


Allan Kardec

"Esperantigis A. K. Afonso Costa
kaj Benedicto Silva"

# LA ĈIELO KAJ LA INFERO

# La Ĉielo kaj la Infero

# La Ĉielo kaj la Infero

aŭ

LA JUSTECO DE DIO LAŬ SPIRITISMO

*Kompara studo de la doktrinoj pri la forpaso de la animo, el la korpa vivo en la spiritan vivon, pri la estontaj punoj kaj rekompencoj, pri la anĝeloj kaj demonoj, pri suferoj ktp, sekvata de nombraj ekzemploj pri la efektiva situacio de la animo dum kaj post la morto.*

de

ALLAN KARDEC

"Kiel Mi vivas – diras la Sinjoro, la Eternulo – Mi deziras ne la morton de malvirtulo, sed ke la malvirtulo deturnu sin de sia vojo kaj restu vivanta". (JEĤEZKEL, 33:11.)

Eldonfako de
BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO
DEPARTAMENTO EDITORIAL E GRÁFICO
*Rua Souza Valente, 17 — 20941 - 040*
*Rio de Janeiro, RJ* — BRAZILO

**1-a eldono en Esperanto**

*5.000 ekzempleroj*

Titolo de la franca originalo:
**LE CIEL ET L' ENFER** ou
LA JUSTICE DIVINE SELON LE SPIRITISME
(Paris, 1865)

El la portugallingva traduko de Manuel Justiniano Quintão esperantigis A. K. Afonso Costa kaj Benedicto Silva

Kovrilo de Cecconi

86-AA; 001.5-O; 5/1981

*Copyrihgt 1979 by*
Federação Espírita Brasileira
(*Brazila Spiritisma Federacio)*
Av. Passos, 30
20051- – Rio de Janeiro, RJ – Brazilo

*Kompostado, fotolitoj kaj ofset-preso de*
*Presejo de la Eldonfako de BSF*
*Rua Souza Valente, 17*
*20941- – Rio de Janeiro, RJ – Brazilo*
*C.G.C. n-ro 33.644.857/0002-84 I.E. n-ro 81.600.503*

Presita en Brazilo
*Impresso no Brasil*

# TABELO DE LA ENHAVO

## UNUA PARTO – DOKTRINO


Ĉap. I: **Estonteco kaj nenio** .................................................... 13

Ĉap. II: **Timo antaŭ la morto** .................................................. 23
Kaŭzoj de la timo antaŭ la morto .................................... 23
Motivo, kial la spiritistoj ĝin ne timas .............................. 28

Ĉap. III: **Ĉielo** .......................................................................... 31

Ĉap. IV: **Infero** .......................................................................... 43
Intuicio pri la estonta punoj .................................................. 43
La kristana infero imitita laŭ la pagana infero ................. 44
Limboj ........................................................................................ 47
Bildo pri la pagana infero ................................................... 48
Skizo de la kristana infero ................................................ 55

Ĉap. V: **Purgatorio** .................................................................... 65

Ĉap. VI: **Doktrino pri la eternaj punoj** .................................. 71
Origino de la doktrino pri la eternaj punoj ....................... 71
Argumentoj favore al la eternaj punoj ............................. 77
Materia neebleco de la eternaj punoj ................................ 81
La doktrino pri la eternaj punoj epokofaris ...................... 84
Jeĥezkel kontraŭ la eternaj punoj kaj la origina peko .......................................................................... 86

Ĉap. VII: **La estontaj punoj laŭ Spiritismo** .......... 89
La karno estas malforta .......... 89
Principoj de la Spiritisma Doktrino pri la estontaj punoj .......... 92
Puna kodo de la estonta vivo .......... 93

Ĉap. VIII: **Anĝeloj** .......... 105
La anĝeloj laŭ la Eklezio .......... 105
Refuto .......... 109
La anĝeloj laŭ Spiritismo .......... 115

Ĉap. IX: **Demonoj** .......... 119
Origino de la kredo je demonoj .......... 119
Demonoj laŭ la Eklezio .......... 123
Demonoj laŭ Spiritismo .......... 135

Ĉap. X: **Interveno de demonoj en la nuntempajn manifestiĝojn** .......... 139

Ĉap. XI: **Pri malpermeso elvoki mortintojn** .......... 159

DUA PARTO – EKZEMPLOJ

Ĉap. I: **La forpaso** .......... 169

Ĉap. II: **Feliĉaj Spiritoj** .......... 177
Sanson .......... 177
La morto de justulo .......... 186
Jobard .......... 187
Samuel Philippe .......... 193
Van Durst .......... 197
Sixdeniers .......... 199
Doktoro Demeure .......... 202
Vidvino Foulon naskita Wollis .......... 207
Rusa kuracisto .......... 215
Bernardin .......... 219
Grafino Paŭla .......... 220

Jean Reynaud ........ 224
Antoine Costeau ........ 228
F-ino Emma ........ 231
Doktoro Vignal ........ 232
Victor Lebufle ........ 235
S-ino Anais Gourdon ........ 237
Maurice Gontran ........ 238

Ĉap. III: **Spiritoj en mezbonaj kondiĉoj** ........ 243
Joseph Bré ........ 243
S-ino Hélène Michel ........ 245
Markizo de Saint-Paul ........ 246
S-ro Cardon, kuracisto ........ 248
Eric Stanislas ........ 253
S-ino Anna Belleville ........ 255

Ĉap. IV: **Spiritoj Suferantaj** ........ 261
Puno ........ 261
Novel ........ 263
Auguste Michel ........ 264
Avertoj de diboĉulo ........ 267
Lisbeth ........ 268
Princo Ouran ........ 272
Pascal Lavic ........ 275
Ferdinand Bertin ........ 276
François Riquier ........ 280
Claire ........ 282

Ĉap. V: **Memmortigintoj** ........ 293
La memmortigintoj el Samaritaine ........ 293
La patro kaj la konskripto ........ 296
François-Simon Louvet ........ 299
Patrino kaj filo ........ 300
Duobla sinmortigo pro amo kaj devo ........ 303

Louis kaj la stebistino de botetoj .................................... 307
Iu ateisto .................................................................................. 310
Félicien ..................................................................................... 316
Antoine Bell ............................................................................... 320

Ĉap. VI: **Pentintaj krimuloj** .................................................. 325
Verger ........................................................................................ 325
Lemaire ...................................................................................... 329
Benoist ....................................................................................... 333
Spirito en Castelnaudary .............................................................. 336
Jacques Latour ............................................................................ 343

Ĉap. VII: **Hardiĝintaj Spiritoj** ................................................ 357
Lapommeray ............................................................................... 357
Angèle, sentaŭgulino sur la Tero .................................................. 363
Unu tedita Spirito ......................................................................... 366
La reĝino de Oude ....................................................................... 368
Xumène ...................................................................................... 371

Ĉap. VIII: **Surteraj elaĉetoj** .................................................... 375
Marcel, la infano el la ĉambro n-ro 4 ............................................. 375
Szymel Slizgol ............................................................................ 378
Julienne-Marie, la almozulino ........................................................ 384
Max, la almozulo ......................................................................... 389
Historio de iu servisto .................................................................. 391
Antonio B ................................................................................... 394
Letil ............................................................................................ 398
Ambicia saĝulo ............................................................................ 400
Charles de Saint-G..., idioto .......................................................... 402
Adélaide-Marguerite Gosse ........................................................... 407
Clara Rivier ................................................................................. 409
Fançoise Vernhes ......................................................................... 412
Anna Bitter .................................................................................. 414
Joseph Maître, la blindulo .............................................................. 417

UNUA PARTO

# DOKTRINO

## ĈAPITRO I

## ESTONTECO KAJ NENIO

1. Ni vivas, pensas kaj laboras — jen kio estas pozitiva. Kaj, ke ni mortos, ne estas malpli certe.

Sed, forlasonte la Teron, kien ni iros? Kio ni estos post la morto? Ĉu ni statos pli bonaj aŭ pli malbonaj? Ĉu ni ekzistos aŭ ne? La *esto* aŭ la *neesto*, jen la alternativo. Ĉiam aŭ neniam; ĉio aŭ nenio: Ĉu ni eterne vivos, aŭ ĉio detruiĝos per unu fojo? Tia estas la tezo sin trudanta.

Ĉiu homo sentas bezonon vivi, ĝui, ami kaj esti feliĉa. Diru al mortanto, ke li vivos plu; ke lia horo estas prokrastata; precipe diru al li, ke li estos pli feliĉa ol li eble iam estis, kaj lia koro ĝojegos.

Kion valorus tiaj aspiroj al feliĉo, se malforta blovo povus ilin disaerigi?

Ĉu ekzistas io pli malesperiga ol tiu penso pri absoluta detruiĝo? Karaj geamatoj, inteligento, progreso, sciaro pene akiritaj ĉio dispecigita, ĉio perdita! Neniel do helpus al ni ĉia klopodo bridi pasiojn, ĉia peno nin klerigi, ĉia sindono al la afero de progreso, se nenion ni profitus el ĉio tio, kiam superregas la penso, ke eble morgaŭ ĉio tio neniel utilus al ni. Se tiel estus, la sorto de la homo fariĝus

centoble pli malbona ol tiu de bruto, ĉar ĉi tiu vivas tute en la estanteco, por kontentigo de siaj materiaj apetitoj, sen aspiro al la estonteco. Sed kaŝita intuicio diras al ni, ke tio ne estas ebla.

2. Pro kredo al nenio homo neeviteble koncentras ĉiujn siajn pensojn sur la nunan vivon.

Oni logike ne klarigus zorgon pri estonteco, kiun oni ne atendas.

Tiu ekskluziva zorgo pri la estonteco igas la homon pli pensi pri si mem prefere al ĉio: ĝi do estas la plej potenca stimulo al egoismo, kaj la nekredanto estas konsekvenca, kiam li venas al la jena konkludo: Ni ĝuu, dum ni ĉi tie estas; ni ĝuu kiel eble plej multe, ĉar kun ni ĉio finiĝas; ni tuj ĝuu, ĉar ni ne scias, kiel longe ni ekzistos.

Ankoraŭ konsekvenca estas tiu alia konkludo, cetere pli grava por la socio: Ni ĝuu malgraŭ ĉio, ni ĉiamaniere ĝuu, ĉiu por si; la feliĉo en ĉi tiu mondo estas de la plej ruza.

Kaj se la homa respekto bridas ne multajn personojn, kia brido eble estos por tiuj, kiuj nenion timas?

Ĉi tiu lastaj kredas, ke homaj leĝoj atingas nur la malkapablajn kaj tial ili uzas sian tutan lertecon ĉe la plej bona rimedo ilin eviti.

Se ekzistas ia *nelogika* kaj kontraŭsocia doktrino, tia ja estas *nihilismo*, kiu rompas la efektivajn ligilojn de solidareco kaj frateco, sur kiuj baziĝas la sociaj interrilatoj.

3. Ni supozu, ke, pro ia ajn cirkonstanco, tuta popolo akiris certecon, ke post ok tagoj, unu monato, aŭ unu jaro ĝi estos ekstermita; ke eĉ ne unu individuo ĝin supervivos, same kiel eĉ ne unu signo pri ĝia ekzistado postrestos: Kion faros tiu kondamnita popolo atendanta ekstermon?

Ĉu ĝi laborus por sia progreso, por sia instruiĝo? Ĉu ĝi sin donus al la vivlaboro? Ĉu ĝi respektus la rajtojn,

la havaĵojn, la vivon de sia similulo? Ĉu ĝi submetiĝus al ia ajn leĝo aŭ aŭtoritato, kiel eble plej justa ĝi estus, eĉ al la patra aŭtoritato?

Ĉu estus por ĝi, en tiu okazo, ia ajn devo?

Certe ne. Nu! Kio kolektive ne fariĝas, tion la doktrino de *nihilismo* ĉiutage realigas izole, individue.

Kaj, se la konsekvencoj ne estas tiel ruinigaj, kiel ili povus esti, estas pro tio, ke unue ĉe la plimulto da nekreduloj ekzistas pli da vanteco ol efektiva nekredemo, pli da dubo ol konvinkiĝo — kaj ili havas pli da timo pri nenio ol kiom ili pretendas ŝajnigi — la kvalifiko fortaj spiritoj flatas iliajn vantecon kaj memamon; due, ke la absolutaj nekreduloj kalkuliĝas al malgrandega malplimulto, kaj ili sentas kun bedaŭro la superecon de la kontraŭa opinio, tenatan de ia materiala forto.

Sed, se la nekredemo fariĝus absoluta por la plimulto, la socio ekruiniĝus.

Jen tio, al kio kliniĝas la doktrino de nihilismo (*).

Kiaj ajn estus ĝiaj konsekvencoj, se ĝi sin altrudus kiel veran, estus necese ĝin akcepti, kaj ne kontraŭaj

---

(*) Unu dekokjara junulo atakita de kormalsano estis deklarita nekuracebla. La Scienco diris: Li povas morti en ok tagoj aŭ en du jaroj, sed post ĉi tiu tempo li plu ne vivos. Sciante tion, la junulo tuj forlasis siajn studojn kaj sin donis al ĉiaspecaj ekscesoj.

Kiam oni lin atentigis pri la danĝero de diboĉa vivo, li respondis: Kio gravas al mi, se mi ne havas pli ol du jarojn da vivo? Kio utilus al mi lacigi la spiriton? Mi ĝuas la malmulton al mi restantan kaj mi volas distri min ĝis la fino. — Jen la logika konsekvenco de **nihilismo**.

Se tiu junulo estus spiritisto, li dirus: La morto nur detruos la korpon, kiun mi postlasos, kiel eluzitan veston, sed mia spirito supervivos. Mi estos en la estonta vivo tio, kion mi mem faras el mi en ĉi tiu vivo; la moralajn kaj intelektajn kvalitojn, kiujn en ĝi mi povos akiri, mi neniom perdos, ĉar ili estos alia ioma gajno por mia progreso; ĉiu neperfektaĵo, de kiu mi liberiĝos, estos plia paŝo al la feliĉo. Mia feliĉo aŭ malfeliĉo dependas de la utileco aŭ malutileco de la nuna ekzistado. Estas do en mia intereso profiti la nelongan tempon al mi restantan kaj eviti ĉion povantan malintensigi miajn fortojn.

Kiu el tiuj doktrinoj estas preferinda?

sistemoj nek penso pri la rezultantaj malbonoj povus bari ĝian ekzistadon. Oni devas diri, ke, malgraŭ la plej bonaj klopodoj de la religio, skeptikeco, dubo, indiferenteco disvatiĝas tagon post tago.

Sed, se la religio montriĝas senpova por bari nekredemon, estas pro tio, ke mankas al ĝi io ĉe la lukto. Se aliflanke la religio sin kondamnus al senmoveco, ĝi estus ruinigita post kelka tempo.

Kio mankas al ĝi en ĉi tiu jarcento de pozitivismo, en kiu oni penas prefere kompreni ol kredi, tio sendube estas la konfirmo de ĝiaj instruoj per pozitivaj faktoj, kaj ankaŭ ilia akordo kun la pozitivaj informoj de la Scienco. Kiam la religio diras, ke io estas blanka, kaj la faktoj diras, ke ĝi estas nigra, tiam estas necese, ke oni elektu inter evidenteco kaj blinda fido.

4. Pro ĉi tiuj cirkonstancoj Spiritismo venas por starigi baron kontraŭ disvastiĝo de nekredemo, ne nur per rezono, ne nur per antaŭvido de danĝeroj, kiujn ĝi kuntrenas, sed ankaŭ per materiaj faktoj, farante videblaj kaj tuŝeblaj la animon kaj la estontan vivon.

Ni ĉiuj estas liberaj por elekti niajn kredojn; ni povas kredi ion aŭ nenion, sed tiuj, kiuj penas teni en la spirito de la amasoj, ĉefe en tiu de la junularo, la neadon pri estonteco, apogante sin al la aŭtoritato de sia sciaro kaj al la altrangeco de sia pozicio, dissemas en la socion ĝermojn de konfuzo kaj ruinigo, prenante sur sin grandan respondecon.

5. Ekzistas ia doktrino, kiu sin defendas kontraŭ la makulo, ke ĝi estas materialisma, ĉar ĝi akceptas ian inteligentan principon ekster la materio: ĝi estas tiu pri *ensorbiĝo en la Universan Tuton*.

Laŭ ĉi tiu doktrino, ĉiu homo, kiam li naskiĝas, asimilas parton de tiu principo, kiu fariĝas lia animo kaj donas al li vivon, inteligenton kaj senton.

Post la morto tiu animo revenas al la komuna fokuso kaj perdiĝas en la senfino, kiel guto da akvo en oceano.

Nekontesteble ĉi tiu doktrino faris paŝon pli antaŭen ol la pura materialismo, ĉar ĝi akceptas ion, dum materialismo akceptas nenion. Sed la konsekvencoj estas ĝuste samaj.

Al la homo estas same, ke li estas droninta en nenio aŭ en la komuna ujego; ekstermite aŭ perdinte sian individuecon estas tiel same, kvazaŭ li ne ekzistus; tial la sociaj interrilatoj nepre rompiĝas, kaj por ĉiam.

Por li, esenca estas la konservado de lia *memo*; sen ĉi tiu, kio gravas al li postvivi aŭ ne?

Estonteco ŝajnas al li ĉiama nenio, kaj la nuna vivo estas la sola afero, kiu lin interesas kaj okupas.

El la vidpunkto pri la moralaj konsekvencoj ĉi tiu doktrino do estas tiel senprudenta, tiel malesperiga, tiel ruiniga, kiel materialismo mem.

6. Krom tio, oni povas fari ĉi tiun kontraŭdiron: ĉiuj gutoj da akvo prenitaj el oceano similas unu la aliajn kaj posedas identajn propraĵojn, kiel partoj de ia sama tuto; kial do la animoj prenitaj el la granda oceano da universa inteligento tiel malmulte similas unu la aliajn? Kial genio kaj krudeco, la plej sublimaj virtoj kaj la plej malnoblaj malvirtoj? Kial boneco, dolĉeco, mildeco apude de malico, krueleco, barbareco? Kiel povas esti tiel malsamaj inter si la partoj de ia sama homogena tuto? Ĉu oni dirus, ke edukado ilin ŝanĝas? En ĉi tiu okazo, el kie venas la denaskaj kvalitoj, la frumaturaj inteligentoj, la bonaj kaj malbonaj instinktoj sendependaj de ĉia edukado kaj multfoje malakordantaj kun la medio, en kiu ili disvolviĝas?

Ne estas dubo, ke edukado modifas la intelektajn kaj moralajn kvalitojn de la animo; sed ĉi tie estas alia malfacilaĵo: Kiu donas al la animo edukadon por fari ĝin progresi? Aliaj animoj, kiuj pro sia komuna origino, ne povas esti pli progresintaj. Krom tio, ree enirante en la Universan Tuton, el kiu ĝi eliris, kaj progresinte dum sia vivo, la animo portas al ĝi ian elementon pli perfektan. El tio oni konkludas, ke pro sia kontinueco, tiu Tuto

troviĝus profunde modifita kaj plibonigita. Tiele, kiel do oni klarigu la senĉesan eliron de nesciaj kaj malicaj animoj el tiu Tuto?

7. Laŭ ĉi tiu doktrino, la universa fonto de inteligento, kiu liveras la homan animon, estas sendependa de Dio; ĝi ne estas ĝuste *panteismo*.

*Panteismo* ĝustadire konsideras la universan principon de vivo kaj de inteligento, kiel Dion mem. Dio estas samtempe Spirito kaj materio; ĉiuj estuloj, ĉiuj korpoj en la Naturo formas Dion, kies molekuloj kaj konsistigaj elemetoj ili estas; Dio estas la tuto de ĉiuj inteligentoj kunigitaj; ĉiu homo, estante parto de la tutaĵo, estas Dio mem; neniu supera kaj sendependa estulo regas la tutaĵon; la Universo estas grandega respubliko sen estro, aŭ prefere, kie ĉiu estas estro kun absoluta povo.

8. Kontraŭ ĉi tiu sistemo oni povas prezenti nombrajn opiniojn, el kiuj la ĉefaj estas la jenaj: se oni povas koncepti diecon sen senfina perfekto, oni demandas, kiel ia perfekta tuto povas esti formita el partoj tiel neperfektaj, kun bezono progresi? Ĉar ĉiu parto estas submetita al la leĝo de progreso, ni konsentu, ke Dio mem devas progresi; kaj se Li konstante progresas, Li eble estis, en la origino de la tempoj, tre malperfekta.

Kaj kiel povas ia malperfekta estulo, formita el ideoj tiel malsamaj, koncepti leĝojn tiel harmoniajn, tiel admirindajn je unueco, saĝeco kaj antaŭzorgo, kiel tiuj regantaj la universon? Se ĉiuj animoj estas porcioj de Dio, ĉiuj kunhelpas por la leĝoj de la naturo; kiel do okazas, ke ili plendas senĉese kontraŭ tiuj leĝoj, kiujn ili mem faris? *Unu teorio nur povas esti akceptata kiel vera, se ĝi kontentigas la racion kaj klarigas ĉiujn faktojn, kiujn ĝi ampleksas; se nur unu fakto ĝin malkonfirmas, ĝi do jam ne enhavas la absolutan veron.*

9. El la morala vidpunkto ankaŭ la konsekvencoj estas nelogikaj. Unue, kiel en la antaŭa sistemo, la animoj ensorbiĝas en la tuton kaj perdas sian individuecon. Se

oni konsentas, laŭ la opinio de kelkaj panteistoj, ke la animoj konservas sian individuecon. Dio ne havus unikan volon, ĉar ĝi estus kuniĝo de miriadoj da malsamaj voloj.

Krom tio, ĉar ĉiu animo estas kompletiga parto de Dio, ĝi ne estas regata de ia supera povo; ĝi ne respondas por siaj bonaj aŭ malbonaj agoj; suverena, sen ia intereso praktiki bonon, ĝi senpune povas praktiki malbonon.

10. Cetere ĉi tiuj sistemoj ne kontentigas la homan racion nek la homan aspiron; el ili venas nesupereblaj malfacilaĵoj, ĉar ili estas senpovaj por solvi ciujn demandojn, kiujn ili efektive naskas. *La homo do havas tri alternativojn: la nenion, la ensorbiĝon aŭ la individuecon de la animo antaŭ kaj post la morto.*

Al ĉi tiu lasta kredo nin ja pelas nerezisteble la logiko, kredo formanta la bazon de ĉiuj religioj, de kiam la mondo ekzistas.

Kaj se la logiko nin kondukas al la anima individueco, ĝi ankaŭ montras al ni ĉi tiun alian konsekvencon: la sorto de ĉiu animo devas dependi de siaj personaj kvalitoj, ĉar estus neracie konsenti, ke la neprogresinta animo de sovaĝulo, kiel tiu de la malica homo, estus sur la sama nivelo de tiu de saĝulo, de tiu de bona homo. Laŭ la principoj de justeco, la animoj devas respondi por siaj agoj, sed por havi tiun respondecon, estas necese, ke ili estu liberaj elekti inter bono kaj malbono; sen libera volo ekzistas fatalo, kaj fatalo ne kunekzistus kun respondeco.

11. Ĉiuj religioj same akceptas la principon de feliĉo aŭ malfeliĉo de la animo post la morto, aŭ alivorte la estontajn punojn kaj ĝuojn, kiuj estas la doktrino pri ĉielo kaj infero ĉie trovata.

Ili esence diferencas en la naturo de tiuj punoj kaj ĝuoj, *precipe* per la kondiĉoj okazigantaj unujn kaj aliajn.

El tio venas la kontraŭantaj punktoj de fido kaŭzantaj la malsamajn kultojn, kaj la devojn sinsekve trudatajn de ili por honori Dion kaj atingi per tiu rimedo ĉielon, kaj eviti inferon.

12. En sia origino, ĉiuj religioj devis esti rilataj al la grado da morala kaj intelekta disvolviĝo de la homoj: ĉi tiuj, tro materiiĝintaj por kompreni la meriton de la pure spiritaj aferoj, konsistigis la plimulton de la religiaj devoj en la plenumado de eksteraj formuloj.

Tre longe tiuj formuloj kontentigis ilian racion; sed poste, ĉar fariĝis lumo en ilia spirito, sentante la malplenon de tiuj formuloj, kiun la religio ne plenigis, ili ĝin forlasis kaj fariĝis filozofoj.

13. *Se la religio, komence konforma al la limigitaj konoj de la homo, ĉiam estus akompaninta la progresan movon de la homa spirito, ne ekzistus nekreduloj, ĉar en la propra naturo de la homo troviĝas la bezono kredi, kaj li kredos, se nur oni donos al li la spiritan panon harmonie kun liaj intelektaj bezonoj.*

La homo volas scii, el kie li venis kaj kien li iras. Se oni montras al li celon, kiu ne respondas al liaj aspiroj nek al la ideo, kiun li faras pri Dio, nek al la pozitivaj donitaĵoj, kiujn la Scienco liveras al li; cetere se oni altrudas al li, ke li atingu sian aspiron, kondiĉojn, kies utilecon lia racio malkonfesas, li ĉion malakceptas; materialismo kaj panteismo ŝajnas al li pli raciaj, ĉar per ili almenaŭ oni rezonas kaj diskutas, kvankam false. Kaj prave, prefere false rezoni ol absolute ne rezoni.

Oni prezentu al la homo ian kondiĉe logikan estontecon tute indan je la grandeco, justeco kaj boneco de Dio, tiam li forpelos materialismon kaj panteismon, kies malplenon li sentas en sia animo, kaj kiujn li akceptos pro manko de pli bona kredo.

Spiritismo donas ion pli bonan; jen kial ĝi estas tuj akceptata de ĉiuj turmentataj de dubo, de ĉiuj, kiuj ne trovas en la vulgaraj kredoj kaj filozofioj tion, kion ili serĉas. Spiritismo havas per si mem la logikon de rezono kaj la konfirmon de la faktoj, kaj tial oni senutile ĝin kontraŭbatalas.

14. La homo instinkte kredas al la estonteco, sed, ne posedante ĝis nun ian firman bazon por ĝin difini, lia

imagpovo fantaziis la sistemojn, kiuj estigis la diversecon de kredoj. La Spiritisma Doktrino pri la estonteco — ne estante la imagverko pli-malpli arte konstruita, sed la rezultado de observado de la materiaj faktoj, kiuj hodiaŭ disfaldiĝas antaŭ nia vido — harmoniigos, kiel jam okazas, la diverĝajn aŭ ŝanĝiĝemajn opiniojn kaj grade faros pro forto de la aferoj la unuiĝon de kredoj pri tiu punkto, bazitan jam ne sur simplaj hipotezoj, sed sur certeco. *Unueco de kredo rilate la estontan destinon de la animoj estos la unua punkto de kontakto de la diversaj kultoj, estos ja grandega paŝo por religia toleremo, kaj poste por la kompleta kunfandiĝo.*

## ĈAPITRO II

## TIMO ANTAŬ LA MORTO

*Kaŭzoj de la timo antaŭ la morto. Motivo, kial la spiritistoj ĝin ne timas*

### Kaŭzoj de la timo antaŭ la morto

1. Kiu ajn estas la grado de lia socia pozicio, ekde sia sovaĝeco, la homo havas la kunnaskitan senton pri la estonteco; la intuicio diras al li, ke la morto ne estas la lasta stadio de la ekzistado, kaj ke tiuj, pri kies perdo ni bedaŭras, ne estas ja perditaj por ĉiam.

La kredo al la senmorteco estas intuicia kaj multe pli ĝeneraliĝinta ol tiu al la nenio. Sed la plimulto de tiuj, kiuj kredas al la nenio, troviĝas antaŭ ni kvazaŭ posedataj de granda amo al la surteraj aferoj kaj timantaj la morton! Kial?

2. Tiu timo estas rezultado de la saĝa Providenco kaj sekvo de la instinkto de memkonservado komuna al ĉiuj vivantaj estaĵoj. Ĝi estas necesa dum oni ne estas sufiĉe instruita pri la kondiĉoj de la estonta vivo, kiel kontraŭpezo de la inklino, kiu, sen tiu brido, igus nin pli frue forlasi la vivon kaj neglekti la surteran laboron, kiu devas servi al nia propra progreso.

Tiamaniere, ĉe la primitivaj popoloj la estonteco estas ia nepreciza intuicio, pli malfrue fariĝinta simpla espero kaj fine ia certeco nur malpliigita de la kaŝita alkroĉiĝo al la korpa vivo.

3. Laŭmezure kiel la homo plibone komprenas la estontan vivon, malpliiĝas la timo antaŭ la morto; post kiam klariĝas lia surtera misio, li trankvile, rezignacie kaj serene atendas ĝian finon. La certeco pri la estonta vivo donas alian direkton al liaj ideoj, alian celon al lia laboro; antaŭ tiu certeco ĉio ligiĝis al la estanteco; post ĝi ĉio al la estonteco, sen malŝato al la estanteco, ĉar li scias, ke tiu dependas de la bona aŭ malbona direkto donita al ĉi tiu.

La certeco renkonti siajn amikojn post la morto, restarigi la interrilatojn, kiujn li havis sur la Tero, ne perdi eĉ unu frukton de sia laboro, senĉese altiĝi en intelekto kaj perfekteco, donas al li paciencon por esperi kaj kuraĝon por elporti la nedaŭrajn surterajn laciĝojn. La solidareco inter vivantoj kaj mortintoj igas lin kompreni la solidarecon, kiu devas ekzisti sur la Tero, kie frateco kaj karitato de tiam havas celon kaj pravon de ekzisto, tiel en la nuneco, kiel en la estonteco.

4. Por liberiĝi de la timo antaŭ la morto, estas necese povi rigardi ĉi tiun el la vera vidpunkto, t.e. penetri per la penso en la spiritan mondon kaj fari pri ĝi ian ideon kiel eble plej ĝusta, kio evidentigas tian aŭ alian progreson de la enkarniĝinta Spirito kaj ties kapablon malligiĝi de la materio.

Ĉe la neprogresema Spirito la materia vivo superas la spiritan. Pro la ŝajnoj la homo ne distingas la vivon ekster la korpo, kvankam la reala vivo kuŝas en la animo; neniigita tiu, al li ĉio ŝajnas perdita, senespera.

Kontraŭe, se ni koncentrus la penson ne sur la korpon, sed sur la animon, fonton de la vivo, realan estaĵon, kiu ĉion postvivas, ni malpli bedaŭrus la perdon de la korpo, kiu prefere estas fonto de suferoj kaj doloroj. Sed por tio la homo bezonas ian forton haveblan nur en la maturaĝo.

La timo antaŭ la morto do venas de la nesufiĉa scio pri la estonta vivo, kvankam ĝi montras la bezonon vivi kaj teruron al tuta detruiĝo; ĝi ankaŭ stimulas la kaŝitan

deziregon je la postvivado de la animo, vualitan ankaŭ per necerteco.

Tiu timo malpliiĝas laŭproporcie kiel la certeco pliiĝas, kaj malaperas, kiam ĉi tiu estas kompleta.

Jen estas la providenca flanko de la demando. Homon nesufiĉe instruitan, kies kompreno apenaŭ elportus la tre pozitivan kaj allogan perspektivon pri ia pli bona estonteco, estus prudente ne ekblindigi per tia ideo, konsiderante, ke per ĝi li povus neglekti la nunecon necesan por lia materia kaj intelkta progreso.

5. Tiu stato de la aferoj estas tenata kaj daŭrigata de kaŭzoj pure homaj, kiujn la progreso forigos. La unua el ili estas la aspekto per kiu oni kredigas la estontan vivon, aspekto, kiu povus kontentigi la malmulte progresintajn intelektojn, sed kiu ne sukcesus kontentigi la instruitan intelekton de la saĝaj pensuloj. Tiel, ĉi tiuj diras: "Se oni prezentas al ni, kiel absolutajn veraĵojn, nur principojn kontraŭdiratajn de la logiko kaj de la pozitivaj elementoj de la Scienco, ili ne estas ja veraj." El tio venas la nekredemo de unuj kaj la duba kredemo de granda nombro da aliaj.

Por ili la estonta vivo estas ia nepreciza ideo, pli ĝuste ia probablaĵo ol absoluta certeco; ili kredas, ili deziras, ke ĝi estus tia, sed malgraŭ tio, ili ekkrias: "Kaj se ĝi ne estos tia! La nuno estas pozitiva; ni zorgu unue pri ĝi, ĉar la estonteco siavice venos."

Kaj cetere kio definitive estas la animo? — ili demandas. Ĉu ia punkto, ia atomo, ia fajrero, ia flamo? Kiel oni ĝin sentas, vidas aŭ perceptas? La animo ja ne ŝajnas al ili ia efektiva realaĵo, sed ia abstraktaĵo.

Iliaj karaj estuloj, reduktitaj al la stato de atomo, laŭ ilia pensmaniero, estas perditaj kaj ne plu havas antaŭ iliaj okuloj la ecojn, per kiuj ili fariĝis amataj de ili; ili ne kapablas kompreni la amon de fajrero nek tiun amon, kiun ni povas dediĉi al ĝi. Rilate al si mem, ili restas meze kontentaj pro la perspektivo, ke ili ŝanĝiĝos mem en monadojn. Tiamaniere, praviĝas ilia prefero por

la pozitivismo de la surtera vivo, kiu posedas ion pli substancan.

Tre granda estas la nombro da homoj regataj de ĉi tiu penso.

6. Alia kaŭzo de alkroĉiĝo al la surteraj aferoj, eĉ ĉe tiuj plej firme kredantaj al la estonta vivo, estas la impreso el la instruo, kiun pri tiu vivo oni donas al ili ekde la infanaĝo. Ni konsentu, ke la bildo skizita de la religio, pri la afero, estas neniom alloga kaj ankoraŭ malpli konsola.

De unu flanko, tordiĝoj de estuloj kondamnitaj elpagi en torturoj kaj eternaj flamoj la pekojn faritajn en vivo nedaŭra kaj forpasema. Jarcentoj sekvas jarcentojn, kaj por tiaj malfeliĉuloj ne estas eĉ la konsolo de ia espero, kaj, kio estas pli kruela, la pento ne donas al ili profiton. Aliflanke, la malvigligitaj kaj afliktitaj animoj en la purgatorio atendas la intervenon de la vivantoj, kiuj preĝos aŭ igos preĝi por ili, nenion farante por progresi per sia propra klopodo.

Tiuj du kategorioj konsistigas la grandegan plimulton de la transtomba loĝantaro. Super ĝi troviĝas la klaso de la elektitoj, ĝuanta siavice la kontemplan beatecon por la tuta eterneco. Tiu eterna neutileco sendube pli preferinda ol la nenio, ne povas ne esti ia enua monotoneco. Ĝuste tial oni vidas en la bildoj pri feliĉuloj anĝelajn figurojn, ĉe kiuj la enuo vidiĝas pli multe ol la vera feliĉo.

Tia stato kontentigas nek la aspirojn nek la instinktan ideon pri progreso, la solan, kiu montriĝas akordigebla kun la absoluta feliĉo. Estas malfacile kredi, ke, nur pro tio, ke li estas baptita, la malklera sovaĝulo — kun obtuza morala kompreno — estas sur la sama nivelo de homo atinginta, post longaj jaroj da laboro, la plej altan gradon da praktikaj scio kaj moraleco. Ankoraŭ malpli komprenebla estas ja la fakto, ke infano mortinta en frua aĝo, antaŭ ol havi konsciencon pri siaj faroj, ĝuu la samajn privilegiojn, pro nur ia ceremonio, kiun ĝia volo mem neniel partoprenis. Tiu rezonado ne povas ne mal-

trankviligi la plej fervorajn kredantojn, kiom ajn malmulte ili meditas.

7. Se la estonta feliĉo ne dependas de la progresa surtera laboro, la facileco, kun kiu oni kredas akiri tian feliĉon per iaj eksteraj praktikoj, kaj la ebleco ĝin eĉ aĉeti per mono, sen regenerado de karaktero kaj moroj, plej multe valorigas la mondoĝuojn.

Pli ol unu kredanto konsideras, en sia interna tribunalo, ke, asekurante sian estontecon per la plenumo de certaj formuloj aŭ per postmortaj donacoj, kio ja senigas lin je nenio, estus necese trudi al si oferojn aŭ iujn ajn malagrablaĵojn por aliulo, ĉar ĉiu aparte sukcesas atingi la propran savon per sia laboro.

Sendube ne ĉiuj pensas tiamaniere, kaj ekzistas multaj kaj honoraj esceptoj; sed oni ne povas nei, ke tiele pensas la plimulto, precipe tiuj el la malmulte instruitaj hom-amasoj, kaj ke ilia ideo pri la feliĉo en alia mondo ne enhavas la estimon al la ĉi-mondaj havaĵoj, estimon, kiu ekscitas la egoismon.

8. Ni aldonu plu la cirkonstancon, ke ĉiuj kutimoj kontribuas por bedaŭri la perdon de la surtera vivo kaj timi la transiron de sur la Tero en la ĉielon. La morto estas ĉirkaŭata de funebraj ceremonioj, pli adekvataj por kaŭzi teruron ol por naski esperon. Se oni priskribas la morton, tion oni faras donante al ĝi abomenindan aspekton, sed neniam tiun de transira dormo; ĉiuj ĝiaj emblemoj memorigas pri detruado de la korpo, montrante ĝin terurega kaj senkarna; neniu prezentas la animon lumradie liberiĝanta el la surtera katenoj. La foriro al tiu pli feliĉa mondo estas akompanata nur de la lamentado de la postvivantoj, kvazaŭ ia grandega malfeliĉo atingas la forirantojn; al ĉi tiuj oni diras eternajn adiaŭojn, kvazaŭ oni neniam ilin revidos plu. En ilia nomo oni bedaŭras la perdon de la mondaj ĝuoj, kvazaŭ pli agrablajn ĝuojn ili ne renkontos en la transtombo. Kia malfeliĉo, ili diras, estas morti tiel juna, riĉa kaj feliĉa, kun la perspektivo de ia brila estonteco! La ideo pri ia pli bona estonteco apenaŭ

tuŝas la penson, ĉar ĝi ne havas radikojn tie. Tiamaniere ĉio kontribuas por inspiri teruron antaŭ la morto, anstataŭ estigi esperon.

Sendube longa tempo estos necesa al la homo, por ke li liberiĝu de tiuj antaŭjuĝoj, kio ne signifas, ke tio ne okazos, laŭmezure kiel lia kredo firmiĝos, ĝis li konceptos pli saĝan penson pri la spirita vivo.

9. Cetere la vulgara kredo metas la animojn en regionojn nur alireblajn por la penso, kie ili fariĝas iel fremdaj al la vivantoj; la Eklezio mem metas inter unuj kaj aliaj ian netransireblan baron, deklarante rompitaj ĉiujn interrilatojn kaj neebla ĉian komunikiĝon. Se la animoj estas en la infero, perdita do estas ĉia espero revidi ilin, escepte se oni ankaŭ iros tien; se ili troviĝas inter la elektitoj, ili vivas tute absorbitaj ĉe kontempla beateco. Ĉi tio intermetas inter mortintoj kaj vivantoj tiel grandan distancon, ke ĝi supozigas, ke estas eterna la disiĝo, kaj estas ja pro tio, ke multaj preferas havi ĉe si, kvankam suferantaj, siajn estulojn, ol vidi ilin foriri, eĉ al la ĉielo.

Ĉu la animo en la ĉielo estos ja feliĉa, vidante ekzemple *sian infanon, sian patron, sian patrinon aŭ siajn geamikojn* eterne brulantaj?

## Motivo, kial la spiritistoj ne timas la morton

10. La Spiritisma Doktrino profunde ŝanĝas la perspektivon de la estonteco. La estonta vivo ĉesas esti ia hipotezo, por fariĝi realaĵo. La postmorta stato de la animoj ne estas plu ia sistemo, sed rezulto de observado. La vualo leviĝis; la spirita mondo ekaperas al ni en la tuteco de sia praktika realo; ne la homoj malkovris ĝin per la penado de ia potenca koncepto, sed la loĝantoj mem de tiu mondo venas priskribis al ni sian situacion; tie ni vidas ilin en ĉiuj gradoj de la spirita skalo, en ĉiuj stadioj de feliĉo kaj de malfeliĉo, fine en ĉiuj sortoŝanĝoj de la transtomba vivo. Jen la motivo, kial la spiritistoj trankvile rigardas la morton kaj fariĝas serenaj en siaj

lastaj momentoj sur la Tero. Jam ne nur la espero, sed ankaŭ la certeco ilin konsolas; ili scias, ke la estonta vivo estas daŭrigo de la surtera vivo, en pli bonaj kondiĉoj, kaj ili atendas ĝin, kun tiu sama konfido, kun kiu ili atendus la sunleviĝon post tempesta nokto. La kaŭzoj de tiu konfido ankaŭ venas de la atestitaj faktoj kaj de la akordiĝo de tiuj faktoj kun la logiko, kun la justeco kaj boneco de Dio, respondantaj al la intimaj aspiroj de la homaro.

Por la spiritistoj la animo ne estas ia abstraktaĵo; ĝi havas eterecan korpon, kiu ĝin difinas al la penso, kio estas multo por fiksi la ideojn pri ĝiaj individueco, kapabloj kaj perceptoj. La memoro pri tiuj, kiuj estas al ni karaj, kuŝas sur io reala. Ili ne plu prezentiĝas al ni, kiel estingiĝantaj flamoj, nenion parolantaj al nia penso, sed sub konkreta formo, pli klare montranta ilin al ni, kiel vivantajn estulojn. Krome, anstataŭ esti perditaj en la profundegaĵo de la Spaco, ili troviĝas ĉirkaŭ ni; la korpa mondo kaj la spirita mondo identiĝas en ĉiamaj interrilatoj, reciproke sin helpante.

Ĉar dubo pri la estonteco ne estas plu permesebla, malaperas la timo antaŭ la morto; ĝia alproksimiĝo estas rigardata malvarmsange, kiel iu, kiu atendas sian liberiĝon tra la pordo al la vivo, kaj ne tra tiu al la nenio.

# ĈAPITRO III

## ĈIELO

1. La vorto ĉielo ordinare nomas la senfinan spacon, kiu ĉirkaŭas la Teron, kaj pli speciale la parton super nia horizonto. Ĝi devenas de la latina vorto *cœlum*, formita el la grekalingva *coilos*, konkava, ĉar ĉielo ŝajnas grandega konkavaĵo.

La antikvuloj kredis al ekzisto de multaj ĉieloj supermetitaj, el solida kaj travidebla materio, formantaj samcentrajn sferojn kun la Tero en la centro.

Rivoluante ĉirkaŭ la Tero, tiuj sferoj kuntrenis la astrojn troviĝantajn en ilia volbo.

Tiu ideo, rezultinta el manko de astronomiaj konoj, estis tiu de ĉiuj teogonioj, kiuj faris el la ĉieloj, tiel ordigitaj, la plurajn ŝtupojn de feliĉo: la lasta el ili estis ŝirmejo de la superega feliĉo.

Laŭ la plej ĝenerala opinio ekzistis sep ĉieloj kaj de tio venas la frazo — *esti en la sepa ĉielo* — uzata por esprimi plenan feliĉon. La islamanoj rekonas naŭ ĉielojn, en ĉiu el ili pligrandiĝas la feliĉo de la kredantoj.

La astronomo Ptolomeo (*) kalkulis dek unu kaj nomis la lastan Empireo (**) pro la brila lumo en ĝi reganta.

---

(*) Ptolomeo vivis en Aleksandrio, Egiptujo, en la dua jarcento de la kristana erao

(**) El la greka lingvo, **pur** aŭ **pyr**, fajro.

Ĉi tio ankoraŭ estas la poezia nomo donita al la loko de la eterna gloro. La kristana teologio rekonas tri ĉielojn: la unuan, kiu estas la regiono de aero kaj nuboj; la duan, kiu estas la spaco, en kiu ĉirkaŭiras la astroj; kaj la trian, trans ĉi tiu, kiu estas la loĝejo de la Plejalta, la restadejo de tiuj, kiuj vidalvide Lin rigardadas. Laŭ ĉi tiu kredo oni diras, ke Sankta Paŭlo estis altigita al la tria ĉielo.

2. Koncerne la paradizon la diversaj doktrinoj apogas sin al la duobla eraro rigardi la Teron, kiel centron de la Universo, kaj kiel limigitan la regionon de la astroj.

Trans tiun imagan limon ĉiuj ja lokis la feliĉan loĝejon kaj la restadejon de la Ĉiopova.

Nevulgara anomalio lokanta la Aŭtoron de ĉiuj aferoj, Tiun, kiu regas ilin ĉiujn, sur la randojn de la Kreitaĵaro, anstataŭ en ĝian centron, de kie lia penso, disradiante, povus ĉion ampleksi!

3. La Scienco kun la nekontestebla logiko de la observado kaj de la faktoj portis sian torĉon ĝis la profundegaĵoj en la Spaco kaj montris la vanecon de ĉiuj tiuj teorioj.

La Tero ne estas plu la akso de la Universo, sed unu el la plej malgrandaj astroj rondirantaj en la spacego; la Suno mem estas nenio alia ol la centro de kirlo da planedoj; la steloj estas tiom da aliaj sennombraj sunoj, ĉirkaŭ kiuj rivoluas nekalkuleblaj mondoj, apartigitaj per distancoj nur percepteblaj por la penso, kvankam ili ŝajnas al ni sin tuŝantaj. En tiu grandioza tuto, regata de eternaj leĝoj — rivelantaj la saĝecon kaj la ĉiosciencon de la Kreinto —, la Tero estas nenio alia ol neperceptebla punkto kaj unu el la malplej favorataj planedoj koncerne loĝeblecon. Kaj tiel estas logike demandi, kial Dio faris el la Tero la solan sidejon de la vivo kaj sur ĝin ekzilis siajn pli amatajn kreitojn? Sed kontraŭe ĉio anoncas la vivon ĉie kaj la homaro estas senfina, kiel la Universo.

Se la Scienco rivelis al ni mondojn similajn al nia, Dio do ne kreis ilin sen ia celo, prefere loĝatigis ilin per estuloj kapablaj ilin direkti.

4. La ideoj de la homo estas proporciaj al tio, kion li scias; kiel ĉiuj gravaj eltrovoj, tiu de la formado de la mondoj devus doni al tiuj ideoj alian direkton; sub la influo de la novaj konoj, la kredoj sin modifis; la Ĉielo estis delokita kaj la stela regiono, estante senlima, ne povis esti plu ĝia sidejo. Kie do ĝi estas? Kaj antaŭ tiu demando ĉiuj religioj mutiĝas.

Spiritismo venas ĝin solvi, montrante la efektivan destinon de la homo. Prenante, kiel bazon, lian naturon kaj la diajn atributojn, oni venas al ia konkludo; alivorte, irante de konataĵo, oni atingas nekonataĵon per konkluda logiko, ne parolante pri la rektaj observoj, kiujn Spiritismo ebligas.

5. La homo konsistas el korpo kaj Spirito: Spirito estas la ĉefa, racia, inteligenta estaĵo; korpo estas la materia envolvaĵo, kiu nedaŭre vestas Spiriton por plenumo de lia misio sur la Tero kaj realigo de la laboro necesa al lia progreso. Korpo eluzita detruiĝas kaj la Spirito postvivas ĝian detruiĝon. Senigite je sia Spirito, la korpo estas nur inerta materio, kiel instrumento senigita je sia reala risorto de funkcio; sen korpo, la Spirito estas ĉio: vivo, inteligento. Forlasinte sian korpon, li revenas en la spiritan mondon, kie li restas por poste reenkarniĝi.

Ekzistas do du mondoj: la *korpa*, konsistanta el enkarniĝintaj Spiritoj; kaj la *spirita*, konsistanta el elkarniĝintaj Spiritoj. La estaĵoj de la korpa mondo, pro la materieco mem de sia envolvaĵo, estas katenitaj al la Tero aŭ al ia ajn globo; la spirita mondo montriĝas ĉie, ĉirkaŭ ni kaj en la Spaco sen ia difinita limo. Pro la fluideca naturo mem de sia envolvaĵo, anstataŭ pene delokiĝi sur grundo, la estuloj konsistigantaj la spiritan mondon transiras distancojn kun la rapideco de la penso.

La morto de la korpo estas nenio alia, ol rompiĝo de la ligiloj, kiuj tenis ilin malliberigitaj.

6. La Spiritoj estas kreataj simplaj kaj sensciaj, sed dotitaj per kapabloj koni ĉion kaj progresi pro sia libera volo. Kun la progreso ili akiras novajn konojn, novajn kapablojn, novajn perceptojn kaj sekve novajn ĝuojn nekonatajn al la malsuperaj Spiritoj; ili vidas, aŭdas, sentas kaj komprenas tion, kion la neprogresintaj Spiritoj ne povas vidi, senti, aŭdi aŭ kompreni.

*La feliĉo estas rekte proporcia al la realigita progreso, tiel ke, el du Spiritoj unu povas ne esti tiel feliĉa, kiel la dua, nur pro tio, ke li ne posedas la saman intelektan kaj moralan progreson, kaj nenecese estas, ke por tio, ĉiu devu resti sur distingita loko.* Kvankam kunaj, unu tamen povas esti en mallumo, dum ĉio brilas por la dua, kiel okasas al blindulo kaj vidanto kun mano en mano: ĉi tiu vidas lumon, de kiu tiu ne spertas minimuman impreson.

*La feliĉo de la Spiritoj estas propra al iliaj kvalitoj, ili ĉerpas ĝin ĉie, kie ili troviĝas, ĉu sur la supraĵo de la Tero, inter la enkarnuloj, ĉu en la Spaco.*

Ia vulgara komparo komprenigas pli bone tiun situacion. Se du homoj troviĝus ĉe koncerto, unu, lerta muzikisto kun edukita aŭdokapablo, kaj dua, nekonanta muzikon, kun malmute delikata aŭdokapablo, la unua spertus senton de feliĉo, dum la dua restus nesentema, ĉar unu komprenas kaj sentas tion, kio nenian impreson donas al la dua. Tiel okazas, rilate ĉiujn ĝuojn, al la Spiritoj, kiuj estas en konforma grado da sentemo.

*La spirita mondo havas lumojn ĉie, harmoniojn kaj ĝuojn, pri kiuj la malsuperaj Spiritoj, submetitaj al la influo de la materio, eĉ ne pensas, kaj kiuj estas senteblaj nur por la puraj Spiritoj.*

7. La progreso de la Spiritoj estas frukto de ilia propra laboro; sed, ĉar ili estas liberaj, ili laboras por sia progreso kun pli aŭ malpli granda aktiveco, kun pli

aŭ malpli da neglekto laŭ sia volo, rapidigante aŭ haltigante la progreson, kaj sekve sian propran feliĉon.

Dum iuj rapide antaŭeniras, aliaj malvigliĝas, kiel malkuraĝuloj en la malsuperaj vicoj. Ili estas do la konstruantoj de sia propra situacio, feliĉa aŭ malfeliĉa, laŭ ĉi tiu frazo de la Kristo: — *Al ĉiu laŭ liaj faroj*[(*)].

La neprogresinta Spirito ne povas plendi, krom pri si mem, kaj tiu antaŭeniranta havas la ekskluzivan meriton de sia klopodo, kaj tial li donas pli grandan valoron al la konkerita feliĉo.

La superega feliĉo estas partoprenata nur de la perfektaj Spiritoj, aŭ, alivorte, de la puraj Spiritoj, kiuj sukcesas atingi ĝin nur post kiam ili progresis je intelekto kaj moraleco.

La intelekta progreso kaj la morala progreso malofte iras kune, sed tion, kion Spirito ne akiras en ia tempo, li atingas en alia, tiel ke la du progresoj fine venos sur la saman nivelon.

Jen kial oni ofte vidas homojn, kvankam inteligentajn kaj instruitajn, tamen morale malmulte progresintajn, kaj inverse.

8. Enkarniĝo estas necesa al la duobla progreso de la Spirito, morala kaj intelekta: al la intelekta progreso pro la deviga aktiveco de laboro; al la morala progreso pro la reciproka bezono de la homoj inter si. *La socia vivo estas la tuŝoŝtono de la bonaj kaj malbonaj kvalitoj*.

Boneco, malboneco, dolĉeco, perforto, bonvolemo, karitato, egoismo, avareco, fiero, humileco, sincereco, malkaŝemo, lojaleco, falseco, hipokriteco, unuvorte ĉio, konsistiganta bonan aŭ malbonan homon, havas kiel objekton, celon kaj stimulon, la rilatojn de la homo kun liaj similuloj.

*Al homo, kiu vivus izolita, ne ekzistus malvirtoj nek virtoj; se homo gardus sin en izolejo kontraŭ malbono, la bono de li mem nuliĝus*.

---

[(*)] Mateo, 16:27. – **La Trad.**

9. Nur unu korpa ekzistado estas evidente nesufiĉa, ke la Spirito akiru la tutan bonon al li mankantan kaj forigu la malbonon al li restantan.

Kiel sovaĝulo, en unu nura enkarniĝo, ekzemple povus morale kaj intelekte atingi la nivelon de la plej progresinta eŭropano? Tio estas materie neebla. Ĉu li do devas eterne resti en nescio kaj barbareco, senigite je la ĝuoj, kiujn nur la disvolviĝo de kapabloj povas doni al li?

La simpla komuna saĝo forpelas tian supozon, kiu estus ne nur neado de la diaj justeco kaj boneco, sed ankaŭ de la propraj evoluaj kaj progresaj leĝoj de la Naturo. Sed Dio, kiu estas suverene justa kaj bona, donas al la Spirito tiom da enkarniĝoj, kiom necesaj, ke li atingu sian celon — la perfektecon.

Al ĉiu nova ekzistado en la materio la Spirito venas kun kapitalo da kapabloj, intuiciaj konoj, inteligento kaj moralo, akirita en antaŭaj ekzistadoj. Tiel ĉiu ekzistado estas paŝo antaŭen sur la vojo de progreso. (*)

Enkarniĝo estas propra al la malsupereco de la Spiritoj, kaj ĝi ne estas necesa, se nur ĉi tiuj, transirinte ĝiajn limojn, fariĝas kapablaj progresi en la spirita stato, aŭ en la korpaj ekzistadoj en superaj mondoj, kiuj posedas neniom da surtera materieco. Tiuj laŭvole enkarniĝas kun celo realigi ĉe la enkarnuloj ian pli rektan agadon por plenumo de sia misio ĉe ili. Tial ili abnegacie akceptas la sortovicojn kaj la suferojn de la enkarniĝo.

10. En la intertempo inter du korpaj ekzistadoj la Spirito ree eniras en la spiritan mondon, kie li estas feliĉa aŭ malfeliĉa laŭ la bono aŭ malbono, kiujn li faris.

Pro tio, ke la spirita stato estas la definitiva stato de la Spirito, kaj ke la spirita korpo ne mortas, ankaŭ tiu eble estas lia normala stato. La korpa stato estas transiĝa kaj pasema. Precipe en la spirita stato la Spirito rikoltas la fruktojn de la realigita progreso per laboro dum la enkarniĝo; ankaŭ en tiu stato li sin preparas por novaj

(*) Vd Unua Parto, ĉap. I, § 3, noto I.

luktoj kaj faras decidojn, kiujn, reveninte al la homaro, li devos plenumi.

La Spirito ankaŭ progresas en la erarvaganteco, akirante specialajn konojn, kiujn li ne povus ekhavi sur la Tero, kaj plibonigante siajn ideojn. La korpa kaj spirita statoj estas fontoj de du specoj de progreso, kiujn la Spirito devas alterne fari en la ekzistadoj propraj al ĉiu el la du mondoj.

11. La reenkarniĝo povas okazi sur la Tero aŭ en aliaj mondoj. Inter la mondoj ekzistas iuj pli progresintaj, kie la ekzistado efektiviĝas en kondiĉoj malpli penigaj, ol sur la Tero, fizike kaj morale, sed kie ankaŭ estas akceptataj nur Spiritoj atingintaj gradon da perfekteco rilata al la stato de tiuj mondoj.

La vivo en la superaj mondoj jam estas ia rekompenco, ĉar tie ni estos senigitaj je la surteraj malbonoj kaj sortovicoj. Tie la korpoj, malpli materiaj kaj preskaŭ fluidecaj, ne plu estas submetitaj al ĝenoj, al malsanoj, kaj ankaŭ ne havas la samajn bezonojn. Escepte de la malbonaj Spiritoj, la homoj ĝuas tutan pacon, sen alia zorgo, krom tiu pri progreso per intelekta laboro.

Efektiva frateco tie regas, ĉar ne ekzistas egoismo; efektiva egaleco, ĉar ne estas fiero, kaj efektiva libereco, ĉar ne estas malordoj forigotaj, nek ambiciuloj klopodantaj premi malfortulojn.

Kompare kun la Tero tiuj mondoj estas efektivaj paradizoj, kiel ripozejoj starantaj laŭlonge de la vojo de progreso kondukanta al la definitiva stato. Ĉar la Tero estas malsupera mondo destinita por purigo de neperfektaj Spiritoj, en tio kuŝas la motivo, kial la malbono tie superregas, ĝis plaĉos al Dio fari el ĝi loĝejon por Spiritoj pli progresintaj. Tiel la Spirito, grade progresante, laŭmezure kiel li disvolviĝas, atingas la apogeon de feliĉo; sed antaŭ ol atingi la kulminon de perfekteco, li ĝuas feliĉon rilatan al sia progreso. Ankaŭ infano ĝuas la plezurojn de infaneco, poste tiujn de juneco, kaj fine tiujn pli solidajn de matureco.

12. La feliĉo de la superaj Spiritoj ne konsistas en la kontempla senfareco, kio estus, kiel ni multfoje diris, ia eterna kaj teda senutileco.

La spirita vivo en ĉiuj siaj gradoj estas male ia konstanta aktiveco, sed aktiveco sen laciĝoj.

La superega feliĉo konsistas en la ĝuo de ĉiuj briloj de la Kreitaĵaro, ĝuo, kiun neniu homa lingvo iam povos priskribi, kiun la plej fekunda komprenkapablo ne povos koncepti. Ĝi ankaŭ konsistas en la penetro en ĉiujn aferojn, en la manko de fizikaj kaj moralaj suferoj, en ia interna plezuro, en ia neŝancelebla sereneco de animo, en la amo ampleksanta ĉiujn estaĵojn, pro manko de ĉagreno el kontakto kun malbonuloj, kaj super ĉio en la kontemplado de Dio kaj en la komprenado de liaj misteroj malkaŝitaj al la plej indaj. La feliĉo ankaŭ ekzistas en la taskoj, kies plenumo faras nin feliĉaj. La puraj Spiritoj estas la Mesioj aŭ la senditoj de Dio por transdiro kaj realigo de liaj voloj. Ili plenumas la grandajn misiojn, prezidas en la formado de la mondoj kaj en la ĝenerala harmonio de la Universo, glora tasko, kiun oni ne atingas, krom per perfektiĝo. Inspiriĝante el lia penso, tiuj el plej alta ordo estas la solaj posedantaj la sekretojn de Dio, de kiu ili estas rektaj reprezentantoj.

13. La devoj de la Spiritoj estas proporciaj al ilia progreso, al la lumoj, kiujn ili posedas, al iliaj kapabloj, sperto kaj grado da konfido al la suverena Sinjoro.

Favoroj kaj privilegioj, kiuj ne estas premio pro merito, ne ekzistas; ĉio estas mezurata kaj pesata per pesilo de la rigora justeco.

La misioj plej gravaj estas konfiditaj nur al tiuj, kiujn Dio juĝas kapablaj ilin plenumi kaj nekapablaj senkuraĝiĝi kaj sin kompromiti. Kaj dum la plej indaj konsistigas la superegan konsilantaron sub la rigardoj de Dio, al la superaj estroj estas donita la direktado de planedaj kirloj kaj al aliaj tiu de specialaj mondoj. Poste venas laŭ ordo de progreso kaj hierarkia rango la pli limigitaj devoj de la delegitoj por la progreso de la

popoloj, por protekto de la familioj kaj individuoj, por impulso de ĉiu branĉo de progreso, por la diversaj agadoj de la Naturo ĝis la plej etaj detaloj de la Kreitaĵaro. En tiu ampleksega kaj harmonia tutaĵo estas okupoj por ĉiuj kapabloj, inklinoj kaj klopodoj; okupoj akceptataj kun ĝojego, petataj kun fervoro, ĉar ili estas rimedo de pli-boniĝo por la Spiritoj sopirantaj progreson.

14. Krom la grandaj misioj konfiditaj al la superaj Spiritoj, ekzistas aliaj kun relativa graveco en ĉiuj gradoj, konsentitaj al Spiritoj el ĉiuj kategorioj, kaj oni povas aserti, ke ĉiu enkarnulo havas sian, t.e. devojn plenum-otajn por la bono de siaj similuloj, ekde la familiestro, kiu prenas sur sin la progreson de siaj infanoj, ĝis la geniulo, kiu ĵetas en la sociojn la semojn de progreso. Ĉe ĉi tiuj flankaj misioj okazas ja senkuraĝiĝoj, devode-kliniĝoj kaj rezignoj, kiuj malutilas al la individuo, sed ne el la kolektivo.

15. Ĉiuj inteligentoj do kunhelpas por la ĝenerala verko, kia ajn estas ilia atingita grado, kaj ĉiu laŭ la mezuro de siaj fortoj, ĉu ĝi estas en la enkarna stato ĉu en la spirita. Ĉie aktiveco, ekde la bazo ĝis la supro de la skalo, kaj ili sin instruas, reciproke sin helpas, donas al si la manojn por atingi la zeniton.

Tiel stariĝas la solidareco inter la spirita kaj fizika mondoj, aŭ, per aliaj vortoj, inter la homoj kaj Spiritoj, inter la liberiĝintaj kaj malliberiĝintaj Spiritoj. Tiel ĉiamiĝas kaj plifirmiĝas per purigo kaj kontinueco de interrilatoj la efektivaj simpatioj kaj noblaj korinklinoj.

Ĉie vivo kaj movo: en la senfino nenia angulo dezerta, neniu regiono, kiu ne estas senĉese vizitata de sennombr-aj legioj de radiaj Spiritoj, nevideblaj por la krudaj sentumoj de la enkarnuloj, sed kies vido ravas per ĝojo kaj admiro la animojn liberiĝintajn el la materio. Ĉie fine ia feliĉo rilata al ĉiuj progresoj, al ĉiuj plenumitaj devoj, kaj ĉiu kunportas kun si la elementojn de sia feliĉo, rezultanta el la kategorio, en kiu oni lokas sin pro sia progreso.

La feliĉo de la Spirito dependas de liaj kvalitoj, kaj ne de la materia stato de la medio, en kiu li troviĝas, kaj la feliĉo do povas ekzisti ĉie, kie estas Spiritoj kapablaj ĝin ĝui. En la Universo neniu loko estas ĉirkaŭlimigita aŭ signita por ĝi.

Kie ajn ili troviĝas, la Spiritoj povas kontempli la dian majestecon, ĉar Dio estas ĉie.

16. Sed la feliĉo ne estas persona: Se ni posedus ĝin nur en ni mem, ne povante dividi ĝin kun aliulo, ĝi estus malgaje egoisma. Ankaŭ ni renkontas ĝin en komuneco de ideoj, kiuj kunigas la simpatiajn estaĵojn. La feliĉaj Spiritoj, altirantaj unuj aliajn per simileco de gestoj kaj sentoj, formas grandajn grupojn aŭ homogenajn familiojn, en kiuj ĉiu individuo elradias siajn proprajn kvalitojn kaj saturiĝas per mildaj fluidaĵoj eliĝantaj el la tuto.

La membroj de ĉi tiu tuto jen disiras por sin doni al sia misio, jen reunuiĝas en ia punkto en la Spaco por fari kalkulon de la realigita laboro, jen kolektiĝas ĉirkaŭ pli supera Spirito por ricevi instruojn kaj konsilojn.

17. Kvankam la Spiritoj estas ĉie, la mondoj prefere estas la centroj de altiro, pro la analogio ekzistanta inter ili kaj tiuj, kiuj loĝas en tiuj mondoj. Ĉirkaŭ la progresintaj mondoj abundas superaj Spiritoj, kiel ĉirkaŭ tiuj malprogresintaj svarmas malsuperaj Spiritoj. Ĉiu globo iel havas sian propran loĝantaron el enkarniĝintoj kaj elkarmiĝintoj, nutratan plejparte per iliaj enkarniĝo kaj elkarniĝo. Tiu loĝantaro estas pli starema en la malsuperaj mondoj, pro ilia alligo al la materio, kaj pli pasemaj en la superaj.

Sed el tiuj lastaj, efektivaj fokusoj de lumo kaj feliĉo, la Spiritoj venas en malsuperajn mondojn por tie disĵeti la semojn de progreso, por tien porti konsolon kaj esperon, levi la animojn falintajn pro la provoj de la vivo. Ankaŭ ili iafoje enkarniĝas por pli efike plenumi sian mision.

18. Kie estas la Ĉielo en tiu senfina grandegeco? Ĉie. Neniu konturo ĝin limas. La progresintaj mondoj estas la lastaj restadejoj sur ĝia vojo, kiun virtoj malfermas kaj malvirtoj baras. Antaŭ tiu grandioza spektaklo, kiu plenigas la Universon kaj donas celon kaj pravon de ekzisto al ĉiuj aferoj de la Kreitaĵaro, kiel malgranda kaj senvalora estas la doktrino, kiu lokas la homaron sur nepercepteblan punkton en la Spaco, kaj kiu montras ĝin al ni, komenciĝantan ĉe ia momento por finiĝi kun la mondo ĝin enhavanta, ne daŭrantan pli ol unu minuton en la Eterneco!

Kiel malgaja, malvarma, glacia estas tiu doktrino, kiam ĝi montras al ni la ceteron de la Universo, dum kaj post la surtera homaro, sen vivo, sen movo, kvazaŭ ian tre vastan dezerton dronintan en profunda silento! Kiel malesperiga estas la perspektivo de la elektitoj destinitaj por la ĉiama kontemplado, dum la plimulto el la kreitoj suferas senfinajn turmentojn! Kiel la ideo pri tiu baro inter mortintoj kaj vivantoj disvundas la sentemajn korojn! La feliĉaj animoj, oni diras, nur pensas pri sia feliĉo, kaj la malfeliĉaj pri siaj doloroj. Ĉu oni miras, ke egoismo regas sur la Tero, kiam oni al ni montras ĝin sur la Ĉielo?

Ho! Kiel malŝatinda ŝajnas al ni tiu ideo pri la grandeco, povo kaj boneco de Dio! Kiel superbela estas la ideo, kiun laŭ Spiritismo ni havas pri Li! Kiom ĝia doktrino altigas la ideojn kaj grandigas la penson! Sed kiuj diras, ke ĝi estas vera? Unue la Racio, poste la Revelacio, kaj fine ĝia akordo kun la progresoj de la Scienco. Inter du doktrinoj, el kiuj unu malŝatas kaj alia altigas la atributojn de Dio; el kiuj unu malakordas kaj alia harmonias kun la progreso; el kiuj unu postrestas kaj alia iras plu, la komuna saĝo diras kun kiu estas la vero. Komparante ilin, ĉiu konsultu sian konsciencon kaj ia interna voĉo parolos anstataŭ ĝi. Nu, tiuj internaj aspiroj estas voĉo de Dio, kiu ne povas trompi la homojn. Sed, oni dirus, kial Dio komence ne malkaŝis al ili la tutan veron? Pro tiu sama motivo, kial oni ne instruas al infano tion, kion oni instruas al homoj en matura aĝo.

La revelacio limita estis sufiĉa en la periodo de la homaro, kaj Dio iom post iom liveras ĝin laŭ la progreso kaj laŭ la fortoj de la Spirito.

Kiuj hodiaŭ ricevas pli kompletan revelacion estas *tiuj samaj Spiritoj*, kiuj ricevis el ĝi parteton en aliaj tempoj kaj kiuj de tiam grandigas sian inteligenton.

Antaŭ ol la Scienco revelaciis al la homoj la vivantajn fortojn de la Naturo, la ekziston de la astroj, la efektivan rolon de la Tero kaj ĝia formado, ĉu ili povus kompreni la grandegecon de la Spaco kaj la plurecon de la mondo? Antaŭ ol la Geologio pruvis la formiĝon de la Tero, ĉu la homoj povus eltiri la inferon el ĝiaj internaĵoj kaj kompreni la alegorian sencon de la ses tagoj de la Kreado? Antaŭ ol la Astronomio malkaŝis la leĝojn regantajn la Universon, ĉu ili povus kompreni, ke ne estas supro nek malsupro en la Spaco, ke la ĉielo ne estas super la nuboj nek limita de la steloj? Ĉu ili povus alkonformiĝi al la spirita vivo antaŭ la progresoj de la psikologia scienco? Koncepti post la morto vivon feliĉa aŭ malfeliĉa, escepte se en limita loko kaj sub materia formo? Ne; pli komprenata de la sentoj, ol de la penso, la Universo estas tre vasta, ke ili ĝin konceptu; estis necese mallarĝigi ĝin al ilia vidpunkto por poste ĝin larĝigi. Ia parta revelacio estis utila, kaj kvankam saĝa ĝis tiam, ĝi tamen hodiaŭ ne kontentigus. Absurdo venas de tiuj, kiuj pensas, ke ili povas regi pensulojn, ne alkalkulante la progreson de la ideoj, kvazaŭ tiuj pensuloj estus infanoj. (Vd "La Evangelio laŭ Spiritismo", ĉap. III.)

# ĈAPITRO IV

# INFERO

*Intuicio pri la estontaj punoj. La kristana infero imitita laŭ la pagana infero. Limboj. Bildo pri la pagana infero. Skizo de la kristana infero.*

## Intuicio pri la estontaj punoj

1. Ekde ĉiuj epokoj la homo intuicie kredas, ke la estonta vivo estas feliĉa aŭ malfeliĉa, laŭ la bono aŭ malbono farita en ĉi tiu mondo. Sed la ideo, kiun li faras pri tiu vivo, respondas al liaj progreso, morala sento kaj pli aŭ malpli ĝustaj nocioj pri bono kaj malbono.

Punoj kaj rekompencoj estas respeguliĝo de la elstaraj instinktoj. Por militemaj popoloj la plej supera feliĉo estas la honoraĵoj aljuĝitaj al la braveco; por la ĉasisto ĝi estas la ĉasabundo; por la voluptemaj, la voluptaj ĝuoj. Regite de la materio, la homo nur malperfekte povas kompreni la spiritecon, imagante ian bildon pli materian ol spiritan pri la estontaj punoj kaj ĝuoj; al li ŝajnas, ke en alia mondo li devas manĝi kaj trinki pli bone ol sur la Tero. (*)

Pli malfrue jam troviĝas en la kredoj pri la estonta vivo ia miksaĵo de spiritualismo kaj materialismo: la

(*) Malgranda savojano, al kiu la paroĥestro priskribis la estontan vivon, demandis lin, ĉu ĉiuj homoj tie manĝas blankan panon, kiel en Parizo.

kontempla beateco konkuranta kun la infero je fizikaj turmentoj.

2. Ĉar li povas kompreni nur tion, kion li vidas, la primitiva homo tute nature modlis sian estontecon laŭ la nuneco; por kompreni aliajn tipojn, krom tiuj, kiujn li havis antaŭ la okuloj, li bezonus ian intelektan progreson, kiun nur la tempo povus aldoni. Ankaŭ la bildo de li imagita pri la estontaj punoj estas nenio alia ol la spegulo de la malbonoj de la homaro, en pli vasta proporcio, ampleksante ĉiajn torturojn, turmentojn kaj suferojn, kiujn li trovis sur la Tero. En la varmegaj klimatoj li imagis ian fajran inferon, kaj en la nordaj regionoj ian inferon el glacio. Ĉar ankoraŭ ne disvolviĝis en li la kapablo ebliganta al li kompreni la spiritan mondon, li nur povis koncepti fizikajn punojn; kaj tiamaniere, malgraŭ malgrandaj diferencoj pro formo, estas similaj la inferoj de ĉiuj religioj.

### La kristana infero imitita laŭ la pagana infero

3. La pagana infero priskribita kaj dramigita de la poetoj estis la plej grandioza modelo de la ĝenro, kaj ĝi eterniĝis en la kristanaj medioj, kie siavice estis poetoj kaj kantistoj. Se oni ilin komparos, oni trovos en ili — escepte de iliaj nomoj kaj detalaj variaĵoj — sennombrajn similaĵojn; ili ambaŭ havas la materian fajron, kiel bazon de la turmentoj, kiel simbolon de la plej kruelaj suferoj. Sed, stranga afero! La kristanoj troigis la inferon de la paganoj je multaj punktoj. Se ĉi tiuj havis la barelegon de la Danaidinoj, la radon de Iksiono, la rokon de Sizifo, tiuj torturoj estis individuaj; male, la kristanoj havas por ĉiuj sendistinge la bolantajn kaldronojn, kies kovrilojn la anĝeloj levas por vidi la tordiĝojn de la turmentatoj (*) kaj Dio senkompate aŭdas iliajn ĝemojn tra la tuta eterneco. La paganoj neniam priskribis la loĝantojn de

(*) Prediko en Montpellier, en 1860.

la Kampoj Elizeaj, plezurantajn je vido de turmentoj en Tartaro. (*)

4. Same kiel la paganoj, tiel ankaŭ la kristanoj havas sian inferreĝon — Satanon — sed kun la diferenco, ke Plutono, ne estante malbona, kontentiĝis regi la ombran imperion, kiu destiniĝis por li, kiel heredaĵo. Li tenis en sia regno tiujn, kiuj faris malbonon, ĉar tia estis lia misio, sed li ne instigis la homojn al peko por ĝui, por ĝoji pri iliaj suferoj. Satano tamen ĉie altiras viktimojn kaj plezuriĝas, turmentante ilin per legio da demonoj armitaj per forkegoj, turnante ilin en la fajro.

Oni jam diskutis serioze pri la naturo de tiu fajro, kiu bruligas sed ne konsumas la viktimojn. Oni eĉ demandis, ĉu ĝi estas ia fajro nutrata per bitumo. (**)

La kristana infero neniel estas malpli turmenta ol la pagana infero.

5. La samaj konsideroj, kiuj devigis la antikvulojn ie loki la regnon de la feliĉo, ankaŭ devigis ilin ĉirkaŭlimigi la lokon por torturoj. Lokinte la unuan en la supraj regionoj, oni nature destinis al la dua la malsuprajn lokojn, t.e. la centron de la Tero, kies enirejo, oni kredis, estis iaj ombroplenaj kavaĵoj kun terura aspekto. Ankaŭ la kristanoj lokis tie dum longa tempo, la loĝejon de la kondamnitoj.

Ankoraŭ pri tio ni reliefigu alian similecon: — Unuflanke la infero de la paganoj havis la Kampojn Elizeajn, kaj aliflanke la Tartaron; la Olimpo, loĝejo de la gedioj kaj de la diigitaj homoj, situis en la supraj regionoj. Laŭ la *litero* de la Evangelio, Jesuo malsupreniris

---

(*) Prediko en Parizo, en 1861.

(**) "La feliĉuloj, ne forirante el la loko, kiun ili okupas, iamaniere povos apartiĝi pro siaj kapabloj de inteligento kaj speciala vido, por konsideri la torturojn de la kondamnitoj, kaj, ĉi tiujn vidante, ne nur estos nesenteblaj por la doloro, sed ankaŭ eĉ **ĝojegos** kaj dankos Dion pro sia propra feliĉo, ĉeestante la neesprimeblan malfeliĉegon de la malpiuloj." (Sankta Tomaso la Akvinano.)

en la inferojn, t.e. en la *malsuprajn lokojn*, por el tie eltiri la animojn de la justuloj, kiuj atendis lian venon.

La inferoj ne estas do ia loko sole nur de turmentoj: ili kuŝis same, kiel por la paganoj, en la *malsupraj lokoj*.

La loĝejo de anĝeloj same, kiel la Olimpo, estis en la supraj lokoj. Oni lokis ĝin trans la stelplena ĉielo, kiun oni opiniis limigita.

6. Tiu miksaĵo el kristanaj kaj paganaj ideoj estas neniel neverŝajna. Jesuo ne povis per ununura bato detrui malnovajn kredojn, kiam al la homoj mankis konoj necesaj por kompreni la vastecon de la Spaco kaj la senliman nombron de la mondoj; por ili la Tero estis la centro de la Universo; ili ne konis ĝian formon nek ĝian strukturon internajn; ĉio limiĝis je ilia vidpunkto: iliaj nocioj pri estonteco ne povis iri trans iliaj scioj. Al Jesuo estis do neeble inici ilin pri la vera stato de la aferoj; sed ne volante, aliflanke, per sia aŭtoritato, sankcii akceptitajn superstiĉojn, li sin detenis korekti ilin, lasante al la kuro de la tempo la plenumadon de tiu misio. Li kontentiĝis paroli nur supraĵe pri la feliĉega vivo, pri la punoj rezervitaj al la pekuloj, neniam aludante, dum sia instruado, la korpajn punojn kaj torturojn, kiuj por la kristanoj estas kredartikolo. Jen kiel la ideoj pri la pagana infero eterniĝis ĝis niaj tagoj. Kaj estis necesaj la disvatiĝo de modernaj lumoj, la ĝenerala disvolviĝo de la homa intelekto, por ke oni faru al li justecon. Sed ĉar nenio pozitiva anstataŭis la ricevitajn ideojn, la periodo de blinda kredemo estis kelkatampe sekvata de la periodo de nekredemo, al kiu metis finon la Nova Revelacio. Estis necese detrui por rekonstrui, ĉar estas pli facile sugesti ĝustajn ideojn al tiuj, kiuj nenion kredas, sentante, ke io mankas al ili, ol fari tion al tiuj, kiuj havas firman ideon, kvankam absurdan.

7. Post lokado de la ĉielo kaj de la infero, la kristanaj sektoj estis devigitaj akcepti ne pli ol du ekstremajn situaciojn: kompletan feliĉon kaj absolutan

suferon. Purgatorio estas nur ia meza kaj transiĝa loko, el kie la animoj rekte pasas al la loĝejo de la justuloj.

Pro la kredo al la definitiva sorto de la animo post la morto, alia ne povas esti la hipotezo. Se ne estas pli ol du loĝejoj, tiu de la elektitoj kaj tiu de la kondamnitoj, oni ne povas konsenti pri multaj gradoj en ĉiu el ili, sen la ebleco ilin trairi, kaj sekve fari progreson. Nu, se ekzistas progreso, ne ekzistas definitiva sorto, kaj se ekzistas definitiva sorto, ne ekzistas progreso. Jesuo solvis la demandon, kiam li diris : "Estas multe da loĝejoj en la domo de mia Patro." (*)

## La limboj

8. Estas vero, ke la Eklezio akceptas ian specialan pozicion en apartaj okazoj.

Infanoj mortintaj en frua aĝo, ne farinte iun ajn malbonon, ne povas esti kondamnitaj al la eterna fajro. Sed, aliflanke, ne farinte bonon, ili ne rajtas ĝui la superegan feliĉon. Ili restas en la limboj, diras al ni la Eklezio, en tiu neniam difinita situacio, en kiu, se ili ne suferas, ili ankaŭ ne ĝuas la feliĉegon. Ĉar tiu sorto estas neŝanĝebla, tiu feliĉego restas al ili malpermesita por ĉiam. Tia malpermeso estigas ian *torturon eternan*, des pli *nemerititan*, ĉar estas vere, ke ne dependas de tiuj animoj la fakto, ke la aferoj tiel okazas. Tio sama okazas al la sovaĝulo, kiu, ne ricevinte la gracon de la bapto kaj la lumon de la religio, pekas pro nescio, forlasite al la naturaj instinktoj. Li certe ne havas la respondecon kaj la meriton de tiuj konscie agantaj. La simpla logiko rifuzas tiun doktrinon en la nomo de la Dia justeco, kiu plene troviĝas en ĉi tiuj vortoj de la Kristo: *"Al ĉiu laŭ liaj faroj"*(**). Jes, faroj bonaj aŭ malbonaj, sed plenumitaj memvole kaj libere, la solaj,

(*) **La Evangelio laŭ Spiritismo**, ĉap. III

(**) Mateo, 16:27. – **La Trad.**

kiuj enhavas respondecon. En tiu okazo ne povas troviĝi la infano, la sovaĝulo, nek tiu, kiu ne estis klerigita.

## Bildo de la pagana infero

9. La kono pri la pagana infero estas liverita al ni preskaŭ ekskluzive de la priskribo de la poetoj. Homero kaj Vergilio donis la plej kompletan priskribon pri ĝi, sed oni devas konsideri la poeziajn bezonojn truditajn de la formo. La priskribo de Fénelon, en *Telemaĥo*, kvankam prenita el la samaj fontoj pri la fundamentaj kredoj, havas la pli koncizan simplecon de la prozo.

Priskribante la funebran aspekton de la lokoj, li ĉefe okupiĝis pri la reliefigo de la sufero de la kulpintoj, plilongigante la priskribadon pri la sorto de la malicaj reĝoj, kun la celo instrui sian reĝan disĉiplon. Kiel ajn populara estas tiu verko, ne ĉiuj memoras pri tiu priskribo aŭ pri ĝi meditas por fari komparon, kaj tial ni kredas, ke estas utile reprodukti la epizodojn, kiuj pli rekte interesas nian temon, t.e. tiujn, kiuj koncernas la individuajn punojn.

10. "Enirante, Telemaĥo aŭdas ĝemojn de senkonsola ombro. Kia estas via malfeliĉo? — li demandis. Kiu nome vi estis sur la Tero? Nabofarzano — respondis la ombro —, reĝo de la fiera Babilonio. Aŭdante mian nomon, ĉiuj popoloj en Oriento tremas; mi devigis la babilonanojn adori min en marmora templo, kie mi estis reprezentata per ora statuo, ĉe kies piedoj tage kaj nokte bruladis incensoj el Etiopujo; neniam iu ajn kuraĝis kontraŭdiri min sen tuja puno; ĉiutage oni elpensis novajn amuzojn, kiuj faris mian vivon pli kaj pli ĉarma.

Estante juna kaj fortika, kiom, ho! kiom da plezuroj ankoraŭ restis ĝuotaj de mi sur la trono! Sed certa virino, kiun mi amis, kaj kiu ne reciprokis mian amon, igis min klare senti, ke mi ne estas dio: ŝi venenis min, kaj... jen mi estas nenio plu. Hieraŭ miaj cindroj pompe estis enfermitaj en oran urnon: oni ploris, elŝiris la harojn, hipokrite volis sin ĵeti en la flamon de mia brulo,

por morti kun mi, kaj ankoraŭ iras plori apud la tombo de miaj cindroj, sed neniu priploras min; mia memoro teruras mian propran familion, dum mi ĉi tie malsupre suferas abomenindajn turmentegojn.

Kortuŝita antaŭ tia spektaklo, Telemaĥo diras al li: Ĉu vi estis vere feliĉa dum via regado? Ĉu vi sentis tian mildan pacon, sen kiu la koro konservas sin premita kaj malfortika meze en la plezuregoj? — Ne — respondis la babilonano; mi ne scias mem tion, kion vi volas diri. La saĝuloj laŭdegas tiun pacon kiel unikan bonon; rilate la koleron, mi neniam ĝin sentis, mia koro senĉese skuiĝas pro novaj deziroj de timo kaj espero. Mi penadis sekonsciigi min per skuo de miaj propraj pasioj, zorge plilongigante tiun ebriecon por fari ĝin eterna, kontinua; la plej malgranda momento da prudento, da trankvileco estus al mi amara. Jen la paco ĝuita de mi; ia ajn alia ŝajnas al mi ia fabelo, ia sonĝo, Tiuj estas la bonoj, kiujn mi priploras

Tiel parolante, la babilonano ploris, kiel malforta viro, tedita de la prosperaĵoj, malkutimiĝinta rezignacie elporti ian malfeliĉon. Ĉe li troviĝis kelkaj sklavoj, mortigitaj honore al liaj funebroj. Merkuro transdonis ilin kune kun ilia reĝo al Karono, donante al ili absolutan povon super tiu reĝo, al kiu ili servis sur la Tero. *Tiuj ombroj de sklavoj ne timis la ombron de Nabofarzano, kiun ili retenis katenita, trudante al li la plej kruelajn insultojn*. Unu diris al li: “Ĉu ni ne estis homoj egalaj al vi? Vi, kiu estis malsaĝa, opiniis vin ia dio, tiel ke vi forgesis vian originon komunan al ĉiuj homoj.” Alia, por insulti lin, diris: “Vi prave ne volis, ke oni prenu vin por homo, ĉar vere vi estis malhumana monstro.” Ankoraŭ alia: “Nu, kie troviĝas nun viaj flatuloj? nenion plu vi havas por doni, mizerulo! eĉ ne malbonon vi povas fari plu: jen vi reduktita nun al sklavo de viaj sklavoj. La justeco de la dioj malfruiĝas sed nepre venas.”

Ĉe tiuj severaj frazoj, Nabofarzano sin ĵetis al la tero, elŝirante la harojn, posedite de kolero kaj malespero. Karono tamen instigis la sklavojn: Trenu lin per kateno, starigu lin kontraŭ lia volo. Li ne povu konsoloĝi, kaŝante

sian honton: estas necese, ke ĉiuj ombroj el Stikso atestu tiun honton, kiel pruvon al la dioj, kiuj dum tiel longa tempo permesis, ke tiu kruelulo regis sur la Tero.

Kaj li tuj ekvidas tre proksime la nigran Tartaron, kiu eligas malluman, densan fumon, kies fetoro estus mortiga, se ĝi disetendiĝus sur la mondon de la vivantoj. Tiu fumo kovris ian fajran riveron, ian flaman kirlon, kies bruego, simila al tiu de plej grandaj torentoj, falantaj de altaj rokoj en profundajn abismojn, kontribuis al tio, ke oni nenion aŭdu en tiuj mallumaj regionoj. Kaŝe kuraĝigita de Minerva, Telemaĥo sentime eniras en tiun abismon. Unue li vidis grandan nombron da homoj vivantaj plej humile, punitaj pro tio, ke ili penis havigi al si riĉaĵojn per trompoj, perfidoj kaj kruelaĵoj. Tie li rimarkis multajn hipokritajn nekredantojn, kiuj, ŝajnante ami religion, ĝin uzis, kiel pretekston por kontentigi siajn ambiciojn kaj moki la kredantojn; kiuj misuzis la Virton mem, la plej gravan donacon de la dioj; kaj kiuj estis punataj, kiel la plej krimaj el ĉiuj homoj. La gefiloj senkapigintaj siajn gepatrojn; la edzinoj makulintaj la manojn per la sango de siaj edzoj; la perfiduloj, kiuj vendis sian patrujon, rompante ĉiujn ĵurojn, ĉiuj, malgraŭ ĉio, suferis punojn pli malgravajn ol tiuj ricevitaj de la hipokrituloj.

La tri inferaj juĝistoj tion volis, pro la jena motivo: la hipokrituloj ne kontentiĝas per tio, ke ili estas malicaj, kiel la ceteraj maliculoj, sed ili volas esti rigardataj, kiel bonaj kaj kontribuas, per sia falsa virto, al la nekredemo kaj korupto de la vero. La dioj, de ili mokataj kaj malestimataj antaŭ la homo, plezure uzas sian tutan potencon por venĝi tiujn insultojn.

Proksime de tiuj troviĝas aliaj homoj ordinare rigardataj kiel senkulpaj, sed senkompate persekutataj de la dioj: ili estas la maldankuloj, la mensoguloj, la flatantoj, laŭdantaj la malvirton, la malicaj kritikantoj, penantaj makuli la plej puran virton; fine tiuj, kiuj, senpripense juĝante la aferojn sen profunda kono pri ili, pro tio mem malutilas la reputacion de la senkulpaj.

Vidante la tri juĝistojn kondamnantaj viron, Telemaĥo kuraĝis demandi ilin pri liaj krimoj. La kondamnito, prenante la parolon, tuj ekkriis: Mi neniam faris iun ajn malbonon; mia tuta plezuro estis la praktiko de bono; mi ĉiam estis bonkora, justa, liberala kaj kompatema; pri kio do oni povas min riproĉi?

Tiam Minoo diris al li: Oni tute ne akuzas vin rilate al la homoj, sed ĉu vi ne ŝuldis malpli al ĉi tiuj ol al la dioj? Kia do estas tiu justeco, pri kiu vi fieras? Al la homoj, kiuj estas nenio, vi neniam neglektis iun ajn devon; vi vere estis virta, sed vi atribuis tiun virton nur al vi mem, forgesante la diojn, kiuj donis ĝin al vi; vi tiele agis nur pro tio, ĉar vi volis ĝui la frukton de via virto, enfermite en vi mem: *vi estis via propra dio*. Sed la dioj, kiuj ĉion faris por si mem, ne povas rezigni siajn rajtojn; ĉar vi volis aparteni al vi mem, ne al ili, tial ili transdonos vin al vi mem, forgesante vin tiel, same kiel vi forgesis ilin. *Se vi povas, serĉu nun konsolon en via propra koro*. Jen vi nun estas por ĉiam apartigita de la homoj, al kiuj vi volis plaĉi; jen vi estas sola kun vi mem, vi, kiu estis via propra idolo: sciu, ke ne estas vera virto sen respekto kaj amo al la dioj, al kiuj oni ĉion ŝuldas. Via hipokrita virto, kiu dum longa tempo ekblindigis la naivulojn, estas konfuzota. Ĉar la homoj juĝas la malvirton kaj la virton nur per tio, kio al ili plaĉas aŭ ĝenas, ili estas blindaj rilate bonon kaj malbonon. Ĉi tie ia dia lumo neniigas iliajn artifikajn juĝojn, jen kondamnante tion, kion ili admiras, jen pravigante tion, kion ili kondamnas.

Ĉe tiuj vortoj, la filozofo, kvazaŭ vundita de fulmo, apenaŭ povis subteni sin. La plezuro, kiun li iam sentadis, revidante siajn moderecon, kuraĝon, bonkorajn inklinojn, nun ŝanĝiĝis en malesperon. La vido je la malamika koro de la dioj estigas en li turmentojn; li vidas, kaj ne povas ne vidi sin mem; li vidas la vantaĵojn de la antaŭjuĝoj de homoj, kiujn li penadis flati ĉe ĉiuj iliaj agoj. Efektiviĝas ia radikala revolucio en lia tuta interno, kvazaŭ volviĝis ĉiuj liaj internaĵoj; li sentas sin ŝanĝita; li ne trovas apogon en la koro; la konscienco, kies atesto estis

tiel agrabla al li, ribelas kontraŭ li, amare kulpigante lian malsaĝiĝon, lian iluzion pri ĉiuj liaj virtoj, kiuj ne havis, kiel principon kaj celon, la kulton al Dio, kaj jen li estas nun konfuzita, konsternita, katenita de honto, de rimorso, de malespero. *La Furioj ne turmentas lin, kaj al ili sufiĉas, ke ili transdonis lin al li mem*, por ke li suferu en sia koro la venĝon de la malŝatataj dioj.

*Serĉante mallumon, li ne povas trovi ĝin, ĉar malopor-tuna lumo lin sekvas ĉie*; el ĉiuj flankoj la penetrantaj radikoj de la vero venĝas la veron, kiun li ne volis sekvi. Ĉio, kion li amis, fariĝas abomena, kiel fonto de liaj senfinaj malbonoj. Li murmuras al si mem: Ho malŝaĝulo! Mi eĉ ne konis la diojn, nek la homojn, nek min mem, ĉar mi neniam amis la veran kaj unikan bonon; ĉiuj miaj paŝoj estis frenezaj; mia saĝo estis nenio alia ol frenezo; mia virto nenio pli ol senkompata, blinda fiero: – mi estis do mia idolo!

Fine Telemaĥo rekonis la reĝojn kondamnitajn pro misuzo de aŭtoritato. Unuflanke, venĝema Furio *prezentis al ili spegulon, kiu reflektis iliajn monstrajn malvirtojn*: nepovante deturni la rigardon, ili tie vidis la vantemon krudan kaj avidan je ridindaj flatoj: la kruelecon al tiuj, kiujn ili devus feliĉigi; la timon kontraŭ la vero, la nesentemon antaŭ la virtoj; la preferon al la kovarduloj kaj flatemuloj, la mankon de realigo, la inertecon, la mallaboremon; la senliman malkonfidon; la ekscesajn pompon kaj riĉecon nutritajn per la popola malfeliĉo; la ambicion pri vanaj gloroj koste de la civitana sango; fine la kruelecon, kiu ĉiutage serĉas novajn plezurojn en la larmoj kaj malespero de tiom da malfeliĉuloj. Tiuj reĝoj ofte revidis sin en tiu spegulo, trovante sin pli monstraj kaj teruraj ol la propra Ĥimero venkobatita de Belerofono, ol la Hidro el Lerno, mortigita de Herkuleso, kaj ol Cerbero, kiu el siaj tri faŭkoj vomadis ian nigran, venenan sangon kapablan pestigi ĉiaspecajn mortemulojn vivantajn sur la Tero.

Duaflanke, alia Furio insulte ripetis al ili ĉiujn flatojn, kiujn la flatemuloj faris al ili dum la vivo, kaj ŝi ankoraŭ montris al ili alian spegulon, kie ili vidis sin

tiaj, kiaj la flatemo ilin pentris. *El la antitezo de la bildoj ilin konsternis ja la turmento de la memamo.* Estas notinde, ke la plej malicaj el la reĝoj estas tiuj, kiuj ricevis la plej multajn kaj plej brilajn flatojn dum sia vivo, pro tio, ke la maliculoj estas pli timataj ol la bonuloj kaj postulas tute senhonte la malnoblajn flatojn de siatempaj poetoj kaj oratoroj.

En la profundo de tiuj mallumoj, kie ili suferas nur ofendojn kaj mokojn, oni aŭdas iliajn agoniajn ĝemojn. En ilia ĉirkaŭaĵo, ĉio ilin forpelas, kontraŭdiras kaj konfuzas, kontraŭe al tio, kion ili atendis dum la vivo, mokante la homojn, en la konvinko, ke ĉio fariĝas por servi al ili. En la Tartaro, iuj sklavoj, al kies kapricoj ili estis submetitaj, igas ilin siavice provi la plej kruelan sklavecon; dolore humiligitaj, al ili estas nenia espero modifi aŭ mildigi la sklavecon. Simile al amboso sub la martelado de la Ciklopoj, kiam instigitaj de Vulkano ĉe la inkandeskaj fornegoj en la monto Etno, tiel ili restas, sub la batoj de tiuj sklavoj ŝanĝitaj en turmentistojn.

Tie Telemaĥo vidis palajn vizaĝojn teruregajn kaj konsternitajn. Malluma estas la malĝojo, kiu konsumas tiujn krimulojn teruritajn de si mem, ne povantajn liberiĝi de ĝi, tiel same, kiel al ili ne estas eble liberiĝi de sia propra naturo: *al iliaj kulpoj estas nenia puno ol tiuj kulpoj mem; tiuj kulpoj senĉese vidiĝas en sia plena grandego, aperante al ili sub la formo de teruraj fantomoj ilin persekutantaj*. Penante liberiĝi de tiu persekuto, ili serĉas morton pli potencan ol tiu, kiu ilin apartigis de la korpo. Senesperaj, ili elvokas ian morton kapablan estingi ilian konsciencon: ili petas, ke la abismoj absorbu ilin, por ke ili liberiĝu de la venĝaj fulmoj de la vero ilin turmentanta, sed ili fordonas sin plu al la venĝo, kiu senĉese falas sur ilin, guto post guto. La vero, kiun ili timas vidi, fariĝas ia turmento; ili tamen ĝin vidas, kaj ili havas okulojn nur por vidi ĝin leviĝi kontraŭ ilin, ilin vundante, dispecigante kaj fulme forŝirante de ili mem, detruante nenion el ilia eksteraĵo, penetrante en la plejprofundo de ilia internaĵo.

Inter la estuloj, kiuj hirtigis al li la harojn, Telemaĥo vidis plurajn kaj antikvajn reĝojn el Lidio, punitaj, ĉar al laboro ili preferis la ĝuojn de ia inerta vivo, kiam la laboro devas esti la konsolo de la popoloj kaj tiel neapartigebla por la reĝeco.

Tiuj reĝoj recipokre bedaŭris la blindecon. Unu al alia, kiu sur la Tero estis lia filo, diris: Ĉu mi ne rekomendis plurfoje al vi dum la vivo kaj ankoraŭ antaŭ la morto, ke vi riparu la malbonojn okazintajn pro mia neglekto? — Ha! Kompatinda patro! — diris la filo — estis ja vi, kiu perdigis min! Via ekzemplo inspiris al mi pompon, orgojlon, voluptamon kaj kruelecon kontraŭ la homoj! Vidante vin regi kun tiom da malzorgo, ĉirkaŭita de malŝatindaj flatemuloj, mi alkutimiĝis ŝati flaton kaj plezurojn.

Mi ekkredis, ke la homoj estas por la reĝoj tio sama, kio la ĉevaloj kaj aliaj ŝarĝobestoj estas por la homoj, t.e. bestoj, kiujn oni estimas nur dum ili taŭgas por laboro kaj komforto.

Mi kredis tion, kaj estis ja vi, kiu igis min kredi... suferanta nun tiom da malbonoj, ĉar mi imitis vin. Al tiuj riproĉoj ili aldonis plej severajn blasfemojn, kvazaŭ poseditaj de kolero sufiĉa por sin reciproke dispecigi. Simile al noktaj noktuoj, ĉirkaŭ tiuj reĝoj flugadis la kruelaj suspektoj, la vanaj timoj kaj malkonfidoj, per kiuj venĝas la popoloj pro sovaĝeco de iliaj reĝoj, la nesatigeblan ambicion je riĉaĵoj, la falsan gloron ĉiam tiranan kaj la malzorgan senfaremon, kiu duobligas la suferojn sen la rekompenco de efektivaj plezuroj. Oni vidis multajn el tiuj reĝoj severe punataj, ne pro malbonoj faritaj, sed *pro tio, ke ili neglektis la bonon, kiun ili povus kaj devus fari*. Ĉiuj krimoj de la popolo, rezultantaj de la neglekto ĉe la observado de la leĝoj, estis imputitaj al la reĝoj, kiuj devas regi nur por plenumi la leĝojn. Oni imputis al ili ankaŭ ĉiujn malordojn naskitajn de pompo, lukso kaj ceteraj eksecoj, pelanta la homon al perforto, ilin instigantaj al akirado de havaĵoj per malobeo al la leĝoj. Antaŭ ĉio oni rigore traktis la reĝojn, kiuj, anstataŭ

esti bonaj kaj viglaj paŝtistoj de popoloj, okupiĝis nur pri detruado de la ŝafaro, kvazaŭ voremaj lupoj.

Sed kio plej multe malĝojigis Telemaĥon, tio ja estis vidi en tiu malluma, malica abismo grandan nombron da reĝoj, kiuj, rigardataj sur la Tero kiel la plej bonaj, kondamnis sin mem al punoj en la Tartaro, ĉar ili sin lasis gvidi de ruzaj kaj malicaj homoj. *Tia puno respondis al la malbonoj, kiujn ili permesis fari en la nomo de sia aŭtoritato*. Sed la plejmulto de ĉi tiuj reĝoj estis nek bona, nek malbona, tia estis ilia malforteco; nescio pri la vero ne timigis ilin, kaj ĉar neniam ĝuis la plezuron de virto, ili neniam povus konsistigi la plezuron en la praktiko de bono."

## Skizo de la kristana infero

11. La opinion de la teologoj pri la infero oni resumas per la sekvantaj citaĵoj [(*)]. Prenite el la sanktaj aŭtoroj kaj el la vivo de la sanktuloj, tiu priskribo povas des pli bone esti rigardata, kiel esprimo de la ortodoksa fido al la temo, ĉar ĝi estas ofte reproduktata, kun malmultaj variaĵoj, ĉe la evangelia predikado kaj en la episkopaj pastoraloj.

12. "La demonoj estas puraj Spiritoj, kaj la kondamnitoj, nuntempe en la infero, povas esti rigardataj kiel puraj Spiritoj, pro tio, ke nur la animo malsupreniras tien, kaj la korpo transdonita al la tero ŝanĝiĝas en herbojn, plantojn, mineralojn kaj likvaĵojn, senkonscie suferante la metamorfozojn proprajn al la materio. Sed la kondamnitoj, same kiel la sanktuloj, devas reviviĝi en la tago de la Lasta Juĝo, prenante, por ilin ne plu forlasi, la samajn karnajn korpojn, kiuj vestis ilin dum la vivo. La elektitoj reviviĝos tamen en purigitaj kaj lumbrilaj korpoj, kaj la kondamnitoj en korpoj malkulitaj kaj

[(*)] Ĉi tiuj citatoj estas prenitaj el la verko titolita "La Infero" de Auguste Callet.

difektitaj de la pekoj. Tio ilin distingos, kaj en la infero ne plu estos puraj Spiritoj, sed homoj, kiel ni. Sekve la infero estas loko fizika, geografia, materia, ĉar ĝi devas esti loĝata de surteraj estuloj havantaj piedojn, manojn, buŝon, langon, dentojn, orelojn, okulojn similajn al niaj, sangon en la vejnoj kaj sentemajn nervojn.

Kie troviĝas ja tiu infero? Kelkaj doktrinoj lokas ĝin en la interno mem de nia terglobo; aliaj, ni ne scias en kiu planedo, kaj la problemo estas solvita de neniu koncilio. Tiurilate ni nur konjektas; la sola afero certigita estas, ke tiu infero, kie ajn ĝi ekzistas, estas mondo el materiaj elementoj, kvankam sen Suno, sen steloj, sen Luno, pli malĝoja kaj kruda, sen ia ĝermo kaj bonefikaj aspektoj eble ankoraŭ troviĝantaj en la plej sekaj regionoj de ĉi tiu mondo, kie ni pekas.

La plej seriozaj teologoj ne kuraĝas, kiel la egiptoj, hindoj kaj grekoj, priskribi la teruraĵojn de tiu loĝejo, kaj ili limas sin nur montri ĝin al ni, kiel premisojn en la malmulto, kiun la Skribo parolas pri tiu loĝejo, nome la lago el fajro kaj sulfuro de la Apokalipso kaj la vermoj de Jesaja, tiuj vermoj eterne svarmantaj sur la kadavroj de Tofel, kaj demonoj turmentantaj la homojn, kiujn ili perdigis, kaj la homoj plorantaj, grincantaj per la dentoj, laŭ la diroj de la evangeliistoj.

Sankta Aŭgusteno ne konsentas, ke tiuj fizikaj suferoj estas nur respeguloj de la moralaj suferoj, kaj vidas en reala sulfura lago vermojn kaj aŭtentikajn serpentojn satiĝantajn per la korpoj, kunigantajn siajn pikojn al tiuj de la fajro. Laŭ paragrafeto de Sankta Marko, li pretendas ankoraŭ pli, ke tiu stranga fajro, kvankam materia, kiel la nia, influanta sur materiajn korpojn, ilin konservos, same kiel salo konservas la korpojn de la viktimoj. La kondamnitoj, ĉiam oferataj kaj ĉiam vivaj viktimoj, sentos la torturon de tiu fajro, kiu bruligas sen detruo, *penetrante en ilian haŭton*; ili estos sorbigitaj kaj saturitaj de tiu fajro ĉe ĉiuj siaj membroj, ĉe la ostaj medoloj, ĉe la okulaj pupiloj, ĉe

la plej kaŝitaj kaj sentemaj fibroj de sia esto. Vulkana kratero, se tien ili povus sin mergi, estus por ili loko de malvarmiĝo kaj ripozo.

Tiel tute firme diras la teologoj pli timemaj, diskretaj kaj moderaj; ili ne neas, ke en la infero estas aliaj korpaj turmentegoj, sed diras, ke por aserti tion mankas sufiĉa kono, almenaŭ tiel pozitiva, kiel tiu, kiun oni donis al ili pri la terura turmentego de la fajro kaj vermoj. Sed ekzistas pli aŭdacaj aŭ pli kleraj teologoj, kiuj donas pli detalajn, variajn kaj kompletajn priskribojn pri la infero. Kaj, kvankam oni ne scias, kie en la Spaco lokiĝas tiu infero, tamen ekzistas sanktuloj, kiuj ĝin vidis. Ili ne alvenis tien kun liro en la mano, kiel Orfeo, aŭ tenante glavon, kiel Uliso, sed transportitaj en spirito.

Al tiu nombro apartenas Sankta Tereza. Oni povus diri, laŭ la priskribo de tiu sanktulino, ke estas unu urbo en la infero; tie ŝi almenaŭ vidis ian specon de longa kaj mallarĝa strateto simila al tiuj abundantaj en antikvaj urboj, kaj ŝi terurite ĝin trakuris, irante sur ŝlima kaj haladza tereno, sur kiu svarmis monstraj reptilioj. Sed ŝia marŝo estis haltigita de speco de murego baranta la strateton, murego, en kiu troviĝis niĉo, kie ŝi sin ŝirmis, ne povante ekspliki la okazintaĵon. Tiu, ŝi diras, estas la loko, kiun oni destinis por ŝi, se ŝi trouzus, dum la vivo, la gracojn, kiujn Dio konsentis al ŝi en ŝia ĉelo en Avila.

Malgraŭ la mirinda facileco, kun kiu ŝi eniris en tiun niĉon, ŝi tamen ne povis sidiĝi aŭ kuŝiĝi, nek stari. Ŝi eĉ ne povis eliri. Tiuj teruraj muroj, kliniĝantaj sur ŝin, ĉirkaŭis ŝin, premadis ŝin, kvazaŭ animitaj de propraj movoj. Ŝajnis al la sanktulino, ke ili sufokis ŝin, strangulante ŝin, samtempe ŝin skrapvundante kaj tranĉe dispecigante. Sentante, ke ŝi brulas, ŝi ankaŭ spertis ĉiaspecajn angorojn.

Sen espero pri helpo, ĉio estis kvazaŭ mallumego ĉirkaŭ ŝi, kvankam tra tia mallumego ŝi ekvidis, ne sen timego, la abomenindan strateton, en kiu ŝi troviĝis, kun

ĝia malpurega ĉirkaŭaĵo. Tia scenejo estis por ŝi tiel neelportebla, kiel la premoj mem de la malliberejo (*).

Sendube tiu estis nenio alia ol malgranda angulo de la infero. Aliaj spiritaj vojaĝantoj estis pli favorataj, ĉar ili vidis en la infero grandajn urbojn, kvazaŭ grandegajn braĝejojn: Babilonon kaj Ninevon, Romon mem kun ĝiaj palacoj kaj temploj brulantaj, kun ĉiuj loĝantoj ĉenitaj.

Ili vidis komercistojn ĉe iliaj vendotabloj, pastrojn kune kun korteganoj en festensalonoj, katenitajn al lamentantaj seĝoj, levante al siaj lipoj ruĝajn flamantajn kalikojn. Servistojn surgenuiĝintajn en bolantaj kloakoj, kun brakoj disetenditaj, kaj princojn, de kies manoj fluadis fandita oro, kvazaŭ vora lafo. Aliaj vidis en la infero senfinajn ebenaĵojn kulturatajn de malsataj kamparanoj, kiuj, nenion rikoltante el tiaj fumantaj kampoj, el tiaj sterilaj semoj, formanĝis unuj aliajn, poste disirante, tiel multenombraj, kiel antaŭe, malgrasaj, voremaj kaj bande irante serĉi malproksime vane regionojn pli feliĉaj. Aliaj erarvagantaj kolonioj da kondamnitoj ilin tuj anstataŭis. Ankoraŭ aliaj rakontas, ke ili vidis en la infero montojn plenajn de abismoj, veantajn arbarojn, senakvajn putojn, fontojn nutratajn per larmoj, riveretojn el sango, neĝotempestojn en glaciaj dezertoj, ŝipetojn ekipitajn per afliktitoj veturantajn sur senbordaj maroj. Resume ili vidis ĉion, kion vidis la paganoj: ian funebran refiguraĵon de la Tero kun ties naturaj eternigitaj suferoj, kaj eĉ subterajn karcerojn, eŝafodojn kaj turmentilojn forĝitajn per niaj propraj manoj.

Fakte estas demonoj, kiuj prenas korpojn por pli bone turmenti la homojn en ties korpoj. Unuj havas vespertajn flugilojn, kornojn, skvamajn kirasojn, piedojn kun ungegoj, akrajn dentojn, kaj ili sin prezentas al ni armitaj per glavoj, tenajloj, pinĉiloj, segiloj, rostokradoj, balgoj, ĉio ardanta, kaj ili, rilate la homan karnon, havas nenian alian oficon, dum la tuta eterneco, ol tiun de buĉisto

(*) En tiu vizio oni rekonas ĉiujn karakterojn de la inkuboj, kaj eble estis tiaspeca la fenomeno okazinta al Sankta Tereza.

kaj kuiristo; aliaj, ŝanĝitaj en leonojn aŭ grandegajn vipurojn, kuntrenas siajn predojn en solecajn kavernojn; ĉi tiuj transformiĝas en korvojn por deŝiri la okulojn de certaj kulpuloj, kaj tiuj en flugantajn drakojn pretaj ĵeti sin sur la dorson de siaj viktimoj, forprenante ilin timigitaj, sangokovritaj, kriantaj, tra la malluma spaco, por fine ĵeti ilin en sulfurplenajn kuvojn. Ĉi tie nuboj da akridoj, da gigantaj skorpioj, kies aspekto kaŭzas naŭzon kaj hirtiĝon, kaj kies kontakto produktas konvulsiojn; tie plurkapaj monstroj, malfermegante voremajn faŭkojn, skuante sur siaj kriplecaj kapoj siajn vipurecajn dikajn harojn, muelante kondamnitojn per sangaj mandibloj, por elvomi ilin maĉitajn sed vivajn, ĉar ili estas senmortaj.

Tiuj demonoj kun impresaj formoj, okulfrape memorigantaj pri la dioj el Amenti kaj el la Tartaro, same kiel la idoloj adorataj de la fenicoj, moabitoj kaj aliaj idolanoj najbaraj al Judujo, tiuj demonoj ne agas hazarde, sed ciu havas sian difinitan funkcion. La malbono de ili praktikata en la infero estas proporcia al la malbono, kiun ili inspiris kaj praktikigis sur la Tero (*). La kondamnitoj estas punataj ĉe ĉiuj siaj organoj kaj sentumoj, ĉar ili ankaŭ ofendis Dion per ĉiuj siaj organoj kaj sentumoj. La pekintoj pro manĝamo estas punataj de la demonoj de glutemo; la mallaboremaj estas punataj de la demonoj de mallaboremo; la voluptamaj, de tiuj de diboĉo, kaj tiel plu, je varieco tiel vasta, kiel tiu de la pekoj. Ili sentos malvarmon dum brulado, kaj varmon, estante mem glacie malvarmaj, samtempe avidaj je movo kaj ripozo; soifantaj kaj malsatantaj; milfoje pli lacaj ol sklavo je la fino de labortago, pli malsanaj ol la mortantoj, pli senfortaj kaj ulcerplenaj ol la martiroj, kaj tiel por eterne.

(*) Vere stranga puno estas tiu konsistanta en la povo daŭrigi, en pli alta grado, la praktikon de malpli granda malbono farita sur la Tero. Estus pli racie, se la malbonfarintoj mem suferus la sekvojn de tiu malbonfaro, anstataŭ doni sin al la plezuro faciligi ĝin al aliulo.

Neniu el la demonoj evitas nek evitos iam ajn la fatalan realigon de sia tasko, ĉar ili estas disciplinitaj kaj fidelaj rilate al plenumo de la *venĝaj ordonoj, kiujn ili ricevis*. Kio do estus la infero sen tio? La pacientoj ripozus, se la ekzekutistoj kverelus aŭ enuus. Sed neniom da ripozo aŭ disputoj por iu ajn el ili, ĉar kvankam ili estas malicaj kaj multenombraj, troviĝante de unu ĝis alia ekstremo de la abismo, neniam estis vidataj sur la Tero vasaloj pli obeemaj al siaj regantoj, armeoj pli servemaj al siaj estroj aŭ monaĥaj kolektivoj pli humilaj kaj obeemaj al siaj superuloj (*).

Oni preskaŭ nenion konas pri la demona popolaĉo, pri tiuj malnoblaj Spiritoj konsistigantaj legiojn da vampiroj, bufoj, skorpioj, salamandroj kaj aliaj sennomaj bestoj; sed oni scias la nomojn de multaj el la princoj komandantaj tiajn legiojn, inter tiuj Belfegor, demono de volupto; Abadono aŭ Apolion, de hommortigo; Baal-Zebud, de la malpuraj deziroj, aŭ sinjoro de la muŝoj generantaj korupton; Mamono, de avareco; Moleĥo, Belialo, Baalgad, Astarot kaj multaj aliaj, precipe ilia superega ĉefo, la severega ĉefanĝelo, kiu en la ĉielo nomiĝis Lucifero, kaj en la infero nomiĝas Satano.

Jen resume la ideo al ni donita pri la infero laŭ la vidpunkto el ĝia fizika naturo kaj ankaŭ el la fizikaj punoj, kiujn oni tie suferas. Foliumu la skribaĵojn de la pastroj kaj antikvaj doktoroj; demandu la piajn legendojn; observu la skulptaĵojn kaj pentraĵojn en niaj preĝejoj; atentu tion, kion ili diras sur la predikokatedroj, kaj vi ekscios pli multe.”

---

(*) Tiuj samaj demonoj, ribelemaj kontraŭ Dio rilate la bonon, estas dotitaj per modela mildeco rilate la praktikon de malbono. Neniu sin detenas aŭ senfortiĝas dum la eterneco. Kia stranga metamorfozo de tiu, kiu estis kreita pura kaj perfekta, kiel la anĝeloj! Ĉu ne estas mirinde vidi ilin doni ekzemplojn pri harmonio, pri neŝanĝebla konkordo, kiam la homoj eĉ ne scias pace vivi sur la Tero, sed kontraŭe sin disŝiras reciproke? Vidante la ekscesajn penojn rezervitajn al la kondamnitoj, kaj komparante ilian situacion kun tiu de la demonoj, estas juste, ke oni demandu, kiuj estas pli kompatindaj – ĉu la viktimoj aŭ ĉu la ekzekutistoj.

13. La Aŭtoro sekvigis tiun kadron per la jenaj konsideroj, kies atingon ĉiu el ni penu kompreni:

"La renaskiĝo de la korpoj estas miraklo, sed Dio faras ankoraŭ ian duan miraklon, donante al tiuj mortemaj korpoj — jam unufoje uzitaj de la nedaŭraj provoj de la vivo, jam unufoje neniigitaj — la povon ekzistadi sen dissolviĝo en fornego, kie eĉ metaloj vaporiĝus. Ke oni diru ja, ke la animo estas sia propra turmentanto, ke Dio ne persekutas ĝin kaj nur ĝin forlasas en la malfeliĉa stato de ĝi mem elektita (kvankam tiu eterna forlaso de malfeliĉa kaj suferanta estulo ŝajnas neakord igebla kun la dia boneco) estas akcepteble; sed kion oni diras pri la animo kaj la spiritaj punoj, tion oni neniel povas diri pri la korpoj kaj respektivaj punoj, por kies eternigo jam ne sufiĉas, ke Dio sin konservu indiferenta, sed kontraŭe, ke Li intervenu kaj agu, sen kio la korpoj pereus.

La teologoj supozas do, ke post la renaskiĝo de la korpoj Dio estigas tiun duan miraklon, pri kiu ni parolis. Ke Li unue eltiras el la tomboj, ilin vorintaj, niajn korpojn el argilo; Li eltiras ilin tiaj, kiaj ili tien malsupreniris kun siaj originaj malsanoj kaj sinsekvaj degeneroj de la aĝo; Li redonas nin al tia stato, kadukaj, frostosentemaj, podagrozaj, plenaj de bezonoj, sentemaj por abelpiko, markitaj per la difektoj de la vivo kaj de la morto, kaj jen estas farita la unua miraklo; poste, al tiuj malfortikaj korpoj, pretaj reveni al la polvo el kiu ili eliris, Li donas econ, kiun ili neniam havis — la senmortecon, tiun kapablon, kiun Li en sia kolero (prefere diru: en sia favorkoreco) forprenis de Adamo foriranta el la Edeno — kaj jen estas kompletigita la dua miraklo. Kiam nemortema, Adamo estis nevundebla, kaj kiam ne plu nevundebla, li fariĝis mortema; la morto sekvis de proksime la doloron. Resnakiĝo do restarigas nin eĉ ne en la fizikaj kondiĉoj de la senkulpa homo, nek en tiuj de pekinto, kaj ĝi prefere estas renaskiĝo nur de niaj mizeraĵoj, sed kun aldono de novaj mizeraĵoj, senfine pli teruraj.

Iamaniere ĝi estas vera kreaĵo, kaj la plej malica, kiun la imagemo eble kuraĝis koncepti. Dio ŝanĝas sian juĝon, kaj por aldoni al la spiritaj turmentoj de la pekuloj karnajn turmentojn povantajn daŭri eterne, Li subite transformas, per sia povo, la leĝojn kaj proprecojn, kiujn Li mem principe starigis por la materiaj komponaĵoj, renaskigas malsanajn kaj putrintajn karnojn, kaj, kunigante per malfarebla nodo tiujn elementojn inklinajn apartiĝi per si mem, Li tenas kaj eternigas, kontraŭ la natura ordo, tiun vivan putraĵon, ĝin ĵetante en fajron, ne por ĝin purigi, sed por konservi ĝin tia, kia ĝi estas, sentema, suferanta, ardanta, terura kaj, laŭ sia volo, senmorta. Por efektivigi tiun miraklon, Dio ŝanĝiĝas en unu el la inferaj ekzekutistoj, ĉar se la kondamnitoj povas atribui nur al si mem la spiritajn malbonojn, kompense nur al Dio ili povas imputi la aliajn.

Post la morto, laŭŝajne nesufiĉa estis la forlaso al malĝojo, al pento, al angoroj de animo, kiu sentas perdita la superegan bonon. Laŭ la teologoj Dio iros elpreni ilin, en tiu nokto, el la fundo de tiu abismo, venigante ilin por momento al la vivo, ne por ilin konsoli, sed por vesti ilin per ia korpo malbelega, flamanta, nepereema, pli infektita ol la tuniko de Dejanira, tiam forlasante ilin por ĉiam.

Malgraŭ tio Li ne forlasos ilin por ĉiam, tute ne, ĉar la Ĉielo kaj la Tero ekzistas pro konstanta ago de lia volo ĉiam aktiva. Dezirante, ke ili eterne kontribuu por siaj eternaj turmentoj al la edifo de la elektitoj, Dio senĉese havos en siaj manoj tiujn kondamnitojn, malhelpante, ke la fajro ilin konsumanta estingiĝu ĉe iliaj korpoj."

14. Ni prave diris, ke la infero de la kristanoj superis tiun de la paganoj. Efektive, en la Tartaro vidiĝas kulpuloj torturataj de la konsciencoriproĉo, antaŭ siaj viktimoj kaj siaj krimoj, afliktataj de tiuj, kiujn ili piedpremis dum la surtera vivo; ni vidas ilin forkuri de la lumo ilin penetranta, vane penantajn sin kaŝi for de la rigardoj ilin persekutantaj; tie le orgojlo estas faligata

kaj humiligata; ĉiuj prezentas stigmaton el sia pasint-eco, estante punataj pro siaj eraroj mem, en tia grado, ke por iuj sufiĉas, ke oni forlasu ilin al ilia sorto, ne estante necese pligrandigi iliajn punojn. Sed ili estas *ombroj*, t.e. *animoj kun fluidecaj korpoj*, bildoj de *sia surtera vivo*; tie oni ne vidas la homojn repreni siajn karnajn korpojn por suferi fizike, kun fajro penetranta ilian haŭton, saturante ilin ĝis la ostaj medoloj. Ankaŭ ne vidiĝas tie la eksceso de la torturoj konsistigantaj la fundon de la kristana infero. Juĝistoj severaj, sed justaj, eldiras verdikton proporcian al la delikto, dum en la imperio de Satano ĉiuj estas intermiksitaj en la samaj torturoj tute materiaj, sen helpo de ia ajn justeco.

Nekontesteble ekzistas hodiaŭ en la sino de la Eklezio mem multaj saĝaj homoj, kiuj ne akceptas laŭvorte tiajn aferojn, kaj ili tie vidas nurajn alegoriojn, kies signifon oni devas interpreti. Tiuj opinioj tamen estas individuaj kaj ne estas leĝo, sed la kredo al la materia infero kun ties sekvoj konsistigas plu kredartikolon.

15. Ni povus demandi, kiel estas homoj kapablaj vidi tiajn aferojn en ekstaza stato, se ĉi tiuj efektive ne ekzistas. Ne estas oportune klarigi ĉi tie la originon de la absurdaj vizioj, plufoje reproduktitaj kun ŝajno de realaĵo. Ni nur diru, ke principe estas necese konsideri, ke ekstazo estas la plej necerta el ĉiuj revelacioj (*), ĉar la stato de superekscito ne ĉiam estigas animan liberigon tiel kompletan, ke ĝi trudiĝas al absoluta kredo, plurfoje montrante la reflekton de antaŭtagaj priokupoj. La ideoj per kiuj la Spirito sin nutras kaj kies formo aŭ bildo estas konservata de la cerbo aŭ, pli bone dirite, de la perispirita envolvaĵo de la cerbo, sin reproduktas plivast-igitaj kvazaŭ ia miraĝo, sub vaporecaj formoj, kiuj sin krucas, intermiksas kaj estigas ian strangan tutaĵon. La ekstazuloj el ĉiuj religioj ĉiam vidis aferojn rilatajn al la kredo, de kiuj ili sin opinias penetritaj, kaj ne estas eksterordinare do, ke Sankta Tereza kaj aliaj, same kiel

(*) **La Libro de la Spiritoj**, §§ 443 kaj 444.

ŝi, saturitaj per inferaj ideoj el rakontoj, parolaj aŭ skribaj, havis viziojn, kiuj ne estas ĝustadire pli ol reproduktaĵoj kaŭzitaj de inkubo. Fanatika pagano prefere estus vidinta la Tartaron kaj la Furiojn, aŭ la fulmotenantan Jupiteron en Olimpo.

## ĈAPITRO V

### PURGATORIO

1. La Evangelio tute ne mencias la purgatorion, kiu estis rekonita nur de la Eklezio en la jaro 593. Ĝi nekontesteble estas ia dogmo pli racia kaj pli konforma al la justeco de Dio, ol la infero, ĉar ĝi starigas punojn malpli rigorajn kaj plenumeblajn por la eraroj de mezgrada graveco.

La principo de purgatorio estas do bazita sur justeco, ĉar, rilate la homan justecon, ĝi estas nedaŭra malliberigo kompare kun la dumviva kondamno. Kion ni diru pri lando, kiu havus nur mortopunon por krimoj kaj negravaj deliktoj?

Sen la purgatorio nur du ekstremaj alternativoj ekzistas por animoj: la superega feliĉo aŭ la eterna turmentego. Kaj laŭ tiu hipotezo, kio fariĝus el la animoj kulpaj nur pro negravaj eraroj? Ili partoprenus en la feliĉo de la elektitoj, eĉ ne neperfektaj, aŭ spertus la punon por la plej danĝeraj krimintoj, eĉ se ili ne faris multe da malbono, kio ne estas justa nek racia.

2. Sed la nocio pri purgatorio necese devus esti nekompleta, ĉar, konante nur la punon per fajro, oni faris el ĝi ian inferon malpli teruran, pro tio, ke la animoj tie ankaŭ ardas, kvankam en fajro malpli varma. Ĉar la dogmo pri la eternaj punoj estas neakordigebla kun la progreso, la animoj en la purgatorio ne liberiĝas el ĝi pro sia progreso, sed pro la preĝoj, kiujn oni faras

aŭ kiujn oni ordonas fari por ilia bono. Kaj se la unua penso estis bona, tiel ne okazis al la sekvoj venintaj el ĝi, pro la misuzoj de tiuj preĝoj. La pagataj preĝoj transformis la purgatorion en negocon pli profitigan, ol la infero (*).

3. Oni neniam precize determinis kaj difinis la lokon de la purgatorio kaj la naturon de la punoj tie suferataj. La prilumado de tiu afero estis konsentita al la Nova Revelacio, klariganta al ni la kaŭzon de la surteraj mizeraĵoj de la vivo, kies justecon nur la plureco de la ekzistadoj povas montri al ni.

Tiuj mizeraĵoj necese originas el la neperfektaĵoj de la animo, ĉar, se tiu estus perfekta, ĝi ne farus erarojn nek devus suferi iliajn sekvojn. Homo, kiu sur la Tero ekzemple estus sobra kaj modera ne suferus malsanojn devenantajn de ekscesoj.

Li plejofte estas malfeliĉa pro sia propra kulpo, sed, se li estas neperfekta, tia li estas, ĉar li tia estis antaŭ ol veni sur la Teron, por elaĉeti ne nur nunajn erarojn, sed ankaŭ antaŭajn erarojn ne elpagitajn. Li pagas per vivo da provoj tion, kion li suferigis al aliulo en antaŭa ekzistado. La sortovicoj, kiujn li spertas, estas siavice nedaŭra korektado kaj ia averto je la neperfektaĵoj, kiujn li devas forigi de si, por eviti malbonojn kaj progresi por la bono. Ili estas por la animo lecionoj de sperto, iafoje krudaj, sed des pli profitaj por la estonteco, ju pli profundaj estas la impresoj, kiujn ili faras. Tiuj sortovicoj okazigas senĉesajn luktojn, kiuj disvolvas liajn fortojn kaj liajn intelektajn kaj moralajn kapablojn. Per tiuj luktoj la animo refreŝiĝas en la bono, triumfante ĉiam, kiam ĝi havos bravecon por ilin subteni ĝis la fino.

---

(*) La purgatorio originis la skandalan komercon de indulgencoj, per kiuj oni vendas eniron en la ĉielon. Tiu misuzo estis la ĉefa kaŭzo de la Reformacio kaj instigis Luteron rifuzi la purgatorion.

La premio de la venko estas en la spirita vivo, kien la animo eniras radianta kaj triumfanta, same kiel soldato, kiu distingiĝas ĉe batalo por ricevi la gloran titolon heroo.

4. Ĉiu ekzistado estas okazo, ke la animo povu fari paŝon antaŭen; de ĝia volo dependas la pli aŭ malpli granda longeco de tiu paŝo: suriri multe da ŝtupoj aŭ resti sur la sama punkto. Ĉe ĉi tiu lasta okazo, ĉar pago por ĝiaj ŝuldoj frue aŭ malfrue nepre trudiĝas, la animo devos rekomenci novan ekzistadon en kondiĉoj ankoraŭ pli penaj, ĉar al ia neforviŝita makulo aldoniĝas alia makulo.

En sinsekvaj enkarniĝoj, la animo ja liberiĝas de siaj neperfektaĵoj, unuvorte ĝi sin *elpurigas*, ĝis kiam ĝi estos sufiĉe pura por forlasi la mondojn por elaĉeto, kia la Tero, kie la homoj elaĉetas la pasintecon kaj nunecon, celante la estontecon. Sed kontraŭe al la ideo, kiun oni havas pri ili, dependas de ĉiu homo plilongigi aŭ mallongigi sian restadon, laŭ la grado da progreso kaj pureco atingita de li mem per lia propra klopodo. Tiu liberiĝo okazas ne pro finiĝo de tempo nek pro aliulaj meritoj, sed pro la merito de ĉiu homo mem, laŭ ĉi tiuj vortoj de la Kristo: *Al ĉiu laŭ liaj faroj* (*), vortoj tute resumantaj la justecon de dio.

5. Tiu do, kiu suferas en ĉi tiu vivo, povas diri, ke tio okazas, ĉar li ne sufiĉe puriĝis en sia antaŭa ekzistado, devante, se tion li ne faris en la nuna, suferi ankoraŭ en la sekvonta. Tio estas samtempe justa kaj logika. Pro tio, ke la sufero estas propra al la neperfektaĵo, la homo des pli suferas, ju pli neperfekta li estas, sammaniere kiel malsano daŭros des pli da tempo, ju pli longa estos la prokrasto ĝin kuraci. Tiel, dum la homo estos fiera, li suferos je la sekvoj de sia fiero; dum egoisma, je tiuj de sia egoismo.

---

(*) Mateo, 16:27. – **La Trad.**

6. Pro siaj neperfektaĵoj la kulpa Spirito unue suferas en la spirita vivo, kaj poste estos al li donita la korpa vivo, kiel rimedo de rebonigo. Tial li ja troviĝas en tiu nova ekzistado, ĉu kun personoj, kiujn li ofendis, ĉu en medioj analogaj al tiuj, en kiuj li praktikis malbonon, ĉu ankoraŭ en situacioj kontraŭaj al tiuj de sia antaŭa vivo, kiel ekzemple la mizero, se li estis malbona riĉulo, kaj la humiliĝo, se fierulo.

La elaĉeto en la mondo de la Spiritoj kaj sur la Tero ne estas duobla puno por ili, sed ia aldono, ia disvolviĝo de efektiva laboro faciliganta la progreson. La profito de tiu laboro dependas de la Spirito. Ĉu ne estas al li preferinde, ke li revenu sur la Teron, kun probableco atingi la ĉielon, ol ke li estu senapelacie kondamnita, ĝin definitive forlasante? La dono de tiu libereco estas pruvo de la saĝeco, boneco kaj justeco de Dio, kiu volas, *ke la homo ĉion ŝuldu al siaj klopodoj kaj estu la faranto de sia estonteco*; ke, malfeliĉa dum pli aŭ malpli longa tempo, li plendu, nur pri si mem, ĉar la vojo de progreso estas ĉiam libera al li.

7. Konsiderante kiel granda estas la sufero de iaj kulpaj Spiritoj en la nevidebla mondo, kiel terura estas la situacio de aliaj, des pli peniga pro ilia nepoveco antaŭvidi la finiĝon de tiuj suferoj, oni povus diri, ke ili troviĝas en *infero*, se tiu vorto ne kuntrenus la ideon pri ia eterna kaj materia puno.

Sed pro la revelacio de la Spiritoj kaj la ekzemploj, kiujn ili prezentas al ni, ni scias, ke la limdato de *la elaĉeto dependas de la pliboniĝo de la kulpulo.*

8. Spiritismo ne neas, sed pli ĝuste konfirmas la estontan punon. Kion ĝi detruas, tio estas infero ie lokita kun fornegoj kaj senapelaciaj punoj. Ĝi ankaŭ ne neas purgatorion, ĉar ĝi pruvas, ke en ĝi ni troviĝas kaj ĝin precize difinas, kaj, klarigante la kaŭzon de la surteraj mizeroj, ĝi kondukas al la kredo tiujn samajn, kiuj ĝin neas. Ĉu ĝi forpelas la preĝojn por la mortintoj? Tute

ne, ĉar la suferantaj Spiritoj ilin petas; ĝi altigas ilin al devo de karitato kaj elmontras ilian efikecon por *konduki al bono* la Spiritojn kaj, per tiu rimedo, mallongigi iliajn turmentiĝojn [(*)]. Parolante al la intelekto, ĝi jam longe portas fidon al multaj nekreduloj, sugestante preĝon al la animo de tiuj, kiuj ĝin malŝatis. Kion Spiritismo certigas, estas tio, ke la valoro de la preĝo estas en la penso, ne en la vortoj, ke la plej bonaj preĝoj estas tiuj el la koro, ne tiuj el la lipoj, kaj fine tiuj, kiujn ĉiu murmuras el si mem, ne tiuj, kiujn oni eldiras por mono. Kiu do kuraĝus ĝin riproĉi?

9. Kiel ajn longa estas la tempo de tiu puno en la spirita vivo aŭ sur la Tero, kie ajn ĝi okazu, ĝi ja havos finon post nelonga aŭ longa tempo. Reale ekzistas por la Spirito nur du alternativoj, nome *puno nedaŭra kaj proporcia al la kulpo, kaj grada rekompenco laŭ la merito*. Spiritismo forpelas la trian alternativon, tiun *pri la eterna kondamno*. Infero reduktiĝas al simbola figuro pri la plej intensaj suferoj, kies fino estas nekonata. Purgatorio ja estas relaĵo.

La vorto purgatorio kuntrenas ideon pri ĉirkaŭlimigita loko: jen kial ĝi pli kompreneble aplikiĝas al la Tero, ol la senfina Spaco, kie vagas la suferantaj Spiritoj, kaj des pli, ĉar la naturo de la surtera elaĉeto havas la karakterojn de efektiva elaĉeto.

Pliboniĝinte, la homoj liveros al la nevidebla mondo nur bonajn Spiritojn; kaj ĉi tiuj, enkarniĝinte, siavice liveros al la korpa homaro nur perfektiĝintajn elementojn. Tiam la Tero ĉesos esti elaĉeta mondo kaj la homoj ne plu suferos la mizerojn devenantajn de siaj neperfektaĵoj.

Cetere, per tia transformiĝo, kiu nuntempe okazas, la Tero altiĝos en la hierarkio de la mondoj [(**)].

---

[(*)] Vd "La Evangelio laŭ Spiritismo", ĉap. XXVII, **Agado de la preĝo**.

[(**)] Vd "La Evangelio laŭ Spiritismo", ĉap. III, **Progresado de la mondoj.**

10. Sed kial la Kristo ne parolis pri purgatorio? Ĉar, se ne ekzistis la ideo, ankaŭ ne estis vorto por ĝin esprimi.

La Kristo helpis sin per la vorto *infero*, la sola uzata, kiel ĝenerala termino, por sendistinge nomi la estontajn punojn. Se li lokus flanke de la vorto *infero* ian rilatan al purgatorio, li ne povus precizigi ĝian efektivan sencon, ne tuŝante aferon rezervitan al la estonteco; li devus fine konsekri la ekzistadon de du specialaj lokoj de puno. Laŭ la ĝenerala koncepto, infero kun la ideo de puno implicite enfermis tiun de *purgatorio*, kiu estas nenio alia ol maniero de puno.

La klarigo pri la naturo de la punoj estis destinita al la estonteco, kiu ankaŭ devis redukti la inferon al ĝia ĝusta valoro. Se la Eklezio, post ses jarcentoj, decidis rompi la silenton de Jesuo pri la purgatotio, dekretante ties ekziston, tiel estis tial, ke la Eklezio opiniis, ke li ne diris ĉion. Kaj kial ne okazos al aliaj aferoj, same kiel al tiu punkto?

# ĈAPITRO VI

## DOKTRINO PRI LA ETERNAJ PUNOJ

*Origino de la doktrino pri la eternaj punoj. Argumentoj favore al la eternaj punoj. Materia neebleco de la eternaj punoj. La doktrino pri la eternaj punoj epokofaris. Jeĥezkel kontraŭ la eternaj punoj kaj la origina peko.*

### Origino de la doktrino pri la eternaj punoj

1. La kredo al la eterneco de la punoj perdas terenon tagon post tago, tiamaniere ke, eĉ ne estante profeto, oni povas antaŭvidi ĝian baldaŭan finon.

Tial tiel potencaj kaj konvinkaj estas la argumentoj kontraŭ ĝi, ke al ni ŝajnas preskaŭ senutile, ke ni de nun okupiĝu pri tia doktrino, lasante ĝin estingiĝi per si mem.

Sed oni ne povas kontesti, ke, kvankam kaduka, ĝi ankoraŭ estas la klavo de la kontraŭuloj de novaj ideoj, la punkto, kiun ili defendas plej obstine, konvinkitaj pri ĝia vundebleco, kaj malpli konvinkitaj pri la sekvoj de tiu falo.

Tial la demando meritas seriozan ekzamenon.

2. La doktrino pri la eternaj punoj havis sian pravon de ekzisto, kiel tiu pri la materia infero, dum la timo povis esti brido por homoj intelekte kaj morale malmulte progresintaj.

Pro la neebleco lerni la nuancojn plurfoje delikatajn de bono kaj malbono, kaj ankaŭ la relativan valoron de

la malpligravigaj kaj pligravigaj cirkonstancoj, tiam la homoj malmulte aŭ eĉ neniom okupiĝus pri la ideo pri la moralaj punoj.

Ili eĉ ne komprenus la nedaŭrecon de tiuj punoj nek la justecon rezultantan de iliaj gradiĝoj kaj proporcioj.

3. Ju pli proksima al la primitiva stato, des pli materia estas la homo.

La morala saĝo estas tio, kio en li disvolviĝas plej malfrue, kaj tial li povas fari pri Dio, pri liaj atributoj kaj pri la estonta vivo ideon nur tre malperfektan kaj malprecizan.

La homo similigas Dion al sia propra naturo, kaj Dio estas por li nenio alia ol suvereno absoluta, tiom pli terura, kiom nevidebla, kvazaŭ ia despota reĝo, kiu, enfermita en sia palaco, neniam sin montrus al siaj regatoj. Ne komprenante lian moralan povon, ili nur akceptas Lin pro lia materia formo. Ili vidas Lin nur armita per fulmo, aŭ meze en fulmaj tempestoj, preterfluge dissemantan detruon, ruinon, simile al nevenkeblaj militistoj.

Iu Dio milda kaj afabla ne estus Dio, sed malforta estulo nekapabla fariĝi obeata. Senkompata venĝemo, teruraj eternaj punoj estis neniom neakordigeblaj kun la ideo, kiun ili faris pri Dio, ne malplaĉis al ilia prudento. Estante senkompata ankaŭ li, la homo, ĉe siaj resentoj, kruela kontraŭ la malamikoj kaj severega kontraŭ la venkitoj, Dio, kiu estis supera al li, devus esti multe pli terura.

Por tiaj homoj estis necesaj religiaj kredoj similaj al ilia kruda naturo. Ia religio tute spirita, tute el amo kaj karitato ne povus esti konforma al iliaj brutalaj kutimoj kaj pasioj.

Ni do ne riproĉu al Moseo lian drakonan leĝaron nur sufiĉan por bridi la malobeeman popolon, nek la fakton, ke li faris el Dio ian venĝeman Dion. La epoko

tion postulis, tiu epoko, kiam la doktrino de Jesuo ne estus akceptita kaj eĉ sin nuligus.

4. Laŭmezure kiel la Spirito disvolviĝis, la materia vualo iom post iom foriĝis, kaj la homoj fariĝis kapablaj kompreni la spiritajn aferojn. Veninte, Jesuo jam povis proklami ian kompateman Dion, parolante pri lia regno, ne el ĉi tiu mondo, kaj aldirante: *Amu unu la alian kaj faru bonon al viaj malamantoj*, dum la antikvuloj diradis: *okulon pro okulo, denton pro dento*.

Nu, kiuj estis la homoj vivantaj en la tempo de Jesuo?

Ĉu ili estus animoj nove kreitaj kaj enkarniĝintaj? Sed, se tiel estus, ĉu Dio estus kreinta por la tempo de Jesuo animojn pli progresintajn ol tiuj en la tempo de Moseo? El tio, kio estus okazinta al ĉi tiuj lastaj? Ĉu ili konsumiĝus ĉe bruteco dum la tuta eterneco? La plej elementa prudento forpelas tiun hipotezon. Ne; tiuj animoj estis ja la samaj, kiuj vivadis sub la regado de la moseaj leĝoj, kaj kiuj estis akirintaj, tra pluraj ekzistadoj, la sufiĉan maturecon por kompreni pli progresintan doktrinon, tiel same, kiel hodiaŭ ili estas pli progresintaj por ricevi ankoraŭ pli kompletan instruon.

5. La Kristo ne povis tamen revelacii al siaj samtempuloj ĉiujn misterojn apartenantajn al la estonteco. Li mem asertis tion: *Multon alian mi dirus al vi, se vi povus ĝin kompreni, kaj jen kial mi parolas al vi per paraboloj*. Precipe rilate la moralon, t. e. la devojn de la homo, la Kristo estis tre klara, ĉar, tuŝante la senteman kordon de la materia vivo, li sciis fari sin komprenata; rilate aliajn punktojn, li kontentiĝis semadi sub alegoria formo la ĝermojn pli malfrue disvolviĝontajn.

La doktrino pri la estontaj punoj kaj rekompencoj apartenas al ĉi tiu lasta speco de ideoj. Precipe rilate la punojn, li ne povus subite forpeli la antaŭkonceptitajn ideojn. Veninte skizi al la homoj novajn devojn, anstataŭigi malamon kaj venĝon per amo al la proksimulo kaj per karitato, la egoismon per abnegacio, tio jam estis multo; krome li ne povis racie malintensigi la timon antaŭ

la puno rezervita por la koruptuloj, samtempe ne malfortigante la ideon de la devo.

Se li promesis la regnon de la ĉielo al la bonuloj, tiu regno estis malpermesita al la malbonuloj, kaj kien ĉi tiuj irus? Krome estus necesa la inversiĝo de la Naturo, por ke la tre elementaj inteligentoj estu impresitaj, tiel ke ili identiĝu kun la spirita vivo, konsiderante la fakton, ke Jesuo direktiĝas al la popolo, al la malplej klera parto de la socio, kiu ne povis malbezoni figurojn iamaniere palpeblajn, kaj kiu ne komprenis subtilajn ideojn.

Jen la motivo, kial Jesuo ne ekpritraktis supraĵajn detalojn koncerne tion; en tiu tempo estis necese nenio pli ol kontraŭmeti punon al rekompenco.

6. Se Jesuo minacis kulpulojn per la eterna fajro, li ankaŭ minacis ĵeti ilin en Gehenon. Nu, kio estas Geheno? Nenio alia ol loko en la ĉirkaŭaĵo de Jerusalemo, forĵetejo destinita por la malpuraĵo de la urbo.

Ĉu oni devus interpreti tion ankaŭ laŭlitere? Sed tiu estis unu el tiuj drastaj figuroj, kiujn li uzadis por impresi la popolamasojn. Tio sama okazas rilate la eternan fajron. Kaj se tia ne estus lia penso, li sin kontraŭdirus, altigante la kompatemon kaj favorkorecon de Dio, ĉar kompatemo kaj neflekseblco estas kontraŭaj sentoj sin reciproke nuligantaj. Oni ne komprenus la sencon de la paroloj de Jesuo, atribuante al ili la sankcion de la dogmo de la eternaj punoj, ĉar lia tuta instruado proklamis la mildecon de la Kreinto kaj ties boneco.

Laŭ la preĝo *Patro Nia* Jesuo instruas al ni diri: *Pardonu al ni, Sinjoro, niajn kulpojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj*. Se la kulpulo ne devus atendi ian pardonon, estus ja tute neutile ĝin peti.

Ĉu tiu pardono estas senkondiĉa? Ĉu ĝi estas ia pura kaj simpla nuligo de puno, kiun oni meritas? Ne; la mezuro de tiu pardono dependas de la maniero, kiel oni mem pardonis, kio signifas, ke ni ne estos pardonitaj, se ni mem ne pardonos. Konsiderante la forgeson pri ofendoj ia absoluta

kondiĉo, Dio ne povus postuli de malforta homo tion, kion Li ĉiopova ne farus.

La preĝo *Patro Nia* estas ĉiutaga protesto kontraŭ la eterna venĝo de Dio.

7. Por homoj posedantaj nur konfuzan ideon pri la spiriteco de la animo, la materia fajro neniel estis senfundamenta, des pli ĉar ĝi jam partoprenis la paganan kredon preskaŭ universale disvastigitan. Ankaŭ la eterneco de la punoj havis nenion, kiu povus malplaĉi al la homoj jam de multaj jarcentoj submetitaj al la leĝaro de la timegiga Jehovo. En la penso de Jesuo la eterna fajro estis do nenio alia ol simpla figuro, kaj estis al li tute ne grave, ke tiu figuro estis laŭlitere interpretata, kondiĉe ke ĝi servu kiel brido al la homaj pasioj. Li sciis plie, ke la tempo kaj la progreso prenus sur sin la taskon ekspliki la alegorian sencon, des pli ĉar, laŭ lia antaŭdiro, la *Spirito de Vero* venos klarigi al la homoj ĉiujn aferojn. La esenca karaktero de la nenuligeblaj punoj estas la *senefikeco de la pento*, kaj Jesuo neniam diris, ke la pento ne meritas la pardonon de la Patro.

Kontraŭe, ĉiam, kiam sin prezentis al li okazo, li parolis pri ia Dio kompatema, favorkora, preta, akcepti la erarintan filon revenantan al la patra hejmo; nefleksebla, fakte, por la obstina pekinto, sed ĉiam preta ŝanĝi punon por pardono al la kulpinto sincere pentinta. Ĉi tiu certe ne estas la trajto de la senkompata Dio. Ankaŭ decas rimarkigi, ke Jesuo neniam eldiris kontraŭ iu ajn, eĉ kontraŭ la plej grandaj kulpuloj, la fatalan kondamnon.

8. Ĉiuj primitivaj religioj, adoptante la karakteron de la popoloj, havis militistajn diojn, kiuj batalis antaŭ siaj armeoj.

La Jehovo de la hebreoj disponigis al ili mil manierojn ekstermi la malamikojn; li rekompencis ilin per la venko, aŭ ilin punis per malvenko. Tia ideo koncerne Dion, igis ilin honori aŭ pacigi Lin per besta aŭ homa sango, kaj el tio originis la sangaj oferoj reprezentantaj tiel elstaran

rolon en ĉiuj antikvaj religioj. La judoj estis forigintaj la homajn oferojn; malgraŭ la instruoj de la Kristo, la kristanoj dum longa tempo opiniis, ke ili honoras la Kreinton, oferante pomile al flamoj kaj al torturoj tiujn, kiujn ili nomis herezuloj, kio sub alia formo konsistigis efektivajn homajn oferojn, ĉar ili okazigis ĉi tiujn oferojn por *la plej granda gloro de Dio*, kun akompano de religiaj ceremonioj. Hodiaŭ ili ankoraŭ alvokas la *Dion de la armeoj* antaŭ ol komenci batalon, Lin gloras post venko, kaj tiomfoje pro nejustaj kaj kontraŭkristanaj kaŭzoj.

9. Kiom malrapide la homo liberiĝas el siaj kutimoj, antaŭjuĝoj kaj primitivaj ideoj! Kvardek jarcentoj nin apartigas de Moseo, kaj nia kristana generacio ankoraŭ vidas trajtojn de antikvaj barbaraj kutimoj, se ne konsekritaj, almenaŭ aprobitaj de la nuntempa religio! Estis necesa la potenca unuiĝo de la *ne-ortodoksuloj* por forigi la ŝtiparojn kaj komprenigi la veran grandecon de Dio. Sed, ĉe manko de ŝtiparoj, ankoraŭ superregas la materiaj kaj moralaj persekutoj, tiel enradikiĝinta estas en la homo la ideo pri la dia krueleco. Nutrata per sentoj asimilitaj ekde la infanaĝo, ĉu la homo povos miri, ke la Dio al li prezentita, flatita pro barbaraj faroj, kondamnas al eternaj tortutoj kaj senkompate rigardas la suferon de la kulpintoj? Estas ja la filozofoj, malpiaj laŭ iuj homoj, tiuj, kiuj skandaliĝas, vidante la nomon Dio profanata per faroj malindaj je Li. Estas ili, kiuj montras Lin al la homoj, en lia tuta grandeco, senigante Lin je pasioj kaj malnoblaĵoj al Li atribuataj de ia malpli evoluinta kredo.

Pri tiu punkto la religio gajnis je digneco tiom, kiom ĝi perdis je ekstera prestiĝo, ĉar se ekzistas homoj sin donantaj al la formo, pli granda estas ja la nombro de tiuj sincere religiaj per la sento kaj per la koro.

Sed flanke de tiuj, kiom multe da homoj estas kondukataj, sen pli da pripenso, al neado de la tuta Providenco! La maniero kiel la religio haltis, en antagonismo kontraŭ la progresoj de la homa prudento, ne sciante akordigi ilin kun la kredoj, degeneris en diismon por

kelkaj, en absolutan skeptikismo por aliaj, kaj ni ne forgesu la panteismon, t. e. la homon fariĝantan mem Dio, pro manko de alia pli perfekta.

## Argumento favore al la eternaj punoj

10. Ni revenu al la dogmo de la eternaj punoj. Jen estas la ĉefa argumento elvokata favore al ĝi: "Estas doktrino sankciita inter la homoj, ke la graveco de la ofendo estas proporcia al la kvalito de la ofendito. La krimo de majestofendo, ekzemple la atenco kontraŭ suverena persono, estante konsiderata pli grava ol tiu kontraŭ iu anj vasalo, estas ja tial pli severe punata. Kaj Dio, estante multe pli alta ol suvereno, ĉar Li estas senfina, senfina devas ja esti la ofendo farita kontraŭ Li, same kiel senfina estu la respektiva puno, t.e. eterna".

*Refuto*: Ĉia refuto estas rezono, kiu devas havi sian deirpunkton, ian bazon, sur kiu ĝi sin apogu, do premisojn. Ni prenu tiujn premisojn el la propraj atributoj de Dio: *unika, eterna, neŝanĝema, nemateria, ĉiopova, superege justa kaj bona, senfina ĉe ĉiaj perfektaĵoj.*

Estas neeble koncepti Dion alie, ĉar, sen la senfina perfekteco, oni povus koncepti alian estaĵon superan al Li. Por ke Li estu unika super ĉiuj estaĵoj, estas necese, ke neniu povu superi Lin aŭ eĉ egali Lin je iu ajn afero. Nu, estas necese, ke Li estu tute senfina.

Kaj tial, ke la diaj atributoj estas senfinaj, ili spertas nek pligrandiĝon nek malgrandiĝon, alie ili ne estus senfinaj, nek Dio perfekta. Se oni forprenus plej malgrand-an parton de nur unu el liaj atributoj, Dio ne ekzistus plu, ĉar povus ekzisti estaĵo pli perfekta. La senlimeco de iu kvalito ekskludas la eblecon de ekzisto de alia kontraŭa kvalito, kiu povus malgrandigi aŭ nuligi ĝin. Estaĵo *senfine bona* ne povas havi plej etan pecon da malboneco, nek estaĵo *senfine malbona* povas havi plej etan pecon da boneco. Tiel, ankaŭ objekto ne estus absolute nigra kun la plej malgranda nuanco de blanko, kaj inverse. Starigita tiu deirpunkto, al la ĉi-supraj argumentoj ni kontraŭmetos la jenajn:

11. Nur ia senfina estaĵo povas fari ion senfinan. La homo, finhava ĉe siaj virtoj, ĉe siaj konoj, ĉe sia povo, ĉe siaj kapabloj kaj ĉe sia surtera ekzistado, povas produkti nur limhavajn aĵojn.

Se la homo povus esti senfina ĉe malbono, kiun li faras, li ankaŭ estus tia ĉe la bono, tiuokaze egaliĝante al Dio. Sed se la homo estus senfina ĉe bono, li ne praktikus malbonon, ĉar absoluta bono ekskludas ĉian malbonon.

Se oni konsentas, ke ia provizora ofendo kontraŭ Dio povus esti senfina, Dio, venĝante per *senfina* puno, estus do *senfine venĝema*; kaj se Dio estas senfine venĝema, Li ne povas esti senfine bona kaj favorkora, ĉar unu el tiuj atributoj ekskludas la alian. Se Li ne estas senfine bona, Li ne estas perfekta; kaj ne estante perfekta, Li ĉesas esti Dio.

Se Dio estas senkompata al la kulpulo pentanta, Li ne estas favorkora; kaj se Li ne estas favorkora, Li ĉesas esti senfine bona. Kaj kial Dio donus al la homoj ian pardoneman leĝon, se Li mem ne pardonus? El tio rezultus, ke la homo, kiu pardonas siajn malamikojn kaj pagas malbonon per bono, estus pli bona ol Dio, kiu restas surda al la pento de tiuj, kiuj Lin ofendas, rifuzante al ili, *por ĉiam*, la plej etan kareson.

Troviĝante en ĉiu loko kaj ĉion vidante, Dio devas vidi ankaŭ la torturojn al la kondamnitoj; kaj se Li konservas sin indiferenta al la ĝemoj tra la tuta eterneco, Li estos eterne senkompata; nu, sen kompato ne ekzistas senfina boneco.

12. Al tio oni respondas, ke la pekulo pentanta antaŭ la morto ricevas favorkorecon de Dio, kaj ke eĉ la plej granda kulpulo povus ricevi tiun favoron. Rilate tion, ne estas ia dubo, kaj oni komprenas, ke Dio pardonas la pentanton, tenante sin nefleksebla kontraŭ la obstinaj; sed se Li estas tute favorkora por la animo pentinta antaŭ la morto, kial Li ĉesos esti tia por tiu, kiu pentas post ĝi? Kial la pento efikas nur dum la vivo, nedaŭra

momento, kaj ne en la eterneco, kiu ne havas finon? Ĉirkaŭlimigitaj al difinita tempo, la diaj boneco kaj favorkoreco havus limon, kaj Dio ne estus senfine bona.

13. Dio estas superege justa. La superega justeco ne estas absolute senkompata, nek kondukas la kompatemon al tia grado, ke ĉiuj pekoj restu nepunitaj; kontraŭe ĝi rigore pesas bonon kaj malbonon, rekompencante unu kaj punante alian juste kaj proporcie, neniam trompiĝante ĉe aplikado de siaj decidoj.

Se pro nedaŭra peko ĉiam rezultanta el la neperfekta naturo de la homo kaj plurfoje el la medio, kie li vivas, la animo povas esti eterne punita sen espero pri kompato aŭ pardono, ne estas proporcio inter la peko kaj la puno — ne estas justeco,. Repaciĝante kun Dio, pentante kaj petante ripari la malbonon faritan, la kulpulo devas ekzistadi plu por la bono, por la bonaj sentoj. Sed, se la puno estas nenuligebla, tiu ekzistado por la bono ne fruktodonos, kaj neatento al bono signifas maljusteco. Inter la homoj, la kondamnito sin korektinta sukcesas vidi sian punon malpligravigita kaj iafoje pardonita; kaj tiel la homa justeco estus pli perfekta ol tiu de Dio.

Se la puno estas nenuligebla, la pento estos neutila, kaj la kulpulo, nenion atendante de sia korektiĝo, persistas en malbono, tiamaniere ke Dio ne nur kondamnas lin al eterna suferado, sed ankaŭ al restado en malbono por la tuta eterneco. En tio estas nek boneco, nek justeco.

14. Estante senfina je ĉio, Dio devas ampleksi pasintecon kaj estontecon; kreante animon, Li devas scii, ĉu ĝi tro grave eraros por esti eterne kondamnita. Se Li ne scios tion, lia scio ne estos senlima, kaj Li ĉesos esti Dio. Se Li scias, Li memvole kreas animon jam de tiam destinitan por la eterna turmentiĝo, kaj tiuokaze Li ĉesos esti bona.

Ĉar Dio povas favori pentintan pekulon, *elprenante lin el la infero*, ĉesas ekzisti eternaj punoj, kaj la juĝo de la homoj estas nuligita.

15. Sekve la doktrino pri la absolutaj eternaj punoj kondukas al neado aŭ almenaŭ malfortiĝo de kelkaj atributoj de Dio, estante mem neakordigebla kun la absoluta perfekteco, el kio rezultas la jena dilemo: aŭ Dio estas perfekta, kaj ne estas eternaj punoj, aŭ estas eternaj punoj, kaj Dio ne estas perfekta.

16. Ankaŭ oni alvokas favore al la dogmo de eternaj punoj la jenan argumenton:

"Estante eterna, la rekompenco donita al la bonuloj devas havi kiel korolarion la eternan punon. Estas juste proporciigi punon al rekompenco."

*Refuto*: Ĉu Dio kreis la animojn por fari ilin feliĉaj aŭ malfeliĉaj?

Evidente la feliĉo de la homo devas esti la celo de la Kreinto; alie Li ne estus bona. La feliĉon li atingas per sia propra indeco, kiun, akirita, li ne plu perdas. La malo estus lia degenero. Eterna feliĉo estas do konsekvenco de lia senmorteco.

Sed antaŭ ol atingi la perfektecon, la homo devas lukti, batali kontraŭ malbonaj pasioj. Ĉar ĝi ne estis kreita perfekta, sed *perfektigebla*, por ke ĝi ricevu la meritojn de siaj faroj, la animo povas fari erarojn, kiuj rezultas el ĝia natura malforteco. Kaj se ĝi estus eterne punata pro tiu malforteco, en tiu okazo oni povus demandi, kial Dio ne kreis ĝin pli forta?

La puno estas prefere averto pri la jam farita malbono, kaj ĝi devas celi rekondukon de la animo al bona vojo. Se la puno estus fatala, la deziro pliboniĝi estus superflua; eĉ la celo de la kreado ne estus atinginta, ĉar ekzistus estuloj antaŭdestinitaj por feliĉo aŭ por malfeliĉo. Se iu animo pentas, ĝi povas regeneri, kaj povante regeneri, ĝi povas aspiri al feliĉo.

Ĉu Dio estus justa, se Li rifuzus al ĝi la respektivajn rimedojn?

Se la bono estas superega celo de la Kreado, la feliĉo, kiu estas ĝia premio, devas esti eterna; kaj la puno, kiel rimedo ĝin atingi, devas esti kelkatempa. La

plej elementa nocio pri la homa justeco ordonas, ke oni ne punu por eterne tiun, kiu deziras fari bonon.

17. Unu lasta argumento favore al la eternaj punoj estas ĉi tiu:

"La timo antaŭ la eternaj punoj estas ia brido; nuligita ĉi tiu, la homo, nenion timante, donus sin al ĉiaj ekscesoj."

*Refuto*: Tiu rezono estus pravigebla se la neeterneco de la punoj efektive forstrekus ĉian punan sankcion.

La estontaj feliĉo aŭ malfeliĉo estas rigora sekvo de la justeco de Dio, ĉar la identeco de kondiĉoj por bono kaj malbono estus la neado de tiu justeco.

Sed, ne estante eterna, eĉ tial la puno ne ĉesas esti timiga, kaj ju pli granda estas la konvinkiĝo pri ĝi, des pli granda estas la timo.

Ĉi tiu konvinkiĝo siavice estos tiom pli profunda, kiom pli racia estos la fundamento de la puno. Puno, al kiu oni ne kredas, ne povas esti brido, kaj la eterneco de la punoj estas afero, al kiu oni ne kredas.

La kredo al tiu puno, ni tion jam asertis, havis sian utilecon, sian pravon de ekzisto en ia epoko; hodiaŭ ĝi ne nur ĉesas impresi la animojn, sed eĉ produktas nekredantojn.

Antaŭ ol rekomendi ĝin kiel necesaĵon, estus bone elmontri ĝian realecon. Krom tio, estus necese observi ĝian efikon ĉe tiuj, kiuj ĝin rekomendas kaj klopodas elmontri.

Kaj, malfeliĉe, multaj el tiuj pruvas per faroj, ke ili tute ne timas la eternajn punojn.

Tiamaniere, nekapabla bridi la proprajn kredantojn, kian aŭtoritaton tiu kredo al eternaj punoj povos havi super la nekredantoj?

## Materia neebleco de la eternaj punoj

18. Ĝis ĉi tie ni batalis per rezono, kontraŭ la dogmo de la eternaj punoj. Nun ni elmontru ĝin en kontraŭdiro

al la pozitivaj faktoj de ni observitaj, pruvante ĝian neebleco.

Laŭ tiu dogmo la sorto de la animoj, nepre fiksita post la morto, estas do ia definitiva bremso aplikita al la progreso.

Nu, ĉu la animo progresas aŭ ne? Jen la demando: Se ĝi progresas, la eterneco de la punoj estas neebla.

Ĉu oni povos dubi pri tiu progreso, vidante la grandegan variecon de moralaj kaj intelektaj kapabloj ekzistantaj sur la Tero, ekde la sovaĝulo ĝis la civilizita homo, taksante la diferencon, kiun iu popolo prezentas de unu al alia jarcento? Se oni ne akceptas, ke tiu progreso ne apartenas al samaj animoj, oni ne povas ne akcepti, ke Dio kreis animojn en ĉiuj gradoj da progreso, laŭ la tempoj kaj lokoj, favorante unujn kaj destinante aliajn por eterna malsupereco, kio estus neakordigebla kun la justeco, kiu cetere devas esti egala por ĉiuj estuloj.

19. Estas nekontesteble, ke la animo morale kaj intelekte malprogresinta, kiel tiu de la barbaraj popoloj, ne povas havi la samajn elementojn de feliĉo, la samajn kapablojn por ĝui la brilajn glorojn en la Senfino, kiel la animoj profunde kapablaj. Se tamen tiuj animoj ne progresos, ili en pli favoraj kondiĉoj nur povos ĝui en la eterneco ian feliĉon, por tiel diri, negativan.

Por akordiĝi kun la rigora justeco, ni do venos al la konkludo, ke la plej progresintaj animoj estas tiuj iam malprogresintaj, kiuj poste akiris progreson. Sed ĉi tie ni atingas la gravan demandon pri la *plureco de la ekzistadoj*, kiel solan kaj racian rimedon por solvi la malfacilaĵon. Ni tamen flanken metu tiun demandon, kaj konsideru la animon el la vidpunkto de unu sola ekzistado.

20. Ni prezentu al ni dudekjaran junulon, el tiuj, kiujn oni ofte renkontas, malkleran, instinkte malvirtan, skeptikan, junulon, kiu neas sian animon kaj Dion; kiu donas sin al konfuzo; kaj kiu faras ĉiaspecan malbonon.

Poste tiu junulo troviĝas en favora, pli bona medio; li laboras, lernas, sin korektas iom post iom kaj fine fariĝas kredema kaj kompatema. Jen palpebla ekzemplo de anima progreso dum la vivo, ekzemplo ĉiutage okazanta. Tiu viro mortas en profunda aĝo, kiel sanktulon, kaj memkompreneble fariĝas nedubebla lia savo. Kia estus tamen lia sorto, se akcidento metus finon al lia vivo tridek aŭ kvardek jarojn pli frue? Li troviĝus en kondiĉoj postulataj por kondamno, kaj, se tiu okazus, ĉia progreso fariĝus neebla por li.

Tiel, konforme al la doktrino de la eternaj punoj, ni havus homon savitan nur danke la cirkonstancon, ke li vivis pli longe, cirkonstanco cetere delikata, ĉar iu ajn akcidento povus ĝin hazarde neniigi. Konsiderante, ke lia animo povis progresi en difinita tempo, kial ĝi ne povus progresi plu post la morto, se dum la vivo ia kaŭzo fremda al ĝia volo tion neebligis al ĝi? Kial Dio rifuzus al ĝi rimedojn, ke ĝi regeneriĝu en alia vivo, se en ĉi tiu Li al ĝi ilin jam donis? Tiuokaze la pento venis, kvankam malfrue; sed, se ekde la momento de la morto estus altrudita nenuligebla kondamno, tiu pento estus vana por ĉiam, same kiel detruitaj estus ankaŭ la kapabloj de tiu animo por la progreso, por la bono.

21. La dogmo de la absoluta eterneco de la punoj estas do neakordigebla kun la anima progreso, al kiu ĝi kontraŭmetas nesupereblan baron. Tiuj du principoj sin detruas reciproke, kaj la nepra kondiĉo de la ekzisto de unu estas la neniigo de la dua. Kiu el la du efektive ekzistas? La leĝo de progreso estas evidenta: ĝi ne estas teorio, ĝi estas fakto konfirmita de la eksperimento: ĝi estas dia, nekadukema leĝo de la Naturo. Se do tiu leĝo ekzistas ne akordigebla kun alia, tio estas nur pro tio, ĉar alia ne ekzistas. Se fakte ekzistus la dogmo de la eternaj punoj, Sankta Aŭgusteno, Sankta Paŭlo kaj multaj aliaj neniam estus vidintaj la ĉielon, se ili estus mortintaj antaŭ ol atingi la progreson, kiun la konvertiĝo alportis al ili.

Al ĉi tiu lasta aserto oni respondas, ke la konvertiĝo de tiuj sanktuloj ne rezultas el la anima progreso, sed de la al ili permesita graco, kiu ilin trafis.

Sed tio estas nura vortludo. Se tiuj sanktuloj faris malbonon kaj poste bonon, tio signifas, ke ili pliboniĝis; ili do progresis. Nu, kial Dio estus doninta al ili, kiel specialan favoron, la gracon sin korekti? Jes, kial al ili, kaj ne al aliaj? Ĉiam, ĉiam la doktrino de la privilegioj, neakordigebla kun la justeco de Dio kaj kun lia egala amo por ĉiuj estuloj.

Laŭ la Spiritisma Doktrino, konforme al la vortoj de la Evangelio, al la logiko kaj al la plej rigora justeco, la homo estas frukto de siaj faroj, dum ĉi tiu vivo kaj post la morto, nenion ŝuldante al nepotismo: Dio lin rekompencas pro lia diligenteco kaj punas pro lia neglekto, tiel longe, kiel li en ĝi persistos..

## La doktrino pri la eternaj punoj epokofaris

22. La kredo al la eterneco de la punoj efike superregis dum la homoj ne atingis komprenon pri la morala povo. Estas ja tio, kio okazas al infanoj dum kelka tempo retenitaj per minacoj de ĥimeraj estaĵoj, per kiuj oni ilin timigas: atingante la periodon de rezonado, ili forpelas mem tiajn ĥimerojn de la infanaĝo, kaj estas absurde pretendi ilin regi per tiaj rimedoj. Se tiuj, kiuj ilin gvidas, dezirus ankoraŭ inspiri al ili la verecon de tiaj fabeloj, tiuj certe falus de ilia konfido. Estas ja tio, kio okazas hodiaŭ al la homaro, eliranta el sia infaneco kaj forlasante, por tiel diri, siajn vindojn. La homo ne estas plu ia pasiva instrumento kurbigita sub materia forto, nek la iama kredema estulo, akceptanta ĉion kun okuloj fermitaj.

23. Kredemo venas el kompreno, kiu tial ne povas esti trudata. Se, dum ia periodo de la homaro, la dogmo de la eternaj punoj sin tenadis sendanĝera. Trudata kiel veraĵo absoluta, kiam la prudento ĝin forpelas, aŭ

la homo volas kredi kaj serĉas ian kredon pli racian, malproksimiĝante de tiuj, kiuj adoptas la dogmon, aŭ tiam li absolute malkredas ĉion. Kiu trankvile studos la aferon, tiu vidos, ke en niaj tagoj la dogmo de la eternaj punoj de longe faras pli da ateistoj kaj materialistoj ol ĉiuj filozofoj.

La ideoj havas senĉese progresantan fluon, kaj estas absurde, ke oni volas regi la homojn, forigante ilin de tiu fluo; provi ilin reteni, retroirigi aŭ eĉ nur haltigi, dum ĝi antaŭeniras, estas sin kondamni, perdiĝi. Sekvi aŭ ĉesi sekvi tiun evoluon estas demando pri vivo aŭ morto, tiel por la religioj, kiel por la registaroj.

Ĉu tiu fatalismo estas bono aŭ malbono? Por tiuj, kiuj vivas el la pasinteco, vidante ĝin neniiĝi, ĝi estas malbono; sed por tiuj, kiuj vivas por la estonteco, ĝi estas leĝo de progreso, ĝustadire de Dio.

Kontraŭ leĝo de Dio estas neutila ĉia ribelo, neebla la lukto. Por kio do ĉiamaniere subteni ian kredon, kiu neniiĝas pro manko de uzo, kaŭzante pli da malutiloj ol utiloj al la religio? Ha! estas malĝojige tion diri, sed ĉi tie materia demando regas super la religia demando.

Tiu kredo estas vaste esplorata de la ideo, ke per mono oni malfermas la pordojn de la ĉielo kaj de la infero. La monsumoj kolektitaj per tiuj rimedoj, iam kaj ankoraŭ hodiaŭ, estas nekalkuleblaj, kaj vere fabela estas la anticipa imposto pagita pro timo antaŭ la eterneco. Kaj estante nedeviga tiu imposto, ĝia produkto estas ĉiam proporcia al la kredo; estingita ĉi tiu, tiu estos neproduktema.

Infano volonte donas sian kukon al tiu, kiu promesas al ĝi forpeli lupfantomon, sed se la infano jam ne kredas je lupfantomoj, ĝi gardos la kukon.

24. Donante pli saĝajn nociojn pri la estonta vivo kaj pruvante, ke ĉiu el ni povas efektivigi feliĉon per siaj propraj faroj, la Nova Revelacio nepre renkontos grandegan kontraŭstaron, des pli viglan, ĉar ĝi sekigas unu el la plej profitodonajn fontojn de enspezo. Kaj tiel

okazis ĉiam, kiam nova eltrovo aŭ invento skuas enradikiĝintajn kaj antaŭstarigitajn kutimojn.

Kiu vivas el malnovaj kaj malfacilaj procedoj, tiu neniam ĉesas diskonigi iliajn superecon kaj bonegecon kaj senkreditigi la novajn, pli ŝparajn.

Ĉu oni kredas ekzemple, ke la presarto estis aklamata de la klaso de kopiistoj, malgraŭ la bonfaroj, kiujn ĝi alportis al la socio?

Ne, ili certe devus ĝin detrui. La samo okazas rilate maŝinojn. Fervojojn kaj centojn da aliaj malkrovoj kaj aplikoj.

Antaŭ la okuloj de nekredantoj, la dogmo de la eternaj punoj ŝajnas senvaloraĵo, pri kiu ili ridas; por filozofo tiu dogmo havas socian gravecon, pro la ekscesoj, kiujn ĝi instigas, dum la vere religiema homo havas la dignecon de la religio interesiĝanta je la detruado de la ekscesoj, kiujn tia dogmo naskas, kaj fine de ilia kaŭzo.

## Jeĥezkel kontraŭ la eternaj punoj kaj la origina peko

25. Al tiu, kiu deziras renkonti em la Biblio pravigon por la eterneco de la punoj, oni povas prezenti kontraŭajn tekstojn, kiuj tiurilate ne ebligas dusencaĵojn. La jenaj paroloj de Jeĥezkel estas la plej klara neo, ne nur de la fatalaj punoj, sed ankaŭ de la respondeco, kiun la peko de la patro de la homa genro okazigus al lia raso:

1. Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante: 2. Kial vi uzas ĉe vi en la lando de Izraelo ĉi tiun proverbon kaj diras: La patroj manĝis nematurajn vinberojn, kaj la dentoj de la filoj agaciĝis? 3. Kiel Mi vivas, diras la Sinjoro, la Eternulo, neniu plu uzos ĉe vi tiun proverbon en Izrael. 4. Jen ĉiuj animoj apartenas al Mi: kiel la animo de la patro, tiel ankaŭ la animo de la filo apartenas al Mi; tiu animo, kiu pekas, ĝi mortos.

5. Sed se iu estas virta kaj agas laŭleĝe kaj juste; 7. neniun perfortas, redonas al la ŝuldanto lian garantiaĵon,

ne faras rabon, donas sian panon al malsatulo kaj nudulon kovras per vesto; 8. ne donas kontraŭ procentegoj kaj ne prenas troprofiton, detenas sian manon de maljustaĵo, faras inter homo kaj homo juĝon justan; 9. sekvas Miajn leĝojn kaj observas Miajn ordonojn, por plenumi ilin ĝuste: tiu estas virtulo, kaj li certe vivos, diras la Sinjoro, la Eternulo.

10. Sed se li naskigis filon, kiu estas rabisto, verŝas sangon, aŭ faras ion similan; 13. li ne devas vivi: ĉar li faras ĉiujn tiujn abomenindaĵojn, li devas morti; lia sango estu sur li.

14. Sed jen li naskigis filon, kiu vidas ĉiujn pekojn de sia patro, kiujn ĉi tiu faras, kaj li timas, kaj ne faras ion similan: 17. li ne mortos pro la pekoj de sia patro, sed li nepre vivos. 18. Kaj lia patro, ĉar li faris kruelaĵojn, prirabis fraton, kaj faris inter sia popolo tion, kio estas nebona: li mortos pro siaj malbonagoj.

19. Vi diros: Kial filo ne estas punata pro la malbonagoj de la patro? La filo agis ĝuste kaj juste, observis ĉiujn Miajn leĝojn kaj plenumis ilin; tial li nepre vivos.

20. Tiu animo, kiu pekas, ĝi mortos; *filo ne suferos pro la malbonagoj de la patro, kaj patro ne suferos pro la malbonagoj de la filo*; la virteco de virtulo estas sur li, kaj la malpieco de malpiulo estos sur li.

21. Sed se malpiulo deturnas sin de ĉiuj siaj pekoj, kiujn li faris, kaj li observos ĉiujn Miajn leĝojn kaj agados ĝuste kaj juste, tiam li vivos, li ne mortos. 22. Ĉiuj liaj malbonagoj, kiujn li faris, ne estos rememorataj; pro siaj bonaj agoj, kiujn li faris, li vivos.

23. Ĉu Mi deziras la morton de malpiulo?, diras la Sinjoro, la Eternulo; kiam li deturnos sin de sia konduto, li ja vivos. (Jeĥezkel, ĉap. XVIII.)

Diru do al ili: Kiel Mi vivas, diras la Sinjoro, la Eternulo, Mi deziras ne la morton de malvirtulo, sed ke la malvirtulo deturnu sin de sia vojo kaj restu vivanta. (Jeĥezkel, ĉapitro XXXIII, § 11. ) (*)

---

(*) Ĉar ĉi tiu teksto aperas en "La Ĉielo kaj la Infero" en biblia lingvaĵo, laŭ formo kaj stilo, kaj ne en tiu de Kardec, ni preferis preni ĝin rekte el la Biblio klasike tradukita de Zamenhof. – **La Trad.**

## ĈAPITRO VII

## LA ESTONTAJ PUNOJ LAŬ SPIRITISMO

*La karno estas malforta. Principoj de la Spiritisma Doktrino pri la estontaj suferoj. Puna kodo de la estonta vivo*

### La karno estas malforta

Ekzistas malvirtaj inklinoj, kiuj evidente estas propraj al la Spirito, ĉar ili alligiĝas pli al la moralo ol al la korpo; aliaj ŝajne dependas ĝustadire de la organismo, kaj tial tiuj homoj ilin posedantaj estas juĝataj malpli respondaj: tiaj estas rigardataj la emo al kolero, al mallaboremo, al volupto ktp.

La spiritualismaj filozofoj hodiaŭ plene rekonas, ke la cerbaj organoj respondantaj al la diversaj kapabloj ŝuldas sian disvolviĝon al la aktiveco de la Spirito. Tiel, tiu disvolviĝo estas efiko, kaj ne kaŭzo. Homo estas muzikisto ne pro tio, ke li havas emon al muziko, sed li posedas tiun inklinon, ĉar lia spirito estas muzikema. Se la aktiveco de la Spirito reagas sur la cerbon, ĝi ankaŭ devas reagi sur aliajn partojn de la organismo.

La Spirito tiamaniere estas la artisto por sia propra korpo, tajlita de li, por tiel diri, laŭ liaj bezonoj kaj por la manifestado de liaj inklinoj.

Tiamaniere la korpa perfekteco de la progresintaj rasoj ne estas produkto de distingiĝaj kreadoj, sed rezultado de la spirita laboro, kiu perfektigas la materian envolvaĵon, laŭmezure kiel la kapabloj disvolviĝas.

Laŭ natura konsekvenco de ĉi tiu principo, la moralaj inklinoj de la Spirito devas ŝanĝi la kvalitojn de la sango, doni al ĝi pli aŭ malpli grandan aktivecon, kaŭzi pli-malpli grandan sekrecion de galo aŭ de iaj likvaĵoj. Tiel estas ekzemple, ke la buŝo de glutemulo pleniĝas de salivo antaŭ apetitiga manĝaĵo.

Vere ne manĝaĵo povas eksciti la gustuman organon, ĉar ĉi tiu ne havas kontakton kun ĝi; la Spirito do, kies sentemo estas vekita, agas ja sur tiun organon per sia penso, dum alia persono restos indiferenta ĉe la vido de la sama frandaĵo. Ankoraŭ pro tiu motivo la sentema persono facile verŝas larmojn. Ne estas la abundo de ĉi tiuj, kiu donas sentemon al la Spirito, sed ties sentemo kaŭzas ja la abundan sekrecion de larmoj. Sub regado de sentokapablo la organismo sin kondiĉas (*) al la normala inklino de la Spirito, sammaniere kiel ĝi sin kondiĉas al la inklino de la glutema Spirito.

Laŭ tiu sinsekvo de ideoj, oni komprenas, ke kolerema Spirito emas stimuli galhumoran temperamenton, el kio rezultas, ke homo ne estas kolerema pro tio, ke li estas galhumora, sed male li estas galhumora, ĉar li estas korelema. Tio sama okazas rilate al ĉiuj aliaj instinktaj inklinoj: maldiligenta kaj malforta tenos sian organismon en atonia stato rilata al sia karaktero, dum aktiva kaj energia homo donos al sia sango kaj al siaj nervoj kvalitojn tute kontraŭajn. La ago de la Spirito sur la korpon estas tiel evidenta, ke ni ne malofte vidas gravajn organajn malordojn okazi post fortaj moralaj emocioj.

La vulgara esprimo: — *La emocio aliigis lian sangon* — ne estas tiel senigita je senco, kiel oni povus supozi. Nu, kio alia povus aliigi la sangon, ol la moralaj inklinoj de la Spiritoj?

---

(*) La aŭtoro skribis **s'est approprié** (p. 93, 4-a eldono, Parizo, 1869), pro manko en tiu tempo, de verbo pli specifa al la perfekta traduko de la ideo. **Noto de la Eldonfako** de BSF, en 1973.

Oni povas rekoni, almenaŭ parte, ke la temperamenton estigas la naturo de la Spirito, kiu estas kaŭzo, kaj ne efiko.

Kaj ni diris, ke ni rekonas nur parte, ĉar ekzistas okazoj, en kiuj la korpo evidente influas la morlajn kapablojn, kiel ekzemple ia morba aŭ nenormala stato estas efiko de eksteraj, neatenditaj kaŭzoj sendenpendaj de la Spirito, kiaj estas temperaturo, klimato, denaskaj korpaj difektoj, nedaŭra malsano ktp.

La moralaj kapabloj de la Spirito povas, en tiuj okazoj, ĉe liaj manifestiĝoj, esti afekciitaj de patologia stato, dum lia interna naturo restas ne modifita. Senkulpigi sin de eraroj pro malforteco de la karno estas nenio alia ol sofismo por eviti respondecon.

*La karno estas malforta nur pro tio, ke la Spirito estas malforta*, kio inversigas la aferon, donante al li la respondecon pri ĉiuj liaj faroj. La karno senigita je penso kaj volo neniam povas superstari la Spiriton, kiu estas ja la pensanta estaĵo kun propra volo.

Estas ja la Spirito, kiu donas al la karno la kvalitojn, kiuj respondas al lia instinkto, same kiel la artisto donas al la materia verko la trajtaron de sia genieco. Liberiĝinte de la bestecaj instinktoj, li ellaboras korpon, kiu ne estas plu tirano de lia aspiro, por spiritigo de sia memo, kaj tiam la homo komencas manĝi por vivi kaj ne plu vivi por manĝi.

La morala respondeco pri la agoj en la vivo tamen restas netuŝita; sed la racio diras al ni, ke la sekvoj de tiu respondeco devas esti proporciaj al la intelekta disvolviĝo de la Spirito. Tiel, ju pli klarmensa estos ĉi tiu, des malpli senkulpinda li fariĝos, ĉar el inteligento kaj morala sento naskiĝas la nocioj pri bono kaj malbono, pri justeco kaj maljusteco.

Ĉi tiu leĝo klarigas la malsukceson de la Medicino ĉe iaj kazoj. Ĉar temperamento estas efiko, kaj ne kaŭzo, ĉiu klopodo por ĝin modifi neniiĝas antaŭ la moralaj inklinoj de la Spirito, kiu kontraŭmetas al ĝi preterkons-

cian reziston, kiu nuligas la terapeŭtikan agon. Sekve oni ja devas agi sur la komencan kaŭzon.

Donu, se vi povas, kuraĝon al poltrono, kaj vi tuj vidos ĉesigitaj la fiziologiajn efikojn de timo. Tio ankoraŭfoje pruvas la bezonon, kiun havas la kuracarto kalkuli je la spirita influo sur la organismojn.

(*Revue Spirite,* Marto 1869, p.65.)

## Principoj de la Spiritisma Doktrino pri la estontaj punoj

La Spiritisma Doktrino rilate la estontajn punojn, ne baziĝas sur antaŭkonceptita teorio; ĝi ne estas sistemo anstataŭanta alian sistemon: pri ĉio ĝi sin apogas sur observoj, kaj ĉi tiuj ja donas al ĝi plenan aŭtoritaton. Neniu iam prezentis al si, ke la animoj post la morto troviĝos en tiaj aŭ tiaj kondiĉoj; estas ja tiuj samaj animoj foririntaj de sur la Tero, kiuj hodiaŭ venas al ni por inici nin en la misterojn de la estonta vivo, por priskribi al ni sian feliĉan aŭ malfeliĉan situacion, la impresojn, la transformiĝon per la morto de la korpo, unuvorte kompletigante la instruojn de la Kristo en tiu rilato.

Estas necese aserti, ke en ĉi tiu okazo la revelacioj ne venas de unu sola Spirito, kiu povus vidi aferojn de sia vidpunkto, sub unu sola aspekto, ankoraŭ regate de surteraj antaŭjuĝoj. Ankaŭ la revelacio ne estas ekskluzive donita al ia individuo, kiu povus konduki sin per ŝajnaĵoj aŭ per ia *ekstaza vizio* trompebla, kaj tio multfoje estas nenio alia ol reflekso de ekzaltita imagemo(*).

Temas ja pri sennombraj ekzemploj donitaj de Spiritoj el ĉiuj kategorioj, ekde tiuj plej altrangaj ĝis tiuj plej malaltklasaj, per tiom do aliaj helpantoj (mediumoj)

(*) Vidu ĉap. VI, § 7, kaj “La Libron de la Spiritoj”, §§ 443 kaj 444.

disaj tra la mondo, kaj tiel la revelacio ne estas privilegio de iu homo, ĉar ĉiuj povas provi ĝin kaj observi ĝin, ne devigante sin kredi laŭ kredo de aliulo.

## Puna kodo de la estonta vivo

Spiritismo ne venas do kun sia aparta aŭtoritateco formuli kodon el fantazio; ĝia leĝo pri la estonteco de la animo, deduktita el observoj pri la fakto, povas resume konsisti el la sekvantaj punktoj:

1-a: La animo aŭ Spirito suferas en la spirita vivo la sekvojn de ĉiuj neperfektaĵoj, kiujn li ne sukcesis korekti en sia korpa vivo. Lia stato feliĉa aŭ malfeliĉa estas propra al lia grado da pureco aŭ malpureco.

2-a: La kompleta feliĉo ligiĝas al perfekteco, t.e. al la kompleta pureco de la Spirito. Ĉia neperfektaĵo estas siavice kaŭzo de sufero kaj de ĝuosenigo, same kiel ĉia akirita perfektaĵo estas fonto de ĝuo kaj mildigilo de suferoj.

3-a: *Ne ekzistas eĉ unu neperfektaĵo de la animo, kiu ne kuntrenas pereigajn kaj neeviteblajn sekvojn, same kiel ne ekzistas nur unu bona kvalito, kiu ne estas fonto de ia plezuro*.

Tiel la sumo de la punoj estas proporcia al tiu de la neperfektaĵoj, kiel la sumo de la plezuroj al tiuj de la kvalitoj.

La animo, kiu ekzemple havas dek neperfektaĵojn, pli multe suferas ol tiu havanta tri aŭ kvar; kaj kiam el tiuj dek neperfektaĵoj ne restos al ĝi pli ol duono aŭ kvarono, tiam ĝi malpli suferos.

Liberiĝinte de ĉiuj, tiam la animo estos tute feliĉa. Ankaŭ sur la Tero tiu, kiu havas multajn malsanojn, suferas pli ol tiu, kiu havas nur unu aŭ neniun. Pro la sama kialo, la animo posedanta dek perfektaĵojn havas pli da ĝuoj, ol alia malpli riĉa je bonaj kvalitoj.

4-a: Pro la leĝo de progreso, kiu donas al ĉiu animo la eblecon akiri la bonon al ĝi mankantan, kaj seniĝi je tio malbona, laŭ la propraj klopodo kaj volo, ni vidas, ke la estonteco estas konsentita al ĉiuj homoj. Dio forpuŝas neniun el siaj infanoj, Li prefere ilin akceptas en sian sinon, laŭmezure kiel ili atingas la perfektecon, konsentante al ĉiuj la meriton laŭ iliaj verkoj.

5-a: Pro tio, ke sufero dependas de neperfekteco, kiel ĝuo de perfekteco, la animo kuntrenas sian propran punon aŭ premion, kie ajn ĝi troviĝas, ne bezonante ĉirkaŭlimigitan lokon.

Infero estas ĉie, kie troviĝas suferantaj animoj, kaj ĉielo same estas tie, kie troviĝas feliĉaj animoj.

6-a: La bono kaj malbono, kiujn ni faras, rezultas el la kvalitoj, kiujn ni posedas. Ne fari bonon, kiam ni povas ĝin fari, estas do rezulto de nia neperfekteco. Se ĉia neperfektaĵo estas fonto de sufero, la Spirito devas suferi ne nur pro la farita malbono, kiun li praktikis, sed ankaŭ pro la bono, kiun li ne faris en la surtera vivo.

7-a: La Spirito suferas pro la malbono, kiun li faris, kaj tial, *ke lia atento estas konstante direktata al la sekvoj de tiu malbono*, li pli bone komprenas ĝiajn nekonvenaĵojn kaj penas sin korekti.

8-a: Ĉar estas senlima la justeco de Dio, la bono kaj malbono estas rigore konsiderataj, kaj ne estas eĉ unu ago, eĉ unu malbona penso, kiu ne havas fatalajn sekvojn, kiel ne ekzistas eĉ unu merita ago, eĉ bona penso de la animo, kiu perdiĝas, *ĉar tiaj agoj estas komenco de progreso eĉ al la plej perversaj*.

9-a: Ĉia farita eraro, ĉia realigita malbono estas ŝuldo, kiu devos esti pagita; se ĝi ne estos pagita en unu ekzistado, ĝi nepre estos en la sekvanta aŭ sekvantaj, ĉar ĉiuj ekzistadoj estas solidaraj inter si. Kiu kvitiĝos en ia ekzistado, tiu ne bezonos fari tion la duan fojon.

10-a: La Spirito suferas jen en la korpa mondo, jen en la spirita, la sekvon de siaj neperfektaĵoj. La mizeroj, la sortovicoj spertitaj en la korpa vivo originas el niaj neperfektaĵoj, estas elpagoj de faritaj eraroj en la nuna aŭ en antaŭaj ekzistadoj.

Laŭ la naturo de la suferoj kaj sortovicoj de la korpa vivo, oni povas taksi la naturon de la faritaj eraroj en antaŭa ekzistado kaj tiun de la neperfektaĵoj, kiuj ilin originigis.

11-a: La elpago varias laŭ la naturo kaj graveco de la eraro, kaj tial la sama eraro povas kaŭzi diversajn elpagojn laŭ la malpligravigantaj aŭ pligravigantaj cirkonstancoj, en kiuj ĝi estos farita.

12-a: Ne ekzistas regulo absoluta nek unuforma pri la naturo kaj daŭro de la puno: la sola ĝenerala leĝo estas, ke ĉia eraro havos punon kaj ĉia merita ago rekompencon *laŭ sia graveco*.

13-a: La daŭro de puno dependas de la pliboniĝo de la kulpa Spirito.

Nenia kondamno estas al li preskribita por difinita tempo. Kion Dio postulas por fino de suferoj, tio estas ia pliboniĝo serioza, efektiva, sincera, de reveno al bono.

Tiel la Spirito ĉiam estas la juĝanto de sia propra sorto, povante longigi siajn suferojn pro sia obstineco en malbono, aŭ ilin mildigi kaj nuligi per praktiko de bono.

Kondamno por antaŭdifinita tempo havus la duoblan nekonvenaĵon daŭrigi la suferegon de la forneinta Spirito, aŭ liberigi lin de sufero, kiam li ankoraŭ restus en malbono. Nu, Dio, kiu estas justa, nur punas pro malbono, *dum ĝi ekzistas*, kaj ĉesas lin puni, *kiam malbono ne plu ekzistas* (*); cetere la morala malbono, estante per si

(*) Vidu ĉap. VI, § 25, citaĵo de Jeĥezkel.

mem kaŭzo de sufero, daŭrigos ĉi tiun, dum tiu ekzistos, aŭ malintensigos, laŭmezure kiel tiu malkreskos.

14-a: La daŭro de la puno dependas de la pliboniĝo de la Spirito, kaj kulpulo, kiu neniam pliboniĝus, ĉiam suferus, kaj por li la puno estus eterna.

15-a: Ia kondiĉo propra al malsupereco de la Spiritoj estas, ke ili ne duonvidas la finon de sia provado, kredante ĝin eterna, kiel eterna laŭŝajne devas esti tia puno. (*)

16-a: Pento, kvankam ĝi estas la unua paŝo por regenerado, ne sufiĉas per si mem; *elaĉeto kaj riparado* estas necesaj.

Pento, elaĉeto kaj riparado do estas la tri kondiĉoj necesaj por forviŝi la trajtojn de kulpo kaj ties sekvojn. Pento mildigas la amaraĵojn de la elaĉeto, malfermante per espero la vojon al renobligo; sed nur riparo povas nuligi efikon, detruante ties kaŭzon. Kontraŭe pardono estus favoro, ne nuligo.

17-a: Pento povas okazi ĉie kaj ĉiam; se ĝi venos malfrue, la kulpulo pli longe suferos.

Tiel longe ĝis la signoj de kulpo malaperos, elaĉeto konsistas en la fizikaj kaj moralaj suferoj, kiuj estas ĝiaj sekvoj, ĉu en la nuna vivo, ĉu en la spirita post la morto, ĉu ankoraŭ en alia korpa ekzistado.

Riparo konsistas en farado de bono al tiuj, al kiuj oni faris malbonon. Kiu ne riparas siajn erarojn en ia ekzistado pro malforteco aŭ malbonvolo, tiu troviĝos

(*) **Ĉiama** estas sinonimo de **eterna**. Oni diras pri la limo de la ĉiamaj neĝoj; la eterna glacio sur la polusoj; oni diras ankaŭ ĉiama sekretario de la Akademio, kio ne signifas, ke li estas tio **ad perpetuam**, sed sole nur dum **senlima** tempo. **Eterna** kaj **ĉiama** oni do uzas laŭ senco nedifinita. Laŭ ĉi tiu senco oni povas diri, ke la punoj estas eternaj, por esprimi, ke ili ne havas limitan daŭron; eternaj do por la Spirito, kiu ne vidas ilian finon.

en posta ekzistado en rilato kun la samaj personoj, kiuj faris plendojn kontraŭ li, en memvole elektitaj kondiĉoj, por elmontri al ili dankon kaj fari al ili tiom da bono, kiom da malbono li faris al ili. Ne ĉiuj eraroj kuntrenas rektan kaj efektivan malprofiton; en tiuj okazoj riparado efektiviĝas, se oni faras tion, kio devus esti farita kaj estis malzorgita; se oni realigas la devojn forlasitajn, la misiojn ne plenumitaj; se oni praktikas bonon kompense pro farita malbono, t. e. fariĝante humila, se oni longe estis fiera; amema, se oni longe estis severa; karitema, se oni longe estis egoisma; bonkora, se oni longe estis malica; laborema, se oni longe estis mallaborema; utila, se oni longe estis neutila; sobra, se oni longe estis malsobra; kaj resume se oni ja respondas per bonaj ekzemploj la faritajn malbonaĵojn. Kaj tiel la Spirito progresas, profitante el sia propra pasinteco. (*)

18-a: La neperfektaj Spiritoj estas forigitaj for de la feliĉaj mondoj, kies harmonion ili konfuzus. Ili restas en la malsuperaj mondoj, elpagante siajn erarojn per ĉagrenoj de la vivo, kaj puriĝante de siaj neperfektaĵoj,

---

(*) La bezono de riparo estas principo de rigora justeco, kiun oni povas konsideri kiel efektivan leĝon por morala restariĝo de la Spiritoj. Sed neniu religio ankoraŭ proklamis tiun doktrinon. Kelke da personoj ĝin forpuŝas, ĉar al ili estas pli facile kvitiĝi je la malbonaj agoj per simpla pento, kio kostas nenion, krom vortoj de kelkaj formuloj; sed tiel pensante, ke ili estas kvitaj, ili poste vidos, ĉu tio al ili sufiĉis. Ni povus demandi, ĉu tiu principo ne estas konfirmata de la homa leĝo, kaj la dia justeco povas esti malsupera ol tiu de la homoj? Plie, ĉu tiuj leĝoj estus plenumitaj, se nur la homo, ilin malobeantaj, simple dirus pro trouzo de konfido, ke li ilin senfine respektas?

Kial tiaj homoj hezitus antaŭ tasko, kiun ĉiu honesta homo altrudus al si, kiel devon, laŭ la grado de siaj fortoj?

Kiam ĉi tiu afero pri riparo estos akceptita de la kredo de la homamasoj, tiam ĝi estos plia brido al iliaj ekscesoj, kaj multe pli potenca ol la infero kun la respektivaj eternaj punoj, ĉar ĝi interesas la vivon en ties tuta aktualeco, kaj la homo povos kompreni la originon de la cirkonstancoj, kiuj faras la vivon pena, aŭ ties efektivan situacion.

ĝis kiam ili meritos enkarniĝon en mondoj pli superaj, morale kaj fizike pli progresantaj. Se oni povas koncepti ian ĉirkaŭlimigitan lokon por puno, tia loko sendube estas tiuj mondoj por kulpelaĉeto, ĉirkaŭ kiuj svarmas neperfektaj elkarniĝintaj Spiritoj, atendantaj novajn ekzistadojn, kiuj ebligos al ili ripari malbonon, helpante ilian progreson.

19-a: Ĉar la Spirito ĉiam havas liberan volon, la progreso iafoje fariĝas malrapida, kaj forta lia obstino ĉe malbono. En tiu stato li povos resti jarojn kaj jarcentojn, kaj fine venos momento, kiam lia obstineco modifiĝos pro sufero, kaj spite sian arogantecon li rekonos la superan povon, kiu lin superregas.

Kiam manifestiĝos la unuaj signoj de pento, tiam Dio faras lin duonvidi la esperon. Ne ekzistas Spirito nekapabla neniam progresi, destinita al eterna malsupereco, kio estus neado de la leĝo de progreso, kiu providence regas ĉiujn kreitojn.

20-a: Kiaj ajn estas la malsupereco kaj maliceco de la Spiritoj, *Dio neniam ilin forlasas*. Ĉiuj homoj havas sian gardanĝelon (gvidanton), kiu zorgas pri ili, suflorante bonajn pensojn, vekante dezirojn progresi kaj ankaŭ esplorante la movojn de ilia animo, per kiuj ili klopodas ripari en ia nova ekzistado la malbonon, kiun ili praktikis. Sed tiu interveno de la gvidanto preskaŭ ĉiam fariĝas kaŝe, tiel ke ne okazu premo, ĉar la Spirito devas progresi per *impulso de sia propra volo*, neniam per ia altrudo.

Bono kaj malbono estas praktikataj laŭ libera volo, kaj sekve la Spirito ne estas *fatale* pelita al unu aŭ alia direkto.

Obstinante longe ĉe malbono, la Spirito suferos ties sekvojn, tiel longe, kiel daŭros lia obstinado, sammaniere kiel donante paŝon al bono, li tuj sentas ĝiajn bonfarantajn efikojn.

*Rimarko.* Estus eraro supozi, ke, pro efiko de la leĝo de progreso, la certeco pli aŭ malpli frue atingi perfektecon

kaj feliĉon povas stimuli obstinon ĉe malbono, sub kondiĉo de posta pento: unue tial, ke la malsupera Spirito ne vidas la finon de sia situacio; due tial, ke estante aŭtoro de sia propra malfeliĉo, li nepre komprenos, ke dependas de li mem ĝin ĉesigi; ke li estos malfeliĉa, dum longe li persistos ĉe malbono; fine tial, ke la sufero estos senfina, se li mem ne metos finon al ĝi. Tio do estus negativa kalkulo, kies sekvojn la Spirito rekonus la unua. El la dogmo pri la nepageblaj punoj oni ja faras tian hipotezon, ĉar al homo estas malpermesita por ĉiam ia ajn ideo pri espero, kaj li do ne havas intereson konvertiĝi al bono, sen ia profito al li.

Antaŭ tiu leĝo ankaŭ falas la kontraŭdiro kontraŭ la dia antaŭsciado, ĉar Dio, kreinte la Spiriton, efektive scias, ĉu li iros pro sia libera volo la bonan aŭ malbonan vojon; scias, ke li estos punita, se li faros malbonon; sed ankaŭ li scias, ke tia nedaŭra puno *estas rimedo* igi lin kompreni sian eraron, frue aŭ malfrue sekvante la bonan vojon. El la doktrino pri la eternaj punoj oni konkludas, ke Dio scias, ke tiu Spirito bankrotos, kaj ke li do estas antaŭdecide kondamnita al senfinaj torturoj.

21-a: La respondeco pri kulpoj estas tute persona, neniu Spirito suferas pro aliulaj eraroj, esceptinte se li ilin originigis, ĉu kaŭzante ilin per sia ekzemplo, ĉu ne ilin malhelpante, dum li tion povis fari.

Tial la memmortiginto estas ĉiam punita; sed kiu, pro malico, instigas alian homon sinmortigi, tiu suferas eĉ pli grandan punon.

22-a: Kvankam senfina la diverseco de punoj, kelkaj tamen estas propraj al la malsupereco de la Spiritoj, kaj kies sekvoj, krom iaj detaloj, estas iom pli-malpli identaj.

La plej tuja puno de tiuj ĉefe ligiĝintaj al la materia vivo, malprofite por la spirita progreso, estas la malrapideco de la animomalligiĝo; la angoro akompanantaj la morton kaj vekiĝon en la alia vivo, la sekvanta konfuziĝo, kiu povas daŭri monatojn aŭ jarojn.

Kontraŭe la elkarniĝo de tiuj, kiuj havas sian konsciencon pura, kaj kiuj jam en la materia vivo portas spiritan vivon, estas rapida, sen skuoj, preskaŭ nula ilia konfuziĝo ĉe paca vekiĝo.

23-a: Tre ofta fenomeno inter la Spiritoj kun ia morala malsupereco estas, ke ili opinias sin ankoraŭ vivantaj, kaj tiu iluzio povas daŭri multe da jaroj, dum kiuj ili spertos ĉiujn bezonojn, ĉiujn turmentojn kaj perpleksaĵojn de la vivo.

24-a: Por krimulo la senĉesa ĉeesto de liaj viktimoj kaj de la cirkonstancoj de la krimo estas kruela suferego.

25-a: Ekzistas Spiritoj dronintaj en densa mallumo; aliaj troviĝas en absoluta izoliteco en la Spaco, turmentataj de la nescieco pri sia propra situacio kaj ankaŭ pri la sorto ilin atendanta. La pli kulpaj suferas torturojn multe pli akrajn, ĉar ili ne duonvidas ties finon.

Al kelkaj estas malpermesate vidi siajn karulojn, kaj ĉiuj ĝenerale ekspertas kun rilata intenseco la malbonojn, la dolorojn kaj seniĝojn, kiujn ili okazigis al aliulo. Tia situacio daŭras tiel longe ĝis la deziro de *riparo* per *pento* donu al ili trankvilecon por antaŭsenti la eblecon meti finon al tia situacio *per si mem*.

26-a: Por fierulo forlasita ĉe la malsuperaj klasoj estas suferego vidi, ke super li estas lokitaj, plenaj de gloro kaj bonstato, tiuj, kiujn li malŝatis sur la Tero. Hipokritulo vidas senvualigitaj, penetrataj kaj legataj de ĉiuj Spiritoj siajn plej sekretajn pensojn, ne povante ĉi tiujn kaŝi aŭ vuali; satiruso, nepotenca ilin satigi, sentas la ekscitiĝon de siaj bestecaj deziroj, kiel plej akran turmenton; avarulo vidas la neeviteblan malŝparon de sia trezoro, dum egoisto forlasita de ĉiuj suferas la sekvojn de sia surtera sinteno; ne lia soifo nek lia malsato estos kvietigitaj, ne amikaj manoj etendiĝos al liaj petegantaj manoj; kaj pro tio, ke dum vivo li zorgis nur pri si mem, neniu kompatos lin pro lia morto.

27-a: La sola rimedo eviti aŭ malgravigi la estontajn sekvojn de ia eraro estas ripari ĝin, malfari ĝin en la nuneco. Ju pli ni prokrastos riparon de eraro, des pli penaj kaj rigoraj estos ties sekvoj en la estonteco.

28-a: La situacio de la Spirito en la spirita mondo ne estas alia ol tiu de li mem preparita en la korpa vivo.

Poste alia enkarniĝo estos donita al li por novaj provoj, por elpago kaj riparo kun pli aŭ malpli granda profito, dependantaj de lia libera volo; kaj se li ne korektos sin, li ĉiam havos rekomenciĝontan mision ĉiam kaj ĉiam pli pena, tiel ke oni povas diri, ke *tiu multe suferante sur la Tero havas multon elpagota*; kaj tiuj ĝuantaj ŝajnan feliĉon, malgraŭ siaj malvirtoj kaj neutilaĵoj, tre kare pagos ĝin en posta ekzistado. Laŭ tiu senco Jesuo diris: "Feliĉaj la afliktitoj, ĉar ili estos konsolataj." (*La Evangelio laŭ Spiritismo*, ĉap. V. )

29-a: Vere la favorkoreco de Dio estas senfina, sed ne blinda. Erarinto, kiun ĝi atingas, ne restas senkulpigita, kaj dum li ne kontentigos justecon, li suferas la sekvojn de siaj eraroj. Pro la senfina favorkoreco ni devas konsenti, ke Dio ne estas nefleksebla, kaj Li lasas ĉiam irebla la vojon al la saviĝo.

30-a: Submetitaj al pento kaj riparo, dependantaj de la homa volo, la suferoj, kvankam nedaŭraj, estas samtempe punoj kaj helpaj *sanigiloj* por kuracado de malbono. La provantaj Spiritoj do ne estas, kiaj punlaboruloj kondamnitaj dum iom da tempo, sed kvazaŭ malsanuloj en hospitalo suferantaj malsanojn rezultintajn de sia propra senzorgeco; uzantaj kuracilojn pli-malpli dolorajn, kiujn la malsano postulas; atendantaj forpermeson, kiu venos des pli frue, ju pli strikte estas observataj la preskriboj de la servema asistanta kuracisto. Se malsanuloj, pro la propra malzorgo pri si mem, plilongigas sian malsanon, kuracisto nenion respondas pri tio.

31-a: Al la suferoj, kiujn la Spirito spertas en la spirita vivo, aldoniĝas tiuj de la korpa vivo, kiuj estas rezultantaj el la neperfektaĵoj de la homo, el liaj pasioj, el la malbona uzo de liaj kapabloj kaj el la elaĉeto de liaj nunaj kaj pasintaj kulpoj. Ĝuste en la korpa vivo la Spirito riparas la malbonon el antaŭaj ekzistadoj, metante

en la praktikon decidojn faritajn en la spirita vivo. Tiel oni klarigas la homajn mizerojn kaj sortovicojn, kiuj, je la unua vido, ŝajne ne havas pravon de ekzisto. Ili tamen estas justaj, kiel heredaĵo el pasinteco — heredaĵo utilanta al nia pilgrimado al la perfektebleco. (*)

32-a: Ĉu Dio, oni diras, ne donus grandan pruvon de amo al siaj infanoj, kreante ilin neeraremaj kaj sekve sen la malvirtoj propraj al neperfekteco? Por tio estus necese, ke Li kreus perfektajn estaĵojn, kiuj devas akiri nenion pli, ĉu da konoj, ĉu da moralo. Sed certe Dio povus fari tion, kaj se Li tion ne faris estas pro tio, ke lia saĝeco volis, ke progreso estu ĝenerala leĝo. La homoj estas neperfektaj, kaj tiel ili estas elmetitaj al la pli-malpli penaj sortovicoj. Kaj, ĉar la fakto ekzistas, ni do devas ĝin akcepti.

El ĝi konkludi, ke Dio ne estas bona nek justa, estas malsaĝa ribelo kontraŭ la leĝo.

Maljusteco ja estus la kreado de privilegiaj estaĵoj pli-malpli favoritaj, havantaj plezurojn, kiujn aliaj eble ne atingas, krom per laboro, aŭ neniam povus atingi. Male la dia justeco evidentiĝas ĉe la absoluta egaleco aplikata al la kreado de la Spiritoj; ĉiuj havas saman deirpunkton kaj neniu dum sia formado ricevas distingiĝon esti pli bone favorata; neniu, kies progresa iro estas escepte faciligata: tiuj, kiuj venis al la fino, trapasis, kiel ĉiuj aliaj la fazojn de malsupereco kaj respektivajn provojn.

Tiel nenio estas pli justa ol la agolibereco al ĉiu konsentita. La vojo al feliĉo larĝe malfermiĝas al ĉiuj, kiel al ĉiuj estas konsentitaj la samaj kondiĉoj por ĝin atingi. La leĝo gravurita en ĉies konscienco, al ĉiuj estas instruata. *Dio faris el la feliĉo la premion al laboro kaj ne al nepotismo,* ke ĉiu havu sian meriton.

---

(*) Vidu, en la 1-a Parto, ĉap. V, **Purgatorio**, §§ 3 kaj sekv.; kaj poste, en la 2-a Parto, ĉap. VIII, **Surteraj kulpelpagoj**. Vidu ankaŭ en **La Evangelio laŭ Spiritismo**, ĉap. V, **Feliĉaj la afliktitoj**.

Ni ĉiuj estas liberaj labori por nia propra progreso, kaj tiu, kiu multe kaj rapide laboras, plej frue ricevas sian rekompencon. Pligrimanto, kiu foriĝas aŭ perdas tempon sur vojo, malrapidigas sian iradon kaj ne povas plendi, krom pri si mem.

Bono kaj malbono estas nedevigaj kaj laŭvolaj: libera, la homo estas *fatale* pelata nek al unu nek al la dua.

33-a: Malgraŭ la diverseco de specoj kaj gradoj da suferoj de la neperfektaj Spiritoj, la puno kodo de la estonta vivo povas esti resumita per ĉi tiuj tri principoj:

1-a: Sufero estas propra al neperfekteco.

2-a: Ĉia neperfektaĵo, kiel ĉia eraro el ĝi rezultanta, kunportas sian propran punon en la naturaj kaj neeviteblaj sekvoj: nome malsano punas ekscesojn kaj el senfareco venas enuo, kaj ne estas necesa ia speciala kondamno por ĉiu eraro aŭ ĉiu individuo.

3-a: Ĉar ĉiu homo povas liberiĝi el la neperfektaĵoj danke la forton de sia volo, tial li ankaŭ povas nuligi la sinsekvajn malbonojn kaj certigi sian estontan feliĉon.

Al ĉiu laŭ liaj faroj, kiel en la Ĉielo, tiel ankaŭ sur la Tero: tia estas la leĝo de la Dia Justeco.

## ĈAPITRO VIII

## ANĜELOJ

*La anĝeloj laŭ la Eklezio. Refuto. La anĝeloj laŭ Spiritismo*

### La anĝeloj laŭ la Eklezio

1. Ĉiuj religioj havas anĝelojn kun malsamaj nomoj, t.e. estaĵoj superajn al la homaro, interajn inter Dio kaj la homoj.

Neante ĉian spiritan ekzistadon ekster la organa vivo, materialismo memkompreneble klasigis la anĝelojn inter la fikciojn kaj alegoriojn. La kredo je anĝeloj estas esenca parto de la dogmoj de la Eklezio, kiu ilin difinas jene: [*]

2. "Ni firme kredas, diras ĝenerala kaj ekumena koncilio [**], ke estas nur unu vera, eterna kaj senfina Dio, kiu *en la komenco de la tempoj* tiris *kune* el la nenio la du estaĵojn — spiritan kaj korpan, anĝelan kaj mondan — poste formante, kiel ĉeneron el la du, la homan naturon, konsistantan el korpo kaj Spirito.

---

[*] Ni prenis ĉi tiun resumon el la pastoralo de Monsinjoro Gousset, kardinalo-ĉefepiskopo en Reims, por la Karesmo de 1864. Per ĝi ni povas do konsideri la anĝelojn, kaj ankaŭ la demonojn, kies resumon ni prenis el la sama origino kaj mencias en la sekvanta ĉapitro, kiel lastan esprimon de la eklezia dogmo tiurilate.

[**] Koncilio de Laterano.

Tia estas, laŭ la kredo, la dia plano en la laboro de kreado, majesta kaj kompleta plano, kiel decis al la eterna saĝo. Tiel konceptita, ĝi prezentas al nia penso la estaĵon en ĉiuj ties gradoj kaj kondiĉoj.

En la plej alta sfero la ekzistado kaj la vivo estas pure spiritaj; en la lasta klaso, unu kaj alia pure materiaj kaj, intere, ia mirinda kuniĝo de tiuj du elementoj, unu vivo samtempe komuna al la inteligenta Spirito kaj al la organa korpo.

Nia animo havas naturon simplan kaj nedivideblan, sed limigita ĉe siaj kapabloj. La ideo, kiun ni havas pri perfekteco, igas nin kompreni, ke povas ekzisti aliaj estaĵoj tiel simplaj, kiel ĝi, kaj superaj laŭ siaj kvalitoj kaj privilegioj.

La animo estas granda kaj nobla, sed ĝi estas kunigita al la materio, posedanta delikatajn organojn kaj limigita en ĝiaj povo kaj ago. Kial ne ekzistas aliaj pli noblaj, liberigitaj el tiu sklaveco, el tiuj bridoj kaj dotitaj per forto kaj aktiveco pli grandaj kaj nekompareblaj? Antaŭ ol meti la homon sur la Teron, por Lin koni, servi kaj ami, ĉu Dio jam ne estus vokinta aliajn estulojn, ke ili aranĝu lian ĉielan kortegon kaj adoru Lin ĉe lia plej alta gloro? Fine Dio ricevas de la manoj de la homo la tributojn de honoro kaj omaĝo de ĉi tiu mondo: ĉu estas do mirinde, ke Li ricevas de la manoj de la anĝeloj la incenson, kaj de la homoj preĝojn? Se la anĝeloj do ne ekzistus, la granda verko de la Kreinto ne evidentigus la kompletecon kaj perfektecon proprajn al ĝi; ĉi tiu mondo, kiu atestas lian ĉiopovon, ne plu estus ĉefverko de la saĝeco; tiuokaze nia prudento, kvankam malforta, povus koncepti ian Dio pli kompletan kaj perfektan. Sur ĉiu paĝo de la sanktaj libroj, tiel de la Malnova, kiel de la Nova Testamentoj, oni menciis tiujn sublimajn inteligentojn, jen en piaj alvokoj, jen en historiaj aludoj. Ilia interveno klare aperas en la vivo de la patriarkoj kaj profetoj. Dio uzas tiujn helpantojn, jen por dissendi sian volon, jen por anonci estontajn okazaĵojn, kaj la anĝeloj preskaŭ ĉiam estas instrumentoj de lia justeco kaj favorkoreco. Ilia ĉeesto sentiĝas ĉe la cirkonstancoj akom-

panintaj la naskiĝon, la vivon kaj la pasionon de la Savinto; rememoro pri ili estas neapartigebla je tiu pri la grandaj homoj, kaj ankaŭ je tiu pri la plej grandiozaj faktoj de la religia antikveco. La kredo je la anĝeloj ekzistas en la sino mem de politeismo kaj en la mitologiaj fabeloj, ĉar tiu kredo estas tiel universala kaj antikva, kiel la mondo. La kulto, kiun la paganoj faris al la bonaj kaj malbonaj genioj, estis nenio alia ol falsa apliko de la vero, ia degenerinta restaĵo de la pratempa dogmo. La paroloj de la sankta koncilio de Laterano enhavas fundamentan distingon inter anĝeloj kaj homoj: ili instruas, ke la unuaj estas puraj Spiritoj, dum la duaj konsistas el korpo kaj animo, t. e. ke la anĝela naturo ekzistadas per si mem, sen miksiĝo, kaj ankaŭ disigita je la materio, kiel ajn vaporeca kaj subtila oni supozas, ke ĝi estas, dum nia animo, same spirita, kuniĝas al la korpo, tiel ke ĝi formas kun ĉi tiu nur unu personon, *estante tia kaj esence ĝia destino*.

Dum daŭras tiu streĉa ligiĝo inter animo kaj korpo, tiuj du substancoj havas komunan vivon kaj unu reciproke influas sur la duan; el tio sekvas, ke la animo ne povas plene liberiĝi el la neperfektaĵoj de tia kondiĉo: la ideoj alvenas al ĝi per la sentumoj, per komparado de eksteraj objektoj kaj ĉiam per bildoj pli-malpli ŝajnaj. Jen kial la animo ne povas rigardi sin mem, nek koncepti Dion kaj la anĝelojn, se ĝi ne atribuas al ili videblan kaj palpeblan formon. Tio sama okazas al la anĝeloj, kiuj, por sin manifesti al la sanktuloj kaj profetoj, devas preni tuŝeblajn kaj palpeblajn formojn. Sed tiaj formoj estis nenio alia ol aeraj korpoj, kiuj moviĝis kaj identiĝis kun ili, aŭ simbolaj atributoj, laŭ la misio, kiun ili prenis sur sin.

Iliaj estaĵo kaj movoj ne estas difinitaj nek ĉirkaŭlimigitaj al certa kaj fiksa punkto en la Spaco. Tute malligitaj je la korpo, ili ne okupas iun ajn spacon en la vakuo; sed, kiel nia animo integre ekzistas en la korpo kaj en ĉiu el ĝiaj partoj, tiel same la anĝeloj estas, preskaŭ samtempe, en ĉiuj punktoj kaj partoj de la mondo. Pli rapidaj ol la penso, ili povas ĉie agi mem en difinita

momento, trovante neniajn malhelpojn krom tiuj starigitaj de la volo de la Kreinto kaj de la homa libereco. Dum ni estas kondamnitaj malrapide kaj malvaste vidi la eksterajn aĵojn; dum la supernaturaj veraĵoj ŝajnas al ni kvazaŭ iaj enigmoj en spegulo, laŭ la frazo de Sankta Paŭlo, ili, la anĝeloj, senpene vidas tion, kies kono estas grava por ili, kaj ili ĉiam rekte rilatas al la objekto de siaj pensoj. *Iliaj konoj rezultas ne el indukto kaj rezono*, sed el tiu klara kaj profunda intuicio samtempe ampleksanta la genrojn kaj la specojn de ili devenantajn, la principojn kaj ties sekvojn. La distanco de la epokoj, la malsameco de lokoj, same kiel la plureco de objektoj povas estigi nenian konfuzon en iliaj spiritoj.

Senfina, la dia esenco estas nekomprenebla; ĝi havas nepenetreblajn misterojn kaj profundaĵojn; sed, kvankam al ili estas malpermesate koni specialajn planojn de la Providenco, tiu tamen ilin malkaŝas al ili, kiam en certaj cirkonstancoj ili estas komisiitaj ilin anonci al la homoj. La komunikiĝoj inter Dio kaj la anĝeloj, kaj inter ĉi tiuj mem, ne fariĝas kiel inter ni, per paroloj kaj senteblaj signoj. La puraj inteligentoj ne bezonas okulojn por vidi, nek oreloj por aŭdi; nek posedas parolorganojn por esprimi, siajn pensojn. Ĉi tiuj ordinaraj instrumentoj de niaj rilatoj estas por ili nenecesaj, ĉar ili komunikas siajn sentojn per propra maniero, t. e. tute spirita. Sufiĉas, ke ili volas, por ke ili reciproke kompreniĝu. Sole nur Dio scias la nombron da anĝeloj. Tiu nombro certe ne estas senfina, ĝi eĉ ne povus esti tia; sed, laŭ kelkaj sanktaj aŭtoroj kaj doktoroj, ĝi estas ja tre granda, vere eksterordinara. Se oni povas proporciigi la nombron da loĝantoj de iu urbo al ties grandeco kaj vasteco, kaj se la Tero estas nur atomo, kompare kun la ĉielo kaj la grandegaj regionoj de la Spaco, oni nepre devas konkludi, ke la nombro da loĝantoj de la aero kaj de la ĉielo estas tre supera al tiu de la homoj. Kaj se la majesto de la reĝoj montriĝas per la brilo kaj nombro de iliaj vasaloj, oficistoj kaj subuloj, kio estos pli taŭga por doni al ni ideon pri la majesto de la Reĝo de reĝoj ol tiu sennombra amaso da anĝeloj loĝantaj en

ĉieloj kaj sur la Tero, en maroj kaj abismoj, ol la digneco de tiuj, kiuj restas senĉese teren kliniĝantaj aŭ starantaj antaŭ trono?

La pastroj de la Eklezio kaj la teologoj ordinare instruas, ke la anĝeloj dividiĝas en tri grandajn hierarkiajn ordojn aŭ principecojn, kaj ĉiu ordo en tri kompaniojn aŭ ĥorojn.

Tiuj apartenantaj al la unua kaj pli alta ordo estas nomataj laŭ la funkcioj, kiujn ili havas en la ĉielo: La *Serafoj* estas tiele nomataj, ĉar ili kvazaŭ brilegas antaŭ Dio pro la karitata ardo; aliaj, la *Keruboj*, pro tio, ke ili lume reflektas la dian saĝon; kaj fine *Tronoj* nomiĝas tiuj, kiuj proklamas la grandecon de la Kreinto, kies gloron ili brilegigas.

La anĝeloj apartenantaj al la dua ordo ricevas nomojn konformajn al la funkcioj, por kies plenumo ili estis komisiitaj, ĉe la ĝenerala regado de la Universo, kaj kiuj estas la jenaj: la *Dominacioj*, kiuj determinas misiojn kaj devojn al la malaltrangaj anĝeloj; la *Virtoj*, kiuj kaŭzas la miregindaĵojn postulatajn de la grandaj interesoj de la Eklezio kaj de la homa genro; kaj la *Povoj*, kiuj protektas per sia forto kaj vigleco la leĝojn, kiuj regas la fizikan kaj moralan mondon.

Tiuj apartenantaj al la tria ordo havas la mision direkti la sociojn kaj la personojn, kaj ili estas: la *Principecoj*, komisiitaj direkti regnojn, provincojn kaj diocezojn; la *Arkanĝeloj*, kiuj transsendas la plej gravajn mesaĝojn, kaj la *Gardanĝeloj*, kiuj akompanas la estulojn por teni ilian sekurecon kaj sanktecon."

## Refuto

3. La ĝenerala principo rezultanta el tiu doktrino estas tio, ke la anĝeloj estas estuloj pure spiritaj, antaŭaj kaj superaj al la homaro, *estuloj privilegiitaj kaj destinitaj por superega kaj eterna feliĉo, ekde sia kreiĝo*, dotitaj, pro sia naturo mem, per ĉiaj virtoj kaj konoj, cetere nenion farinte por ilin akiri. Ili troviĝas, por tiel

diri, en la unua plano de la Kreitaĵaro, kontraste kun la lasta, kie la vivo estas pure materia; kaj inter la du planoj, ĝuste en la mezo, ekzistas la homaro, t.e. la animoj, estuloj malsuperaj al la anĝeloj kaj ligitaj al materiaj korpoj.

De tiu sistemo venas diversaj ĉefaj demandoj: Unue, kia estas tiu vivo pure materia? Ĉu ĝi estus ja tiu de la kruda materio? Sed la kruda materio estas neanimita kaj ne havas vivon per si mem. Ĉu ĝi eble rilatas al la bestoj kaj vegetaĵoj?

Laŭ tiu hipotezo ĝi estus ia kvara ordo en la Kreitaĵaro, ĉar oni ne povas nei, ke en la inteligenta animalo estas io pli ol en ia planto, kaj en ĉi tiu, io pli ol en simpla ŝtono.

Rilate la homan animon, kiu starigas la transiĝon, ĝi estas rekte ligita al la korpo, cetere kruda materio; ĉar sen animo la korpo havas tiom da vivo, kiom iu ajn ŝtonbloko.

Evidente tiu divido estas malpreciza kaj ne akordigebla kun la observado; ĝi estas simila al la teorio pri la kvar elementoj, nuligita de la progreso de la Scienco. Ni tamen konsentu pri ĉi tiuj esprimoj: la spirita, la homa kaj la korpa estaĵoj, ĉar, kiel oni diras, tia estas la dia plano, majesta kaj kompleta kiel decas al la Eterna Saĝo. Antaŭ ĉio ni notu, ke estas nenia nepre necesa rilato inter tiuj tri esprimoj, kaj ke ili estas tri kreaĵoj malsamaj kaj sinsekve formitaj, dum en la Naturo ĉio kateniĝas, montrante al ni ian leĝon de mirinda unueco, kies elementoj, estante nenio pli ol transformiĝoj inter si, havas tamen siajn unuigajn ligilojn.

Sed tiu teorio, kvankam nekompleta, ĝis certa grado estas vera rilate la ekziston de la tri esprimoj: mankas al ĝi la kontaktopunkto de tiuj tri esprimoj, kio estas ja facile elmontrebla.

4. La Eklezio diras, ke tiuj tri kulminaj punktoj de la Kreitaĵaro estas necesaj por la harmonio de la tuto. Se al ĝi mankus almenaŭ unu, la nekompleta verko ne plu

akordiĝus kun la Eterna Saĝo. Sed unu el la fundamentaj dogmoj diras, ke la Tero, la bestoj, la vegetaĵoj, la Suno kaj la steloj, kaj eĉ la lumo estas kreitaj el la *nenio*, antaŭ ses mil jaroj. Antaŭ tiu epoko ne ekzistas do estaĵo homa nek korpa, kio signifas, ke en la daŭro de la eterneco la dia verko restis neperfekta. Estas esenca kredartikolo la kreado de la Universo antaŭ ses mil jaroj, des pli, ke antaŭ nelonge la Scienco ankoraŭ estis anatemita, ĉar ĝi detruis la biblian kronologion, pruvante pli grandan antikvecon de la Tero kaj de ties loĝantaro.

Malgraŭ tio, la koncilio de Laterano, ekumena koncilio valoranta kiel leĝo sur ortodoksa kampo, diras: *"Ni firme kredas je unika kaj vera, eterna kaj senfina Dio, kiu en la komenco de la tempoj* tiris *kune* el la nenio la du estaĵojn — spiritan kaj korpan." Kiel *komencon de la tempoj* ni povas kompreni la pasintan eternecon, ĉar la tempo estas senfina kiel la Spaco, sen komenco kaj fino. Tiu esprimo, *komenco de la tempoj*, estas prefere ia figuro entenanta la ideon de *senlima* antaŭeco. La koncilio de Laterano *firme* kredas do, ke spiritaj estaĵoj, same kiel la korpaj, estis samtempe formitaj kaj *kune* tiritaj el la nenio, en ne difinita epoko en la pasinteco. Al kio do reduktiĝas la biblia teksto, laŭ kiu la mondkreado okazis ses mil jarojn antaŭ la naskiĝo de la Kristo? Kvankam oni akceptas, ke tiam estis la komenco de la tempoj, al kiu ni kredu: ĉu al la koncilio aŭ al la Biblio?

5. Krom tio la koncilio formulas strangan propozicion: "Nia animo, ĝi diras, egale spirita, estas kunigita kun la korpo, tiel ke ĝi formas kun ĉi tiu unu persono, kaj *tia estas esence ĝia destino*." Nu, se la esenca destino de la animo estas unuiĝi kun la korpo, tiu unuiĝo estas la normala stato, la celo, ĉar tia estas ĝia destino. Sed la animo estas senmorta, kaj la korpo ne; la unuiĝo de tiu kun ĉi tiu efektiviĝas nur unu fojon, laŭ la Eklezio, kaj kvankam ĝi daŭrus jarcenton, tio tamen estus nenio kompare kun la eterneco. Kaj daŭrante nur kelkajn

horojn por multaj, kian utilon havus por la animo tiel efemera unuiĝo? Sed, kvankam oni plilongigu tiun unuiĝon tiom, kiom oni povas plilongigi surteran ekzistadon, ĉu eĉ tiel oni povos aserti, ke *ĝia destino estas resti esence unuigita*? Ne, tiu unuiĝo fakte estas nenio pli ol ia okazeto, ia stadio de la animo, neniam ĝia esenca stato.

Se la esenca destino de la animo estas resti ligita al homa korpo; se pro sia naturo kaj laŭ la providenca celo de la mondkreado, tiu unuiĝo estas necesa al la manifestado de ĝiaj kapabloj, oni nepre devas konkludi, ke sen korpo la homa animo estas nekompleta estaĵo. Nu, por ke la animo plenumu siajn planojn, kiam ĝi forlasas unu korpon, estas necese, ke ĝi prenu alian, kio kondukas nin al la nepra plureco de ekzistadoj, aŭ, per aliaj vortoj, al la reenkarniĝo, al la eterneco.

Estas vere mirinde, ke ia koncilio, rigardata kiel unu el la lumoj de la Eklezio, tiagrade identigis la estaĵojn spiritan kaj materian, tiel ke ili ne povas ekzisti per si mem, ĉar la esenca kondiĉo de ilia kreado estas, ke ili restu unuiĝintaj.

6. La hierarkia kadro de la anĝeloj montras al ni, ke pluraj ordoj havas, kiel siajn komisiojn, la regadon de la fizika mondo kaj de la homaro, por kies celo ili estas kreitaj. Sed laŭ *Genezo*, la fizika mondo kaj la homaro ekzistas nur de ses mil jaroj; nu, kion faris tiaj anĝeloj antaŭ tiu epoko, dum la eterneco, kiam ne ekzistis la objekto de iliaj okupoj? Ĉu ili jam estis kreitaj de la tuta eterneco? Tiel devas esti, ĉar ili servas al la glorado de la Ĉiopova. Sed, kreinte ilin en iu ajn difinita epoko, ĉu Dio restus ĝis tiam, t. e. dum tuta eterneco, sen adorantoj?

7. La koncilio diras plie: "*dum* daŭras tiu tiel intima unuiĝo de la animo kun la korpo." Ĉu estas do momento, kiam la unuiĝo malfariĝas? Ĉi tiu propozicio kontraŭdiras tiun, kiu subtenas la esencon de tiu unuiĝo. Kaj la koncilio diras plu: "La ideoj alvenas al ili per la sentumoj, el

komparo de la eksteraj objektoj.” Jen filozofia doktrino nur parte vera, sed ne en absoluta senco.

Ricevi ideojn per la sentumoj estas, laŭ la eminenta teologo, kondiĉo propra al la homa naturo; sed li forgesas la naturdevenajn ideojn, la iafoje transcendajn kapablojn, la intuicion, kiun la infanoj portas ekde la lulilo, ne ŝuldatajn al iu ajn instruo. Per kiaj sentumoj tiuj junaj pastroj, naturaj kalkulistoj, mirigantaj saĝulojn, akiras ideojn necesajn al la preskaŭ momenta solvo de la plej komplikaj problemoj? La samon oni povas diri pri frumaturaj muzikistoj, pentristoj kaj filologoj.

“La konoj de la anĝeloj ne rezultas de indukto kaj rezonado”; tiujn konojn ili posedas, ĉar ili estas anĝeloj, ne bezonantaj ilin lerni, ĉar Dio jam kreis ilin tiaj: koncerne la animon, ĉi tiu devas lerni. Sed se la animo ricevas nur la ideojn pere de la korpaj organoj, kian ideon povas havi la animo de infano mortinta kelkajn tagojn post sia naskiĝo, se ni akceptus, kiel la Eklezio, ke tiu animo ne renaskiĝas?

8. Ĉi tie estiĝas fundamenta demando: “Ĉu la animo povas akiri konojn post la morto de sia korpo?” Se, liberigite el la korpo, ĝi ne povas akiri novajn konojn, la animo de infano, de sovaĝulo, de stultulo, de idioto aŭ de malklerulo restos tia, kia ĝi estis en la momento de la morto, por ĉiam kondamnita al nuliĝo. Sed kontraŭe se ĝi akiras novajn konojn post la nuna vivo, tiam ĝi ja povas progresi.

Se ne estas posta progreso por la animo, oni venas al absurdaj konkludoj tiom, kiom ĝin akceptante, oni konkludas al neado de ĉiuj dogmoj bazitaj sur la haltado, la neŝanĝebla sorto, la eternaj punoj ktp. Se la animo progresas, kia estas la limo de la progreso? Ne estas motivo, ke oni ne atingu per ĝi la rangon de la anĝeloj aŭ de puraj Spiritoj. Nu, laŭ tiu ebleco oni ne pravigus la kreadon de specialaj kaj privilegiitaj estuloj, liberaj el ĉia laboro, senkondiĉe ĝuanta eternan feliĉon, dum aliaj estuloj malplifavorataj nur akiras tian feliĉon koste

de longaj, kruelaj kaj malfacilegaj provoj. Ne estas ia dubo, ke Dio povus esti determininta tion, sed, konsentante pri lia senfina perfekteco, sen kiu Li ne estus Dio, estas nepre necese konkludi, ke Li ne kreus ion ajn senutilan, malkonfesante siajn superegajn justecon kaj bonecon.

9. “Kaj se la majesto de la reĝoj montras sian brilon per la nombro de iliaj vasaloj, oficistoj kaj subuloj, kio estus pli taŭga por doni al ni ideon pri la majesto de la Reĝo de reĝoj ol tiu sennombra amaso da anĝeloj loĝantaj en *ĉielo kaj sur la Tero, en maro kaj abismoj*, ol la digneco de tiuj, kiuj restas senĉese adorkliniĝantaj aŭ starantaj antaŭ lia trono?”

Ĉu ne estos malaltigi Dion similigi lian luksegon al tiu de la surteraj suverenoj? Altrudite al la spirito de la popolamasoj, tiu ideo perfidas la opinion pri lia vera grandeco. Ĉiam Dio reduktita al malnoblaj proporcioj de la homaro! Doni al Li milionojn da adorantoj, *eterne surgenuantaj*, estas doni al Li vantamon kaj malfortecon proporciajn al la fieraj despotoj el Oriento! Kio ja glorigas la suverenojn vere grandajn? Ĉu la nombro kaj brilo de la korteganoj? Ne; tio estas la boneco, la justeco, la justa titolo gvidantoj de ilia popolo. Vi ja demandos, ĉu estos io pli taŭga por doni al ni ideon pri la grandeco kaj majesto de Dio, ol la amaso da anĝeloj konsistiganta lian kortegon... Jes, ĝi certe donas, sed la pli bona afero estas, ke al siaj estuloj Dio prezentu sin superege bona, justa kaj favorkora, ne kolera, enviema, venĝema, detruema kaj partia, kreante por sia propra gloro tiujn privilegiitajn estulojn, plenajn de ĉiaj kapabloj kaj naskitajn por la eterna feliĉo, dum al aliaj Li trudas penigajn kondiĉojn ĉe la akirado de havaĵoj, punante momentajn erarojn per eternaj torturoj...

10. Pri la unuiĝo de la animo kun la korpo, Spiritismo adoptas doktrinon senfine pli *spiritualisman*, por ne diri *malpli materialisman*, kaj ĝi cetere ankoraŭ havas avantaĝon esti konforma al la observado kaj al la destino de la animo. Ĝi instruas al ni, ke la animo estas sendependa

de la korpo, kaj ke ĉi tiu estas nenio alia ol kelkatempa envolvaĵo: *spiriteco estas ĝia esenco, kaj ĝia normala vivo estas la spirita vivo*. La korpo estas nur instrumento de la animo por ekzercado de kapabloj ĉe ĝiaj rilatoj kun la materia mondo; disigita je tiu korpo, la animo ĝuas siajn kapablojn pli libere kaj noble.

11. La unuiĝo de la animo kun la korpo, estante necesa al la unuaj progresoj de la animo, fariĝas nur en periodo, kiun ni povas klasifiki kiel tiun de ĝia infaneco kaj adoleskanteco; sed tuj kiam ĝi atingas ian gradon da perfekteco kaj senmateriiĝo, tiu unuiĝo estas nenecesa kaj la progreso fariĝas en ĝia vivo kiel Spirito. Cetere, kiom ajn multenombraj estas la enkorpaj ekzistadoj, ili limiĝas al la ekzistado de korpo, kaj ilia tuto, je ĉiuj okazoj, ampleksas nur neperccepteblan parton de la spirita vivo, kiu estas senlima.

## La anĝeloj laŭ Spiritsmo

12. Ne estas ia dubo, ke ekzistas estuloj dotitaj per ĉiaj kvalitoj atribuitaj al la anĝeloj. La spiritisma revelacio pri tiu punkto konfirmas la kredon de ĉiuj popoloj, samtempe konigante al ni la originon kaj naturon de tiaj estuloj.

La animoj aŭ Spiritoj estas kreitaj simplaj kaj sensciaj, t. e. sen konoj kaj konscio pri bono kaj malbono, sed kapablaj akiri tion, kio mankas al ili. La laboro estas rimedo por akiro, kaj la celo — kiu estas la perfekteco — estas la sama por ĉiuj. Ili ĝin atingas pli-malpli rapide, pro sia libera volo kaj proporcie al siaj klopodoj; ĉiuj havas la samajn ŝtupojn trapasotajn, la saman laboron plenumotan. Dio ne pli favoras unujn ol aliajn, ĉar Li estas justa, kaj, ĉar ĉiuj estas liaj filoj, tial Li ne havas preferojn. Li diras al ili: *Jen la leĝo, kiu devas esti via kondutnormo; ĝi nur povas konduki vin al la celo; ĉio, kio estos konforma al ĝi, estas bono; ĉio, kio estas kontraŭa al ĝi, estas*

*malbono. Vi havas plenan liberecon obei aŭ malobei tiun leĝon, kaj tiel vi estos juĝantoj de via propra sorto.* Sekve, Dio ne kreis malbonon; ĉiuj liaj leĝoj sin destinas por bono, sed la homo kreis la malbonon, malobeante tiujn leĝojn; se la homo ilin skrupule observus, li neniam sin deturnus de la bona vojo.

13. Malgraŭ tio, la animo, simile al iu infano, estas sensperta en la unuaj fazoj de sia ekzistado, kaj tial ĝi estas erarema. Dio ne donas al ĝi la sperton, sed donas al ĝi rimedojn por ĝin akiri. Falsa paŝo do sur la vojeto de malbono estas malprogreso por la animo, kiu, suferante ties sekvon, lernas mem tion, kion ĝi devas eviti. Tiamaniere, iom post iom ĝi disvolviĝas, perfektiĝas kaj progresas en la spirita hierarkio, ĝis la stato de *pura Spirito aŭ anĝelo*. Anĝeloj estas do animoj de homoj atingintaj la perfektogradon, kiun la estulo kapablas atingi, ĝuante la plenan promesitan feliĉon. Sed antaŭ ol atingi la superegan gradon, ili ĝuas ian feliĉon relativan al sia progreso, feliĉon konsistantan ne el neniofarado, sed el funkcioj, kiujn plaĉas al Dio konfidi al ili, kaj pro kies plenumo ili sentas sin feliĉaj, ankoraŭ vidante en tio ian rimedon por progreso. (Vidu en la *1-a Parto ĉap. III, "La Ĉielo"*.)

14. La homaro ne estas limigita al la Tero; per ĝi Dio loĝatigas sennombrajn mondojn turniĝantajn en la Spaco; per ĝi Dio jam loĝatigis mondojn malaperintajn, kaj loĝatigos tiujn, kiuj formiĝos. Ĉar Dio kreis ĝin jam de la tuta eterneco, Li neniam ĉesos ĝin kreadi. Longe antaŭ ol ekzistis la Tero kaj kiom ajn antikva ni supozas, ke ĝi estas, ekzistis aliaj mondoj, kie enkarniĝintaj Spiritoj, atinginte sian celon eĉ antaŭ ol ni eliris el la manoj de la Kreinto, trapasis la samajn fazojn, kiujn nun trapasas tiuj pli frue formitaj.

Nu, de la tuta eterneco ekzistas puraj Spiritoj aŭ anĝeloj; sed, ĉar ilia homa ekzistado okazis en senlima pasinteco, tial ni supozas, ke ili ĉiam estis anĝeloj.

15. Tiamaniere efektiviĝas la granda leĝo de unueco de la Kreado; Dio neniam estis neaktiva kaj ĉiam havis plurajn Spiritojn, spertajn kaj instruitajn, destinitajn por la transsendo de siaj ordonoj kaj por la direktado de la Universo, ekde la regado de la mondoj ĝis plej etaj detaloj. Dio ankaŭ ne bezonis krei privilegiitajn estulojn, liberajn de devoj; ĉiuj, antikvaj kaj novaj, akiris siajn poziciojn en la lukto per propra merito; ĉiuj fine estas filoj de siaj faroj.

Kaj tiel egale kompletiĝas la superega justeco de la Kreinto.

# ĈAPITRO IX

# DEMONOJ

*Origino de la Kredo je demonoj. Demonoj laŭ la Eklezio. Demonoj laŭ Spiritismo.*

## Origino de la kredo je demonoj

1. En ĉiuj tempoj, laŭ la diversaj teogonioj, la demonoj ludis elstaran rolon kaj, kvankam iamaniere defalintaj laŭ la ĝenerala koncepto, la graveco, kiun oni atribuas al ili, ankoraŭ hodiaŭ iom valorigas la aferon, kiu tuŝas la fundon mem de la religiaj kredoj. Jen kial estas utile ekzameni ĝin plej detale.

Kredo al ia supera povo estas instinkta ĉe la homo. Ni trovas ĝin sub malsamaj formoj, en ĉiu aĝo de la mondo. Sed se hodiaŭ, malgraŭ la grado da atingita kulturo, oni ankoraŭ diskutas la naturon kaj atributojn de tiu povo, ni prezentu al ni kiajn nociojn pri tio havus la homo en la infaneco de la homaro.

2. Kiel pruvo de ilia simplanimeco, la sceno de la primitivaj homoj, ekstazitaj antaŭ la Naturo kaj admirantaj en ĝi la bonecon de la Kreinto, estas sendube tre poezia, sed malmulte reala. Fakte, ju pli la homo alproksimiĝas al la primitiva stato, des pli li sklaviĝas al sia instinkto, kion oni vidas ankoraŭ hodiaŭ ĉe la nuntempaj barbaraj kaj sovaĝaj popoloj; kio plej multe lin priokupas, aŭ ĝustadire, kio lin ekskluzive priokupas, tio estas la

kontentigo de liaj materiaj bezonoj, des pli, ĉar li ne havas aliajn.

La sola sento, kiu povas fari lin alirebla por la pure moralaj ĝuoj, nur grade kaj malrapide disvolviĝas; la animo ankaŭ havas sian infanaĝon, sian junaĝon kaj maturaĝon, kiel la homa korpo; sed por kompreni abstraktaĵon, kiom da evoluoj ĝi devas sperti ĉe la homaro! Kiom da ekzistadoj ĝi devas travivi!

Ne parolante pri la primitivaj tempoj, ni rigardu ĉirkaŭe al la homoj sur kamparo kaj ni profunde esploru la admirosentojn, kiujn ĉe ili vekas la brilo de la leviĝanta Suno, la stelplena volbo de la firmamento, la kanto de la birdoj, la murmuro de la klaraj ondoj, la floranta ĝardeno sur herbejoj. Laŭ ili la Suno leviĝas laŭkutime, kaj ĉar ĝi donas la necesan varmon por maturigi grenejojn, se nur tiu varmo ilin ne bruletigu, estas realigita ĉio, kion ili aspiras; ili rigardas al la ĉielo por ekscii, ĉu okazos bona aŭ malbona vetero; al ili ne gravas, ke kantu aŭ ne la birdoj, se nur ĉi tiuj ne malmultigu la grajnojn en grenplantejo; al la melodioj de najtingalo ili preferas la gluglon de kokinaro kaj la grunton de porkoj; kion ili deziras rilate la riveretojn kristalklarajn aŭ ŝlimecajn, estas tio, ke ili ne sekiĝu nek transbordiĝu; rilate la herbejojn, ke ĉi tiuj produktu bonan herbon kun aŭ sen floroj.

Jen ĉio, kion tiuj homoj aspiras, aŭ pli bone ĉio, kion ili komprenas el la Naturo, kvankam ili jam estas tre distancaj de la primitvaj homoj.

3. Se ni revenos al ĉi tiuj lastaj, ni tiam ilin vidos pli ekskluzive priokupiĝintaj pri kontentigo de siaj materiaj bezonoj, kaj bono aŭ malbono en ĉi tiu mondo konsistos nur en kontentigo aŭ malprofito de tiuj bezonoj.

Kredante al ia superhoma povo, kaj ĉar la materia malprofito ĉiam estas tio, kio al ili plej multe gravas, ili atribuas ĝin al tiu povo, pri kiu cetere ili faras tre neprecizan ideon. Kaj ĉar ili nenion konceptas ekster la videbla kaj tuŝebla mondo, tia povo ŝajnas al ili ekzistanta en la estuloj kaj aĵoj, kiuj ilin malutilas.

La malutilaj bestoj estas nenio alia ol naturaj kaj rektaj reprezentantoj de tiu povo. Pro la sama motivo ili vidas en la utilaĵoj la personiĝon de bono: el tio venas ilia kulto al difinitaj plantoj kaj eĉ al senvivaj objektoj.

Sed la homo ordinare estas pli sentema al malbono ol bono; ĉi tiu ŝajnas al li natura, dum tiu lin malutilas. Ne pro alia motivo oni klarigas, ĉe la primitivaj kultoj, la ceremoniojn pli kaj pli nombraj je honoro al la malbonfara povo: timo superstaras dankon.

Dum multe da tempo la homo komprenis nur la fizikajn bonon kaj malbonon; la moralaj sentoj nur poste markis la progreson de la homa inteligento, kaj igis lin duonvidi ĉe la spiritaro ian superhoman povon ekster la videbla mondo kaj la materiaj aferoj. Tiu progreso certe estas realigita de distingiĝaj inteligentoj, kiuj tamen ne povis iri trans iajn limojn.

4. Pruvinte kaj evidentiginte la lukton inter bono kaj malbono, ĉi tiu multfoje pli prosperanta ol tiu, kaj ne povante racie akcepti, ke malbono devenu de bonfara povo, oni venis al konkludo, ke ekzistas du rivalaj povoj en la regado de la mondo. El tio fontis la doktrino pri la du principoj, cetere logika en tempo, kiam la homo troviĝis nekapabla penetri per rezono en la esencon de la Superega Estulo. Kiel li tiam komprenus, ke malbono, el kiu povas veni bono, estas nenio alia ol pasema stato, kondukanta lin al feliĉo per sufero kaj helpanta lian progreson? La limoj de lia morala horizonto, permesantaj al li vidi nenion trans la estanteco, tiel en la pasinteco, kiel en la estonteco, ankaŭ ne permesis al li kompreni, ke li jam progresis, ke li ankoraŭ individue progresos, kaj ke la sortovicoj de la vivo rezultas el la neperfektaĵoj de la en li loĝanta spirita esto, kiu antaŭekzistas kaj postvivas la korpon, dependante de serio da purigaj ekzistadoj por atingi la perfektecon.

Por kompreni kiamaniere bono povas rezulti el malbono estas necese konsideri ne unu, sed multe da ekzistadoj; estas necese kompreni ilin ĉiujn, el kiuj — kaj

nur el kiuj — nete rezultas la kaŭzo kaj la repektivaj efikoj.

5. La duobla principo pri bono kaj malbono estis, dum multe da jarcentoj kaj sub pluraj nomoj, la bazo de ĉiuj religiaj kredoj. Ni tiel vidas ĝin koncentriĝinta en *Ormuzdo* kaj *Arimano* inter la persoj, en *Javeo* kaj *Satano* inter la hebreoj. Sed, ĉar ĉiu suvereno devas havi ministrojn, la religioj entute konsentis pri flankaj potencoj aŭ pri bonaj kaj malbonaj genioj. La paganoj faris el ili individuojn kun la ĝenerala nomo dioj kaj donis al ili specialajn komisiojn por bono kaj malbono, por virtoj kaj malvirtoj. Kristanoj kaj muzulmanoj heredis de la hebreoj la anĝelojn kaj demonojn.

6. La doktrino pri demonoj sekve originas el la antikva kredo al tiuj du principoj. Koncernas nin esplori ĝin ĉi tie sole nur laŭ la kristana vidpunkto, ke ni vidu ĉu ĝi estas laŭ la plej ĝustaj nocioj, kiujn ni hodiaŭ posedas pri la atributoj de Dio.

Tiuj atributoj estas la deirpunkto, la bazo de ĉiuj religiaj doktrinoj; dogmoj, kulto, ceremonioj, kutimoj kaj moralo, ĉio estas rilata al la penso pli-malpli ĝusta, pli-malpli alta, kiun oni havas pri Dio, ekde fetiĉismo ĝis Kristanismo. Se la esenco de Dio restas plu ia mistero por niaj konsciencoj, ni tamen ĝin pli bone komprenas nun ol iam, danke la instruojn de la Kristo. Kristanismo racie instruas al ni, ke *Dio estas unika, eterna, neŝanĝema, nemateria, ĉiopova, superege justa kaj bona, senfina pri ĉiuj perfektaĵoj*.

Tial ni diris aliloke (1-a Parto, ĉap. VI, "Doktrino pri la eternaj suferoj"): "Se oni eltirus plej malgrandan parton el nur unu el liaj atributoj, Dio ne plu ekzistus, ĉar povus kunekzisti ia pli perfekta estaĵo." Tiuj atributoj en sia absoluta tuteco estas do la kriterio de ĉiuj religioj, fundamento de la vero pri ĉiu el la principoj, kiunj ili instruas. Sed, ke iu el tiuj principoj estu vera, estas necese, ke ĝi ne atencu la diajn perfektaĵojn. Ni vidu ĉu tiel fakte estas en la vulgara doktrino pri la demonoj.

## Demonoj laŭ la Eklezio

7. *Satano*, ĉefo aŭ reĝo de la demonoj, ne estas laŭ la Eklezio ia alegoria persono por malbono, sed ia *reala estaĵo* praktikanta ekskluzive malbonon, dum Dio praktikas ekskluzive bonon.

Ni do prenu lin, kiel oni lin prezentas al ni. Ĉu Satano ekzistas de la tuta eterna tempo, kiel Dio, aŭ li estas posta al Li? Ekzistante de eterne, li estas *nekreita*, kaj sekve egala al Dio. Ĉi tiu Dio nepre ne estus unika, ĉar ekzistus alia dio por malbono. Kaj se li estus posta al Li? En ĉi tiu okazo li ne estus io alia ol kreito de Dio. Se li estus tia, nur praktikanta malbono, ĉar nekapabla fari bonon kaj penti, Dio estus kreinta estaĵon ekskluzive kaj eterne destinitan al malbono. Se malbono ne estas verko de Dio, ĝi devas esti verko de unu el liaj kreitoj, kaj eĉ tiel Dio ne povus ne esti la aŭtoro, kaj sekve Li ne estus profunde bona. Tio sama ĝuste okazas rilate al malbonaj estaĵoj nomataj demonoj.

8. Tia estis dum multe da tempo la kredo en ĉi tiu senco. Hodiaŭ oni diras (*) : "Dio, kiu estas boneco kaj sankteco en plej alta grado, ne kreis ilin perversaj kaj malicaj. La patreca mano, kiu plezuriĝas doni al siaj verkoj la karakteron de senfinaj perfektaĵoj, dotis ilin per bonegaj kvalitoj. Al la eminentegaj kvalitoj de sia naturo Li aldonis la malavaraĵojn de sia graco; pri ĉio Li faris ilin egalaj al la Spiritoj altegaj pri gloro kaj feliĉo; subdividite en ĉiujn siajn ordojn kaj ligite al ĉiuj klasoj, ili havis la saman celon kaj identajn destinojn. Ilia ĉefo estis la plej bela el la ĉefanĝeloj. Ili eble eĉ estus atingintaj la titolon justuloj por ĉiam kaj estus akceptitaj en la ĉielojn por feliĉoĝuado. Ĉi tiu lasta

(*) La sekvantaj citaĵoj estas eltiritaj el la episkopa letero de Monsjnjoro Gousset, kardinalo-ĉefepiskopo de Reims, por la karesmo de 1865. Atentaj al la persona merito kaj al la rango de la aŭtoro, ni povas konsideri tiujn citaĵojn, kiel la lastan esprimon de la Eklezio pri la doktrino pri la demonoj.

favoro, kiu estus komplemento de ĉiuj aliaj, estus la premio por ilia obeemo, sed ili sin senmeritigis pri ĝi, pro malsaĝa kaj kuraĝa ribelo."

"Kia estis la rifo kontraŭ ilia konstanteco? Kian veraĵon ili ne konis? Kian montron de adoro, de fido ili rifuzis al Dio? *La Eklezio kaj la historio de la sanktaj skriboj kategorie ne respondas tion al ni*, sed *ŝajnas vero*, ke la demonoj ne konsentis pri la perado de la Filo de Dio nek pri la altigo de la homa naturo de Jesuo Kristo."

"La Dia Vorto, kreinta ĉiujn aferojn, ankaŭ estas la peranto kaj unika savanto, tiel sur la Tero, kiel en la Ĉielo. Oni donis la supernaturan celon al la anĝeloj kaj al la homoj, nur antaŭvidante iliajn enkarniĝon kaj meritojn, ĉar nenia proporcio ekzistas inter la verko de la eminentaj Spiritoj kaj la rekompenco, kiu estas Dio mem. Nenia kreito povus atingi tian celon, sen tia mirinda kaj sublima interveno de la karitato. Nu, por plenigi la senfinan distancon, kiu apartigas lian esencon de liaj verkoj estis necese kunigi al lia persono la du ekstremaĵojn, kaj aldoni al lia dieco la naturojn de anĝelo aŭ de homo: kaj Li preferis la homan naturon. Tiu plano konceptita ekde la tuta eterno, estis prezentita al la anĝeloj longe antaŭ ĝia plenumo: la Homo-Dio estis montrita al ili, kiel Tiu, Kiu devos ilin firmigi en la graco kaj ilin gvidi al la gloro, kondiĉe ke ili Lin adoru dum lia surtera misio kaj ĉiam en la ĉielo. Neatendita revelacio, miriga vizio al la malavaraj kaj dankaj koroj, sed profunda mistero — humiliga al la fieraj Spiritoj! Tiu supernatura karaktero, tiu grandega gloro, kiun oni al ili proponis, ne estus nur rekompenco por iliaj personaj meritoj. Ili neniam povus atribui al si mem la titolojn de tiu gloro! Ia peranto inter Dio kaj ili! Kia ofendo al ilia digno! Kion diri pri la spontanea prefero al la homa naturo? Kia maljusteco! Kia atenco al iliaj rajtoj!"

"Kaj ĉu ili ja vidos ĉi tiun homaron, kiu estas tiel malsupera al ili, diigitan pro unuiĝo kun la Vorto, sidantan ĉe la dekstra flanko de Dio sur brilanta Trono?

Ĉu ili konsentos fine, ke ĝi eterne faru al Dio sian adoromaĝon?”

“Lucifero kaj triono da anĝeloj falis pro tiaj pensoj de envio kaj fiero. Sankta Miĥael kaj multe da aliaj same ekkriis: “Kiu estas simila al Dio? Li estas la mastro de siaj donoj, la suverena Sinjoro de ĉiuj aferoj. Gloro al Dio kaj al la Ŝafido, kiu devas esti oferita por savo de la mondo.” Sed la ĉefo de la ribelintoj, forgesante, ke li ŝuldas al Dio siajn noblecon kaj privilegiojn, ĝislimante ĝis trokuraĝo, diris: “Mi supreniros en la ĉielon, pli alten ol la steloj de Dio, mi levos mian tronon, kaj mi sidos sur la monto de kunveno, ĉe la rando de nordo; mi supreniros sur la altaĵon de la nuboj, mi similiĝos al la Plejaltulo. “Kiuj dividis tiajn sentojn, tiuj aŭdis tiujn vortojn, kun murmuroj de aprobo, kaj partianoj aperis en ĉiuj hierarkioj. Sed ilia multego ne antaŭgardas ilin kontraŭ puno.”

9. Ĉi tiu doktrino naskas diversajn kontraŭdirojn:

1-a. Se Satano kaj la demonoj estis anĝeloj, ili do estis perfektaj; se estante perfektaj, kiel ili povis fali tiamaniere, ke ili ne rekonis la aŭtoritaton de tiu Dio, ĉe kiu ili troviĝis? Eĉ se ili estus grade atingintaj tian eminentecon, post kiam ili suriris la ŝtupojn de perfekteco, ni povus koncepti malgajan retroiron; sed ne en la maniero, kiel oni prezentas ilin al ni, t. e. perfektaj ekde ilia origino.

Jen estas la konkludo: Dio volis krei perfektajn estaĵojn, ĉar Li favoris ilin per ĉiuj kapabloj, sed Li trompiĝis: laŭ la Eklezio do Dio ne estas neerarema! (*)

---

(*) Ĉi tiu monstra doktrino estas konfirmita de Moseo, kiam li diris (Genezo, 6:6-7): “Tiam la Eternulo pentis, ke Li kreis la homon sur la tero, kaj Li afliktiĝis en Sia koro. Kaj la Eternulo diris: Mi ekstermos de sur la tero la homon, kiun Mi kreis, de la homoj ĝis la brutoj, ĝis la rampaĵoj, kaj ĝis la birdoj de la ĉielo; ĉar **Mi pentas**, ke Mi ilin kreis.” Nu, ia Dio, kiu pentas pri tio, kion Li faris, ne estas perfekta nek neerarema; Li do ne estas Dio. Kaj ĉi tiuj estas ja la vortoj, kiujn la Eklezio pro-

2-a. Ĉar la eklezio kaj la sanktaj analoj ne klarigas la kaŭzon de la ribelo de la anĝeloj kontraŭ Dio kaj nur konsideras kiel duban (*preskaŭ certan*) la reziston rekoni la estontan mision de la Kristo, kian valoron — ni demandas — kian valoron eble havas la priskribo tiel preciza kaj detala pri la sceno tiam okazinta? Per kia fonto ili helpis al si, por konkludi, ke efektive tiel klaraj vortoj kaj eĉ simplaj interparoloj estis eldiritaj? El du asertoj unu: la sceno estas vera aŭ ne. En la unua okazo, se ekzistas nenia dubo, kial la Eklezio ne solvis la demandon? Sed se la Eklezio kaj la Historio silentas, se la afero nur ŝajnas *certa*, estas nedubeble, ke ĝi estas nenio alia ol hipotezo, kaj la priskribita sceno estas nura frukto de imagemo. (*)

3-a. La vortoj atribuitaj al Lucifero montras mirigan nescion de ia ĉefanĝelo, kiu, pro siaj naturo kaj atingita rango, ne devas partopreni, rilate la organizon de la

---

klamas! Ankaŭ oni ne vidas tion, kio eble estis komuna inter la bestoj kaj malico de la homoj, ke tiuj meritus tian ekstermon.

(*) Estas legata en Jesaja, ĉap. XIV, §§ 11 kaj sekvantaj: "En ŝeolon estas ĵetita via majesto kaj la bruo de viaj psalteroj; sub vi sterniĝos vermoj, kaj vermoj estos via kovrilo. Kiel vi falis de la ĉielo, ho Lucifero, filo de la matenruĝo! Hakita sur la teron vi estas, ho turmentinto de la popoloj. Kaj vi diris **en via koro**: Mi supreniros en la ĉielon, pli alten ol la steloj de Dio mi levos mian tronon, kaj mi sidos sur la monto de kunveno, ĉe la rando de nordo; mi supreniros sur la altaĵon de la nuboj, mi similiĝos al la Plejaltulo. Sed en ŝeolon vi estos mallevita, en la profundon de la tombo! Tiuj, kiuj vin vidos, rigardos vin atente, kaj miros: ĉu ĉi tio estas la viro, kiu tremigis la teron, teruris regnojn, kiu faris la mondon dezerto kaj ruinigis ĝiajn urbojn, kiu siajn kaptitojn ne liberigis hejmen?" Ĉi tiuj vortoj de la profeto ne rilatas al la ribelo de la anĝeloj; ili ja estas ia aludo al la fiero kaj falo de la reĝo de Babilonio, kiu tenis la judojn kaptitaj, kiel atestas la lastaj paragrafoj. La reĝo de Babilonio estas alegorie nomata Lucifero, sed en tiu teksto oni faras nenian mencion pri la sceno supre priskribita. Tiuj vortoj estas de la reĝo, kiu ilin havis en sia koro, kaj sin lokis pro fiero super Dion, kies popolon li sklavigis. La profetaĵo pri liberigo de la juda popolo, de la reĝino de Babilonio kaj pri frakaso de la asirianoj estas cetere la ekskluziva temo de tiu ĉapitro.

Universo, en la eraroj kaj antaŭjuĝoj, kiujn la homoj konfesis ĝis tiam, kiam ili estis klarigitaj de la Scienco. Kiel do li povus diri, ke li levos loĝejon pli alten ol la steloj kaj supreniros sur la altaĵon de la nuboj?

Ĝi estas ĉiam la malnova kredo pri la Tero, kiel centro de la Universo, pri la ĉielo kvazaŭ formita el nuboj etendiĝantaj al la steloj, kaj pri la limigita regiono de ĉi tiuj, kiujn la Astronomio montras al ni dissemitajn sennombre en la senfina spaco! Sciante, kiel hodiaŭ oni scias, ke la nuboj ne altiĝas pli ol du mejloj super la tera surfaco, kaj parolante regi ilin en regiono kiel eble plej alta, kompare kun la montoj, oni devis fari sian observon de sur la Tero, efektiva loĝejo de la anĝeloj. Supozante, ke tiu loĝejo estas en supera regiono, senutile estus, ke oni altiĝus super la nubojn. Atribui al la anĝelo ian lingvaĵon makulitan per nescio estas konfesi, ke la nuntempaj homoj estas pli saĝaj ol la anĝeloj. La Eklezio ĉiam iras erare, ne alkalkulante la progresojn de la Scienco.

10. La respondo al la unua kontraŭdiro troviĝas en la sekvanta teksto:

"La sankta skribo kaj tradicio nomas ĉielo "la regionon, sur kiun oni lokis la anĝelojn, en la momento de ilia kreiĝo. Sed tiu ne estis la ĉielo super la ĉieloj, la ĉielo por beata vizio, kie Dio sin vizaĝe montras al siaj elektitoj, kiuj klare kaj sen peno Lin rigardas, ĉar tie estas plu nek ebleco nek danĝero de peko; tento kaj dubo tie estas nekonataj; justeco, paco kaj ĝojo regas senŝanĝaj, sankteco kaj gloro nepereemaj. Ĝi do estis alia ĉiela regiono, ia luma kaj feliĉa sfero, en kiu restadis tiel noblaj kreitoj favoritaj de la diaj komunikaĵoj, kiujn ili devis ricevi kun fido kaj humileco ĝis tiam, kiam ili estos akceptitaj en la konon de sia realo — esenco de Dio mem."

Laŭ tio antaŭe dirita oni konkludas, ke la defalintaj anĝeloj apartenis al ia malpli alta kaj perfekta kategorio, ne atinginte ankoraŭ la superegan lokon, en kiu eraro estas neebla. Ni do konsentu: sed tiam estas evidenta

kontraŭdiro en ĉi tiu aserto: — Dio *pri ĉio kreis ilin similaj al la superegaj spiritoj*, kiuj, subdividitaj en ĉiujn ordojn kaj ligitaj al ĉiuj klasoj, havis saman celon kaj identajn destinojn, kaj iliaj ĉefo estis la plej bela el la ĉefanĝeloj. Nu, estante pri ĉio similaj al la aliaj, ili ne estus malsuperaj ol tiuj je naturo; identaj je kategorioj, ili ne povus resti en ia speciala loko. Ne tuŝita do restas la kontraŭdiro.

11. Ankoraŭ ekzistas alia, kiu certe estas pli serioza kaj pli grava:

Oni diras: — "Ĉi tiu plano (la interveno de la Kristo), konceptita *ekde la tuta eterno*, estis prezentita al la anĝeloj longe antaŭ ĝia plenumo." Dio do sciis, de la tuta eterna tempo, ke tiel la anĝeloj, kiel la homoj bezonos tiun intervenon. Ankoraŭ pli: la Dio ĉioscia sciis, ke kelkaj el tiuj anĝeloj estis defalontaj, suferontaj eternan kondamnon kaj kuntrenontaj al sama sorto parton de la homaro. Kaj tiel, post pripenso Li antaŭe kondamnis la homan estaĵon, sian kreiton mem. Ĉi tiun rezonon oni ne povas eviti, ĉar alimaniere ni devus konsenti la dian nekonscion, proklamante la neantaŭscion de Dio. Por ni estas neeble identigi tian kreitaĵon kun la superega boneco. En ambaŭ okazoj ni vidas mankon de atributoj, kaj sen ilia absoluta tuteco Dio ne estus Dio.

12. Akceptite la erareco de la anĝeloj kaj de la homoj, puno estas cetere justa kaj natura sekvo de la kulpo; sed se ni akceptus samtempe la eblecon de pago, regenero kaj graco, post pento kaj elaĉeto, ĉio klariĝus kaj alkonformiĝus al la boneco de Dio. Li sciis, ke ili eraros, ke ili estas punotaj, sed Li same sciis, ke tia nedaŭra puno estos rimedo, kiu faros ilin kompreni la eraron, aliiĝontan en profiton por ili. Jen kiel oni klarigas la vortojn de la profeto Jeĥezkel: — "Mi deziras ne la morton de malvirtulo, sed ke malvirtulo deturnu sin de sia vojo kaj restu vivanta." (*)

(*) Vidu en la 1-a Parto, ĉap. VI, § 25, la citaĵon de Jeĥezkel.

La neutileco de pento kaj la neebleco de regenero ja neos la dian bonecon. Akceptite tia hipotezo, oni eĉ povos diri rigore kaj ĝuste, ke *ĉi tiuj anĝeloj ekde sia kreiĝo, ĉar Dio ne povas tion ignori, estas destinitaj por ĉiamigo de malbono, kaj antaŭdestinitaj esti demonoj por treni homojn al malbono*.

13. Ni nun vidu kia estas la sorto de tiaj anĝeloj kaj kion ili faras:

"Apenaŭ manifestiĝis la ribelo de la klaso de la Spiritoj, t. e. de la kuraĝego de iliaj pensoj, ili estis elpelitaj el la ĉiela restadejo kaj mallevitaj en la abismon. El tiuj vortoj ni komprenas, ke ili estis ĵetitaj en ian lokon por turmentado, en kiu ili suferas la fajropunon laŭ la teksto de la Evangelio, kiu estas la parolo mem de la Savanto. "For de mi, vi malbenitaj, en la eternan fajron, kiu estas preparita por la diablo kaj liaj anĝeloj." (*) Sankta Petro kategorie diras: "ke Dio ligis ilin al la inferaj katenoj kaj torturoj, ne estantajn tie eterne, ĉar nur ĉe la fino de la mondo ili por ĉiam estos enfermitaj kun la maliculoj. Nun Dio permesas, ke ili okupu lokon inter ĉi tiu Kreitaĵaro, al kiu ili apartenas en la ordo da aferoj identaj kun sia ekzistado, fine en la rilatoj, kiujn ili devus teni kun la homoj, kaj el kiuj ili faras la plej malutilan misuzon. Dum unuj restas en la nigra loĝejo, kiel instrumento de la dia justeco *kontraŭ la malfeliĉaj animoj, kiujn ili trompis*, senfina nombro da aliaj formas legiojn kaj loĝas en la malsuperaj tavoloj de la atmosfero, trakurante la tutan terglobon. Ili enmiksiĝas en ĉion ĉi tie okazantan, kaj ili eĉ tre aktive partoprenas en la surteraj okazaĵoj."

Rilate la vortojn de la Kristo pri la suferego en la eterna fajro, ni jam klarigis en la ĉap. IV, "La Infero".

14. Laŭ ĉi tiu doktrino nur parto de la demonoj estas en la infero; la alia libere vagas, enmiksiĝante en

(*) Mateo, 25:41. – **La Trad.**

ĉion ĉi tie okazantan, plezurante en la praktiko de malbono kaj tion farante ĝis la fino de la mondo, kies nedifinita tempo eble tiel frue ne venos. Sed kial tia distingo? Ĉu ĉi tiuj estas malpli kulpaj? Certe ne, kondiĉe se ili ne alternos, kiel oni povas konkludi el la jenaj vortoj: "Dum unuj restas en la nigra loĝejo, kiel instrumento de la dia justeco kontraŭ la malfeliĉaj animoj, kiujn ili trompis."

Iliaj okupoj do konsistas en suferigi *la animojn, kiujn ili delogis*. Tiel ili ne okupas sin per puno de kulpoj libere kaj memvole praktikitaj, sed per tiuj, kiujn ili mem kaŭzis. Ili estas samtempe *kaŭzo de eraro kaj instrumento de puno*; kaj stranga afero, kiu ne estus akceptata de la homa justeco eĉ neperfekta: – la viktimo, subfalanta pro malforteco, en eventualaĵoj neatendataj kaj eble superaj ol siaj fortoj, estas tiel aŭ pli severe punata ol la trompanto, kiu uzas ruzon aŭ artifikon, ĉar tiu viktimo, post kiam forlasas la Teron, iras en la inferon suferi sen interrompo, sen favoro, eterne, dum la kaŭzanto de ĝia unua kulpo, la deloganto, ĝuas tian aŭ tian prokraston kaj liberon ĝis la fino de la mondo.

Kiel povas la justeco de Dio esti malpli perfekta, ol tiu de la homoj?

15. Sed ankoraŭ ne estas ĉio: "Dio permesas, ke ili okupu lokon inter ĉi tiu Kreitaĵaro, en la rilatoj, kiujn ili devus teni al la homoj, kaj kiujn ili malutile trouzas." Ĉu Dio povus ne scii la misuzon, kiun ili farus el la libero donita de Li mem? Nu, kial Li ĝin donis? Sed en ĉi tiu okazo tute konscie Dio forlasas siajn kreitojn al ties propra sorto, sciante pro sia ĉioscieco, ke ili subfalos kaj havos la saman sorton de la demonoj. Ĉu ili ne estas per si mem sufiĉe malfortaj por eraro, sen provoko de ia malamiko des pli danĝera, ĉar li estas nevidebla? Kiel bele, se la puno estus nedaŭra kaj la kulpulo povus elaĉeti per riparo!... Kontraŭe la kondamno estas ne-nuligebla, eterna! Pento, regenero, lamentoj, ĉio superflua!

La demonoj do estas nenio alia ol provokantaj agentoj kaj antaŭdecide destinitaj varbi animojn al infero, laŭ permeso de Dio, kiu antaŭvidis, kiam Li kreis tiujn animojn, la sorton, kiu ilin atendos. Kion do oni dirus sur la Tero pri juĝisto, kiu sin helpus per tia rimedo por troplenigi malliberejojn? Strangan ideon oni donas al ni pri Dio, pri ia Dio, kies ĉefaj atributoj estas la jenaj: — superegaj justeco kaj boneco! Kaj oni diras, ke tiaj doktrinoj estas instruataj en nomo de Jesuo, de tiu, kiu predikis nur amon, pardonon kaj karitaton! Estis tempo, kiam oni ne rimarkis tiajn anomaliojn, ĉar ili ne estis komprenataj nek sentataj; la homo, kurbigita de la jugo de despoteco, submetis sin al la blinda fido, rezignis la racion. Sed hodiaŭ, kiam sonas la horo de emancipiĝo, tiu homo komprenas la justecon, kaj, dezirante ĝin tiel en la vivo, kiel en la morto, li ekkrias: — Tio ne estas Dio, Li ne povas esti tia, aŭ Dio ne estas Dio.

16. “Puno ĉie sekvas la defalintajn estaĵojn: la infero estas en ili kaj kun ili: ne paco nek ripozo, en amaraĵojn estas transformitaj la dolĉaĵoj de espero, kiu fariĝas al ili abomena. La mano de Dio donis al ili punon ĉe la ago mem de peko, kaj ilia volo koncentriĝis en malbono.

Fariĝinte malicaj, ili obstinas esti tiaj, kaj tiaj ili estos por ĉiam.

Ili estas post peko, kio estas la homo post la morto. *Renobliĝo de tiuj, kiuj defalis, fariĝas neebla*; de tiam ilia perdo estas neriparebla, kaj ili tenas sin en sia fiero antaŭ Dio, en sia malamo kontraŭ la Kristo, en sia envio kontraŭ la homaro.

Ne povinte alproprigi al si la ĉielan gloron per sia senmezura ambicio, ili klopodas firmigi sian imperion sur la Tero, elpelante de sur ĝi la regnon de Dio. La enkarniĝinta Vorto plenumis, krom tio, siajn planojn por la savo kaj gloro de la homaro. Pro tio, per ĉiuj rimedoj ili penas erarigi la animojn savitajn de la Kristo: artifiko kaj ĝenado, mensogo kaj delogo, ĉio estas uzata por ilin treni al malbono kaj elfini ilian perdon.

Kaj ĉar ili estas nelaceblaj kaj potencaj, la vivo de la homo kun tiaj malamikoj nepre estas senĉesa lukto, de la lulilo ĝis la tombo.

Efektive tiuj malamikoj estas tiuj samaj, kiuj, post enkonduko de malbono en la mondon, kovris ĝin per densa mallumo da eraro kaj malvirto; tiuj samaj, kiuj dum longaj jarcentoj igis sin adori, kvazaŭ dioj, kaj kiuj absolute regis la popolon en la antikveco; fine tiuj samaj, kiuj ankoraŭ havas tiranan influon sur la idolajn regionojn, ekscitante malordon kaj skandalon eĉ en la sino de la kristanaj societoj. Por kompreni ĉiujn rimedojn, kiujn ili disponas por la malica servo, estas sufiĉe, ke oni rimarku, ke ili *nenion perdis el siaj miraklecaj kapabloj, kiuj estas karaktero de la anĝela naturo*. Vere la estonteco kaj super ĉio la natura ordo havas misterojn konatajn nur de Dio, en kiujn ili ne povas penetri; sed ilia inteligento estas tre supera ol nia, ĉar ili per unu fojo komprenas la efikojn de la kaŭzoj kaj kontraŭe. Tiu kompreno ebligas al ili antaŭdiri estontajn okazaĵojn, kiujn ne vidas niaj konjektoj. Distanco kaj plureco de lokoj malaperas antaŭ ilia facilmoveco. Pli rapidaj ol fulmo, pli rapidaj ol penso, ili preskaŭ subite aperas sur diversaj punktoj de la terglobo kaj povas priskribi okazaĵojn en la distanco, en la sama horo, kiam ĉi tiuj efektiviĝas.

Ili ne estas alireblaj por la leĝoj, laŭ kiuj Dio regas la Universon, tial ili ne povas ilin nuligi, kaj sekve antaŭdiri kaj fari efektivajn miraklojn; sed ili konas la arton imiti kaj falsigi en difinitaj limoj la diajn verkojn; ili scias pri la fenomenoj rezultantaj el la kombino de la elementoj, antaŭdiras kun pli aŭ malpli granda certeco tiujn, kiuj nature okazas kaj ankaŭ tiujn, kiujn ili mem povas estigi. El tio rezultas la nombraj orakoloj, la eksterordinaraj antaŭdiroj, kiujn la sanktaj kaj profanaj libroj rikoltis, bazante kaj kuraĝante tiom kaj tiom da supertiĉoj.

Ilia simpla kaj nemateria substanco forprenas ilin de antaŭ niaj okuloj; ili restas ĉe nia flanko kaj ni ilin ne vidas, ili altiras nian animon, ne impresante nian aŭdadon. Opiniante, ke ni obeas niajn proprajn pensojn,

ni tamem multfoje estas sub ilia pereiga influo. Kontraŭe niaj inklinoj estas konataj de ili pro la en ni travidataj impresoj, kaj ili ordinare nin atakas ĉe la plej malforta flanko. Por nin sekure delogi ili helpas sin per sugestoj kaj allogaĵoj konformaj al niaj inklinoj. Ili modifas sian agadon laŭ la cirkonstancoj kaj karakteraj trajtoj de ĉiu temperamento. Sed iliaj plej preferataj armiloj estas hipokriteco kaj mensogo."

17. Oni asertas, ke sufero ilin ĉien sekvas; ke ili ne scias, kio estas paco kaj ripozo. Ĉi tiu aserto neniel detruas la observon, kiun ni faris pri la privilegio de tiuj, kiuj troviĝas ekster la infero, privilegio, kiun ni konsideras des malpli justa, pro tio, ke ili povas fari, kaj ja faras, pli grandan malbonon. Estas kredeble, ke tiuj eksterinferaj demonoj ne estas tiel feliĉaj, kiel la bonaj anĝeloj, sed ĉu oni ne devas alkalkuli ilian relativan liberon? Ili ne posedos la moralan feliĉon, kiun naskas la virto, sed ili nekontesteble estas pli feliĉaj, ol tiuj en la infero kun flamoj. Cetere maliculo ĉiam sentas ian plezuron praktiki malbonon, des pli kiam li agas libere. Demandu krimulon, kion li preferas: resti en malliberejo aŭ libere trairi kamparojn, agante laŭvole. La afero do estas ĝuste sama.

Oni ankaŭ asertas, ke konsciencoriproĉo ilin postsekvas sen interrompo kaj kompato, forgesante, ke konsciencoriproĉo estas la senpera antaŭanto de la pento, se ne la pento mem. "Fariĝinte malicaj, ili obstinas esti tiaj, kaj tiaj ili restos por ĉiam." Sed, ĉar ili obstinas esti malicaj, ili ja ne havas konsciencoriproĉojn; kontraŭe, ĉe la plej malgranda sento de bedaŭro, ili rezignus malbonon kaj petus pardonon. Konsciencoriproĉo do ne estas puno por ili.

18. "Ili estas post pekado tio, kio estas la homo post la morto. La renobliĝo de la falintoj do fariĝas neebla."

El kio venas tiu neebleco? Oni ne komprenas, ke ĝi estas konsekvenco de ilia simileco al la homo post la morto, propozicio, kiu cetere estas tre dubasenca.

Ĉu ĝi venas de la volo mem de la demonoj? Ĉu eble de la dia volo? En la unua okazo la obstineco montras absolutan firmecon en malbono, kaj eĉ oni ne komprenas, ke profunde malicaj estaĵoj iam povis esti *virtaj anĝeloj*, konservante ĉe ĉi tiuj, dum *nedifinita* tempo, ĉiujn trajtojn de siaj malbonegaj karaktero kaj naturo.

En la dua okazo, oni ankoraŭ malpli komprenas, ke Dio altrudis, kiel punon, la neeblecon de riparo post unua eraro. La Evangelio ne faras ian aludon pri io simila.

19. "De tiam ilia perdo estas neriparebla, kaj ili tenas sin en sia fiero antaŭ Dio." Pri kio ilin helpus la detruo de tiu fiero, se pento ne utilas al ili? Nur bono povus ilin interesi, se ili havus esperon pri renobliĝo, kia ajn estus ties prezo. Tiel ne okazas, kaj, se ili do persistas en malbono, estas tial, ĉar oni fermis al ili la pordon de espero. Sed kial Dio fermus al ili tian pordon? Por venĝi sin por la ofendo rezultanta el ilia malobeo. Kaj tiel, por kontentigi sian resenton kontraŭ kelkaj kulpuloj. Dio preferas ne nur vidi ilin suferi, sed ankaŭ pligravigi la malbonon per pli granda malbono; peli la tutan homaron al la eterna sufero, kiam per simpla indulga ago Li povus eviti tiel grandan turmenton, cetere antaŭviditan ekde la tuta eterno!

Ĉu temas, en ĉi tiu okazo, pri ago de indulgo, pri nura kaj simpla graco, kiu eble aliiĝus en stimulon al malbono? Ne, temas pri kondiĉa pardono, dependanta de sincera kaj kompleta regeneriĝo. Sed anstataŭ parolo de espero kaj favorkoreco, kvazaŭ diris Dio: *"Pereu la tuta homa raso antaŭ ol mia venĝo."* Kaj antaŭ tia doktrino ankoraŭ multe da homoj miras, ke ekzistas nekredemuloj kaj ateistoj! Ĉu estas tiel, ke Jesuo reprezentas ĉe ni sian Patron? Li, kiu donis al ni la kategorian leĝon de forgeso kaj de pardono je la ofendoj, kiu ordonas nin pagi malbonon per bono, kiu preskribas amon al niaj malamikoj, kiel unuan el la virtoj kondukantaj nin al la ĉielo, li tiamaniere ja volus, ke la homoj estu pli bonaj, pli justaj, pli indulgaj, ol Dio mem?

## Demonoj laŭ Spiritismo

20. Laŭ Spiritismo anĝeloj kaj demonoj ne estas distingiĝaj estuloj, pro tio, ke la kreado de inteligentaj estaĵoj estas nur unu sama. Unuiĝintaj al materiaj korpoj, tiuj estaĵoj konsistigas la homaron, kiu loĝas sur la Tero kaj sur aliaj sferoj; liberiĝintaj de la materia korpo, ili konsistigas la spiritan mondon aŭ de la Spiritoj, kiuj loĝas en la Spacoj. Dio kreis ilin *perfekteblaj* kaj donis al ili, kiel celon, la perfektecon kun la feliĉo el ĝi rezultanta. Sed ne donis al ili la perfektecon, ĉar Li volis, ke ili ĝin ekhavu per sia propra klopodo, ke ankaŭ al ili reale apartenu la merito. De la momento de sia kreiĝo la estaĵoj progresas, ĉu enkarniĝintaj, ĉu en la spirita stato. Atinginte la apogeon, ili *fariĝas puraj spiritoj aŭ anĝeloj* laŭ la vulgara esprimo, tiamaniere ke, de la embrio de la inteligenta estaĵo ĝis anĝeloj, ekzistas ia ĉeno, de kiu ĉiu el la ĉeneroj signas gradon da progreso.

El tio supre dirita rezultas, ke ekzistas Spiritoj en ĉiuj gradoj da morala kaj intelekta progreso, laŭ la pozicio, en kiu ili troviĝas sur la grandega evolua ŝtuparo.

Nescieco, scieco kaj malico do ekzistas laŭ ĉiuj gradoj. En la malsuperaj klasoj ankoraŭ elstaras Spiritoj profunde inklinaj al malbono, plezurante ĉe malbono. Ĉi tiujn oni povas nomi *demonoj*, ĉar ili estas kapablaj por ĉiuj malicaĵoj atribuataj al demonoj. Spiritismo ne donas al ili tian nomon, ĉar ĝi estas ligita al ideo pri ia kreaĵo malsama ol la homa speco, pri estaĵoj kun esence malica naturo, eterne destinitaj al malbono kaj nekapablaj por ia ajn progreso je la bono.

21. Laŭ la doktrino de la Eklezio la demonoj naskiĝis bonaj kaj fariĝis malbonaj pro sia malobeo: ili estas anĝeloj primitive lokitaj de Dio sur la supron de la ŝtuparo, kaj ili defalis de ĝi. Laŭ Spiritismo la demonoj estas neperfektaj Spiritoj kapablaj je regeneriĝo, kiuj, metitaj sur la bazo de la ŝtuparo, nepre ĝin supreniros. Tiuj, kiuj pro apatio, neglekto, obstino aŭ malbonvolo pli da tempo persistas resti ĉe la malsuperaj

klasoj, spertas la sekvojn de tiu sinteno, kaj kutimo al malbono malhelpas ilian regeneriĝon. Sed iam venos al ili laceco pro tiu malvirto kaj ĝiaj respektivaj sekvoj; ili komparas sian situacion kun tiu de la bonaj Spiritoj kaj komprenas, ke ilia intereso estas ĉe la bono, kaj tiam ili penas pliboniĝi, sed per ago de spontanea volo, kaj en tio estas nenia perforto. "Submetitaj al la ĝenerala leĝo de progreso, pro sia inklino al ĝi, eĉ tiel ili antaŭeniras ne kontraŭvole." Dio konstante donas rimedojn al ili, sed kun la povo ilin akcepti aŭ malakcepti. Se la progreso estus deviga, ne ekzistus merito, kaj Dio volas, ke ni ĉiuj havu la meriton laŭ niaj faroj. Neniu estas metita sur unuan lokon pro privilegio; sed al ĉiuj estas konsentita la unua loko, kiun oni atingas per sia propra klopodo.

La plej superaj anĝeloj atingis sian altrangecon, irante, same kiel la aliaj, la ordinaran vojon.

22. Atinginte ian gradon da pureco, la Spiritoj ekhavas misiojn konformajn al sia progreso, ili tiel plenumas ĉiujn misiojn atribuatajn al la anĝeloj el malsamaj kategorioj.

Kaj, ĉar Dio kreas de eterne, oni konkludas, ke de eterne estas sufiĉa nombro da ili por kontentigi la bezonojn de la universala regado. En tiu maniero nur unu speco da inteligentaj estaĵoj, submetita al la leĝo de progreso, kontentigas ĉiujn celojn de la Kreitaĵaro.

Fine la unueco de la Kreitaĵaro ligita al la ideo pri ia komuna origino kun samaj deirpunkto kaj vojo pli bone respondas al la justeco de Dio, ol la kreado de malsamaj specoj pli-malpli favorataj per naturaj dotoj, kiuj estus tiom da aliaj privilegioj.

23. La vulgara doktrino pri la naturo de la anĝeloj, de la demonoj kaj de la animoj, ne konsentante pri la leĝo de progreso, sed vidante diversgradajn estaĵojn, konkludis el tio, ke ili estas rezulto de tiom da aliaj specialaj kreoj. Kaj tiel ĝi faris el Dio partian patron, kiu donas ĉion al unuj el siaj infanoj kaj al aliaj altrudas

plej krudan laboron. Oni ne miru, ke dum longe la homoj trovis pravigon por tiaj preferoj, kiam ili mem uzis ĉi tiujn preferojn rilate al siaj infanoj, starigante rajtojn de unuenaskiteco kaj aliajn naskiprivilegiojn. Ĉu tiaj homoj povis kredi, ke ili estis pli eraraj ol Dio?

Sed hodiaŭ la sfero da ideoj larĝiĝis: la homo vidas pli klare kaj havas nociojn pli precizajn pri justeco; dezirante ĝin por si kaj ne ĉiam trovante ĝin sur la Tero, li almenaŭ volas trovi ĝin pli perfekta en la Ĉielo.

Jen kial lia racio abomenas ĉian doktrinon, en kiu ne brilas la Dia Justeco, laŭ ties tuta pureco.

# ĈAPITRO X

## INTERVENO DE DEMONOJ EN LA NUNTEMPAJN MANIFESTIĜOJN

1. La nuntempaj spiritismaj fenomenoj de longe altiras atenton sur analogajn faktojn de ĉiuj tempoj, kaj pri tio la Historio neniam estis tiel esplorata, kiel en la lastaj tempoj. Pro la simileco de efikoj oni deduktis la unuecon de la kaŭzo. Kiel ĉiam okazas rilate al eksterordinaraj faktoj nekonataj de la komuna saĝo, la vulgarularo vidis en la spiritismaj fenomenoj ian supernaturan kaŭzon, kaj la superstiĉo kompletigis la eraron, aldonante al ĝi absurdajn kredojn. El tio venas amaso da legendoj, kiuj plejparte estas ia miksaĵo el malmultaj veraĵoj kaj multaj mensogoj.

2. La doktrinoj pri la demono, longe superstarante, tiom multe troigis ian povon, ke ili, por tiel diri, igis la homojn forgesi Dion; ĉie aperis la fingro de Satano, kaj por tio sufiĉis, ke la observita fakto transiru la limojn de la homa povo. Eĉ la plej bonaj aferoj, la plej utilaj malkovroj, precipe tiuj, kiuj povis skui la malklerecon kaj plilarĝigi la sferon da ideoj, plurfoje estis rigardataj kiel diablaj faroj. La hodiaŭaj spiritismaj fenomenoj, pli disvastigitaj kaj pli bone observataj en la lumo de la prudento kaj kun helpo de la Scienco, sendube konfirmas la intervenon de kaŝitaj inteligentoj, kiuj tamen agadas laŭ naturaj leĝoj kaj montras per sia agado ian novan forton kaj leĝojn ĝis tiam nekonatajn.

Sekve la demando reduktiĝas al tio, nome scii kiaspecaj estas tiaj inteligentoj.

Dum oni posedis sciojn pri la spirita mondo nur necertajn kaj sistemajn, la vero daŭre estis kaŝita; sed hodiaŭ, kiam rigoraj observoj kaj eksperimentaj studoj klarigas la naturon, originon kaj destinon de la Spiritoj, kaj ankaŭ ilian agmanieron kaj rolon en la Universo, hodiaŭ, ni diras, la demando solviĝas per faktoj. Nun ni scias, ke tiuj kaŝitaj inteligentoj estas la animo de tiuj, kiuj vivis sur la Tero. Ni ankaŭ scias, ke la diversaj kategorioj el bonaj kaj malbonaj Spiritoj ne konsistas el estuloj de malsamaj specoj, sed ke ili prezentas nur *diversajn gradojn da progreso*. Laŭ la pozicio, kiun ili okupas pro sia intelekta kaj morala disvolviĝo, la manifestiĝantaj estuloj prezentas la plej profundajn kontrastojn, sen kio ni povus supozi, ke ne ili ĉiuj eliris el la granda homa familio, sammaniere kiel la sovaĝulo, la barbaro kaj la civilizita homo.

3. Pri tiu punkto, same kiel pri multaj aliaj, la Eklezio tenas la antikvajn kredojn je la demonoj. Ĝi diras: "Ekzistas principoj, kiuj ne ŝanĝiĝas jam de dek ok jarcentoj, ĉar ili estas neŝanĝemaj." Ĝia eraro estas ĝuste tio, ke ĝi ne konsideras la progreson de la ideoj; ke ĝi supozas Dion nesufiĉe saĝa por ebligi revelacion al la disvolviĝo de la inteligentoj; resume, ke ĝi parolas al la samtempuloj la saman lingvon de la pasinteco. Nu, se la homaro progresas, dum la Eklezio sisteme tenas sin en malnovaj eraroj tiel sur la spirita kampo, kiel same sur la scienca, baldaŭ venos nekredemo, submetante la propran Eklezion.

4. Jen kiel la Eklezio klarigas la ekskluzivan enmiksiĝon de la demono en la spiritajn manifestiĝojn: (*)

(*) La citaĵoj en ĉi tiu ĉapitro estas prenitaj el la sama pastoralo menciita en la antaŭa, kies korolarioj ili estas. Ĝi estas la sama fonto kaj sekve la sama aŭtoritato.

"En siaj eksteraj enmiksiĝoj la demonoj penas kaŝi sian ĉeeston, por forigi suspektojn. Ĉiam ruzaj kaj perfidaj, ili delogas la homon per insidoj, antaŭ ol mankateni lin per subpremo kaj sklavaĉemo.

Ĉi tie ili akrigas lian scivolemon per fenomenoj kaj infanecaj petolaĵoj; tie ili vekas lian admiron kaj subigas lin per sorĉo de tio supernatura.

Se io supernatura ekaperas kaj ilin senmaskigas, tiam ili kvietiĝas, forigas ĉiajn maltrankviliĝojn, petas pri konfido kaj estigas familiarecon.

Jen ili prezentiĝas kiel dioj kaj bonaj genioj, jen prenas nomojn kaj eĉ trajtojn de memorataj mortintoj. Helpe de tiaj trompoj indaj je la antikva serpento, ili parolas kaj estas aŭdataj; ili diktas dogmojn kaj estas fidataj; almiksas al siaj mensogoj kelkajn veraĵojn kaj sugestias eraron sub ĉiaj formoj. Jen kion signifas la supozataj revelacioj el transtombo. Kaj estas por tia rezulto, ke lignaĵo kaj ŝtono, arbaroj kaj fontoj, sanktejoj de idoloj kaj tablopiedoj kaj infanmanoj fariĝas orakoloj: tial antaŭdiristino delire profetas; malklerulo fariĝas scienculo dum mistera sonĝo. Trompi kaj falsi, jen estas la superega celo de tiuj manifestiĝoj, ĉie kaj ĉiam.

La mirigaj rezultoj de tiuj ordinare absurdaj kaj ridindaj praktikoj aŭ agoj, ne povante deveni de la ekskluziva virto, nek de *la ordo starigita de Dio*, povas esti atribuataj nur al la helpo de la kaŝitaj povoj. Tiaj estas ĉefe la eksterordinaraj fenomenoj realigitaj en niaj tagoj, per la ŝajne nedanĝeraj procedoj de magnetismo, kaj ankaŭ tiuj de la parolantaj tabloj. Per faroj de la moderna magio, ni vidas nuntempe reproduktiĝi la elvokojn, la konsultojn, la *resanigojn* kaj sorĉaĵojn, kiuj famigis la templojn de la idoloj kaj kavernojn de la sibiloj. Kiel en la pasinteco, oni demandas lignon, kaj ĉi tiu respondas; oni ordonas al ĝi, kaj ĝi obeas; tio en ĉiuj lingvoj kaj pri ĉiuj aferoj; oni troviĝas antaŭ nevideblaj estuloj uzurpantaj nomojn de mortintoj, kies supozataj malkaŝoj havas karakteron de kontraŭdiro kaj mensogo; senkonsistaj kaj subtilaj formoj subite kaj rapide

ekaperas, montrante sin kvazaŭ dotitaj per superhoma forto.

Kiuj estas la sekretaj agantoj de tiuj fenomenoj, la veraj aŭtoroj de tiuj neklarigeblaj scenoj? La anĝeloj, tiuj ne akceptus ja tiajn malnoblajn rolojn, kaj ankaŭ ne submetiĝus al ĉiuj kapricoj de la scivolemo.

La animoj de la mortintoj, kiujn Dio malpermesas elvoki, restas en la loko por ili destinita de lia justeco, kaj ne povas, sen lia permeso, submetiĝi al la ordonoj de la vivantoj. Tiamaniere, la misteraj estuloj alkurantaj ĉe la unua alvoko de *herezulo*, de *malpiulo* aŭ de *kredemulo* — kio estas grave diri: de naiveco aŭ de krimo — estas nek senditoj de Dio, nek apostoloj de la vero kaj de la savo, sed faktoroj de eraro kaj agantoj de la infero. Malgraŭ la zorgo, kun kiu ili sin kaŝas sub la plej respektindaj nomoj, ili sin perfidas pro senvaloreco de siaj doktrinoj, pro la malnobleco de siaj faroj kaj senkoheraj paroloj.

Ili penas forviŝi de la religia simbolo la dogmojn de la origina peko, de la renaskiĝo de la korpoj, de la *eternaj punoj*, kaj ankaŭ de la tuta dia revelacio, por forpreni de la leĝoj ties veran sankcion kaj malfermi al malvirto ĉiujn barojn. Se iliaj sugestoj povus superstari, ili fine formus oportunan religion por uzo de socialismo kaj de ĉiuj, kiujn ĝenas la nocio pri la devo kaj pri la konscienco.

La nekredemo en nia jarcento faciligis al ili la vojon. Tiel, la kristanaj societoj povu, per sincera sindono al la katolika kredo, eviti la danĝeron de tiu nova kaj terura invado!”

5. Tiu tuta teorio devenas de la principo, ke ĉiuj anĝeloj kaj demonoj estas estuloj diferencaj de la homaj animoj, kaj ĉi tiuj prefere estas produkto de ia speciala kreado, cetere malsuperaj al la demonoj laŭ inteligenteco, laŭ scio kaj ĉiaspecaj kapabloj. Kaj tial ĝi opinias, ke estas ekskluziva de la malicaj anĝeloj la interveno en la antikvajn kaj nuntempajn manifestiĝojn de la Spiritoj.

La ebleco de komunikiĝo de mortintoj estas fakta afero, estas la rezulto de observado kaj eksperimentoj, kies diskuto ne estas ĉi tie oportuna. Ni tamen akceptu, kiel hipotezon, la ĉi-supre menciitan doktrinon, kaj ni vidu ĉu ĝi ne detruiĝas mem, per siaj propraj argumentoj.

6. El la tri kategorioj de anĝeloj, laŭ la Eklezio, la unua okupiĝas ekskluzive pri la ĉielo; la dua, pri la regado de la Universo, kaj la tria, pri la Tero. En ĉi tiu lasta troviĝas la gardantaj anĝeloj, al kiuj estas komisiita la protektado de ĉiu homo. Nur unu parto da anĝeloj el ĉi tiu lasta kategorio partoprenis en la ribelo kaj estis transformita en demonojn. Nu, ĉar Dio permesis al ili, jen per kaŝitaj sugestoj, jen per videblaj manifestiĝoj, tiel libere erarigi la homojn, kaj ĉar tiu Dio estas superege bona kaj justa, Li almenaŭ devus, por malgravigi la malbonojn de tiel abomeninda privilegio, permesi ankaŭ la manifestiĝon de la bonaj anĝeloj. Tiel la homoj havus minimume la liberecon kaj la rimedon de la elekto. Sed doni al la malbonaj anĝeloj la monopolon de delogo, kun vasta povo ŝajnigi, ke ili faras bonon por pli bone delogi, kaj samtempe malpermesante ĉian intervenon de la bonaj, tio estas atribui al Dio la nekoncepteblan intencon pligravigi la malfortecon, la malspertecon kaj naivecon de la homoj.

Ankoraŭ pli: tio igas nin supozi konfidekspluaton de Dio, pro la fido, je kiu Li estas inda. La prudento rifuzas akcepti tiom multan partiecon profite al malbono. Ni vidu la faktojn.

7. Al la demonoj oni donas transcendajn kapablojn: ili nenion perdis el la anĝela naturo; ili posedas la scion, la sagacecon, la antaŭzorgon kaj la penetremon de la anĝeloj, havante ankoraŭ plie ruzon, trompemon kaj artifikon, ĉion en pli alta grado. Iliaj celoj estas deturni la homojn de la bono, malproksimigi ilin de Dio kaj treni ilin en la inferon, kies provizistoj kaj rekrutistoj ili estas. Tiel oni komprenas, ke ili prefere sin direktu al tiuj,

kiuj persisteme troviĝas sur la bona vojo; oni komprenas la uzadon de allogoj kaj ŝajniĝoj de bono por altiri kaj erarigi la homojn; sed kion oni ne komprenas, estas tio, ke la demonoj direktu sin al tiuj, kiuj jam apartenas al ili, per korpo kaj animo, por rekonduki ilin al Dio kaj bono.

Kiu pli forte estos inter la ungegoj de demono, ol tiu, kiu blasfemas kontraŭ Dio, regita de malvirto kaj konfuziteco pro pasioj? Ĉu tiu ne estas sur la vojo al infero? Kiel tamen oni komprenu, ke al tia kaptaĵo tiu demono instigu petegi Dion, submetiĝi al lia volo, kaj rezigni malbonon?

Kiel oni komprenu, ke li altigas antaŭ la okuloj de tiu kaptaĵo la plezuregan vivon de la bonaj Spiritoj, kaj pentras la teruran situacion de la malbonaj? Neniam oni vidis komerciston elstarigi al siaj klientoj la varojn de najbaro malprofite al siaj, konsilante ilin iri al ties vendejo. Neniam oni vidis rekrutiston de soldatoj subtaksi la militistan vivon, prikantante la ripozon de la hejma vivo! Ĉu li povos diri al la rekrutoj, ke ĉi tiuj havos vivon plenan de laboroj kaj seniĝoj, kun dek eblecoj kontraŭ unu morti, aŭ almenaŭ resti sen brakoj kaj kruroj? Tiu tamen estas la malinteligenta rolo de la demono, ĉar estas notinde — kaj ĝi estas fakto —, ke la instruoj devenintaj de la nevidebla mondo regeneris nekredantojn kaj ateistojn, enblovante en ties animojn fervoron kaj kredojn neniam ekzistintajn.

Ankoraŭ pro tiaj manifestiĝoj oni vidis — kaj oni vidas ĉiutage — regeneriĝi obstinajn malvirtulojn, penantajn plibonigi sin mem. Nu, atribui al demono tiel bonefikan propagandon kaj edifan rezulton estas ja doni al li diplomon pri stulteco.

Ĉar ne temas pri simpla supozo, sed pri eksperimenta fakto, kontraŭ kiu ne ekzistas argumento, ni devas konkludi, ke la demono estas ia unuaklasa mallertulo, aŭ ke li ne estas tiel sagaca kaj malbona, kiel oni pensas, kaj sekve ne tiel timiga, kiel oni diras; aŭ ke tiam ĉiuj manifestiĝoj ne venas de li.

8. "Ili penetrigas en la spiriton la eraron sub ĉiuj formoj, kaj estas ja por havigi al si tian rezulton, ke ligno, ŝtono, arbaroj, fontoj, sanktejoj de idoloj, tablo-piedoj kaj *manoj de infanoj* fariĝas orakoloj."

Sed, se tiel estas, kiuj estas la signifo kaj la valoro de la vortoj de la Evangelio: — "Mi elverŝos Mian spiriton sur ĉiun karnon; kaj viaj filoj kaj viaj filinoj profetos, kaj viaj junuloj havos viziojn, kaj viaj maljunuloj havos sonĝojn; kaj eĉ sur Miajn sklavojn kaj Miajn sklavinojn en tiu tempo Mi elverŝos Mian Spiriton, kaj ili profetos." (La Agoj, 2:17 kaj 18.)

Ĉu en tiuj paroloj ne estas la silenta antaŭdiro de la nuntempa mediumeco al ĉiuj permesita, eĉ al la infanoj? Ĉu tiu kapablo estis anatemata de la apostoloj? Ne; ili ĝin proklamas, kiel dian favoron, kaj ne kiel demonan faron.

Ĉu la hodiaŭaj teologoj havas pli multe da aŭtoritato ol la apostoloj? Kial ne vidi prefere la dian fingron en la efektiviĝo de tiuj paroloj?

9. "Per la moderna magio, ni vidas nuntempe refariĝi la elvokojn, la konsultojn, la resanigojn kaj la sorĉaĵojn, kiuj disfamigis la templojn de la idoloj kaj la kavernon de la sibiloj."

Ni demandas: kio komuna ekzistas inter la faroj de la magio kaj la spiritaj elvokoj?

Estis tempo, kiam tiaj faroj estis fidindaj kaj oni kredis al ilia efiko, sed hodiaŭ ili estas nur ridindaj. Neniu ilin konsideras, kiel seriozajn, kaj Spiritismo ilin kondamnas. En la epoko, kiam la magio floris, estis neperfekta la kono pri la naturo de la Spiritoj, kiujn oni ĝenerale rigardis, kiel estaĵojn dotitajn per superhoma povo.

Koste de sia propra animo, neniu ilin elvokis krom por havigi al si favorojn de la sorto kaj destino, trovi trezorojn, malkaŝi la estontecon aŭ ekhavi eliksirojn de amo. Kune kun siaj kabalaj signoj, formuloj kaj praktikoj, la magio estis riproĉata pro tio, ke ĝi liveris sekretojn por fari miregindaĵojn, por devigi Spiritojn submetiĝi al

la ordonoj de homoj kaj kontentigi ties dezirojn. Hodiaŭ ni scias, ke Spiritoj estas animoj de mortintoj, kaj ni ne elvokas ilin, krom por ricevi konsilojn de tiuj bonaj, moraligi la malbonajn, kaj interrilati plu kun estuloj karaj al ni. Jen tio, kion Spiritismo diras tiurilate:

10. Vi neniam povos postuli la ĉeeston de Spirito al vi egala aŭ supera pri moraleco, ĉar al vi mankas aŭtoritato super li; sed de Spirito malsupera al vi, kaj se ĝi *estas por via bono*, tiam tio al vi prosperos, ĉar tiam aliaj Spiritoj vin helpos. (*La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap. XXV.)

La plej nepre necesa el ĉiuj disponoj por elvoko estas la enmemiĝo, kiam oni volas havi aferon al seriozaj Spiritoj. *Kun fido kaj deziro fari bonon* oni havas pli da forto por elvoki la superajn Spiritojn. Dum kelkaj momentoj da enmemiĝo, altigante sian animon, oni identiĝas kun la bonaj Spiritoj kaj inklinigas ilin veni. (*La Libro de la Mediumoj,* 2-a Parto, ĉap. XXV.)

Neniu objekto, kiel medalo kaj talismano, havas la povon altiri aŭ forpuŝi la Spiritojn, ĉar la materio neniel agas sur ilin. Iu bona Spirito neniam konsilas tiajn sensencaĵojn. La efiko de talismanoj neniam ekzistis krom en la imagemo de kredemuloj. (*La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉp. XXV)

Ekzistas nenia rita formulo por elvoki Spiritojn; kiu ajn pretendus rekomendi iajn parolojn, tiun oni povas sentime alnomi ĉarlatano, ĉar por la puraj Spiritoj formo estas nenio. Tamen la elvoko devas ĉiam esti farata en la nomo de Dio. (*La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap. XVII.)

La Spiritoj difinantaj rendevuojn en terurvekaj lokoj kaj je malfruegaj horoj amuzas sin pri la homoj, kiuj ilin aŭskultas. Estas ĉiam senutile kaj ofte danĝere cedi al similaj sugestoj; senutile, ĉar oni el tio gajnas nenion, krom esti mistifikita; danĝere, ne pro la malbono, kiun la Spiritoj povas fari, sed pro la influo, kiun tio povas havi sur malfortajn cerbojn. (*La Libro de la Mediumoj,* 2-a Parto, ĉap. XXV.)

Ne ekzistas tagoj nek horoj pli favoraj por elvokoj: por la Spiritoj tio estas tute indiferenta, same kiel ĉio materia, kaj estus superstiĉo kredi la *influon* de tagoj kaj horoj. La plej favoraj momentoj estas tiuj, en kiuj la elvokanto povas esti malplej absorbita de siaj kutimaj okupoj, kiam lia korpo kaj lia spirito troviĝas en la plej trankvila stato. (*La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap. XXV.)

Al la malbonvola kritiko plaĉis prezenti la spiritajn komunikaĵojn envolvitaj en ridindaj kaj superstiĉaj praktikoj de magio kaj nekromancio. Se la homoj, kiuj parolas pri Spiritismo, ne ĝin konante, penus studi tion, pri kio ili volas paroli, ili ŝparus al si mulatjn imag-laborojn kaj asertojn, kiuj taŭgus nur por pruvi iliajn nescion kaj malbonan volon.

Por informo al personoj fremdaj al tiu scienco, ni diros, ke por komunikiĝi kun la Spiritoj, ne estos tagoj, nek horoj, nek lokoj pli favoraj ol aliaj; ke por ilin elvoki ne estas necesaj formuloj, nek vortoj sakramentaj aŭ kabalaj; ke oni bezonas nenian preparon aŭ inicadon; ke la uzado de ĉiu signo aŭ materia objekto por ilin altiri aŭ forigi estas senefika, kaj ke la penso sufiĉas; fine, ke, ne elirantaj el sia normala stato, la mediumoj ricevas iliajn komunikaĵojn tiel simple kaj nature, kiel se ĉi tiuj estus diktataj de vivanta homo. Nur ĉarlataneco povus afekti strangajn manierojn kaj aldoni ridindajn akce-soraĵojn. (*Kio estas Spiritismo?*, ĉap. II, § 49.)

Kiel principo, estonteco estas kaŝita al la homo, kaj nur en maloftaj esceptaj okazoj Dio permesas, ke ĝi estu malkaŝita. Se la homo konus sian estontecon, li ne atentus la nunecon kaj ne kondutus kun sama libereco; ĉar li estus posedita de la ideo, ke, se io devas okazi, li ne bezonas sin okupi pri ĝi, aŭ li penus ĝin deturni. Dio ne volis, ke tiel estu, por ke ĉiu kunlaboru por la plenumo de la aferoj, eĉ de tiuj, kiujn la homo volus kontraŭstari. Dio tamen permesas ĝian malkaŝon, kiam ĝia antaŭa kono ne malhelpas, sed faciligas la plenumon de iu afero, sugestante al homo konduton alian ol tiu, kiun li havus

sen tia cirkonstanco. (*La Libro de la Spiritoj*, 3-a Parto, ĉap. X.)

La Spiritoj ne povas gvidi la homojn en la eltrovoj kaj en la sciencaj esploroj. La scienco estas verko de la genio; ĝi devas esti akirita nur per laboro, ĉar nur per laboro la homo iras antaŭen sur sia vojo. Kian meriton li havus, se sufiĉus al li demandi la Spiritojn, por ĉion scii? Por ĉi tiu prezo ĉiu ajn stultulo povus turniĝi en scienculon. Same estas kun la inventoj kaj eltrovoj en la industrio. Kiam venis la tempo de la eltrovo, la Spiritoj komisiitaj por direkti ĝian iradon serĉas homon kapablan konduki ĝin al sukceso kaj inspiras al li la necesajn ideojn, sed tiel ke li havu la tutan meriton de sia laboro, ĉar tiujn ideojn li devas mem ellabori kaj konkretigi. Tiel estas kun ĉiuj gravaj laboroj de la homa inteligento. La Spiritoj lasas ĉiun homon en lia sfero: el tiu, kiu taŭgas nur por plugeti la teron, ili ne faras gardanton de la sekretoj de Dio; sed ili povas *preni el la senfameco* la homon kapablan helpi la plenumon de iliaj planoj. Ne lasu vin do treni de scivolemo aŭ ambicio sur kampo fremda al Spiritismo, kiu ne havas tiajn celojn, ĉar per ĉi tiuj al vi prosperos nur la plej ridindaj mistifikoj. (*La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap. XXVI.)

La Spiritoj ne povas helpi en la eltrovo de kaŝitaj trezoroj. La superaj Spiritoj ne okupas sin pri tiaj aferoj, sed la mokemaj Spiritoj ofte indikas neekzistantajn trezorojn aŭ ankaŭ povas vidigi iun trezoron en unu loko, dum ĝi kuŝas en alia rekte kontraŭa; ĉi tio estas ja utila nome por montri, ke la vera riĉeco venas el laboro. Se la Providenco destinas kaŝitajn riĉaĵojn por iu homo, ĉi tiu ilin trovos nature; ne alie, neniam. (*La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap. XXVI.)

Klarigante al ni la propraĵojn de la fluidaĵoj — iloj kaj rimedoj de agado de la nevidebla mondo, kiuj estas unu el la fortoj kaj potencoj de la Naturo — Spiritismo havigas al ni la ŝlosilon de multego da aferoj antaŭe neklarigeblaj per alia rimedo kaj kiuj povis pasintatempe esti rigardataj kiel miregindaĵoj. Same kiel magnetismo, ĝi elmontras leĝon, se ne nekonatan, almenaŭ mis-

komprenatan, aŭ, pli bone dirite, oni konis la efikojn, ĉar ili okazas en ĉiuj tempoj, sed oni ne konis la leĝon, kaj ĝuste de tio, ke oni ne konis la leĝon, naskiĝis la superstiĉo. Ĉe la konado de tiu leĝo ĉio mirakleca disfumiĝas kaj la fenomenoj enviciĝas inter la naturaj aferoj. Jen kial, estigante la movadon de tablo aŭ farante, ke la forpasintoj skribu, la spiritistoj ne faras pli grandan miraklon, ol kuracisto, kiu revivigas mortanton, aŭ fizikisto, kiu faligas fulmon. Iu, kiu per ĉi tiu scienco pretendus *fari miraklojn*, aŭ ne konus la aferon aŭ estus trompisto. (*La Libro de la Mediumoj*, 1-a Parto, ĉap. II.)

Certaj personoj havas ideon tute malpravan pri la elvokoj; iuj kredas, ke la elvokoj venigas el la tombo la mortintojn en funebra aparato. Nur en romanoj, en fantaziaj rakontoj pri reaperantoj kaj en la teatro oni vidas la mortintojn senkarnaj, elirantaj el siaj tomboj, envolvitaj en littukoj, kaj klakigantaj siajn ostojn.

Spiritismo neniam faras miraklojn, ĝi ne faris ankaŭ tiun; ĝi neniam revivigis mortintan korpon; la spirita estulo, fluideca, inteligenta ne estas tien metita kun sia maldelikata envolvaĵo, kiu tie restas tute definitive. Li apartiĝas de ĝi en la momento de la morto, kaj kiam la disiĝo estas farita, li jam havas nenion komunan kun ĝi. (*Kio estas Spiritismo?*, ĉap. II, § 48)

11. Ni plivastigis ĉi tiujn citaĵojn por montri, ke la spiritismaj principoj havas nenian rilaton kun tiuj de la magio. Tiel, nek Spiritoj submetitaj al la homoj; nek rimedoj por ilin konfuzi; nek kabalaj formuloj aŭ signoj; nek eltrovoj de trezoroj; nek procedoj por riĉigi, kaj ankaŭ ne mirakloj kaj miregindaĵoj, fantaziaj divenoj kaj aperaĵoj; fine, nenio el tio, kio estas celo kaj esencaj elementoj de magio. Spiritismo ne nur malaprobas tiajn aferojn, kiel ankaŭ elmontras ties neeblecon kaj senefikecon. Ni ankoraŭfoje asertas, ke estas nenia simileco inter la procedoj kaj la celoj de magio kaj Spiritismo; nur malklereco kaj malsincereco povos ilin intermiksi. Tiamaniere, tia eraro ne povas superstari, ĉar la spi-

ritismaj principoj elportas ekzamenon, kaj tie ili estas evidente kaj klare formulitaj por ĉiuj.

Rilate al resanigoj, kiujn la ĉi-supre menciita pastoralo rekonis kiel realajn, la donita ekzemplo estas miselektita kiel rimedo por eviti interrilatojn kun la Spiritoj. Efektive tiaj resanigoj estas aliaj bonoj, kiuj inspiras dankemon kaj kiujn ĉiuj povas sperti. Malmultaj personoj estas pretaj por ilin rezigni, precipe post kiam ili eluzis aliajn rimedojn antaŭ ol turni sin al la diablo. Cetere, se la diablo resanigas oni devas konfesi, ke li faras bonan kaj indan agon. (*)

12. “Kiuj estas la sekretaj agantoj de tiaj fenomenoj, la veraj aŭtoroj de tiuj neeksplikeblaj scenoj? La anĝeloj ne akceptus mem malnoblajn rolojn, kiel ne sin submetus al ĉiuj kapricoj de scivolemo.”

La aŭtoro aludas la fizikajn manifestiĝojn de la Spiritoj, inter kiuj evidente estas kelkaj malmulte indaj je superaj Spiritoj. Ni tamen petos, ke li anstataŭigu la vorton *anĝelo* per *puraj spiritoj* aŭ *superaj spiritoj*, ĉar tiel ni havos ĝuste tion, kion Spiritismo diras. Sed oni ne povas rigardi kiel neindajn je la bonaj Spiritoj ian amason da skribaj, parolaj aŭ aŭdaj komunikaĵoj, ĉar tiaj komunikaĵoj estus kaj estas indaj je la plej eminentaj homoj sur la Tero. La samon ni povas diri pri la resanigoj, aperaĵoj kaj sennombraj faktoj grandkvante cititaj en la sanktaj libroj, kiel verko de anĝeloj kaj de sanktuloj. Se do anĝeloj kaj sanktuloj iam estigis similajn fenomenojn, kial ili ne estigas tiujn fenomenojn nuntempe? Kial identaj faktoj estas rigardataj kiel *sorĉaĵoj* en la manoj de unuj, dum en la manoj de aliaj ili estas konsiderataj kiel sankatj mirakloj?

Defendi tian tezon estas rezigni ĉian logikecon.

La aŭtoro de la Pastoralo eraras, kiam li asertas, ke tiaj fenomenoj estas neklarigeblaj. Kio okazas estas

---

(*) Volante kredigi la personojn resanigitajn per Spiritismo, ke ilin kuracis la diablo, oni faris grandan nombron da ili disiĝi de la Eklezio, kvankam ili neniam antaŭe havis ĉi tiun intencon.

ĝuste la malo, t. e. hodiaŭ tiuj fenomenoj estas perfekte klarigitaj, des pli ke ili ne plu estas konsiderataj kiel mirindaj kaj supernaturaj. Se tamen oni konsentas, ke ili ne estis tiaj, tiel logike estas ja atribui ilin al la diablo, sama kiel iam estis logike atribui al ĉi tiu la aŭtorecon de ĉiaj naturaj fenomenoj, kies kaŭzo estis tiam nekonata.

Kiel malnoblajn rolojn ni devas kompreni tiujn, kiuj celas malbonon kaj ridindaĵon, escepte se ni volas tiel taksi la utilegan verkon de la bonaj Spiritoj, kiuj praktikas bonon, kondukante la homojn al Dio per virto.

Sed Spiritismo *precize* diras, ke la malnoblaj roloj ne apartenas al la superaj Spiritoj, kiel oni konkludas el la jenaj reguloj:

13. Oni ekkonas la kvaliton de la Spiritoj laŭ ilia parolo; tiu de la vere bonaj kaj superaj Spiritoj estas ĉiam digna, nobla, logika, sen kontraŭdiroj; ĝi estas plena de saĝeco, de modesteco, de bonvolemo kaj de la plej pura moralo.

Krome ĝi estas konciza, klara kaj ne havas vortojn senutilajn. La malsuperaj, malkleraj aŭ fieraj Spiritoj manke de ideoj provizas sian parolon per abundo da frazoj. Ĉiu penso evidente erara, ĉiu maksimo kontraŭa al perfekta moralo, ĉiu konsilo ridinda, ĉiu esprimo maldelikata, banala aŭ simple frivola, fine ĉiuj montroj de malbonvolemo, de aroganteco, de fiero estas nediskuteblaj signoj de malsupereco ĉe la Spirito.

La superaj Spiritoj okupiĝas nur pri inteligentaj komunikaĵoj celantaj nian instruadon. La fizikaj aŭ pure materialaj manifestiĝoj estas pli speciale okupoj de malsuperaj Spiritoj, vulgare nomataj *frapantaj Spiritoj*, same kiel ĉe ni la montro de forto apartenas al ĵonglistoj, ne al scienculoj. *Estus absurdo pensi, ke Spiritoj, eĉ malaltnivelaj, amuziĝas per parado*. (*Kio estas Spiritismo?*, ĉap. II §§ 37, 40 kaj 60. Vd ankaŭ *La Libro de la Spiritoj*, 2-a Parto, ĉap. I — Diversaj ordoj da Spiritoj; spirita hierarkio, kaj *La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto,

ĉap. XXIV — Pri la identigo de la Spiritoj; distingo inter la bonaj kaj la malbonaj Spiritoj.)

Kiu sincera homo povas duonvidi en tiuj instruoj povojn neakordigeblajn kun altrangaj Spiritoj? Ne, Spiritismo ne intermiksas la Spiritojn, sed kontraŭe ilin distingas unuj de aliaj. La Eklezio ja atribuas al la demonoj ian inteligenton egalan al tiu de la anĝeloj, dum Spiritismo, bazita sur la observado de faktoj, asertas kaj konfirmas, ke la malsuperaj Spiritoj estas pli-malpli malkleraj, kaj ke estas tre limigitaj iliaj morala horizonto kaj sagaceco, tiel ke ili ofte havas tute malpravan kaj nekompletan ideon pri la aferoj, estante nekapablaj solvi certajn demandojn kaj sekve fari ĉion, kion oni atribuas al la demonoj.

14. “La animoj de la mortintoj, kiujn Dio malpermesas elvoki, loĝas en loko al ili difinita de lia justeco, kaj ne povas, sen lia permeso, esti al la dispono de la vivantoj.”

Spiritismo iras pli malproksimen, estas pli rigora: ĝi ne akceptas la manifestiĝon de iuj ajn Spiritoj, bonaj aŭ malbonaj, sen la permeso de Dio, dum la Eklezio ne pensas pri tio koncerne la demonojn, kiuj, laŭ ĝia teorio, malbezonas tian permeson.

Spiritismo diras plu, ke danke tiun permeson, kaj respondante la elvokon de la vivantoj, la Spiritoj *ne estas al ties dispono*.

Ĉu la elvokita Spirito venas volonte aŭ devigite?

*Obeante la volon de Dio*, t. e. la leĝon, kiu prezidas en la Universo, kaj uzante sian liberan volon, li pesas mem, ĉu veni estas utile aŭ malutile. Supera Spirito venas ĉiam, kiam vokita por utila celo; li rifuzas respondon nur en rondoj da homoj malmulte seriozaj aŭ pritraktantaj ĉi tiujn aferojn kiel amuzon. (*La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap XXV, p. 313.)

Ĉu iu Spirito povas rifuzi kontentigi la elvokon, al li faritan? Sendube, ĉar li havas sian liberan volon.

Ĉu vi pensas, ke ĉiuj estuloj de la Universo estas al via dispono? Vi mem, ĉu vi opinias, ke vi ja estas devigata respondi al ĉiuj, kiuj eldiras vian nomon? Dirante, ke li povas rifuzi veni, mi parolas pri la *peto de la elvokinto*, ĉar malsupera Spirito povas esti devigita veni laŭ la ordono de iu supera Spirito. (*La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap. XXV, p. 313.)

La spiritistoj estas tiel konvinkitaj, ke ili rekte, sen la permeso de Dio, havas nenian povon super la Spiritoj, ke ili diras, elvokante: "Ni petas Dion ĉiopovan permesi al iu bona Spirito komunikiĝi kun ni; ni petas ankaŭ niajn gardanĝelojn volonti helpi nin kaj forigi la malicajn Spiritojn." Kiam oni volas elvoki difinitajn Spiritojn: "Ni petas Dion ĉiopovan permesi al la Spirito de tiu persono komunikiĝi kun ni." (*La Libro de la Mediumoj*, 2-a Parto, ĉap. XVII, § 203.)

15. La akuzoj de la Eklezio kontraŭ la elvokoj ne atingas Spiritismon, sed la praktikojn de la magio, kun kiu Spiritismo havas nenion komunan. Spiritismo tiel, kiel la Eklezio, kondamnas tiujn praktikojn, dum ĝi ne atribuas al la superaj Spiritoj ian rolon neindan je ili, nek demandas aŭ deziras ricevi de ili ion, sen la permeso de Dio.

Certe povas ekzisti iu, kiu misuzas la elvokojn; kiu faras el ili ian ludon; kiu falsas ilian providencan trajton profite al personaj interesoj; aŭ ankoraŭ kiu, pro mal-klereco, frivoleco, fiero aŭ ambicio deturnas sin de la veraj principoj de la Doktrino; sed la vera Spiritismo, la Spiritismo serioza, ilin kondamnas tiom, kiom la vera religio kondamnas la hipokritajn kredantoj kaj la fanatikulojn. Ne estas logike nek prudente imputi al Spiritismo ekscesojn, kiujn ĝi la unua kondamnas, same kiel la erarojn de tiuj, kiuj ĝin ne komprenas. Antaŭ ol formuli iun ajn akuzon, estas necese scii, ĉu ĝi estas justa. Tiel ni diros: La riproĉo de la Eklezio falas sur la ĉarlatanojn, sur la ekspluatantojn, sur la praktikantojn de magio kaj sorĉaĵo, kaj prave. Kiam la religia aŭ skep-

tika kritiko, forsekciante ekscesojn, detruas la ĉarlatanismon, ĝi faras nenion pli ol reliefigi la purecon de la perfekta doktrino, ĝin helpante ĉe elpurigado de malbonaj elementoj kaj faciligante al ni la taskon. La eraro de la kritiko kuŝas en la intermiksado de bono kaj malbono, kio ofte okazas pro la malsincereco de kelkaj homoj kaj pro la malklereco de la plejparto. Sed la distingadon, kiun tia kritiko ne faras, aliaj faras. Fine la kontraŭ malbono aplikata kritiko, kiun ĉiu sincera kaj honesta spiritisto aprobas, estas kritiko, kiu ne malutilas nek kontraŭas la Doktrinon.

16. "Tiamaniere la misteraj estuloj alvenantaj ĉe la unua alvoko de *herezulo*, de *malpiulo*, aŭ de *kredemulo* – kio signifas diri: de naiveco aŭ de krimo – estas nek senditoj de Dio, nek apostoloj de vero kaj de savo, sed faktoroj de eraro kaj agantoj de infero."

Tiuj vortoj kredigas, ke Dio ne permesas la manifestiĝon de bonaj Spiritoj povantaj klarigi kaj savi el eterna perdiĝo la herezulon, la malpiulon kaj la krimulon! Nur la komisiitoj el la infero estas senditaj al ili por ilin enprofundigi ankoraŭ pli en la ŝlimejon. Estas malĝojige diri tion, sed laŭ la Eklezio Dio ne sendas al naivuloj krom perversaj estuloj por ilin delogi!

La Eklezio ne konsentas, ke el inter la anĝeloj, el inter la privilegiitaj kreitoj de Dio, ia estulo sufiĉe kompatema venu helpe al la devojiĝintaj animoj! Por kio do servas la brilaj kvalitoj ornamantaj tiajn estulojn? Ĉu sole nur por ilia persona ĝuo? Ĉu ili estas efektive bonaj, kiam, ekstazantaj de la kontemplaj plezuroj, vidas tiom multajn animojn sur la vojo al la infero, ne penante ilin deturni? Sed tio estas ĝuste la bildo pri la egoismo de tiuj potenculoj, kiuj, senkompataj ĉe abunda riĉaĵo, lasas morti de malsato almozulon frapantan ĉe ilia pordo!

Tio estas ankoraŭ pli grava: tio estas egoismo mem altigita al virto kaj metita ĉe la piedoj de la Kreinto!

Sed vi miras, ke la bonaj Spiritoj venas al herezulo kaj al malpiulo, certe tial, ke vi forgesis tiun parabolon

de la Kristo: "Ne la sanuloj bezonas kuraciston" (*). Ĉu vi do ne havas pli altan vidpunkton ol tiu de la tiutempaj fariseoj? Kaj vi mem, ĉu vi rifuzus montri la bonan vojon al la nekredanto, kiu vin alvokus? Nu, bone: la bonaj Spiritoj faras tion, kion vi farus; ili direktiĝas al malpiulo por doni al li bonajn konsilojn. Ho! Anstataŭ anatemi la transtombajn komunikaĵojn, estus pli bone, se vi benus la dekretojn de la Sinjoro, mirante antaŭ liaj senlimaj povo kaj boneco.

17. Oni diras, ke ekzistas gardantaj anĝeloj; sed kiam tiuj gardantaj anĝeloj ne povas fariĝi komprenataj per la mistera voĉo de la konscienco aŭ de la inspiro, kial ili ne uzas pli rektajn materiajn agorimedojn, tiel ke ili ekfrapegu la sentumojn, ĉar ĉi tiuj rimedoj efektive ekzistas? Se ĉio devenas de Dio kaj nenio okazas sen lia permeso, ĉu ni povas akcepti, ke Li permesus tiajn rimedojn al la malbonaj Spiritoj kaj ilin rifuzus al la bonaj?

Tiuokaze estas necese konfesi, ke Dio donas pli multe da povoj al la demono, por perdigi la homojn, ol al la gardantaj anĝeloj, por ilin savi! Nu, bone! Kion la gardanta anĝeloj, laŭ la Eklezio, ne povas fari, tion faras mem la demonoj: uzante tiajn komunikaĵojn, nomitajn inferaj, ili rekondukas al Dio tiujn homojn, kiuj Lin forĵuris, kaj al bono tiujn sklavigitajn al malbono. Tiuj demonoj faras ion pli: donas al ni la spektaklon de milionoj da homoj kredantaj je Dio pro interveno de ilia diabla povo, dum la Eklezio estas nekapabla ilin konverti. Homoj neniam preĝintaj, hodiaŭ fervore preĝas, danke la instruojn de tiuj demonoj! Kiom multe da fieruloj kaj diboĉuloj fariĝis humilaj, karitemaj kaj modestaj! Kaj ĉio okazis pro la diablo! Ha! se tiel okazis, vere estas, ke al ĉiuj tiuj homoj la demono faris pli bonajn servon kaj gardon ol la anĝeloj mem. Sed estas necese havi mizeran opinion pri la komuna saĝo de nia tempo por kredi, ke la homoj blinde akceptas tiajn ideojn.

(*) Marko, 2:17. – **La Trad.**

Sed iu religio, kiu baziĝas sur tia doktrino, iu religio, kiu sin detruas ĉe sia propra bazo, se oni senigas ĝin je ĝiaj demonoj, je ĝia infero, je ĝiaj eternaj punoj kaj je ĝia senkompata dio: tia religio, ni diras, estas religio sin mortiganta.

18. Oni diras, ke Dio sendis la Kriston, sian filon, por savi la homojn, per tio pruvante al ili sian amon. Sed kiel oni klarigu, ke Li poste ilin forlasis?

Ne estas ia dubo, ke Jesuo estas la dia kuriero sendita al la homoj por instrui al ili la veron kaj, per ĝi, la vojon al la savo; sed prezentu al vi — kaj nur post lia veno — kiom multe da homoj ne povis aŭskulti de li la parolon pri la vero, kiom multaj mortis kaj mortos ne konante ĝin, kaj fine kiom multaj el tiuj, kiuj ĝin konas, ĝin praktikas. Tiam, kial Dio, ĉiam preta por savi siajn kreitojn, ne sendas al ili aliajn kurierojn, kiuj, malsuprenirante sur ĉiujn lokojn, inter eminentulojn kaj humilulojn, malklerulojn kaj saĝulojn, kredemulojn kaj skeptikulojn, venu instrui la veron al tiuj, kiuj ĝin ne konas, fari ĝin komprenebla por tiuj, kiuj ne ĝin komprenas, kaj fine akceli per sia *rekta* kaj *multobla* instruado la nesufiĉan disvatigadon de la Evangelio, plifruigante la eventon de la dia regado? Jen alvenas tiuj kurieroj en multnombraj amasoj, malfermante la okulojn al blinduloj, konvertante malpiulojn, resanigante malsanulojn, konsolante afliktitojn, same kiel Jesuo! Kion vi faras, kaj kiel vi ilin akceptas? Ha! vi malakceptas ilin, vi forpelas la bonon, kiun ili faras, kaj kriegas: ili esta demonoj!

Alia ne estis la parolo de la fariseoj koncerne la Kriston, kiu, ili diradis, faris la bonon per diablaj povoj! Kaj la Nazaretano respondis al ili: “Vi konos arbon per ĝia frukto: la putra arbo ne povas doni bonaj fruktojn.” (*)

---

(*) Luko, 6:43 kaj 44. – **La Trad.**

Laŭ la fariseoj, estis malbonaj la fruktoj de Jesuo, ĉar li venis detrui la eksceson kaj proklami la liberecon, kiu ruinigus ilian aŭtoritaton. Se anstataŭ tio Jesuo estus veninta flati ilian fieron, sankcii iliajn erarojn kaj subteni ilian povon, tiam li estus ja la atendata Mesio de la judoj. Sed la Kristo estis sola, malriĉa kaj malforta: oni dekretis lian morton, opiniante estingi lian parolon, kaj lia parolo postvivis lin, ĉar ĝi estis dia. Sed estas nepre necese diri, ke tiu parolo disvastiĝis nur malrapide, kaj post dek ok jarcentoj, ĝi estas konata nur de dekono de la homaro. Malgraŭ tio, multenombraj skismoj jam elrompiĝis el la sino de la kristanaro. Nu bone: nun Dio, en sia favorkoreco, sendas la Spiritojn por konfirmi ĝin, kompletigi ĝin, disvastigi ĝin ĉe ĉiuj homoj kaj sur la tuta Tero — la sanktan parolon de Jesuo. Kaj la granda fakto estas tio, ke la Spiritoj ne estas enkarniĝintaj en nur unu homo, kies voĉo estas limigita: ili estas sennombraj, troviĝas sur ĉiu loko kaj ne povas esti baratai. Ankaŭ pro tio ilia instruado disvastiĝas fulme rapide; kaj tial, ke ili parolas al la koro kaj al la konscienco, ili estas pli bone komprenataj de la humiluloj.

19. *Ĉu ne estas malhonoro por ĉielaj kurieroj* — vi diras — *la transsendo de la instruoj per tiel vulgara rimedo, kiel tiu de la tabloj? Ĉu ne estos ofendo kontraŭ ili supozi, ke ili amuziĝas per frivolaĵoj, lasante sian luman loĝejon por meti sin al la dispono de la unua scivolemulo?*

Ankaŭ Jesuo lasis la loĝejon de la Patro por naskiĝi en stalo. Kiu diris al vi, ke Spiritismo atribuas bagatelaĵojn al la superaj Spirito? Ne; Spiritismo nepre asertas la kontraŭon, t. e., ke vulgaraĵoj estas propraj al la vulgaraj Spiritoj. Malgraŭ tio, el tiuj vulgaraĵoj rezultas ia utilo, nome skuegi multajn imagemulojn, pruvante la ekziston de la spirita mondo kaj ĝissate elmontrante, ke tiu mondo ne estas tia, sed tre malsama ol tiu, kiun oni opiniis. Tiuj unuaj manifestiĝoj eble estis simplaj, kiel ĉio komenciĝanta, sed eĉ ne pro tio, ke ĝi ĝermas el tre malgranda

semo, iam la arbo ĉesos etendi sian verdan kaj foliriĉan branĉaron.

Kiu kredus, ke el mizerega trogo en Bet-Leĥem povus eliri la parolo, kiu nepre transformas la mondon?

Jes! La Kristo estas ja la dia Mesio. Lia parolo estas ja tiu parolo de vero; jes, la religio fondita sur tiu parolo fariĝas neskuebla, sed kondiĉe, ke ĝi praktiku la sublimajn instruojn, ne farante el la bona kaj justa Dio, kiun ni rekonas en ĝi, ian partian, venĝeman kaj kruelan Dion.

## ĈAPITRO XI

## PRI LA MALPERMESO ELVOKI MORTINTOJN

1. La Eklezio neniel neas la realecon de la manifestiĝoj. Kontraŭe, kiel ni vidis en la antaŭaj citaĵoj, ĝi ilin tute akceptas, atribuante ilin al la ekskluziva interveno de la demonoj. Estas vane aludi la Evangelion, kiel oni ĝin faras, por pravigi ilian intervenon, ĉar la Evangelio nenion diras pri tio. La gravega argumento superstaranta estas la malpermeso de Moseo. Ni transskribas malsupre la vortojn, per kiuj aludas la temon la sama pastoralo, kiun ni citis en antaŭaj ĉapitroj:

"Ne estas permesate teni interrilatojn kun ili (la Spiritoj), ĉu senpere, ĉu pere de tiuj, kiuj ilin elvokas kaj eldemandas. La leĝo de Moseo punis la nacianojn. Ne turnu vin al magiistoj — diras *Levidoj* — nek al sorĉistoj, ne provu malpuriĝi per ili: Mi estas la Eternulo, via Dio. Kaj viro aŭ virino, se ili estos magiistoj aŭ sorĉistoj, estu mortigitaj; per ŝtonoj oni ilin mortigu, ilia sango estu sur ili. (*Levidoj*, 19:31, 20:27.) Diras *Readmono*: Ne devas troviĝi inter vi iu, kiu trairigas sian filon aŭ filinon tra fajro, aŭguristo, antaŭdiristo, magiisto, sorĉisto, nek subĵurigisto, nek elvokisto de spiritoj, nek signoklarigisto, nek esploristo de mortintoj; ĉar abomenaĵo por la Eternulo estas ĉiu, kiu faras tion, kaj pro tiuj abomenaĵoj la Eternulo, via Dio, forpelas ilin de antaŭ vi." (*Readmono*, 18:10-12.)

2. Por pli bone kompreni la efektivan sencon de la vortoj de Moseo estas utile reprodukti la tutan tekston iom mallongigitan el la antaŭcitaĵo. Jen ĝi:

"Ne turnu vin al magiistoj nek al sorĉistoj, ne provu malpuriĝi per ili: Mi estas la Eternulo, via Dio. Kaj viro aŭ virino, se ili estos magiistoj aŭ sorĉistoj, estu mortigitaj; per ŝtonoj oni ilin mortigu, ilia sango estu sur ili. (*Levidoj*, 19:31, 20:27.) Ne devas troviĝi inter vi iu, kiu *trairigas sian filon aŭ filinon tra fajro*, aŭguristo, antaŭdiristo, magiisto, sorĉisto, nek subĵuristo, nek elvokisto de spiritoj, nek signoklarigisto, nek esploristo de mortintoj; ĉar abomenaĵo por la Eternulo estas ĉiu, kiu faras tion, kaj pro tiuj abomenaĵoj la Eternulo, via Dio, forpelas ilin de antaŭ vi." (*Readmono,* 18:10-12.)

3. Se la leĝo de Moseo devas esti tiel rigore observata pri tiu punkto, ankaŭ ĝi estu same pri ĉiuj aliaj. Kial ĝi estus bona pri la elvokoj kaj malbona pri aliaj el siaj partoj? Estas necese, ke ni estu koheraj. Se nur oni rekonas, ke la leĝo de Moseo ne estas en harmonio kun nia tempo kaj kutimoj rilate iajn aferojn, la saman kialon oni alvokas pri la malpermeso, pri kiu ni diskutas.

Cetere estas necese esprimi la motivojn, kiujn pravigis tiun malpermeson kaj kiuj hodiaŭ komplete nuliĝis. La hebrea leĝisto volis, ke lia popolo forlasu ĉiujn kutimojn akiritajn en Egiptujo, kie la elvokoj estis uzataj kaj faciligis misuzojn, kiel ni konkludas el ĉi tiuj vortoj de Jesaja: "Kaj malaperos la kuraĝo de la Egiptoj interne de ili, kaj Mi detruos iliajn intencojn; kaj ili demandos la idolojn kaj la sorĉistojn kaj la aŭguristojn kaj la antaŭdiristojn." (Jesaja, 19:3.)

La izraelidoj ne devis kontrakti aliancojn kun fremdaj nacioj, kaj estis sciate, ke ĉe tiuj nacioj, kontraŭ kiuj ili estis batalontaj, ili trovos la samajn praktikojn. Moseo do devis pro politiko inspiri al la hebreoj abomenon por ĉiuj kutimoj, kiuj eble havus similecon kaj kontaktopunkton kun la malamiko. Por pravigi tiun abomenon, estis necese, ke li prezentis tiajn praktikojn, kiel malaprobitaj de Dio mem, kaj tion konfirmas la jenaj vortoj: — "Ĉar abomenaĵo por la Eternulo estas ĉiu, kiu

faras tion, kaj pro tiuj abomenaĵoj la Eternulo, via Dio, forpelas ilin de antaŭ vi.”

4. La malpermeso de Moseo estis tre justa, ĉar la elvokado de mortintoj ne fontis el sentoj de respekto, amemo aŭ kompato al ili, kaj ĝi prefere estis rimedo de divenoj, kiel ĉe aŭguroj kaj antaŭdiroj ekspluatataj de ĉarlatanismo kaj superstiĉo. Tiuj praktikoj laŭŝajne ankaŭ estis negocobjekto, kaj Moseo, plej multe klopodinte, ne sukcesis forigi ilin el la popolaj kutimoj.

La sekvantaj vortoj de la profeto pravigas la aserton: — “Se oni diros al vi: Demandu la magiistojn kaj antaŭdiristojn, kiuj flustras sorĉojn, respondu: *Ĉu ĉiu popolo ne konsultas sian Dion? Ĉu por la vivantoj oni ja ne demandas la mortintojn?* (Jesaja, 8:19.) “Mi estas la Eternulo, kiu neniigas la signojn de divenistoj kaj ridindigas la sorĉistojn, repuŝas la saĝulojn malantaŭen kaj malsaĝigas ilian scion.′ (Jesaja, 44:25.)

“Vi laciĝis de la multo de viaj konsiliĝoj; nun ili stariĝu, la mezurantoj de la ĉielo, la esplorantoj de la steloj, la antaŭdiristoj laŭ la luno, kaj ili savu vin kontraŭ tio, kio trafos vin. Jen, ili fariĝos kiel pajlo; la fajro forbruligos ilin; ili ne savos sian animon el la forto de la flamo; ne estos ia karbo, ĉe kiu sin varmigi, nek fajro, antaŭ kiu sidi. Tiaj fariĝis por vi tiuj, kun kiuj vi multe penis, kun kiuj vi interrilatis de via juneco; ĉiu forvagis siaflanken, neniu vin savos.” (Jesaja, 47:13-15.)

En ĉi tiu ĉapitro Jesaja sin turnas al la babilonanoj per la alegoria figuro *“virgulino filino de Babel, filino de Ĥaldeoj*”. (Jesaja, 47:1.) Li diras, ke la antaŭdiristoj ne malhelpos la ruinon de la monarkio. La sekvantan ĉapitron li rekte turnas sin al la izraelidoj.

“Sed venu ĉi tien vi, ho filoj de sorĉistino, idoj de adultulo kaj malĉastulino! Kiun vi mokegas? Kontraŭ kiu vi malfermegas la buŝon kaj elŝovas la langon? Ĉu vi ne estas infanoj de krimo, idoj de mensogo, kiuj varmiĝas en la arbaretoj, sub ĉiu verdbranĉa arbo; kiuj *buĉas la infanojn* en la valoj, sub la elstarantaj rokoj? Inter la glataĵoj de la valo estas via parto; ili, ili estas

via loto; al ili vi verŝis verŝoferojn, alportis farunoferojn; ĉu Mi povas esti kontenta pri tio?" (Jesaja, 57:3-6.)

Ĉi tiuj vortoj estas sendubaj kaj klare pruvas, ke en tiu tempo la elvokoj celis divenadon, samtempe kiel ili estis komerco ligita al la magia kaj sorĉa praktikoj eĉ sekvataj de hombuĉoj. Moseo do pravis, kiam li malpermesis tiajn aferojn kaj asertis, ke Dio ilin abomenas.

Tiuj praktikoj daŭris plu ĝis la Mezepoko, sed hodiaŭ la racio superstaras, samtempe kiel Spiritismo venas por montri al la homoj la ekskluzive moralan, konsolantan kaj religian celon de la rilatoj kun la transtombo.

Sed pro tio, ke la spiritistoj *ne buĉas infanojn nek honoras diojn per verŝoferoj*; ke ili ne demandas astrojn, mortintojn kaj aŭguristojn por diveni la veron saĝe kaŝitan al la homoj; ke ili rifuzas komerci per la kapablo interrilati kun Spiritoj; ke ili ne estas movataj de scivolo nek de avideco, sed de ia sento de kompato, de ia deziro instruiĝi kaj pliboniĝi, kaj faciligi la suferantajn animojn; ke ili tiel estas, kaj tiel ili ja estas — la malpermeso de Moseo de povas ilin atingi.

Se tiuj, kiuj maljuste plendas kontraŭ la spiritistoj, pli enprofundiĝus en la senco de la bibliaj vortoj, ili rekonus, ke en la principoj de Spiritismo ekzistas nenio analoga al tio, kio okazadis inter hebreoj. Estas vero, ke Spiritismo kondamnas ĉion, kion Moseo malpermesis; sed ĝiaj malamikoj, ĉe la dezirego trovi argumentojn por rebati la novajn ideojn, ne rimarkas, ke tiaj argumentoj estas negativaj, ĉar ili estas tute falsaj.

La nuntempa civila leĝo punas ĉiujn trouzojn, kiujn Moseo celis bridi.

Sed, se li eldiris la mortpunon kontraŭ la kulpuloj estas tial, ke ne prosperis al li la moderaj rimedoj regi tiel sendisciplinan popolon. Cetere ĉi tiu puno estis tro citata en la leĝaro de Moseo, ĉar el la punrimedoj ne estis multaj elektotaj. Sen malliberejoj kaj pundomoj en la dezerto Moseo ne povis gradigi punon, kiel oni faras en niaj tagoj, kaj krom tio lia popolo ne timiĝis antaŭ la

nur disciplinaj punoj. Ne pravas do tiuj, kiuj sin apogas al la severeco de puno por pruvi la gradon da kulpo ĉe la elvokado de mortintoj. Ĉu konvenus pro obeo al la leĝo de Moseo teni la mortpunon por ĉiuj okazoj, kiujn li preskribis? Kial do oni revivigu tiel insiste ĉi tiun artikolon, samtempe dirante nenion pri la komenco de la ĉapitro, kiu malpermesas al la sacerdotoj posedi surterajn havaĵojn kaj partopreni en ia ajn heredaĵo, ĉar la Sinjoro estas ilia heredaĵo? (*Readmono*, 18:1-2.)

5. Estas du distingiĝaj partoj en la leĝo de Moseo: la ĝustadira leĝo de Dio, ricevita sur la monto Sinaj, kaj la civila aŭ disciplina leĝo, konforma al la kutimoj kaj karaktero de la popolo. Unu el tiuj leĝoj estas nevaria, dum la dua aliiĝas kun la tempo, kaj neniu pensas, ke ni povas esti regataj per la samaj rimedoj, per kiuj estis la judoj en la dezerto, ke ankaŭ la kanonikoj de Karolo la Granda almodlu sin al Francujo de la XIX jarcento. Kiu hodiaŭ ekzemple pensus revivigi la jenan artikolon de la leĝo de Moseo: "Se bovo kornobatos viron aŭ virinon kaj tiu mortos, tiam oni ŝtonmortigu la bovon kaj ĝia viando ne estu manĝata, sed la mastro de la bovo restu senkulpa?" (*Eliro*, 21:28 kaj sekvantaj.)

Sed ĉi tiu artikolo, ŝajnanta al ni tiel absurda, ne havis alian celon ol puni la bovon kaj senkulpigi ĝian mastron, kio estas samvalora kiel konfisko de la bruto, kaŭzo de la akcidento, por devigi ĝian posedanton pli multe vigli. La mortigo de bovo eble estis puno tre sentebla por ia popolo el paŝtistoj, tiel ke ĝi malbezonis ian alian punon; sed tiu mortigo utilis al neniu, ĉar estis malpermesate manĝi la viandon. Aliaj artikoloj preskribas aferon, pri kiu la mastro estas respondeca.

Ĉio havis pravon de ekzisto en la leĝaro de Moseo, ĉar ĉion ĝi antaŭvidas en minimumaj detaloj, sed la formo, kiel ankaŭ la fundo adaptiĝas al la okazaj cirkonstancoj. Se, en niaj tagoj, Moseo revenus por leĝodoni al ia civilizita nacio, li certe de donus al ĝi kodon egalan al tiu de la hebreoj.

6. Al ĉi tiu kontraŭdiro, oni kontraŭmetas la aserton, ke ĉiuj leĝoj de Moseo estis diktitaj en nomo de Dio, kiel tiuj sur Sinaj. Sed opiniante, ke ili ĉiuj estas el dia fonto, kial do oni limis la ordonojn per la dekalogo? Kia estas la motivo de tiu diferenco? Ĉu ne estas certe, ke, se ĉiuj tiuj leĝoj fontas el Dio, ili same estas devigaj? Kial oni ne konservis cirkumcidon, al kiu Jesuo sin submetis kaj kiun li ne aboliciis? Ha! oni forgesas, ke por doni aŭtoritaton al siaj leĝoj ĉiuj antikvaj leĝodonantoj atribuis al ili dian originon. Nu, Moseo pli ol iu alia havis bezonon de tiu rimedo, konsidere la karakteron de sia popolo; kaj se malgraŭ tio li malfacile fariĝis obeata, kio okazus, se la leĝoj estus donitaj, kiel liaj!

Ĉu Jesuo ne venis por modifi la leĝon de Moseo, farante el sia leĝo la kodon de la kristanoj?

Ĉu li ne diris: "Vi scias, kio estis dirtita al la antikvuloj, tia kaj tia afero, kaj mi diras al vi tian alian aferon?" Sed Jesuo ne nuligis, kontraŭe konfirmis la leĝon de Sinaj, de kiu lia tuta doktrino estas disvolviĝo. Nu, nenie Jesuo aludis la malpermeson elvoki mortintojn, kiam ĉi tiu afero estis sufiĉe grava por esti forlasata en siaj predikoj, precipe pro tio, ke li pritraktis aliajn flankajn aferojn.

7. Fine estas grave scii, ĉu la Eklezio metas la leĝon de Moseo super la evangelian leĝon, aŭ alivorte ĉu ĝi estas pli judisma ol kristana. Ankaŭ estas grave rimarki, ke el ĉiuj religioj, precize judismo estas tiu, kiu malpli kontraŭstaras al Spiritismo, ĉar ĝi ne deklaras la mosean leĝon kontraŭa al rilatoj kun mortintoj, kiel ĝin faras la kristanaj sektoj.

8. Sed ni ankoraŭ prezentas alian kontraŭdiron: Se Moseo malpermesis elvoki mortintojn, estas tial, ke ĉi tiuj povis veni, ĉar alie la malpermeso estus senutila. Nu, se mortintoj en tiu tempo povis veni, ankaŭ hodiaŭ ili povas; kaj se ili estas Spiritoj de mortintoj, kiuj venas, ili ne estas ekskluzive demonoj. Cetere Moseo neniel parolas pri tiuj lastaj.

Duobla do estas la motivo, kial oni logike ne povas akcepti la aŭtoritaton de Moseo, nome: unue ĉar lia leĝo ne regas Kristanismon; kaj due ĉar ĝi estas nepropra al kutimoj de nia tempo. Sed ni supozu, ke tiu leĝo havas la tutan aŭtoritaton al ĝi donitan de kelkaj, kaj eĉ tiel, kiel vidite, ĝi ne aplikiĝas al Spiritismo. Estas vero, ke la malpermeso de Moseo ampleksas demandadon al mortintoj, sed en flanka maniero, kiel aldono al la praktikoj de la sorĉarto.

La vorto *demando* mem, ĉe tiuj divenisto kaj sorĉisto, pruvas, ke ĉe la hebreoj la elvokoj estis divenorimedo; sed la spiritistoj nur elvokas mortintojn por ricevi saĝajn konsilojn kaj ekhavi konsolon por la suferantoj, neniam por akiri nekonvenajn malkaŝojn.Sen ia dubo, se la hebreoj uzus la komunikaĵojn, kiel la spiritistoj, anstataŭ ilin malpermesi, Moseo ilin rekomendus, ĉar lia popolo nur havus profiton.

9. Vere kelke da gajaj aŭ malbonintencaj kritikantoj priskribas la seancojn, kiel kunsidojn de nekromanciistoj aŭ sorĉistoj, kaj la mediumojn, kiel astrologojn aŭ ciganojn, eble pro tio, ke ĉiuj ĉarlatanoj adaptis tiajn nomojn al siaj praktikoj, kiujn cetere spiritismo ne povas aprobi.

Kompense, ankaŭ ekzistas multe da homoj farantaj justecon kaj atestantaj la esence gravan moralan karakteron de la seriozaj kunsidoj. Krom tio, la doktrino kun libroj akireblaj por ĉiuj forte protestas kontraŭ la trouzoj, por ke la kalumnio falu sur tiun, kiu ĝin meritas.

10. La elvokado, oni diras, estas manko de konsidero al mortintoj, kies cindrojn oni devas respekti. Sed kiuj diras tion? Ili estas la antagonistoj sur la du kontraŭaj kampoj, t. e. la nekredantoj, *kiuj ne kredas je la animoj*, kaj la kredantoj kiuj juĝas, *ke nur la demonoj, kaj ne la animoj, povas veni*.

Kiam la elvoko estas farata kun enpensiĝo kaj religie; kiam oni alvokas la Spiritojn, ne pro scivolo, sed pro sento de korinklino kaj simpatio, kun sincera deziro

instruiĝi kaj progresi, ni vidas nenion malrespektema en la ago turni nin al mortintoj, kvazaŭ ni turnus nin al vivantoj. Ankoraŭ ekzistas alia respondo al tiu kontraŭdiro, nome la Spiritoj spontanee, tute libere sin prezentas, eĉ multfoje ne estante elvokitaj. Ankaŭ ili montras sian ĝojon komunikiĝi kun homoj, kaj iafoje plendas, ke ĉi tiuj ilin forgesas. Se la Spiritoj konfuziĝus aŭ kolerus pro niaj elvokoj, certe ili tion dirus kaj ne revenus; sed, se pro tiuj elvokoj la Spiritoj, liberaj kiel ili ja estas, manifestiĝas, tiel estas, ĉar tio konvenas al ili.

11. Ankoraŭ plia motivo estas prezentata: La animoj restas en loko, kiun la dia justeco al ili difinas, kio estas sama, kiel diri en la ĉielo aŭ en la infero. Tiel, tiuj estantaj en la infero, el tie ili ne povas eliri, dum la plej granda libereco estas donita al la demonoj. Tiuj en la ĉielo, tute donitaj al sia beateco, estas tre superaj al la mortemuloj, por sin okupi pri ĉi tiuj, kaj estas tro feliĉaj, ke ili ne revenos al ĉi tiu Tero kun mizeroj, por intereso de parencoj kaj amikoj, kiujn ili ĉi tie eble postlasis. Ĉu tiuj animoj do povas esti komparataj kun nababoj, kiuj deturnas de la malriĉuloj sian rigardon pro timo perturbi sian digestadon? Sed se tiel estus, tiuj animoj sin montrus malmulte indaj je la superega feliĉo, aliigante sin en ekzemplon de egoismo!

Restas ankoraŭ la animoj en la purgatorio, sed ĉi tiuj, suferantaj, kiel ili eble estas, devas zorgi pri sia savo, antaŭ ol pri alia afero. Sekve de tio, ĉar ne unuj nek aliaj animoj povas respondi al nia alvoko, nur demono prezentas sin anstataŭ ili.

Tiam venas la okazo diri: se la animoj ne povas veni, la homoj ne devas timi, ke tiuj maltrankviligu ilian ripozon.

12. Jen alia malfacilaĵo ekaperas. Se la feliĉaj animoj ne povas forlasi sian gloran restadejon por helpi la mortemulojn, kial la Eklezio petas helpon de la sanktuloj, kiuj ankoraŭ devas ĝui pli grandan beatecon? Kial ĝi konsilas voki ilin en okazoj de malsano, afliktiĝo, malfeliĉegoj? Kial, laŭ la sama Eklezio, la sanktuloj kaj la Virgulino mem ekaperas al la homoj kaj faras

miraklojn? Tiuj lasas la ĉielon por malleviĝi al la Tero; sed tiuj starantaj malpli alte ne povas tion fari!

13. Ke la skeptikuloj neu la manifestiĝon de la animoj, ni konsentas, ĉar tiuj ne kredas al ili; sed kio nin surprizigas, tio *estas vidi koleri kontraŭ la rimedoj pruvi ilian ekziston, klopodante elmontri la neeblecon de tiuj rimedoj*, tiujn samajn homojn, kies kredo baziĝas sur la ekzisto kaj estonteco de la animoj! Ŝajnas, ke estus pli nature, ke tiuj homoj akceptus, kiel bonon de la Providenco, la rimedojn konfuzi skeptikulojn per nerefuteblaj pruvoj, ĉar ili estas la neantoj de la religio mem. Kiuj interesiĝas pri la ekzisto de la animo, tiuj konstante bedaŭras la lavangon da nekredemo, kiu invadas la gregon da fideluloj, ĝin ruinigante: sed kiam oni prezentas al ili la plej potencan rimedon kontraŭbatali la nekredemon, ili rifuzas tiun rimedon, kun tiom aŭ pli da obstino, ol tiu de la nekredantoj mem. Poste, kiam la pruvoj amasiĝas, tiel ke ili forigas ĉiujn dubojn, tiam tiuj homoj prenas, kiel superegan argumenton, la malpermeson elvoki mortintojn, uzante, por tion pravigi, artikolon de la leĝo de Moseo, pri kiu neniu pensis, perforte donante al ĝi neekzistantajn sencon kaj aplikon. Kaj tiel feliĉaj ili sentas sin pro la eltrovo, ke ili ne vidas, ke tiu artikolo estas plia pravigo pri la Spiritisma Doktrino.

14. Ĉiuj kialoj cititaj por kondamni la rilatojn kun la Spiritoj malaperas antaŭ serioza ekzameno. Pro la fervoro, kun kiu oni batalas en tiu direkto, estas facile kompreni la grandan intereson ligitan kun la afero. El tio venas la insistado. Vidante tiun batalon de ĉiuj religioj kontraŭ la manifestiĝoj, oni dirus, ke *ĉi tiujn ili timas*.

Tre povas esti, ke la vera motivo estas timo, ke la tre klarmensaj Spiritoj venu instrui la homojn pri punktoj, kiujn oni deziras malklarigi, kaj samtempe konigi al tiuj homoj la certecon pri ia alia mondo, *pri la efektivaj kondiĉoj, por ke ili en ĝi vivu feliĉaj aŭ malfeliĉaj*. La

motivo devas esti tiu sama, kial oni diras al infano: *"Ne iru tien, ĉar tie estas lupfantomo."* Al homo oni diras: "Ne elvoku Spiritojn. Ili estas diabloj." Sed ne gravas: oni malhelpas la homojn elvoki Spiritojn, sed oni ne povos malhelpi ĉi tiujn veni al homoj *por levi la lampon de sub la grenmezurilo* (*).

Religio tenanta la absolutan veron neniom devos timi lumon, ĉar lumo briligas la veron kaj demono ne povas ion faris kontraŭ la vero.

15. Malakcepti la komunikaĵojn el transtombo estas forpuŝi la plej potencan rimedon instruiĝi, ĉu rilate la inicadon pri konoj je la estonta vivo, ĉu rilate la ekzemplojn, kiujn tiaj komunikaĵoj donas al ni. Krom tio, la sperto instruas al ni la bonon, kiun ni povas fari, devojigante de malbono la neperfektajn Spiritojn, helpante tiujn suferantajn malligiĝi de la materio kaj perfektiĝi. Sed malpermesi komunikaĵojn estas senigi je helpo la suferantajn animojn, helpo, kiun al ili ni povas kaj devas doni.

La sekvantaj vortoj de iu Spirito admirinde resumas la sekvojn de elvoko, se ĝi estas praktikata por karitata celo:

"Ĉiu suferanta kaj malĝoja Spirito rakontos al vi sian falon, la frenezaĵojn, kiuj lin malvirtigis. Esperojn, luktojn kaj terurojn; konsciencoriproĉojn, malesperojn kaj dolorojn, li ĉion rakontos al vi, montrante Dion prave kolera, kiu punas kulpulon per sia tuta severeco. Kiam vi aŭdas lin, du sentoj alsaltos al vi: tiu de kompato kaj tiu de timo! kompato al li kaj timo je vi mem. Kaj se vi aŭdos liajn plendojn, vi tiam vidos, ke Dio neniam lin forlasas, atendante la pentintan pekulon, etendante al li la brakojn, tuj kiam li penos reboniĝi. Fine vi vidos la bonefikajn progresojn de la kulpulo, por kiuj vi havis la feliĉon kaj gloron kontribui, kun la pretemo kaj amemo de kirurgo observanta la cikatriĝon de vundo, kiun li ĉiutage flegas." (Bordeaux, 1861.)

(*) Mateo, 5:15. – **La Trad.**

DUA PARTO

# EKZEMPLOJ

## ĈAPITRO I

## LA FORPASO

1. La certeco pri la estonta vivo ne forigas la priokupiĝojn de ni antaŭ nia reveno de ĉi tiu vivo en la alian. Multe da homoj timas ne la morton mem, sed la transiĝan momenton. Ĉu ni suferas aŭ ne, dum tiu reveno? Tial ili malkvietiĝas, kaj prave, ĉar neniu evitas la fatalan leĝon de tiu transiĝo. Ni povas ne fari iun vojaĝon en ĉi tiu mondo, sed ne fari tiun en la alian mondon estas tute neeble. Riĉuloj kaj malriĉuloj, ĉiuj nepre devos fari ĝin, kaj, kiel eble plej dolora estas la forpaso, ne socia rango nek riĉeco povus ĝin mildigi.

2. Vidante la flegmon de kelkaj mortantoj kaj la terurajn konvulsiojn de aliaj, oni antaŭe povas opinii, ke la spertitaj sensacioj ne ĉiam estas samaj. Kiu do povus klarigi al ni tian aferon? Kiu priskribus la fiziologian fenomemon pri la disiĝo de la animo je la korpo? Kiu rakontus al ni la impresojn pri tiu lasta momento, pri kiu silentas la Scienco kaj la Religio? Kaj ili silentas, ĉar mankas al ili kono pri la leĝoj regantaj la rilatojn inter Spirito kaj materio, kaj unu haltas ĉe la sojlo de la spirita vivo kaj dua ĉe la sojlo de la materia vivo. Spiritismo estas ligilo inter ili, kaj nur ĝi povas diri al

ni, kiel okazas la disiĝo, ĉu rilate la plej pozitivajn nociojn pri la naturo de la animo, ĉu rilate la priskribojn de tiuj, kiuj forlasis ĉi tiun mondon. La kono de la fluideca ligilo, kuniganta la animon kun la korpo estas la ŝlosilo por tiu kaj por multe da aliaj fenomenoj.

3. La nesentebleco de la inerta materio estas fakto, kaj nur la animo spertas sensaciojn de doloro kaj de plezuro. Dum la vivo, ĉia materia diseriĝo reagas sur la animon, kiu tial ricevas impreson pli-malpli dolora. Suferas ja la animo, ne la korpo, ĉar ĉi tiu estas nenio alia ol instrumento por doloro: la animo estas la paciento. Post la morto, post disiĝo de la animo, la korpo povas esti senkompate mutilata kaj ĝi neniom suferas; la animo, pro la disiĝo, nenion spertas de la organa detruiĝo. La animo havas proprajn sensaciojn, kies fonto ne estas en la tuŝebla materio. La perispirito estas la envolvaĵo de la animo kaj disiĝas je ĝi ne antaŭ nek post la morto. La perispirito formas kun ĝi tuton, kaj oni ne konceptas unu sen la dua. Dum la vivo la perispirita fluidaĵo penetras en ĉiujn partojn de la korpo kaj servas kiel portilo de la fizikaj sensacioj de la animo, tiel same, kiel ĉi tiu per ĝi agas sur la korpon kaj direktas ties movojn.

4. La estingiĝo de la organa vivo okazigas la disiĝon de la animo je la korpo, kaŭze de la rompiĝo de la fluideca ligilo, kuniganta ĝin kun la korpo, sed tiu disiĝo neniam estas subita.

La perispirita fluidaĵo nur iom post iom liberiĝas de ĉiuj organoj, tiel ke la disiĝo nur estas kompleta kaj absoluta, kiam ne plu restas eĉ atomo de perispirito ligita al unu molekulo de la korpo. "La dolora sento de la animo okaze de la morto estas rekte proporcia al la sumo de la kontaktopunktoj, ekzistantaj inter la korpo kaj la perispirito, kaj sekve ankaŭ al la pli granda aŭ pli malgranda malfacileco, kiun la rompiĝo prezentas." Ne estas necese do diri, ke laŭ la cirkonstancoj la morto eble estas pli aŭ malpli pena. Tiajn cirkonstancojn ni ja devas ekzameni.

5. Unue ni starigu, kiel principon, la sekvantajn kvar okazojn, kiujn ni povas opinii ekstremaj situacioj, inter kies limoj estas senfinaj variaĵoj:

1-a: Se, en la momento, kiam la organa vivo estingiĝas, la malligiĝo de la perispirito estus kompleta, la animo absolute sentus nenion.

2-a: Se, en tiu momento, la altirforto de tiuj du elementoj estos en la apogeo de sia intenseco, okazos ia rompiĝo, kiu dolore reagos sur la animon.

3-a: Se la altirforto estos neintensa, la disiĝo estos facila kaj fariĝos sen skuo.

4-a: Se, post la tuta ĉeso de la organa vivo, ankoraŭ ekzistos nombraj kontaktopunktoj inter la korpo kaj la perispirito, la animo povos senti la efikojn de la putriĝo de la korpo ĝis tiam, kiam la ligilo tute rompiĝos.

El tio rezultas, ke la sufero akompananta la morton dependas de la altirforto, kiu kunigas la korpon kun la perispirito; ke ĉio, kio eble malintensigos tiun forton kaj plirapidigos la malligiĝon, faras la forpason malpli pena; ke fine, se la malligiĝo okazos sen malfacileco, la animo ne spertos ian ajn malagrablan senton.

6. Dum la transiĝo de la korpa vivo en la spiritan, ankoraŭ okazas alia tre grava fenomeno — la konsterniteco. Dum ĝi okazas, la animo spertas ian torporon, kiu nedaŭre paralizas ĝiajn kapablojn, nuligante almenaŭ parte la sensaciojn. Tio estas, kvazaŭ ia katalepsia stato, en kiu la animo preskaŭ neniam atestas konscie sian lastan elspiron. Ni diris *preskaŭ neniam*, ĉar en iaj okazoj la animo konscie povas observi sian liberiĝon, kiel ni baldaŭ vidos. La konsterniteco do povas esti rigardata, kiel ordinara stato ĉe la momento de la morto kaj daŭri nedifinitan tempon, variantan de kelke da horoj ĝis kelke da jaroj. Proporcie kiel ĝi liberiĝas, la animo troviĝas en situacio komparebla kun tiu de homo vekiĝanta de profunda dormado; la ideoj estas konfuzaj,

neprecizaj, necertaj; la vidado apenaŭ distingas, kvazaŭ tra densa nebulo, sed klariĝas iom post iom; memoro kaj kono pri ĝi mem vekiĝas. Sed tre malsama estas tiu vekiĝo; trankvila ĉe unuj, ĝi alportas dolĉajn sensaciojn; funebra, timiga kaj aflikta ĉe aliaj, ĝi similas teruran inkubon.

7. La lasta spiro preskaŭ neniam estas dolora, ĉar ĝi ordinare okazas ĉe momento de nekonscio, sed la animo spertas antaŭ ĝi la malkomponiĝon de la materio, ĉe la stertoroj de agonio, kaj post ĝi la angorojn pro konsterniteco. Ni rapidas aserti, ke tiu stato ne estas ĝenerala, ĉar la intenseco kaj daŭro de la sufero estas rekte proporcia al la altireco ekzistanta inter korpo kaj perispirito. Tiel, ju pli granda estos tiu alligiteco, des pli penigaj kaj daŭraj estos la klopodoj de la animo por liberiĝi. Ekzistas personoj, en kiuj la altireco estas tiel malintensa, ke la malimplikiĝo okazas per si mem, kvazaŭ laŭnature; tio estas, kvazaŭ matura frukto defalus de sia branĉo, kaj ĝi estas ekzemplo de trankvilaj mortoj, de paca vekiĝo.

8. La ĉefa kaŭzo de pli aŭ malpli granda facileco de liberiĝo estas la morala stato de la animo. La alligiteco inter la korpo kaj la perispirito estas proporcia al la alkroĉiĝo al la materio, alkroĉiĝo, kiu atingas sian plej altan gradon ĉe la homo, kies zorgoj ekskluzive kaj nure rilatas al la materiaj vivo kaj ĝuoj. Kontraŭe, ĉe la animoj puraj, kiuj antaŭe identigas sin kun la spirita vivo, la alkroĉiĝo estas preskaŭ nula. Ĉar la malrapideco kaj la malfacileco estas proporciaj al la grado da pureco kaj elmateriiĝo de la animo, de ni dependas fari facila aŭ peniga, agrabla aŭ dolora, tiun liberiĝon.

Prezentinte tion, jen kiel teorion, jen kiel rezultaton de observoj, ni fine devas esplori la influon de la speco de morto sur la sensaciojn de la animo ĉe ties lastaj momentoj.

9. Kiam temas pri natura morto, rezultanta el la estingiĝo de la vivo-fortoj pro maljuneco aŭ malsano,

la disiĝo grade okazas; de homo, kies animo elmateriiĝis kaj kies pensoj disiĝis je la surteraj aferoj, la malligiĝo preskaŭ kompletiĝas antaŭ ol la reala morto, t. e. dum lia korpo ankoraŭ havas organan vivon, lia Spirito jam penetras en la spiritan vivon, nur ligite per ĉenero tiel delikata, ke ĝi rompiĝas ĉe la lasta bato de la koro. En ĉi tiu okazo la Spirito jam eble reakiris sian mensklarecon, tiel ke li fariĝas konscia atestanto de la estingiĝo de la vivo de sia korpo, opiniante sin feliĉa, ke li ĝin forlasis. Al tiu la menskonfuziĝo estas preskaŭ nula, aŭ prefere ĝi estas nenio alia ol nelonga kvieta dormado, el kiu li vekiĝas kun neesprimebla impreso de espero kaj feliĉo.

Al la tre materieca kaj voluptama homo, vivinta pli korpe ol spirite, kaj al kiu la spirita vivo nenion signifas, ne tuŝante eĉ lian penson, ĉio kontribuas por streĉi la materiajn ligilojn, kaj kiam la morto proksimiĝas, la malligiĝo, kvankam same grade okazanta, postulas konstantajn klopodojn. La konvulsioj el la agonio estas signoj de lukto de la Spirito, kiu iafoje penas rompi la fortajn ligilojn kaj alifoje alkroĉiĝas al la korpo, el kiu nevenkebla forto lin perforte fortiras molekulon post molekulo.

10. Ju malpli la Spirito vidas ekster la korpa vivo, des pli li alkroĉiĝas al ĝi, kaj tiel li sentas, ke ĝi eliĝas el li kaj li volas ĝin reteni; anstataŭ sin doni al la movo, lin altiranta, li rezistas per ĉiuj fortoj kaj eĉ povas plilongigi la lukton dum tutaj tagoj, semajnoj kaj monatoj.

Certe, en tiu momento, la Spirito ne posedas sian tutan konscion, ĉar lia menskonfuziĝo de longe antaŭis la morton, sed ne tial li malpli suferas, kaj la malpleno, en kiu li troviĝas, kaj la necerteco pri tio, kio al li okazos, pligravigas liajn angorojn. Fine venas la morto, kaj ne tial ĉio estas finiĝinta; la menskonfuziĝo daŭras plu, li sentas, ke li vivas, sed ne scias ĉu materie ĉu spirite, li luktas, kaj li ankoraŭ luktas ĝis kiam la lastaj ligiloj de la perispirito tute rompiĝos. La morto metis finon al la efektiva malsano, sed ne baris la sekvojn, kaj

dum ekzistos punktoj de kontaktoj kun la korpo, la Spirito resentas kaj suferas pro siaj impresoj.

11. Kiel alia estas la situacio de la elmateriiĝinta Spirito, eĉ en plej kruelaj malsanoj! Estante delikataj, la fluidecaj ligiloj, kiuj kunigas lin kun la korpo, facile rompiĝas; krome lia konfido al la estonteco, pense aŭ reale duonvidita, iel iafoje okazas, igas lin rigardi la morton, kiel savilon, kaj ĝiajn sekvojn, kiel provon, kaj el tio venas al li ia rezignacia flegmo, kiu malintensigas lian suferon.

Post la morto, rompitaj la ligiloj, ne estas eĉ unu dolora reago, kiu lin ĝenu; la vekiĝo estas rapida, senembarasa; liaj solaj sensacioj: korfaciliĝo, ĝojo!

12. Ĉe la perforta morto la sensacioj ne estas ĝuste tiuj samaj. Nenia komenca diseriĝo antaŭe okazigis la disiĝon de la perispirito je la korpo; la organa vivo kun sia tuteco de forto estas subite estingita. En ĉi tiuj kondiĉoj la malligiĝo komenciĝas nur post la morto kaj ne povas rapide kompletiĝi. La Spirito neatendite trafita statas kvazaŭ menskonfuzita kaj sentas, kaj pensas, kaj kredas, ke li vivas, kaj longigas ĉi tiun iluzion, ĝis kiam li komprenos sian staton. Ĉi tiu duma stato inter la korpa kaj spirita vivoj estas el tiuj plej interesaj por studado, ĉar ĝi prezentas la strangan scenon de Spirito, kiu opinias materia sian fluidecan korpon, samtempe spertante ĉiujn sensaciojn de la organa vivo. Krom tio, pri tiu stato ekzistas senfina serio da nuancoj, kiu varias laŭ la konoj kaj la moralaj progresoj de la Spirito. Al tiuj homoj, kies animo estas purigita, la situacio ne longe daŭras, ĉar ili havas en si mem ian antaŭan malligiĝon, kies finon la plej subita morto nur fruigas. Ekzistas aliaj, al kiuj la situacio longiĝas dum tutaj jaroj. Ĉi tiu situacio estas tre ofta ĉe la okazoj de ordinara morto, kiu, estante neniel pena al la progresintaj Spiritoj, fariĝas terura por la malprogresintaj. Precipe al la memmortiginto ĝi superas ĉian atendon. Katenita al la korpo per ĉiuj fibroj, la perispirito komunikas al la animo ĉiujn sentojn de la korpo kun afliktegaj doloroj.

13. La stato de la Spirito okaze de la morto povas esti resume priskribita jene: Des pli granda estas la sufero, ju pli malrapida estos la malligiĝo de la perispirito; la rapido de ĉi tiu malligiĝo estas rekte proporcia al la morala progreso de la Spirito; al la elmateriiĝinta Spirito, kun pura konscienco, la morto estas kvazaŭa mallonga dormado, senigita je agonio, kaj lia vekiĝo estas tre milda.

14. Por ke la homo laboru por sia puriĝo, bridu siajn malbonajn inklinojn kaj regu siajn pasiojn, estas necese, ke li *rezignu siajn tutajn profitojn* por sia estonteco, ĉar, por identiĝi kun la spirita vivo, direktante al ĝi ĉiujn siajn aspirojn kaj preferante ĝin al la surtera vivo, ne sufiĉas, ke li kredu, sed ke li komprenu. Ni devas konsideri tiun vivon el vidpunkto, kiu samtempe kontentigu la racion, la logikon, la komunan saĝon kaj la koncepton, kiun ni faras pri la grandeco, boneco kaj justeco de Dio. Rigardate el ĉi tiu vidpunkto, pro la neskuebla fido, kiun ĝi donas, Spiritismo el tiom da doktrinoj, kiujn ni konas, estas tiu, kiu havas plej potencan influon.

La *serioza* spiritisto ne limiĝas kredi, *ĉar li komprenas*, kaj li komprenas, ĉar li rezonas; la estonta vivo estas realaĵo senĉese disvolviĝanta antaŭ liaj okuloj; por tiel diri, realaĵo, kiun li ĉiumomente tuŝas kaj vidas, tiel ke dubo ne povas ekposedi lin aŭ nesti en lia animo. La korpa vivo, tiel mallonga, senvaloriĝas antaŭ la spirita vivo, la efektiva vivo. Kio gravas la incidentoj en la vojirado, se li komprenas la kaŭzon kaj utilecon de la homaj sortovicoj, kiam ĉi tiuj estas rezignacie eltenataj? Lia animo altiĝas pro la rilatoj kun la videbla mondo; la fluidecaj ligiloj, lin katenantaj al la materio anticipe malfortiĝas, kaŭzante partan malligiĝon, kiu faciligas lian venon en la alian vivon. La menskonfuziĝo, sekvanta la transiĝon, nelonge daŭras, ĉar, farinte la paŝon, li tuj rekonas sen surpriziĝo, sed komprenante, sian novan sitiacion.

15. Efektive ne estas nur Spiritismo, kiu certigas al ni tiel promesantan rezultaton, ĝi eĉ ne arogas al si

esti la ekskluziva rimedo, la sola savogarantio por la animoj. Sed estas necese konfesi, ke pro la konoj, kiujn ĝi donas, pro la sentoj, kiujn ĝi inspiras, ankaŭ pro la humoro, en kiun ĝi metas la Spiriton, igante lin kompreni la bezonon pliboniĝi, ĝi treege faciligas la saviĝon. Ĝi plie donas al ĉiu la rimedojn helpi la malligiĝon de *aliaj Spiritoj* forlasantaj la materian envolvaĵojn, mallongigante ilian konfuziĝon per elvoko kaj per preĝo. Per la sincera preĝo, kiu estas ia spirita magnetizo, oni kaŭzas pli rapidan malligiĝon de la perispirita fluidaĵo; per elvoko saĝe kaj prudente gvidata, per bonvolaj kaj konsolaj vortoj oni disbatas la torporon de la Spirito, helpante lin rekoni sin pli frue, kaj se li estas suferanto, oni inspiras al li penton — solan rimedon mallongigi liajn suferojn. (*)

---

(*) La ekzemploj, kiujn ni transskribos, montras al ni la Spiritojn en iliaj variaj gradoj da feliĉo kaj malfeliĉo en la spirita vivo. Ni ne prenis ilin el inter la personoj pli aŭ malpli kleraj de la pasinteco, kies situacio eble multe ŝanĝiĝis post la ekzistado, en kiu ni ilin konis, kaj tial ili ne donus sufiĉajn pruvojn pri aŭtentikeco. Kontraŭe ni prenis tiujn ekzemplojn el la cirkonstancoj plej ordinaraj de la nuntempa vivo, ĉar tiel ĉiu povas trovi pli da similaĵoj kaj asimili per komparado la plej profitajn instruojn. Ju pli proksima al ni estas la surtera ekzistado de la Spiritoj — ĉu pro sia socia rango, ĉu pro siaj ligiloj de parenceco aŭ pro simplaj interrilatoj — des pli ni interesiĝas pri ili, kaj tiel fariĝas al ni facile konstati ilian identecon. La vulgaraj pozicioj estas plej ordinaraj, pli nombraj, kaj ĉiu homo povas apliki ilin al si, ke ili fariĝu utilaj, dum tiuj esceptaj pozicioj malpli nin impresas, ĉar ili restas for de la sfero de niaj kutimoj. Ni do ne elektis eminentulojn, kaj se en tiuj ekzemploj troviĝas iaj konataj personoj, la pli granda nombro konsistas el nekonataj. Ni aldonu, ke famaj nomoj ne helpus nin pri la instruiĝo, kiun ni celas, kaj plie povus vundi korojn. Kaj ni turnas nin ne al la scivolemuloj nek al skandalamantoj, sed sole nur al tiuj, kiuj intencas sin instrui. Tiuj ekzemploj povas esti multobligataj senfine, sed devigite limi ilian nombron, ni elektis tiujn, kiuj pli bone povas klarigi la spiritan mondon kaj ĝian staton, ĉu per la situacio de la Spiritoj, ĉu per eksplikoj, kiujn ili povis doni. La pli granda parto de tiuj ekzemploj estas neeldonita, kaj nur kelkaj nemultaj, estas publikigitaj en la **Revue Spirite**. El ĉi tiuj ni forigis superfluajn detalojn, konservante nur tion esencan por la celo, al kiu ni nin donis, poste aldonante instruojn, kiam ĉi tiujn montriĝos necesaj.

## ĈAPITRO II

## FELIĈAJ SPIRITOJ

### Sanson

Ĉi tiu malnova membro de la Spiritisma Societo de Parizo mortis la 21an de Aprilo 1862, post unu jaro da teruraj suferoj. Antaŭvidante sian morton, li direktis al la prezidanto de la Societo leteron laŭ la jena teksto:

"Ĉar povas esti, ke mi estos surprizita de la disiĝo de mia animo je mia korpo, venas al mi en la kapon ree fari al vi peton, kiun mi faris antaŭ ĉirkaŭ unu jaro, nome ke vi elvoku mian Spiriton, kiel eble plej baldaŭ, por ke mi povu, kiel tre neutila membro de nia Societo, esti por vi iel utila post la morto, klarigante, fazon post fazo, la cirkonstancojn, kiuj sekvas tion, kion la vulgarularo nomas morto, kaj kio estas por ni — la spiritistoj — nenio alia ol ia transformiĝo, laŭ la nesondeblaj planoj de Dio, sed ĉiam utila al la celo, kiun Li proponas al si. Krom ĉi tiu peto — kiu estas rajtigo, por ke vi honoru min per tia spirita nekropsio eble neutila pro mia preskaŭ nenia progreso, kaj kiun via saĝo ne konsentos transpasi certan nombron da provoj — mi kuraĝas persone insisti ĉe vi kaj ankaŭ ĉe ĉiuj kolegoj, ke vi petegu la Ĉiopovan pri helpo de la bonaj Spiritoj kaj de Sankta Ludoviko, nia spirita prezidanto, speciale, ke ili gvidu min ĉe elekto de nova reenkarniĝo kaj ties tempo, penso jam de longe min priokupanta.

Mi timas tro fidi miajn proprajn spiritajn fortojn, tre frue kaj tromemfide petante Dion pri la korpa stato,

en kiu mi ne povu pravigi la dian bonecon, tiel malhelpante mian propran progreson kaj plilongigante mian restadon sur la Tero aŭ alia loko, en la okazo, se mi fiaskos.”

Por kontentigi lian deziron ni per senprokrasta elvoko direktiĝis kun kelkaj membroj de la Societo al la mortoĉambro, kie antaŭ lia korpo efektiviĝis la ĉi-suba interparolo, unu horon antaŭ la respektiva enterigo. Nia celo estis duobla: plenumi ian lastan deziron kaj ankoraŭ-foje observi iun animon ekde la momento tuj post la morto, konsiderante cetere, ke temas pri homo eminente klera, inteligenta kaj profunde konvinkiĝinta pri la spiritismaj veraĵoj. Fine ni iris rikolti el liaj unuaj impresoj la pruvon de kiom multe povas influi sur la staton de la Spirito la kompreno de tiuj veraĵoj. Kaj ĉe tiu atendo ni ne iluziiĝis, ĉar Sanson priskribis tute klarmense la momento de transiĝo, vidante sin morti kaj renaskiĝi, kio estas cirkonstanco malofta, kiun oni ŝuldas nur al la supereco de lia Spirito.

I

(Mortoĉambro, la 23an de Aprilo 1862)

1. *Elvoko*. — R. Mi kontentigas vian peton por plenumi mian promeson.

2. — Mia kara S-ro Sanson, plenumante ian devon, ni plezure vin elvokas kiel eble plej frue, post via morto, laŭ via deziro. — R. Tio estas speciala graco, kiun Dio donas al mi, por ke mi povu manifestiĝi; mi dankas vin pro via bonvolo, sed mi estas tiel malforta, ke mi *tremas*.

3. — Vi tiel multe suferis, ke ni pensas, ni povas demandi vin, kiel vi fartas nun... Ĉu vi ankoraŭ sentas viajn dolorojn? Komparante la hodiaŭan situacion kun tiu de antaŭ du tagoj, kiajn sensacojn vi spertas nun? — R. Mia situacio estas tre feliĉa; mi troviĝas restarigita, renovigita, kiel oni diras ĉe vi, kaj sentas nenion pli el la

malnovaj doloroj. La transiro de la surtera vivo al tiu de la Spiritoj komencis kaŭzi al mi ian nekompreneblan staton, ĉar iafoje ni restas plurajn tagojn senigita je mensklareco. Mi tamen faris ian peton al Dio, ke Li permesu al mi paroli al miaj karuloj, kaj Dio kontentigis min.

4. — Post kiom da tempo vi reakiris la klarecon de viaj ideoj? — R. Post ok horoj. Dio, mi rediras, donis al mi pruvon de sia boneco, pruvon pli grandan ol mia indeco, kaj mi ne scias kiel mi Lin danku.

5. — Ĉu vi estas tre certa pri tio, ke vi ne plu apartenas al nia mondo? Se jes, kiel vi povas pruvi tion? — R. Ho! Mi tute certe ne apartenas al tiu mondo, sed mi ĉiam estos apud vi por vin protekti, por ke vi prediku karitaton kaj abnegacion, kiuj gvidis mian vivon. Poste mi instruos la veran fidon, la spiritisman fidon, kiu devas plialtigi la kredemon de la bonulo kaj justulo; mi estas forta, fortika, per alia vorto — ŝanĝita. En mi vi ne plu rekonos la malsanan maljunulon, kiu devis forgesi ĉion, evitante ĉiam plezuron kaj ĝojon. Mi estas Spirito kaj mia patrujo estas la Spaco, mia estonteco estas Dio, kiu regnas en la senlimaĵo. Mi deziras povi paroli al miaj geinfanoj, instrui al ili tion saman, kion ili malakceptis kredi.

6. — Kian efekton kaŭzas al vi via korpo, kuŝanta ĉi tie apude? — R. Mia korpo! Kompatinda, mizera restaĵo... refariĝas polvo, dum mi memoras ĉiujn, kiuj min estimis. Mi vidas tiun kompatindan karnon putrintan, kiu estis loĝejo de mia Spirito por multjara provado! Dankon, mizera korpo, ĉar ci purigis mian Spiriton! Mia suferado, dekoble benata, donis al mi lokon tre kompensan, tial, ke tiel frue mi povas komunikiĝi kun vi...

7. — Ĉu vi konservis viajn pensojn ĝis la lasta momento? — R. Jes. Mia Spirito konservis siajn kapabl-ojn, kaj kiam mi jam ne plu vidis, mi antaŭsentis. Mia

tuta ekzistado disvolviĝis en la memoro kaj mia lasta penso, mia lasta preĝo estis por tio, ke mi povu komunikiĝi kun vi, kiel mi faras nun; poste mi petis Dion, ke Li vin protektu, por ke plenumiĝu la revo de mia vivo.

8. — Ĉu vi estis konscia pri la momento, en kiu via korpo ellasis la lastan spiron? Kio okazis al vi en tiu momento? Kian sensacon vi spertis? — R. Foriras la vivo kaj la vido, aŭ prefere, la vido de la Spirito estingiĝas; oni trovas la malplenaĵojn, la nekonataĵon, kaj trenata de povo, kiun mi ne konas, oni troviĝas en mondo de ĝojo kaj grandeco! Mi nenion sentis, nenion komprenis, kaj tamen ia nedirebla feliĉo, libera de la pezo de la doloroj, ekstazigis min de ĝuo.

9. — Ĉu vi scias... kion mi intencas legi ĉe via tombo?

Apenaŭ estis elparolataj la unuaj vortoj pri la afero, la Spirito respondis antaŭ ol mi finis la demandon. Sen ia demando, li ankaŭ respondis ian kontraŭdiron estiĝintan inter la ĉeestantoj, pri tio, ĉu estus oportuna la legado de tiu komunikaĵo en la tombejo, ĉe personoj ne partoprenantaj niajn opiniojn.

— R. Ho! Mi scias, mia amiko, kaj mi scias, ĉar mi vidis vin hieraŭ, tiel same, kiel hodiaŭ... kiom granda estas mia ĝojo! Dankon! Dankon! Parolu... parolu, por ke vi min komprenu kaj oni estimu vin; nenion vi devas timi, ĉar oni respektas la morton... parolu do, por ke la nekredantoj havu fidon. Adiaŭ; parolu; kuraĝon, konfidon, kaj Dio volu, ke miaj infanoj povu konvertiĝi al ia sanktega kredo.

*J. Sanson*

Dum la ceremonio en la tombejo li diktis la jenajn vortojn: “Ne timu la morton, miaj amikoj: ĝi estas stadio de la vivo, se vi bone scios vivi; ĝi estas feliĉo, se vi bone ĝin meritos aŭ pli bone se vi plenumos viajn provojn! Mi rediras: estu kuraĝa kaj bonvolema! Atribuu

ne pli ol eta valoro al la surteraj riĉaĵoj, kaj vi estos rekompencitaj. *Oni ne povas multe ĝuadi, ne forprenante la komforton de aliulo*, kaj ne farante morale ian grandan, ian grandegan malbonon. La tero estu malpeza al mi.”

## II

(Spiritisma Societo de Parizo, la 25an de Aprilo 1862)

1. *Elvoko.* — R. Mi estas proksime de vi, miaj amikoj.

2. — Ni opinias nin feliĉaj pro la intervjuo, kiun ni havis en la tago de via enterigo, kaj, ĉar vi tion permesis, ni estos pli feliĉaj se ni ĝin kompletigos por nia instruiĝo. — R. Mi estas preta kaj sentas feliĉa pro tio, ke vi pensas pri mi.

3. — La falsa ideo, kiun ni faras pri la nevidebla mondo, plurfoje kondukas nin al nekredemo, kaj tiel ĉio, kio tiurilate povas nin instrui, estos por ni plej grava. Tial ne surprizu vin la demandoj, kiujn ni eble faros al vi. — R. Mi ilin atendas kaj mi ne estos surprizata.

4. — Vi klare priskribis vian transiĝon al alia vivo; vi diris, ke en la momento, kiam la korpo ellasas la lastan spiron, la vivo foriras kaj la vidokapablo estingiĝas. Ĉu tiu momento estas ja sekvata de ia ajn dolora senaco? — R. Tute certe, ĉar la vivo estas nenio alia ol kontinua serio da doloroj, el kiuj la morto estas kompletigaĵo. El tio sekvas perforta rompiĝo, kvazaŭ la Spirito devus fari ian eksterordinaran penon por eskapi el sia envolvaĵo, peno absorbanta la tutan estaĵon, iganta lin perdi la konscion pri sia destino.

Ĉi tiu kazo ne estas ĝenerala, ĉar la sperto pruvas, ke pluraj Spiritoj perdas la konscion antaŭ ol morti tiel same, kiel la disiĝo okazas sen penado al tiuj, kiuj atingis ian gradon da senmateriiĝo.

5. — Ĉu ekzistas, laŭ via scio, Spiritoj, al kiuj la ekstrema momento estas pli peniga? Ĉu ĝi ekzemple estas pli dolora al la materialisto? — R. Tio estas ja senduba, ĉar preparita Spirito jam forgesis la suferon, aŭ prefere alkutimiĝis al ĝi, kaj la sereneco, kun kiu li rigardas la morton, malebligas al li duoble suferi, ĉar li scias, kio lin atendas. La morala sufero estas pli forta kaj ĝia foresto, en la momento de la morto, estas per si mem ia granda korfaciliĝo. La nekredanto similas ian kondamniton al mortopuno, kies penso antaŭvidas la tranĉilegon kaj la *nekonataĵon*. Tia morto kaj tiu de la ateisto estas egalaj.

6. — Ĉu ekzistas materialistoj sufiĉe harditaj por pensi, en tiu momento, ke ili estos ĵetataj en la nenion? — R. Jes, ili kredas je la nenio ĝis la lasta horo, sed en la momento de disiĝo la Spirito retroiras, la dubo lin ekkaptas kaj lin torturas; li demandas al si mem kio okazos, li volas lerni ion, sed li nenion povas fari. La disiĝo ne povas kompletiĝi sen tiu impreso.

Ĉe aliaj cirkonstancoj, iu Spirito faris al ni la jenan priskribon pri la morto de nekredantoj: Ĉe la lastaj momentoj ili spertas la angorojn de tiuj teruraj inkuboj, en kiuj ili sin vidas ĉe abismaj krutaĵoj ilin tuj englutontaj; ili volas forkuri sed ne povas; ili penas alkroĉiĝi al io ajn, sed ne trovas apogon kaj sentas, ke ili defalas: ili volas alvoki, krii kaj sukcesas ellasi eĉ ne unu sonon: — tiam ni vidas, ke ili tordiĝas, kuntiras la manojn, eligas sufokitajn kriojn, kaj donas tiom da aliaj simptomoj de la inkubo, kies viktimoj ili estas.

Ĉe la ordinara inkubo de sonĝo, la vekiĝo neniigas vian malkvietiĝon kaj vi estos trankviligitaj de la kompreno, ke vi sonĝis; la mortinkubo plurfoje plilongiĝas eĉ dum jaroj, kaj kio faras la sensacon ankoraŭ pli peniga por la Spirito, tio estas la mallumo, en kiu li dronas.

7. — Vi diris, ke en la momento morti, vi nenion vidis, sed antaŭsentis. Oni komprenas, ke fizike vi nenion vidis, sed kion vi antaŭsentis antaŭ la estingiĝo, ĉu tio jam estus la heleco de la Spirita mondo?

— R. Tion mi ja diris antaŭe: la momento de la morto donas vidon al la Spirito; liaj okuloj ne vidas, sed la Spirito, kiu posedas ian vidkapablon multe pli akran, tuj malkovras ian mondon, kaj la vero, subite brilante, momente donas al li grandegan ĝojon aŭ profundan ĉagrenon, laŭ lia konsciostato aŭ la memoro pri la pasinta ekzistado.

Temas pri la momento, kiu antaŭas la morton, aŭ pli bone, pri la momento, en kiu oni perdas la konscion – kion klarigas la vorto *momente*, ĉar la agrablaj aŭ penigaj impresoj, kiaj ajn ili estas, daŭras plu post la vekiĝo.

8. — Ĉu vi povas diri al ni tion, kio impresis vin, kion vi vidis en la momento, kiam viaj okuloj malfermiĝis al la lumo? Ĉu vi povas priskribi al ni, se eble, la aspekton de la aferoj, kiuj sin prezentis al vi? — R. Kiam mi povis vekiĝi kaj vidi, kio estis antaŭ la okuloj, mi estis kvazaŭ ravita, povante kompreni nenion, ĉar la mensklareco ne refariĝas subite. Sed Dio, kiu donis al mi abundan pruvon de sia boneco, permesis, ke mi reakiru la kapablojn, kaj tiam mi vidis min ĉirkaŭita de sennombraj, bonaj kaj fidelaj amikoj. Ĉiuj protektantaj Spiritoj, kiuj nin helpas, min ĉirkaŭis ridetante; ia senegala ĝojo radiis de ilia mieno kaj ankaŭ mi, forta kaj animita, povis senpene trakuri la spacojn. Tio, kion mi vidis, ne havas nomon en la homa lingvaĵo. Poste mi revenos por al vi paroli pli multe pri miaj aventuroj, ne transpasante memkompreneble la limon difinitan de Dio. Sciu, ke la feliĉo tia, kia vi ĝin komprenas, estas nenio alia ol fikcio. Vivu saĝe, sankte, por karitato kaj amo, kaj vi havigos al vi la rajton je la impresoj kaj plezuroj, kiujn la plej eminenta el la poetoj ne scios priskribi.

La mirrakontoj estas plenaj de absurdaj aferoj, sed eble ili enhavas iamaniere kaj parte ion okazantan en la mondo de la Spiritoj. La priskribo de S-ro Sanson kvazaŭ memorigas nin pri viro endormiĝinta en domaĉo kaj vekiĝanta en luksega palaco, kaj ĉirkaŭita de brila kortego.

## III

9. — Sub kia aspekto prezentiĝis al vi la Spiritoj? sub la homa formo? — R. Jes, mia kara amiko; tie, sur la Tero, la Spiritoj al ni instruas, ke en alia mondo ili konservas la saman formon, kiu servis al ili kiel envolvaĵo, kaj tio estas ja vera. Sed kia diferenco estas inter la malgracia maŝino, kiu tie treniĝas akompanata de mizeraĵoj, kaj la mirinda fluideco de la spirita korpo! La malbeleco de plu ekzistas, ĉar ĝiaj trajtoj perdis la malmolecon de la esprimo formanta la karakteron, kiu distingas la homan rason. Dio feliĉigis tiujn graciajn korpojn, kiuj elegante sin movas; ilia lingvaĵo havas tonojn netradukeblajn por vi kaj ilia rigardo la povon atingi stelon! Prezentu al vi tion, kion Dio povos krei en sia ĉiopoveco, Li, la Arkitekto de la arkitektoj, kaj tiam vi estos farintaj ian palan ideon pri la formo de la Spiritoj.

10. — Rilate al vi, kiel vi vidas? Ĉu vi rekonas en vi ian formon limigitan, ĉirkaŭlimigitan, kvankam subtilegan? Ĉu vi sentas en vi mem ian kapon, trukon, krurojn kaj brakojn? — R. Konservante sian homan formon idealigitan, diigitan, la Spirito povas, sen kontraŭdiro, posedi ĉiujn membrojn, pri kiuj vi parolas. Mi perfekte sentas miajn manojn kun la fingroj, ĉar ni povas laŭvole aperi al vi kaj premi viajn manojn. Mi estas ĉe miaj amikoj kaj premas iliajn manojn, kaj ili tion ne vidas. Rilate nian fluidecon kaj danke al ĝi, ni povas ĉien iri, ne trairante la spacon nek produktante iajn ajn sensacojn, se tion ni deziros. En ĉi tiu momento, mi havas inter viaj krucigitaj manoj la miajn. Mi ekzemple diras, ke mi vin amas; sed mia korpo okupas nenian spacon, la lumo ĝin trairas kaj kion vi nomus miraklo, se vi ĝin vidus, tio por la Spirito estas nenio alia ol konstanta ago en ĉiuj momentoj.

La vidkapablo de la Spiritoj ne povas esti komparata kun tiu homa, ĉar ilia korpo havas neniajn realajn similaĵojn; por ili ĉio transformiĝas tiel en la esenco, kiel same en la tutaĵo. Al vi mi rediras, ke la Spirito

havas ian dian sagacecon, kiu ampleksas ĉion, tiel ke li povas diveni eĉ la aliulan penson; li ankaŭ povas oportune preni la plej konvenan formon por fariĝi konata. Sed la Spirito efektive finita la provaĵon, preferas tiun formon, kiu kondukis lin al Dio.

11. — La Spirito ne havas sekson; sed ĉar antaŭ kelkaj tagoj vi estis viro, tial ni deziras scii ĉu vi havas, en via nova stato, pli multe da vira naturo ol da ina. Kaj tio sama, kio okazas al vi, povas esti atribuata al Spirito jam de longe elkarniĝinta? — R. Ni ne havas motivon por aparteni al vira aŭ ina naturo: la Spiritoj ne reproduktas. Dio kreis ilin, kiel Li volis, kaj ĉar, laŭ siaj mirindaj projektoj, Li devis reenkarnigi ilin sur la Tero, Li tie subigis ilin al la leĝoj de reproduktado de la specioj, karakterizita de la kuniĝo de la seksoj. Sed vi devas senti, sen plia ekspliko, ke la Spiritoj ne povas havi sekson.

Ĉiam oni diris, ke la Spiritoj ne havas sekson, ĉar ĉi tiu estas necesa nur al la reproduktado de la korpoj. Fakte, ĉar ili ne sin reproduktas, sekso estus al ili tute neutila. Nia demando ne celis konfirmi tiun fakton, sed koni la impresojn, kiujn S-ro Sanson konservis pri sia surtera stato, ĉar li estis ĵus elkarniĝinta. La puraj Spiritoj perfekte komprenas sian naturon, sed inter la malsuperaj, ne elmateriiĝintaj, ekzistas multaj, kiuj opinias sin enkarniĝintaj sur la Tero, kun la samaj pasioj kaj deziroj. Tiel ili pensas, ke ili ankoraŭ estas la samaj, kiaj ili estis, t.e. viro aŭ virino, kaj ekzistas tiuj, kiuj pro tiu motivo pensas, ke ili efektive havas sekson. La kontraŭdiroj pri tio naskiĝas el la grado da instruiteco de la Spiritoj sin manifestantaj, kaj la eraro apartenas malpli al ili ol al tiuj, kiuj ilin demandas, tute ne zorgante ĝisfunde esplori la demandojn.

12. — Kiel sin prezentas al vi la kunsido? Ĉu ĝia aspekto estas tiu sama en la tempo, kiam vi vivadis? Ĉu la personoj konservas por vi la saman ŝajnon? Ĉu ĉio estas tiel klara kaj distingebla, kiel en la pasinteco? — R. Multe pli klara, ĉar mi povas legi la penson de vi ĉiuj, sentante min ankaŭ feliĉa pro la bonefika impreso

al mi kaŭzita de la bonvolo de ĉiuj kuniĝintaj Spiritoj. Mi deziras, ke la sama kriterio estu sentata ne nur en Parizo, sed en la tuta Francujo, *kie ekzistas grupoj sin apartigantaj, sin reciproke enviantaj, regitaj de agitemaj Spiritoj, kiuj plezuras ĉe malkonkordo*, kiam Spiritismo devas inspiri la kompletan kaj absolutan forgeson de la memo".

13. — Vi diris, ke vi povas legi nian penson: Ĉu vi povas ekspliki al ni, kiel estiĝas tiu transsendo? — R. Ĝi ne estas facila. Ke ni priskribu al vi tiun eksterordinaran miregindaĵon de nia vidkapablo, ĝin eksplikante, estus necese disponigi al vi ian tutan arsenalon da novaj agantoj, kio cetere alportus nenion al vi, ĉar vi havas viajn kapablojn limigitaj de la materio. Paciencon... Fariĝu bonaj, kaj vi sukcese atingos ĉion. Nuntempe vi nur povas havi tion, kion Dio konsentis al vi, sed kun la espero pri senĉesa progreso; pli malfrue vi estos kiel ni. Penu tamen morti en graco, por ke vi multon scios. La scivolemo, stimulo de la pensema homo, trankvile kondutos vin al la morto, rezervante al vi la kontentigon de ĉiuj deziroj estintaj, estantaj kaj estontaj. Dum vi atendas, mi diros, por respondi, kvankam malbone, vian demandon: la aero, kiun vi spiras, nepalpebla, kiel ni mem, kvazaŭ stereotipas vian penson; la blovo, kiun vi ellasas, estas pli-malpli la skribita paĝo de viaj pensoj legitaj kaj komentariitaj de la Spiritoj ofte troviĝantaj ĉe vi, kurieroj de ia dia telegrafio, kiu ĉion transsendas kaj gravuras.

## La morto de justulo

Tuj post la unua elvoko de S-ro Sanson, okazinta ĉe Societo de Parizo, iu Spirito donis la jenan komunikaĵon sub ĉi tiu titolo:

"Estis ja de justulo la morto de tiu viro, pri kiu vi okupiĝas en ĉi tiu momento, t.e. esperplena kaj serena. Kiel tago nature sekvas aŭroron, tiel same la spirita vivo sekvis lian surteran vivon, sen interrompo kaj skuo. Lia

lasta spiro estis tute simila je himno de dankemo kaj amo. Kiom malmultaj estas tiuj, kiuj spertas tiele la penan transiĝon! Kiom malmultaj tiuj, kiuj post la konfuzon kaj malespero de la vivo, konceptas la harmonian ritmon de la sferoj! Kiel homo perfekte sana, estante subite stumpigita, suferas ĉe la detranĉitaj membroj de la korpo, tiel same la animo de skeptikulo, apartigita de la korpo, dispeciĝas kaj korŝire sin ĵetas en la Spacon, nekonscia pri si mem.

Preĝu por tiuj konfuzitaj animoj; preĝu por ĉiuj suferantoj, ĉar la karitato ne limiĝas al la videbla homaro, sed ĝi devas helpi kaj konsoli la loĝantojn de la Spaco. Evidentan pruvon pri tio vi havis ĉe la subita konvertiĝo de tiu Spirito (*) tuŝita de la spiritismaj preĝoj ĉe la tombo de la honestulo, kiun vi venas demandi kaj kiu deziras igi vin progresi sur la bona vojo. La amo ne havas limojn; ĝi plenigas la Spacon kaj donas kaj ricevas reciproke siajn diajn konsolojn. Ankaŭ la maro, ŝajne renkontante kun la ĉielo, ĉe sia limo, etendiĝas en senfina perspektivo, kies spektaklo ravas la spiriton. Ili estas du vastaĵoj sin recipokre kuntuŝiĝantaj. Nu bone; tia estas la amo; pli profunda ol la ondoj, pli senfina ol la Spaco, ĝi devas unuigi vin ĉiujn, enkarniĝintajn kaj elkarniĝintajn, en la sankta komuneco de la karitato, sublima fandiĝo de la finhava kun la eterna."

*Georges*

## Jobard

Direktoro de la Industria Muzeo de Bruselo, naskita en Baissey (Supera Marno) kaj mortinta en Bruselo pro fulma apopleksio, la 27an de Oktobro 1861, aĝante sesdek naŭ jarojn.

---

(*) Aludo al la Spirito Bernard, kiu memvole manifestiĝis en la tago de la funebra ceremonio de S-ro Sanson. (Vd. **Revue de Majo** 18622, p. 132.)

I

S-ro Jobard estis prezidanto de la Spiritisma Societo de Parizo kaj oni aranĝis lian elvokon ĉe la kunsido en la 8-a de Novembro, kiam, anticipante nian deziron, li memvole donis la jenan komunikaĵon:

"Ĉi tie estas mi, kiun vi estas elvokontaj, manifestante min per ĉi tiu mediumo, al kiu ĝis nun mi vane petis. Antaŭ ĉio mi deziras priskribi miajn impresojn okaze de mia disiĝo: mi sentis ian nedireblan skuon; momente mi memoris pri mia naskiĝo, pri mia junaĝo, pri mia maljuneco; mia tuta vivo klare prezentiĝis en la memoro. Mi nur sentis kvazaŭ ian pian deziron troviĝi fine en la regionoj priskribitaj de nia kredo. Poste la tumulto sereniĝis: mi estis libera kaj mia korpo kuŝis inerta. Ha! Miaj karaj amikoj, kian plezuron oni spertas sen la pezo de la korpo! Kian ĝojon, ĉe la ampleksado de la Spaco! Tamen ne pensu, ke mi subite fariĝis ia elektito de la Sinjoro; ne, mi estas inter la Spiritoj, kiuj, lerninte iomete, ankoraŭ devas lerni multon! Post nelonge mi memoris pri vi, *fratoj de ekzilo*, kaj mi certigas al vi mian simpation, kaj ĉiuj miaj bondeziroj vin ĉirkaŭas.

Ĉu vi volas scii kiaj Spiritoj min akceptis? Kiaj estas miaj impresoj? Bone, amikoj, ili estis ja tiuj, kiujn ni elvokis, ĉiuj tiuj fratoj, kiuj partoprenis niajn laborojn. Mi vidis la brilegon, sed mi ne povas ĝin priskribi. Mi penis distingi tion, kio estis aŭtentika ĉe la komunikaĵoj, mi estis preta kontraŭdiri ĉion, kio estus erara, preta esti la vaganta kavaliro de la vero, en ĉi tiu mondo, tia, kia mi estis en la via."

*Jobard*

1. — Kiam vi estis sur la Tero, vi petis, ke ni elvoku vin, kaj tion ni nun faras ne nur por plenumi tiun deziron, sed ankaŭ por ankoraŭfoje atesti al vi nian sinceran simpation, samtempe nin instruante, ĉar neniu pli bone ol vi povas doni al ni precizajn klarigojn pri tiu mondo, kie vi hodiaŭ loĝas. Ni opinios nin feliĉaj se vi

konsentos respondi niajn demandojn. — R. Nun, kio plej gravas estas via instruado. Rilate al via simpatio, mi ĝin duonvidas kaj ĝian pruvon mi havigas al mi nur per tio, kion mi aŭdas, kio jam estas grandega progreso.

2. — Por fiksi ideojn kaj ne deturniĝi, ni komencas demandante en kiu loko vi troviĝas ĉi tie, kaj kiel ni vidus vin, se tio estus permesita al ni? — R. Mi troviĝas apud la mediumo, kun la eksteraĵo de la sama Jobard, kiu sidadis ĉe via tablo, ĉar viaj mortemaj okuloj, ankoraŭ vualitaj, ne kapablas vidi la Spiritojn, krom sub ilia mortema formo.

3. — Ĉu vi povos fariĝi videbla? En kontraŭa okazo, kia estas la malfacileco? — R. La stato vin koncernanta estas ja tute persona. Vidiva mediumo min vidos, kaj la ceteraj homoj ne.

4. — Ĉu via ĉi-tiea loko estas tiu sama, en kiu tiam vi ĉeestis enkarniĝinta niajn seancojn, kaj kiun ni rezervis al vi? Tiuj, kiuj vidis vin en tiaj kondiĉoj, eble pensos, ke vi tie estas tia, kia vi tiam estis, ĉar vi tie ne estas en via iama materia korpo, sed en via nuna fluideca korpo, kaj en la sama formo. Se ni ne vidas vin per la korpaj okuloj, ni vidas vin per la penso; se vi ne povas komunikiĝi per parolo, vi povos per skribo, helpe de mediumo; tiamaniere niaj interrilatoj neniel rompiĝis per via morto, kaj ni povas ilin teni tiel facile kaj komplete, kiel antaŭe. Ĉu estas ja precize tiamaniere, ke la aferoj okazas? — R. Jes, kaj vi scias tion jam de longe. Mi okupos ĉi tiun lokon plurfoje, kaj eĉ sen via scio, ĉar mia Spirito loĝos ĉe vi.

Ni turnas vian atenton al ĉi tiu frazo: *mia Spirito loĝos ĉe vi*, kiu ĉi-okaze ne estas ia simpla metaforo, sed realaĵo. Per la kono, kiun Spiritismo al ni donas pri la naturo de la Spiritoj, ni scias, ke iu ajn povas troviĝi ĉe ni ne nur en penso, sed ankaŭ *persone*, kun sia etereca korpo, kiu faras lin ia aparta individueco. Unu Spirito sekve povas loĝi ĉe ni tiel post la morto, kiel dum la vivo, aŭ alie pli bone

post la morto, ĉar li povas libere kaj memvole iri tien kaj reen. Tiel ni havas amason da nevideblaj kunmanĝantoj, iuj indiferentaj, aliaj allogitaj de korinklino. Al ĉi tiuj lastaj aplikiĝas ja tiu frazo: *Ili loĝas ĉe ni*, kion ni povas interpreti jene: *Ili nin helpas, inspiras kaj protektas*.

5. — Antaŭ nelonge vi enkarniĝinta sidadis en tiu sama loko. Ĉu la kondiĉoj, en kiuj vi tion faras nun, ŝajnas al vi strangaj? Kia estas la efiko de via statoŝanĝo? — R. Tiuj kondiĉoj neniel ŝajnas al mi strangaj, ĉar mia Spirito elkarniĝinta ĝuas klarvidon sufiĉe perfektan por ne lasi nesolvitaj iajn ajn demandojn, kiujn mi alfrontos.

6. — Ĉu vi memoras, ke vi jam troviĝis en sama stato antaŭ la lasta ekzistado? Ĉu vi spertas iun ajn ŝanĝon tiurilate, komparante vian nuntempan situacion kun la pasinta? — R. Mi memoras la antaŭajn ekzistadojn kaj sentas, ke mi pliboniĝis, ĉar mi identiĝas kun tio, kion mi vidas, dum konfuzita en la antaŭaj ekzistadoj, mi perceptis nur la surterajn erarojn.

7. — Ĉu vi memoras la antaŭlastan enkarniĝon, tiun, kiu antaŭis tiun de S-ro Jobard? — R. Ho! Mi bone memoras ĝin... Mi estis mekanikisto persekutita de la mizero kaj deziro plibonigi mian metion. *Kiel Jobard, mi efektivigis la revojn de la malriĉa laboristo*, kaj mi dankas Dion, kies senlima boneco igis ĝermi la planton, kies semo Li metis en mian cerbon.

8. — Ĉu vi jam komunikiĝis aliloke? — R. Mi malmulte komunikiĝis. En pluraj lokoj iu Spirito prenis mian nomon; kelkafoje mi estis apud li, tute ne povante komunikiĝi senpere. Tiel ĵusa estas mia morto, ke mi ankoraŭ suferas kelkajn surterajn influojn. Estas necese, ke estiĝu perfekta simpatio, por ke mi povu esprimi mian penson. Baldaŭ mi agos senkondiĉe, sed nun, mi ree diras, mi ne povas fari tion. Kiam iu homo mortas iom fama, li estas vokata el ĉiuj flankoj, kaj sennombraj Spiritoj rapidas alproprigi al si lian individuecon. Jen kio okazis

al mi en pluraj okazoj. Al vi mi asertas, ke tuj post sia disiĝo malmultaj Spiritoj povas komunikiĝi, eĉ pere de preferata mediumo.

9. — Ĉu vi vidas la Spiritojn, kiuj troviĝas ĉe ni? — R. Jes, precipe Lazaron kaj Eraston; kaj pli malproksime la *Spiriton de Vero* ŝvebantan en la Spaco; poste ankoraŭ amason da Spiritoj vin ĉirkaŭantaj, servemaj kaj bonvolaj. Estu feliĉaj, amikoj, ĉar bonefikaj influoj klopodas por forpreni vin el la ungegoj de eraro.

10. — Kiam vi estis enkarniĝinta vi konsentis pri tio, ke la Tero formiĝis per la unuiĝo de kvar planedoj: Ĉu vi ankoraŭ havas la saman opinion? — R. Ĝi estis eraro. Novaj geologiaj malkovroj pruvas la renversegojn de la Tero kaj ties gradan kaj iom-post-ioman formiĝon. La Tero, same kiel la ceteraj planedoj, havis sian propran vivon, kaj Dio ne bezonis uzi tiun grandan malordon, kiu estus la kuniĝo de planedoj. La akvo kaj la fajro estas la plej solaj organikaj elementoj de la Tero.

11. — Ĉu vi ankaŭ konsentis, ke la homoj povis fali en katalepsian staton por nedifinita tempo, kaj ke la homa genro tiel aperis sur la Tero? — R. Pura iluzio de mia menso, kiu ĉiam transpasis sian celon. La katalepsio povas esti longdaŭra, sed ne senfina: tradicioj, legendoj troigitaj de la orienta imagpovo. Miaj amikoj, mi de longe jam suferas multon pro la iluzioj, kiuj nutris mian Spiriton; ne trompiĝu pri tio. Mi multe lernis kaj hodiaŭ mi povas diri al vi, ke mia intelekto, kvankam kapabla asimili diversajn kaj vastajn studojn, tamen konservos el sia lasta enkarniĝo la inklinon por tio supernatura kaj mistika, kiun ĝi ĉerpis el la populara imagfonto. Ankoraŭ nun mi malmulte okupiĝas pri la demandoj pure intelektaj, en la senco, laŭ kiu vi ilin taksas. Kaj kiel mi povus tion fari, ravita kaj miregigita de la supernatura spektaklo min ĉirkaŭanta? Nur la Spiritisma ligilo, kiun vi homoj ne povas kompreni, povas logi min al tiu Tero, kiun mi forlasas — mi ne diros kun ĝojo, ĉar tio estus malpieco — sed kun la profunda sento de libereco.

Kiam la Societo estigis kotizaĵon favore al la laboristoj de Liono, en Februaro 1862, iu kunsocietano asignis 50 frankojn, 25 en sia nomo kaj 25 en la nomo de S-ro Jobard, kiu tiam donis la jenan komunikaĵon pri la afero:

"Mi ĝojegas kaj fieras pro tio, ke mi ne estas forgesita de miaj spiritistaj fratoj. Mi dankas la malavaran koron, kiu al vi alportis la obolon, kiun mi donus, se mi ankoraŭ loĝus en via mondo. En ĉi tiu mondo, kie mi nun loĝas, estas nula la bezono je mono, tiel ke al mi estis necese min turni al monujo de amiko por materie pruvi, ke ankaŭ min ĉagrenis la malfeliĉo de la gefratoj en Liono. Kuraĝaj kulturistoj de la vinberejo de la Sinjoro, vi multe devas konvinkiĝi ke karitato ne estas malplena vorto, ĉar riĉuloj kaj malriĉuloj elmontris al vi, en la krizaj okazoj, sentojn de simpatio kaj fratamo. Vi troviĝas sur la granda homama vojo al la progreso.

Nu bone, volu Dio, ke vi estu feliĉaj survoje, kaj la amikaj Spiritoj vin subtenu, por ke vi fine triumfu. Mi komencas vivi spirite pli trankvila, malpli konfuzita de la oftaj elvokoj, kiuj pluvadis sur min. La modo ankaŭ influas sur la Spiritojn, kaj kiam Jobard en modo eliĝos el modo, tiam li petos siajn seriozajn amikojn, ke ili lin elvoku.

Tiam ni pliprofundigos demandojn supraĵe traktitajn, kaj via Jobard, tute transfigurita, povos esti utila, kiel li tutkore deziras."

*Jobard*

Post la unuaj tempoj dediĉitaj al la reviglado de siaj amikoj, S-ro Jobard kuniĝis kun la Spiritoj aktive batalantaj por la socia renoviĝo, atendante ian novan surteran reenkarniĝon por partopreni, ankoraŭ pli aktive kaj senpere, tiun movadon. Post tiu tempo li donis al la Societo de Parizo, kie li kunlaboras plu, komunikaĵojn de nekontraŭdirebla supereco, ne sin deturnante de la originaleco kaj spritaĵoj konsistigantaj la fundon de lia karaktero, tiagrade ke li fariĝis rekonata antaŭ ol subskribi siajn komunikaĵojn.

## Samuel Philippe

Ĉi tiu estis bona homo laŭ la ampleksa senco de tiu vorto. Neniu memoris esti vidinta lin fari malbonan agon aŭ konscie erari pri io ajn. Dotita je ekstrema dediĉo al la amikoj, oni povis atendi lian afablecon, kiel certan, kiam temis pri iuj ajn komplezoj, eĉ se kontraŭaj al lia propra intereso.

Laboroj, laciĝoj, oferoj, nenio malebligis al li esti utila, kaj tio sen fanfaronado, kaj li miris, kiam pro tiaj kvalitoj oni atribuis al li grandan meriton. Li neniam malestimis tiujn, kiuj faris malbonon al li; male li rapidis servi al ili, kiel se ili faris similan bonon al li. Se temis pri sendankemuloj, li diradis: Ne min, sed ilin oni devas kompati. Kvankam tre inteligenta kaj dotita per natura vigleco, li havis sur la Tero vivon tre humila, laborplena kaj brodita per krudaj provaĵoj. Li povus esti komparata kun tiaj elitaj estaĵoj vivantaj en la ombro, pri kiuj la mondo ne parolas kaj kies brilo ne reflektiĝas sur la Tero. El la spiritisma kono li ĉerpis ian ardan fidon pri la estonta vivo kaj ian grandan rezignacion pri ĉiuj malbonoj de la surtera ekzistado. Fine li forpasis en Decembro 1862, en la aĝo de 50 jaroj, de kruelega malsano, kaj lia forpaso estis tre sentata de liaj familio kaj amikoj. Kelkajn monatojn post lia morto ni elvokis lin.

— Demando. Ĉu vi havas klaran rememoron pri la lastaj momentoj de via vivo sur la Tero? — R. Sendube, kvankam tiu rememoro iom post iom reaperas. En la ekzakta momento de la disiĝo estis konfuzaj miaj ideoj.

— D. Profite al nia instruiĝo kaj al la intereso, kiun vi meritas de ni pro via modela vivo, ĉu vi volas priskribi kiel okazis via transpaso de la korpa al la spirita vivo? — R. Volonte, des pli ĉar la priskribo ne estos utila nur al vi, sed ankaŭ al mi mem, pro tio, ke, direktante mian penson al la Tero, la komparo igos min pli bone taksi la bonecon de la Kreinto. Vi scias kiom da turmentoj mi suferis en la vivo: neniam tamen mankis al mi kuraĝo en malfeliĉo, dank'al Dio! Kaj hodiaŭ mi gratulas min! Kaj mi ankoraŭ tremas, kiam mi pensas, ke ĉio, kion mi suferis, nuliĝus, se mi senfortiĝus, kaj mi devus komenci denove la provadon! Ho! Miaj amikoj, konsciiĝu firme pri

tiu veraĵo, ĉar en ĝi kuŝas la feliĉo de via estonteco. Aĉeti tiun feliĉon per kelkaj jaroj da sufero ne estas tre kare! Ha! Se vi scius, kio estas kelkaj jaroj, kompare kun la senfino! Se fakte mia lasta ekzistado havis ian indecon antaŭ viaj okuloj, la samon vi ne dirus pri tiuj, kiuj ĝin antaŭis. Kaj estis ja nur per laboro super mi mem, ke mi fariĝis tia, kia mi estas nun. Por elviŝi la lastajn postsignojn de la antaŭaj pekoj mi bezonis suferi la lastajn provojn, kiujn mi volonte akceptis. Estis ja sur la firmeco de miaj decidoj, ke mi apogis la rezignacion, por ke mi suferu sen plendo. Hodiaŭ mi benas tiujn provojn, ĉar al ili mi ŝuldas mian rompon kun la pasinteco — nun simpla rememoro, ebliganta rigardadi min kun justa ĝojo la iritan vojon.

"Ho vi, kiuj igis min suferi sur la Tero; vi, kiuj estis al mi kruelaj kaj malbonvolemaj, kiuj min humiligis kaj afliktis; vi, kies malico tiom da fojoj kaŭzis al mi seniĝojn — mi ne nur vin pardonas, sed ankaŭ eĉ vin dankas. Intencante fari malbonon, vi ne suspektis pri la profito, kiun tiu malbono havigis al mi. Sed estas vero, ke al vi mi ŝuldas grandan parton de la feliĉo, kiun mi ĝuas, tial ke vi ebligis al mi okazon por pardoni kaj pagi malbonon per bono. Dio metis vin sur mian vojon por kontroli mian paciencon, ankaŭ ekzercante min ĉe la praktikado de la plej malfacila karitato: *ami la malamikojn*.

Ne senpacienciĝu pro tiu temodekliniĝo, ĉar mi respondos nun vian demandon. Kvankam mi terure suferis pro la malsano min atakinta, mi tamen preskaŭ ne agoniis: la morto venis al mi kvazaŭ dormo, sen luktoj kaj skuoj. Sen timo pri la estonteco, mi ne alkroĉiĝis al la vivo, kaj sekve mi ne devis barakti en la lastaj momentoj. La disiĝo kompletiĝis sen doloro kaj peno, kaj mi eĉ ne rimarkis tion. Mi ne scias, kiel longe daŭris la dormo, kiu cetere estis mallonga. Mia trankvila vekiĝo kontrastis kun mia antaŭa stato: mi ne plu sentis dolorojn kaj ĝojegis; mi volis ekstari, paŝi, sed ia sensenteco neniel malagrabla, sed plezuriga, min katenis, kaj mi forlasis min al ĝi plezurege, ne komprenante mian situa-

cion, kvankam mi ne dubis, ke mi jam forlasis la Teron. Ĉirkaŭ mi, ĉio estis kvazaŭ ia sonĝo. Mi vidis mian edzinon kaj kelkajn amikojn surgenuiĝintaj en mia ĉambro, plorantaj, kaj mi supozis, ke ili min opinias mortinta. Tiam mi volis seniluziigi ilin je tiu ideo, sem mi ne kapablis eldiri eĉ unu vorton, kaj el tio mi konkludis, ke mi sonĝas. La fakto, ke mi vidis min ĉirkaŭata de personoj karaj, jam de longe mortintaj, kaj ankoraŭ de aliaj kiujn mi ĉe la unua rigardo ne povis rekoni, firmigis mian penson pri sonĝo, en kiu tiaj estuloj min prigardis.

En tiu stato alternis momentoj da klarvido kaj dormemo, dum kiuj mi rehavigadis kaj perdadis la konscion pri mia "memo".

Iom post iom miaj ideoj fariĝis pli klaraj, la lumo, kiun mi vidis tra densa nebulego, ekbrilis; kaj mi komencis min kompreni, min rekoni, komprenante kaj rekonante, ke mi ne plu apartenas al tiu mondo. Se mi ne konus Spiritismon, certe tiu iluzio daŭrus pli longan tempon. Mia materia envolvaĵo ankoraŭ ne estis enterigita kaj mi ĝin rigardis kompate, gratulante min pro la disiĝo, pro la liberiĝo. Kaj mi ja estis tiel feliĉa pro tio, ke mi senembarasiĝis! Libere mi spiradis, kiel tiu eliranta el naŭza atmosfero; nedirebla sensaco de bonfarto penetris en mian tutan estaĵon, la ĉeesto de miaj amikoj ĝojigis min, ne surprizante min, prefere ŝajnante natura, kvazaŭ mi ilin renkontus post longa vojaĝo. Io tuj mirigis min: nia interkompreniĝo sen eldiro de eĉ unu vorto! Niajn pensojn ni sendis per la rigardo, kvazaŭ per fluideca penetro.

Mi tamen ne estis tute libera de la surteraj zorgoj, kaj, kvazaŭ por pli reliefigi la novan situacion, mi iam kaj iam memoris tion, kion mi suferis.

Mi suferis korpe kaj morale, precipe morale, ĉar mi estis celo de malbondiremo, de tiuj senfinaj priokupiĝoj eble pli akraj ol la realaj malfeliĉoj, kiam ili degeneras en eternan afliktiĝon.

Kaj tiaj impresoj ankoraŭ ne estis plene foriĝintaj, kaj jen mi demandis min mem, ĉu mi fakte liberiĝis de

ili, kaj mi ankoraŭ kvazaŭ aŭdis kelkajn malagrablajn voĉojn. Rekonsiderante la malfacilaĵojn, kiuj tiel ofte min turmentadis, mi tremis; mi kloplodis, por tiel diri, min rekoni kaj certigi al mi, ke ĉio tio estis nenio alia ol fantazia sonĝo. Kaj kiam mi venis al konkludo, al la realeco de tiu nova situacio, tiam mi sentis min liberiĝinta de grandega pezo.

Estas ja tute vere, mi diradis, ke mi estas libera de tiuj zorgoj turmentantaj la vivo! Dank' al Dio! Ankaŭ malriĉulo subite riĉiĝinta dubas pri la realeco de sia riĉaĵo kaj nutras dum kelka tempo la maltrankvilojn de malriĉeco. Tia mi estis.

Ho! se la homoj povus kompreni la estontan vivon — kian forton, kian kuraĝon tia kompreno ja donus al ili en malfeliĉo!

Kiuj homoj sur la Tero ĉesus serĉi kaj certigi al si la feliĉon, kiun Dio rezervas al siaj dolĉaj, humilaj infanoj? Plezuroj ambiciitaj, enviitaj fariĝus sensignifaj, rilate al tiuj, kiujn ili malŝatas!"

— D. Ĉu tiu mondo tiel nova, kompare kun kiu la nia nenion valoras, kaj la sennombraj amikoj, kiujn vi en ĝi renkontis, igis vin forgesi viajn familion kaj amikojn enkarniĝintajn?

— R. Se mi ilin estus forgesinta, mi estus neinda je la feliĉo, kiun mi ĝuas. Egoismon Dio ne rekompencas, sed punas.

"La mondo, kiun mi vidas, povas igi min malestimi la Teron, sed ne la Spiritojn sur ĝi enkarniĝintajn. Nur inter la homoj la prospero igas forgesi la kunulojn en malfeliĉo. Plurfoje mi venas viziti tiujn, kiuj estas karaj al mi, ĝojegante pro la rememoro, kiun ili gardas pri mi; mi ĉeestas iliajn amuzaĵojn kaj, altirita de iliaj pensoj, mi plezuras, se ili plezuras, kaj mi suferas, se ili suferas.

Sed mia sufero estas relativa kaj ne povas esti komparata kun la homa sufero, ĉar mi komprenas la celon, la neceson kaj la paseman karakteron de la provoj. Cetere tiu sufero estas mildigita de la konvinkiĝo pri tio, ke tiuj de mi amataj ankaŭ venos al tiu feliĉa loĝejo, kie

ne ekzistas doloro. Por fari ilin indaj je ĝi, je tiu loĝejo, mi klopodos inspiri al ili bonajn pensojn kaj antaŭ ĉio rezignacion, kiun mi havis, laŭ la volo de Dio. Mia afliktiĝo kreskas, kiam mi vidas ilin prokrasti la alvenon pro manko de kuraĝo, pro murmuroj, hezitoj kaj precipe pro iu ajn riproĉinda ago. Tiam mi penas deturni ilin de la malbona vojo, kaj se tio al mi prosperas, ĝi estas feliĉo ne nur por mi, sed ankaŭ por aliaj Spiritoj; kiam male la interveno estas senprofita, mi ĉagrenite ekkrias: Plia momento da prokrasto; sed min konsolas la penso, ke nenio senrevene perdiĝas."

*Samuel Philippe*

## Van Durst

Malnova funkciulo mortinta en Antverpeno, en 1863,
en la aĝo de okdek jaroj.

Nelonge post lia morto, al demando farita de mediumo al lia gvidanto, ĉu oni povus lin elvoki, oni respondis: "Tiu Spirito malrapide reboniĝas el sia konfuziteco, kaj, kvankam li povas tuj respondi al vi, tia komuniko tamen kostus al li multan ĉagrenon. Mi petas, ke vi atendu ankoraŭ ĉirkaŭ kvar tagojn, ĉar ĝis tiam li sciiĝos pri la bonaj intencoj manifestitaj pri li, kaj li amike kaj dankeme respondos al ili."

Post kvar tagoj ni ricevis la jenan komunikaĵon:

"Mia amiko, la ŝarĝo de mia ekzistado estis tre malpeza laŭ la pesilo de la eterneco, kaj tamen mi tute ne sentas min tre feliĉa. Mia humila kaj relative feliĉa kondiĉo estas propra al tiu, kiu ne agis malbone, ne celante per tio perfektiĝon. Kaj se povas ekzisti feliĉaj homoj en limigita sfero, mi apartenas al ties nombro. Kion mi beadŭras estas ja tio, ke mi ne konis tion, kion nun vi konas, alie mia konfuziĝo ne tiel longe daŭrus, kaj ĝi estus malpli dolora.

Fakte ĝi estis granda; vivi kaj ne vivi, esti krude katenita al la korpo, ne povante uzi ĝin, vidi tiujn, kiuj estis karaj al ni, sentante estingiĝi la penson, kiu nin

katenas al ili, ho! Kia teruraĵo! Kia kruela momento, en kiu duonsveno nin ekkaptas kaj konfuzas, por tuj poste neniiĝi en mallumon! Ĉion senti, por neniiĝi post momento! Oni volas havi konscion pri sia memo, kaj ne trovas ĝin; ne ekzisti, kaj senti, ke oni ekzistas!

Profunda konfuziteco! Post nekalkulebla tempo da retenitaj angoroj, sen fortoj por ilin senti; post tiu tempo, mi diras, kvazaŭ senfina — jen venas la iom-post-ioma renaskiĝo de la vivo, la vekiĝo de ia nova aŭroro en alia mondo! Nenia materia korpo, nenia surtera vivo! Vivo ja, sed senmorta! Ne plu karnaj homoj, sed diafanaj formoj. Spiritoj glitantaj, aperantaj el ĉiuj flankoj, vin ĉirkaŭantaj kaj kiujn vi ne povas ĉirkaŭpreni per la rigardo, ĉar ili flosas en la senfino! Havi antaŭ si la Spacon kaj povi ĝin libere traflugi laŭplaĉe! Komunikiĝi per penso kun ĉio ĉirkaŭanta! Kia nova vivo, mia amiko, nova, brila kaj plena de feliĉo! Saluton, ho! saluton eterneco enhavanta min en cia sino!... Adiaŭ, Tero, kiu tiel longe min detenis apartigitan de la natura elemento de mia animo! Ne... mi tute ne dependis plu de ci, ĉar ci estas la lando de ekzilo, kaj la plej granda feliĉo, kiun ci disdonas, nenion valoras! Se mi scius tion, kion vi scias, kiom facila kaj agrabla estus al mi la inico en la spiritan vivon! Jes, ĉar antaŭ ol morti mi scius tion, kion nur pli malfrue mi devus scii, en la momento de la disiĝo, tiamaniere, ke mi facile malligiĝus. Vi estas survoje, sed certigu vin, ke ĉia progreso estas malmulte. Diru tion al mia filo tiom da fojoj, kiom sufiĉaj, por ke li instruiĝu kaj kredu, ĉar kontraŭe nia apartiĝo daŭros plu ĉi tie.

Adiaŭ, amikoj; mi vin atendas, kaj, dum vi estos sur la Tero, mi plurfoje venos lerni el vi, ĉar mi scias malpli ol multaj el vi. Notu, ke ĉi tie, kie mi troviĝas, sen maljuneco min malfortikiganta kaj ĉiaspecaj embarasoj, mi lernos pli rapide kaj facile. Ĉi tie oni vivas malkaŝe, kuraĝe irante, havante antaŭ la okuloj horizontojn tiel belajn, ke oni senpacienciĝas por ilin ĉirkaŭpreni. Adiaŭ, mi lasas vin, adiaŭ."

*Van Durst*

## Sixdeniers

Bona homo mortinta pro akcidento kaj konata al la mediumo, kiam li estis enkarniĝinta.

(Bordeaux, la 11an de Februaro 1861)

— D. Ĉu vi povas liveri al ni kelkajn detalojn pri via morto? — R. Post la drono, Jes.

— D. Kial ne antaŭ ol ĝi? — Ĉar vi jam ilin konas. (Efektive la mediumo jam ilin konis.)

— D. Ĉu vi bonvolos do priskribi viajn postmortajn sensacojn? — R. Mi restis longan tempon nekapabla rekoni min, sed dank' al Dio kaj al helpoj de la homoj min ĉirkaŭantaj, kiam fariĝis lumo, ĝi inundis min. Konfidu, kaj vi ĉiam trovos pli multe ol vi atendas. Ĉi tie ekzistas nenio materia: ĉio tuŝas la kaŝitajn sentumojn, sen helpo de vido kaj palpo: ĉu vi komprenas? Estas mirindaĵo, kaj ne estas vorto por ĝin klarigi. Nur la animo povas ĝin percepti. Tre feliĉa estis mia vekiĝo. La vivo estas unu el tiuj sonĝoj, kiuj, malgraŭ la kruda ideo atribuata al tiu vorto, povas esti kvalifikitaj nur kiel terura premsonĝo. Prezentu al vi, ke vi estas enfermita en haladza karcero, kie via korpo, detruita de vermoj ĝis la ostomedoloj, pendas super arda fornego, ke via seka buŝo trovas eĉ ne aeron por ĝin refreŝigi; ke via terurita Spirito vidas ĉirkaŭ si nur monstrojn pretajn ĝin vori; fine prezentu al vi ĉion teruriga kaj abomenindan, kion fantazia sonĝo povas naski, kaj poste vin transportu subite al la tre plezuriga Edeno. Vekiĝu ĉirkaŭita de ĉiuj, kiujn vi amis kaj priploris; vidu, vin ĉirkaŭantajn, amatajn vizaĝojn ridantajn de feliĉo; enspiru la plej mildajn parfumojn; mildigu vian sekiĝintan gorĝon ĉe la fonto de viva akvo; sentu vian korpon ŝvebanta en la senfina Spaco, kiu subtenas kaj balancas ĝin kvazaŭa floro malligiĝanta el frondo ĉe zefira blovado; opiniu vin envolvita en la amo de Dio, simile al ĵusnaskitoj en la patrina amo, kaj tiam vi havos ideon, cetere nur malperfektan, de tiu transiĝo. Mi penis klarigi al vi la feliĉon

en la vivo atendanta la homon post la korpa morto, sed mi ne sukcesis. Ĉu estus eble ekspliki la senfinon al tiu, kiu havas la okulojn fermitajn al la lumo, kaj kiu ne povas eliri el la mallarĝa sfero lin enhavanta? Por klarigi al vi la eternan feliĉon, al vi mi diros nur tion: amu, ĉar nur la amo ebligas ĝin antaŭsenti, kaj kiu diras amon, tiu diras maleston de egoismo.

— D. Ĉu via pozicio estis feliĉa, ekde la momento, kiam vi eniris en la mondon de la Spiritoj? — R. Ne; mi devis pagi la homan ŝuldon. Mia koro antaŭsentis la estontecon de la Spirito, sed al mi mankis fido. Mi devis elpagi mian indiferentecon kontraŭ la Kreinto, sed lia favorkoreco konsideris la sensignifan bonon, kiun mi povis fari, la dolorojn, kiujn, malgraŭ la suferoj, mi rezignacie elportis, kaj lia justeco, kies pesilon la homoj neniam komprenos, tiel volonte kaj ame pesis la bonon, ke la malbono rapide estingiĝis.

– D. Ĉu vi povas doni al mi informojn pri via filino? (mortinta antaŭ kvar aŭ kvin jaroj) — R. Ŝi troviĝas en misio tie sur la Tero.

— D. Ĉu ŝi estas malfeliĉa en la karno? Notu, ke mi ne volas fari nediskretajn demandojn. — R. Mi scias. Alie mi ne vidus vian penson, kiel ian pentraĵon antaŭ miaj okuloj. En la karno mia filino ne estas feliĉa, sed kontraŭe ŝi devas provi ĉiujn surterajn mizerojn, disvastigante per ekzemplo la grandajn virtojn, pri kiuj vi faras nur tondrajn vortojn. Mi tamen helpos ŝin, kun la certeco, ke al ŝi ne estos peniga la venko super la obstakloj, ĉar ŝi estas sur la Tero *en misio, kaj ne en puna elpago*. Trankviliĝu pri ŝi, kaj dankon por via rememoro.

En tiu momento, spertante malfacilaĵon en la skribado, la mediumo diras: Se estas Spirito suferanta, kiu malebligas el mi tion, mi petas, ke li skribu sian nomon. — R. Iu kompatindulino.

— D. Bonvolu diri al mi vian nomon. — R. Valeria.

— D. Ĉu vi povas diri al mi la kaŭzon de via sufero? — R. Ne.

— D. Ĉu vi pentas pri viaj eraroj? — R. Vi mem povas juĝi.

— D. Kiu kondukis vin ĉi tien? — R. Sixdeniers.

— D. Por kia celo? — R. Ke vi nin helpu.

— D. Ĉu estis vi, kiu antaŭ nelonge malebligis min skribi? — R. Sixdeniers metis min en sian lokon.

— D. Kio estas inter vi kaj li? — R. Li min gvidas.

— D. Petu lin akompani nin ĉe la preĝo. (Post la preĝo, Sixdeniers reprenas la parolon, dirante: — Dankon por ŝi. Vi jam komprenis; ni ne forgesos vin; pensu pri ŝi.)

— D. (Al Sixdeniers.) Ĉu vi havas multajn suferantajn Spiritojn por gvidi? — R. Ne; sed, regenerinte iun, ni devas tuj serĉi alian, kaj tiel plu, ne forlasante la unuajn.

— D. Kiel vi povas teni ian viglan atenton, kiu devas senfine multobliĝi tra la jarcentoj? — R. Tiuj, kiujn ni regeneras, puriĝas kaj progresas, ne plu priokupante nin; krome ankaŭ ni progresas, kaj, laŭmezure kiel ni progresas, plivastiĝas niaj kapabloj kaj povoj, rekte proporcie al nia pureco.

RIMARKO. Laŭ nia observo, la malsuperaj Spiritoj estas helpataj de bonaj Spiritoj kun la misio ilin gvidi, tasko ne ekskluzive komisiita al enkarniĝintoj, kiuj tamen ne estas sen la devo helpi, ĉar ankaŭ tio estas por ili rimedo por progreso. Ne ĉiam malsupera Spirito venas bonintence interrompi bonajn komunikaĵojn, sed sendube ili kelkafoje tion faras, kiel en la nuna okazo, kun la permeso de la bonaj Spiritoj, ĉu kiel provo, ĉu kun la intenco havigi al si, el tiu, al kiu li sin direktas, la helpon necesan por sia progreso. Estas fakto, ke la persistemo en tiaj okazoj povas degeneriĝi en obsedon, sed ju pli granda estas la persistemo, des pli multe ĝi pruvos la bezonon de helpo. Estas eraro kaj malbono forpuŝi tiajn Spiritojn, kiujn ni devas rigardi kiel almozpetantojn. Prefere ni diru: Li estas malfeliĉa Spirito, kiun la bonaj sendas al mi por eduki. Sukcesinte lin regeneri, al ni restos la tuta ĝojo naskiĝanta de bona faro, kaj neniu faro estas pli bona ol tiu konsistanta en la regenerado de animo por malpliigi ĝiajn suferojn. Plurfoje tiu tasko est-

as peniga, kaj sendube estus pli bone senĉese ricevi belajn komunikaĵojn, konversacii kun elektitaj Spiritoj; sed ne estas per kontentigo de niaj propraj deziroj nek per forpuŝo de la okazoj al ni sin prezentantaj por bonfari, ke ni altiros la protekton de la bonaj Spiritoj.

## Doktoro Demeure

Mortinta en Albi (Tarn) la 25an de Januaro 1865.

Li estis tre eminenta homeopatia kuracisto. Lia karaktero, same kiel lia klereco, altiris al li la estimon kaj respekton de liaj samurbanoj. Liaj bonkoreco kaj karitemo estis neelĉerpeblaj, kaj, malgraŭ sia granda aĝo, li tute ne laciĝis, kiam li iris viziti malriĉajn malsanulojn. La prezo de la vizitoj plej malmulte lin priokupis, kaj li prefere oferis siajn komfortojn al malriĉulo, dirante, ke ĉe lia manko la riĉuloj povus iri al alia kuracisto. Kaj kiom da fojoj li provizis senmonan malsanulon per materialaj bezonaĵoj, kiam ĉi tiuj estis pli utilaj ol la propra medikamento. Pri li oni povas diri, ke li estas la Curé d'Ars de la Medicino. Trovante en Spiritismo la ŝlosilon de problemoj, kies solvon li vane petis de la Scienco, same kiel de ĉiuj filozofioj, D-ro Demeure arde sin dediĉis al tiu doktrino. Per la profundeco de sia serĉema spirito li subite komprenis ĝian tutan objekton, tiel ke li fariĝis unu el ĝiaj plej diligentaj predikantoj.

Per korespondado, rilatoj de reciproka kaj viva simpatio estiĝis inter ni. La 30an de Januaro ni sciiĝis pri lia forpaso, kaj nia tuja deziro estis lin elvoki. Ni prezentas ĉi-sube la komunikaĵon ricevitan en tiu sama tago:

"Jen mi estas ĉi tie. Ankoraŭ vivanta, mi prenis sur min la kompromison manifestiĝi, kondiĉe se tio estos ebla al mi, por premi la manon al mia kara majstro kaj amiko Allan Kardec.

La morto donis al mia animo tiun pezan dormon, kiun oni nomas letargio, sed mia penso viglis. Mi forskuis la mortan sensentecon el la konfuziteco rezultanta de la morto, ekstariĝis kaj per salto mi faris la vojaĝon. Kiel mi estas feliĉa! Ne plu maljuna kaj malsana. La korpo estis nur masko. Juna kaj bela, el tiu eterne gaja beleco

de la Spiritoj, kies haroj ne blankiĝas sub la influo de la tempo.

Lerta kiel birdo rapide trafluganta la horizontojn de via nebula ĉielo, mi admiras, rigardadas, benas, amas kaj riverencas, mi estanta atomo, antaŭ la grandeco kaj saĝo de la Kreinto, konsistigantaj el la mirindaĵoj min ĉirkaŭantaj. Feliĉa! feliĉa en la gloro! Ho! kiu povos priskribi la brilegan belecon de la loĝejo de la elektitoj; la ĉielojn, la mondojn, la sunojn kaj ilian kunlaboron en la harmonio de la Universo? Nu, mi provos fari tion, ho mia majstro; mi lernos kaj alportos al vi la rezultaton de miaj laboroj de Spirito, kaj kiun anticipe mi dediĉas al vi, kiel omaĝon. Ĝis baldaŭ."

*Demeure*

La du sekvantaj komunikaĵoj, ricevitaj la 1-an kaj 2-an de Februaro, koncernas la malsanon, kiun tiam mi suferis. Malgraŭ ilia persona karaktero, mi ilin publikigas, kiel pruvojn, ke D-ro Demeure kiel Spirito montriĝis tiel bona, kiel li estis, kiel homo.

"Mia bona amiko, kuraĝu kaj konfidu je ni, ĉar tiu krizo, kvankam laciga kaj dolora, ne estos longdaŭra, kaj, per la preskribitaj konsiloj, vi povos laŭ via deziro kompletigi la verkon, kiun vi proponis al vi, kiel celon de via ekzistado. Estas mi, kiu troviĝas ĉi tie, apud vi, kaj kun la *Spirito de Vero*, kiu permesas al mi paroli en lia nomo, ĉar mi estas el viaj amikoj la plej laste elkarniĝinta. Tio estas kvazaŭ oni farus al mi la honoron de akceptado. Kara majstro, kiel feliĉa mi sentas min pro tio, ke mi elkarniĝis ĝustatempe por kuniĝi al tiuj amikoj, en ĉi tiu momento! Se liberiĝinta pli frue, mi eble povus evitigi al vi tiun ne antaŭviditan krizon. Mia disiĝo estis tre ĵusa, por ke mi okupiĝu pri aferoj aliaj ol la spiritaj; sed nun mi vigle protektos vin, kara majstro. Kiel Spirito, mi estas feliĉa ĉi tie, apud vi, por servi al vi. Vi konas la proverbon: "helpu vin, la ĉielo vin helpos". Nu, obeante iliajn ordonojn, helpu la bonajn Spiritojn, kiuj vin

asistas. Ĉi tie estas tre varme, ĉi tiu fumo estas ekscitanta. Dum vi estas malsana konvenas ne fari fajron, por ke via angoro ne pliiĝu. La gasoj tie eliĝantaj estas malsanigaj. Via amiko.

*Demeure*

"Mi estas Demeure, la amiko de S-ro Kardec. Mi venas diri al li, ke mi lin akompanadis, kiam okazis al li la akcidento. Sendube ĉi tiu estus fatala sen la efika interveno, kiun mi fieras esti partopreninta. Laŭ miaj observoj kaj laŭ la sciiĝoj ĉerpitaj ĉe bonaj fontoj, estas evidente por mi, ke ju pli frue li elkarniĝos, des pli baldaŭ li reenkarniĝos por kompletigi sian verkon. Sed, antaŭ ol foriri, estas necese fari la lastajn korektojn al la komplementaj verkoj pri la doktrina teorio, kies iniciatinto li estas. Se tamen pro eksceso de laboro, ne atentante la malperfektecon de sia organismo, li anticipos sian foriron ĉi tien, li estos puninda pro memvola sinmortigo. Estas necese diri al li la tutan veron, por ke li sin preparu kaj strike observu niajn preskribojn."

*Demeure*

La sekvanta komunikaĵo estas ricevita en Montauban, la 26an de Januaro, post la tago de lia elkarniĝo, ĉe Grupo de spiritistaj amikoj, ekzistinta en tiu urbo.

"Antoine Demeure. Mi ne mortis por vi, miaj amikoj, sed por tiuj, kiuj ne konas la sanktan doktrinon unuigantan tiujn, kiuj sur la Tero sin amis kaj havis la samajn sentojn de amo kaj karitato. Mi estas feliĉa kaj pli feliĉa ol mi esperis, ĝuante ian klarvidecon malofta ĉe la Spiritoj, rilate la tempon post mia elkarniĝo.

Provizu vin per kuraĝo, bonaj amikoj, ĉar mi plurfoje estos apud vi, instruante vin pri multaj aferoj, kiujn ni ne scias, kiam katenitaj al la materio, dika vualo por tiom da mirindaĵoj, por tiom da plezuroj. Preĝu por tiuj, kiuj estas senigitaj je tiu feliĉo, ĉar ili ne scias la malbonon, kiun ili faras al si mem.

Hodiaŭ mi ne multe parolos, kaj mi nur diros al vi, ke mi ne sentas min tute fremda en ĉi tiu mondo de la nevideblaj, kaj eĉ ŝajnas al mi, ke mi ĉiam loĝis en ĝi. Ĉi tie mi estas feliĉa, vidante miajn amikojn, komunikiĝante kun ili ĉiam, kiam mi tion deziras.

Ne ploru, miaj amikoj, ĉar tiam vi igus min bedaŭri, ke mi konatiĝis kun vi. Lasu la tempon fluadi, kaj Dio gvidos vin al ĉi tiu loĝejo, kie ni ĉiuj fine devos unuiĝi. Bonan nokton, amikoj; Dio vin konsolu, kaj mi restas apud vi."

*Demeure*

Mi ankoraŭ transskribas la jenan rakonton el unu letero de Montauban:

"Pro ŝia ekstrema sentemo, ni kaŝis al S-ino G... — somnambula kaj tre klare vidiva mediumino – la morton de D-ro Demeure. Sendube obeante nian intencon, la bonkora kuracisto ankaŭ evitis manifestiĝi al ŝi. La 10an de Februaro, ni kunvenis invitite de la gvidantoj, kiuj diris, ke ili deziras liberigi S-ino G... de ia luksacio, de kiu ŝi multe suferadis ekde la antaŭtago. Nenion pli ni sciis kaj eĉ ne suspektis pri la surprizo nin atendanta. Tuj post kiam tiu sinjorino estiĝis en trancon, ŝi komencis eligi korŝirajn kriojn, montrante al sia piedo. Jen kio okazis: S-ino G... vidis iun Spiriton kliniĝintan ĉe ŝiaj piedoj, kun kaŝita vizaĝo, farante al ŝi ŝmiradon kaj masaĝon, iafoje laŭlonge tirante la elartikigitan parton, ĝuste kiel faras ĉiu ajn kuracisto. La operacio estis tiel doloriga, ke la pacientino kolerkriegis, farante senordajn movojn.

Sed la krizo ne estis longdaŭra, kaj post ĉirkaŭ dek minutoj malaperis la inflamo kaj la postsignoj de la elartikigo, kaj la piedo reprenis sian normalan aspekton. S-ino G... estis resanigita! La Spirito daŭris plu nekonata al la mediumino, kaj persistis plu ne malkaŝante al ŝi siajn trajtojn, kiam, pro lia manifestita deziro foriri, la malsanulino, kiu momenton antaŭe ne farus unu paŝon,

sin ĵetas per salto en la mezon de la ĉambro por premi la manon al sia spirita kuracisto. Ankoraŭ tiun fojon la Spirito deturnis la vizaĝon, lasante sian manon en tiu de la mediumino. En tiu momento S-ino G... ekkrias kaj svene falas sur la plankon, ĉar ŝi tuj rekonis D-ron Demeure en la Spirito, kiu ŝin operaciis. Dum la sveno ŝi estis zorgata de pluraj amikaj Spiritoj.

Fine reaperis la somnambula klarvideco kaj ŝi konversaciis kun multaj el tiuj Spiritoj, reciproke sin gratulante, precipe D-ron Demeure, kiu reciprokis al ŝi la atestojn de amikeco, en ŝin penetrigante regenerajn fluidaĵojn.

Konsiderante, ke la Spiritoj kvazaŭ ludas rolojn de la homa vivo, ĉu ne estas surprize drama tiu sceno? Ĉu ĝi ne estas nur unu el inter mil aliaj pruvoj, ke la Spiritoj estas efektive realaj estaĵoj, agantaj kiel se ili troviĝus sur la Tero? Ni estas feliĉaj pro tio, ke ni vidas, en la amika Spirito, la saman bonan koron de la komplezema kaj abnegacia kuracisto, kiu li estis en ĉi tiu mondo. Dum la vivo li estis kuracisto de la mediumino, kaj, konante ŝian ekstreman sentemecon, li ŝparis suferon al ŝi tiom, kiom se ŝi estus lia infano mem. Tiu pruvo de identeco, donita al tiuj, kiujn la Spirito estimis, estas mirinda, kaj igis nin rigardi la estontan vivon el pli konsola vidpunkto.”

RIMARKO. La spirita situacio de D-ro Demeure estas ĝuste tiu, kiun oni povis antaŭvidi en lia vivo tiel digna, kiel utile uzita. Sed el tiuj komunikoj ankoraŭ rezultas alia fakto ne malpli instrua – tiu de la aktiveco, kiun li uzas ekde preskaŭ tuj post la morto, celante fariĝi komplezema. Pro siaj alta inteligento kaj moralaj kvalitoj, li apartenas al la klaso de la tre progresintaj Spiritoj. Sed lia feliĉo ne konsistas en neniofarado. Ankoraŭ antaŭ kelkaj tagoj li kuracis malsanulojn kiel kuracisto, kaj apenaŭ li disiĝas de la materio, jen li ilin kuracas kiel Spirito. Iuj personoj diros, ke oni tute ne pliboniĝas per la restado en la alia mondo, ĉar tie oni ne ĝuas ripozon. Ĝi estas la okazo demandi al ili, ĉu estas nenio la fakto, ke ni ne plu havas zorgojn, bezonojn, malsanojn; ke ni povas libere senlace traflugi la

Spacon kun la rapideco de la penso, vidi tiujn, kiuj al ni estas ĉiam karaj, ĉiumomente, kiel ajn malproksime de ni ili estas! Kaj ni aldonos: En la alia mondo nenio perfortos vian volon; vi povus restadi en ekstaza neniofarado, kiel longe ĝi plaĉus al vi, sed estu certaj, ke tiu egoisma ripozo vin tuj ĝenos, kaj vi estus el tiuj, kiuj la unuaj petus iun ajn okupiĝon. Tiam oni dirus al vi, ke, se la neniofarado vin ĝenas, vi mem devus peni fari ion, ĉar ne mankas okazoj esti utilaj, ĉu en la mondo de la Spiritoj, ĉu en tiu de la homoj. Kaj estas ja tiel, ke la spirita aktiveco ĉesas esti devo, por fariĝi ia bezono, ia plezuro rilata al la tendencoj kaj inklinoj, kaj estas elektataj prefere la okupoj pli favoraj al la progreso de ĉiu homo.

## Vidvino Foulon naskita en Wollis

S-ino Foulon, mortinta en Antibes la 3an de Februaro 1865, loĝis longan tempon en Havre, kie ŝi akiris la reputacion de tre lerta miniaturistino. Dotita per notinda talento, ŝi unue uzis ĝin, kiel simpla diletantino, sed kiam venis al ŝi bezonoj, ŝi faris el sia arto profitodonan fonton de enspezo. Kio plej multe faris ŝin admirata kaj estimata, poste inspirante al tiuj, kiuj ŝin konis, agrablan rememoron pri ŝi, tio estis antaŭ ĉio la mildeco de ŝia karaktero, ŝiaj personaj kvalitoj, kiujn nur la intimuloj povis tute koni. Kiel ĉiuj denaske havantaj la senton pri bono, ŝi ne fanfaronadis pri ĝi, kontraŭe opiniis ĝin ia natura kvalito. Se ekzistis persono sur kiun la egoismo ne influis, tiu sen ia dubo estis ŝi. Eble neniam la sento de persona abnegacio estis tiel forta, ĉar ŝi estis ĉiam preta oferi sian ripozon kaj interesojn profite de la malriĉuloj. Oni povas diri, ke ŝia vivo estis longa serio da sinoferoj, kaj ankaŭ da krudaj provoj, ekde la junaĝo, kaj kuraĝo kaj rezignacio, malgraŭ tiuj provoj, neniam mankis al ŝi. Sed sia vidado jam difektita pro delikata laboro estingiĝis tagon post tago, ĝis tia grado, ke post iom da tempo rezultis kompleta blindeco! Estis ja tiam, ke la ekkono de la Spiritisma Doktrino fariĝis al ŝi ia lumoceano, kvazaŭ disŝirante al ŝi dikan vualon por lasi ŝin duonvidi ion ne tute konatan, sed pri kio ŝi posedis

nur malprecizan intuicion. Ŝi ĝin studis fervore sed samtempe kun la kriterio de taksado propra al la personoj, kiel ŝi, dotitaj per alta inteligento.

Estis necese taksi ĉiujn necertecojn, ĉiujn dubojn de ŝia ekzistado, dubojn kaj necertecojn devenintajn ne de ŝi mem, sed de ŝiaj parencoj, por opinii pri la konsoloj, kiujn ŝi ĉerpis el la sublima revelacio, kaj kiuj donis al ŝi la nerompeblan fidon pri la estonteco, la konscion pri la senvaloreco de la surteraj aferoj.

Ankaŭ ŝia morto estis inda je la vivo, kiun ŝi havis. Sen la minimuma angora maltrankvilo, ŝi vidis ĝin alproksimiĝi, kiel liberigon el la surteraj katenoj, samtempe malfermante am ŝi la pordon al la spirita vivo, kun kiu ŝi identiĝis ĉe la studado de Spiritismo. Kaj ŝi mortis serene konvikita, ke ŝi kompletigis la mision, kiun ŝi akceptis ĉe la enkarniĝo, ĉar ŝi zorge plenumis la devojn de edzino kaj familipatrino; kaj kiel dum la vivo ŝi deturniĝis de ĉiu kaj ĉia resento kontraŭ tiuj, pri kies nedankemo ŝi povus plendi; kaj kiel ŝi ĉiam pagis malbonon por bono, tiel ŝi ankaŭ elkarniĝis, pardonante ilin, petegante por ili la diajn bonecon kaj justecon.

Fine ŝi elkarniĝis kun sereneco rezultanta el ia senmakula konscienco, kaj la konvinkiĝo, ke, ne pro tio, ŝi ne malproksimiĝus de siaj infanoj, ĉar ŝi spirite povus esti kun ili, ilin konsoli kaj protekti, kie ajn ili troviĝus sur la terglobo.

Tuj post nia sciiĝo pri la morto de S-rino Foulon, nia unua zorgo estis elvoki ŝin. La rilatoj de amikeco kaj simpatio, kiujn la Doktrino starigis inter ni klarigas kelkajn el ŝiaj frazoj kaj pravigas la familiaran lingvaĵon.

## I

(Parizo, la 6an de Februaro 1865, tri tagojn post ŝia morto)

Ĉar mi tute ne dubis, ke vi elvokos min tuj post mia malligiĝo, mi pretiĝis respondi al vi, ĉar mi spertis neniam konfuzitecon. Ĉi tiu ekzistas nur por la estuloj

envolvitaj kaj dronantaj en la mallumo de sia propra Spirito.

Nu! Mia amiko, mi opinias min feliĉa nun; ĉi tiuj mizeraj okuloj, kiuj malfortikiĝis ĝis tia grado, ke ili ne allasis ion al mi, krom la rememoro pri mirindaj koloraj scenoj el la juneco, ĉi tiuj okuloj, mi diras, malfermiĝis por ree vidi belegajn horizontojn, pentritaj de viaj geniaj artistoj laŭ neprecizaj reproduktaĵoj, sed kies majesta riĉego, severa kaj sekve grandioza, havas la stampon de la plej kompleta realo.

Antaŭ ne pli ol tri tagoj mi elkarniĝis kaj tamen mi sentas, ke mi estas artistino: miaj aspiroj rilataj al la idealo de la artisma belo estis nenio alia ol la intuicio de kapabloj akiritaj en antaŭaj ekzistadoj kaj elvolviĝintaj en la lasta reenkarniĝo.

Sed kiom da peno por reprodukti ĉefverkon indan je la grandioza sceno sin prezentanta al la Spirito alveninta al regionoj de lumo! Penikojn! Donu al mi penikojn, kaj mi pruvos al la mondo, ke la spiritisma arto estas la komplemento de la pagana arto, de la kristana arto pereanta, kaj nur Spiritismo havas la gloron revivigi ĝin kun la tuta brilo, en via forlasita mondo.

Tio sufiĉas al la artisto; kaj nun, al la amikino:

"Kial vi priokupiĝas, mia bona amikino (ŝi aludas S-inon Allan Kardec), pri mia morto? Vi, precipe vi, kiu konas la elreviĝojn kaj amaraĵojn de mia ekzistado, devos ja ĝojiĝi, sciante, ke mi ne plu trinkas el la amara kaliko de la surtera doloroj, kaliko plene elĉerpiĝinta. Kredu min: la mortintoj estas pli feliĉaj ol la vivantoj, kaj ilin priplori estas dubi pri la spiritaj veraĵoj. Estu certa, ke vi ree vidos min. Se mi foriris antaŭ ol vi, tio okazis pro tio, ke estis plenumita la tasko, kiun cetere ĉiu havas sur la Tero. Tiamaniere, kiam vi finos la vian, tiam vi venos ripozi iomete apud mi por poste rekomenci, atenta al la principo, ke nenio estas neaktiva en la Naturo. Ni ĉiuj havas malbonajn inklinojn, kiujn ni obeas, kio estas superega leĝo konfirmanta la liberan volon. Sekve havu indulgon kaj karitaton, mia amikino, sentojn, kiujn ni

reciproke bezonas, ĉu en la videbla mondo, ĉu en la nevidebla. Kun tia devizo ĉio iras bone. Ne ordonu, ke mi ĉesu paroli. Vi scias do, ke, por la unua fojo, tre longa jam estas la konversacio, motivo, kial mi lasas vin por cedi vicon al mia bonega amiko S-ro Kardec.

Mi volas danki lin pro la afablaj vortoj, kiujn li bonvolis direkti al la amikino, kiu lin antaŭiris en la tombon, ĉar ni ne sukcesis foriri kune al la mondo, kie mi troviĝas! (Aludo al la malsano, pri kiu ŝi parolis al D-ro Demeure). Kion dirus tiam la tre amanta kunulino en nia ekzistado, se la bonaj Spiritoj ne estus intervenintaj? Ŝi plorus kaj ĝemus, kion mi komprenas ĝis ioma grado. Sed estas necese, ke vi estu vigla, por ke vi ne plu vin forlasu al nova danĝero, antaŭ ol plenumi la laboron de la spiritisma inicado, antecipe alvenante al ni kaj, kiel Moseo, vidante nur de malproksime la promesitan landon.

Tio estas amikino, kiu diras ĝin al vi — antaŭgardu vin.

Nun mi foriras al miaj karaj infanoj, kaj poste mi iros vidi trans la maro, ĉu mia vojiranta ŝafino alvenis aŭ restas ankoraŭ laŭ la kaprico de la tempestoj. (Ŝi aludas al unu el siaj filinoj loĝanta en Ameriko.) Dio volu, ke ŝin protektu la bonaj Spiritoj, kun kiuj mi kuniĝos por la sama celo. Mi ree konversacios kun vi, tial ne forgesu, ke mi estas nelacigebla konversaciulino.

Ĝis baldaŭ, bonaj kaj karaj amikoj; ĝis baldaŭ."

*Vidvino Foulon*

## II

(La 8-an de Februaro 1865)

— D. Kara S-ino Foulon, mi konsideras min kontenta pro via komunikaĵo de antaŭ kelkaj tagoj, per kiu vi promesis daŭrigi nian konversacion.

Kredu, ke mi tuj vin rekonis, pro tio, ke vi parolis pri aferoj nekonataj de la mediumo kaj tre propraj al via

Spirito. La lingvaĵo afabla al ni estas tute certe tiu de animo amena, kiel la via, kvankam ni rimarkis en la vortoj ian firmecon, ian certecon, ian prononcon ĝis tiam nekonatan ĉe vi. Vi certe memoras, ke tiurilate mi permesis al mi fari al vi pli ol unu averton, en iaj kaj difinitaj cirkonstancoj.

— R. Jes, estas vere, sed de kiam mi grave malsaniĝis, mi penis reakiri la spiritan firmecon skuatan de la ĉagrenoj kaj sortoŝangoj ofte min timigantaj sur la Tero. Mi diris al mi: Se vi estas ja spiritistino, forgesu la Teron; preparu vin por la transformiĝo de via estaĵo kaj rigardu per la penso la luman vojon, kiu atendas vian animon post la disiĝo, kaj per kiu vi devos atingi, liberiĝinta kaj feliĉa, la ĉielajn sferojn, kie estonte vi loĝos.

Eble vi diros, ke mi estis iom vantema, fidante la perfektan feliĉon post mia elkarniĝo; sed la fakto estas, ke mi tiel multe suferis, ke mi devus elpagi la erarojn faritajn ne nur en la lasta, sed ankaŭ en la antaŭaj enkarniĝoj. Tiu intuicio ne trompis min, kaj estis ja ĝi, kiu donis al mi la kuraĝon, la trankvilecon kaj la firmecon en la lastaj momentoj. Nu bone, tiu firmeco kreskis rapidege, kiam post mia liberiĝo mi vidis miajn esperojn efektivigitaj.

— D. Nun priskribu al ni la transiron, la vekiĝon kaj la unuaj impresojn, kiujn vi tie ricevis.

— R. Mi suferis, sed la Spirito superis la materian suferon, kiun la disiĝo mem kaŭzis al li. *Post la lasta spiro*, jen mi troviĝis kvazaŭ en sveno, sen konscio pri mia stato, pensante pri nenio, en nepreciza dormemo, kiu ne estis ĝustadire la dormo de la korpo nek la vekiĝo de la animo. En tiu stato mi restis longan tempon, kaj poste, kvazaŭ mi eliris el daŭra sinkopo, mi malrapide vekiĝis meze inter fratoj, kiujn mi ne konis. Ili malŝparis al mi zorgojn kaj karesojn, kaj samtempe montris al mi, en la Spaco, punkton iom similan al stelo, dirante: "Tien vi iros kun ni, ĉar vi plu ne apartenas al la Tero." Tiam mi rememoris; kaj apogita sur ili formantaj gracian grupon, kiu sin ĵetas al la nekonataj sferoj, sed kun la

certeco trovi tie la feliĉon, ni supreniris kaj supreniris, laŭmezure kiel la stelo grandiĝis...

Ĝi estas ia mondo feliĉa, ia supera centro, kie via amikino ripozos. Kiam mi diras ripozo, mi volas aludi la korpajn laciĝojn, kiuj min amare suferigis, la sortovicojn de la surtera vivo, ne la neaktivecon de la Spirito, ĉar ĉi tiu havas, en sia aktiveco, ian fonton de ĝuoj.

— D. Ĉu vi tiam forlasis la Teron definitive?

— R. Mi lasas sur ĝi multajn karajn estulojn, por ke mi povu apartiĝi definitive. Al ĝi do mi venos en Spirito, ĉar mi estas komisiita por misio apud miaj infanoj. Vi sufiĉe scias, ke neniu obstaklo malhelpas venon sur la Teron, resume viziton de la Spiritoj loĝantaj en superaj mondoj.

— D. Ĉu via nuna situacio povus iamaniere malpliigi aŭ malfortigi viajn rilatojn kun tiuj, kiujn vi lasis ĉi tie?

— R. Ne, mia amiko, ĉar amo proksimigas la animojn. Estu certa, ke sur la Tero vi povos esti pli proksimaj al tiuj, kiuj atingis la perfektecon, ol al tiuj, kiuj, pro sia malsupereco kaj egoismo, vagas ĉirkaŭ la tera sfero.

Karitato kaj amo estas la du motoroj je potenca altiro, kiu firmigas kaj daŭrigas la unuiĝon de la animoj, malgraŭ la distancoj kaj lokoj.

Distanco ekzistas nur por materiaj korpoj, neniam por la Spiritoj.

— D. Kian ideon vi faras nun pri miaj verkoj, pri Spiritismo?

— R. Ŝajnas al mi, ke vi estas misiulo kaj ke via ŝarĝo estas peza, sed mi ankaŭ antaŭvidas la celon de via misio, kaj mi scias, ke vi ĝin atingos. Mi helpos vin laŭ mia povo, per miaj spiritaj konsiloj, por ke vi povu venki la malfacilaĵojn al vi aperontaj, fine kuraĝigante vin entrepreni taskojn, kiuj koncernas la akceladon de la renoviganta movado, sur kiu baziĝas Spiritismo, dum vi restos tie.

Demeure, via amiko, ligita al la *Spirito de Vero*, al vi estos ankoraŭ pli utila, ĉar li estas pli saĝa kaj modera ol mi. Mi scias, ke la helpo de la bonaj Spiritoj vin fortikigas kaj subtenas en via laboro, kaj mi ankaŭ certigas al vi mian kunlaboron ĉiam kaj ĉie.

— D. Ĉu el kelkaj el viaj vortoj oni povas konkludi, ke vi ne donos tre aktivan personan helpon por la disvastigado de Spiritismo?

— R. Vi eraras. Estas fakto, ke mi vidas tiel multajn aliajn Spiritojn pli kapablajn ol mi por pritrakti tiun aferon, certe tiel gravan, ke ia nevenkebla timo malebligas min respondi al vi laŭ via deziro. Probable tiel okazos, kaj mi forte kuraĝiĝos, se mi pli bone konos tiujn Spiritojn. Nur antaŭ kvar tagoj mi forlasis la Teron kaj sekve mi ankoraŭ troviĝas sub la miriga influo de ĉio min ĉirkaŭanta. Ĉu vi ne komprenas min? Mi ne kapablas esprimi la novajn sensacojn, kiujn min spertas. Mi ĉiel penadas eviti la sorĉon, kiun al mia estaĵo kaŭzas la mirindaĵoj de ĝi admirataj. Kion mi povas fari, tio estas nur adori kaj danki Dion pro liaj faroj. Sed tiu impreso neniiĝos kaj la Spiritoj al mi certigas, ke baldaŭ mi estos kutimiĝinta al ĉiuj tiaj grandiozaĵoj, tiel ke mi povos pritrakti kun spirita klarvideco ĉiujn aferojn, kiuj koncernas la renovigon de la Tero. Al tiu cirkonstanco vi ankoraŭ devas aldoni tiun, ke mi havas konsolotan familion.

Adiaŭ kaj ĝis baldaŭ, kara majstro. Via bona amikino vin amas kaj ĉiam amos, pro tio, ke nur al vi ŝi ŝuldas la solan eternan kaj veran konsolon, kiun ŝi havis sur la Tero."

*Vidvino Foulon*

## III

La sekvanta komunikaĵo estis destinita al ŝiaj infanoj la 9an de Februaro:

"Miaj tre amataj infanoj:

Dio forkondukis min de via ĉeesto, sed la rekompenco, kiun Li bonvolis doni al mi estas multe pli granda ol la malmulto, kiun mi faris sur la Tero.

Submetiĝu, karaj infanoj, al la voloj de la Ĉiopova, kaj prenu de ĉio, kion Li permesis al vi ricevi, la forton por elporti la provojn de la vivo. Havu en la koro la firman kredon, kiu tiel multe faciligis al mi la transiron al ĉi tiu mondo.

Same kiel Li faris jam al mi sur la Tero, post mia morto Dio etendis sur min la mantelon de sia senfina favorkoreco.

Vi devas danki Lin pro la favoro, kiun Li amasigas al vi. Benu Lin, miaj infanoj, benu Lin ĉiam, ĉiumomente. Neniam forgesu tion, kio estis al vi rekomendita, nek la vojon irotan. Meditu pri la uzado de la tempo, kiun Dio al vi difinis sur la Tero. Tie vi estos feliĉaj, miaj karaj infanoj, feliĉaj unuj ĉe aliaj, kondiĉe ke regu ĉe vi unuiĝo. Feliĉaj ankoraŭ ĉe viaj idoj, se vi ilin edukos laŭ la puraj principoj, kiujn Dio permesis malkaŝi al vi. Vi certe ne povas vidi min; sed konvenas, ke vi sciu, ke la ligiloj tie povas vidi min; sed konvenas, ke vi sciu, ke la ligiloj tie nin katenintaj ne dispeciĝis per la morto de la korpo, ĉar ne la envolvaĵo, sed la Spirito nin unuigis. Kaj al mi estas ja eble, pro boneco de la Ĉiopova, gvidi vin, kuraĝigi vin, por ree nin kunigi, kiam por vi finiĝos tiu laboro.

Karaj infanoj, ame kulturu tiun subliman kredon. Al vi, kiuj ĝin posedas, belaj tagoj venos. Tion oni jam diris al vi, sed mi ne estis dotita per la povo vidi tiujn tagojn tie sur la Tero. En la alto do mi taksos la belajn tempojn promesitajn de la Dio de boneco, de justeco kaj favorkoreco. Ne ploru, miaj infanoj. Ĉi tiuj komunikaĵoj povu firmigi vin en la fido, en la amo al Dio, tiu Dio, kiu tiom da bonfaroj malavaris al ni; kiu tiel ofte helpis vian patrinon. Preĝu ĉiam, ĉar la preĝo konsolas. Konformiĝu al la ordonoj de mi tiel arde obeitaj, kiam mi estis enkarniĝinta, kiel vi.

Mi revenos, miaj infanoj, sed estas necese konsoli la filinon, kiu tiom multe bezonas min nun. Adiaŭ, ĝis

baldaŭ. Tion al vi mi petegas por vi: kredu al la dia boneco. Via por ĉiam.”

*Vidvino Foulon*

RIMARKO. Ĉiu klarmensa kaj serioza homo facile prenos el ĉi tiuj komunikaĵoj la instruojn el ili elstariĝantajn. Ni nur turnas lian atenton sur la du jenajn punktojn: Unue, sur la elmontritan eblecon, laŭ ĉi tiu ekzemplo, ne plu bezoni enkarniĝi sur la Tero kaj transiri en superan mondon, ne restante apartigitaj de la amataj estuloj, kiujn ni postlasas ĉi tie. Tiel tiuj, timantaj la reenkarniĝon pro la surteraj mizeroj, povas ĝin eviti, laborante por sia progreso. Kaj tiel agos tiu, kiu ne volos vegeti en la malsuperaj sferoj, kiel eble plej multe sin klerigante, laborante kaj progresante.

La dua punkto estas la konfirmo de la fakto, ke ni estas malpli disigitaj en la morto ol en la vivo, je la estuloj, kiuj estis al ni karaj en ĉi tiu lasta.

Retenita de malsano kaj de la aĝo en malgranda urbo, en la Sudo, S-ino Foulon konservis apud si nur etan parton de sia familio. La plejparto el ŝiaj infanoj kaj geamikoj estis disigitaj kaj malproksimaj, kaj materiaj obstakloj malpermesis, ke ŝi vidu ilin tiom da fojoj, kiom ŝi deziros. De kelkaj la distanco malfaciligis la korespondadon mem. Apenaŭ elkarniĝinta, S-ino Foulon rapide kuras apuden de ĉiu, senlace trakuras distancojn tiel rapide, kiel elektro, ilin vidas kaj ĉeestas iliajn intimajn kunsidojn, ili protektas kaj povas uzante la mediumecon ĉiumomente sin distri kun ili, kvazaŭ ŝi estus vivanta sur la Tero.

Mirigas nin, ke antaŭ tiel konsola perspektivo ankoraŭ ekzistas iu, kiu preferas la ideon de eterna apartiĝo!

## Rusa kuracisto

M. P..., el Moskvo, estis kuracisto eminenta, tiel pro sia saĝo, kiel ankaŭ pro siaj moralaj kvalitoj. Ne havinte kun li rilatojn eĉ nerektajn, tiu, kiu lin elvokis, konis lin nur tradicie. La originala komunikaĵo estis ricevita en rusa lingvo.

— D. (Post la elvoko.) Ĉu vi ĉeestas? — R. Jes. En la tago de mia morto mi sekvis vin per mia ĉeesto,

kaj vi rezistis al la provoj, kiujn mi faris, por ke vi skribu. La vortoj, kiujn vi diris pri mi, ebligis al mi vin rekoni, kaj el tio venas mia deziro rilati kun vi, por via bono.

— D. Se vi estis bona, kial vi tiel suferis? — R. Ĉar plaĉis al Dio igi min duoble senti per tiu rimedo la prezon de mia liberiĝo, samtempe dezirante, ke mi kiel eble plej multe progresu sur la Tero.

— D. Ĉu la ideo de morto terurigis vin? — R. Mi tre fidis Dion, por ke tio ne okazu.

— D. Ĉu la disiĝo estis dolora? — R. Ne. Tio, kion vi nomas lastaj momentoj, neniom estas dolora. Mi sentis nur rapidan skuon, kaj tuj sentis min feliĉa, tute malembarasita el la mizera skeleto.

— D. Kaj kio okazis poste? — R. Mi havis la plezuron vidi alproksimiĝi sennombrajn amikojn, ĉefe tiujn, kiujn mi helpis, kaj ili ĉiuj bonvenigis min.

— D. En kiuj regionoj vi loĝas? Ĉu sur ia planedo? — R. Ĉio, kio ne estas planedo, konsistigas tion, kion vi nomas Spaco, kaj en ĉi tiu mi ja loĝas. Sed la homo ne povas kalkuli, eĉ fari ideon pri la nombro da gradoj de tiu vastaĵo. Kiel senfina estas la serio da gradoj de tiu ŝtuparo de Jakob, kiu iras de la Tero ĝis la Ĉielo, t.e. de dolora reenkarniĝo en malsupera mondo, kiel via, ĝis la kompleta puriĝo de la animo! Al la loko, kie mi nun troviĝas, oni ne alvenas, krom post grandega serio da provoj, aŭ, alivorte, da reenkarniĝoj.

— D. Ĉu vi havis do multajn ekzistadojn? — R. Tio ne povus esti alie. Nenio estas escepta en la neŝanĝebla Universa ordo starigita de Dio . Rekompenco povas veni nur post la venko en la lukto: tiel, se tiu estis granda, estas nur pro tio, ke ankaŭ ĉi tiu estis neeviteble granda. Sed la homa vivo estas tiel mallonga, ke la lukto fariĝas nur dum interspacoj, kiuj estas la diferencaj sinsekvaj enkarniĝoj. Estas do facile konkludi, ke, se mi troviĝas sur unu el la superaj ŝtupoj, mi ĝin atingis post longa serio da bataloj, el kiuj Dio permesis, ke mi kelkfoje eliris venkinta.

— D. El kio konsistas via feliĉo? — R. Estas malfacile komprenigi tion al vi. La feliĉo, kiun mi ĝuas, estas speco de ekstrema kontenteco pri mi mem, ne pro miaj meritoj — kio estus ja fiero kaj ĉi tiu estas atributo de neprogresintaj Spiritoj — sed kontenteco kvazaŭ saturiĝinta, droninta en la amo de Dio, en la danko pro lia senfina boneco. Resume ĝi estas ĝojo al ni inspiranta la bonon, kaj oni povas supozi, ke ni per nia bontrovo kontribuis por la progreso de aliaj, kiuj supreniris al la *Kreinto*. Ni estas kvazaŭ identigitaj kun tia bonstato, kiu estas ia speco de fandiĝo de la Spirito kun la dia boneco. Ni havas la kapablon vidi la pli progresintajn Spiritojn, kompreni ilian mision, scii, ke ankaŭ ni atingos tian staton; en la senmezura senfino ni ekvidas la regionojn, kie la dia fajro brilegas en tia grado, ke ĝi nin ravas eĉ tra la vualo ilin envolvanta.

Sed kion mi diras? Ĉu vi komprenas miajn vortojn? Ĉu vi kredas, ke la de mi aludita fajro estas ekzemple komparebla kun la Suno? Ne, neniam. Tio estas afero nedirebla por la homo, ĉar la vortoj esprimas por li fizikajn aŭ metafizikajn aferojn, kiujn li parkere aŭ intuicie scias. Se la homo ne povas teni en la memoro tion, kion li tute ne konas, kiel ni povas sugesti al li ĝian percepton? Sciu, ke jam estas granda feliĉo la penso pri la ebleco senfine progresi.

— D. Vi bonvolis esprimi la deziron esti utila al mi: mi petas, ke vi diru per kio. — R. Mi povas vin helpi kaj protekti ĉe viaj malfortiĝoj, animi vin ĉe viaj moment-oj da malkuraĝiĝo, konsoli vin ĉe via afliktiĝo. Se via fido ŝanceliĝos kaj ia ajn emocio vin konfuzos, elvoku min, ĉar Dio permesos, ke mi Lin memorigu al vi, vin altirante al Li. Se vi sentos, ke vi baldaŭ falos sub la pezo de malbonaj inklinoj, kiujn via propra konscienco konsideras kulpaj, alvoku min plu, ĉar mi helpos vin porti vian krucon, same kiel oni helpis Jesuon porti tiun, sur kiu li tiel solene povis proklami la veron, la karitaton. Se vi hezitos sub la pezo de amaraĵoj mem, kiam la malespero vin posedos, ankoraŭfoje voku min, ke mi venu forpreni vin el la abismo, spirite parolante al vi, memorigante vin pri devoj

truditaj ne de sociaj aŭ materiaj konsideroj, sed de la amo, kiun mi transfluigos en vian animon, amo al mi donita favore al tiuj, kiuj per ĝi povas saviĝi.

Certe, sur la Tero vi havas amikojn, kiuj partoprenante en viaj angoroj, eble jam vin savis. En afliktaj momentoj serĉu ja tiujn amikojn, kiuj donas konsilojn, apogon, karesojn... Nu bone, estu certa, ke en la Spaco vi ankaŭ povas havi amikojn, utilajn kaj helpemajn.

Estas konsolo, ke ĉiu povas diri: Kiam mi mortos, dum miaj surteraj amikoj, ĉe mia lito, ploros kaj petos, tiuj el la Spaco, ĉe la sojlo de la vivo, ridetante kondukos min al la loko. Konforma al miaj meritoj kaj virtoj.

— D. Kial mi meritas tiun protekton, kiun vi volas doni al mi? — R. Jen la kialo: Mi alligiĝis al vi tuj en la tago de mia morto: — kiel Spirito, mi ja vidis vin sincera adepto de Spiritismo kaj bona mediumo. Ĉar el inter tiom da homoj, kiujn mi tie lasis, vi estas tiu, kiun la unua mi vidis, mi do promesis al mi kontribui por via progreso. La profito ne estas nur via, sed ankaŭ de tiuj, kiujn vi devas instrui pri la kono de la vero.

En via misio vi povas vidi elokventan pruvon de amo de Dio al vi. Kiuj alproksimiĝos al vi, tiuj iom post iom fariĝos kredantoj, kaj al tiuj rezistaj, se ili aŭskultos vin, ankaŭ alvenos la vico kredi, kvankam malfrue. Senkuraĝiĝi neniam; marŝi ĉiam, malgraŭ la ŝtonoj. Prenu min, kiel apogon en la momentoj de senkuraĝiĝo.

— D. Mi ne opinias min inda je tiel granda favoro. — R. Certe vi estas ja tre malproksima de la perfekteco. Malgraŭ via ardo en la praktiko de la edifaj doktrinoj; malgraŭ via zorgo teni la fidon al tiuj, kiuj vin aŭskultas; konsili pri karitato, boneco kaj bonvolemo, eĉ rilate al tiuj, kiuj malbone kondutas al vi; pri rezisto kontraŭ la koleraj instiktoj, kiujn cetere vi facile povus malŝarĝi sur tiujn, kiuj vin afliktas, ĉar ili nescias viajn intencojn; ĉio tio malgravigas la malicon, kiun vi ankoraŭ havas. Estas konvene, ke mi tion diru: pardono al ofendoj estas, el inter ĉiuj, unu el la plej potencaj malgraviloj de malbono. Dio amasigas al vi gracojn per

la kapabloj, kiujn Li donis al vi, kaj kiujn vi devas elvolvigi per via propra klopodo, por ke vi kunhelpu por la saviĝo de via proksimulo. Mi vin lasos, sed ĉiam kalkulu pri mi. Estas necese, ke vi moderigu viajn surterajn ideojn, kiel eble plej ofte vivante kun la amikoj el la Spaco.

*P...*

## Bernardin

(Bordeaux, Aprilo 1862)

Jam de multaj jarcentoj mi estas forgesita Spirito. Tie sur la Tero mi vivis en malhonoro kaj mizero, senĉese laborante, tagon post tago, por doni al la familio malabundan panon. Mi tamen amis la veran Sinjoron, kaj kiam tio afliktanta min sur la Tero pligravigis miajn dolorojn, mi diradis: "Dio mia, donu al mi fortojn por senplende elporti la pezon de miaj doloroj." Mi elpagis miajn pekojn, miaj amikoj. Sed elirinte el la kruda provado, la Sinjoro min akceptis en sian sanktan pacon kaj mia plej kara deziro estis kunigi vin ĉiujn, fratojn kaj filojn, dirante al vi: "Kiom ajn kara vi ĝin opiniu, la feliĉo vin atendanta superos la prezon." Filo de multenombra familio, mi neniam havis pozicion kaj servis al tiu, kiu plej bone povis helpi min elporti la ekzistadon. Naskita en tempo de kruela sklaveco, mi provis ĉiujn maljustaĵojn, laciĝojn kaj ĉagreniĝojn, kiujn la subuloj de la Sinjoro decidis trudi al mi.

Ofendita virino, filinoj forrabitaj kaj tuj poste forlasitaj, ĉion mi suferis, ne povante plendi. Miajn filojn oni forkondukis al militoj de rabo kaj krimoj, por poste ilin pendigi pro kulpoj ne faritaj. Ha! Kompatindaj amikoj, se vi scius tion, kion mi suferis en mia longa ekzistado... Mi tamen esperis, kaj la Sinjoro permesis al mi tiun feliĉon, kiu ne ekzistas sur la Tero. Vi ĉiuj do estu kuraĝaj, paciencaj kaj rezignaciaj. Vi, mia filo, konservu tion, kion mi donis al vi, kaj kio estas praktika instruo.

Kiu konsilas, tiu estas ĉiam pli respektata, kiam li povas diri: Mi elportis pli ol vi, kaj mi elportis sen plendo.

— D. En kiu tempo vi vivis?

— R. De 1400 ĝis 1460.

— D. Kaj vi poste havis alian ekzistadon?

— R. Mi ankoraŭ vivis ĉe vi, kiel misiulo... Jes, kiel misiulo de la fido, sed de la pura, vera fido, devenanta de Dio, kaj ne manpreparita de la homoj.

— D. Kaj nun, kiel Spirito, ĉu vi ankoraŭ havas okupojn?

— R. Ĉu vi povas kredi, ke la Spiritoj restus neaktivaj? Neaktiveco, neutileco estus por ni ia turmento. Mia misio estas gvidi spiritismajn grupoj, al kiuj mi inspiras bonajn pensojn, samtempe penante nuligi tiujn inspiritajn de malbonaj Spiritoj.

*Bernardin*

## Grafino Paŭla

Bela, juna, riĉa kaj de nobla deveno, ankaŭ ĉi tiu estis perfekta modelo de intelektaj kaj moralaj ecoj. Ŝi mortis aĝante 36 jarojn, en 1851. Ŝia nekrologo estas el tiuj, kiuj povas resumiĝi en la jenaj vortoj de mil buŝoj ripetitaj: — "Kial Dio tiel frue forprenas tiajn homojn de sur la Tero?" Feliĉaj tiuj, kiuj tiel faras benita sian memoron. Ŝi estis bona, milda kaj indulga, ĉiam preta senkulpigi aŭ malgravigi la malbonon, anstataŭ ĝin pligravigi. Neniam malbondiro makulis ŝiajn lipojn. Sen fiero kaj severeco, ŝi kontraŭe kun bonvolemo kaj delikata familiareco traktadis la servistojn, krome sen ia ajn ŝajno de supereco aŭ humila protekto. Komprenante, ke la homoj vivantaj per sia laboro ne estas rentuloj, kaj sekve bezonas tion, kion oni ŝuldas al ili, ĉu pro ilia kondiĉo, ĉu por ilia vivteno, ŝi neniam retenis pagon de eĉ unu salajro. La nura ideo, ke iu povus sperti ian seniĝon pro ŝia kaŭzo, farus al ŝi konsciencoriproĉon. Ŝi ne apartenis al la nombro de tiuj, kiuj, ne paginte la

proprajn ŝuldojn, trovas monon por kontentigi siajn kapricojn; ŝi ne povis kompreni, ke estus plezuro por la riĉulo havi ŝuldon, kaj ŝi opinius sin ofendita, se oni dirus al ŝi, ke ŝiaj liverantoj devis konsenti al ŝi pagoprokrastojn. Ankaŭ okaze de ŝia morto estis nur bedaŭroj, nenia protesto.

Ŝia bonfarado estis neelĉerpebla, sed ne tiu bonfarado parada, en tagmeza lumo; tiel ŝi praktikis la elkoran karitaton, ne pro amo al pavemo. Nur Dio scias la larmojn, kiujn ŝi sekigis, la malesperojn, kiujn ŝi kvietigis, ĉar tiajn virtojn atestis nur tiuj malfeliĉuloj, al kiuj ŝi helpadis. Krome ŝi klopodis malkovri la plej korŝirajn malfeliĉojn, la kaŝitajn, ilin helpante per tiu afableco, kiu altigas la homon, anstataŭ lin humiligi.

El ŝia deveno kaj el la altaj funkcioj de ŝia edzo rezultis ŝiaj pezegaj domaj devoj, el kiuj ŝi ne povis liberiĝi; malavare plenumante la postulojn de sia pozicio, ŝi tamen tion faris sen malŝparo kaj troaĵo, tiel ke al ŝi sufiĉis nur duono de tio, kio estis bezona por aliaj homoj.

Kaj tiele ŝi permesis al si disponigi pli grandan parton de sia havo al la mizeruloj. Destinante la renton de parto de tiu riĉaĵo nur por tiu celo, ŝi ĝin konsideris sankta kaj io malpli elspeza en la doma servo. Tiel ŝi trovis rimedojn por akordigi siajn devojn antaŭ la socio kaj antaŭ la malfeliĉoj (*). Unu el ŝiaj parencoj, inicita en Spiritismon, ŝin elvokis dek du jarojn post ŝia morto, kaj ricevis, responde al diversaj demandoj, la jenan komunikaĵon: (**)

“Vi pravas, amiko, pensante, ke mi estas feliĉa. Tia mi efektive estas, kaj ankoraŭ pli ol kiom la lingvo povas esprimi, kvankam malproksime de la lasta feliĉogrado. Sed sur la Tero mi estis inter la feliĉaj, ĉar mi ne memoras,

---

(*) Oni povas diris, ke tiu sinjorino estis la viva enkarniĝo de karitatema virino, priskribita en “La Evangelio laŭ Spiritismo”, ĉap. XIII.

(**) El tiu komunikaĵo, kies originalo estas en la germana lingvo, ni eltiris la tekstojn, kiuj interesas la temon, pri kiu ni okupiĝas, forigante tiujn de naturo ekskluzive familia.

ĉu mi tie spertis eĉ nur unu efektivan ĉagreniĝon. Junecon, omaĝojn, sanon, riĉaĵon, ĉion, kio ĉe vi estas feliĉo, mi ja posedis! Kio tamen estas tiu feliĉo, kompare kun tiu, kiun mi ĝuas ĉi tie? Brilegaj surteraj festoj, kie oni montradas la plej riĉajn ornamaĵojn, kio ili estas, kompare kun tiuj asembleoj da Spiritoj kun intensega brilo, kiun viaj okuloj ne elportus, brilo, kiu estas propraĵo de ilia pureco? Viaj palacoj je orkorolaj salonoj, kio ili estas, kompare kun tiuj aeraj loĝejoj, vastaj regionoj en la Spaco, ornamitaj per koloroj pli belaj ol ĉielarko? Viaj promenadoj kalkulitaj laŭ paŝoj, en parkoj, al kio ili reduktiĝas, kompare kun la iradoj tra la vastaĵo, pli rapidaj ol fumo?

Kio estas nebulaj kaj limigitaj horizontoj, kompare kun la spektaklo de mondoj moviĝantaj en la senfina Universo, sub la influo de la Plejalta? Kaj kiom monotonaj estas viaj plej harmoniaj koncertoj, rilate al la melodio vibriganta la eterajn fluidaĵojn kaj ĉiujn animajn fibrojn! Kaj kiom malĝojaj kaj senspritaj estas viaj plej grandaj ĝojoj, kompare kun la nepriskribebla sento de feliĉo, kiu saturas nian tutan estaĵon, kiel bonfara vaporo, sen miksado de malkvietiĝo, de subpremado, de sufero! Ĉi tie ĉio montras amon, konfidon, sincerecon: ĉie amantaj koroj, amikoj ĉie!

Nek enviuloj, nek ĵaluzuloj! Tio estas la mondo, kie mi troviĝas, mia amiko, kaj al kiu vi nepre alvenos, se vi sekvos la rektan vivovojon.

Unuforma feliĉo tamen lacigus, kaj tiel vi ne kredus, ke la nia estu libera de neatenditaĵoj: nek eterna koncerto, nek senfina festo, nek beateca kontemplado por la tuta eterneco, sed movo, aktiveco, vivo.

Kvankam sen laciĝoj, la okupiĝoj estas plenaj de perspektivoj kaj emocioj varieblaj kaj senĉesaj pro la mil incidentoj, kiuj naskiĝas el ili. Ĉiu havas sian mision plenumotan, siajn protektatojn prizorgotajn, surterajn amikojn vizitotajn, mekanismojn direktotajn en la Naturo, suferantajn animojn konsolotajn; kaj ĝi estas la irado tien kaj reen, ne de unu al alia strato, sed de unu al

alia mondo, unuigante nin, disigante nin, por ree nin kunigi; kaj kunigitaj sur certa punkto, ni komunikas unu al alia la plenumitan laboron, reciproke gratulante nin pro la sukceso atingita; ni nin alĝustigas, ni reciproke helpas nin ĉe la malfacilaj aferoj. Fine mi certigas al vi, ke neniu havas tempon por sin ĝeni, eĉ dum sekundo. Nuntempe la Tero estas la granda temo de nia meditado. Kia moviĝo ĉe la Spiritoj! Kiaj multenombraj falangoj tien alkuras helpi la progreson kaj la evoluadon! Oni dirus, ke nubo da laboristoj maldensigas ian arbaron, sub la ordonoj de spertaj estroj; unuj faligas centjarajn trunkojn, eltiras iliajn profundajn radikojn, aliaj mal-krutigas la terenon; ĉi tiuj kulturas la grundon, semante; tiuj konstruas la novan urbon sur la putrintaj ruinoj de malnova mondo. Tiumomente la estroj interkonsiliĝas kaj sendas siajn ordonojn pere de heroldoj, en ĉiujn direktojn. En difinita tempo la Tero devas regeneriĝi, ĉar gravas, ke la projektoj de la Providenco efektiviĝu, kaj tiel ĉiu havas sian rolon. Ne opiniu min simpla spektantino de tiu granda entrepreno, kio ja min hontigus, ĉar en ĝi ĉiuj laboras. Grava misio min koncernas, kaj mi forte klopodas por ĝin plenumi kiel eble plej bone. Ne sen lukto mi atingis la pozicion, kiun mi nun okupas en la spirita vivo; kaj estu certa, ke mia lasta ekzistado, kiom ajn meritplena ĝi povas ŝajni al vi, ne valoris per si mem kaj ne estis sufiĉa por tiu celo. Ĉe diversaj ekzistadoj mi submetiĝis al provoj de laboro kaj mizero, kiujn mi volonte elektis por plifortigi kaj purigi mian Spiriton; mi havis la feliĉon triumfe eliri el tiuj provoj, krom nur unu, eble la plej danĝera el ĉiuj: tiu de materiaj riĉeco kaj bonstato, *ia bonstato sen ombroj de ĉagreniĝoj*. En tio konsistis la danĝero. Kaj antaŭ ol ĝin provi, mi volis senti min tro forta por ne fali. Pro miaj bonaj intencoj, Dio donis al mi la gracon de sia helpo. Ekzistas multaj Spiritoj, kiuj, delogitaj de ŝajnaĵoj, senpripense elektas tiun provon, sed, malfortaj por alfronti ĝiajn danĝerojn, lasas la mondajn delogojn triumfi super ilia nesperteco.

Laboristoj! mi estas en viaj vicoj, mi la nobela sinjorino gajnis, kiel vi, la panon per la ŝvito de mia vizaĝo; mi afliktiĝis pro manko de necesaĵoj, suferis sortoŝanĝojn kaj tio ja vigligis la fortojn de mia animo; kontraŭe mi estus falinta ĉe la lasta provo, kio malfruigus la progreson de mia kariero.

Kiel mi, ankaŭ vi havos vian provon de riĉeco, sed ne rapidu ĝin peti tre frue. Kaj vi aliaj, riĉuloj, memoru ĉiam, ke la vera riĉaĵo, la senmorta riĉaĵo, ne ekzistas sur la Tero; prefere penu sciiĝi pri la prezo, per kiu vi povos atingi la bonfarojn de la Ĉiopova."

*Paŭla, Gafrino de ... sur la Tero*

## Jean Reynaud

(Spiritisma Societo de Parizo. Spontanea komunikado)

Miaj amikoj, kiel brilega estas ĉi tiu nova vivo! Simila al luma torento, ĝi trenas en sia grandega fluo la Spiritojn ebriajn je la senfino! Mi pasis el la materiaj ombroj al la brila aŭroro antaŭvidiganta la Ĉiopovan.

Post la rompiĝo de la materiaj ligiloj, miaj okuloj atingis novajn horizontojn, kaj mi vivas kaj ĝuas la pompajn mirindaĵojn de la senfino. Mi saviĝis ne per la indeco de miaj servoj, sed per la kono de la eterna principo, kiu evitigis al mi la makulojn naskitajn de la malklereco de la kompatinda homaro. Mia morto estis benita, kvankam miaj biografioj, blindaj, opiniis ĝin antaŭtempa! Ili bedaŭris kelkajn verkojn naskiĝintajn el la polvo, kaj ne komprenis nek komprenos kiom multe la silento ĉirkaŭ la ĵusfermita tombo utilas al la afero Spiritismo.

Mia tasko estis finita; miaj antaŭuloj sekvis la planitan vojon; mi atingis la apogeon, ĉe kiu la homo, doninte tion plej bonan, kion li posedis, farus nenion alian al rekomenci. Mia morto revivigas la atenton de la kleruloj, turnante ĝin al mia ĉefa verko, kiu koncernas la grandan spiritisman demandon, kiun ili ŝajnigas ne

koni, sed kiu tre baldaŭ ilin ravos. Gloron al Dio! Helpata de superaj Spiritoj, kiuj protektos la novan doktrinon, mi estos unu el la esploristoj, kiuj faros al vi la vojiran planon.

*Jean Reynaud*

(Parizo; familia seanco. Dua spontanea komunikado)

La Spirito respondas al penso pri sia neatendita morto, en ne profunda aĝo, kio surprizis multajn personojn.

"Kiu diris al vi, ke mia morto ne estos en la estonteco, kaj pro siaj sekvoj, ia bonfaro por Spiritismo?

Ĉu vi rimarkis, mia amiko, la marŝon de la progreso, la direkton de la spiritisma kredo? Antaŭ ĉio Dio donis al vi la materiajn pruvojn: movojn de tablo, batojn kaj ĉiaspecajn fenomenojn, por veki atenton.

Tio estis kvazaŭ amuza antaŭparolo. La homoj bezonas pruvojn tuŝeblajn por kredi. Nun la afero estas ja alia. Post la materiaj faktoj, Dio parolas al la intelekto, al la prudento, al la malvarma racio; ne plu fizikaj efikoj, sed raciaj aferoj, kiuj devas konvinki kaj kunigi ĉiujn nekredemulojn, eĉ tiujn pli obstinajn. Kaj tio estas nur komenco. Notu bone tion, kion mi diras al vi: tuta serio da intelektaj, nerefuteblaj fenomenoj sekviĝos, kaj la jam tiel granda nombro da adeptoj de la spiritisma kredo ankoraŭ pliiĝos. Dio manifestiĝos al la distingiĝaj intelektoj, al la eminentuloj de spirito, de talento kaj de saĝo. Tio estos simila al lumradio disvastiĝanta, disverŝiĝanta sur la tutan Teron, kvazaŭ ia nerezistebla magneta fluidaĵo altiranta la plej kalcitrajn homojn al la esplorado de la senfino, al la studado de tiu mirinda scienco, kiu al ni instruas tiel sublimajn maksimojn.

Ĉiuj grupiĝos ĉirkaŭ vi, kaj, malestimante diplomon pri genieco, fariĝos humilaj kaj malgrandaj por lerni kaj kredi. Poste, pli malfrue, kiam ili estos kleraj kaj konvinkitaj, ili utilos sian aŭtoritaton kaj famon por porti

ankoraŭ pli malproksimen, al ĝiaj lastaj limoj, la celon, kiun vi proponis al vi — la regeneradon de la homa specio per racia kaj profunda kono de la estintaj kaj estontaj ekzistadoj. Jen estas mia sincera opinio pri la nuntempa stato de Spiritismo."

(Bordeaux)

*Elvoko*. Plezure mi alkuras al via alvoko, sinjorino. Vi pravas; la spirita konfuzo ne ekzistas por mi (tio respondis al la penso de la mediumo); memvola ekzilito sur la Tero, kien mi devis ĵeti la unuan solidan semon de la grandaj veraĵoj ĉi-momente kovrantaj la mondon, mi ĉiam konsciis la spiritan patrujon kaj rapide rekonis min inter fratoj.

— D. Mi dankas vian ĉeeston, kvankam mi ne kredas, ke la nura deziro konversacii kun vi kaŭzis vian venon; certe inter ni nepre ekzistas tiel granda diferenco, ke ĉe ĝia nura konsiderado mi sentas min posedita de respekto.

— R. Mia filino, dankon pro tiu bona ideo; sed vi ankaŭ devas scii, ke, kiom ajn granda estas la distanco, pro la elfiniĝo de la provoj pli-malpli feliĉaj kaj tuj diligente plenumitaj, ĉiam ekzistas ia potenca ĉenero nin liganta — la simpatio — kaj tiun ĉeneron vi ĵus mallarĝigis per via konstanta penso.

— D. Kvankam pluraj Spiritoj klarigis al ni siajn unuajn sensacojn ĉe la vekiĝo, ĉu vi povas diri al mi, kion vi spertis en tia situacio kaj kiel okazis la disiĝo de via Spirito?

— R. Tiel same, kiel ĝi okazas al aliaj. Mi sentis alproksimiĝi la momenton de la foriro; sed, estante pli feliĉa ol pluraj aliaj, tiu momento ne kaŭzis angorojn al mi, ĉar mi jam konis ĝiajn sekvojn, kvankam ĉi tiuj estis pli gravaj ol mi supozis. La korpo estas embaraso por la kapabloj de la Spirito kaj, kiom ajn pli grandaj estas la lumoj de li konservataj, ĉi tiuj estas pli-malpli senbriligitaj de la kontakto kun la materio. Mi fermis la okulojn, esperante feliĉan vekiĝon, kaj, se la dormo estis nedaŭra, la admiro estis grandega. La ĉielaj brilegoj antaŭ miaj

okuloj pompadis per sia tuta grandiozeco! Mia ravanta vido etendiĝis al la grandegeco de la mondoj, kies ekzistadon mi asertis kaj ankaŭ ilian loĝatecon. Tio estis ia miraĝo samtempe malkaŝanta kaj konfirmanta la ĝustecon de miaj pensoj. Kiom ajn konvinkita estas la homo, kiam li parolas, li iafoje havas dubon en la interno de sia koro, kaj malfidas, se ne la de li proklamatan veron, almenaŭ la neperfektajn rimedojn uzantajn por ĝin elmontri. Konvinkita pri la vero, kiun mi asertadis, mi plurfoje luktis kontraŭ min mem, kontraŭ la senkuraĝiĝon vidi, tuŝi, por tiel diri, la veron, ne povante fari ĝin same palpebla por tiuj, kiuj ĝin bezonas por iradi la vojon al ili konvenan.

— D. Ĉu vi dumvive konfesadis Spiritismon?

— R. Ekzistas granda diferenco inter konfesi kaj praktiki. Multaj konfesas unu doktrinon, kiun ili ne praktikas; mi do praktikadis kaj ne konfesadis. Ĉar kristano estas ĉiu homo sekvanta la leĝojn de la Kristo, eĉ ne konante lin, ankaŭ ni povas esti spiritistoj, kredante al la senmorteco de la animo, al la reenkarniĝoj, al la senĉesa progreso, al la surteraj provoj — purigiloj necesaj al nia pliboniĝo. Kredante ĉion tion, mi do estis spiritisto. Mi komprenis la vagantecon, ligilon inter reenkarniĝoj kaj purgatotio, kie la kulpa Spirito seniĝas je la malpuraj vestoj por revesti novan togon, kaj kie la Spirito evoluanta zorge teksas tiun togon, kiun li nepre portos kun la intenco ĝin konservi pura. Mi komprenis ĉion tion, kaj, ne konfesante, mi praktikis plu.

NOTO. Tiuj tri komunikaĵoj estis ricevitaj per tri mediumoj malsamaj kaj nekonataj inter si. Per la simileco de la penso kaj formo de la lingvaĵo, ni povas, almenaŭ supozeble, akcepti ilian aŭtentikecon.

La esprimo "zorge teksi la togon, kiun li nepre portos" estas feliĉa figuro spegulanta la diligentecon kun kiu la evoluanta Spirito preparas sian novan ekzistadon, kondukantan al progreso pli granda ol tiu farita. La neprogresintaj Spiritoj estas malpli detalemaj, kaj plurfoje ili malsukcese elektas provojn, kio devigas ilin rekomenci.

## Antoine Costeau

Ano de la Spiritisma Societo de Parizo, entombigita la 12-an de Septembro 1863 en la tombejo de Montmartre, en komuna tombo.

Li estis bonkora homo, kiun Spiritismo rekondukis al Dio; kompleta, sincera kaj profunda estis lia fido al Dio. Humila pavimisto, li praktikis karitaton per pensoj, paroloj kaj agoj laŭ siaj malgrandaj kapabloj, kaj ankoraŭ tiel li trovis rimedojn por helpi tiujn, kiuj posedis malpli ol li. Se la Societo ne akiris por li privatan tombon, tio estis, ĉar al ĝi ŝajnis pli utile uzi la monon por la vivantoj ol por kontentigi la vantemon de memamo, des pli ĉar ni spiritistoj scias, pli bone ol aliaj, ke komuna tombo tiel, kiel la plej pompaj maŭzoleoj, estas malfermita pordo al la ĉielo.

S-ro Canu, sekretario de la Societo kaj profunda materialisto en aliaj tempoj, faris ĉe la tombo la jenan paroladon:

"Kara frato Costeau, antaŭ kelkaj jaroj, multaj el ni, kaj mi mem la unua, ne venus antaŭ ĉi tiun malfermitan tombon, kiu reprezentus nur la finon de la homaj mizeroj, kaj poste la nenion, la teruran nenion, kie ne ekzistis eĉ animo merita aŭ pune elaĉetanta, kaj sekve nek Dio por rekompenci, puni aŭ pardoni. Hodiaŭ, dank' al nia sankta Doktrino, ni duonvidas ĉi tie la finon de niaj provoj, kaj por vi, kara frato, kies kadavro malsupreniras en la teron, la triumfon super la laboroj kaj la komencon de la rekompencoj, kiujn rajtas via kuraĝo, rezignacio, karitato, viaj virtoj, kaj super ĉio la gloron de ia saĝa, ĉiopova, justa kaj bona Dio.

Estu do, kara frato, la portanto de niaj dankoj al la Eternulo pro tio, ke Li permesis al Spiritismo disbati la mallumon de eraro kaj nekredemo, kiu nin regas. Antaŭ nelonge, kaj ĉe ĉi tiuj samaj cirkonstancoj, kun la kapo klinita kaj ŝirita koro, senkuraĝe ni al vi dirus: "Amiko, adiaŭ por ĉiam." Sed hodiaŭ ni diras al vi, kun la kapo

levita, radia je espero, kaj kun la koro plena de amo kaj kuraĝo: "Kara frato, ĝis baldaŭ, preĝu por ni." (*)

Unu el la mediumoj de la Societo ricevis en la sama loko, ĉe la tombo ankoraŭ duonfermita, la jenan komunikaĵon aŭditan de ĉiuj ĉeestantoj, inkluzive de tombistoj kun ĉapeloj demetitaj kaj profunda emocio. Efektive estis nova kaj miriga okazaĵo aŭdi la parolojn de mortinto, ricevitajn el la interno de lia propra tombo:

"Dankon, amikoj, dankon. Mia tombo ankoraŭ ne estas tute ermita, se post minuto la tero kovros mian kadavron. Vi do scias, ke mia animo ne estos entombigita en tiu polvo, sed ĝi ŝvebos en la Spaco por supreniri al Dio!

Kaj kiom mi konsolas min povi diri la jenon pri la morto de mia envolvaĵo: Ho! Mi ne mortis, mi vivas la veran vivon, la vivon eternan! Al enterigo de malriĉulo ne vidiĝas granda akompanantaro nek fieraj manifestiĝoj alproksimiĝas al lia tombo...

Inverse de tio, kredu al mi, *grandega amaso ne mankas ĉi tie*, kaj bonaj Spiritoj akompanis kun vi kaj kun tiuj kompatemaj virinoj la korpon tie kuŝantan.

Vi ĉiuj almenaŭ fidu kaj amu la bonan Dion!

Ho! Ni certe ne mortos nur pro tio, ke nia korpo eldetruiĝas, edzino amata! Cetere mi ĉiam estos apud vi por vin konsoli, por helpi al vi elporti la provojn. Por vi la vivo estos kruda, sed via koro estos plena de la ideoj pri la eterneco kaj amo de Dio. Kiom pasemaj estos viaj suferoj! Parencoj ĉirkaŭantaj mian tre amantan kunulinon amu ŝin, respektu ŝin, estu por ŝi kiel fratoj. Neniam forgesu la helpon, kiun vi ŝuldas al vi reciproke sur la Tero, se vi ja deziras eniri en la loĝejon de la Sinjoro.

Rilate al vi, spiritistoj, fratoj, amikoj, dankon pro tio, ke vi venis al ĉi tiu loĝejo el polvo kaj ŝlimo min

---

(*) Pliajn detalojn kaj aliajn paroladojn vidu en **Revue Spirite** de Oktobro 1863, p. 297

adiaŭi. Sed vi scias, kaj tre bone scias, ke mia senmorta animo vivas, kaj ke iafoje ĝi petos de vi preĝojn, kiujn vi neniam rifuzos por helpi ĝin en la grandioza vivo, kiun vi vidigis al ĝi jam de la vivo sur la Tero.

Al vi ĉiuj, kiuj estas ĉi tie, adiaŭ. Ni povos revidi nin en alia loko, kaj ne ĉe ĉi tiu tombo. Animoj vokas min por interparoli. Adiaŭ, preĝu por la suferantoj, kaj ĝis revido."

*Costeau*

Post tri tagoj, elvokite ĉe privata grupo, la Spirito de Costeau jene parolis pere de alia mediumo:

"Morto estas vivo. Mi faras nenion alian ol rediri tion, kion oni jam diris, sed por vi ne estas alia esprimo ol tiu, malgraŭ tio, kion asertas la materialistoj, tiuj, kiuj preferas resti blindaj. Ho! Miaj amikoj, kia bela spektaklo sur la Tero estas la flirtantaj standardoj de Spiritismo!

Profunda vastega scienco, kies unuajn vortojn vi apenaŭ legas. Kaj kiom da lumo ĝi portas al la bonvolaj homoj, al tiuj, kiuj, liberiĝante el la teruraj prizonoj de fiero, laŭte proklamas sian kredon je Dio! Homoj, preĝu, danku Lin pro tiom da bonfaroj. Kompatinda homaro! Ha, se al ci estus permesite kompreni!... Sed ne, ĉar ankoraŭ ne alvenis la tempo, kiam la favorkoreco de la Sinjoro devas etendiĝi sur ĉiujn homojn, por ke ili rekonu lian volon, kaj al ĉi tiu submetiĝu. Per ciaj lumaj radioj, benita scienco, ili ja rekonos tiun volon kaj ĝin komprenos.

En la bonfara varmo ili varmigos siajn korojn, fortikigante ilin en la dia fajro, kiu portas konsolojn kaj fidon.

En ciaj vivigaj radioj *majstro kaj laboristo* samiĝos kaj identiĝos, konvinkiĝintaj pri tiu frateca karitato diskonigita de la dia Mesio.

Ho! Miaj fratoj, pensu pri la grandega feliĉo, kiun vi posedas, kiel unuaj inicitoj en la verkon de regenerado.

Honoro estu farita al vi. Daŭrigu, kaj unu tagon, vidante la patrujon de la Spiritoj, kiel mi, vi ekkrios:

— Morto estas vivo, aŭ prefere sonĝo, ia inkubospeco daŭranta unu minuton, el kiu ni vekiĝos por vidi nin ĉirkaŭataj de amikoj nin gratulantaj, feliĉaj pro tio, ke ili brakumas nin. Tiel granda estis mia feliĉo, ke mi ne povis kompreni, ke Dio destinis por mi tiom da gracoj pro la malmulto, kiun mi faris. Ŝajnis al mi, ke mi sonĝis, kaj pro tio, ke iam mi iafoje sonĝis, ke mi estas mortinta, momente mi ne povis ne senti la timon reveni al la malfeliĉa korpo. Baldaŭ tamen mi kaptis la realaĵon kaj dankis Dion. Mi benis la majstron, kiu tiel bone sciis inspiri al mi la devojn de homo kredanta al la estonta vivo. Jes, mi lin benadis, lin dankadis, ĉar *La Libro de la Spiritoj* estigis en mia animo la ligilojn de amo al mia Kreinto.

Dankon, bonaj amikoj min altirintaj apud vin! Sciigu al niaj fratoj, ke plurfoje mi troviĝis ĉe nia amiko Sanson. Ĝis revido, kaj havu kuraĝon, ĉar la triumfo vin atendas. Feliĉaj tiuj, kiuj partoprenis la batalon!"

Poste S-ro Costeau ofte manifestiĝis ĉe la Societo kaj ĉe aliaj kunsidoj, ĉiam donante pruvojn pri tiuj superaj pensoj, kiuj karakterizas la progresintajn Spiritojn.

## F-ino Emma (*)

Pro akcidentoj kaŭzitaj de fajro, tiu junulino mortis post kruelaj suferoj. Iu decidis peti pri ŝia elvoko ĉe la Spiritisma Societo de Parizo, kiam ŝi spontanee manifestiĝis la 31an de Julio 1863, nelonge post sia morto.

"Jen mi ankoraŭ sur la scenejo de la mondo, mi, kiu opiniis min por ĉiam entombigita en mia vualo de senpekeco kaj juneco. La fajro de la Tero min savus el la fajro de la infero — tiel mi pensadis laŭ mia katolika fido —, kaj, se mi ne kuraĝis duonvidi la paradizajn brilegojn, mia timema animo alkroĉiĝis al la purgatoria kulpelaĉeto, dum ĝi petadis, suferadis kaj ploradis. Sed,

(*) F-ino Emma Livry

kiu donis al mia malvigliĝinta Spirito forton por elporti la angoroj? En la longaj noktoj da maldormo kaj dolora febro, kiu kliniĝis super la turmenta lito? Kiu refreŝigis miajn lipojn soifajn, varmegajn? Tio estis vi, mia Gvidanto, kies blanka aŭreolo min ĉirkaŭis; kaj estis vi aliaj, karaj kaj amikaj Spiritoj, kiuj venis murmuri en mian orelon vortojn de espero kaj amo.

La flamo, kiu konsumis mian malfortan korpon, ankaŭ senigis min je ĝiaj katenoj, kaj tiel *mi mortis, jam vivante la veran vivon*. Mi ne spertis konfuziĝon; mi eniris serena kaj absorbita en la radian tagon, kiu en sian helecon envolvas ĉiujn, kiuj post longa suferado sciis atendi iomete. Mia patrino, mia kara patrino estas la lasta surtera vibrado, kiu resonis sur mian animon. Kiom mi deziras, ke ŝi fariĝu spiritistino! Simile al matura frukto, kiu antaŭtempe apartiĝas de arbo, tiel mi disiĝis de la Tero. Mi ankoraŭ ne estis tuŝita de la demono de la orgojlo stimulanta la malfeliĉajn animojn trenatajn de la ebriigaj kaj brilaj sukcesoj de la juneco.

Mi do benas la fajron, la suferon, la provon, kiuj estis nenio alia ol kulpelpago. Simile al tiuj blankaj kaj malpezaj aŭtunfadenoj, mi flosas en la luma torento, kaj ne plu la steloj el diamanto rebrilas sur mia frunto, sed la oraj steloj de la bona Dio.”

*Emma*

## Doktoro Vignal

Malnova membro de la Societo de Parizo, mortinta la 27an de Marto 1865. En la antaŭtago de lia enterigo, klarvida somnambulo kaj vidiva mediumo, insiste invitita veni apud lin kaj priskribi tion, kion li vidos, diris:

“Mi vidas kadavron, en kiu okazas io eksterordinara; oni povas diri, ke ia kvanto da maso agitiĝas kaj io laŭŝajne klopodas por disiĝi de ĝi, sed renkontante malfacilaĵon venki la reziston. Mi ne distingas bone karakterizitan formon de Spirito.”

La elvoko okazis ĉe la Societo de Parizo, la 31an de Marto.

— D. Kara Sinjoro Vignal, ĉiuj viaj malnovaj kolegoj el la Societo de Parizo konservas pri vi la plej vivan sopiron, kaj mi aparte, pri niaj bonaj rilatoj, cetere neniam interrompitaj. Vin elvokante, ni unue celas atesti nian simpation, konsiderante nin feliĉaj, se vi povos kaj volos konversacii kun ni.

— R. Estimata amiko kaj inda majstro, tiel bona rememoro kaj atestoj pri simpatio estas al mi treege agrablaj. Dank' al viaj elvoko kaj helpo, faritaj per preĝoj, hodiaŭ mi povis veni senembarase ĉeesti ĉi tiun kunvenon el bonaj spiritistaj amikoj kaj fratoj. Kiel ĝuste diris la juna sekretario, mi senpacience deziris komunikiĝi; ekde la hodiaŭa vesperiĝo, mi uzis ĉiujn spiritajn fortojn por regi tiun deziron; ĉar la gravaj temoj pritraktataj en via konversacio forte interesis min, ili faris malpli peniga mian atendon. Pardonu min, kara amiko, sed mia dankemo postulis, ke mi min manifestu.

— D. Unue diru al ni, kiel vi sentas vin en la spirita mondo, kaj priskribu la disiĝon, viajn sensacojn en tiu momento, same kiel la tempon necesan por rekoni vian staton.

— R. Mi estas kiel eble plej feliĉa, vidante plene konfirmitaj la kaŝitajn pensojn koncepteblajn rilate al ia konsolanta doktrino.

Mi estas feliĉa, des pli ĉar nun mi vidas, sen iu ajn malhelpo, disvolviĝi antaŭ mi la estontecon de la spiritismaj scienco kaj filozofio.

Sed por hodiaŭ ni forlasu tiujn maloportunajn diskutojn: mi denove alparolos vin pri tiu temo, precipe pro tio, ke mi scias, ke mia ĉeesto donos al vi tiom da plezuro, kiom mi spertas, vin vizitante.

La disiĝo estis rapida; pli rapida ol mi povis atendi pro mia malmulta indeco. Mi estis efike helpata per via kunlaboro kaj la somnambulo donis al vi ideon tre klaran pri la fenomeno de disiĝo, por ke mi insistu pri ĝi. Tio estis ia speco de intermita balanciĝo, kvazaŭa treniĝo em

kontraŭajn direktojn. La ĉi ĉeestanta Spirito triumfis. Mi tute forlasis la korpon nur tiam, kiam ĝi malsupreniris en la teron; kaj jen mi venis apud vin.

D. Kion do vi diras pri via enterigo? Mi opiniis, ke mi devas ĝin ĉeesti. En tiu momento vi estis tro libera por ĝin taksi; ĉu la preĝoj, kiujn mi faris por vi (diskrete, memkompreneble), vin atingis?

— R. Jes; mi jam diris tion; via helpo tre utilis al mi, kaj mi revenis al vi, tute forlasante la malnovan skeleton. Cetere vi scias, min malmulte interesas la materiaj aferoj. Mi pensadis nur pri la animo kaj Dio.

— D. Rememoru, ke antaŭ kvin jaroj, en Februaro 1860, laŭ via peto, ni verkis studon pri vi (*). Tiam — kiam vi ankoraŭ troviĝis ĉe ni — via Spirito malligiĝis por veni paroli al ni. Ĉu vi povas kiel eble plej bone priskribi al ni la diferencon inter la nuntempa disiĝo kaj la tiama?

— R. Jes, mi memoras. Kaj kia granda diferenco inter unu kaj alia! En tiu stato, la materio ankoraŭ subpremadis min per siaj nerompeblaj katenoj, t.e. mi volis, sed ne povis tute liberiĝi.

Hodiaŭ mi estas libera; vasta nekonata kampo troviĝas antaŭ mi, kaj mi esperas, per la helpo de vi kaj de la bonaj Spiritoj, progresi kaj konvinkiĝi, kiel eble plej rapide, pri la sentoj, kiujn oni bezonas posedi, kaj pri la agoj, kiujn ni devas fari por elporti la provojn kaj meriti la rekompencon.

Kia majesteco! Kia grandiozeco! La sento superreganta estas preskaŭ de timo, kiam ni malfortaj tiaj, kiaj ni estas, volas fikse rigardi la lumplenajn lokojn.

— D. Plezure ni okupiĝos pri la temo ĉiam, kiam vi volos.

— R. Mi koncize kaj senorde respondis al viaj diversaj demandoj. Nun ne postulu pli de via fidela disĉiplo, ĉar mi ankoraŭ ne estas tute libera. Konversacii

(*) Vd **Revue Spirite** de Marto 1860.

plu estas al mi plezuro, sed mia gvidanto moderigas mian entuziasmon, kaj mi jam povis sufiĉe taksi liajn bonecon kaj justecon por tute submeti min al lia decido, kiom ajn granda estas mia ĉagreniĝo esti interrompita. Mi konsolas min, pensante, ke mi nerimarkite povos iafoje veni ĉeesti viajn kunsidojn.

Ĉiam, kiam eble, mi parolos al vi, ĉar mi vin estimas kaj deziras pruvi tion. Sed aliaj Spiritoj pli progresintaj postulas antaŭecon, kaj mi devas kurbiĝi antaŭ tiuj, kiuj permesis al mi doni liberan kuron al la torento da amasigitaj ideoj.

Amikoj, mi lasas vin kaj devas duoble danki ne nur vin spiritistojn, kiuj min elvokis, sed ankaŭ tiun Spiriton, kiu bonvolis cedi al mi sian lokon, Spiriton, kiu sur la Tero havis la saman nomon Pascal.

De tiu, kiu estis kaj ĉiam estos la plej sindona el viaj kunadeptoj.

*D-ro Vignal*

## Victor Lebufle

Juna, piloto en la haveno de Havre, mortinta en la aĝo de dudek jaroj.

Li loĝis kun sia patrino, vendistino, al kiu li dediĉis la plej karesajn kaj afablajn zorgojn, ŝin subtenante per la frukto de sia kruda laboro. Oni neniam vidis lin vizitadi drinkejojn nek sin doni al la ekscesoj tiel kutimaj en sia profesio, ĉar li ne volis elspezi eĉ la plej malgrandan parton de salajro, kiun li destinis por karitata celo. Sian tutan liberan tempon li dediĉis al sia patrino, ŝparante al ŝi laciĝojn. Jam de longe atakita de malsano, kiu, laŭ lia scio, lin certe mortigos, li kaŝadis antaŭ ŝi la suferojn, por ne maltrankviligi ŝin kaj por ke ŝi ne volu sendevigi lin fari parton de sia laboro. En la aĝo de la pasioj, estis necesaj al tiu junulo granda kvanto da moralaj kvalitoj kaj potenca energio por kontraŭstari la pereigajn delogojn de la medio, kie li vivis. Dotita per sincera kompato, li havis edifan morton.

En la antaŭtago de sia morto, li postulis, ke lia patrino iru ripozi, dirante al ŝi, ke ankaŭ li bezonas dormi.

Tiam ŝi havis vizion; ŝi troviĝis, ŝi diris, en granda mallumo, kiam ŝi ekvidis luman punkton iom post iom kreskantan, ĝis la ĉambro fariĝis prilumata per brila heleco, en kiu distingiĝis la figuro de ŝia filo, supreniranta al la senfina Spaco. Ŝi komprenis, ke lia fino alproksimiĝas, kaj fakte, en la sekvanta tago, tiu nobla animo postlasis la Teron, murmurante ian preĝon.

Unu spiritista familio, kiu konis lian belan konduton, interesiĝante pri lia patrino, kiu restis sola, decidis lin elvoki nelonge post lia morto, kaj li spontanee sin manifestis, donante la jenan komunikaĵon:

"Vi deziras ekscii, kiel mi nun estas: feliĉa, feliĉega! Oni devas konsideri la suferojn kaj angorojn, kiuj estis la origino de la transtombaj benoj kaj felico. Feliĉo! Ha! Vi ne komprenas la signifon de tiu vorto. La surteraj feliĉoj kiom malproksime estas de tiuj, kiujn ni spertas kiam ni revenas al Jesuo kun pura konscienco, kun la konfido de la servisto plenuminta sian devon, ĝojege esperante la aprobon de Tiu, kiu estas ĉio.

Ha! Miaj amikoj, la vivo estas peniga kaj malfacila, kiam oni ne konsideras ĝian celon; sed vere mi diras al vi, ke se vi sekvos la leĝon de Dio, tiam, kiam vi venos apud nin, vi estos pli, multe pli rekompencitaj por la suferoj kaj meritoj, kiujn, vi eble opinios, ke vi akiris por alia vivo. Estu bonaj kaj praktikantoj de karitato, de tiu karitato tiel nekonata ĉe la homoj, kaj kiu estas nomata bonvolemo. Helpu viajn similulojn, farante por aliaj pli multe ol vi farus por vi mem, ĉar vi nescias la aliulan mizeron kaj konas la vian.

Helpu mian patrinon, kompatindan patrinon, sola ĉagreno al mi venanta el sur la Tero. Ŝi devas sperti aliajn provojn, kaj estas necese, ke ŝi atingu la ĉielon. Adiaŭ, mi iras ŝin vidi."

*Victor*

*La gvidanto de la mediumo*. Ne ĉiam la amaraj suferoj sur la Tero estas ia kulpelpago. La Spiritoj, kiuj, plenumante la volon de la Sinjoro, malsupreniras sur la Teron, kiel tiu, estas feliĉaj, spertante malbonojn, kiuj por aliaj estus provado. La dormo ilin revigligas antaŭ la Ĉiopova, kaj donas al ili fortojn por ĉion elporti por ilia pli granda gloro. En lia lasta ekzistado, la misio de tiu Spirito ne estis pompa, sed kiel ajn senfama ĝi estis, eĉ tiel ĝi ne havis malpli da indeco, ĉar li ne povis esti stimulita de orgojlo. Antaŭ ĉio li devis esti danka al tiu, kiu estis lia patrino; poste li devus pruvi, ke en la plej malbonaj medioj povas ekzisti animoj puraj, kun noblaj kaj altaj sentoj, kapablaj rezisti ĉiujn delogojn. Tio pruvas, ke la moralaj kvalitoj havas antaŭajn kaŭzojn, kaj tia ekzemplo ne estos senfrukta.

## S-ino Anais Gourdon

Ŝi estis tre juna kaj rimarkinda pro la mildeco de siaj karakteroj kaj eminentaj moralaj ecoj ŝin distingantaj, kaj mortis en Novembro 1860. Ŝi apartenis al familio de ministroj el la ĉirkaŭaĵoj de Saint-Étienne, cirkonstanco faranta interesa ŝian spiritan pozicion.

*Elvoko*. — R. Mi ĉeestas.

— D. Via patro kaj via edzo petis, ke mi vin elvoku, kaj ili opinius sin tre feliĉaj, se ili ricevus ian komunikaĵon.

— R. Ankaŭ mi estas feliĉa, ĝin donante.

— D. Kial vi tiel frue forŝoviĝis de la familiaj karesoj?

— R. Ĉar mi finis la surterajn provojn.

— D. Ĉu vi iafoje povas vidi viajn geparencojn?

— R. Ho! Mi ĉiam estas apud ili.

— D. Ĉu vi estas feliĉa, kiel Spirito?

— R. Mi estas feliĉa. Mi amas kaj esperas. La ĉieloj ne kaŭzas timon al mi, kaj plena de fido mi esperas, ke blankaj flugiloj levu min ĝis ili.

— D. Kion vi komprenas, kiel blankajn flugilojn?

— R. Tion, ke mi fariĝu pura Spirito, lumbrila kiel la ĉielaj kurieroj min blindigantaj.

La flugiloj de la anĝeloj, ĉefanĝeloj, serafoj, kiuj estas nenio alia ol puraj Spiritoj, evidente estas nur atributo imagita de la homoj por doni ideon pri la rapideco, kun kiu ili translokiĝas, ĉar ilia etera naturo liberigas ilin de ĉia rimedo por trairi la spacojn. Ili tamen povas aperi al la homoj kun tia akcesoraĵo, por respondi al ilia penso, tiel same, kiel la Spiritoj prenas homan aspekton por fariĝi rekoneblaj.

— D. Ĉu viaj geparencoj povas fari ion por vi?

— R. Jes, karaj fratoj, ne plu ĉagrenante min per sia lamentado, ĉar ili scias, ke mi ne estas tute perdiĝinta por ili. Mi deziras, ke la rememoro pri mia estaĵo estu por ili milda kaj dolĉa. Mi pasis, kiel floro sur la Tero, kaj el tiu pasado devas resti nenio ĉagrena.

— D. Kiel via lingvaĵo povas esti tiel poezia kaj tiel malmulte harmonia kun via situacio sur la Tero?

— R. Kiu parolas, tio estas ja mia animo. Jes, mi havis akiritajn konojn, kaj Dio plurfoje permesas, ke afablaj Spiritoj enkarniĝu ĉe pli krudaj homoj, por igi ĉi tiujn antaŭsenti la atingeblajn delikataĵojn, kiujn pli malfrue ili komprenos.

Sen ĉi tiu tiel logika ekspliko, konforma al la bonvolemo de Dio por la homoj, oni malfacile komprenus tion, kio unuavide ŝajnos anomalio. Kio efektive povas esti pli bela, poezia kaj gracia ol la lingvaĵo de tiu junulino edukita inter krudaj laboristoj? Plurfoje okazas la malo: Malsuperaj Spiritoj enkarniĝas inter plej progresintaj homoj, sed por kontraŭa celo. Ĉar Li celas ilian propran progreson, tial Dio metas ilin en kleran medion, kaj iafoje kiel instrumenton de provo en tiu mondo. Kiu alia filozofio povas solvi tiajn problemojn?

## Maurice Gontran

Li estis solfilo kaj mortis en la aĝo de dek ok jaroj, de ia pulma infektaĵo. Dotita per ne ordinara inteligen-

teco, frua prudento, granda amo al studo, milda karaktero, amemo kaj simpatio, li posedis ĉiujn ecojn, kiuj antaŭvidigis brilan estontecon. Kun granda sukceso li finis, tre frue, la unuajn studojn, enmatrikuliĝante tuj poste en la Politeknika Lernejo. Lia morto kaŭzis al la geparencoj unu el tiuj doloroj postlasantaj profundajn kaj tre afliktajn trajtojn, ĉar ili atribuis la antaŭtempan morton de li, ĉiam dotita per delikata naturo, al la penoj ĉe studoj, al kiuj ili lin instigis.

Sin riproĉante, ili tiam diradis: "Ĉu nun utilas al li ĉio, kion li lernis? Estus pli bone, se li restus malklera, ĉar sciaro ne estis necesa al li por vivi, kaj tiel li sendube restus inter ni; li estus la konsolo de nia maljuneco." Se ili konus Spiritismon, ili rezonus tute alie. En ĝi ili tamen trovis la efektivan konsolon. La jena diktato estis donita de la junulo al unu el liaj amikoj, kelkajn monatojn post lia morto.

— D. Mia kara Maurice, la milda amemo, kiun vi dediĉis al viaj gepatroj, alportas al mi la certecon, ke vi deziras revigligi ilian animon, se vi povos ĝin fari. La ĉagreno, mi diru pli ĝuste, la malespero, kiun via forpaso kaŭzis al ili, videble ruinigas ilian sanon, igante ilin malŝati la vivon. Kelkaj konsolaj vortoj certe povos renaskigi en ili la esperon...

— R. Mia amiko, mi senpacience atendadis ĉi tiun okazon komunikiĝi, okazon, kiun vi nun ebligas al mi. La doloro de miaj gepatroj afliktas min, sed ĝi malakriĝos, kiam ili estos certaj, ke mi ne perdiĝis por ili; alproksimiĝu al ili por konvinki ilin pri ĉi tiu veraĵo, kion vi certe atingos. Estis necesa tiu okazintaĵo por inspiri al ili ian kredon, kiu donos al ili feliĉon kaj malebligos ilin murmuri kontraŭ la dekretoj de la Providenco. Vi scias, ke mia patro estis tre skeptika pri la estonta vivo. *Dio donis al li tiun ĉagrenon por forpreni lin el lia eraro*. Ĉi tie ni ree renkontiĝos, en ĉi tiu mondo, kie ne estas konataj vivoĉagrenoj, kaj kie mi antaŭis miajn gepatrojn; energie asertu al ili, ke la plezuro revidi min estos al ili rifuzita, kiel puno pro ilia manko de fido al la boneco de Dio. Al mi estus malpermesite komuniki kun

ili dum la tempo de ilia restado sur la Tero. Malespero estas ribelo kontraŭ la volo de la Ĉiopova, kaj ĝi estas ĉiam punata per *daŭrigado de la kaŭzon ĝin produktinta*, ĝis fariĝos kompleta submetiĝo.

Malespero estas efektiva memmortigo, ĉar ĝi konsumas la korpajn fortojn, kaj kiu mallongigas sian vivon celante pli frue eviti amaraĵojn de la doloro, tiu spertos plej kruelajn disreviĝojn; male oni devas fortikigi la korpon por pli facile elporti la pezon de la provoj.

Miaj karaj kaj bonaj gepatroj, ĉi-momente mi direktiĝas al vi. De kiam mi forlasis mian kadravon, neniam mi apartiĝis de vi. Mi troviĝas apud vi pli ofte ol kiam mi estis sur la Tero. Konsoliĝu do, ĉar mi ne estas mortinta, aŭ pli bone mi estas pli viva ol vi. Nur mia korpo mortis, sed la Spirito vivas ja ĉiam. Cetere li estas libera, feliĉa, ne submetita al malsanoj kaj doloroj.

Anstataŭ vin turmenti, ĝoju, sciante, ke mi estas libera de zorgoj kaj afliktoj, en loko, kie la koro estas saturita de purega ĝojo, sen ombro de la malagrablaĵo.

Miaj bonaj amikoj, ne priploru tiujn antaŭtempe mortintajn, ĉar tio estas graco, kiun Dio permesas al ili, deturnante ilin for de la turmentoj de la surtera vivo. Ĉi-foje mia tiea ekzistado ne devus daŭri pli longan tempon, ĉar mi antaŭe akiris ĉion necesan por plenumi en la Spaco ian pli altan mision. Se mi disponus pli da tempo, vi ne povus prezenti al vi la danĝerojn kaj delogojn, al kiuj mi min elmetos.

Ĉu vi ja povus taksi mian forton, ke mi ne falu en tiu lukto, kiu kaŭzus al mi kelkajn jarcentojn da malprogreso? Kial do lamenti tion, kio estas avantaĝa por mi?

En tia okazo, ia senkonsola doloro signifus nekredemon pravigeblan nur por la ideo pri la nenieco. Kiuj tiel ne kredas, tiuj estas ja bedaŭrindaj, ĉar por ili ne povas ekzisti ebla konsolo; iliaj karuloj ŝajnas al ili neripareble perditaj, ĉar la tombo forprenas de ili la lastan esperon!

— D. Ĉu via morto estis dolora?

— R. Ne, mia amiko; antaŭ ol morti mi suferis nur la efikojn de la malsano, sed *tiu sufero malpliiĝis, laŭmezure kiel alproksimiĝis la lasta momento*: poste iun tagon mi ekdormis, ne pensante pri la morto. Kaj tiam mi havis plezurigan sonĝon! Mi sonĝis, ke mi estas resaniĝinta, ke mi ne plu suferas, kaj plezure spiradis, per plenaj pulmoj, ian parfumitan, puran aeron: ia nekonata forto transportis min tra la Spaco. Brila lumo radiis ĉirkaŭe, ne lacigante tamen miajn okulojn! Mi vidis mian avon, ne plu palega, senfortiĝinta, sed kun juna kaj eleganta aspekto. Kaj li etendis al mi la brakojn, ame alpremante min al sia koro.

Amaso da aliaj personoj gajaspektaj lin akompanis, kaj ĉiuj kun bonvolemo kaj afableco min akceptis; ŝajnis, ke mi ilin renkontis, kaj feliĉa pro tio, ke mi ilin revidas, ni interŝanĝis gratulojn kaj atestojn pri amikeco! Nu bone! Kion mi rigardis, kiel ian sonĝon, tio estis realaĵo, ĉar el tia sonĝo mi ne devus vekiĝi sur la Tero: mi vekiĝis ja en la spirita mondo.

— D. Ĉu via malsano ne fontas el via granda konstanteco je la studo?

— R. Ho! Ne, certigu vin. Estis kalkulita la tempo, kiun mi devis pasigi sur la Tero, kaj nenio povus reteni min tie. Tion sciis mia Spirito en la momentoj de disiĝo kaj mi konsideris min feliĉa kun la ideo pri la baldaŭa liberiĝo.

Sed la tempo, kiun mi tie pasigis, ne estis senprofita, kaj hodiaŭ mi gratulas min pro tio, ke mi ne ĝin perdis.

La seriozaj studoj kuraĝigis al mi la animon, pliigante ĝiajn konojn, kaj, se pro mia mallonga ekzistado mi ne povis ilin apliki, mi nepre aplikos ilin pli malfrue kaj pli utile.

Adiaŭ, kara amiko: mi foriras apud miajn gepatrojn por antaŭklinigi ilin al la ricevado de ĉi tiu komunikaĵo.

*Maurice*

## ĈAPITRO III

## SPIRITOJ EN MEZBONAJ KONDIĈOJ

### Joseph Bré

(Mortinta en 1840 kaj elvokita en Bordeaux,
de sia nepino, en 1862.)

*La honesta homo laŭ Dio*
*aŭ laŭ la homoj*

1. — Kara avo, ĉu vi povas diri al ni, kiel vi statas en la mondo de la Spiritoj, donante al ni iajn utilajn detalojn por nia progreso?

— R. Ĉion, kion vi volas, kara infano. Mi suferas pro mia nekredemo; sed granda estas la boneco de Dio, kiu konsideras la cirkonstancojn. Mi suferas, sed ne kiel vi povus prezenti al vi: ĝi estas la bedaŭro, ke mi ne pli bone profitis mian tempon tie, sur la Tero.

2. — Ĉu eble? Ĉu vi do ne vivis ĉiam honeste?

— R. Jes, laŭ la opinio de la homoj; *sed ekzistas abismo inter honesteco antaŭ la homoj kaj honesteco antaŭ Dio*. Ĉar vi deziras instruiĝi, mi penos elmontri al vi tiun malsamon. Tie ĉe vi oni opinias honesta tiun, kiu respektas la leĝojn de sia lando, respekto arbitra ĉe multaj. Honestulo estas tiu, kiu malkaŝe ne malutilas proksimulon, kvankam tiu multfoje forprenas de ĉi tiu feliĉon kaj honoron, ĉar la kriminala kodo

kaj la publika opinio ne trafas la kulpan hipokritulon. Povante gravurigi epitafon pri virto sur tombŝtonon, multaj opinias, ke ili pagis sian ŝuldon al la homaro! Eraro! Ne sufiĉas al homo, por esti honesta antaŭ Dio, ke li respektis la leĝojn de la homoj; antaŭ ĉio estas necese, ke li ne malobeis la diajn leĝojn. Honestulo en la okuloj de Dio estas tiu homo, kiu, posedite de abnegacio kaj amo, dediĉas sian ekzistadon al bono, al progreso de siaj similuloj; kiu, animite de zorgo sen limoj, estas aktiva ĉe la plenumado de siaj materiaj devoj, instruante kaj praktikante al aliaj amon al laboro; aktiva ĉe la bonaj agoj, ne forgesante sian kondiĉon de servisto, de kiu la Sinjoro iun tagon petos kalkulon pri la uzo de lia tempo; fine aktiva ĉe la praktikado de amo al Dio kaj al la proksimulo.

Tiel la homo honesta antaŭ Dio devas zorge eviti vundajn vortojn, venenon kaŝitan sub floroj, kiu detruas reputaciojn kaj ĉagrenas iun, multfoje kovrante lin per ridindaĵo. La honesta homo, laŭ Dio, ĉiam devas teni fermita sian koron kontraŭ ĉiaj vermoj de fiero, de envio, de ambicio; devas esti pacienca kaj bonvola al tiuj, kiuj lin atakus; devas pardoni el la fundo de sia animo, sen penoj kaj super ĉio sen vanta elmontrado, al iu ajn, kiu lin ofendus; fine devas praktiki la koncizan kaj grandiozan ordonon, kiu estas "Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso, kaj vian proksimulon kiel vin mem". (*)

Jen, kara infano, resume, kiel honesta homo devas konduti antaŭ Dio. Nu bone: ĉu tia mi estis? Ne. Mi konfesas ne ruĝiĝanta, ke mi malplenumis multajn el tiuj devoj; ke mia forgeso pri Dio pelis min al pliaj eraroj, kiuj, kvankam ne submeteblaj por la homaj leĝoj, tamen malrespektas la leĝon de Dio. Kompreninte tion, mi multe suferis, kaj tiel pli konsolita mi hodiaŭ atendas la favorkorecon de tiu bona Dio, kiu konas mian penton. Transdiru, kara infano, rediru ĉion tion al ĉiuj havantaj

(*) Mateo, 22:37-39. — **La Trad.**

sian konscion ŝuldiĝinta, ke ili rebonigu siajn erarojn per bonaj faroj, ke la favorkoreco de Dio etendiĝu super ilin, Liaj patraj okuloj kalkulos iliajn provojn. Lia potenca mano forviŝos iliajn erarojn.

## S-ino Hélène Michel

Dudekkvinjara junulino, subite mortinta en sia hejmo, sen suferoj, sen antaŭe konata kaŭzo. Riĉa kaj iom frivola, la ventanimeco de karaktero inklinigis ŝin pli al la senvaloraĵoj de la vivo ol al la seriozaj aferoj. Sed ŝi posedis bonan koron kaj estis dolĉa, amena kaj karitatema.

Tri tagojn post sia morto, elvokite de konataj personoj, ŝi esprimis jene:

"Mi ne scias, kie mi estas... kia konfuzo min ĉirkaŭas! Vi vokis min kaj mi venis. Mi ne komprenas, kial mi ne estas hejme; oni bedaŭras mian foreston, dum mi ĉeestas, ne povante fariĝi rekonata. Mia korpo ne plu apartenas al mi, kaj tamen mi sentas ĝian malvarmon... Mi volas forlasi ĝin kaj mi ĉiam pli ligiĝas al ĝi... Mi estas kvazaŭ du personoj... Ho! Kiam mi fine komprenos tion, kio okazas al mi? Estas necese, ke mi ankoraŭ iru tien... mia alia "memo", kio al ĝi okazos dum mia foresto?Adiaŭ."

Tiu sento pri duoblaĵo, kiu ankoraŭ ne estas detruita per kompleta disiĝo, ĉi tie estas evidenta. Nekonstanta karaktero, kun pozicio kaj riĉaĵo konsentantaj al ŝi kontentigon de ĉiuj kapricoj, devis ankaŭ favori ŝiajn inklinojn al frivoleco. Ne mirigas do, ke ŝia malligiĝo estis malrapida, tiel ke, tri tagojn post sia morto, ŝi ankoraŭ sentis sin ligita al sia korpa envolvaĵo. Sed, ĉar ŝi ne posedis gravajn malvirtojn kaj estis bonkaraktera, tiu situacio neniel estis pena kaj ne devis longe daŭri. Post kelkaj tagoj, kiam ŝi estis elvokita, tiam ŝiaj ideoj jam estis tute aliaj. Jen tio, kion ŝi diris:

"Dankon, ke vi preĝis por mi. Mi rekonas la bonecon de Dio kiu evitigis al mi la suferojn kaj la maltrankvil-

ojn, kiuj sekvus la malligiĝon de mia Spirito. Por mia kompatinda patrino rezignacii estos tre malfacile; sed ŝi estos konsolita, kaj tio, kio en ŝiaj okuloj estas granda malfeliĉo, estis fatala kaj nepre necesa, ke la aferoj de la Ĉielo sin turnis en tion, kio devas esti: ĉio. Mi estos apud ŝi ĝis la fino de ŝia surtera provado, helpante ŝin elteni ĝin.

Mi ne estas malfeliĉa, sed mi multon devas fari por alproksimigi min al la situacio de la feliĉuloj. Mi petos al Dio konsenti al mi reveni sur la Teron por regajni la tempon, kiun mi tie perdis, en mia lasta ekzistado.

La fido subtenu vin, miaj amikoj; fidu la efikecon de la preĝo, precipe tiu venanta el la koro. Dio estas bona."

— D. Ĉu vi longe restis, ne rekonante vin?

— R. Mi komprenis la morton en la sama tago, kiam vi preĝis por mi.

— D. Ĉu via konfuzostato estis dolora?

— R. Ne, mi ne suferis, mi pensis, ke mi sonĝas kaj mi atendadis la vekiĝon. Mia vivo ne estis senigita je doloroj, sed ĉiu enkarnulo en via mondo devas suferi. Mi rezignaciis pri la volo de Dio, kaj mia rezignacio estis de Li konsiderata. Mi dankas vin por la preĝoj helpintaj min rekoni min mem. Dankon; mi plezure ĉiam revenos. Adiaŭ."

*Hélène*

## Markizo de Saint-Paul

(Mortinta en 1860 kaj elvokita, laŭ peto de ia sia fratino, membro de la Societo de Parizo, en la 16-a de Majo l861.)

1. *Elvoko*. — R. Jen mi ĉi tie.

2. — Via fratino petis min elvoki vin, ĉar, kvankam mediumino ŝi tamen ankoraŭ ne estas sufiĉe disvolviĝinta.
— R. Mi respondos kiel eble plej klare.

3. — Mi unue deziras scii, ĉu vi estas feliĉa.
— R. Mi estas en vaganteco (*), transiĝa stato, kiu donas nek absolutajn feliĉon nek punon.

4. — Ĉu vi longe restis nekonscianta vian staton?
— R. Mi longe restis konfuzita kaj mi nur rekonsciiĝis por beni la kompaton de tiuj, kiuj, min rememorinte, preĝis por mi.

5. — Ĉu vi povas taksi la tempon de tiu konfuziĝo?
— R. Ne.

6. — Kiujn geparencojn vi rekonis la unuaj?
— R. Miajn patrinon kaj patron, kiuj, kiam mi vekiĝis, min akceptis, enkondukante min en la novan vivon.

7. — Al kio atribui la fakton, ke vi ekstreme malsana laŭŝajne konversaciis kun amataj personoj sur la Tero? — R. Al la antaŭa kono de la malkaŝo de la mondo, en kiu mi estis loĝonta. Vidiva mediumo antaŭ la morto, miaj okuloj nur nebuliĝis en la momento de mia disiĝo je la korpo, ĉar la karnaj ligiloj estis ankoraŭ tre fortaj.

8. — Kiel klarigi la rememorojn pri infaneco, kiuj prefere okazis al vi? — R. Al la fakto, ke la komenco pli identiĝas kun la fino, ol kun la mezo de la vivo.

— Kiel tion klarigi? — R. Estas gave diri, ke la mortantoj memoras kaj vidas, *kiel konsolan reflekton*, la infanan purecon de siaj unuaj jaroj.

Eble, pro providenca simila motivo, la maljunuloj, laŭmezure kiel ili proksimiĝas al la fino de sia vivo, iafoje havas klaran rememoron pri la plej malgravaj epizodoj de sia infaneco.

---

(*) Stato de Spiritoj vagantaj, t.e. ne enkarniĝintaj, dum intertempoj de iliaj enkorpaj ekzistadoj. — **La Trad.**

9. — Kial, aludante la korpon, vi ĉiam uzis pronomon de la tria persono? — R. Ĉar mi estis vidiva mediumo, kiel mi diris al vi, kaj mi klare vidis la diferencojn inter fiziko kaj moralo; tiuj diferencoj, tre miksitaj inter si de la vivo-fluidaĵo, fariĝas tre distingiĝaj en la okuloj de la klarvidaj mortantoj.

Jen nevulgara aparteco de la morto de tiu sinjoro. En siaj lastaj momentoj, li ĉiam diris: Li soifas, estas necese doni al li trinki; li sentas malvarmon, estas necese varmigi lin; li suferas de tia kaj tia regiono ktp. Kaj kiam oni diris al li: Ĉu ne vi, kiu soifas? — li respondis: "Ne mi, li." Ĉi tiu ekzemplo reliefigas la du ekzistadojn; la pensanta *memo* estas en la Spirito, ne en la korpo; la Spirito duone malliberiĝinta rigardis la korpon kiel alian individuon, kiu ĝustadire ne apartenis al li; estis do necese sensoifigi lian korpon mem, sed ne la Spiriton. Ĉi tiu fenomeno ankaŭ estas rimarkata ĉe kelkaj somnambuloj.

10. – Tio, kion vi diris pri la vaganteco de via Spirito kaj ties rilata konfuziĝo, farus nin dubi pri via feliĉo, kontraŭante tion, kion oni povus konkludi el viaj kvalitoj. Krome ekzistas vagantaj Spiritoj feliĉaj kaj malfeliĉaj. — R. Mi estas en transiĝa stato; ĉi tie la homaj virtoj estas taksataj laŭ sia ĝusta valoro. Vere ĉi tiu stato estas milfoje preferinda al tiu de mia surtera enkarniĝo; sed, ĉar mi ĉiam celis tion vere bona kaj bela, mia animo nur kontentiĝos, kiam ĝi atingos la piedojn de la Kreinto.

## S-ro Cardon, kuracisto

Li pasigis parton de sia vivo em komerca ŝiparo, kiel kuracisto en balenoŝipo, akirinte en tia medio ideojn iom materialismajn; transloĝinte en la urbon J..., li tie praktikis la modestan profesion de internlanda kuracisto. Post kelka tempo, li certiĝis, ke li estas afekciata de hipertrofio de la koro, kaj sciante, ke la malsano estas nekuracebla, li donis sin al malvigliĝo, antaŭ la perspektivo de morto, en nekonsolebla melankolia stato. Li antaŭ-

diris la difinitan tagon de sia morto, antaŭe ĉirkaŭ du monatoj, kaj kiam venis la momento, li kunigis sian familion por diri al ĝi la lastan adiaŭon.

Kiam liaj edzino, patrino, tri infanoj kaj aliaj geparencoj alproksimiĝis al lia lito, kaj la unua provis lin levi, li pli malvigliĝis, fariĝante mallume viola kaj fermante la okulojn, tial oni opiniis lin mortinta. Tiam la edzino intermetis sin por kaŝi al siaj infanoj tiun scenon.

Post minutoj, la malsanulo remalfermis la okulojn; lia mieno prilumita, por tiel diri, prenis radiantan esprimon de beateco, kaj li ekkriis: — "Ho, miaj infanoj, kia beleco! feliĉo! Ho, morto! kia bonfaro! kia milda afero! Mortinte, mi sentis, ke mia animo leviĝis tre alten, sed Dio permesis al mi reveni por al vi diri: *Ne bedaŭru mian morton, kiu estas liberigo*. Ha! Mi ne povas priskribi al vi la grandiozecon de ĉio, kion mi vidis, la impresojn, kiujn mi spertis! Sed vi ne povus ilin kompreni... Ho! miaj infanoj, ĉiam kondutu, tiel ke vi meritu tiun neesprimeblan feliĉon destinitan al bonaj homoj; vivu laŭ la reguloj de karitato; el tio, kion vi havas, donu parton al bezonantoj.

Kara edzino, mi restigas vin en nemulte laŭdinda situacio; ni havas ricevotajn ŝuldojn, sed mi petegas vin ne turmenti niajn ŝuldantojn; se ili estas ĉe malfacilaĵoj, atendu ĝis ili povos pagi; kaj pardonu tiujn, kiuj ne povas pagi. Dio vin rekompencos. Vi, mia filo, laboru por subteni vian patrinon; estu ĉiam honesta kaj evitu fari ion, kio eble makulus nian familion. Ricevu ĉi tiun kruc-on, heredaĵon de mia patrino; neniam ĝin forlasu, kaj Dio volu, ke ĝi faru vin ĉiam rememori miajn lastajn konsilojn: Miaj infanoj, reciproke helpu vin, subtenu unu alian, ke la bona harmonio regu vin; ne estu vantemaj nek fieraj; pardonu viajn malamikojn, se vi volas, ke Dio vin pardonu..."

Poste alproksimigante ilin al si, li prenis iliajn manojn kaj diris plu: — "Infanoj, mi vin benas." — Kaj liaj okuloj fermiĝis, ĉi tiun fojon por ĉiam; sed lia vizaĝo

konservis tiel imponan esprimon, ke nombra amaso posedita de admiro venis vidi lin ĝis la momento, kiam li estis envolvita en mortotukon.

Post kiam iu amiko de la familio donis al ni ĉi tiujn treege interesajn informojn, tiam ni memoris, ke elvoko fariĝus instrua al ni ĉiuj kaj utila al la Spirito mem.

1. *Elvoko.* — R. Mi estas apud vi.

2. — Oni rakontis al ni la cirkonstancojn, en kiu okazis via morto, kaj ni forte miris. Ĉu vi bonvolas priskribi al ni ankoraŭ pli detale tion, kion vi vidis dum la intertempo de tio, kion ni povus nomi viaj du mortoj? — R. Tion, kion mi vidis... Ĉu vi povus ĝin kompreni? Mi ne scias, ĉar mi ne trovus esprimojn proprajn al kompreno de tio, kion mi povis vidi dum la momentoj, en kiuj estis eble al mi forlasi la fizikan envolvaĵon.

3. — Kaj ĉu vi scias, kie vi estis? Ĉu malproksime de la Tero, sur alia planedo, aŭ en la Spaco? — R. La Spirito ne mezuras distancojn, nek konas ilian longecon tiel, kiel vi. Forprenite de la supernatura aganto, kiun mi ne komprenas, mi vidis brilojn de ia ĉielo, de tiuj, kiujn nur sonĝe ni povas prezenti al ni. Tiu iro tra la senfino okazis kun tia rapideco, ke mia Spirito ne povis kalkuli kiom da sekundoj ĝi daŭris.

4. — Kaj vi nun ĝuas la feliĉon, kiun vi atendis? — R. Ne; mi ja deziras ĝin ĝui, sed Dio ne devas tiamaniere rekompenci min. Mi multfoje ribelis kontraŭ la benataj pensoj, kiujn diktis mia koro, kaj la morto ŝajnis al mi ia maljustaĵo.

Mi nekredanta doktoro nutris ĉe la kuracarto profundan antipation kontraŭ la dua naturo, kiu estas nia inteligenta dia impulso; al mi la senmorteco de la animo estis nenio alia ol fikcio taŭga por logi nemulte instruitajn homojn, kvankam la neniaĵo min timigis kaj mi malbenis la misteran aganton, kiu ĉiam influas. La Filozofio malebligis al mi, tion mi ne konsciis, kompreni la grand-

econ de la Eternulo, kiu povas distribui doloron kaj ĝojon por instrui la homaron.

5. — Ĉu vi rekonis vian staton tuj post via definitiva malligiĝo? — R. Ne; mi nur rekonis min dum la transiro, kiun mia korpo spertis por trakuri la eteran regionon. Sed tio ne tuj okazis, kaj estis necesaj kelke da tagoj por mia vekiĝo.

Dio faris al mi favoron, tial mi klarigos al vi: Mia malnova malkredo ne plu ekzistis; mi fariĝis kredanto antaŭ la morto, post kiam mi grave kaj science esploris la aferon, kiu min turmentis, post kiam mi fine trovis ne surterajn kialojn, sed dian kialon, kiu min inspiris kaj konsolis, donante al mi kuraĝon pli fortan ol la doloro. Tiel mi benis tion, kion mi malbenis, mi rigardis la morton kiel ian liberigilon. La ideo pri Dio estas granda, kiel la mondo! Ho! kia superega konsolo venas el la preĝo, kiu nin kortuŝas kaj emocias: ĝi estas la plej pozitiva elemento de nia nemateria naturo; per ĝi mi komprenis, mi firme kaj suverene kredis, kaj tial Dio, konsiderante miajn agojn, bonvolis rekompenci min antaŭ la fino de mia enkarniĝo.

6. — Ĉu oni povus diri, ke vi estis mortinta dum tiu unua krizo? — R. Jes kaj ne: post kiam la Spirito forlasis la korpon, la karno nature estingiĝadis; sed, kiam li reprenis la surteran loĝejon, la vivo revenis al la korpo, kiu spertis transiĝon, ian dormon.

7. — Kaj ĉu vi sentis la ligilojn, kiuj tenis vin ĉe la korpo? — R. Sendube; la Spirito havas fortegan katenon, kiu lin tenas, kaj li eniras en la naturan vivon, antaŭ la lasta tremo de la karno.

8. — Kiel do, en via ŝajna morto kaj dum kelke da minutoj, via Spirito povis subite kaj nekonsterneble malligiĝi, dum via efektiva malligiĝo estis akompanata de konfuziĝo dum kelke da tagoj? Ŝajnas al ni, ke en la unua okazo, pro la ligiloj inter korpo kaj Spirito pli

ekzistantaj ol en la dua, la malligiĝo devus esti pli malrapida, ĝuste kontraŭa al tio, kio efektiviĝis. — R. Vi multfoje elvokis enkarniĝintan Spiriton, ricevante ĝustajn respondojn; mi troviĝis en tiaj kondiĉoj, ĉar Dio vokis min kaj liaj servantoj al mi diradis: — “Venu...” Mi obeis kaj dankis al Li la specialan favoron, kiun Li bonvolis fari al mi, ke mi povu duonvidi kaj kompreni lian senfinan grandecon. Mi dankas vin tial, ke antaŭ la reala morto vi permesis al mi instrui miajn geparencojn, ke ili travivu bonajn kaj ĝustajn enkarniĝojn.

9. — El kie venis la belaj paroloj, kiujn post via vekiĝo vi eldiris al via familio? — R. Ili estis reflekto de tio, kion mi vidis kaj aŭdis; la bonaj Spiritoj inspiris al mi la parolon kaj donis brilon al mia mieno.

10. — Kian impreson, laŭ via opinio, kaŭzis via revelacio ĉe la ĉeestantoj kaj precipe ĉe viaj infanoj? — Surprizigan, profundan; la morto ne estas mensogema; la infanoj kiel eble plej maldankaj ĉiam kurbiĝas ĉe la finiĝanta enkarniĝo. Se ni povus penetri en la koron de la infanoj, apud malfermita tombo, ni vidus ilin nur poseditaj de veraj sinceraj sentoj, tuŝitaj de la kaŝita mano de la Spiritoj, kiuj diras al ĉiuj pensoj: Ektremu, se vi dubas; morto estas rebonigo, justeco de Dio, kaj mi garantias al vi, spite al la nekreduloj, ke miaj familio kaj amikoj kredis la parolojn de mi eldiritajn antaŭ la morto. Krome mi estis peranto de iu alia mondo.

11. — Dirinte, ke vi ne ĝuas la duonviditan feliĉon, ĉu ni tamen povas diri, ke vi estas malfeliĉa? — R. Ne, ĉar mi fariĝis kredanto antaŭ la morto, kaj tio, el koro kaj konscienco. Doloro turmentas en tiu mondo, sed fortikigas el la vidpunkto de la spirita estonteco. Rimarku, ke Dio konsideris miajn preĝojn kaj mian absolutan kredon je Li; mi estas firma sur la vojo al perfektiĝo, kaj mi venos al celo, kiun oni konsentis al mi duonvidi. Preĝu, miaj amikoj, por ĉi tiu nevidebla mondo, kiu prezidas en viaj destinoj; ĉi tiu frateca interŝanĝo estas ama;

estas rimedo interkomunikiganta la Spiritojn el ĉiuj mondoj.

12. — Ĉu vi bonvolus eldiri kelkajn vortojn al viaj edzino kaj infanoj? — R. Mi petas ĉiujn miajn karulojn, ke ili kredu je la ĉiopova, justa, neŝanĝema Dio; ke ili kredu la preĝon, kiu konsolas kaj korfaciligas; la karitaton, kiu estas la plej nobla praktiko de la homa enkarniĝo; mi petas ilin rememori, ke ankaŭ el la malmulto oni povas doni, ĉar monereto de malriĉulo estas pli meritoplena en la okuloj de Dio, de tiu Dio, kiu scias, ke malriĉulo donas multon, eĉ kiam li malmulton donas.

"La riĉulo devas multe doni, kaj konstante doni por tiom multe meriti. La estonteco estas la karitato, la bonvolemo ĉe ĉiuj agoj; estas konsideri, ke ĉiuj Spiritoj estas fratoj, neniam zorgante pri la miloj da infanecaj surteraj vantaĵoj.

Vi spertos krudajn provaĵojn, kara amata familio; sed ilin kuraĝe akceptu, memorante, ke Dio ilin vidas. Ofte rediru ĉi tiun preĝon: — "Ama kaj bona Dio, ĉiam ĉion konsentanta, donu al ni forton superan al ĉiuj sortovicoj, faru nin bonaj, humilaj kaj karitatemaj, malgrandaj je riĉaĵo kaj grandaj je koro. Permesu, ke nia Spirito estu spiritisto sur la Tero, por vin pli bone kompreni kaj ami.

Via nomo estu emblemo de libereco, ho! mia Dio! — La konsolanto de ĉiuj subprematoj, de ĉiuj benzonantaj ami, pardoni kaj kredi."

*Cardon*

## Eric Stanislas

(Spontanea komunikaĵo. Societo de Parizo; Aŭgusto 1863.)

"Kian feliĉon donas al ni la emocioj intense sentataj de bravaj koroj! Ho! konsolaj pensoj malfermantaj la savovojon al ĉio vivanta, al ĉio materie kaj spirite spiranta. La konsolanta balzamo neniam ĉesu abunde flui

sur nin kaj vin! Kiaj vortoj ni uzas, esprimantaj la feliĉon de la elkarniĝintaj fratoj, kiam ili penetras en la amon, kiu nin ĉiujn kunigas?

Ha, fratoj! ĉie kiom da bono, kiom da dolĉaj sentoj altaj kaj simplaj, kiel vi, kiel via doktrino, vi estas invitataj dissemi laŭlonge de la irota vojo; sed ankaŭ kiom multe oni donos al vi eĉ antaŭ ol vi akiros rajtojn!

Mi ĉeestis ĉion, kio okazis en ĉi tiu nokto; mi aŭdis, mi komprenis kaj mi penos memvole plenumi mian devon kaj instrui la klason el neperfektaj Spiritoj. Aŭdu do: mi tute ne estis feliĉa; kiam mi estis enabismiĝinta en la grandegeco, en la senfino, miaj suferoj estis des pli intensaj, ju pli malfacila estis al mi ilia kompreno.

Benata estu Dio, kiu konsentas al mi veni en sanktejon, kiu ne povas senpune esti malfermita al malbonuloj.

Amikoj, kiom mi dankas vin, kiom da fortoj mi regajnis inter vi! Ho, bonaj homoj! konstante kolektiĝu; lernu, ĉar vi ne povas dubi pri la fruktoj de la seriozaj kunsidoj; la Spiritoj devantaj ankoraŭ multon lerni, kiuj memvole restas senfaraj, mallaboremaj kaj forgesantaj siajn devojn, povas troviĝi tie, ĉe vi, pro cirkonstancoj atenditaj aŭ neatenditaj; kaj tiam, forte tuŝitaj, ili sin rekonas, kaj multe da okazoj prezentiĝas al ili duonvidi la celon, la tre deziratan objekton, samtempe serĉi, edifite de via ekzemplo, la rimedojn eviti la penigan staton, kiu ilin regas.

Kun granda plezuro mi fariĝas interpretanto de la suferantaj animoj, ĉar mi parolas al bonkoraj homoj, en la certeco, ke mi ne estos forpelata.

Ankoraŭfoje akceptu do, komplezemaj homoj, la esprimon de mia aparta danko kaj tiun de ĉiuj, al kiuj vi de longe faris multe da bono, eĉ ne sciante.”

*Eric Stanislas*

*La gvidanto de la mediumo*. Miaj infanoj, ĉi tiu estas Spirito longe suferinta, devojiĝinta de la ĝusta vojo. Li

num komprenas siajn erarojn, pentas kaj turnas la okulojn al Dio, kiun li forneis. Lia situacio ne estas tiu de feliĉulo, sed li aspiras la feliĉon kaj ne plu suferas. Dio konsentis al li ĉi tiun kunsidon, ke li poste iru en malsuperan sferon por sin instrui kaj stimuli la progreson de la Spiritoj, kiuj, kiel li, malobeis la leĝon. Ĝi estas riparado, kiu koncernas lin. Li fine konkeros la feliĉon, pro lia persisteco.

## S-ino Anna Belleville

Tridekkvinjara virino mortinta post kruela malsano. Vigla, spirita, dotita per neordinara inteligento, skrupula kriterio kaj altaj moralaj kvalitoj; edzino kaj sindediĉa familiopatrino, ŝi cetere posedis ian maloftan forton de karaktero kaj ian abundon da rimedoj, kiuj ĉiam tenis ŝin protektata kontraŭ la plej hazardaj okazaĵoj de ŝia ekzistado. Ne konservante resenton pri personoj, pri kiuj ŝi povas plendi, ŝi ĉiam estis preta fari al ili oportunan servon. Intime ligite al ŝia persono de multe da jaroj, ni povis akompani ĉiujn fazojn de ŝia ekzistado kaj ankaŭ ĉiujn neatenditaĵojn en ĝia fino. Venis de ia akcidento la malsano, kiu devis ŝin mortigi, reteninte ŝin sur lito tri jarojn, katenitan de la plej kruelaj suferoj, cetere eltenitaj ĝis la fino, kun heroeca kuraĝo, kaj malgraŭ kiuj la natura beleco de ŝia Spirito neniam ŝin forlasis. Ŝi firme kredis la ekzistadon de la animo kaj la estontan vivon, sed nemulte zorgis pri tio; ĉiuj ŝiaj pensoj rilatis al la estanteco, kiu estis por ŝi tre grava, kvankam ŝi ne timis la morton kaj estis indiferenta por la materiaj plezuroj. Ŝia vivo estis simpla kaj ŝi sen peno rezignis tion, kion ŝi ne povis ekhavi; sed ŝi denaske posedis la senton pri bono kaj belo, senton, kiun ŝi nutris eĉ ĉe la plej malgrandaj aferoj.

Ŝi volis vivi malpli por ŝi ol por siaj infanoj, komprenante kiom sia malesto kostus al ili, kaj tio ja ligis ŝin al la vivo. Ne ĝin studinte ĝisfunde , ŝi konis Spiritismon; ŝi interesiĝis pri ĝi, sed ŝi neniam povis firme

teni siajn ideojn pri la estonteco; ĉi tiu estis laŭ ŝi relaĵo, sed ne kaŭzis al ŝia spirito profundan impreson.

Tio bona, kion ŝi praktikis, estis rezultato de ia natura, spontanea impulso, kaj ŝi ne pensis pri rekompencoj nek pri estontaj punoj.

Ŝia stato estis senesperiga kaj baldaŭa ŝia morto, cirkontanco, kiun ŝi mem konis. Iun tagon, kiam ŝia edzo forestis, ŝi senfortiĝis kaj komprenis, ke ŝia horo venas; ŝiaj okuloj nebuliĝis, konfuziĝo ŝin invadis, kaj ŝi sentis ĉiujn angorojn pro la disiĝo.

Sed la morto antaŭ la reveno de la edzo estis por ŝi malfacila. Per superega klopodo super si mem, ŝi murmuris: "Ne, mi ne volas morti!"

Ŝi tiam sentis reveni la vivon kaj ŝi reprenis la tutan uzon de siaj kapabloj. Veninte ŝia edzo, ŝi al li diris: "Mi estis mortonta, sed mi volis atendi vian alvenon, pro tio, ke mi devas fari al vi kelkajn rekomendojn." Tial la lukto de la vivo kontraŭ la morto daŭris plu ankoraŭ tri monatojn, tempon, kiu estis por ŝi nenio alia ol dolora agonio.

*Elvoko en la tago sekvinta tiun de ŝia morto.* — R. Bonaj amikoj, mi estas danka pro la intereso, kiun mi meritas de vi; cetere vi estis por mi kvazaŭ bonaj parencoj. Nu bone, ĝojegu, ĉar mi estas feliĉa. Konsolu mian kompatindan edzon kaj protektu miajn infanojn. Mi tuj iris al ili, post kiam mi elkarniĝis.

— D. Ni povas supozi, ke via konfuziĝo ne estis longa, ĉar vi al ni respondas klarmense.

— R. Ha! Miaj amikoj, mi tiel multe suferis... kaj vi bone scias, ke mi suferis rezignacie. Nu, mia provado finiĝis. Mi ne diros, ke mi estas tute liberiĝinta, ne; sed vero estas, ke mi ne plu suferas, kaj tio estas por mi granda korfaciliĝo! Nuntempe mi estas tute resaniĝinta, sed mi ankoraŭ bezonas la helpon de viaj preĝoj, ke mi poste kunlaboru kun vi.

— D. Kio estis la kaŭzo de viaj longaj suferoj?

— R. Ia terura pasinteco, mia amiko.

— D. Ĉu vi povas rakonti al ni tiun pasintecon?

— R. Ho! Lasu min ĝin iom forgesi... mi ĝin tiel kare elpagis...

*Unu monaton post la morto*. — Nun, kiam vi eble estas tute malligiĝinta kaj kiam nin pli bone rekonas, ni tre dezirus teni kun vi pli klaran konversacion. Ĉu vi ekzemple povus respondi al ni, kia estis la kaŭzo de via longa agonio? Tri monatojn vi estis inter vivo kaj morto...

— R. Dankon, miaj amikoj, pro via rememoro, kaj ankaŭ pro viaj preĝoj! Kiom sanigaj ĉi tiuj estis por mi kaj kiom ili kunhelpis por mia liberiĝo! Mi ankoraŭ havas bezonon esti konsolata; preĝu plu por mi. Vi komprenas la valoron de la preĝo. Tiuj, kiujn vi eldiras, neniel estas banalaj formuloj, kompare kun tiuj murmurataj de tiom da aliaj homoj, kiuj ne taksas ilian gravecon, la frukton de ia bona preĝo.

"Mi multe suferis, sed miaj suferoj estis malavare kompensitaj, kaj multfoje estis al mi permesate esti apud miaj karaj infanoj, kiujn mi postlasis kun tiom da dedaŭro!

Mi mem plilongigis tiujn suferojn; la arda deziro vivi plu, pro amo al miaj infanoj, igis min iamaniere alkroĉiĝi al la materio, kaj malsame ol aliaj homoj mi ne volis forlasi la kompatindan korpon, de kiu mi devis disiĝi, malgraŭ tio, ke ĝi estis por mi instrumento de tiom da torturoj.

Jen la kialo de mia longa agonio. Koncerne la malsanon kaj la devenantajn suferojn, ili estis elpago de mia pasinteco — plia ŝuldo, kiun mi pagis. Ha! bonaj amikoj, se mi estus vin aŭdinta, kiom da ŝanĝo estus okazinta en mia nuna vivo!

Kian korfaciliĝon mi spertus en la lastaj momentoj, kaj kiel facila eble estus mia disiĝo, se, anstataŭ ĝin bari, mi estus min konfide submetinta al la volo de Dio, al la fluo, kiu min trenadis! Sed, anstataŭ turni la okulojn al la estonteco min atendanta, mi nur vidis la estantecon, kiun mi estis forlasonta!

Kiam mi revenos sur la Teron, mi estos ja spiritistino, mi ĝin asertas al vi. Kia superbela scienco! Mi ofte ĉeestas viajn kunsidojn kaj la konsilojn, kiujn oni transdiras al vi. Eble miaj suferoj estus mildigitaj, se mi povus ilin kompreni, kiam mi estis sur la Tero. La okazo ne estis ankoraŭ veninta.

Mi hodiaŭ komprenas la bonecon kaj la justecon de Dio, kvankam mi ne estas sufiĉe progresinta por senzorgigi min pri la aferoj de la vivo; mi precipe iras al miaj infanoj, ne por dorloti ilin, sed por ilin helpi, montrante al ili la vojon, kiun Spiritismo malfermas en ĉi tiu momento. Jes, miaj amikoj, mi ankoraŭ havas gravajn zorgojn, inter kiuj elstaras tiu rilata al la estonteco de miaj infanoj."

— D. Ĉu vi povas doni al ni iajn informojn pri la pasinteco, kiun vi bedaŭras?

— R. Ha! bonaj amikoj, mi estas preta fari konfeson. Mi malzorgis la aliulan suferon, indiferente vidante la suferojn de mia patrino, kiun mi nomis malsanulino pro imaga malsano. Por ne vidi ŝin sur lito, mi supozis, ke ŝi ne suferas kaj mi mokis ŝiajn plendojn. Jen kiel Dio punas.

*Ses monatojn post la morto*. — D. Nun, kiam sufiĉe longa tempo forpasis, de kiam vi forlasis vian materian envolvaĵon, bonvolu priskribi al ni viajn pozicion kaj okupojn en la spirita mondo.

— R. Dum la surtera vivo mi estis tio, kion oni ordinare nomas bona persono; sed antaŭ ĉio mi ŝatis mian bonstaton; laŭnature kompatema, mi eble ne estus kapabla por sinofero malpliigi malfeliĉon. Hodiaŭ ĉio ŝanĝiĝis, kaj kvankam mi ĉiam estas la sama, la iama memo tamen modifiĝis.

"Mi profitis el la modifiĝo kaj mi vidas, ke ne ekzistas kategorioj nek kondiĉoj ekster la persona merito, en la nevidebla mondo, kie karitatema kaj bonkora malriĉulo superstaras riĉulon, kiu humiligis per sia almozo. Mi speciale helpas tiujn afliktiĝantajn pro familiaj suferoj,

pro perdo de parencoj aŭ de riĉeco. Mia misio estas ilin reanimi kaj konsoli kaj ĉe tio mi sentas min feliĉa.”

*Anna*

Grava demando venas el la faktoj supre menciitaj. Jen ĝi:

Ĉu persono, pro forto de sia propra volo, povus prokrasti la momenton de disiĝo de la animo je la korpo?

*Respondo de la Spirito Sankta Ludoviko*. Senkondiĉe jese respondita, ĉi tiu demando povus okazigi erarajn konsekvencojn.

Certe, pro iaj kondiĉoj, iu enkarniĝinta Spirito povas longigi sian korpan ekzistadon, por plenumi nepre necesajn misiojn, aŭ almenaŭ de li tiel supozatajn — tio estas permeso, kiun oni al li povas konsenti, por ĉi tiu pritaktata okazo kaj por multe da aliaj ekzemploj. Sed ĉi tiu vivoprokrasto devas esti ja mallonga, ĉar estas malpermesate al la homo inversigi la ordon de la naturaj leĝoj kaj ankaŭ memvole reveni en la vivon, kiam ĝi jam atingis sian limdaton. Ĝi estas nur nedaŭra haltigo. Sed, pro ebleco de la fakto, oni ne konkludu, ke ĝi estas ĝenerala, kaj ke dependas de ĉiu homo tiamaniere plilongigi sian ekzistadon. Kiel *provon por la Spirito*, aŭ por intereso de finiĝonta misio, la malvigliĝintaj organoj povas ricevi aldonon da vivo-fluidaĵo, kiu ebligos al ili kelke da momentoj plilongigi la materian manifestiĝon de penso. Ĉi tiuj okazoj estas esceptaj kaj ne faras regulon. Ankaŭ oni ne devas vidi en tiu fakto ian nuligon de la neŝanĝemeco de la leĝoj de Dio, sed ian sekvon de la libera volo de la animo, kiu, en la ekstrema momento, havas konscion pri sia misio kaj volas, spite la morton, elfini tion, kion ĝi ĝis tiam ne povis. Tiu vivolongigo iafoje povas esti ia speco de puno trudita al la Spirito dubema pri la estonteco, vivoprokrasto, kiun li nepre devas suferi.

*Sankta Ludoviko*

Oni ankoraŭ povus miri pri la relativa rapido, kun kiu ĉi tiu Spirito liberiĝis, pro lia alkroĉiĝo al la korpa vivo; sed estas necese konsideri, ke tiu alkroĉiĝo neniel estis materia kaj voluptama, ĝi prefere havis sian moralan flankon efektive motivitan de la bezonoj helpi la infanojn ankoraŭ en frua aĝo. Ŝia spirito estis intelekte kaj morale progresinta. Se ŝi estus atinginta plian ŝtupon, oni povus opinii ŝin unu el tiuj Spiritoj el la plej feliĉaj. Ne ekzistis do ĉe la perispiritaj ligiloj tiu obstineco rezultanta el la materia identigo; oni povas diri, ke la vivo malfortiĝinta pro daŭra malsano, apenaŭ kateniĝis per delikataj fadenoj, kies rompiĝon ŝi penis malhelpi. Sed ŝia rezisto estis punita per plilongigo de la suferoj rilataj al la malsano mem kaj ne per la malfacileco de la malligiĝo. Jen kial, post ĉi tiu malligiĝo, ŝia konfuziĝo estis mallonga. Alia fakto same grava venas de ĉi tiu elvoko, kiel de la pli granda parto de tiuj realigitaj en pluraj tempoj, pli-malpli malproksimaj de la morto: ĝi estas la grada aliiĝo de la ideoj de la Spirito, kies progreso vidiĝas ne ĉe liaj pli bonaj sentoj, sed ĉe lia pli justa taksado de la aferoj. La progreso de la Spirito en la spirita vivo estas do fakto elmontrita de la sperto. La korpa vivo estas praktikado de tiu progreso, elmontro de liaj decidoj, fandilo, en kiu li puriĝas. Ĉar la animo progresas post la morto, ĝia sorto ne povas esti definitive difinita, pro tio, ke la definitiva decido pri la sorto estas, kiel ni jam diris, la neado de la progreso.

Kaj, ĉar tiuj du aferoj ne povas samtempe kunekzisti, restas plu tiu, kiu havas favore por si la konfirmon de la faktoj kaj de la racio.

## ĈAPITRO IV

## SPIRITOJ SUFERANTAJ

### Puno

Ĝenerala elmontro de la stato de kulpuloj, okaze de ilia eniro en la mondon de la Spiritoj, diktita al la Spiritisma Societo de Parizo, en Oktobro 1860.

"Post la morto, la Spiritoj harditaj, egoismaj kaj malicaj tuj estas kaptitaj de kruela dubo pri sia destino, en nuneco kaj estonteco. Ili rigardas ĉirkaŭ si kaj vidas nenion, kio povas utili al la praktikado de ilia malboneco, kio ilin afliktegas, ĉar izoliteco kaj neaktiveco estas netolereblaj por la malbonaj Spiritoj.

Ili ne levas la rigardon al la loĝejo de la progresintaj Spiritoj, konsideras tion, kio ilin ĉirkaŭas kaj tiam, komprenante la malvigliĝon de la malfortaj kaj punitaj Spiritoj, ili alkroĉiĝos al ili, kvazaŭ al ia kaptitaĵo, uzante la rememoron pri iliaj pasintaj pekoj, kiujn ili senĉese agigas per siaj ridindaj gestoj.

Ĉar al ili ne sufiĉas tiuj mokoj, ili sin ĵetas al la Tero simile al malsategaj vulturoj, serĉante inter la homoj ian animon, kiun ili povas delogi. Ĝin trovinte, ili ĝin ekposedas, ekscitante ĝian ambicion kaj penante estingi ĝian fidon je Dio, ĝis ili fine alproprigas al si unu konsciencon kaj, vidante, ke la kaptitaĵo estas sekura, ili etendas la fatalecon de sia infekto sur ĉion, kio alproksimiĝas al ĝi.

La malica Spirito estas preskaŭ feliĉa en la plejintenso de sia kolero, kaj li suferas nur en la momentoj, kiam li ne agas, aŭ en la okazoj, kiam la bono triumfas super malbono. Sed la jarcentoj pasas, kaj subite la malica Spirito antaŭsentas, ke la mallumo fine lin ĉirkaŭas; lia agosfero malplivastiĝas, kaj lia konscienco, ĝis tiam muta, sentigas al li akrajn dornojn de rimorso.

Inerta, trenata de kirlego, li vagadas, kiel diras la Sanktaj Skriboj, sentante sian haŭthararon hirtiĝi de teruro. Baldaŭ estiĝas ia granda vakuo ĉirkaŭ li: venas la momento, kiam li devas kulpelpagi; jen estas la enkarniĝo okazonta... kaj li vidas, kvazaŭ en spegulo, la terurajn provojn, kiuj lin atendas, li volas retroiri, sed iras antaŭen kaj, ĵetita en la vivabismon, li neatendite ruliĝas ĝis la vualo de forgeso falos sur liajn okulojn. Li vivas, agas, ankoraŭ estas kulpa, sentante en si, mi ne scias kian maltrankviligan rememoron, iajn antaŭsentojn, kiuj igas lin tremi, sed ne retroirante sur la vojo de malbono. Fine lacigita de penoj kaj krimoj li estas mortonta. Etendite sur litaĉo (aŭ sur lito, tio ne gravas), la kulpulo sub ŝajna senmoveco sentas moviĝi kaj vivi interne de si ian mondon el forgesitaj sensacoj. Ferminte la okulojn, li vidas ekaperantan helecon, aŭdas strangajn sonojn; lia animo, baldaŭ forlasonta la korpon, agitiĝas senpacience, dum liaj krispigitaj manoj provas kapti la litkovrilojn... Li volas paroli, kriegi al siaj ĉirkaŭantoj: — Retenu min! Mi vidas la punon! — Neeble! La morto sigelas liajn palajn lipojn, dum la ĉeestantoj diras: Ripozu en paco!

Li tamen aŭdas, ŝvebante ĉirkaŭ la korpo, kiun li ne volas forlasi. Ia mistera forto lin altiras; li vidas, kaj fine rekonas tion, kion li jam vidis. Terurita jen li sin ĵetas en la Spacon, kie li dezirus kaŝiĝi sed nenia ŝirmo, nenia ripozo.

Aliaj Spiritoj reciprokas al li malbonojn, kiujn li faris; punita, konfuzita kaj mokita li siavice vagas kaj vagos ĝis la dia lumo en lin penetru kaj lin prilumu,

montrante al li la venĝeman Dion, la super ĉiu malbono Dion triumfantan, kun kiu li ne povos repacigi krom per kulpelpago kaj ĝemoj."

*Georges*

Neniam estis pentrita bildo pli terura kaj aŭtentika pri la sorto de maliculo; ĉu ankoraŭ estas necesa la iluziaĵo de la flamoj kaj fizikaj torturoj?

## Novel

La Spirito alparolas la mediumon, kiun li konis dum la vivo.

"Mi rakontos al vi mian suferon ĉe la morto. Katenita al la korpo per materiaj ligiloj, mia Spirito renkontis grandajn malfacilaĵojn por senembarasiĝi — kio per si mem jam estis kruda angoro.

La vivo, kiun mi lasis en la aĝo de 21 jaroj, ankoraŭ estis tiel energia, ke mi ne povis kredi al ĝia perdo. Tial mi serĉadis la korpon, kaj miris, timegita de tio, ke mi vidis min perdita meze en kirlo da ombroj. Fine la konscio pri mia stato kaj la elmontro de la eraroj faritaj en ĉiuj miaj reenkarniĝoj subite min frapis, dum ia senkompata lumo prilumis la plej sekretan internon de mia animo, kiu sin sentis nudigita kaj tuj kaptita de ĉagrena honto. Mi penadis eviti tiun influon, interesiĝante pri la objektoj min ĉirkaŭantaj, objektoj novaj, sed kiujn mi *jam konis*; la lumaj Spiritoj, ŝvebantaj en la etero, donis al mi la ideon pri ia feliĉo, kiun mi ne povis aspiri; ombraj kaj afliktegaj formoj, iuj dronitaj en ĝenaj malesperoj, aliaj furiozaj aŭ ironiaj, glitadis ĉirkaŭ mi aŭ sur la tero, al kiu mi estis alkroĉiĝinta. Mi vidis homojn, kiuj sin agitadis, kies nescion mi enviis; ia tuta klaso da nekonataj aŭ prefere *retrovitaj* sensacoj min samtempe invadis. Kvazaŭ trenata de nerezistebla forto, kaj penante eviti furiozan doloron, mi neniigis la distancojn, la elementojn, la materiajn obstaklojn, tiamaniere ke la naturaj

belaĵoj kaj la ĉielaj brilegoj ne povis eĉ por momento kvietigi la akran doloron de mia konscienco nek la teruron kaŭzitan de la malkaŝo de la eterneco. Mortulo povas antaŭjuĝi la materiajn torturojn laŭ la tremoj de la karno; sed viaj malfortaj doloroj, mildigitaj de la espero, malgravigitaj de la distroj aŭ mortigitaj de la forgeso, neniam donos al vi ideon pri la angoroj de iu animo senĉese, senespere, senpente suferanta. Pasinte ia tempo, kies daŭron mi ne povas precizigi, enviante elektitojn, kies gloron mi duonvidis, malamante la malbonajn Spiritojn moke min persekutantajn, malestimante la homojn, kies hontidaĵojn mi vidis, mi pasis de profunda malvigleco al ia senprudenta ribelemo.

Fine vi alvokis min, kaj por la unua fojo ia milda kaj tenera sento trankviligis min; mi aŭdis la instruojn, kiujn al vi donas viaj gvidantoj, al mi trudiĝis la vero, mi preĝis; Dio aŭdis min, malkaŝiĝis al mi per sia Kompatemo, tiel same, kiel Li jam malkaŝis al mi per sia Justeco."

*Novel*

## Auguste Michel

(Havre, Marto 1863)

Li estis riĉa, mallaborema junulo, larĝe kaj ekskluzive ĝuanta la materian vivon. Kvankam inteligenta, la indiferenteco al seriozaj aferoj estis lia karakteriza trajto.

Sen malico, li estis pli bona ol malbona, faris sin estimata de siaj kamaradoj de diboĉo, kaj en la socio li estis konata pro siaj ecoj de monduma viro. Li ne praktikis la bonon, sed ankaŭ ne faris malbonon. Li mortis pro falo de veturilo, per kiu li promenis. Elvokite kelkajn tagojn post sia morto, de mediumo nerekte lin koninta, li donis sinsekve la jenajn komunikaĵojn:

*La 8-a de Marto 1863*. "Dume mi nur sukcesis malligiĝi, kaj malfacile mi povas paroli al vi. La falo,

kiu al mi kaŭzis morton, profunde konfuzis mian Spiriton.

Malkvietigas min tiu kruela necerteco pri mia estonteco. La dolora korpa suferado, kiun mi spertis, estas neniel komparebla kun ĉi tiu konfuziĝo. Preĝu, por ke Dio min pardonu.

Ho! kia doloro! Ho! dankon, Dio mia! kia doloro! Adiaŭ."

*La 18-a de Marto*. "Mi jam venis al vi, sed mi povis parolis nur malfacile. Nuntempe mi apenaŭ povas komunikiĝi kun vi. Vi estas la sola mediumo, al kiu mi povas peti preĝon, por ke la boneco de Dio forprenu min de ĉi tiu afliktiĝo. Kial plu suferadi, kiam la korpo jam ne plu suferas? Kial ekzistas ĉiam tiu terurega doloro, ĉi tiu kruela angoro? Preĝu, ho! preĝu, por ke Dio permesu al mi ripozon... Ho! kia kruela dubo! Mi ankoraŭ estas ligita al la korpo. Nur malfacile mi povas vidi, kie mi ja troviĝas; mia korpo tie estas, kaj kial mi restas ĉiam ankaŭ tie? Venu preĝi *super ĝi*, por ke mi senembarasiĝu el tiu kruela prizono... Dio min pardonos, mi esperas. Mi vidas la Spiritojn, kiuj estas apud vi, kaj pere de ili mi povas paroli al vi. Preĝu por mi."

*La 6-a de Aprilo*. "Estas mi, kiu venas peti, ke vi preĝu por mi.

Ĉu estos necese, ke vi iru al la *loko, kie kuŝas mia korpo*, por petegi al la Ĉiopova, ke Li kvietigu miajn suferojn?

Mi suferas! Ho! mi ja suferas! Iru al tiu loko — tiel estas necese — kaj direktu al la Sinjoro ian preĝon por ke Li min pardonu.

Mi vidas, ke mi povos resti pli trankvila, sed mi senĉese revenos al la loko, kien oni metis tion, kio apartenis al mi."

Ne atentante la peton, kiun oni faris al li, por preĝi ĉe la tombo, la mediumo ne plenumis ĝin. Sed pli malfrue irante tien, tie mem li ricevis ian komunikaĵon.

*La 11-a de Majo*. “Mi atendis vin ĉi tie. Mi esperis, ke vi venos al la loko, kie mia Spirito ŝajnas estis ligita al sia envolvaĵo, por petegi al la favorkora kaj bona Dio kvietigi miajn suferojn. Vi povos helpi min per viaj preĝoj, ne ĝin forgesu, mi petegas tion de vi. Mi konstatas kiom multe mia vivo estis kontraŭa al tio, kio ĝi devus esti; mi vidas la erarojn faritajn.

En la mondo mi estis neutila estulo; mi faris nenian profitan uzon de miaj kapabloj; la riĉaĵo servis nur al la kontentigo de miaj pasioj, al miaj kapricoj pri lukso kaj al mia vantamo; mi pensis pri nenio alia ol la korpaj plezuroj, malestimante tiujn de la animo kaj la animon mem. Ĉu sur min, kompatindan Spiriton kiu suferas la sekvojn de siaj surteraj eraroj, malsupreniros ja la favorkoreco de Dio? Preĝu, por ke Li min pardonu, liberigante min el la doloroj min afliktantaj. Mi dankas vin pro tio, ke vi ĉi tien venis por preĝi por mi.”

*La 8-a de Junio*. “Mi povas paroli kaj dankas Dion, kiu ĝin permesis al mi.

Mi komprenis miajn erarojn kaj esperas, ke Dio min pardonos.

En la vivo iru konforme al la kredo vin konsolanta, ĉar ĝi garantios al vi, en la estonteco, ian ripozon, kiun mi ankoraŭ ne havos. Dankon pro viaj preĝoj. Ĝis revido.”

La insista peto de la Spirito, por ke oni preĝu ĉe lia tombo, estas rimarkinda detalo, kiu tamen havis sian pravon de ekzisto, se ni konsideros la fortikecon de la ligiloj lin katenantaj al la korpo, pro la malfacileco de la malligiĝo, sekve de la materieco de lia ekzistado. Oni komprenas, ke la preĝo pli proksima povas havi iaspecan magnetan efikon pli potencan por faciligi la disiĝon. Ĉu la preskaŭ ĝenerala kutimo preĝi al la kadavroj ne naskiĝas de la senkonscia intuico de tia efiko? Tiuokaze la efiko de la preĝo atingus ian rezulton samtempe moralan kaj materian.

## Avertoj de diboĉulo

(Bordeaux, la 19an de Aprilo 1862)

*La 30-a de Julio*. "Nuntempe mi estas malpli malfeliĉa, ĉar mi ne plu sentas la pezan katenon, kiu jungis min al la korpo. Fine mi estas libera, sed mi ankoraŭ ne kulpelpagis kaj estas necese, ke mi regajnu la tempon perditan, se mi ne volos plilongigi la suferojn. Mi esperas, ke Dio, konsiderante la sincerecon de la pento, permesu al mi la gracon de sia pardono. Petu plu por mi, mi vin petegas. Homoj, fratoj miaj, mi vivis nur por mi, kaj nun mi kulpelpagas kaj suferas! Dio permesu al vi la gracon eviti la dornojn nun min ŝirantajn. Iru plu la larĝan vojon de la Sinjoro, kaj preĝu por mi, ĉar mi misuzis la favorojn, kiujn Dio donas al siaj kreitoj!

Kiu oferas al la krudaj instinktoj la inteligenton kaj la bonajn sentojn al li donitajn de Dio, tiu similas beston, kiu plurfoje difektas sin mem. La homo devas modere uzi la bonojn konfiditajn al li, kutimante celi la eternecon, kiu lin atendas, sekve rezignante la materiajn plezurojn. Lia nutrado devas celi nur la vivon; lukso limiĝu nur al la bezonoj de lia pozicio; gustoj, inklinoj, eĉ la plej naturaj, devas obei al la plej saĝa prudento; sen tio li materiiĝas, anstataŭ puriĝi. La homaj pasioj estas mallarĝaj karceroj ĉirkaŭvolvantaj la karnon, kaj tial evitu ilin. Vi ne scias iliajn prezojn, kiam ni revenas al la patrujo! La homaj pasioj vin senvestigas eĉ antaŭ ol vin forlasi, tiel ke vi alvenos nudaj, tute nudaj antaŭ la Sinjoron. Ha! vestu vin per bonaj faroj, kiuj vin helpos traflugi la Spacon inter vi kaj la eterneco. Brilanta mantelo, ili kaŝas viajn homajn hontindaĵojn. Envolvu vin en karitaton kaj amon — diajn vestojn eterne daŭrantajn."

*Instruoj de la gvidanto de la mediumo*. Ĉi tiu Spirito estas sur bona vojo, ĉar krom peto, li ankaŭ aldonas

konsilojn celantajn evitigi la danĝerojn de la vojo de li irita.

Rekoni erarojn jam estas indeco kaj efektiva paŝo al la bono: ankaŭ pro tio, lia situacio, ne estante feliĉa, ankaŭ ne estas tiu de malfeliĉa Spirito.

Petinte, li nur devas ripari sin en alia ekzistado. Sed antaŭ ol alveni tien, ĉu vi scias, kia estas la ekzistado de tiuj homoj volupteme vivintaj, kiuj al sia Spirito donis nenian aktivecon krom la elpensado de novaj plezuroj?

La influo de la materio ilin sekvas ĝis transtombo, kaj la morto ne ĉesigas la apetitojn, kiujn ilia vidado, tiel limigita, kiel kiam ili vivadis sur la Tero, vane serĉas rimedojn satigi. Ĉar ili neniam serĉis spiritan nutraĵon, ilia animo vagas en la vakuo sendirekte, sen espero, kaptite de la afliktiteco de tiu, kiu havas antaŭ si nenion pli ol ia senlima dezerto. La neekzisto de spiritaj aktivecoj memkompreneble kaŭzas la neniigon de la spirita laboro post la morto; kaj ĉar al li restas nenia rimedo por satigi la korpon, nenio restos por kontentigi la Spiriton.

El tio, ia morta ĝeno, kies finon ili ne antaŭvidas kaj al kiu ili preferus la nenion. Sed la nenio ne ekzistas... Ili povis mortigi la korpon sed ne povas neniigi la Spiriton. Gravas do, ke ili vivu en tiuj moralaj torturoj, ĝis, venkitaj de laciĝo, ili decidas turni la okulojn al Dio.

## Lisbeth

(Bordeaux, la 13an de Februaro 1862)

Suferanta Spirito subskribas per la nomo Lisbeth.

1. — Ĉu vi volas doni al ni kelkajn informojn pri via situacio kaj ankaŭ pri la kaŭzo de viaj suferoj? — R. Estu humila de koro, submetita al la Divolo, pacienca ĉe la provado, karitema al la malriĉulo, konsolanto de malfortulo, sentema al ĉia suferado, kaj tiam vi ne suferos la turmentojn, kiuj min torturas.

2. — Ŝajne vi sentas la erarojn naskitajn de kontraŭa konduto... Ĉu pento alportos trankvilon al vi? — R. Ne. Pento estas neutila, kiam naskita nur de sufero. Bonefika pento baziĝas sur la ĉagreniĝo esti ofendinta Dion, kaj ĝi konsistas en la arda deziro de ia riparo. Bedaŭrinde mi ankoraŭ tiom ne povas. Rekomendu min al la preĝoj de ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la aliulaj suferoj, ĉar mi bezonas tiujn preĝojn.

Tiu instruo estas granda veraĵo; iafoje la sufero estigas penton malpli sinceran, kiu ne estas esprimo de ĉagreniĝo pro malbono farita, ĉar, se la Spirito ĉesus suferi, li ne hezitus refari ĝin. Jen kial pento ne ĉiam kaŭzas la tujan liberiĝon de la Spirito. Ĝi tamen inklinigas lin al tio — jen ĉio.

Krom tio, al li estas necese pruvi la sincerecon kaj firmecon de la decido, per novaj provoj riparantaj la malbonon faritan.

Zorge mediante pri ĉiuj ekzemploj de ni prezentitaj, oni trovos en la vortoj de la Spiritoj — eĉ de tiuj pli malsuperaj — profundajn lecionojn, kiuj sciigas nin pri la plej intimaj detaloj de la spirita vivo. La facilanima homo povas vidi en tiuj ekzemploj nenion alian ol pitoreskajn rakontojn; sed la serioza kaj pripensema homo trovos en ili abundan fonton de instruoj.

3. – Mi faros tion, kion vi deziras. Ĉu vi povas doni al mi kelkajn detalojn pri via lasta ekzistado en la korpo? El tio eble rezultos ia utila instruo, kaj tiel vi faros profita la penton.

(La Spirito hezitas ne nur pri la respondo al tiu demando, sed ankaŭ al kelkaj el tiuj sekvantaj.)

— R. Mi havis naskiĝon ĉe alta pozicio. Mi posedis ĉion, kion la homoj opinias fonto de feliĉo. Estante riĉa, mi fariĝis egoisma; bela, mi estis vantema, nesentema, hipokrita; nobela, mi estis ambicia. Mi piedpremis sub mia potenco tiujn, kiuj ne ruliĝis ĉe miaj piedoj kaj subpremis ankoraŭ pli tiujn, kiuj sin metis sub ilin, kaj

ne forgesis, ke ankaŭ la kolero de la Sinjoro subpremegas frue aŭ malfrue la plej arogantajn fruntojn.

4. — En kiu tempo vi vivis? — R. Antaŭ centkvindek jaroj, en Prusujo.

5. — Ĉu vi, kiel Spirito, de tiam ne faris iun ajn progreson? — R. Ne; la materio ĉiam ribelis, kaj vi ne povas taksi la influon, kiun ĝi ankoraŭ havas sur min, malgraŭ la disiĝo de la korpo. La fiero ligas nin al bronzaj katenoj, kies ĉeneroj pli kaj pli premas la mizerulon, kiu hipotekas al ĝi sian koron. Fiero estas hidro je cent kapoj senĉese renoviĝantaj, eligantaj vevenajn siblojn iafoje similajn al ĉielaj kantoj ! Fiero estas tiu multforma demono, kiu alĝustiĝas al ĉiaj anomalioj de la Spirito; kiu sin kaŝas en ĉiuj faldoj de la koro; kiu penetras en ĉiujn vejnojn; kiu ensorbas kaj trenas homojn al la mallumo de la eterna geheno!... Ho! jes... eterna!

Probable la Spirito diras, ke li faris nenian progreson, ĉar lia situacio estas ĉiam peniga; la maniero kiel li priskribas la fieron kaj priploras ĝiajn sekvojn estas sendiskute ia progreso. Certe, kiam enkarniĝinta kaj eĉ tuj post la morto, li ne povus rezonadi tiel. Li komprenas la malbonon, kio jam estas io, kaj pli malfrue venos la kuraĝo kaj la intenco ĝin eviti.

6. — Dio estas tre bona por ne kondamni siajn filojn al eternaj punoj. Konfidu al lia favorkoreco. — R. Oni diras, ke tio povas havi finon, sed kie kaj kiam? Jam de longe mi ĝin serĉas kaj vidas nur suferon, ĉiam, ĉiam, ĉiam!

7. — Kiel vi venis ĉi tien hodiaŭ? — R. Kondukata de iu Spirito plurfoje min akompananta. — D. De kiam vi vidas tiun Spiriton? — R. De antaŭ nelonge. — D. Kaj de kiam vi estas konscia pri la eraroj de vi faritaj? —

R. (Post longa enpensiĝo.) Jes, vi pravas: estis ja de tiam, ke mi komencis vidi lin.

8. — Ĉu vi komprenas nun la rilaton inter pento kaj la helpo farita de via protektanto? Rigardu kiel originon de tiu apogo la amon de Dio, kies celo estos liaj senfinaj pardono kaj favorkoreco. — R. Ho! kiom mi dezirus, ke ĝi estu tia. Mi kredas, ke mi povas promesi en la nomo, cetere tre sankta, de Tiu, kiu neniam estis surda al la voĉo de siaj afliktitaj gefiloj.

9. — Elkore petu, kaj vi estos elaŭdita. — R. Mi ne povas; mi timas. — Ni kune preĝu, Li nin kontentigos. (Post la preĝo.) Ĉu vi ankoraŭ estas tie? — R. Jes. Dankon! Ne forgesu min.

10. — Venu ĉi tien ĉiutage. — R. Jes, jes, mi venos ĉiam.

*La gvidanto de la mediumo*. Neniam forgesu la instruojn, kiujn vi ĉerpos el la suferoj de viaj protektatoj kaj precipe el iliaj kaŭzoj, ĉar ili estas lecionoj utilaj al ĉiuj, por antaŭgardo kontraŭ la samaj danĝeroj kaj punoj. Purigu viajn korojn, estu humilaj, amu kaj helpu vin reciproke, neniam forgesante la fonton de ĉiuj gracoj, neelĉerpeblan fonton ĉe kiu ĉiuj povas laŭplaĉe sensoifiĝi, fonton de viva akvo, kiu egale kvietigas kaj nutras, fonton de vivo kaj eterna feliĉo. Iru al ĝi, miaj amikoj, kaj trinku kun fido. Dronigu en ĝin viajn ujojn, kiuj eliros el ĝiaj ondoj plenaj de benoj. Avertu viajn fratojn pri la danĝeroj, en kiujn ili povas fali. Dissemu la benojn de la Sinjoro, kiuj senĉese kreskas; kaj ju pli vi ilin diskonigos, des pli ili multiĝos. Koncernas vin la tasko, ĉar, dirante al viaj fratoj — tie estas la danĝeroj, tie la rifoj; venu kun ni, por ke vi ilin evitu; imitu nin, kiuj donas ekzemplon — tiel vi disverŝos la benojn de la Sinjoro sur tiujn, kiuj vin aŭdos.

Benataj estu viaj penoj. La Sinjoro amas la purajn korojn: faru vin indaj je lia amo.

*Saint Paulin*

## Princo Ouran

(Bordeaux, 1862)

Iu suferanta Spirito prezentis sin sub la nomo Ouran, iama rusa princo.

— D. Ĉu vi volas doni al ni kelkajn detalojn pri via situacio?

— R. Ho! feliĉaj estas la kore humilaj, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo! Preĝu por mi. Feliĉaj la kore humilaj, kiuj elektas modestan pozicion por plenumi la provon. Vi ĉiuj, kiujn la envio konsumas, ne scias la staton al kiu reduktiĝis unu el tiuj homoj, kiuj sur la Tero estas rigardataj kiel feliĉaj; vi ne kapablas prezenti al vi la fajron, kiu lin bruligas, nek la oferojn truditajn de la riĉaĵo, kiam per ĝi oni volas sin savi! La Sinjoro permesu al mi, fiera despoto, elpagi la krimojn naskitajn de mia orgojlo inter tiuj, kiujn mi tirane subpremis! Orgojlo! Ni konstante rediru tiun vorton, por ke oni neniam forgesu, ke ĝi estas fonto de ĉiuj suferoj nin ĉagrenantaj. Jes, mi trouzis la povon kaj favorojn, kiujn mi disponis; mi estis energia kaj kruela por miaj subuloj, kiuj devis kliniĝi antaŭ ĉiuj miaj kapricoj, kontentigi ĉiujn miajn koruptaĵojn. Mi volis noblecon, riĉaĵon, honoraĵojn, kaj mi subfalis sub la pezo supera al miaj propraj fortoj.

Ĝenerale la subfalantaj Spiritoj estas devigitaj preteksti ian devon superan al siaj propraj fortoj — kio estas ankoraŭ ia restaĵo de orgojlo kaj ia rimedo sin senkulpigi antaŭ si mem, ne konformiĝante kun la propra malforteco. Al neniu Dio donas pli ol tio, kion li povas elporti, Li ne postulas de la naskiĝanta arbo la fruktojn donitajn de plenkreska trunko. Cetere la Spiritoj havas liberecon; kio al ili mankas, tio estas volo, kaj ĉi tiu dependas ekskluzive de ili mem. Kontraŭ forta volo ne ekzistas malvirtaj inklinoj nevenkebl-

aj; sed kiam malvirto plaĉas al ni, ni memkompreneble ne klopodas ĝin bridi. Tiel nur al ni mem ni povas atribui la respektivajn sekvojn.

— D. Vi estas konscia pri viaj eraroj, kaj tio jam estas paŝo al regeneriĝo.

— R. Tiu konscio ankoraŭ estas sufero. Por multaj Spiritoj sufero estas ia efiko preskaŭ materia, ĉar, alligiĝintaj al la homaro de sia lasta enkarniĝo, ili ne spertas nek komprenas la moralajn sentojn. Kiam mi liberiĝis el la materio, tiam pliiĝis por mi la morala sento pri ĉio, kion la kruelaj fizikaj sensacoj havis plej terura.

— D. Ĉu vi duonvidas ian finon al viaj suferoj?

— R. Mi scias, ke ili ne estas eternaj, sed mi ne duonvidas ilian finon, kaj mi entute devas rekomenci la provojn.

— D. Ĉu vi esperas baldaŭ fari tion?

— R. Mi ankoraŭ ne scias.

— D. Ĉu vi memoras pri viaj antaŭaj faroj? Kun la intenco lerni, mi faras al vi ĉi tiun demandon?

— R. Viaj gvidantoj troviĝas ĉe vi, kaj ili scias tion, kion vi bezonas. Mi vivis en la tempo de Marko-Aŭrelio. Estante potenca, tiam mi cedis al orgojlo kaŭzo de ĉiuj faloj. Post ia vagado dum centjaroj, mi volis sperti ian senfaman ekzistadon.

"Malriĉa studento, mi almozpetis pri pano, sed mi ĉiam estis posedita de orgojlo: la Spirito gajnis scion, sed ne virton. Ambicia klerulo, mi vendis la konsciencon al tiu, kiu plej kare pagis , servante al ĉiuj venĝoj, al ĉiuj malamoj. Mi sentis min kulpa, sed soifo je gloroj kaj riĉaĵo sufokis la voĉon de la konscienco. La kulpelpago ankoraŭ estis longa kaj kruela. Fine, ĉe mia lasta enkarniĝo mi volis rekomenci ian vivon de lukso kaj povo, celante regi la embarasojn, ne atentante konsilojn. Ankoraŭ estis la orgojlo, kiu igis min konfidi pli al mi mem ol al la konsilo de protektantaj amikoj, kiuj ĉiam nin gardas.

Vi scias la rezulton de tiu lasta klopodo. Fine hodiaŭ mi komprenas kaj atendas la favorkorecon de la Sinjoro. Mi demetas ĉe liaj piedoj mian detruitan orgojlon kaj petas, ke Li superŝarĝu min per la plej peza tributo de humileco, ĉar kun helpo de lia graco tiu ŝarĝo ŝajnos al mi pli malpeza.

Preĝu kun mi kaj por mi: preĝu ankaŭ, por ke tiu diabla fajro ne konsumu la instinktojn, kiuj kondukas vin al Dio. Fratoj de sufero, Dio volu, ke mia ekzemplo estu utila al vi, kaj neniam forgesu, ke orgojlo estas malamiko de feliĉo. El ĝi fluas ĉiuj malbonoj, kiuj atakas la homaron, kaj kiuj persekutas ĝin eĉ en la ĉielaj regionoj."

*La gvidanto de la mediumo*. Vi eksentis dubojn pri la identeco de ĉi tiu Spirito, ĉar lia lingvaĵo ŝajnis al vi nekonforma al la stato de sufero montranta malsuperecon.

Forŝiru tiajn dubojn, ĉar vi ricevis seriozan komunikaĵon. Kiel ajn suferanta li estas, tiu Spirito havas tro kulturitan inteligenton por esprimiĝi tiamaniere. Kio mankis al li, tio estis nur humileco, sen kiu neniu Spirito povas atingi Dion. Tiun humilecon li ĵus konkeris, kaj ni esperas, ke kun persisteco li triumfe eliros el ia nova provo.

Nia ĉiela Patro estas tre justa en sia saĝeco, kaj Li konsideras la klopodojn, kiujn la homoj faras por superregi la malbonajn instinktojn. Ĉia venko super vi mem estas unu ŝtupo irita sur tiu ŝtuparo, kiu havas unu ekstremaĵon sur la Tero kaj alian ĉe la piedoj de la superega Juĝisto. Decide suriru tiujn ŝtupojn, ĉar la suprenirado estas des pli facila, ju pli firma estas la volo. Rigardu ĉiam supren, por ke vi kuraĝiĝu, ĉar ve al tiu, kiu haltas kaj retroiras. Frue li estos posedita de kapturniĝo, ektimas antaŭ la abismo lin ĉirkaŭanta, senkuraĝiĝas kaj diras: — por kio iri plu, se mi ĝin faris tiel malmulte kaj al mi ankoraŭ mankas multo? Ne, miaj amikoj, ne retroiru.

La orgojlo estas interne de la homo; nu bone! utiligu ĝin ĉe la klopodo kaj kuraĝo elfini vian supreniradon. Uzu

ĝin ankoraŭ ĉe la superregado de la malforteco kaj grimpu sur la supron de la eterna monto.

## Pascal Lavic

(Havre, la 8an de Aŭgusto 1863)

Ne estante konata de la mediumo en sia vivo eĉ laŭ nomo, ĉi tiu Spirito memvole komunikiĝis.

"Mi kredas al la boneco de Dio, kiu en sia favorkoreco kompatos mian Spiriton. Mi jam longe suferis multe, multe; mi pereis en la maro. Ligita al la korpo, mia Spirito vagis longan tempon sur la ondoj. Dio...

(La komunikado interrompiĝis, kaj en la sekvinta tago la Spirito daŭrigis ĝin)

decidis permesi, ke la preĝoj de tiuj, kiuj restis sur la Tero, liberigu min el la stato de konfuziteco kaj necerteco, en kiu mi dronis. Ili min atendis longan tempon, kaj fine ili povis trovi mian korpon. Nuntempe ĝi ripozas, kvankam la Spirito, malfacile liberiĝinta, vidas la erarojn faritajn. Post la provado, Dio juste juĝas, lia boneco etendiĝas al la pentintoj.

Dum longa tempo la korpo kaj la Spirito kune vagadis, kaj tia estas mia kulpelpago. Iru la rektan vojon, se vi volas, ke Dio faciligu da disiĝon de via Spirito. Vivu laŭ lia amo, preĝu, kaj tiel la morto, kiu por tiom multe da homoj estas timiga, al vi estos mildigita de la scio pri la vivo vin atendanta. Mi pereis en la maro, kaj dum longa tempo oni min atendis. La neebleco malligiĝi de la korpo estis por mi terura provo, jen kial mi bezonas preĝon de tiuj, kiuj, kiel vi, posedas la savantan kredon kaj povas peti por mi al la Dio de justeco. Mi pentas kaj esperas esti pardonita. La 6an de Aŭgusto mia korpo estis renkontita. Mi estis malriĉa maristo kaj jam antaŭ longe mortis. Preĝu por mi."

*Pascal Lavic*

— D. Kie via korpo estis trovita?
— R. Ne tre malproksime de vi.

*Journal du Havre* de la 6-a de Aŭgusto 1863 enhavas la sekvantan raporton, pri kiu la mediumo ne povis sciiĝi:

“Ni sciigas, ke la 6an de la fluanta monato oni renkontis la restaĵon de kadavro sur marbordo, inter Bléville kaj La Hève. Kapo, brakoj kaj brusto malaperis, sed malgraŭ tio oni povis identigi ĝin per la ŝuoj ankoraŭ ligitaj al la piedoj. Oni rekonis la korpon de la fiŝkaptisto Lavic, kiu la 11an de Decembro estis forprenita de sur la ŝipo *L'Alerte*, de mara ekventego. Lavic havis la aĝon de 49 jaroj kaj naskiĝis en la urbo Calais. Lia vidvino rekonis lian identecon.”

La 12an de Aŭgusto, ĉar oni pritraktis tiun okazintaĵon en la Spiritisma Grupo, en kiu la Spirito unuafoje manifestiĝis, li denove kaj memvole donis la jenan komunikaĵon:

“Mi efektive estas Pascal Lavic, kiu bezonas viajn preĝojn. Vi povas bonfari al mi, ĉar estis terura la provo, kiun mi spertis. La disiĝo de mia Spirito je la korpo okazis nur post kiam mi rekonis miajn erarojn, kaj post tio, ankoraŭ ne tute disiĝinta, mi ĝin sekvis en la oceano ĝin englutinta. Preĝu do, por ke Dio min pardonu kaj permesu al mi ripozon. Preĝu, mi vin petegas. Dio volu, ke tia perea finiĝo de malfeliĉa surtera vivo servu al ni kiel granda leciono! Vi ĉiam devas konsideri la estontan vivon, neniam ĉesante petegi al Dio lian dian favorkorecon. Preĝu por mi; mi necesas, ke Dio kompatu min.”

*Pascal Lavic*

## Ferdinand Bertin

Iu mediumo el Havro elvokis la Spiriton de konatulo, kiu respondis: — “Mi volas komunikiĝi, sed mi ne povas venki la obstaklon ekzistantan inter ni. Mi estas devigita lasi alproksimiĝi tiujn malfeliĉajn suferantojn.”

Tiam sekvis la jena spontanea komunikaĵo:

"Mi estas en terura abismo! Helpu min... Ho! Dio mia! Kiu forprenos min el tiu abismo? Kiu per sia kompata mano helpos la malfeliĉulon englutitan de la ondoj? Ĉie la plaŭdado de la ondoj, kaj eĉ ne unu amika vorto por min konsoli kaj helpi en ĉi tiu lasta momento. Ĉi tiu profunda nokto estas tamen la morto kun ties teruroj, kiam mi ne volas morti!... Ho! Dio mia! ne estas la estonta morto, sed la pasinta! Mi estas por ĉiam apartigita de tiuj, kiuj estas karaj al mi... Mi vidas mian korpon, kaj, kion mi ĵus sentis, tio estis nur la rememoro pri mia angora disiĝo... Kompatu min, vi, kiu konas mian suferon; preĝu por mi, ĉar mi ne volas senti plu la korŝirojn de la agonio, kiel jam okazas ekde la fatala nokto!... Tiu estas do la puno, mi bone antaŭsentas ĝin... Mi petegas vin preĝi!... Ho! la maro... la malvarmo... mi estos englutata de la ondoj!... Helpon!... Estu kompatemaj; ne forpelu min! Ni savos nin ambaŭ sur ĉi tiu tabulo!... Ho! mi sufokiĝas! La ondoj englutos min, kaj al la miaj ne restos la konsolo revidi min...Sed ne! kion mi vidas? mian korpon balancata de la ondoj... La preĝoj de mia patrino estos aŭdataj... Kompatinda patrino! se ŝi povus supozi sian filon tiel mizera, kia li efektive estas, certe ŝi petus pli multe; sed ŝi kredas, ke la morto sanktigis lian pasintecon kaj ŝi priploras min kiel martiron, kaj ne kiel punitan malfeliĉulon!... Ho! ĉu vi, kiuj ĝin scias, estos neelpeteblaj? Ne, certe vi propetos pro mi."

*Francois Bertin* (*)

Tiu nomo, tute nekonata, ne sugestis al la mediumo eĉ neprecizan memoron, pro kio oni supozis, ke ŝercema ŝipdroninto memvole venis manifestiĝi al li, kiel okazis plurfoje. Pli malfrue oni eksciis, ke estas efektive la nomo

(*) **Noto de la Eldonejo de la Brazila Spiritisma Federacio** al la 21-a eldono, en 1973: Sur la antaŭa paĝo, la Spirito estis nomata **Ferdinand**, ekzakte kiel en la originalo. Ni konsultis plurajn francajn eldonojn (paĝoj 324/5), inkluzive la 4an de 1869.

de unu el la viktimoj de la granda markatastrofo tie okazinta la 2an de Decembro 1863. La komunikaĵo estis donita je la 8-a de tiu sama monato, do ses tagojn post la akcidento. Tiu viro pereis, farante eksterordinarajn provojn savi la ŝipanaron, en la ĝusta momento, kiam li opiniis sin ŝirmita kontraŭ la morto. Havante nenian parencecon kun la mediumo, kaj eĉ ne konatecon, kial li manifestiĝis al li, anstataŭ al iu ajn familiano? La fakto estas, ke la Spiritoj ne trovas en ĉiuj personoj la fluidajn kondiĉojn nepre necesajn al la manifestiĝo. En la konfuziteco, en kiu li troviĝis, tiu Spirito ne havis eĉ liberecon de elekto, kaj li do estis instinkte altirita al tiu mediumo ŝajne dotita per speciala inklino al tiaspeca komunikado. Oni ankaŭ povas supozi, ke li antaŭsentis ian apartan simpation, kiel aliaj ĝin trovis en identaj cirkonstancoj. Fremda al Spiritismo, eble eĉ neinklina al tiu kredo, lia familio ne estus akceptinta la manifestiĝon, kiel tiu mediumo ĝin faris.

Kvankam la morto okazis antaŭ kelkaj tagoj, la Spirito ankoraŭ spertadis ĉiujn ĝiajn angorojn. Evidente tamen, ke li ne havis konscion pri la situacio; li opiniis sin vivanta, luktante kontraŭ la ondoj, sed samtempe aludante la korpon, kvazaŭ li estus disiĝinta de ĝi; li ekkrias por helpo, diras, ke li ne volas morti, kaj tuj poste parolas pri sia morto, rekonante en ĝi ian punon.

Tiu tuta senkohereco montras la intermiksiĝon de ideoj, komuna fakto en preskaŭ ĉiuj perfortaj mortoj.

Post du monatoj, la 2an de Februaro 1864, la Spirito memvole ree komunikiĝas per la sama mediumo, dirante la jenon:

"Via kompatemo al miaj tiel teruraj suferoj faciligis min. Mi komprenas la esperon, antaŭvidas la pardonon, sed post la puno pro la eraro farita. Mi senĉese suferas, kaj, se Dio permesas, ke mi duonvidu dum sekundoj la finon de mia malfeliĉo, tion mi ŝuldas al la preĝoj de karitemaj animoj, kiuj kompatis mian situacion. Ho! espero, ĉiela radio, kiom benata ci estas, kiam mi sentas cin ekaperi en mia animo!... Sed ve! la abismo malferm-

egiĝas, la teruro kaj sufero absorbas la penson pri favorkoreco. La nokto, ĉiam la nokto!... la akvo, la muĝado de la ondoj min englutintaj, estas nur pala imago de la teruro, en kiun sin envolvas mia Spirito... Mi fariĝas pli trankvila, kiam mi povas resti apud vi, ĉar, kiel la konfido de sekreto al amika brusto min faciligas, tiel same via kompatemo, naskita de la konfido de mia mizero, kvietigas la suferon kaj ripozigas al mi la Spiriton...

Viaj preĝoj plaĉas al mi, ne rifuzu ilin al mi. Mi ne volas rehavigi al mi tiun teruran sonĝon, kiu ŝanĝiĝas en realaĵon, kiam mi ĝin vidas... Prenu la krajonon pli da fojoj. Tre faciligas min la komunikiĝo kun vi.”

Kelkajn tagojn poste, ĉe spiritista kunsido en Parizo, oni faris al ĉi tiu Spirito la jenajn demandojn, kunigitajn de li en unu solan komunikaĵon kaj pere de alia mediumo, laŭ la ĉi-suba formo.

Jen estas la demandoj:

Kiu igis vin memvole komunikiĝi per alia mediumo? Kiom da tempo forpasis de via morto kiam vi manifestiĝis?

Kiam vi ĝin faris, vi ŝajne ankoraŭ dubis pri via stato, kaj vi samtempe elmontris angorojn de terura morto: ĉu vi nun komprenas pli bone tiun situacion?

Vi kategorie diris, ke via morto estas provo: ĉu vi povos diri al ni la motivon de tiu aserto?

Tio por ni estas instruo kaj por vi servas kiel korfaciligo. Per sincera konfeso vi havigos al vi la rajton je la favorkoreco de Dio, favorkoreco, kiun ni petos en niaj preĝoj.

*Respondo.* — Unue, ŝajnas neeble, ke iu homo povas suferi tiel kruele. Dio! Kiel penige estas vidi sin konstante envolvita en furiozaj ondoj, senĉese suferante tiun turmenton, tiun glacian malvarmon, kiu supreniras ĝis la stomako, ĝin ĉirkaŭpremante!

“Sed por kio mi retenas vin per tiuj scenoj? Ĉu mi ne devas komenci obei al la dankoleĝoj, dankante vin

ĉiujn, kiuj interesiĝas pri miaj turmentoj? Vi demandis min, ĉu mi manifestiĝis post longe, post mia morto.

Mi ne povas respondi facile. Pripensante, vi present-os al vi la teruran situacion, en kiu mi ankoraŭ troviĝas. Mi pensas, ke fremda forto kondukis min antaŭ la mediumon kaj — neeksplikebla afero — mi uzis mian brakon kun la sama facileco, kun kiu mi nun uzas la vian, konvinkite ke ĝi apartenis al mi. Nun mi spertas grandan plezuron, kvazaŭ ian apartan korfaciliĝon, kiu... sed ve! Jen ĝi finiĝas. Sed, Dio mia! Ĉu mi havos forton fari la konfeson, kiu min koncernas?"

Post kiam li estis tre kuraĝigita, la Spirito aldiris: — "Mi estis tre kulpa, kaj kio plej multe min turmentas, tio estas la fakto, ke mi estis rigardata kiel martiro, kiam mi verdire ne estis... En la antaŭa ekzistado mi ensakigis plurajn viktimojn kaj ilin ĵetis en la maron... Preĝu por mi!...

*Komentario pri ĉi tiu komunikaĵo fare de Sankta Ludoviko*

Ĉi tiu konfeso alportos grandan konsolon al la Spi-rito, kiu efektive estis tre kulpa! Sed honora estis la ekzistado, kiun li ĵus lasis: — li estis amata kaj estimata de siaj estroj. Tiu cirkonstanco estis frukto de liaj bonaj decidoj antaŭ ol reveni sur la Teron, kie li deziris esti tiel humana, kiel kruela li estis. La sindonemo de li elmontrita estis reboniĝo, sed li devis elpagi la pasintajn erarojn per fina provo — tiu de la morto, kiun li spert-is. Li mem volis puriĝi per la torturoj, kiujn li trudis al aliaj, kaj rimarku, ke ia ideo lin persekutas: la ĉagreniĝo pro tio, ke li estis rigardata kiel martiro. Oni konsideros tiun humilecon. Fine li forlasis la vojon al kulpelpago por eniri sur tiun de regeneriĝo, sur kiu vi povos subteni lin per viaj preĝoj, lin devigante iri sur ĝi per paŝo pli firma kaj decida.

## François Riquier

Li estis maljuna fraŭlo, avara kaj tre populara, kiu mortis en C..., en 1857, postlasante al siaj gefratoj

grandan riĉaĵon. Iam li ludonis domon al virino, kiu pli malfrue lin tute forgesis, eĉ nesciante ĉu li ankoraŭ vivis aŭ ne. En 1862, unu filino de tiu sinjorino, inklina al krizoj de katalepsio akompanataj de magneta dormo, kaj ankaŭ bona mediumino, vidis dum unu el tiuj dormoj S-ron Riquier, kiu, ŝi asertis, intencis paroli al ŝia patrino.

Kelkajn tagojn poste, tial ke li memvole manifestiĝis, konfirmante tiun intencon, oni tenis kun li la jenan konversacion:

— D. Kion vi volas de ni?

— R. La monon, kiun alproprigis la malŝatinduloj, por dividi ĝin inter si! Ili vendis bienojn, domojn, ĉion, por riĉiĝi! Ili malŝparegis miajn havojn, kvazaŭ ili ne plu apartenis al mi. Zorgu, ke oni estu justaj al mi, tial ke ili jam ne aŭdas min, kaj mi ne volas vidi tiajn abomenindaĵojn. Ili diras, ke mi estis uzuristo, kaj ili gardis mian monon. Kial ili ne volas redoni ĝin al mi? Ĉu ili opinias, ke ĝi estis malhoneste akirita?

— D. Sed vi estas mortinta, mia kara sinjoro, kaj ne havas plu iun ajn bezonon de mono. Petegu al Dio, ke Li permesu al vi novan ekzistadon de malriĉeco, por ke vi elpagu la uzuron de ĉi tiu lasta vivo.

— R. Ne, mi ne povos vivi em malriĉeco. Mi bezonas mian monon, sen kiu mi ne povas vivi. Cetere mi ne bezonas alian ekzistadon, ĉar mi nuntempe estas viva.

— D. (Al li estis farita la jena demando, kun la celo voki lin en la realon.) Ĉu vi suferas?

— R. Ho! Jes. Mi suferas torturojn pli dolorajn ol tiuj kaŭzitaj de la kruela malsano, ĉar estas ja mia animo, kiu ilin suferas. Ĉar mi ĉiam havas en la menso la maljustecon de ia vivo, kiu por multaj homoj estis kialo de skandaloj, mi havas konscion, ke mi estas ne kompatinda mizerulo, sed mia sufero estas tiel granda, ke estas necese, ke oni helpu min eliri el tiu bedaŭrinda situacio.

— D. Ni preĝos por vi.

— R. Dankon! Preĝu, por ke mi forgesu miajn surterajn havojn, sen tio mi ne povos penti.

Adiaŭ kaj dankon.

*François Riquier*, Rue de la Charité nº 14

Estas kurioze vidi tiun Spiriton indiki sian loĝejon, kvazaŭ li estus vivanta.

La sinjorino rapidis konfirmi ĝin, kaj ŝi tre surpriziĝis, konstante, ke ĝi estis ĝuste la lasta domo, en kiu Riquier loĝi*s*. Jen kiel, post kvin jaroj, li ankoraŭ sin ne opiniis mortinta, kaj male spertis la deziregon, tre kruelan por uzuristo, vidi siajn havojn dividitaj inter la heredintoj. La elvoko, sendube okazigita de iu bona Spirito, celis komprenigi al li lian staton, kaj inklinigi lin al pento.

## Claire

(Societo de Parizo, 1861)

La Spirito liverinta la jenajn diktatojn apartenis al iu sinjorino, kiun la mediumo konis, kiam ŝi vivis sur la Tero. Ŝia konduto, same kiel ŝia karaktero, plene pravigas la turmentojn, kiujn ŝi suferis. Krom tio, ŝin regadis ia ekcesa sento de personaj orgojlo kaj egoismo, sento evidenta en la tria el la mesaĝoj, kiam ŝi deziras, ke la mediumo priokupiĝu nur pri ŝi. La komunikaĵoj estis ricevitaj en malsamaj tempoj, kaj la tri lastaj elmontras senteblan progreson de la inklinoj de la Spirito, dank' al la zorgemo de la mediumo, kiu efektivigis ŝian moralan edukon.

1. Jen mi estas ĉi tie, mi, la malfeliĉa Claire. Kion vi volas, ke mi diru al vi? La rezignacio, la espero estas nenio alia ol vortoj, por tiuj, kiuj scias, ke, multenombraj kiel grajnoj el hajlo, la suferoj daŭros al ili dum la senfinaj jarcentoj. Mi povas mildigi ilin, vi diras... Kia nepreciza vorto! Kie renkonti kuraĝon kaj esperon por tio? Penu do, obtuza inteligento, kompreni kio estas eter-

na tago. Unu tago, unu jaro, unu jarcento... kion mi scias? se la horoj ne dividas ĝin, la sezonoj ne varias; eterna kaj malrapida kiel la akvo, kiu rosumas la rokon, tiu abomeninda, malbenita tago pezas sur mi, kiel lavango da plumbo... Mi suferas!... Ĉirkaŭ mi, nur silentaj kaj indiferentaj ombroj... Mi suferas!

Sed mi scias, ke super tiu mizero regas la Dio Patro, al kiu ĉio iras. Mi volas pensi pri Li, mi volas petegi de Li favorkorecon. Mi baraktas kaj vivas, treniĝante, kiel kriplulo rampanta sur vojo. Mi ne scias, kia forto altiras min al vi; eble vi estas mia savo. Mi forlasas vin pli trankvila, pli reanimita, simile al maljunulino glaciiĝinta, kiu sin varmigus en sunradio. Frostiĝinta, mia animo revigliĝas ĉe via alproksimiĝo.

2. Mia malfeliĉo pliiĝas tagon post tago, proporcie kiel mi ekkonas la eternecon. Ho mizero! Malbenitaj estas la horoj da egoismo kaj inerto, en kiuj, forgesante ĉian karitaton, ĉian alligiĝon, mi nur pensis pri mia bonstato! Malbenitaj homaj interesoj, materiaj priokupiĝoj min blindigintaj kaj perdigintaj! Nun la konsciencoriproĉo pri la tempo perdita! Kion mi diros al vi, kiu min aŭdas? Rigardu, prigardu konstante, amu la aliajn pli ol vin mem, ne prokrastu la marŝon nek grasigu vian korpon malprofite de via animo. Gardu vin, laŭ la prediko de la Sinjoro al liaj disĉiploj. Ne danku min pro tiuj konsiloj, ĉar, se *mia Spirito ilin konceptas, la koro neniam ilin aŭdis*. Simile al elpelita hundo, kiu treniĝas de timo, tiel same mi humiliĝas, ankoraŭ ne konante la spontanean amon. Tre malfruas ekaperi la dia aŭroro! Preĝu por mia nesentema kaj tiel mizera animo!

3. Ĉar vi min forgesas, tial mi ĉi tien venas vin serĉi. Ĉu vi kredas, ke izolitaj preĝoj kaj la simpla elparolo de mia nomo sufiĉas por faciligi miajn punojn? Ne, centfoje ne. Mi kriegas de doloro, vagante sen ripozo, sen protekto, sen espero, sentante la eternan pikilon de la puno eniĝi en mian ribelantan animon. Kiam mi aŭdas

viajn lamentojn, mi ridas, tiel same kiam mi vidas vin venkita. Viaj nedaŭraj mizeroj, la larmoj, la turmentoj ĉesigitaj de la dormo, kio do ili estas? Ĉu mi dormas ĉi tie? Mi volas (ĉu vi aŭdis?), mi volas, ke, forlasante viajn filozofiajn noktomeditojn, vi okupiĝu pri mi, farante, ke ankaŭ aliaj tion faru. Mi ne havas vortojn por difini tiun forpasantan tempon, kies horoj ne difinas periodojn. Mi vidas nur subtilan esperradion, vi donis ĝin al mi: do ne forlasu min.

4. *La Spirito de Sankta Ludoviko*. Ĉi tiu sceno estas tute vera kaj pri nenio troigita. Eble oni demandos, kion faris tiu virino por esti mizera. Ĉu ŝi faris ian teruran krimon? ŝtelis? murdis? Ne; ŝi faris nenion, kio insultus la justecon de la homoj. Kontraŭe ŝi amuzis sin per tio, kion vi nomas surtera feliĉo; beleco, ĝuoj, flatoj, ĉio ridetis al ŝi, nenio mankis al ŝi, tiagrade ke tiuj, kiuj ŝin vidis, diradis: Kia feliĉa virino! Kaj oni enviadis ŝian sorton. Sed ĉu vi volas scii?

Ŝi estis egoisma; ŝi posedis ĉion, krom bona koro. Ŝi ne malobeis la leĝon de la homoj, sed tiun de Dio, ĉar ŝi forgesis la unuan el la virtoj — la karitaton. Ĉar ŝi amis neniun krom si mem, nun ŝi ne trovas iun, kiu ŝin amu, kaj vidas sin izolita, forlasita, sen protekto en la Spaco, kie neniu pensas nek okupiĝas pri ŝi.

Jen kio konsistigas ŝian turmenton. Ĉar ŝi serĉis nur la mondajn plezurojn hodiaŭ ne plu ekzistantajn, tial ĉirkaŭ ŝi estiĝis ia malplenaĵo, kaj ĉar ŝi vidas nur la nenion, ĉi tiu al ŝi ŝajnas eterna. Ŝi ne suferas fizikajn torturojn; demonoj ne venas turmenti ŝin, kio cetere estas nenecesa, ĉar ŝi turmentas sin mem, kaj tio estas pli dolora, pro tio, ke, se tio okazus, la demonoj estus estuloj okupantaj sin pri ŝi. Egoismo estis ŝia ĝojo sur la Tero; nu bone, ĝi — Ŝia efektiva demono — ankoraŭ ŝin persekutas, kvazaŭ ia vermo mordanta al ŝi la koron.

*Sankta Ludoviko*

5. Al vi mi parolos pri la grava diferenco ekzistanta inter la moralo dia kaj la moralo homa. La unua helpas la adultulinon en ŝia forlasiteco, kaj diras al la pekuloj: “Pentu, kaj al vi malfermiĝos la regno de la ĉielo.”

Fine la moralo dia akceptas ĉian penton, ĉiujn konfesitajn pekojn, samtempe ke la moralo homa rifuzas penton kaj ridetas al la kaŝitaj pekoj, kiuj, ĝi diras, estas parte pardonitaj. La unuan koncernas la graco de la pardono, kaj la duan la hipokriteco. Elektu, Spiritoj avidaj je vero! Elektu inter la ĉieloj malfermitaj al la pento kaj la toleremo akceptanta la malbonon, forpelante la singultojn de la sincere elmontrita pento, nur por ne vundi la egoismon kaj antaŭjuĝojn. Pentu vi ĉiuj, kiuj pekas, rezignu la malbonon kaj precipe la hipokritecon — vualon el hontindaĵoj, ridetantan maskon de reciprokaj interesoj.

6. Mi estas pli trankvila kaj rezignacia antaŭ la elpago de miaj eraroj. La malbono ne estas ekster mi, ĝi loĝas en mi, kaj mi, ne la eksteraj aferoj, devas ja transformiĝi.

“Ni portas en ni la ĉielon kaj la inferon; niaj eraroj, gravuritaj en nia konscienco, estas flue legataj en la tago de la reviviĝo. Kaj ĉar la animstato nin faligas aŭ altigas, ni estas la juĝantoj de ni mem. Mi klarigas: Spirito malpura kaj *superŝarĝita per kulpoj* ne povas koncepti nek aspiri ian altiĝon, kiu estus al li neelportebla. Kiel la malsamaj specioj de estaĵoj vivas ĉiu en la sfero, kiu estas propra al ili, tiel same la Spiritoj, laŭ sia grado da progreso, moviĝas en la medio adekvata al iliaj kapabloj kaj ne konceptas alian, escepte kiam la progreso (instrumento de la malrapida transformiĝo de la animoj) forprenas de ili la malnoblajn inklinojn, senigante ilin je la krizalido de la peko, por ke ili povu ŝvebi antaŭ ol sin ĵeti tiel rapidaj, kiel sagoj, al la unika kaj dezirata celo — Dio! Ha! mi ankoraŭ rampas, sed mi ne plu malamas, kaj mi konceptas ja la nedireblan feliĉon de la dia amo. Do preĝu por mi, kiu esperas kaj atendas.”

En la sekvanta komunikaĵo, Claire parolas pri sia edzo, kiu ŝin ege martirigis, kaj pri la pozicio, en kiu li troviĝas en la spirita mondo. Tiu priskribo, kiun ŝi ne povis mem kompletigi, estis finita de la spirita gvidanto de la mediumo.

7. Mi venas serĉi vin, vin, kiu por tiel longa tempo lasis min en forgesiteco. Sed mi jam akiras paciencon kaj ne plu mi malesperas. Ĉu vi volas scii, kia estas la situacio de la kompatinda Félix? Li vagadas en la mallumo, forlasita al la profunda nudeco de sia animo. Supraĵa kaj frivola, malnobligita de la sensualismo, li neniam sciis, kio estis amo kaj amikeco. Eĉ ne la pasio ekbrilis en li per siaj malgajaj lumoj. Lia nuna stato estas komparebla kun tiu de infano nekapabla al la funkcioj de la vivo kaj senigita je ĉia protekto. Félix terurite vagas en tiu fremda mondo, kie ĉio brilegas en la lumo de la Dio, kiun li neis.

8. *La gvidanto de la mediumo*. — Mi parolos anstataŭ Claire, ĉar ŝi ne povas daŭrigi la raporton pri la turmentoj de sia edzo, ne ilin suferante:

"Félix — supraĵa je ideoj, same kiel je sentoj; perforta pro malforteco; diboĉa pro frivoleco — en la spiritan mondon eniris nuda tiel rilate la moralon, kiel rilate la korpon. *Per reenkarniĝo li akiris nenion, kaj sekve li devas rekomenci la tutan laboron*. Kiel homo, kiu rekonas la profundan agitiĝon de siaj nervoj, ĉe vekiĝo el longa dormo, tiu kompatinda estulo, elirante el konfuzostato, rekonos, ke li vivis el ĥimeroj kripligintaj lian ekzistadon. Tiam li malbenos la materialismon, kiu donis al li malpenaĵon sub la ŝajno de realaĵo; li kontraŭos al pozitivismo, kiu igis rigardi, kiel iluzion, la ideojn pri la estonta vivo; kiel frenezecon, sian aspiron; kiel malfortecon, la kredon je Dio. Vekiĝante, la malfeliĉulo ekvidos, ke tiuj nomoj de li mokitaj estas formulo de la vero, kaj ke, kontraŭ la instruo de la fabelo, la ĉaso de la besto estis malpli profita ol tiu de la ombro."

*Georges*

### *Studo pri la komunikaĵoj de Claire*

Tiuj komunikaĵoj estas instruaj, ĉar ili montras al ni precipe unu el la plej komunaj trajtoj de la vivo — tiun de egoismo. El ili ne rezultas tiuj grandaj krimoj, kiuj konsternas eĉ la plej perversajn homojn, sed la kondiĉo de grandega amaso vivanta en ĉi tiu mondo, en honoro kaj respekto, nur pro tio, ke ili havas ian bonan ŝajnon kaj sin gardas de la hontego el puno de la sociaj leĝoj. Tiuj homoj ne spertos eksterordinajn punojn en la spirita mondo, sed ian situacion simplan, naturan kaj konforman al siaj animostato kaj vivmaniero. Izoliteco, forlaso, senprotekto, jen la puno al tiu, kiu vivis nur por si mem. Kiel ni vidis, Claire estis Spirito tro inteligenta, sed dotita per malmola koro. La socia pozicio, la riĉeco, la bela korpo, kiujn ŝi posedis sur la Tero, altiris la omaĝojn agrablajn al ŝia vantemo — kio sufiĉis al ŝi; hodiaŭ, kie ŝi troviĝas, ŝi vidas nur indiferentecon kaj frivolecon ĉirkaŭ si.

Tiu puno estas ne nur pli turmentanta ol la doloro, kiu inspiras kortuŝon kaj kompaton, sed ankaŭ ĝi estas rimedo ŝin devigi veki aliulan interesiĝon pri ŝi, pri ŝia morto.

La sesa mesaĝo enhavas ideon tute veran koncerne la obstinecon de kelkaj Spiritoj en la praktiko de malbono.

Ni miris, vidante kiel kelkaj el ili estas nesentemaj al la ideo kaj eĉ al la sceno de feliĉo de la bonaj Spiritoj. Ĝi estas ekzakte la situacio de degenerintaj homoj, kiu plezuras ĉe korupto, same kiel ĉe la krude voluptaj agoj. Tiaj homoj estas, por tiel diri, en sia elemento; ili ne kapablas koncepti delikatajn plezurojn, kaj preferas ĉifonaĵojn al puraj brilaj vestoj, ĉar en tiuj ili sin sentas pli laŭplaĉe. Jen kial ili preferas bakkajn orgiojn, ol bonajn kompaniulojn. Kaj tiuj Spiritoj tiel identiĝas kun tiu vivmaniero, ke ĝi eĉ fariĝas ia dua naturo por ili, tiagrade ke ili kredas sin nekapablaj eĉ sin altigi super sia sfero. Kaj ili tiel konserviĝas, ĝis profunda transformiĝo de la estaĵo revigligos al ili la intelekton, elvolvigos ilian

moralan senton kaj faros ilin senteblaj por la plej subtilaj sensacoj.

Kiam elkarniĝintaj, tiuj spiritoj ne povas tuj akiri la delikatecon de sentoj, kaj dum tempo pli aŭ malpli longa ili okupos la malsuperajn tavolojn de la spirita mondo, same kiel okazas sur la Tero; tiel ili restos dum ili restas ribelaj al la progreso, sed kun la tempo, la sperto, la turmentoj kaj mizeroj de la sinsekvaj reenkarniĝoj alvenos la momento vidi ion pli bonan ol tio, kion ili ĝis tiam posedis. Fine iliaj aspiroj altiĝas, ili ekkomprenas tion, kio mankas al ili kaj komenciĝas la klopodoj de regenerado.

Jam sur tiu vojo, la marŝo estas rapida, ĉar ili ekkonciis pri iu supera bono, kompare kun kiu la aliaj, kiuj estas nenio alia ol krudaj sensacoj, nepre inspiros naŭzon al ili.

— D. (al Sankta Ludoviko) Kion ni komprenu kiel mallumon, en kiu troviĝas dronintaj certaj suferantaj animoj? Ĉu temas pri tiu ofte menciita en la Skribo?

— R. Jes, efektive tiu difinita de Jesuo kaj de la profetoj, kiam ili mencias la punon al la maliculoj.

Sed tio estis nenio alia ol alegorio destinita tuŝi la materiiĝintajn sentumojn de iliaj samtempuloj, kiuj neniam kapablus kompreni punon el la spirita vidpunkto. Iaj Spiritoj estas dronintaj en mallumo, sed tion oni devas rigardi, kiel efektivan nokton de la animo, kompareblan kun la intelekta mallumo de la idioto. Ĝi ne estas anima frenezeco, sed ia nekonscio de tiu kaj de ĉio lin ĉirkaŭanta, nekonscio, kiu okazas ĉu en ĉeesto, ĉu en malesto de la materia lumo. Ĝi estas precipe la puno de tiuj, kiuj dubis pri sia sorto. Ili ja kredis al la nenio; la aspekto de tiu nenio ilin turmentas, ĝis kiam ilia animo, rekonante sian eraron, rompas la afliktiĝon, kiu ĝin malvigligis kaj regadis, simile al homo, kiu, subpremita de peniga sonĝo, en la momento luktas, per la tuta forto de siaj kapabloj, kontraŭ la teruraĵoj komence lin superregintaj. Ĉi tiu momenta reduktiĝo de la animo al la nenio fikcia, kaj konscia pri sia ekzisto, estas sento

pli kruela ol oni povas imagi, pro la ripoza aspekto, kiun ĝi havas: — tiu ripozo trudita, tiu nuleco de la estaĵo, tiu necerteco turmentas ĝin. La ĉagreno, kiu ĝin invadas, estas la plej terura el la punoj, ĉar ĝi vidas nenion ĉirkaŭ si — nek aĵojn nek estulojn; vere ĉio tio estas nur mallumo por ĝi.

*Sankta Ludoviko*

(Claire): Jen mi estas ĉi tie. Ankaŭ mi povas respondi al la demando pri la mallumo, ĉar mi vagadis kaj suferis dum longa tempo en tiu limbo, kie ĉio estas singulto kaj mizeroj. Jes, ekzistas la videbla mallumo, pri kiu parolas la Skribo, kaj la malfeliĉuloj forlasantaj la vivon, nesciaj aŭ kulpaj, post la surteraj provoj estas forpelitaj en malvarman regionon, nekonsciaj pri si mem kaj pri sia destino. Ĉar ili kredas la eternecon de tiu situacio, ilia lingvaĵo ankoraŭ estas tiu de la vivo ilin deloginta, kaj ili miras kaj ektimas antaŭ la profunda mallumo: mallumo estas ja tiuj lokoj homplenaj kaj samtempe dezertaj, spacoj en kiuj eraras obskuraj kompatindaj Spiritoj, sen konsolo, sen amikoj, sen iu ajn helpo. Al kiu ili sin direktas... se ili sentas sur si la premegan eternecon?... Ili tremas kaj bedaŭras la malnoblajn interesojn, kiuj okupis iliajn horojn; priploras la foreston de la noktoj, plurfoje alportintaj al ili, en feliĉa sonĝo, la forgeson pri la ĉagrenoj. Por la Spirito la mallumo estas: nescio, malpleno, abomeno kontraŭ la nekonataĵo... Mi ne povas daŭrigi...

*Claire*

Ankoraŭ pri ĉi tiu temo ni ricevis la jenan klarigon:

“Pro sia naturo la Spirito posedas ian luman proprecon elvolviĝanta sub la influo de la aktiveco kaj kvalitoj de la animo. Oni povas diri, ke tiuj kvalitoj estas por la perispirita fluidaĵo, same kiel la frotado por la alumeto. La intenseco de la lumo estas proporcia al la pureco de la Spirito: la plej malgrandaj moralaj neperfektaĵoj ĝin

malgravigas kaj malfortigas. La lumo elsendita de iu Spirito estos des pli viva, ju pli granda estos lia progreso. Tiel, ĉar la Spirito estas iamaniere sia propra *lanterno*, li vidos proporcie al la intenseco de la lumo, kiun ĝi naskas, el kio rezultas, ke la Spirito ĝin ne naskantaj troviĝas en malumo."

Ĉi tiu teorio estas perfekte ekzakta rilate la disradiadon de lumaj fluidaĵoj el la superaj Spiritoj, kaj ĝi estas konfirmita de observo, kvankam oni ne povas konkludi, ke tiu disradiado estas la vera kaŭzo, aŭ almenaŭ la sola kaŭzo de la fenomeno; unue, ĉar ne ĉiuj malsuperaj Spiritoj estas en mallumo; due, ĉar unu sama Spirito povas troviĝi alterne en lumo kaj en mallumo; kaj trie, fine, ĉar ankaŭ lumo estas puno por la Spiritoj tre neperfektaj. Se la mallumo, en kiu troviĝas iuj Spiritoj, estas propra al ilia personeco, tiu mallumo estus *konstanta* kaj ĝenerala por ĉiuj malbonaj Spiritoj, kio cetere ne okazas. Iafoje tiuj plej rafinite malicaj perfekte vidas; aliaj, ne tiaj, restas por kelka tempo en profunda mallumo.

Tiamaniere ĉio montras, ke, sendepende de sia propra lumo, la Spiritoj ricevas eksteran lumon al ili mankantan laŭ la cirkonstancoj, el kio oni devas konkludi, ke la mallumo dependas de ia kaŭzo aŭ de ia fremda volo, kio estas speciala puno de la superega justeco por difinitaj kulpoj.

*Demando* (al Sankta Ludoviko). — *Kial la morala edukado de la elkarniĝintaj Spiritoj estas pli facila ol tiu de la enkarniĝintaj?* La rilatoj, kiujn Spiritismo starigis inter homoj kaj Spiritoj, ebligas, ke ĉi tiuj lastaj estu pli rapide korektitaj sub la influo de la bonfaraj konsiloj, ol la enkarniĝintaj Spiritoj, kiel oni vidas ĉe la kuracado de obseditoj.

*Respondo* (Societo de Parizo). — Laŭ sia propra naturo, la enkarniĝinto troviĝas en senĉesa lukto pro la kontraŭaj elementoj, el kiuj li konsistas kaj kiuj devas konduki lin al lia providenca celo, reagante unu sur alian.

La materio estas facile superregata de ekstera fluidaĵo; se, kun la tuta morala povo, je kiu ĝi estas

kapabla, la animo ne reagos, ĝi lasos sin regi de la peranto de sia korpo, obeante la impulson de la perversaj influoj ĝin ĉirkaŭantaj, kaj tio kun des pli granda facileco, ĉar la nevideblaj estuloj, kiuj ĝin subjugigas, atakas la pli atingeblajn punktojn, la inklinojn al la reganta pasio.

Tio sama ne okazas al la elkarniĝinto, kiu, kvankam troviĝas sub la duonmateria influo, ne povas esti komparata, pro sia stato, kun la enkarniĝinto. La homa respekto, tiel profunda ĉe la homo, ne ekzistas ĉe la elkarniĝinto, kaj nur ĉi tiu penso sufiĉas por devigi lin ne rezisti dum longa tempo la argumentojn, kiujn la propra intereso montras al li kiel bonajn.

Li povas lukti, kaj li eĉ ĝin faras ĝenerale kun pli da impeto ol la enkarniĝinto, ĉar li estas pli libera. Nenia priokupiĝo pri materia intereso, pri socia pozicio prezentiĝos al lia rezonado. Li luktas pro amo al malbono, sed frue li konvinkiĝas pri sia senforteco, antaŭ la morala supereco lin superreganta; la perspektivo pri lia bona estonteco pli facile lin tuŝas, ĉar li rekonas sin en la sama vivo, en kiu tiu estonteco devas efektiviĝi; kaj tiu vido ne malklariĝas en la tumultego de la homaj plezuroj. Unuvorte la sendependeco je la karno faciligas la konvertiĝon, precipe kiam oni akiris tian aŭ alian elvolviĝon per la plenumitaj provoj.

Spirito tute primitiva estus malmute inklina al rezonado, kio cetere ne okazas al tiu, kiu jam havas sperton pri la vivo. Krom tio, ĉe enkarniĝinto, same kiel ĉe elkarniĝinto, sur la animon, sur la senton estas ja necese agi.

Ĉia materia ago povas ĉesigi dum momento la suferon de malvirta homo, sed kio ĝi ne povas, tio estas detrui la morban principon sidantan en la animo.

*Ĉiu ajn ago ne celanta la pliperfektiĝon de la animo ne povos deturni ĝin de malbono.*

*Sankta Ludoviko*

## ĈAPITRO V

## MEMMORTIGINTOJ

### La memmortiginto el Samaritaine (*)

La 7an de Aprilo 1858, je la sepa vespere, iu viro ĉirkaŭ 50-jara kaj konvene vestita venis en la institucion Samaritaine, en Parizo, kaj ordonis, ke oni preparu al li banon. Post ĉirkaŭ du horoj, la servisto, mirante pri la silento de la kliento, decidis eniri en lian kabineton por vidi tion, kio okazis.

Tiam vidiĝis terura sceno: la malfeliĉulo tranĉis al si la gorĝon per razilo kaj lia tuta sango miksiĝis kun la akvo en la banejo. Kaj, ĉar la identeco de la sinmortiginto ne povis esti konstatita, lia korpo estis transportida en kadavrejon.

1. — *Elvoko*. (Respondo de la gvidanto de la mediumo.) — Atendu, li estas ĉi tie.

2. — Kie vi hodiaŭ troviĝas? — R. Mi ne scias... diru al mi tion.

3. — Vi troviĝas en kunveno de personoj lernantaj Spiritismon, kiuj estas al vi bonvolaj. — R. Diru al mi, ĉu mi vivas, ĉar ĉi tiu medio min sufokas.

---

(*) Banejo Samaritaine apud Pont-Neuf sur la dekstra brako de la rivero Sejno. (Vd "Reformador", n-ro de Februaro 1976.) — **La Trad.**

Kvankam apartigita de la korpo, lia animo tamen estas droninta en tio, kion oni povus nomi kirlo da korpa materio; tiel vivaj estas al ĝi la surteraj ideoj, ke ĝi kredas sin enkarniĝinta.

4. — Kiu pelis vin veni ĉi tien? — R. Mi sentas min korfaciligita.

5. — Kia estas la motivo, kiu trenis vin al memmortigo? — R. Ĉu mi estas mortinta? Mi? Ne... ĉar mi loĝas en mia korpo... Vi ne scias, kiel mi suferas!... Mi sufokiĝas... Dio volu, ke kompatema mano neniigu min per unu fojo.

6. — Kial vi ne lasis postsignojn, kiuj povus fari vin rekonebla? — R. Mi estas forlasita; *mi evitis suferon por transdoni min al torturo*.

7. — Ĉu vi ankoraŭ havas la samajn motivojn por resti nekonata? — R. Jes; ne turnu varmegan feron en mia sanganta vundo.

8. — Ĉu vi povas diri al ni viajn nomon, aĝon, profesion kaj loĝejon? — R. Tute ne.

9. — Ĉu vi havis familion, edzinon, infanojn? — R. Mi estis la forlasito, neniu min amis.

10. — Kaj kion vi faris por esti tiel forlasita? — R. Kiom multe da homoj estas tiel, kiel mi estas!... Ĉu viro povas ja vivi forlasita en la sino de sia familio, kiam neniu lin estimas?!

11. — En la momento, kiam vi vin mortigis, ĉu vi ne spertis ian heziton? — R. Mi avidis morti...Mi deziris ripozi.

12. — Kial la penso pri la estonteco ne igis vin rezigni tian planon? — R. Mi absolute ĝin ne kredis. Mi estis iu seniluziiĝinta. Estonteco estas espero.

13. — Kiaj estis viaj pripensoj, kiam vi sentis la estingiĝon de via vivo? — R. Mi ne pripensis, mi sentis... Sed mia vivo ne estingiĝis... mia animo estas ligita al la korpo... *Mi sentas vermojn mordi min.*

14. — Kian sensacion vi spertis en la ĝusta momento de via morto? — R. Ĉu ĝi do kompletiĝis?

15. — Ĉu estis dolora la momento, kiam via vivo estingiĝis? — R. Malpli dolora ol tiuj postaj momentoj. Nur la korpo suferis.

16. — (Al la Spirito Sankta Ludoviko.) Kion la Spirito volas diri, asertante, ke la momento de la morto estis malpli dolora ol tiuj post ĝi? — R. La Spirito demetis la ŝarĝon, kiu lin premis; li ree sentis la volupton de doloro.

17. — Ĉu tia stato ĉiam venas post memmortigo? — R. Jes. La Spirito de memmortiginto restas ligita al sia korpo ĝis la limdato de ĝia vivo. La natura morto estas liberigo de la vivo: memmortigo ĝin tute rompas.

18. — Ĉu tio sama okazas ĉe la akcidentaj mortoj, kvankam nevolaj, kiuj tamen mallongigas la ekzistadon? — R. Ne. Kion vi komprenas, kiel memmortigon? La Spirito nur respondas por siaj agoj.

Tiu dubo pri la morto estas tre ordinara ĉe la elkarniĝintaj personoj, kaj precipe ĉe tiuj, kiuj dum la vivo ne altigis sian animon super la materion. Tio estas fenomeno laŭŝajne stranga je la unua vido, sed kiu nature klariĝas. Se al individuo, unuafoje en somnambula stato, ni demandus, ĉu li dormas, li preskaŭ ĉiam nee respondus, kaj tiu respondo estas logika: la interparolanto ja misdemendas, uzante ne ĝustan vorton. En la ordinara parolo la ideo pri dormo estas ĉeso de ĉiuj sensivaj kapabloj; nu, somnambulo, kiu pensas, kiu vidas kaj sentas, kiu konscias pri sia libero, ne opinias sin endormiĝinta, kaj efektive li ne dormas, laŭ la vulgara senco de la vorto. Jen kial li *nee* respondas, ĝis kiam li familiariĝos kun tiu maniero kompreni la fakton. Tio sama

okazas al homo ĵus elkarniĝinta; laŭ li la morto estas neniigo de la memo, kaj tiel, same kiel la somnambulo, li vidas, sentas kaj parolas, kaj tial li ne konsideras sin mortinto, kaj tion li asertas, ĝis kiam li akiros la intuicion pri sia nova stato. Tiu iluzio ĉiam estas pli-malpli dolora, ĉar ĝi neniam estas kompleta kaj donas al la Spirito tian aŭ tian angoron. Laŭ la supra ekzemplo ĝi estas efektiva turmentego pro la sento de vermoj mordantaj la korpon, kaj ni ne parolas pri ĝia daŭro, kiu eble estas samlonga, kiel la tempo de vivo nekompletigita. Ĉi tiu stato estas komuna al la sin-mortigintoj, kvankam ĝi ne ĉiam sin prezentas en identaj kondiĉoj, daŭre kaj intense variantaj, laŭ la cirkonstancoj malgravigantaj aŭ gravigantaj la eraron. La sento de vermoj kaj malkomponiĝo de la korpo ne estas nur propra al la memortigintoj: spertas ĝin ankaŭ tiuj, kiuj vivis pli materie ol spirite. Ĝenerale ne ekzistas eraro libera je punoj, sed ankaŭ ne estas absoluta kaj uniforma regulo ĉe la procedoj de puno.

## La patro kaj la konskripto

En la komenco de la milito en Italujo, en 1859, ia komercisto en Parizo, patro de familio, ĝuante ĝeneralan estimon de siaj najbaroj, havis filon, kiu estis lote rekrutita por militoservo. Nekapabla sendevigi lin fari tiun servon, venis al li en la kapon la ideon sinmortigi por evitigi la militoservon al la junulo, kiu fariĝus solfilo de vidvino. Post unu jaro li estis elvokita ĉe la Societo de Parizo, laŭ peto de persono, kiu lin konis, deziranta certiĝi pri lia sorto en la spirita mondo.

(Al Sankta Ludoviko.) — Ĉu vi povas diri al ni, se estas eble elvoki la Spiriton, kiun ni ĵus aludis? — R. Jes, kaj li profitos el tio, ĉar li restos pli konsolita.

1. — *Elvoko*. — R. Ho, dankon! Mi multe suferas, sed... estas juste. Li tamen min pardonos.

La Spirito tre malfacile skribas; la literoj estas neregulaj kaj misformitaj; post la vorto *sed*, li haltas, kaj vane penante skribi, li nur sukcesas fari nedeĉifreblajn strekojn kaj punktojn. Estas evidente, ke ĝuste la vorto Dio estis tiu, kiun li ne sukcesis skribi.

2. — Bonvolu klompletigi la frazon per la vorto, kiun vi ne skribis. — R. Mi ne indas ĝin skribi.

3. — Vi diras, ke vi suferis; vi komprenas, ke vi malbone agis, sin mortigante; ĉu la motivo, kiu pelis vin al tiu ago ne altiris al vi ian ajn indulgon? — R. La puno estos malpli daŭra, sed eĉ tiel mia ago restas plu malbona.

4. — Ĉu vi povas priskribi al ni tiun punon? — R. Mi duoble suferas de animo kaj de korpo; kaj mi suferas de ĉi tiu lasta, kvankam mi ĝin jam ne posedas, kiel operaciito suferas de manko de amputita membro.

5. — Ĉu vian memmortigon kaŭzis nur la protekto al via filo, aŭ por ĝi kunhelpis aliaj motivoj? — R. Mi estis tute inspirita de la patra amo, sed misinspirita. Pro tio mia puno estos mallongigita.

6. — Ĉu vi povas precize diri kiel longe daŭros viaj suferoj? — R. Mi ne vidas ilian finon, sed mi estas certa, ke tiu fino ekzistas, kio estas korfaciligo por mi.

7. — Antaŭ nelonge ne estis al vi eble skribi la vorton Dio, kaj tamen ni jam vidis tre suferantajn Spiritojn fari tion: ĉu ĝi estas sekvo de via puno? — R. Mi povos fari ĝin per grandaj klopodoj de pento.

8. — Faru do tiujn klopodojn por ĝin skribi, ĉar ni estas certaj, ke vi estos kvietigita. (La Spirito fine strekis ĉi tiun frazon per dikaj, neregulaj kaj tremaj literoj: — *Dio estas treege bona.*)

9. — Ni estas kontentaj de via bonvolo, kun kiu vi respondis al nia elvoko, kaj ni petos Dion, ke Li etendu sur vin sian favorkorecon. — R. Jes, dankon.

10. — (Al Sankta Ludoviko.) Ĉu vi povas doni al ni vian instruon pri ĉi tiu simortigo? — R. Ĉi tiu Spirito

juste suferas, ĉar mankis al li konfido al Dio, manko, kiu ĉiam estas puninda. Tiu puno estus pli granda kaj pli daŭra, se ne estus la laŭdinda motivo malhelpi, ke lia filo sin elmetu al morto en milito. Dio, kiu estas justa kaj vidas la fundon de la koroj, punas lin nur laŭ liaj faroj.

RIMARKOJ. Je la unua vido, kiel agon de abnegacio, oni povus konsideri ĉi tiun sinmortigon senkulpinda. Efektive ĝi estas tia, sed ne en absoluta maniero. Al tiu viro mankis konfido al Dio, kiel diris la Spirito Sankta Ludoviko. Lia faro eble malhelpis le efektiviĝon de la destinoj de lia filo; cetere li ne estis certa, ke tiu mortus en la milito kaj la milita kariero eble donus al li okazon progresi. Lia intenco estis nobla, kaj tio malgravigas la faritan malbonon kaj li meritas indulgon; sed malbono ĉiam estas malbono, kaj se ĝi ne estus, oni povus, uzante la ŝildon de rezonado, senkulpigi ĉiujn krimojn kaj eĉ mortigi, pretekstante servi.

Patrino, kiu mortigas sian infanon, kredante, ke ŝi ĝin sendas al la ĉielo, ĉu ŝi estus malpli kulpa, pro tio, ke ŝi bonintence krimis? Jen sistemo, kiu eble pravigus ĉiujn krimojn de la blinda fanatikeco de la religiaj militoj.

Homo ordinare ne rajtas meti finon al sia vivo, ĉar ĉi tiu estas al li donita por plenumado de devoj sur la Tero, sufiĉa motivo, ke li ĝin ne mallongigu memvole, je nenia preteksto. Sed la homon — ĉar li havas sian liberan volon — neniu malhelpas malrespekti tiun leĝon. Li tamen submetiĝas al la sekvoj de tiu malrespekto. La memmortigo plej severe punata estas tiu rezultanta el malespero, celante liberiĝon el la surteraj mizeroj, kiuj samtempe estas elaĉetoj kaj provoj. Eviti ilin estas retropaŝi de antaŭ akceptita tasko, kaj iafoje de antaŭ plenumota misio. La sinmortigo ne konsistas nur en la memvola ago, kiu kaŭzas la subitan morton, sed en ĉio konscie farita por plirapidigi la estingon de la vivofortoj. Oni ne povas nomi memmortiginto tiun, kiu elmetas sian vivon por savi sian similulon: unue, ĉar por la afero li ne intencas senigi sin je la vivo, kaj due, ĉar ne estas danĝero, de kiu la Providenco ne povas senigi nin, kiam la horo ne venis. La morto el tiaj eventualaĵoj estas merita sinofero, ĉar ĝi estas abnegacia ago favore por aliulo. (La Evangelio laŭ Spiritismo, ĉap. V, §§ 5, 6, 18 kaj 19)

## François-Simon Louvet

(El Havre)

La sekvanta komunikaĵo estis spontanee diktita en spiritista kunsido, en Havre, la 12an de Februaro 1863:

"Ĉu vi sentos kompaton al ia suferanta mizerulo, de longe spertanta kruelajn torturojn? Ho! la malpleno... la Spaco... mi defalas... mi falas... mi mortas... Helpo! Dio, mi havis ekzistadon tiel mizeran... Mi, kompatinda diablo, malsatis multfoje en maljuneco; kaj tial mi kutimiĝis drinki, senti honton pri ĉio kaj malŝaton al ĉio.

Mi volis morti kaj mi ĵetis... Ho, mia Dio! Kia momento! Kaj kial tia deziro, se la fino estis tiel proksima? Preĝu, ke mi ne vidu senĉese ĉi tiun *malplenon sub mi*... Mi estas dispeciĝonta kontraŭ tiujn ŝtonojn! Mi petegas vin, kiuj konas la mizerojn de tiuj, kiuj ne plu apartenas al tiu mondo. Vi ne konas min, sed mi tiom suferas... Kial pli da provoj? Mi suferas! Ĉu ĝi ne sufiĉas? Se mi malsatus, anstataŭ ĉi tiu plej terura sufero kaj krome neperceptebla por vi, vi ne hezitus kvietigi min per ia panpeceto. Mi do petas vin preĝi por mi... Mi ne povas resti pli da tempo en ĉi tiu stato... Demandu iun ajn el ĉi tiuj ĉeestantaj kaj vi scios, kiu mi estis. Preĝu por mi."

*François-Simon Louvet*

*La gvidanto de la mediumo.* – "Tiu, kiu ĵŭs alparolis vin, estis kompatinda malfeliĉulo spertinta sur la Tero la provon de mizero; venkita de ĉagreno, la kuraĝo mankis al li, kaj li, anstataŭ laŭdeve rigardi la ĉielon, sin donis al ebrieco; li malsupreniris al la lastaj ekstremaĵoj de malespero, metante finon al sia malgaja provado: li ĵetis sin de sur la Turo Francisko I, en la 22-a de Julio 1857. Kompatu lian animon, kiu ne estas progresinta, sed kiu duonvidas el la estonta vivo ion sufiĉan por suferi

kaj deziri ian reboniĝon. Petu Dion, ke Li donu al li tiun favoron, kaj per tio vi faros ion meritoplenan.

"Serĉante informojn pri tio, oni trovis en la *Journal du Havre* de la 23-a de Julio 1857 la jenan sciigon:

"Hieraŭ, je la 4-a vespere, la pasantoj sur la kajo estis dolore impresitaj de terura akcidento: — viro ĵetis sin de sur la turo, dispeciĝante kontraŭ ŝtonojn. Li estis malnova haŭlisto, kies inklino al ebrieco kondukis lin al sinmortigo. Li nomiĝis François-Victor-Simon Louvet. La korpo estis transportita al la hejmo de unu el liaj filinoj, ĉe la strato Corderie.

Li estis 67-jara."

Tiu viro mortis antaŭ ses jaroj kaj li ankoraŭ vidas sin falanta de sur la turo, dispeciĝanta kontraŭ ŝtonojn... La malpleno timegigas lin, la perspektivo de la falo lin teruriġas... kaj tio okazas jam de 6 jaroj! Kiel longe daŭros tia stato? Li ĝin ne scias, kaj tia necerteco pliigas liajn angorojn. Ĉu tio ne estas la samo, kiel infero kun flamoj? Kiu malkaŝis kaj elpensis tiajn punojn? La suferantoj mem estas tiuj, kiuj venas ilin priskribi, kiel aliaj Spiritoj faras tion pri siaj ĝojoj. Kaj ili multfoje faras tion spontanee, kiam ni ne pensas pri ili — kio forigas ĉian hipotezon, ke ni estas ludilo de nia propra imagemo.

## Patrino kaj filo

En Marto 1865 S-ro M.C., komercisto en malgranda urbo en la ĉirkaŭaĵo de Parizo, havis en sia hejmo la pli maljunan el siaj infanoj grave malsana, kiu aĝis 21 jarojn. Ĉi tiu fraŭlo, antaŭvidante sian morton, venigis sian patrinon kaj ankoraŭ havis forton por ŝin brakumi. Ŝi diris al li, verŝante abundajn larmojn: "Iru, mia filo, antaŭ min, ĉar mi post nelonge vin sekvos." Dirinte tion, ŝi retiriĝis, kaŝante la vizaĝon inter la manoj.

La personoj ĉeestantaj ĉi tiun konsternan scenon konsideris nura eksplodo de doloro tiujn vortojn de S-rino C., doloro, kiun la tempo kvietigos. Post la morto de la malsanulo, oni serĉis ŝin tra la tuta domo kaj fine

oni trovis ŝin pendigita en la provizejo. La enterigo de la memmortigintino okazis samtempe kun tiu de ŝia filo.

*Elvoko de ĉi tiu multe da tagoj la fakto*. — D. Ĉu vi scias pri la sinmortigo de via patrino pro la malespero, kiun via forpaso kaŭzis al ŝi? — R. Jes, kaj sen la ĉagreno kaŭzata de tiu ŝia fatala decido, mi opinius min tute feliĉa. Kompatinda, bonega patrino! Ŝi ne povis elteni la provon pri tiu nedaŭra apartiĝo, kaj ŝi iris kuniĝi al sia filo, sekvante vojon, kiu ŝin pli apartigis de li. Kaj dum kiom da tempo! Tiel ŝi longe prokrastis kuniĝon, kiu baldaŭ estus okazinta, se ŝia animo obee alkonformiĝus al la volo de la Sinjoro; se ŝi estus rezignaciiinta, humiliĝinta, pentinta antaŭ la provo, kiu al ŝi sin trudis, antaŭ la elaĉeto, kiu devus ŝin purigi! Preĝu, ho preĝu por ŝi!... kaj super ĉio ne imitu ŝin, ho patrinoj, emociite de la rakonto pri ŝia morto. — Ne pensu, ke ŝi kun amo pli granda ol tiu de aliaj patrinoj amis tiun filon, pri kiu ŝi fieris, ne; al ŝi ja mankis kuraĝo kaj rezignacio. Patrinoj min aŭdantaj, kiam agonio senvivigos la okulojn de viaj infanoj, rememoru, ke, same kiel la Kristo, ili supreniras sur la supron de Kalvario, de kie ili leviĝos al la eterna gloro.

*Benjameno C...*

*Elvoko de la patrino*. — R. Mi volas vidi mian infanon. Ĉu vi havas povos redoni lin al mi? Krueluloj!... Vi forprenis lin de mi por konduki lin al la lumo, kaj vi lasis min en mallumo. Mi volas lin... mi volas lin, ĉar li apartenas al mi!... Ĉu nenion valoras la patrina amo? Nu, mi portis lin en la ventro, dum naŭ monatoj; mi lin mamnutris; mi nutris per mia karno lian karnon, per mia sango lian sangon; mi gvidis liajn unuajn paŝojn; mi intruis lin balbuti la nomon Dio kaj la dolĉan nomon patrino; mi faris el li homon plenan de aktiveco, de inteligento, de honesteco, de fila amo, por lin perdi, kiam li realigadis ĉiujn miajn esperojn, kiam brila estonteco jam venis antaŭ liajn okulojn! Ne, Dio ne estas justa; Li ne estas Dio de la patrinoj, ne komprenas iliajn dolorojn

kaj afliktiĝojn... Kaj kiam mi donis min al la morto por ne apartiĝi de mia filo, tiam oni lin ree ŝtelis de mi!... Mia filo! mia filo, kie vi estas?

*Elvokanto*. — Kompatinda patrino, ni dividas kun vi vian doloron. Sed vi serĉis malĝojigan rimedon por kolektiĝi al via filo: — Memmortigo estas krimo en la okuloj de Dio, kaj vi devas scii, ke Dio punas ĉian malobeon al siaj leĝoj. La foresto de via filo estas via puno.

*Ŝi*. — Ne; mi opiniis Dion pli bona ol la homoj; mi ne kredis al lia infero, sed mi kredis al kolektiĝo de animoj sin amantaj, kiel ni nin amas... Mi eraris... Dio ne estas justa nek bona, tial, ke Li ne komprenas la intensecon de mia doloro kaj de mia amo!... Ho! kiu redonos al mi mian filon? Ĉu mi lin perdis por ĉiam? Kompaton! kompaton, mia Dio!

*Elvokanto*. — Nu, trankviliĝu de via malespero; konsideru, ke se ekzistas rimedo revidi vian filon, vi ĝin ne atingos per blasfemoj kontraŭ Dio, kiajn vi eldiras. Per tio, anstataŭ altiri Lian favorkorecon, vi meritas pli fortan severecon.

*Ŝi*. — Oni diris al mi, ke mi neniam ree vidos lin, kaj mi komprenis, ke oni kondukis lin al la paradizo. Rilate min, ĉu mi eble estas en la infero? En la infero de patrinoj? Ĝi ekzistas cetere mi ĝin vidas...

*Elvokanto*. — Via filo ne estas perdita por ĉiam; vi ja vidos lin, sed estas necese tion meriti pro submetiĝo al la volo de Dio, dum ribelo povos senfine prokrasti tiun momenton. Aŭdu min: Dio estas senfine bona, sed ankaŭ senfine justa. Tiel neniu senmotive estas punata, kaj, se al vi sur la Tero Li trudis grandajn dolorojn, estas pro tio, ke vi ilin meritis. La morto de via filo estis ia provo por via rezignacio; bedaŭrinde sub ĝi vi falis, kiam vi vivis, kaj nun post la morto vi ree falas; kiel vi deziras, ke Dio rekompencu la ribelintajn infanojn? La kondamno ne estas nenuligebla kaj la pento de kulpulo ĉiam estas konsiderinda. Se vi humile estus spertinta la provon; se vi pacience estus atendinta la momenton de via elkarniĝo,

vi, enirante en la spiritan mondon, en kiu vi troviĝas, tuj estus vidinta vian filon, kiu kun malfermitaj brakoj akceptus vin. Post lia foresto vi ĝojegante vidus lin. Sed kion vi faris kaj ankoraŭ faras, tio starigas baron inter vi kaj li. Ne opiniu lin perdita en la profundegaĵo de la Spaco, prefere li estas pli proksima al vi, ol kiel vi pensas — tiel okazas, ĉar netravidebla vualo kaŝas lin for de via vido.

Li vin ĉiam vidas kaj amas, bedaŭrante la malgajan situacion, en kiun vi falis pro manko de konfido al Dio, kaj avide atendante la feliĉan momenton por prezenti sin al vi. Nur de vi dependas plifruigi aŭ malfruigi tiun momenton. Preĝu al Dio kaj diru kun mi: ”Mia Dio, pardonu min, ke mi dubis pri via justeco kaj boneco; se vi min punis, mi rekonas, ke mi ĝin meritas. Bonvolu akcepti miajn penton kaj submetiĝon al via sankta volo.”

*Ŝi.* — Kian lumon de espero vi ĵus faris en mia animo! Ĝi estas kvazaŭa fulmo en la mallumo min ĉirkaŭanta. Dankon, mi estas preĝonta... Adiaŭ.

La morto, eĉ pro sinmortigo, ne kaŭzis al ĉi tiu Spirito la iluzion, ke li ankoraŭ vivas. Li sin prezentas konscia pri sia stato: — tiel estas, ĉar por aliaj la puno konsistas en tiu iluzio, pro la ligiloj tenantaj ilin ĉe la korpo. Ĉi tiu virino volis forlasi la Teron por sekvi sian filon en alia vivo: estis do necese, ke ŝi sciis, ke ŝi tie reale estas pro certeco pri sia elkarniĝo, pro la ekzakta kono pri sia situacio. Tiel estas, ĉar ĉiu eraro estas punata laŭ la cirkonstancoj, kiuj ĝin determinis, kaj ĉar ne estas unuformaj punoj por samspecaj eraroj.

## Duobla sinmortigo pro amo kaj devo

En unu ĵurnalo de la 13-a de Junio 1862 estas legata la jena sciigo:

“La juna Palmyre, modistino, loĝanta ĉe siaj gepatroj, estis dotita per ĉarma aspekto kaj afabla karaktero. Tial ankaŭ multaj amindumis ŝin. El ĉiuj amindumantoj ŝi elektis B., kiu reciprokis ŝian preferon per sia plej viva pasio. Malgraŭ sia korinklino al li, pro respekto al

siaj gepatroj, Palmyre konsentis edziniĝi kun D., kies socia rango ŝajnis supera ol tiu de lia rivalo. B. kaj D. estis amikoj, kaj kvankam ne estis inter ili interesaj rilatoj, ili tamen neniam ĉesis renkontiĝi. La reciproka amo de B. kaj Palmyre, kiu fariĝis S-rino D., neniel malintensiĝis, kaj malgraŭ tio, ke ambaŭ klopodis ĝin bridi, ĝi intensiĝis rekte proporcia al tiu klopodo. Celante ĝin estingi, B. decidis edziĝi kaj efektive edziĝis kun junulino posedanta eminentajn kvalitojn, kaj li faris ĉion eblan por ŝin ami.

Sed li frue rimarkis ke tiu heroeca rimedo estis neutila por la forgeso. Kvar jaroj forpasis, dum kiuj B. kaj S-rino D. ne malplenumis siajn devojn.

Kion ili suferis, tion nur ilin scias, ĉar D., kiu efektive estimis sian amikon, ĉiam altiris ĉi tiun al sia hejmo, insistante, ke li ne foriru, kiam li provis tion fari.

Renkontiĝinte iun tagon pro cirkonstancoj neatenditaj kaj sendependaj de sia volo, la du geamantoj sciigis unu alian pri la doloro ilin torturanta kaj ili opiniis, ke la morto en tiu okazo estus la sola rimedo, kiu al ili prezentiĝas. Ili interkonsentis sin duope mortigi, en la sekvanta tago, kiam S-ro D. estos pli longe for de sia hejmo. Post la lastaj preparoj ili skribis longan kaj kortuŝan leteron, klarigante la kaŭzon de sia decido: por ne adulti. Ili finis la leteron kun peto pri pardono kaj plie kun deziro, ke oni enmetu ilin en la saman tombon.

Reveninte hejmen S-ro D. ilin renkontis sufokitaj. Li respektis iliajn lastajn dezirojn, kaj tiel ne konsentis, ke iliaj korpoj estu apartigitaj en la tombejo."

Post kiam tiu okazaĵo estis submetita al la Societo de Parizo, kiel temon por studo, iu Spirito klarigis:

"La du geamantoj sin mortigintaj ankoraŭ ne povas respondi al vi. Mi vidas ilin konsternitaj kaj teruritaj de la perspektivo de eterneco. La moralaj sekvoj de la farita eraro devigas ilin fari *sinsekvajn pilgrimojn*, dum kiuj iliaj apartigitaj animoj senĉese penas renkontiĝi, submetitaj al la duobla turmentego reciproke antaŭsenti kaj vane deziri unu alian.

Post la elaĉeto ili kune restos por ĉiam, en la sino de la eterna amo. Post ok tagoj, en la proksima seanco vi povos ilin elvoki. Ili ĉi tien venos, ne vidante sin, ĉar densa mallumo ilin longe apartigos.”

1. — *Elvoko de la sinmortigintino*. — Ĉu vi vidas vian amanton, kun kiu vi vin mortigis? — R. Mi vidas neniun, eĉ nek la Spiritojn, kiuj vagas kun mi en ĉi tiu mondo. Kia nokto! Kia nokto! Kaj kia dika vualo kovras la frunton!

2. — Kian sensacion vi spertis, kiam vi vekiĝis en alia mondo? — R. Strangan! Mi sentis malvarmon kaj tamen mia korpo ardis. Mi havis glacion en la vejnoj kaj fajron sur la frunto! Strangaĵo, antaŭe nesentita duopo! Fajro kaj glacio ŝajne min konsumis! Kaj mi pensis, ke mi estas mortonta la duan fojon!...

3. — Ĉu vi sentas ian ajn fizikan doloron? — R. Mia tuta sufero sidas *ĉi tie, ĉi tie*...

— Kion vi deziras esprimi per la vortoj *ĉi tie, ĉi tie*? — R. *Ĉi tie*, en mia cerbo; *ĉi tie*, en mia koro...

4. — Ĉu vi kredas la ĉiamecon de tiu situacio? — R. Ho, ĉiam! ĉiam! Mi iafoje aŭdas inferajn ridojn, terurajn voĉojn, kiaj: *tiel ĉiam!*

5. — Nu bone: ni certe povas diri al vi, ke tiel ne ĉiam estos. Vi per pento ricevos pardonon. — R. Kion vi diras? Mi ne aŭdas.

6. — Ni rediras, ke viaj suferoj havos finon, ke vi per pento povos ilin mallongigi, kaj estas eble al ni helpi vin per preĝo. — R. Mi ne aŭdis, krom konfuzaj sonoj, pli ol unu vorton. Tiu vorto estas: — *favoro*! Ĉu estis efektive favoro, kion vi eldiris? Vi parolis pri *favoro*, sed

sen ia dubo vi faris ĝin al la ĉi tie preterpasinta animo, kompatinda infano, kiu ploras kaj atendas.

Iu sinjorino, ĉeestanta la seancon, informis, ke ŝi faris por la malfeliĉulino fervoran preĝon, kiu sen ia dubo emociis ŝin, kaj ke ŝi efektive mense petegis por ŝi favoron de Dio.

7. — Vi diris, ke vi estas en mallumo kaj ke vi aŭdas nenion. — R. Estas konsentite al mi aŭdi kelkajn el viaj vortoj, sed kion mi vidas, tio estas nur funebra krepo, sur kiu iam kaj iam pentriĝas ia ploranta vizaĝo.

8. — Sed, ĉar li ĉi tie estas kaj vi lin ne vidas, ĉu vi ja ne sentas la ĉeeston de via amanto? — R. Ha, ne parolu pri li. Mi devas lin nun forgesi, ke de la nigra krepo forviŝiĝu la pentriĝinta bildo.

9. — Kies bildo? — R. De ia viro suferanta, kies moralan ekzistadon sur la Tero mi longe nuligis.

El la legado de tiu rakonto oni tuj komprenas, ke ekzistas malgravigaj cirkonstancoj ĉe tiu sinmortigo, rigardata kiel heroeca ago por plenumo de devo. Sed oni plie rekonas, ke kontraŭe de tio, kion oni opiniis, longa kaj terura eble estis la puno al la kulpintoj, tial, ke ili memvole serĉis la morton por eviti lukton. La intenco ne malplenumi devojn efektive estis nobla, kaj poste estos alkalkulita al ili, sed la efektiva merito konsistus en la rezisto, kaj ili kondutis, kiel dizertinto, kiu forlasis batalon en momento de danĝero.

Kiel vidate, la puno konsistas en tio, ke ili vane serĉu unu alian dum multe da tempo, *ĉu en la spirita mondo, ĉu en aliaj enkarniĝoj sur la Tero*; puno nun pligravigita de la perspektivo pri eterna daŭro. Tiu perspektivo kune kun la puno faras, ke estu malpermesate al ili aŭdi esperdonajn vortojn, kiujn oni eble dirus al ili. Al tiuj, kiuj opinios ĉi tiun punon longa kaj terura, des pli ke ĝi nur ĉesos post pluraj enkarniĝoj, ni diros, ke tia daŭro ne estas absoluta, sed dependanta de la maniero, kiel ili eltenos la estontajn provojn, krom tio, ili povas esti helpataj per la preĝo. Kaj ili estos tiel, kiel ĉiuj, arbitraciantoj de sia propra destino. Ĉu tio, eĉ tiel, ne estas preferinda ol la eterna kondamno, sen espero, al kiu ili estus nenuligeble submetitaj, laŭ la

doktrino de la Eklezio, kiu konsideras ilin por ĉiam destinitaj al infero, en tia grado, ke ĝi rifuzas al ili la lastajn preĝojn, certe opiniante ĉi tiujn senutilaj?

## Louis kaj la stebistino de botetoj

Dum sep aŭ ok monatoj Louis G., ŝuisto, amindumis junulinon Victorine R., kun kiu li baldaŭ edziĝos, kaj eĉ la edziĝanoncoj jam estis publikigitaj.

Tiel interkonsentite, ili konsideris sin preskaŭ definitive ligitaj kaj por ekonomio la ŝuisto ĉiutage venis tagmanĝi kaj vespermanĝi ĉe sia fianĉino.

Iun tagon, ĉe vespermanĝo, okazis disputo pri ia bagatelaĵo, kaj pro tio, ke ambaŭ obstinis en siaj opinioj, la disputo atingis tian gradon, ke Louis forlasis la manĝotablon, asertante, ke li ne plu revenos.

Malgraŭ tio, li revenis la sekvintan tagon por peti pardonon. Kiel sciate, la nokto estas bona konsilanto, sed la junulino, eble antaŭjuĝante, laŭ la antaŭtaga sceno, tion, kio povus okazi, kiam ne plu estus eblaĵo por forigi malbonon, rifuzis repaciĝon. Nek protestoj, nek larmoj, nek malesperoj povis ŝin demovi. Multe da tagoj ankoraŭ forpasis, kaj Louis esperis, ke sia amatino estu pli komprenema, kaj fine li decidis fari lastan provon: — Alveninte al la domo de la junulino, li frapis, tiel ke li estu rekonata, sed la pordo restis fermita, oni rifuzis malfermi ĝin al li. Aliaj petegoj de la forpelito, aliaj protestoj ne eĥis en la koro de lia amindumantino. “Adiaŭ do, kruelulino! — ekkriis la kompatinda junulo — adiaŭ por ĉiam. Penu trovi edzon, kiu estimu vin tiel, kiel mi.” La junulino samtempe aŭdis dampitan veon kaj tuj poste bruon de kvazaŭa korpo glitanta ĉe la pordo. Pro la sekvinta silento la junulino pensis, ke Louis sidiĝis sur la sojlo de la pordo, kaj ŝi certigis al si mem, ke ŝi ne eliros dum li tie restos.

Post kvaronhoro iu luanto preterpasanta sur la trotuaro kaj kunportanta lampon ellasis krion pro teruro kaj petis helpon.

La najbaroj rapide alvenas, kaj Victorine, malferminte la pordon ekkriis de teruro, rekonante sian fianĉon pala, senanima, sur la platŝtona pavimo. Ĉiuj rapidas lin helpi, sed ili tuj rimarkas, ke ĉio estas senutila, ĉar li ne vivis plu. La kompatinda junulo penetrigis tranĉilon en la regionon de la koro, kaj la lameno restis enmetita en la vundo.

(Spiritisma Societo de Parizo, Aŭgusto 1858)

1. — *Al la Spirito de Sankta Ludoviko.* — La junulino, kiu nevole kaŭzis la sinmortigon, estas respondeca? — R. Jes, ĉar ŝi lin ne amis.

2. — Nu, por eviti la malfeliĉon, spite la abomenon, kiun li kaŭzis al ŝi, ĉu ŝi devus edziniĝi kun li? — R. Ŝi atendis okazon rompi sian fianĉinecon, kaj tiel ŝi rompis ĝin en la komenco de sia ligiteco, kion ŝi ja pli malfrue farus.

3. — En ĉi tiu okazo ŝia respondeco venas de tio, ke ŝi nutris sentojn, en kiuj ŝi ne partoprenis, kaj kiuj rezultigis la memmortigon de la junulo? — R. Jes, ĝuste.

4. — Sed tiu respondeco do devas esti proporcia al la eraro, kaj ne tiel grava, kvazaŭ ŝi konscie kaj memvole estus kaŭzinta la memmortigon... — R. Estas evidente.

5. — Ĉu la memmortigo de Louis indas senkulpigon pro la frenezeco al li kaŭzita de la obstino de Victorine? — R. Jes, ĉar la sinmortigo deveninta de amo estas malpli krima en la okuloj de Dio, ol la memmortigo de tiu peninta liberiĝi el la vivo pro motivoj de malkuraĝo.

Al la Spirirto de Louis G., poste elvokita, oni faris la jenajn demandojn:

1. — Kiel vi juĝas la agon, kiun vi praktikis? — R. Victorine estis ia sendanka, kaj mi malbone agis, mortigante min pro ŝi, ĉar ŝi ĝin ne meritis.

2. — Nu, ĉu ŝi vin ne amis? — Ne. Komence ŝi sin iluziis, sed nia malpaciĝo malfermis ŝiajn okulojn, kaj ŝi eĉ opiniis sin feliĉa, trovante pretekston por sin malimpliki je mi.

3. — Kaj via amo al ŝi, ĉu ĝi estis sincera? — R. Nur pasio, kredu; ĉar se mia amo estus pura, mi estus klopodinta ne kaŭzi al ŝi ian ĉagrenon.

4. — Kaj en la okazo, ke ŝi divenus vian intencon, ĉu ŝi persistus en sia rifuzo? — R. Mi ne scias, mi eĉ pensas, ke ŝi ne rifuzus, ĉar ŝi ne estas malica. Sed, eĉ tiel, ŝi ne estus feliĉa, kaj pli bone por ŝi, ke la aferoj tiamaniere okazis.

5. — Frapante ĉe la pordo, ĉu vi intencis vin mortigi, en la okazo de ŝia rifuzo? — R. Ne, mi ne pensis pri tio, ĉar ankaŭ mi ne atendis ŝian obstinon. Nur pro ĉi tiu obstino mi perdis la prudenton.

6. — Vi laŭŝajne bedaŭras vian memmortigon nur pro la fakto, ke Victorine ne ĝin meritis... Ĉu reale ĝi estas via sola ĉagreniĝo? — R. En ĉi tiu momento, jes; mi ankoraŭ estas menskonfuzita, ŝajnas al mi, ke mi restas plu ĉe la pordo, kvankam mi ankaŭ spertas alian sensacion, kiun mi ne povas difini.

7. — Ĉu vi poste povos kompreni min? — R. Jes, kiam mi estos libera de ĉi tiu memskonfuzo. Mi agis malbone, mi devus rezignacii... Mi estis malforta kaj suferas la sekvojn de mia malforteco. Pasio blindigas homon en tia grado, ke li praktikas frenezaĵojn, kaj bedaŭrinde li tion komprenas nur tre malfrue.

8. — Vi diras, ke vi spertas ĉagreniĝon... kia ĝi estas? — Mi agis malbone, mallongigante mian vivon. Mi devis ne fari tion. Estus preferinde ĉion elteni, ol morti antaŭ la tempo. Mi estas do malfeliĉa; mi suferas, kaj estas ŝi, kiu ĉiam suferigas min, ŝi sendanka. Ŝajnas

al mi, ke mi ĉiam estas ĉe ŝia pordo, sed... ni ne parolu nek pensu plu pri tio, kio min tre ĝenas. Adiaŭ.

En tio ankoraŭ estas vidata alia konfirmo pri la justeco, kiu prezidas en la disdonado de punoj, laŭ la grado da respondeco de la kulpuloj. En ĉi tiu okazo, sur la junulino pezas pli granda respondeco, pro tio, ke ŝi nutris en Louis, pro frivoleco, ian amon, kiun ŝi ne sentis. Rilate la junulon, ĉi tiu estas sufiĉe punata per la daŭranta sufero, sed lia puno estas malpeza, ĉar li nur cedis al senpripensa movo, en momento de ekzaltiĝo, kaj ne al malvarma antaŭdecido de la memortigintoj, kiuj penas eviti la provojn de la vivo.

## Iu ateisto

M.J.-B.D estis klera homo, sed ekstreme saturita per materialismaj ideoj, ne kredante je Dio nek al la ekzisto de la animo. Laŭ peto de parenco li estis elvokita ĉe la Spiritisma Societo de Parizo, du jarojn post sia elkarniĝo.

1. *Elvoko*. — R. Mi suferas. Mi estas maliculo.

2. — Ni estas devigitaj elvoki vin, en nomo de viaj geparencoj, kiuj memkompreneble deziras scii pri via sorto. Ĉu vi povas diri al ni, ĉu nia elvoko estas al vi peniga aŭ agrabla? — R. Peniga.

3. — Ĉu via morto estis memvola? — R. Jes.

La Spirito skribas kun ekstrema malfacileco. Lia skribaĵo estas grasa, neregula konvulsia kaj preskaŭ nekomprenebla. Fininte la skribon, li ekkoleris, rompis la krajonon kaj disŝiris la paperon.

4. — Trankviliĝu, ni ĉiuj preĝos al Dio por vi. — R. Mi estas devigita kredi je tiu Dio.

5. — Kia motivo povis peli al la sinmortigo? — R. La tedo de ia vivo *sen espero*.

Oni konceptas sinmortigon, kiam la vivo estas *sen espero*; oni tiam penas eviti ĝin je ia ajn prezo. Kontraŭe, laŭ Spiritismo nia espero plifirmiĝas, ĉar la estonteco al ni disvolviĝas. Memmortigo ĉesas esti celo, ĉar estas rekonate, ke oni nur senigas sin je malbono por malbono centoble pli dolora. Jen kial Spiritismo evitigas al multaj homoj la memvolan morton. Forte kulpaj estas tiuj, kiuj klopodas kredigi, per *sciencaj sofismoj kaj sub preteksto de ia malvera rezono*, tiun senesperigan ideon, fonton de tiom da krimoj kaj malbonoj, laŭ kiu ĉio forfiniĝas kun la vivo. Ili estos respondaj ne nur pri siaj propraj eraroj, sed ankaŭ pri ĉiuj malbonoj, kiujn ili kaŭzas.

6. — Vi volis detirigi vin de la sortovicoj de la vivo...Ĉu tio prosperis al vi Ĉu vi nun estas feliĉa? — R. Kial la nenio ne ekzistas?

7. — Bonvolu priskribi al ni kiel eble plej bone vian nunan situacion. — R. *Mi suferas de la devigo kredi ĉion, kion mi neis*. Terure turmentata, mia Spirito estas sur kvazaŭa braĝejo.

8. — De kie venis viaj iamaj materialismaj ideoj? — R. En antaŭa enkarniĝo mi estis maliculo kaj tial mi kondamnis min en la sekvinta al la turmentoj de necerteco, kaj estis tial, ke mi min mortigis.

El tio venas tuta serio da ideoj. Multfoje ni demandas nin mem, kiel povas ekzisti materialistoj, se, vivinte en la spirita mondo, ili devus havi intuicion pri ĝi; nu, ĝuste tiu intuicio ne estas konsentita al kelkaj Spiritoj, kiuj, konservante sian fieron, ne pentis pri siaj eraroj. Por tiuj la provo konsistas en la akirado, dum sia korpa vivo kaj *koste de sia propra rezonado*, de la pruvo pri la ekzistado de Dio kaj pri la estonta vivo, kiun ili havas sub siaj okuloj. Sed multfoje la pretendo konsenti nenion super si mem ilin ekposedas kaj absorbas. Tiel, ili suferas la punon ĝis kiam, regante sian fieron, la evidenteco ilin venkos.

9. — Kiam vi dronis, kiaj estis viaj ideoj pri la sekvoj? Kiaj estis viaj pripensoj en tiu momento? —

R. Nenia, ĉar ĉio estis al mi la nenio. Poste, plenuminte la kondamnon, mi vidis, ke mi devos ankoraŭ plie suferi.

10. — Ĉu vi nun estas konvinkiĝinta pri la ekzisto de Dio, de la animo kaj de la estonta vivo? — R. Ha! Ĉio tio min tre turmentas!

11. — Ĉu vi ree vidis vian fraton? — R. Ho, ne!

12. — Kial do ne? — R. Por kio konfuzi niajn malesperojn? Oni ekziliĝas en malfeliĉon kaj en la feliĉo oni kuniĝas, jen la realo.

13. — Ĉu ĝenos vin la ĉeesto de via frato, kiun ni povas altiri apud vin? — R. Ne faru tion, mi ĝin ne meritas.

14. — Kial vi oponas al tio? — R. Ĉar ankaŭ li ne estas feliĉa.

15. — Vi timas lian ĉeeston, kaj tamen ĝi nur povas esti bonfara al vi. — R. Ne, poste...

16. — Ĉu vi havas ian mesaĝon por viaj geparencoj? — R. Ili preĝu por mi.

17. — Ŝajne en la rondo de viaj amikoj estas iuj dividantaj viajn opiniojn. Ĉu vi deziras, ke ni diru ion al ili pri tio? — R. Ho, ili malfeliĉuloj! Ili kredu al alia ekzistado, jen mia forta deziro. Se ili povus taksi mian doloran situacion, ili multe pripensus.

(Elvoko de iu frato de la antaŭanto, frato, kiu konfesis la samajn teoriojn, sed ne sin mortigis. Kvankam ankaŭ malfeliĉa, li tamen sin montras pli trankvila; lia skribaĵo estas klara kaj legebla.)

18. *Elvoko*. — R. La sceno pri niaj suferoj estu utila leciono, konvinkanta vin pri la realo de alia ekzistado, en kiu oni elaĉetas siajn kulpojn, kiuj fontas el nekredemo.

19. — Ĉu vi kaj via frato, kiun ni ĵus elvokis, vin reciproke vidas? — R. Ne; li min evitas.

Oni povus demandi, kiel la Spiritoj povas eviti unu alian en la Spirita mondo, ĉar tie ne ekzistas malhelpoj nek rifuĝejoj nepenetreblaj por la vido. Sed ĉio estas relativa en tiu mondo kaj konforma al la fluideca naturo de la estaĵoj ĝin priloĝantaj. Nur la superaj Spiritoj havas senfinajn perceptojn, kiuj estas limigitaj ĉe la malsuperaj. Por ĉi tiuj la fluidecaj baroj egalvaloras al materiaj baroj. La Spiritoj kaŝiĝas de antaŭ la okuloj de siaj similuloj pro volo, kiu agas sur la perispiritan envolvaĵon kaj mediajn fluidaĵojn. Sed la Providenco, kvazaŭa patrino, prizorgas ĉiujn siajn infanojn, kaj pere de ili individue donas aŭ ne tiun kapablon, laŭ iliaj moralaj disponoj, kio estas puno aŭ rekompenco, laŭ la cirkonstancoj.

20. — Vi estas pli trankvila ol via frato. Ĉu vi povas pli precize priskribi viajn suferojn? — R. Ĉu vi ne suferas tie, sur la Tero, pri via fiero, pri via memamo, kiam vi estas devigitaj rekoni viajn erarojn?

"Ĉu via Spirito ne ribelas kontraŭ la ideon humiliĝi antaŭ tiu, kiu montras vian eraron? Nu bone! Prezentu al vi kiom devas suferi la Spirito, kiu dum sia tuta vivo konvinkiĝis, ke krom li ekzistas nenio, kaj ke super ĉiuj ĉiam staras lia pravo. Subite troviĝante antaŭ la impona vero, tiu Spirito sentas sin neniigita, humiligita. Al tio ankoraŭ aldoniĝas la konsciencoriproĉo, ke li tiel longe forgesis la ekzistadon de tiel bona, tiel indulgema Dio. La situacio estas neeltenebla; ne ekzistas flegmo nek ripozo; oni ne havas iom da trankvileco, krom en la momento, kiam la dia favoro, t.e. la amo de Dio nin tuŝas, ĉar fiero ekposedas nin en tia maniero, ke ĝi tute senkomprenigas nin en tia grado, ke estas necese multe da tempo, ke ni tute demetu tiun fatalan veston. Nur preĝo de niaj fratoj povas helpi nin en tiuj doloraj momentoj."

21. — Ĉu vi deziras paroli pri la enkarniĝintaj fratoj aŭ pri la Spiritoj? — R. Pri ambaŭ.

22. — Dum mi parolas kun via frato, unu el la ĉi tie ĉeestantaj personoj preĝis por li: — ĉu tiu preĝo estis al li profita? — R. Ĝi ne perdiĝos. Se li nun rifuzas tiun favoron, li tion ne faros, kiam li estos en kondiĉoj helpi sin por tiu dia *panaceo*.

Ĉi tie ni vidas alian specon de puno, kiu tamen ne estas la sama por ĉiuj skeptikuloj. Sendependa de sufero estas, por tiu Spirito, la bezono rekoni veraĵojn, kiujn li repuŝis, kiam li estis reenkarniĝinta.

Liaj nunaj ideoj montras iom da progreso kompare kun tiuj de aliaj Spiritoj persistantaj en sia neado pri Dio. Konfeso pri persona eraro jam estas io, ĉar ĝi estas montro de humileco.

En la sekvanta enkarniĝo estas tre probable, ke lia nekredemo cedu lokon al la *denaska* sento pri fido.

Transdirante la rezultaton de tiuj du elvokoj al la persono, kiu ilin petis de ni, ni ricevis de li la sekvantan informon:

“Vi ne povas taksi, kara sinjoro, la grandan bonefikon el la elvoko de mia bopatro kaj de mia onklo. Ni ilin perfekte rekonas. Precipe la skribaĵo de la unua montras ian rimarkindan similecon kun tiu de li en vivo, des pli ke, dum la lastaj monatoj kiujn li pasigis kun ni, ĝi estis malfacila kaj nedeĉifrebla. Tie oni rimarkas la saman formon de strekoj, de la parafo kaj de certaj literoj. Rilate la vortaron kaj la stilon la simileco estas ankoraŭ pli konvinka; al ni la analogio estas kompleta, nun kun pli granda kono pri Dio, pri la animo kaj pri la eterneco, kiun li iam tiel formale neadis. Al ni do restas nenia dubo pri lia identeco. Dio estos glorata pro la pli granda firmeco de nia kredo al Spiritismo, kaj niaj enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj fratoj fariĝos pli bonkoraj. Ankaŭ la identeco de lia frato ne estas malpli evidenta; en lia ŝanĝiĝo de ateisto en kredanton ni rekonas liajn karakteron, stilon, noblecon de frazo. El ĉiuj vortoj, unu vekis nian atenton — *panaceo* — de li preferata, ĉiumomente ripetata.

Mi montris tiujn du komunikaĵojn al pluraj personoj, kiuj ne malpli miris pri ilia vereco, sed la nekredantoj kun la samaj opinioj de miaj geparencoj deziris ankoraŭ pli kategoriajn respondojn.

Ili ekzemple volis, ke M.D. aludu la lokon, en kiu li estis enterigita, kie li dronis, kiel li estis trovita ktp. Por konvinki ilin, ĉu vi povus fari plian elvokon kaj demandi kie kaj kiel li sin mortigis, kiel longe li estis subakvigita, en kiu loko oni trovis la kadavron, kie li estis enterigita, kiamaniere, civile aŭ religie, li estis entombigita? Bonvolu, kara sinjoro, insisti pri kategoria respondo al tiuj demandoj, ĉar ili estas necesaj por tiuj ankoraŭ dubantaj. Mi estas konvinkiĝinta, ke ili donos bonegajn rezultojn.

Mi rapidas ekspedi al vi ĉi tiun leteron, ke ĝi estu transdonita al vi la vendredon matene, tiel ke oni povu fari la elvokon en la seanco de la Societo, en tiu sama tago... ktp."

Ni reproduktis tiun leteron pro la fakto, ke ĝi konfirmas la identecon kaj ni aldonas al ĝi nian respondon por instruo al la personoj ne alkutimiĝintaj al la transtombaj komunikaĵoj.

"La demandoj, kiujn oni petis al ni prezenti al la Spirito de via bopatro, nekontesteble estas faritaj kun laŭdinda intenco, kia estas konvinki nekredantojn, ĉar en vi ekzistas plu nenia sento de dubo aŭ scivolemo. Sed pli profunda kono pri la spiritisma scienco igus vin juĝi superfluaj tiujn demandojn. Unue petante de mi, ke mi sukcesu ricevi kategorian respondon, vi montras ne koni la cirkonstancon, ke ni ne povas laŭplaĉe regi la Spiritojn. Sciu, ke ili respondas al ni, kiam kaj kiel ili volas, kaj ankaŭ kiel ili povas. Ilia agolibereco estas ankoraŭ pli granda ol kiam ili estis enkarniĝintaj, kaj ili posedas rimedojn pli efikajn por eviti la moralan premon, al kiu oni eble volas ilin submeti. La plej bonaj pruvoj de identeco estas tiuj, kiujn ili spontanee donas per si mem, aŭ tiuj venantaj el la cirkonstancoj mem. Okazigi ĉi tiujn estas preskaŭ ĉiam senutile. Laŭ tio, kion vi certigis, via

parenco pruvis sian identecon en nekontestebla maniero; sekve estas pli ol probable, ke li rifuzos respondi la demandojn, kiujn li prave povos opinii superfluaj, kontentigante la scivolemon de personoj al li indeferentaj. La respondo povus ja esti tiu, kiun aliaj donis en similaj okazoj, t.e. — "por kio demandi pri aferoj, kiujn vi jam konas?"

Al tio mi aldonas, ke la perturboj kaj suferoj, lin regantaj, eble pligraviĝus pro tiaspecaj esploroj, tute simile voli devigi malsanulon, kiu apenaŭ kapablas pensi kaj paroli, rakonti detalojn de sia vivo, kio estus manko de karitato inspirata de lia stato mem.

Koncerne la celon, kiun vi aludis, estu certa, ke ĉio donus nean rezultaton. La liveritaj pruvoj de identeco estas multe pli valoraj, ĉar ili estis spontaneaj, kaj ne antaŭe pripensitaj. Nu, se tiuj ne kontentigis la nekredulojn, des malpli tion farus la demandoj jam antaŭe formulitaj, kies kunkulpecon oni povus suspekti.

Ekzistas personoj, kiujn nenio povas konvinki. Tiuj povus vidi vian parencon per siaj propraj okuloj, kaj ili restus plu supozantaj sin atakitaj de ia halucinacio.

Ni ankoraŭ diru malmultajn vortojn pri la peto, kiun vi al mi faris por okazigi tiun elvokon en la sama tago, kiam mi ricevis vian leteron. Elvokojn oni ne faras subite; la Spiritoj ne ĉiam atentas nian vokon; estas necese, ke ili volu, kaj ne nur tio, sed ke ili ankaŭ povas tion fari. Estas necese ankoraŭ, ke ili renkontu mediumon konvenan al ili, kun necesaj specialaj kapabloj kaj ke tiu mediumo estu disponebla en iu difinita tempo. Fine estas necese, ke la medio estu al ili simpatia ktp. Ne ĉiam, eĉ kun la kunekzisto de tiuj cirkonstancoj, oni povas respondi, kaj estas tre grave koni tiujn cirkonstancojn, se oni deziras agi serioze kaj sekure."

## Félicien

Li estis riĉa klera homo, inspira poeto, posedanta sanan, komplezeman kaj mildan karakteron, senmakulan honestecon.

Malfeliĉaj negocoj kompromitis lian riĉaĵon, kaj ne povante reakiri ĝin pro sia grandaĝo, li donis sin al senkuraĝeco, sufokante sin en Decembro 1864, en sia dormoĉambro.

Li ne estis materialisto nek ateisto, sed homo de spirito iom supraĵa, donante malmultan gravecon al la problemo de la vivo en la transtombo. Intime konante lin, ni elvokis lin kvar monatojn post lia sinmortigo, inspirite de la simpatio, kiun ni dediĉis al li.

*Elvoko*. — R. Mi priploras la Teron, sur kiu mi havis elreviĝojn, sed malpli grandajn ol tiuj, kiujn mi ĉi tie spertis. Revinte pri mirindaĵoj, mi staras malsupre de la realo de mia idealo. La mondo de la Spiritoj estas tre konfuza, kaj por fari ĝin eltenebla estus necese bona selektado. Estas al mi malfacile kredi. Kian resumon pri spiritaj kutimoj oni povus fari ĉi tie! Balzac mem, vivante en sia elemento, farus tian resumon nur en kruda maniero. Sed mi lin ne vidis... Kie estas tiuj eminentaj Spiritoj, kiuj tiel energie kontraŭbatalis la malvirtojn de la homaro? Eble ili ĉi tie loĝis, kiel mi, antaŭ ol leviĝi al regionoj pli altaj. Mi plezuras rigardi tiun strangan pandemonion, kaj tiel mi restas plu ĉi tie.

Malgraŭ tio, ke la Spirito klarigis, ke li troviĝas en societo tro konfuza kaj tial el malsuperaj Spiritoj, surprizis nin lia parolo, pro la speco de morto, pri kiu li faris nenian aludon. Krom tio, ĉio montris lian karakteron.

Tia cirkonstanco tenis nin en dubo pri la identeco.

— D. Bonvolu diri al ni, kiel vi mortis... — R. Kiel mi mortis? De la de mi elektita morto, kiu plej plaĉis al mi, kaj estas notinde, ke mi longe meditis pri tiu elekto, celante malembarasi min je la vivo. Malgraŭ tio, mi konfesas, ke mi ne gajnis multon: — mi liberiĝis el la materiaj zorgoj, por ilin renkonti ja pli gravaj penigaj en mia spirita kondiĉo, kies finon mi eĉ ne antaŭvidas.

— D. (al la gvidanto de la mediumo). Ĉu la komunikiĝanta Spirito estas efektive tiu de Félicien? Tia parolo,

preskaŭ trankvila, fariĝas suspekta, kiam temas pri memmortiginto...

— R. Jes. Sed pro ia sento pravigebla en sia situacio, li ne volis konigi al la mediumo sian specon de morto. Tial li maskis sian frazon, sed fine li ĝin konfesis pro la rekta demando, kiun vi al li faris, kaj ne sen angoroj. La memmortigo lin multe suferigas, kaj tial li kiel eble plej multe evitas ĉion, kio rememorigas al li lian nigran finon.

— D. (al la Spirito). Via elkarniĝo des pli konsternis nin, ĉar ni antaŭvidis la malgajajn sekvojn, konsidetrante nian estimon kaj intimecon de niaj interrilatoj. Persone mi ne forgesis, kiom multe komplezema kaj bona vi estis al mi. Mi estus feliĉa, se mi povus atesti mian dankon al vi, farante al vi ion utilan.

— R. Sed mi ne povus alimaniere eviti la embarasojn de mia materia pozicio. Nun mi bezonas preĝojn; precipe preĝu, ke mi vidu min libera de tiuj teruraj estuloj, kiuj estas ĉi tie apud mi, obsedantaj min per krioj, ridetoj kaj inferaj mokoj. Ili nomas min malkuraĝulo, kaj prave, ĉar estas malkuraĝo rezigni la vivon. *Ĝi estas la kvara fojo, kiam mi falas je tiu provo*, malgraŭ la formala promeso ne fali... Fatalo!... Ha! Preĝu... Kia turmento la mia! Kiel malfeliĉa mi estas! Preĝante, vi utilos al mi pli ol mi povis utili al vi, kiam mi estis sur la Tero; sed la provo, antaŭ kiu mi multfoje fiaskis, jen ĝi bildigita, neforigebla, antaŭ mi! *Estas necese ree sperti ĝin en difinita tempo*... Ĉu mi havos fortojn? Ha! multfoje rekomenci la vivon; longe lukti kaj fali ĉe la okazaĵoj estas ja malespere, eĉ ĉi tie! Jen kial mankas al mi forto. Oni diras, ke ni povas akiri ĝin per preĝo... Preĝu por mi, ĉar mi ankaŭ volas preĝi.

Ĉi tiu neordinara ekzemplo de memmortigo, kvankam realigita en vulgaraj cirkonstancoj, prezentas specialan aspekton. Ĝi montras al ni ian Spiriton, kiu multfoje falis ĉe sia

provo, refariĝanta en ĉiu ekzistado *kaj kiu renoviĝos, ĝis kiam li havos forton por rezisto*.

Tiel konfirmiĝas la fakto, ke ne estas profito ĉe la sufero ĉiufoje, kiam ni ne atingas la finon de nia enkarniĝo, kaj estas necese ĝin rekomenci, ĝis ni fine venkos sur la batalkampo.

*Al la Spirito de S-ro Félicien*. — Aŭdu, mi petas, aŭdu kaj pripensu miajn vortojn. Kion vi nomas fatalo, tio estas nur via malkuraĝeco, ĉar, se fatalo ekzistus, la homo ne estus respondeca pri siaj agoj. La homo ĉiam estas libera, kaj en tiu libereco kuŝas lia plej granda kaj plej bela privilegio. Dio ne volis fari el li obeeman kaj blindan aŭtomaton, kaj se tiu libereco faras lin erarema, ĝi ankaŭ faras lin perfektigebla, ĉar nur per la perfekteco li povos atingi la superegan feliĉon. Fiero nur povas igi la homon atribui al la destino siajn surterajn malfeliĉojn, kiam estas vero, ke tiuj malfeliĉoj devenas de lia senzorgeco mem. Evidentan ekzemplon pri tio vi havis en via enkarniĝo, kiam vi posedis ĉion, kio estis necesa por la homa feliĉo: inteligenton, talenton, riĉon, meritan konsideron; neniom da ruinigaj malvirtoj, sed kontraŭe rimarkindajn kvalitojn... Kiel do via situacio estas tiel kompromitita? Nur pro via senprudenteco. Vi devus konsenti, ke agante pli prudente, kontentigante vin per la multo al vi jam donita, anstataŭ peni senbezone pliigi tiun multon, la ruino ne okazus. En tio estis nenia fatalo, ĉar vi povus esti evitinta tian okazaĵon. Via provo konsistis en sinsekvo da cirkonstancoj, kiuj devus doni al vi *ne la bezonon, sed la tenton de memmortigo*; malfeliĉe, malgraŭ via talento kaj instruiteco, vi ne sciis regi tiajn cirkonstancojn kaj nun vi suferas la sekvojn de via malkuraĝeco.

Tiu provo, kiel vi prave antaŭsentis, ankoraŭ devas refariĝi; en via proksima enkarniĝo vi devos alfronti okazaĵojn, kiuj sugestos al vi ideon pri memmortigo, kaj tiel ĉiam okazos, ĝis kiam vi estos tute triumfinta.

Tute ne kulpigante la sorton, kiu estas via verko mem, admiru la bonecon de Dio, kiu anstataŭ nepardoneble

kondamni pro unua eraro, ĉiam donas rimedojn ĝin korekti.

Tiel vi ne eterne suferos, sed nur dum vi persistas en eraro. En la spirita stato, dependas de vi preni la sufiĉe energian decidon manifesti antaŭ Dio sinceran penton, insiste petante helpon de la bonaj Spiritoj. Vi tiam revenos sur la Teron, kirasite per rezisto al ĉiaj tentoj. Atinginte tiun venkon, vi iros pli rapide la vojon de feliĉo ĉar, rilate aliajn aspektojn, via progreso jam estas granda. Kiel vi vidas, ankoraŭ estas paŝo farota, por kiu ni helpos vin per niaj preĝoj. Ĉi tiuj estos ja senprofitaj, se vi ne helpos nin per viaj klopodoj.

— R. Ho, dankon! Ho! dankon por tiel bonaj admonoj. Mi ilin tiom multe bezonas, ĉar mi estas pli malfeliĉa, *ol kiom vi pensas*. Mi ilin profitos, mi ĝin asertas, por la preparo de mia proksima enkarniĝo, dum kiu mi faros ĉion eblan por ne fali. Por mi estas malfacile elteni la malnoblan medion de mia ekzilo.

*Félicien*

## Antoine Bell

Li estis kasisto ĉe banka institucio en Kanado kaj mortigis sin en la 28-a de Februaro 1865. Unu el niaj korespondantoj, kuracisto kaj apotekisto loĝanta en la sama urbo, donis al ni la sekvantajn informojn pri li:

"Dum ĉirkaŭ 20 jaroj mi konatiĝis kun li, pacama viro kaj estro de nombra familio. De longe ĝis antaŭ nelonga tempo li imagis, ke li aĉetis tokson en mia apoteko, uzinte ĝin por iun veneni. Li multfoje venis petegi de mi, ke mi diru al li la daton de tiu aĉeto, posedita de teruraj halucinacioj. Li maldormis, plendis, batis la bruston. La familio vivis en konstanta afliktiĝo de la 4-a vespere ĝis la 9-a matene, horo, je kiu li direktiĝis al la banko, kie cetere li tre regule faris registrojn sur siajn librojn, kaj li neniam faris eĉ unu eraron. Li laŭkutime diris, ke li sentas en si estulon, kiu helpis lin korekte kaj bonorde

plenumi sian registradon. Kiam li ŝajne konvinkiĝis pri la ekstravaganco de siaj ideoj, li ekkriis: — "Ne; ne; vi volas trompi min... *mi memoras*... estas vero..."

Laŭ peto de tiu amiko, li estis elvokita en Parizo, la 17an de Aprilo 1865.

1. *Elvoko*. — R. Kion do vi deziras de mi? Ĉu mi devas submeti min al demandaro? Estas vane, mi ĉion konfesos.

2. — Ni tute ne intencas aflikti vin per scivolaj demandoj; ni deziras nur scii, kia estas via situacio en tiu mondo, kaj ankaŭ ĉu ni povas esti utilaj al vi... — R. Ha! Se tio estos ebla, mi estos ekstreme danka al vi. Mi abomenas mian krimon kaj mi estas tre malfeliĉa!

3. — Ni esperas, ke niaj preĝoj malintensigos viajn dolorojn. Ŝajnas al ni, ke vi troviĝas en bonaj kondiĉoj, ĉar pento jam sieĝas vian koron — kio estas komenco de renobliĝo. Dio senfine favorkora ĉiam kompatas la pentantan pekinton. Preĝu kun ni. (Oni faras la preĝon por memmortigintoj kiu troviĝas en *La Evangelio laŭ Spiritismo*.)

Nun bonvolu diri al ni pri kiaj krimoj vi rekonas vin kulpa. Tia konfeso, humile farata, estos al vi favora.

— R. Unue permesu, ke mi danku vin por tiu espero, kiu vi estigis en mia koro. Ho! Jam tre longe mi vivadis en urbo ĉe Mediteraneo. Mi tiam amis belan fraŭlinon, kiu reciprokis mian amon; sed, ĉar mi estis malriĉa, ŝia familio min forpuŝis. Mia amatino komunikis al mi, ke ŝi edziniĝos kun la filo de ia komercisto, kies negocoj etendiĝis trans du marojn, kaj tial mi estis forlasita. Freneza de doloro mi decidis forfini mian vivon, antaŭe mortiginte mian malamegantan rivalon, kontentigante mian venĝodeziron. Mi abomenis la perfortajn rimedojn, la praktiko de krimo terurigis min, sed mia ĵaluzo ĉion superstaris. En la antaŭtago de la geedziĝo mia rivalo mortis venenita, per rimedo ŝajninta al mi pli facila. Jen

kiel estas klarigataj la rememoroj pri la pasinteco... Jes, mi jam reenkarniĝis, kaj estas necese, ke mi ankoraŭ reenkarniĝu... Ho, mia Dio, kompatu miajn larmojn kaj mia malforteco!

4. — Ni bedaŭras tiun malfeliĉon, kiu prokrastis vian progreson, kaj ni vin sincere kompatas; sed, se vi pentos, Dio vin kompatos. Diru al ni, ĉu vi efektive plenumis vian planon memmortigi...

— R. Ne; kaj mi konfesas kun honto, ke la espero ree ekburĝonis en mia koro kun la deziro profiti el la jam farita krimo. Sed la konsciencoriproĉo perfidis min kaj mi fine elpagis, per la lasta turmentego, tiun mian frenezaĵon: — mi min sufokis.

5. — Ĉu vi en via lasta enkarniĝo konsciis la malbono, kiun vi praktikis en la antaŭlasta?

— R. Nur en la lastaj jaroj, kaj jen kiel: — mi laŭnature estis bona, kaj submetite, kiel ĉiuj murdintoj, al la turmento de konstanta vido je la viktimo, kiu min persekutis, kvazaŭ viva rimorso, mi post multe da jaroj apartiĝis de ĝi per miaj pento kaj preĝoj. Mi rekomencis alian ekzistadon — la lastan —, kiun mi travivis flegma kaj timema. Mi havis kvazaŭ malklaran intucicion pri mia denaska malforteco, kaj ankaŭ pri mia antaŭa kulpo, kies memoron mi konservis en latenta stato.

Sed iu obsedanta kaj venĝema Spirito, kiu estis neniu alia ol la patro de mia viktimo, facile ekposedis min kaj revivigis en mia koro, kvazaŭ en magia spegulo, la rememorojn pri mia pasinteco.

Alterne sub la influo de li kaj de mia gvidanto, kiu min protektis, mi estis la veneninto kaj samtempe la familiopatro, perlaborante la nutraĵon por miaj infanoj. Fascinite de tiu demoneca obsedanto, mi donis min al memmortigo. Efektive mi estas tre kulpa, sed malpli ol se mi estus decidinta per mi mem. La memmortigintoj el mia kategorio, nekapablaj pro sia malforteco kontraŭ-

stari la obsedantojn, estas malpli kulpaj kaj malpli punataj ol tiuj forlasantaj la vivon pro sia ekskluziva volo.

Preĝu kun mi, ke la Spirito, kiu tiel fatale min obsedis, rezignu la venĝon, kaj preĝu por mi, ke mi akiru energion, forton necesan, ke mi ne cedu al la memvola memmortigo, *provo, al kiu mi estos submetita, oni diras al mi, en la estonta enkarniĝo*.

— (*Al la gvidanto de la mediumo*.) Ĉu iu obsedanta Spirito efektive povas peli obsediton al memmortigo?

— R. Jes, ĉar obsedo, kiu estas per si mem speco de provo, povas preni ĉiajn formojn. Sed tio ne signifas seniĝon je kulpeco. La homo ĉiam disponas sian liberan volon kaj tiel de li mem dependas cedi aŭ malcedi al la sugestoj, al kiuj oni lin submetas.

Tiel estas, ke, falante, li ĉiam ĝin faras pro konsento de sia volo. Cetere la Spirito pravas, dirante, ke la ago instigita de alia estas malpli kulpa kaj riproĉinda ol tiu memvole praktikita. Sed eĉ tiel li ne senigas sin je kulpo, ĉar, deflankiĝante de la rekta vojo, li montras, ke la bono ankoraŭ ne estas ligita al lia koro.

6. — Malgraŭ tio, ke la preĝo kaj pento liberigis tiun Spiriton de la turmenta vizio pri lia viktimo, kiel li povis estis atingita de la venĝo de obsedanto en sia lasta enkarniĝo?

— R. Pento, vi bone scias, estas nur *la komenca rimedo nepre necesa al renobliĝo*, sed ĝi ne estas sufiĉa por liberigi kulpulon en ĉiuj liaj afliktiĝoj. Dio ne kontentiĝas per promesoj, kaj necesa estas pruvo per agoj, de reveno sur la bonan vojon. Jen kial la Spirito estas submetata al pliaj provoj, kiuj lin fortikigas, donante al li ankoraŭ pli grandan meriton, kiam li triumfas super ili.

La Spirito suferas persekuton de malbonuloj, de obsedantoj, *dum ĉi tiuj ne renkontas lin tro forta por ilin rezisti*. Renkontante reziston, ili lin forlasas, certaj pri la senutileco de siaj klopodoj.

Ĉi tiuj du lastaj ekzemploj montras al ni la renoviĝon de la sama provo en sinsekvaj enkarniĝoj, kaj tiel longe, dum ankoraŭ daŭras ilia senefikeco. Antoine Bell fine evidentigas al ni tre instruan fakton de homo persekutata de rememoro pri krimo farita en antaŭa ekzistado, kvazaŭ ia konsciencoriproĉo kaj ia avizo.

El tio ni ankoraŭ vidas, ke ĉiuj ekzistadoj estas solidaraj inter si; ke la diaj justeco kaj boneco montriĝas al la homo, en la donita kapablo grade progresi, neniam senigante lin je la ebleco pagi siajn erarojn; ke la kulpulo estas punata laŭ sia krimo, kaj tiu puno, anstataŭ venĝo de Dio, estas rimedo uzata por igi lin progresi.

## ĈAPITRO VI

## PENTINTAJ KRIMULOJ

### Verger

(Murdinto de la ĉefepiskopo de Parizo)

La 3an de Februaro 1857 Monsinjoro Sibour, ĉefepiskopo de Parizo, elirante el la Preĝejo de Saint-Étienne-du-Mont, estis morte vundita de juna pastro nomata Verger. La kriminto estis kondamnita al morto kaj ekzekutita la 30an de Januaro. Ĝis la lasta momento li montris nenian senton de ĉagreniĝo, de pento aŭ de kortuŝiteco.

Elvokite en la sama tago de la ekzekuto, li donis la jenajn respondojn:

1. *Elvoko*. — R. Mi ankoraŭ estas katenita al la korpo.

2. — Ĉu via animo do ankoraŭ ne estas tute liberiĝinta? — R. Ne... mi timas... mi ne scias... Atendu, ĝis mi rekonsciiĝos. Mi ne estas mortinta, ĉu ne?

3. — Ĉu vi pentas pri via faro? — R. Mi agis malbone, mortigante, sed al tio mi estis kondukita de mia karaktero, kiu ne povis toleri humiligojn... Elvoku min alian fojon.

4. — Kial do vi jam foriras? — R. Se mi vidus lin, mi tre ektimus pro la suspekto, ke li ree faros al mi la samon.

5. — Sed vi devas timi nenion, ĉar via animo estas disigita je la korpo. Forlasu ĉian malkvietĝon, kiu ne estas konvena nun. — R. Kion do vi volas? Ĉu vi estas mastro de viaj impresoj? Rilate al mi, mi ne scias, kie mi estas... mi estas freneza.

6. — Penu trankviligi vin. — R. Mi ne povas, ĉar mi estas freneza... Atendu, ĝis mi reakiros mian tutan klarvidecon.

7. — Se vi preĝus, eble vi povus koncerni viajn pensojn... — R. Mi ektimas... mi ne kuraĝas preĝi.

8. — Preĝu, ĉar la favorkoreco de Dio estas granda! Ni preĝos kun vi. — R. Jes; mi ĉiam kredis al la senfina favorkoreco de Dio.

9. — Ĉu vi nun pli bone komprenas vian situacion? — R. Ĝi estas tiel eksterordinara, ke mi ankoraŭ ne povas ĝin kompreni.

10. — Ĉu vi vidas vian viktimon? — R. Ŝajnas al mi, ke mi aŭdas voĉon similan al lia, kaj ke li diras al mi: "Mi ne plu volas vin..." Eble ĝi estas efekto de mia imagemo! Mi estas freneza, mi certiĝas al vi, ĉar mi vidas mian korpon unuflanke, kaj la kapon aliflanke... kaj tamen ŝajnas al mi, ke mi vivas en la Spaco, inter la Tero kaj tio, kion vi nomas ĉielo... Mi sentas kvazaŭ la malvarnecon de tranĉilo tuj falonta sur mian gorĝon, sed tio eble estas la teruro antaŭ la morto... Ŝajnas al mi ankaŭ, ke mi vidas amason da Spiritoj min ĉirkaŭantaj, min kompate rigardantaj... Kaj ili parolas al mi, sed mi ilin ne komprenas.

11. — Sed inter tiuj spiritoj eble estas unu, kies ĉeesto vin humiligas kaŭze de via murdo. — R. Al vi mi

diros, ke ekzistas nur unu, kiu terurigas min — la Spirito de tiu, kiun mi mortigis.

12. — Ĉu vi memoras viajn antaŭajn ekzistadojn? — R. Ne; mi estas sendecida, mi kvazaŭ sonĝas... Ankoraŭfoje mi bezonas rekonsciiĝi.

13. — (Tri tagojn poste.) Ĉu do vi rekonas vin pli bone, nun? — R. Mi jam scias, ke mi ne apartenas plu al tiu mondo, kaj mi ne priploras tion. Min ĉagrenas tio, kion mi faris, sed mia Spirito estas pli libera. Mi plie scias, ke estas serio da enkarniĝoj, kiuj donos utilajn konojn al ni, por ke ni fariĝu tiel perfektaj, kiel estas eble al la homo.

14. — Ĉu vi estas punata pro la krimo, kiun vi faris? — R. Jes; mi bedaŭras tion, kion mi faris, kaj tio min suferigas.

15. — Kiel do vi estas punata? — R. Mi estas punata, ĉar mi estas konscia pri mia eraro, kaj petas de Dio pardonon; mi estas punata, ĉar mi rekonas mian nekredemon je tiu Dio, kaj scias nun, ke ni ne devas malpliigi la vivotagojn de niaj fratoj; mi estas punata per la konsciencoriproĉo, pro tio, ke mi prokrastis mian progreson, kaj iras malĝustan vojon, ne aŭskultante la krion de la propra konscienco, kiu diris al mi, ke ne per murdo mi atingos mian celon. Mi lasis min regi de enviemo kaj orgojlo; mi trompiĝis kaj pentas, ĉar la homo ĉiam devas peni superregi la malbonajn pasiojn — kion cetere mi ne feris.

16. — Kia estis via sento, kiam ni vin elvokis? — R. Mia sento estis de plezuro kaj timo, ĉar mi ne estas malica.

17. — En kio konsistas tia plezuro kaj tia timo? — R. Plezuro konversacii kun homoj kaj povi parte ripari

miajn erarojn, ilin konfesante; kaj timo, kiun mi ne povas difini — ia honto pro tio, ke mi estis krimulo.

18. — Ĉu vi deziras reenkarniĝi sur la Tero? — R. Mi eĉ ĝin petas kaj deziras konstante elmeti min al murdo, provante timon antaŭ ĝi.

Elvokite, Monsinjoro diris, ke li pardonis la krimulon kaj preĝis, por ke li pentu. Li diris plie, ke kvankam li ĉeestis lian elvokon, li ne sin montris al li, por ne pliigi liajn suferojn, ĉar la timo vidi la murditon jam estas simptomo de konsciencoriproĉo, jam estas ia puno.

— Ĉu la homo, kiu mortigas iun, scias, ke li, elektante novan enkarniĝon, en ĉi tiu fariĝos murdinto? — R. Ne; li scias, ke, elektante vivon je lukto, li havas *ŝancojn* mortigi similulon, sed li nescias, ĉu li tion faros, ĉar li preskaŭ ĉiam estas en lukto kun si mem.

Ĉe la morto, la situacio de Verger estas tiu de preskaŭ ĉiuj, kiuj perforte pereas. Ĉar la disiĝo ne estas subita, ili restas kvazaŭ konfuzitaj, ne sciante ĉu ili estas mortintaj aŭ vivantaj. Oni evitigis al li la vidon je la ĉefepiskopon, ĉar ĝi estus nenecesa por lia konsciencoriproĉo; sed aliaj Spiritoj, en identaj cirkonstancoj, estas konstante persekutataj de la rigardo de siaj viktimoj.

Al la grandegeco de la delikto Verger aldonis la pligravigan fakton, ke li ne pentis ankoraŭ dum la vivo, kondiĉo necesa por eterna kondamno. Sed tuj post kiam li foriris de sur la Tero, pento invadis lian animon, kaj, malaprobante sian pasintecon, li deziras sincere ĝin ripari. Al tio li estas pelata ne de la troa suferado, ĉar li eĉ ne havis tempon suferi, sed de la alarmo de tiu konscienco forlasita dum la vivo, kaj kiu nun fariĝas aŭdata de li.

Kial do ne konsideri valora tiun penton? Kial antaŭ kelkaj tagoj ĝi savus lin el la infero, kaj poste ne? Kaj fine, kial la Dio favorkora por pentinto antaŭ la morto, jam tia ne estas kelkajn tagojn pli malfrue? Estus miriga la rapida ŝanĝo iafoje okazinta ĉe la ideoj de krimulo hardita kaj senpenta ĝis la morto, se la forpaso ne estus sufiĉa por kompreni la tutan maljustecon de lia konduto. Sed tiu

rezulto tute ne estas ĝenerala — el kio sekvus, ke ne ekzistas malicaj Spiritoj. Pento ofte estas malfrua, jen kial la puno plilongiĝas.

La obstino en malbono, dum la vivo, venas iafoje de la orgojlo de tiu, kiu rifuzas submetiĝi kaj konfesi siajn propr-ajn erarojn, pro tio, ke la homo estas submetita al la influo de la materio, kiu ĵetante vualon sur aliajn spiritiajn sentum-ojn, lin ensorĉas kaj halucinas. Kiam tiu vualo rompiĝas, subita lumo lin heligas, kaj li ekvidas sin reganto de sia prudento. La senpera manifestiĝo de pli bonaj sentoj estas ĉiam duonpruvo de ia morala progreso, nur atendanta favor-an cirkonstancon por sin malkaŝi, dum la pli aŭ malpli longa persisto en malbono post la morto estas sendiskute pruvo de neprogreso de la Spirito, kies materiaj instinktoj atrofias la ĝermon de la bono, tiel ke li bezonos novajn provojn, por ke li korektiĝu.

## Lemaire

Kondamnita de la tribunalo de Aisne al mortopuno kaj ekzekutita la 31an de Decembro 1857. Elvokita la 29an de Januaro 1858.

1. *Elvoko*. — R. Ĉi tie mi estas.

2. — Nin vidante, kian senton vi spertas? — R. Tiun de honto.

3. — Ĉu vi tenis viajn sentumojn ĝis la lasta mo-mento? — R. Jes.

4. — Ĉu post la ekzekuto vi ekhavis tujan konon pri tiu nova ekzistado? — R. Mi dronis en granda konfuziĝo, el kiu cetere mi ankoraŭ ne liberiĝis. Mi sentis ian senmezuran doloron, kaj ŝajnis al mi, ke mia koro ĝin suferadis. Mi vidis ĉe la eŝafodo ion, kion mi ne scias; mi vidis la fluantan sangon kaj mia doloro fariĝis pli akra.

— Ĉu ĝi estis ia doloro nur fizika, simila al tiu kaŭzata de granda vundo, pro amputo de membro,

ekzemple? — R Ne; prefere prezentu al vi ian konsciencoriproĉon, ian grandan moralan doloron.

5. — Sed la fizikan doloron de torturo, kiu ĝin spertas: ĉu la korpo aŭ la Spirito? — R. La morala doloro estis en mia Spirito, kaj la korpo sentis la fizikan doloron; *sed ankaŭ la disiĝinta Spirito ĉi tiun sentas*.

6. — Ĉu vi vidis la korpon kripligitan? — R. Mi vidis ion ajn senforman, al kiu mi estis kvazaŭ integriĝinta; sed mi rekonis min neŝanĝita, t.e. mi estis mi mem... — D. Kiajn impresojn vi ricevis de tiu fakto? — R. Mi tre sentis mian doloron, *mi estis tute ligita al ĝi*.

7. — Ĉu estas vere, ke la korpo ankoraŭ vivas kelkajn momentojn post senkapigo, kaj ke la ekzekutito ankoraŭ restas konscia pri siaj ideoj? — R. La Spirito retiriĝas iom post iom; ju pli lin retenas la materiaj ligiloj, des pli malrapida estas la disiĝo.

8. — Oni diras, ke estas rimarkataj esprimo de kolero kaj movoj en la mieno de certaj ekzekutitoj, kvazaŭ ili volus paroli; ĉu tio estas rezultato de nervaj kuntiriĝoj, aŭ ago de la volo? — R. De la volo, ĉar la Spirito ankoraŭ ne malligiĝis.

9. — Kia estas la unua sento, kiun vi spertis, kiam vi eniris en vian novan ekzistadon? — R. Neelporteblan suferon, ian specon de korŝira konsciencoriproĉo, kies kaŭzon mi nesciis.

10. — Ĉu vi troviĝis kunigita kun viaj kunkulpuloj samtempe ekzekutitaj? — R. Bedaŭrinde jes, por nia malfeliĉo, ĉar tiu reciproka vido estas kontinua turmento, dum kiu unuj al aliaj riproĉas siajn krimojn.

11. — Ĉu vi renkontis viajn viktimojn? — R. Mi ilin vidis... ili feliĉaj; iliaj rigardoj min persekutas...

mi sentas, ke ili trapikas mian estaĵon kaj mi vane provas ilin eviti.

— Kian impreson kaŭzas al vi tiuj rigardoj? — R. Honton kaj konsciencoriproĉon. Ilin *mi memvole kaŭzis* kaj ankoraŭ ilin abomenas.

— Kaj kian impreson vi kaŭzas al ili? — R. Kompaton, senton, kiun, mi komprenas, ili havas pri mi.

12. — Ĉu ili sentas siavice malamon kaj deziron venĝi? — R. Ne; la rigardoj, kiujn ili al mi turnas, memorigas al mi mian kulpelpagon. *Vi ne povas taksi nian teruran turmentiĝon pro tio, ke ni ĉion ŝuldas al tiuj, kiujn ni malamas*

13. — Ĉu vi bedaŭras la perdon de la korpa vivo? — R. Mi nur bedaŭras miajn krimojn! Se la fakto ankoraŭ dependus de mi, mi ne plu pereus.

14. — Ĉu la inklino al malbono estis en via naturo, aŭ vi ankoraŭ ricevis la influon de la medio, en kiu vi vivis? — R. Ĉar mi estas malsupera Spirito, la inklino al malbono estis ja en mia propra naturo. Mi volis leviĝi rapide, sed mi petis pli multe ol kapablis miaj fortoj. Kredante, ke mi estas forta, mi elektis krudan provon kaj jen mi cedis al la tentoj.

15. — Se vi estus ricevinta edifajn principojn de eduko, ĉu vi estus deturniĝinta de la krima vojo? — R. Jes, sed mi elektis la denaskan kondiĉon.

— Ĉu vi ne povus esti fariĝinta honestulo? — R. Malforta homo estas tiom nekapabla por bono, kiom por malbono. Eble mi povus korekti dum la vivo la malbonon propran al mia naturo, sed neniam doni min al la praktiko de la bono.

16. — Kiam vi estis enkarniĝinta, ĉu vi kredis je Dio? — R. Ne.

— Sed oni iras, ke en la lasta horo vi pentis... — R. Ĉar mi kredis je venĝema Dio, tial estis nature, ke mi Lin timu...

— Kaj ĉu via pento estas nun pli sincera? — R. Kial do ne? Mi vidas, kion mi faris... — D. Kion do vi pensas pri Dio? — R. Mi Lin sentas, sed mi Lin ne komprenas.

17. — Ĉu al vi ŝajnas justa la puno, kiun oni trudis al vi sur la Tero? — R. Jes.

18. — Ĉu vi esperas ricevi pardonon pri viaj krimoj? — R. Mi ne scias.

— Kiel do vi intencas ilin ripari? — R. Per novaj provoj, kvankam ŝajnas al mi, ke ekzistas tuta eterneco inter ili kaj mi.

19. — Kie vi estas nun? — R. Mi estas en mia suferado.

— Ni demandas, en kiu loko vi troviĝas... — R. Apud la mediumo.

20. — Ĉar tiel estas, sub kiu formo ni vidus vin, se tio estus ebla al ni? — R. Vi vidus min sub mia enkorpa formo: la kapo apartigita de la trunko.

— Ĉu vi povas aperi al ni? — R. Ne; lasu min.

21. — Ĉu vi povas diri al ni, kiel do vi forkuris el la prizono de Montdidier? — R. Mi scias nenion pli... mia sufero estas tiel granda, ke mi konservas nur la rememoron pri la krimo... Lasu min.

22. — Ĉu ni povus faciligi al vi tiun suferon? — R. Deziru, ke alvenu al mi kulpelaĉeto.

## Benoist

(Bordeaux, Marto 1862)

Iu Spirito sin prezentas memvole al la mediumo, sub la nomo Benoist, dirante, ke li mortis en 1704, kaj ke li terure suferas.

1. — Kio do vi estis sur la Tero? — R. Nekredema monaĥo.

2. — Ĉu nekredemo estis via sola peko? — R. Ĝi sola sufiĉas por naski aliajn.

3. — Ĉu vi povas doni al ni kelkajn detalojn pri via vivo? Estos tre ŝatata la sincereco de via konfeso. — R. Malriĉa kaj mallaborema, mi enordeniĝis por havi ian pozicion, kvankam mi ne havis inklinon por tiu ofico. Inteligenta, mi atingis tiun pozicion; influhava mi trouzis mian povon; malvirta, mi koruptis tiujn, kiujn mi devis savi; kruela, mi persekutis tiujn, kiuj ŝajne volis riproĉi miajn ekscesojn; la pacemaj estis ĉagrenitaj de mi. La malsattorturoj de multaj viktimoj estis ofte perforte estingitaj. Nun mi suferas ĉiujn infertortutojn, tial ke miaj viktimoj ekbruligas fajron, kiu min konsumas. Nesatigeblaj voluptamo kaj malsato min persekutas; soifo bruletigas miajn varmegajn lipojn, kaj eĉ ne unu guto falas por ilin malvarmigi. Preĝu por mia Spirito.

4. — Ĉu la preĝoj faritaj por la forpasintoj devas esti atribuataj al vi, same kiel al aliaj? — R. Vi kredas, ke ili estas edifaj, sed *por mi ili samvaloras, kiel tiuj kiujn mi ŝajnigis fari*. Mi ne plenumis mian laboron, kaj tiel mi ricevas la salajron.

5. — Ĉu vi neniam pentis? — R. Jam antaŭ longe; sed la pento nur venis *per sufero*. Kaj kiel mi estis surda al la petegoj de la senkulpaj viktimoj, tiel same la Sinjoro estas surda al miaj petegoj. Justeco!

6. — Vi rekonas la Justecon de la Sinjoro; nu bone, fidu lian bonecon kaj petu de Li helpon. — R. La demonoj kriegas pli laŭte ol mi; iliaj krioj min sufokas; ili plenigas mian buŝon per bolanta peĉo!... Mi ĝin faris, granda... (La Spirito ne sukcesis skribi la vorton Dio.)

7. — Ĉu vi ne estas sufiĉe liberiĝinta el la surteraj ideoj, tiel ke vi komprenu, ke ĉiuj tiuj torturoj estas moralaj? — R. Mi suferas ilin... ilin sentas... vidas miajn ekzekutintojn, ĉiuj havantaj konatan vizaĝon, ĉiu havanta nomon, kiu eĥas en mia cerbo.

8. — Sed kio do povus peli vin fari tiom da abomenindaĵoj? — R. La malvirtoj, de kiuj mi estis saturita, la krudeco de la pasioj.

9. — Ĉu vi neniam petegis al la bonaj Spiritoj, ke ili helpu vin eliri el tiu situacio? — R. Mi vidas nur la inferajn demonojn.

10. — Kiam vi estis sur la Tero, ĉu vi timis tiujn demonojn? — R. Ne, tute ne, ĉar mi nur kredis la nenion. La plezuroj je kia ajn kosto estis mia kulto. Kaj tial, ke mi al ili dediĉis la vivon, la inferaj dioj ne plu min forlasis, nek forlasos!

11. — Ĉu vi do ne duonvidas ian finon al tiuj suferoj? — R. La senlimo ne havas finon.

12. — Sed Dio estas senlima en sia favorkoreco, kaj ĉio povas finiĝi, kiam tio plaĉos al Li. — R. Se Li ĝin volus!

13. — Kial do vi venis enskribiĝi ĉi tie? — R. Mi eĉ ne scias la motivon, sed mi volis paroli kaj krii, por ke oni faciligu al mi.

14. — Ĉu tiuj demonoj malpermesas vin skribi? — R. Ne, sed ili tenas sin antaŭ mi, kaj atendas min... Ankaŭ pro tio mi dezirus ne fini.

15. — Ĉu la unuan fojon vi tiamaniere skribas? — R. Jes. — D. Ĉu vi sciis, ke la Spiritoj tiele povus alproksimiĝi al la homoj? — R. Ne. — D. Kiel do vi ĝin perceptis? — R. Mi ne scias.

16. — Kiajn sentojn vi spertis, kiam vi alproksimiĝis al mi? — R. Ian malgrandiĝon de miaj teruroj.

17. — Kiel do vi konsciis vian ĉeeston ĉi tie? — R. Kiel ĉe vekiĝo.

18. — Kion vi faris por komunikiĝi kun mi? — R. Mi ne povas kompreni, sed ĉu ankaŭ vi ne sentis?

19. — Ne temas pri mi, sed pri vi... Penu certigi vin pri tio, kion vi faras dum mi skribas. — R. Vi estas mia penso, jen ĉio.

20. — Ĉu vi do ne deziris igi min skribi? — R. Ne, mi ja skribas, kaj vi pensas per mi.

21. — Penu certigi vin pri via stato, ĉar la bonaj Spiritoj vin ĉirkaŭantaj helpos vin. — R. Ne, ĉar la anĝeloj ne venas en la inferon. Ĉu vi ne estas sola? — D. Rigardu ĉirkaŭe. — R. Mi sentas, ke oni helpas min agi sur vin... via mano obeas min... mi ne tuŝas vin, kaj mi vin tenas... Kiel? Mi ne scias...

22. — Petegu viajn protektantojn pri helpo. Ni ambaŭ petu. — R. Ĉu vi volas lasi min? Restu ĉe mi, ĉar oni min ree ekposedos. Mi vin petas... Restu! Restu!...

23. — Mi ne povas resti plu. Revenu ĉiutage, por ke ni preĝu kune, kaj la bonaj Spiritoj vin helpos. — R. Jes, mi deziras pardonon. Preĝu por mi, ĉar mi ĝin ne povas fari.

*La gvidanto de la mediumo*. — Kuraĝon, mia infano, ĉar al li estos donita tio, kion vi petas, kvankam ankoraŭ estas malproksima la fino de la kulpelpago. La kruelaĵoj

faritaj de li estas sennomaj kaj sennombraj, kaj li estas des pli kulpa, ĉar li posedis inteligentecon, instruitecon kaj lumon por sin gvidi. Ĉar li konscie eraris, tial pli teruraj estas liaj suferoj, kiuj, malgraŭ tio, mildiĝos kun helpo kaj ekzemplo de la preĝo, tiel ke li vidu ilian finon, konsolita per la espero. Dio vidas lin sur la pento-vojo, kaj jam donis al li la *gracon* povi komunikiĝi, por ke li estu kuraĝigita kaj konsolita.

Pensu ofte pri li, ĉar ni transdonis lin al vi, por ke li plifortiĝu ĉe la bonaj decidoj , kiuj povos veni de viaj konsiloj. Lia pento estos sekvata de la deziro je reboniĝo, kaj tiam li petos novan ekzistadon por praktiki la bonon, kiel kompenson pro la malbono, kiun li faris. Kiam Dio estos kontenta pri li kaj lin vidos decidema kaj firma, tiam Li igos lin duonvidi la diajn lumojn lin kondukantajn al savo, kaj lin akceptos en sian sinon, kiel patro akceptas la malŝpareman filon. Fidu, kaj ni vin helpos kompletigi vian laboron.

*Paulin*

Ni metis ĉi tiun Spiriton inter la krimulojn, kvankam ne atingita de la homa justeco, ĉar la krimo estas en la agoj, kaj ne en la puno trudita de la homoj. Tio sama okazas al la sekvanta Spirito.

## Spirito en Castelnaudary

Bruoj kaj aliaj strangaj kaj diversaj manifestiĝoj okazintaj en dometo proksime al Castelnaudary supozigas ĝin loĝata de fantomoj, hantata ktp. Tiel tiu domo estis ekzorcita en 1848, cetere senrezulte. Ĝia posedanto, S-ro D..., intencante loĝi en ĝi, mortis subite, kelkajn jarojn poste; unu lia filo, animita de la sama deziro, enirante en unu el ĝiaj ĉambroj, ricevis fortegan frapon de nekonata mano kaj, ĉar li estis tute sola, li ne dubis pri ia kaŝita origino, kio devigis lin forlasi la domon definitive. En tiu loko kuradis sciigo, laŭ kiu ia grava krimo estis farita tie. La Spirito, kiu donis la frapon, estis elvokita ĉe la Societo de Parizo, en 1859, kaj manifestiĝis

per tiel perfortaj signoj, ke montriĝis senprofitaj ĉiuj klopodoj lin kvietigi. Demandite pri tio, Sankta Ludoviko respondis: “Li estas Spirito de plej malica speco, efektiva monstro: ni venigis lin, sed malgraŭ ĉio, kion ni diris al li, al ni ne estis eble igi lin skribi. Li havas sian liberan volon, kiun la malfeliĉulo tre malbone uzas.”

— Ĉu tiu Spirito estas pli bonigebla? — R. Kial do ne? *Ĉu tiaj ne estas ja ĉiuj*: ĉi tiu, same kiel la ceteraj? Eble tio ne okazos sen malfacilaĵo, sed la interŝanĝo de bono por malbono nepre tuŝos lin. Preĝu unue, kaj se vi lin elvokos post unu monato, vi vidos lian transformiĝon.

Ree elvokita pli malfrue, la Spirito montriĝis pli milda kaj iom post iom submetiĝinta kaj pentinta. Postaj klarigoj liveritaj ne nur de li mem, sed ankaŭ de aliaj Spiritoj, sciigis, ke en 1608, loĝante en tiu domo, li mortigis fraton pro terura ĵaluzo, tranĉante al li la gorĝon dum dormo. Kelkajn jarojn poste, li murdis ankaŭ sian edzinon.

Li mortis en 1659, en la aĝo de 80 jaroj, ne respondinte por tiuj krimoj, kiuj vekis malmultan atenton en tiu tempo de tumultoj. Post la morto, li neniam ĉesis praktiki malbonon, estigante diversajn akcidentojn en tiu domo.

Iu vidiva mediumo, kiu ĉeesti la unuan elvokon, vidis lin, en la momento, kiam oni intencis devigi lin skribi; li perforte skuis la brakon de la mediumo. Lia aspekto estis terura; li estis vestita per ĉemizo sange makulita kaj tenis ponardon en la mano.

1. — (Al Sankta Ludoviko.) Bonvolu priskribi al ni la specon de turmento de tiu Spirito. — R. Ĝi estas kruela, ĉar li estas kondamnita loĝi en la domo, en kiu li faris la krimon, ne povante fiksi la penson sur alian aferon ol la krimo, kiun li havas ĉiam antaŭ la okuloj, kaj li kredas al la eterneco de tiu torturo. Li ofte vidas sin, kiel en la momento de la krimo mem; ĉiu alia memoraĵo estis forprenita de li, kaj oni malpermesis al li ĉiun komunikiĝon kun alia Spirito. Sur la Tero li povas resti nur

en tiu domo, kaj en la Spaco nur restas el li soleco kaj mallumo.

2. — Ĉu estus ia rimedo por elpeli lin el tiu domo? Kia estus tiu rimedo? — R. Kiam oni volas malembarasiĝi je la obsedo de similaj Spiritoj, la rimedo estas facila: preĝi por ili. Sed estas ĝuste tio, kion oni ofte ne faras. Oni preferas ilin timigi per ekzorcismaj formuloj, kiuj cetere ilin tre amuzas.

3. — Ĉu ni, inspirante al la interesataj personoj tiun ideon preĝi por ili, kaj tion farante mem, ne sukcesus ilin forpeli? — R. Jes, sed rimarku, ke mi diris, ke ni preĝu por ili, kaj ne, ke ni *ordonu preĝi* por ili.

4. — Ĉar li estas jam de du jarcentoj en tiu situacio, ĉu li taksos tiun tutan tempon kvazaŭ li estus enkarniĝinta, t.e. ĉu tiu tempo ŝajnos al li tiel longa aŭ malpli longa, ol kiam li estis sur la Tero? — R. Pli longa: *dormo ne ekzistas por li*.

5. — Oni diris al ni, ke la tempo ne ekzistas por la Spiritoj kaj ke por ili unu jarcento estas nenio pli ol unu momento en la eterneco. Ĉu efektive tiu fakto okazas al ĉiuj Spiritoj? — R. Tute ne, ĉar tio nur okazas al la Spiritoj atingintaj tre altan gradon da progreso; al la malsuperaj tamen la tempo estas ofte malrapida, precipe kiam ili suferas.

6. — De kie venis tiu Spirito antaŭ sia enkarniĝo? — R. Li havis ekzistadon ĉe triboj el la plej ferocaj kaj sovaĝaj, kaj antaŭe en planedo malsupera ol la Tero.

7. — Tiu Spirito estas severe punita nun pro la krimo, kiun li faris; se li vivus inter sovaĝuloj, li estus devigita fari krimojn pli kruelajn ol la antaŭaj; ĉu li estus tiam sammaniere punata? — R. Jes, sed ne tiom, ĉar, estante pli nescia, li malpli komprenus la intensecon de la krimo.

8. — Ĉu la stato, en kiu troviĝas tiu Spirito, estas tiu de la estuloj vulgare nomataj *damnitoj*? — R. Tute ne, ĉar ekzistas kondiĉoj ankoraŭ pli timigaj. La suferoj tute ne estas la samaj por ĉiuj estuloj, kaj ili varias laŭ tio, kiel la kulpinto estas pli aŭ malpli pentema. Por ĉi tiu, tiu domo estas lia infero; aliaj portas tiun inferon en si mem, pro la ilin turmentantaj pasioj, kiujn ili ne povas satigi.

9. — Malgraŭ sia malsupereco, tiu Spirito estas sentema al la efiko de la preĝo, kion li ankaŭ rimarkis rilate al aliaj Spiritoj same perversaj kaj de plej kruda naturo; sed ekzistas Spiritoj, kiuj, instruitaj, dotitaj per pli progresinta intelekto, montras mankon de bonaj sentoj, mokante ĉion plej sanktan; nenio ilin tuŝas kaj ili eĉ ne ĉesigas sian cinikecon... — Preĝo utilas nur al pentanta Spirito; por tiuj, kiuj, poseditaj de orgojlo, ribelas kontraŭ Dio kaj persistas en eraro, eĉ ĝin troigante tiel same, kiel kondutas la malfeliĉuloj, por tiuj preĝo valoras nenion, nek valoros, escepte kiam subtila montro de pento ekĝermas en ilia konscienco. Ankaŭ la senefikeco de la preĝo estas por ili ia puno! Fine ĝi nur kvietigas tiujn ne plene harditajn.

10. — Kiam oni vidas Spiriton ne senteman al la efiko de preĝo, ĉu tio estas motivo, ke oni ne preĝu por li? — R. Ne, ĉar frue aŭ malfrue la preĝo povos triumfi super lian harditecon, inspirante al li edifajn pensojn. La samo okazas al iaj malsanuloj, ĉe kiuj la medikamentan efikon oni konstatas nur post longa tempo, kaj kontraŭe. Bone konsciiĝante pri tio, ke ĉiuj Spiritoj estas progres-emaj, kaj ke neniu estas fatale kaj eterne kondamnita al ni estos facile kompreni la efikon de la preĝo en ĉiu ajn cirkonstanco. Kiel eble plej efika ĝi povas ŝajni al ni unuavide, estas certe, ke ĝi entenas en si mem ĝermojn tre bonfarajn por antaŭinklinigi al pento la Spiriton, se ili lin ne tuj impresas. Estus do eraro, se ni senkuraĝiĝus, ĉar ni ne ricevas de ĝi tujan rezulton.

11. — Kiam tiu Spirito reenkarniĝos, kia estos lia kategorio? — R. Dependas de li kaj de lia tiama pento. Pluraj konversacioj kun li donis, kiel rezulton, notindan ŝanĝiĝon de lia moraleco.

Jen kelkaj el liaj respondoj:

12. — (Al la Spirito.) Kial do vi ne povis skribi la unuan fojon, kiam ni vin elvokis? — R. Ĉar mi ne volis. — D. Kial do ne? — R. Nescio kaj krudeco

13. — Ĉu nun vi povas laŭvole forlasi la domon en Castelnaudary? — R. Oni permesas tion al mi, ĉar mi profitas viajn konsilojn. — D. Ĉu vi sentas ian trankvilecon? — R. Mi komencas havi esperon.

14. — Se al ni estus eble vidi vin, kia estus via aspekto? — R. Vi vidus min en ĉemizo, sed sen la ponardo. — D. Kial do vi ne plu portas la ponardon? Kion do vi faris el ĝi? — R. Ĝin malbenante, *Dio forprenis ĝin el mia vido*.

15. — Se la filo de S-ro D... (tiu, kiu estis pugnofrapita) revenus al tiu domo, kion do vi farus al li? — R. Nenion, ĉar mi pentis. — D. Kaj se li ankoraŭ intencus vin defii? — R. Ne faru tiun demandon al mi! Mi ne bridus min, tio superas miajn fortojn, ĉar mi estas mizerulo.

16. — Ĉu vi duonvidas ian finon al viaj suferoj? — R. Ho! ankoraŭ ne. Jam estas multe scii, dank' al via interveno, ke tiuj suferoj ne estas eternaj.

17. — Bonvolu priskribi al ni vian situacion antaŭ ol ni vin elvokis la unuan fojon. Vi komprenas, ke ĉi tiu demando celas, ke ni estu utilaj al vi, kaj ne la simplan kaj frivolan scivolemon. — R. Mi jam diris al vi, ke mi komprenis nenion krom mia krimo, kaj ke mi ne povis forlasi la domon, en kiu mi krimis, krom por vagadi en la Spaco, sola kaj nekonata; pri tio mi ne povis doni

ideon al vi, ĉar mi neniam povis kompreni, kio okazis. Kiam mi leviĝis en la Spaco, ĉio estis mallumo kaj malpleno, aŭ prefere mi eĉ ne scias, kio ĝi estas... Hodiaŭ mia konsciencoriproĉo estas multe pli granda, kaj tamen mi ne estas devigita resti en tiu fatala domo, kaj al mi estas permesite erarvagi sur la Tero kaj min konduti per observado de ĉio, kion mi tie vidas, pli bone komprenante la grandegecon de miaj krimoj, kaj se unuflanke mi suferas malpli, aliflanke pliiĝas la torturoj de konsciencoriproĉo... Sed... feliĉe mi havas esperon.

18. — Reenkarniĝonte, kian ekzistado vi preferus? — R. Pri tio mi ne sufiĉe pripensis.

19. — Dum via longa izoleco — ni preskaŭ povas diri dum sklaveco —, ĉu vi spertis ian konsciencoriproĉon? — R. Nenian, jen kial mi tiel longe suferis. Nur kiam mi ĝin sentis, tiam ĝi kaŭzis, mi tion ne perceptis, la cirkonstancojn, kiuj okazigis vian elvokon al mia Spirito por komenco de mia liberiĝo. Dankon do al vi, kiuj kompatis kaj prilumis min.

Efektive ni vidas avarulojn suferi ĉe la vido je oro, kiu por ili estis nenio alia ol ĥimero; fierulojn turmentataj de ĵaluzo pro la honoraĵoj faritaj al aliaj kaj ne al ili; homojn, kiuj superregis sur la Tero, humiligataj de la nevidebla povo, devigataj al obeado sub la rigardo de iliaj subuloj, kiuj ne plu kliniĝas al ili; ateistojn konsterniĝintaj de la dubo, antaŭ la spacego, ĉe la plej absoluta izoliteco, sen eĉ unu estulo, kiu ilin prilumu.

En la mondo de la Spiritoj estas kompensoj por ĉiuj virtoj, sed ekzistas ankaŭ punoj por ĉiuj eraroj, kaj, el inter ĉi tiuj, tiuj, kiuj eskapis de la homaj leĝoj, estas nepre trafitaj de la leĝoj de Dio.

Ni ankoraŭ devas noti, ke la samaj eraroj, kvankam faritaj en identaj cirkonstancoj, estas malsame punitaj, laŭ la grado da progreso de la kriminta Spirito. Al la pli neprogresintaj Spiritoj de pli kruda naturo, kiel tiu, pri kiu ni okupiĝas, estas truditaj punoj iamaniere pli materiaj ol moralaj, dum okazas la malo al tiuj, kies inteligent-

eco kaj sentemeco estas pli elvolviĝintaj. Al la unuaj estas trudata la puno konforma al la krudeco de ilia kapablo kompreni la eraron kaj liberiĝi el ĝi. Tiel honto ekzemple, kaŭzante malmultan aŭ nenian impreson sur ĉi tiujn, fariĝas neelportebla por tiuj.

En ĉi tiu dia kriminala kodo, saĝeco, boneco, providenco de Dio por liaj kreitoj elmontriĝas eĉ ĉe la plej malgrandaj detaloj, kaj ĉio estas donata kaj interligata kun admirinda zorgo por faciligi al la kulpinto la rimedojn por regeneriĝo. La minimumaj aspiroj estas konsiderataj kaj kolektataj.

Male, laŭ la dogmoj de la eternaj punoj, konfuziĝas la grandaj kaj malgrandaj krimuloj, la momentaj kaj la obstinemaj kulpuloj, la harditaj kaj pentintaj. Krome nenia savotabulo prezentiĝas al ili; la momenta eraro povas kaŭzi ian eternan kondamnon, kaj, kio estas pli grave, ĉia bonfaro, kiun ili eble faris, nenion valoros al ili. Kun kiu do troviĝas la vera justeco, la vera boneco?

Ĉi tiu elvoko estis neniel hazarda; ĉar ĝi devis utili al tiu malfeliĉulo, pro tio li jam ekkomprenis la gravecon de sia krimo, tiam la prigardantaj Spiritoj opiniis oportuna tiun efikan helpon, kaj komencis faciligi al li favorajn cirkonstancojn. Ĉi tiun fakton ni ja vidas ofte prezentiĝi. Oni demandos, kio fariĝus kun tiu Spirito, se li ne estus elvokita; kio fariĝus kun ĉiuj suferantoj, kiuj ne povas esti elvokataj, kaj ankaŭ kun tiuj, pri kiuj oni eĉ ne pensas... Ni povus respondi, ke la rimedoj, kiujn Dio disponas por savi siajn kreitojn estas nenombreblaj; la elvoko estas unu el ili, sed certe ne la sola. Dio lasas neniun forgesita, kaj krome la kolektivaj preĝoj devas iamaniere influi sur la pentemajn Spiritojn.

Dio ne povus submeti la sorton de la suferantaj Spiritoj al la homaj bonvolemo kaj konoj.

De kiam la homoj povis starigi regulajn interrilatojn kun la nevidebla mondo, unu el la unuaj rezultoj de Spiritismo estis la instruado pri la servoj, kiujn ili povas fari al siaj elkarniĝintaj gefratoj per tiuj interrilatoj.

Tiamaniere Dio evidentigas la solidarecon ekzistantan inter ĉiuj estuloj en la Universo, kaj donas la leĝon de la naturo, kiel bazon de la principo de frateco. Al ni Dio elmontras la veran, utilan kaj seriozan trajton de la elvokoj, kiujn ĝis tiam nescio kaj superstiĉo devojigis el ilia providenca celo.

Al la suferantoj neniam mankis helpoj kaj, se la elvokoj havigas al ili ian novan savovojon, ili eble utilas multe pli al la enkarniĝintoj, tial ke ĉi tiuj akiras novajn rimedojn bonfari, samtempe instruiĝante pri la kondiĉoj de la estonta vivo.

## Jacques Latour

(Murdinto kondamnita de tribunalo de Foix kaj ekzekutita en Septembro 1864)

Ĉe privata kunsido de sep ok personoj, kiu okazis en Bruselo, la 13an de Septembro 1864, kaj kiun ni ĉeestis, oni petis iun mediumon, ke li prenu krajonon, kaj ni tute ne faris iun ajn specialan elvokon.

Posedita de eksterordinara skuo, jen li skribis literojn tre dikajn kaj poste, disŝirante la paperon, li ekkrias:

“Mi pentas! Mi pentas! Latour!”

Surprizitaj de la neatendita komunikaĵo ricevita tute sen elvoko, ĉar neniu pensis pri tiu malfeliĉulo, pri kies morto parto de la ĉeestantoj ĝis tiam ne sciis, ni direktis al la Spirito vortojn de konsolo kaj kompato, kaj tuj poste mi faris al li ĉi tiun demandon:

— Kia motivo igis vin manifestiĝi ĉi tie prefere ol en alia loko, se ni ne elvokis vin?

La mediumo buŝe respondas:

“Mi vidis, ke vi, sindonaj animoj, kompatus min, dum aliaj aŭ min elvokadus pli bone pro scivolemo ol pro karitato, aŭ foriĝus de mi teruritaj.” Poste li komencis ian nepriskribeblan scenon, kiu daŭris ne pli ol duonhoron. Aldonante siajn gestojn kaj fizionomian esprimon al la parolo, la mediumo evidentigis la identiĝon

de la Spirito kun ties persono; kelkfoje, tiuj gestoj de kruela malespero akre reliefigis lian suferadon; la tono de lia voĉo estis tiel maldolĉa, liaj petegoj tiel flamaj, ke ni profunde kortuŝiĝis. Kelkaj estis eĉ teruritaj de la superekscitiĝo de la mediumo, sed ni sciis, ke la manifestiĝo de pentinta estulo, kiu petegas pri kompato, nenian danĝeron povas estigi. Se li serĉis la organojn de mediumo, estas pro tio, ke li pli bone deziris elmontri sian situacion, por ke ni pli interesiĝu pri lia sorto, kaj li ne agis, tiel, kiel la obsedantaj kaj superregantaj Spiritoj, kiuj celas alproprigi al si la mediumojn, por regadi super ili. Eble tiu manifestiĝo estis permesita al li ne nur por lia propra profito, sed ankaŭ por la edifo de la ĉeestantoj.

Li ekkrias:

“Ho jes, kompaton... mi tre bezonas ĝin... Vi ne scias, kion mi suferas... Vi ne scias kaj ne povas ĝin kompreni. Estas terure! La gilotino!... Kion valoras la gilotino, kompare kun la nuna sufero? Nenion! — ĝi estas unu momento. Ĉi tiu fajro min konsumas, jes, ĝi estas pli terura, ĝi estas senĉesa morto, sen halto kaj sen ripozo... sen fino!...Kaj miaj viktimoj, jen ili estas ĉirkaŭe, montrante al mi siajn vundojn, min persekutante per sia rigardo...

Jen ili estas, kaj mi vidas ilin ĉiujn... ĉiujn... ne povante fuĝi de ili! Kaj tiu maro da sango! Kaj tiu oro makulita de sango! Ĉio estas tie... ĉio... kaj ĉiam antaŭ miaj okuloj! Kaj la sangodoro!... Ĉu vi ne sentas ĝin? Ho! Sango kaj ĉiam sango! Jen ili petegas, la kompatindaj viktimoj, kaj mi ilin ĉiam vundante... ĉiam... senkompate!... La sango ebriigas min... Mi kredis, ke post la morto ĉio finiĝus, kaj tiel mi alfrontis la turmenton, mi alfrontis Dion, mi Lin forĵuris!... Kiam tamen mi opiniis min por ĉiam eldetruita, kiel terura estis mia vekiĝo... ho! jes, terura, ĉirkaŭita de kadavroj kun piedoj eniĝintaj en sangon!... Mi opiniis min mortinta, kaj jen mi estas viva! Terura! terura! pli terura ol ĉiuj surteraj turmentoj! Ha! se ĉiuj homoj povus scii tion, kio ekzistas trans la vivo, ili ankaŭ scius, kiom kostas la sekvoj de malbono! Certe ekzistus plu nek

murdoj nek murdintoj nek maliculoj! Mi nur volus, ke ĉiuj murdintoj povu vidi tion, kion mi vidas kaj suferas...

Ho! tiam ili ne plu estus tiaj, ĉar estas ja terura tiu sufero! Mi bone scias, ke mi ĝin meritis, ho mia Dio, ĉar mi ankaŭ ne kompatis miajn viktimojn; mi forpuŝis la etenditajn manojn, kiam ili min petegis pri indulgo... Jes, sendube mi estis kruela, kovarde mortigante ilin por ilin prirabi! Kaj mi estis senkompata kaj ankaŭ blasfema, forpuŝante vian tre sanktan Nomon... *Mi volis trompi min, ĉar mi volis konvinki min pri tio, ke Vi ne ekzistas*... Mia Dio, mi estas granda krimulo! Nun mi ĝin komprenas. Sed... ĉu vi ne kompatos min?... Vi estas Dio, t.e. la boneco, la favorkoreco! Vi estas ĉiopova! Kompaton, Sinjoro! Kompaton! Mi Vin petegas, ne estu senkompata; liberigu min de tiuj malamaj rigardoj, de tiuj abomenindaj fantomoj... de tiu sango... de miaj viktimoj...*rigardoj, kiuj*, simile al ponardobatoj, trapikas al mi la koron.

Vi, kiuj estas ĉi tie, kiuj min aŭdas, estu bonaj, karitemaj animoj. Jes, mi vidas, mi scias, ke vi kompatas min, ĉu ne vere? Vi nepre preĝos por mi...

Ho! mi vin petegas, ne forlasu min, kiel iam mi forlasis miajn similulojn. Vi petos Dion, ke Li forprenu de antaŭ miaj okuloj tiun teruran scenon, kaj Li vin aŭskultos, ĉar vi estas bonaj... Mi petegas, preĝu por mi."

La ĉeestantoj emociitaj direktis al li parolojn kuraĝigajn kaj konsolajn. Dio, ili diris al li, ne estas neelpetebla; Li nur postulas de la kulpulo ian sinceran penton kunigitan al la deziro ripari la malbonon faritan. Ĉar via koro ne estas ŝtoniĝinta kaj vi petas lian pardonon pri viaj krimoj, lia favorkoreco falos sur vin. Estas do necese, ke vi persiste decidu ripari la malbonon, kiun vi faris. Certe vi ne povas redoni al la viktimoj la vivojn, kiujn vi forprenis de ili, sed se vi fervore Lin petegos, Dio permesos, ke vi ilin renkontos en nova enkarniĝo, en kiu vi povos elmontri al ili tiom da sindediĉo, kiom da malbono vi faris al ili. Kaj kiam la riparo ŝajnos al vi

sufiĉa, vi tuj ĝuos lian sanktan favoron. Tiel la daŭro de via puno kuŝas en viaj manoj, kaj nur de vi mem dependas ĝia mallongigo. Ni promesas helpi vin per niaj preĝoj kaj alvoki por vi la helpon de la bonaj Spiritoj. Ni faros por vi la preĝon el *La Evangelio laŭ Spiritismo*, rilatan al la suferantaj kaj pentintaj Spiritoj. Ni ne faros tiun preĝon destinitan al la malbonaj Spiritoj, ĉar, konsiderante, ke vi pentas, petegas pri helpo, rezignas la malbonon, por ni vi estas nenio alia ol Spirito malfeliĉa, sed ne malbona.

Post la preĝo kaj mallonga tempo da trankvilo la Spirito daŭrigas:

"Dankon, mia Dio!... Ho! Dankon! Vi kompatis min... Jen la fantomoj foriras... Ne forlasu min, sendu viajn bonajn Spiritojn subteni min... Dankon...

Post tiu sceno la mediumo fariĝas senforta, malvigla, kun la membroj malstreĉitaj dum kelkaj tempo. Komence li havas nur neprecizan ideon pri la okazintaĵo, sed iom post iom li ekmemoras kelkajn vortojn, kiujn li nevole eldiris, rekonante, ke ne estis li, kiu parolis.

En la sekvinta tago, ĉe nova kunsido, la Spirito ree manifestiĝis, rekomencante la antaŭtagan scenon, sed nur dum kelkaj minutoj, kaj tion li faris kun la sama signifoplena gestado, kvankam malpli perforta. Poste, kaptita de febra skuiĝo, li skribis:

"Mi estas danka pro viaj preĝoj. Mi jam spertas ian senteblan pliboniĝon. Tiel estis la fervoro, kun kiu mi preĝis, ke Dio permesis al mi nedaŭran faciliĝon; malgraŭ tio, mi ankoraŭ devos vidi miajn viktimojn... Jen ili estas! Jen ili estas! Ĉu vi vidas ĉi tiun sangon?..." (Ripetiĝis la antaŭtaga preĝo. La Spirito daŭrigas, alparolante la mediumon.)

"Pardonu, ke mi ekposedis vin. Dankon pro la kvietiĝo, kiun vi havigis al miaj suferoj. Pardonu la malbonon, kiun mi kaŭzis al vi, sed mi bezonas komunikiĝi, kaj nur vi povas...

Dankon! dankon! Mi jam sentas ian kvietiĝon, kvankam mi ne atingis la finon de la provoj. Miaj viktimoj baldaŭ revenos. Jen la puno, kiun mi meritis, sed, mia Dio, estu indulgema.

Preĝu vi ĉiuj por mi, estu kompatemaj.”

*Latour*

Iu membro de la Spiritisma Societo de Parizo, kiu preĝis por la malfeliĉulo, lin elvokante, havigis al si, post intertempoj, la jenajn komunikaĵojn:

I

Mi estis elvokita preskaŭ tuj post mia morto, sed mi ne povis manifestiĝi tuj, kaj sekve pluraj ventanimaj Spiritoj prenis miajn nomon kaj vicon. En Bruselo mi profitis la restadon de la Prezidanto de la Societo de Parizo, kaj mi komunikiĝis kun permeso de la *superaj Spiritoj*.

Mi ree manifestiĝos ĉe la Societo, por fari malkaŝojn, kiuj estos komenco de riparo de miaj eraroj, kaj kiuj servos ankaŭ kiel instruado al ĉiuj krimuloj, kiuj legos la raportojn pri miaj suferoj kaj meditos pri ili. La raporto pri inferaj punoj povas teruri nur la Spiriton de malfortaj homoj aŭ de infanoj. Nu, granda malbonfaranto ne estas ja timema Spirito, kaj la timo antaŭ policisto estas por li pli reala ol la priskribo de la inferaj turmentoj. Jen kial ĉiuj, kiuj min legos, estos kortuŝitaj de miaj vortoj kaj suferoj, kiuj ne estas fikciaj. Ne ekzistas eĉ unu pastro, kiu povas diri, ke li vidis tion, kion mi vidis, ĉar mi estas spektanto de la torturoj de la inferkondamnitoj. Sed kiam mi venos diri: — “Jen kio okazis post mia morto, la morto de la korpo; jen mi treege elreviĝis, kiam mi rekonis min vivanta, kontraŭe al tio, kion vi supozis kaj eĉ prenis, kiel finon de turmentoj, dum ĝi vere estis la komenco de aliaj torturoj, cetere nepriskribeblaj!” — tiam pli ol unu estulo estos sur la rando de la abismo,

en kiun li estis sin ĵetonta, kaj ĉiu el la malfeliĉuloj de mi deturnitaj de la krima vojo kunlaboros por mia kulpelaĉeto.

Al mi estis permesite liberiĝi de la rigardo de miaj viktimoj ŝanĝitaj en ekzekutistojn, por komunikiĝi kun vi; vin lasante, mi tamen revidos ilin, kaj tiu sola ideo kaŭzas al mi tiom da sufero, ke mi ne povas priskribi ĝin. Kiam oni elvokas min, mi estas feliĉa, ĉar tiam mi lasas mian inferon por kelkaj minutoj.

Preĝu ĉiam al la Sinjoro por mi; petu, ke Li liberigu min de la rigardo de miaj viktimoj.

Jes, ni preĝos kune. La preĝo tre bonfaras... Mi estas pli trankvila; mi ne sentas tiel peza la ŝarĝon, kiu min afliktas. Mi vidas restaĵon de espero brili antaŭ miaj okuloj kaj mi ekkrias pentinta: Benata la mano de la Sinjoro! Fariĝu lia volo!

II

*La mediumo*. – Anstataŭ peti Dion, ke Li forprenu vin for de la rigardo de viaj viktimoj, mi vin invitas peti kun mi, ke Li al vi donu la necesan forton por elporti tiun kulpelpagan torturon.

*Latour*. – Mi preferus liberiĝi de tiuj rigardoj. Se vi scius, kiom mi suferas... La plej nesentema homo emociiĝus, se li vidus kvazaŭ fajre gravuritaj en mia fizionomio la suferojn de mia animo. Mi tamen faros tion, kion vi konsilas al mi, ĉar mi komprenas, ke tio estas rimedo por iom pli rapide elpagi miajn kulpojn. Ĝi estas kvazaŭ dolora operacio, kiu kuracas grave malsanan korpon. Ha! se la surteraj kulpuloj povus vidi min, ili estus teruritaj antaŭ la rezultoj de miaj krimoj, de tiuj krimoj, kiuj, nesciataj de la homoj, estas tamen vidataj de la Spiritoj. Kiel fatala estas la nescio por multaj personoj!

Kian ŝuldiĝon prenas sur sin tiuj, kiuj rifuzas instruon al la malriĉaj sociaj klasoj! Ili kredas, ke per

policistoj kaj soldatoj oni povas eviti krimojn... Kia granda eraro!

III

Teruraj estas miaj suferoj, sed post kiam vi preĝas por mi, mi sentas min konsolita de bonaj Spiritoj, kiuj al mi konsilas esperon. Mi komprenas la efikecon de la heroa kuracilo, kiun vi rekomendis al mi, kaj mi petas Dion, ke Li donu al mi fortojn por elporti tiun penigan provon, cetere egalan, tion mi povas aserti, al la malbono, kiun mi faris. Mi ne volas min senkulpigi je miaj kruelaĵoj; sed certe estas, ke por miaj viktimoj la doloro en la morto ne ekzistis, escepte de nedaŭra teruro antaŭanta la forpason, kaj tiuj jam finintaj siajn surterajn provojn iris ricevi la rekompencojn, kiujn ili atendas. Sed post mia reveno al la mondo de la Spiritoj, por mi estis nur inferaj suferoj, escepte de mallongaj momentoj, dum kiuj mi manifestiĝis.

Malgraŭ siaj terurigaj bildoj, la pastroj havas nur tre palan ideon pri la veraj suferoj, kiujn la dia justeco trudas al tiuj, kiuj rompas la leĝon de amo kaj karitato.

Kiel kredigi al malsaĝuloj, ke animo, t.e. io nemateria, povas suferi ĉe kontakto kun la materia fajro? Ĝi estas absurdo, kaj tial tre multaj krimuloj priridas tiujn fantaziajn pentraĵojn pri la infero. Tio sama tamen ne okazas rilate la moralan doloron de la kondamnito, post la fisika morto. Preĝu, por ke la malespero ne ekposedu min.

IV

Mi estas tre danka al vi pro la perspektivo, kiun vi donis al mi, kaj kies gloran celon mi devas atingi, kiam mi estos elpurigita.

Mi tre suferas, sed ŝajnas al mi, ke la suferoj malpliiĝas. Mi ne povas kredi, ke en la mondo de la Spiritoj la doloro malpliiĝas iom post iom, pro multe da alkutimiĝo al ĝi. Ne. Mia konkludo estas, ke viaj bonefikaj

preĝoj pliigas miajn fortojn, tie ke, *kun la samaj doloroj, mi pli rezignacie malpli suferas*.

Tiam mia penso turnas sin al la lasta ekzistado kaj mi vidas la erarojn, kiujn mi tiam forpelus, se mi scius preĝi. Hodiaŭ mi komprenas la efikon de la preĝo; mi komprenas la valoron de tiuj honestaj kaj piaj virinoj, malfortaj laŭ la karno, sed fortaj je lafido; fine mi komprenas tiun misteron nescianta de la falsaj saĝuloj sur la Tero. Preĝoj! vorto per si mem estiganta ridon al la fortaj spiritoj. Mi ilin atendas ĉi tie, en la spirita mondo, kaj kiam rompiĝos por ili la vualo kaŝanta la veron, tiam konsentante, ili kliniĝos ĉe la piedoj de la Eternulo, kiun ili malestimis, kaj ili estos feliĉaj humiliĝi, por ke iliaj pekoj kaj krimoj estu malkaŝitaj! Tiam ili nepre komprenos la efikon de la preĝo.

Preĝi estas ami, kaj ami estas preĝi! Kaj ili amos la Sinjoron kaj direktos al Li preĝojn de dankon kaj amo, regenerite de la sufero. Kaj, ĉar ili devas suferi, ili petos, kiel mi petas, la forton necesan al la sufero kaj kulpelaĉeto. Ĉesante suferi, ili ankoraŭ devos preĝi por danki por la pardono, kiun ili meritis pro siaj obeemo kaj rezignacio. Ni preĝŭ, fratoj, por ke mi plifortiĝu plu... Ho! dankon pro via kompato, mia frato, ĉar mi estas pardonita. Dio liberigas min de la rigardo de miaj viktimoj. Ho! mia Dio! Benata estu Vi, por la tuta eterneco, pro la favoro, kiun Vi permesas al mi! Ho, mia Dio! Mi sentas la grandegecon de miaj krimoj kaj kliniĝas antaŭ via ĉiopoveco. Sinjoro! mi Vin amas el mia tuta koro kaj al Vi petegas la gracon permesi laŭ via volo, ke mi suferu novajn provojn sur la Tero; ke mi revenu al ĝi, kiel misiulo de la paco kaj karitato, instruante al la infanoj respekte elparoli vian nomon. Mi Vin petas ebligi al mi instrui al ili ami Vin, kiu estas Patro de ĉiuj kreitoj. Dankon, mia Dio! Mi estas pentinta Spirito, kaj sincera estas mia pento.

Mi Vin amas tiom, kiom mia malpura koro povas enteni tiun senton, kiu estas pura emanaĵo de via dieco. Ni preĝu, frato, ĉar mia koro elverŝas dankon. Mi estas libera, mi rompis la katenojn, mi ne estas plu maliculo.

Mi estas suferanta Spirito, sed pentinta, deziranta, ke mia ekzemplo povu reteni ĉe la sojlo de la krimo ĉiujn krimajn manojn, kiujn mi vidas tuj leviĝontaj.

Ho! fratoj, malantaŭen, retroiru, ĉar la torturoj, kiujn vi nun preparas, estos kruelaj! Ne kredu, ke la Sinjoro tuj aŭskultos la preĝon de siaj infanoj. Jarcentoj da torturoj vin atendas.

*La gvidanto de la mediumo*. Vi diras, ke vi ne komprenas la vortojn de la Spirito. Penu prezenti al vi ian ideon pri liaj emocio kaj danko al la Sinjoro, aferoj, kiujn li kredas, ke li ne povas pli bone atesti ol provante deadmoni ĉiujn tiujn krimulojn vidatajn de li, sed kiujn vi ne povas vidi. Li volas, ke liaj vortoj atingu aliajn orelojn; sed kion li ne diris al vi, ĉar li ĝin ankoraŭ nescias, estas tio, ke al li estos permesite komenci la regenerajn misiojn. Li iros apud tiuj, kiuj estis liaj kunkulpuloj, kaj penos inspiri al ili penton, enmetante en iliajn korojn la ĝermon de konsciencoriproĉo.

Kelkfoje vidiĝas sur la Tero personoj, kiuj, kvankam rigardataj kiel honestaj, sin ĵetas al la piedoj de pastro por sin akuzi pri iu krimo.

Estas ja la konsciencoriproĉo, kiu diktas al ili la konfeson de la kulpo. Kaj se la vualo kaŝanta de vi la nevideblan mondon neniiĝus, vi plurfoje vidus la Spiriton, kiu estis kunkulpa aŭ kriminstiga, peni ripari sian eraron, inspirante konsciencoriproĉon al la enkarniĝinta Spirito, same kiel faros Jacques Latour.

*Via protektanta gvidanto*

Poste la mediumo en Bruselo, tiu sama, kiu tiam ricevis la unuan diktaton, ricevis la jenan komunikaĵon:

"Nenion plu vi timu pri mi, kiu estas trankvila, malgraŭ la sufero, kiun mi ankoraŭ sentas. Vidante mian penton, Dio kompatis min. Nun *mi suferas pro tiu pento, kiu montras al mi la grandegecon de miaj krimoj*. Se mi estus bone gvidita dum la vivo, mi tute ne estus farinta tiun malbonon, sed sen brido mi blinde obeis miajn instin-

ktojn. Se ĉiuj homoj pli pensus pri Dio, aŭ pli bone, se ili kredus je Li, tiaj eraroj ne estus faritaj.

Sed la homa justeco estas neperfekta; eraro iafoje negrava kondukas la homon en prizonon, kiu ne povas ne esti fokuso de malvirtiĝo. El tie li eliras tute koruptita de la malbonaj ekzemploj kaj konsiloj. Kvankam lia karaktero estas bona kaj forta por ne koruptiĝi, elirinte el tie li tamen trovos ĉiujn pordojn fermitaj, ĉiujn manojn retiritaj, ĉiujn korojn indiferentaj! Kio do restas al li? Malestimo, mizero, forlaso kaj malespero, se al li restas almenaŭ bona intenco korektiĝi. Tiam la mizero lin kondukas al ekscesoj, kaj tiel ankaŭ li estas kaptita de malestimo por sia similulo, tiel li perdas la konscion pri bono kaj malbono, ĉar li vidas sin forpelita, malgraŭ siaj bonaj intencoj. Por havigi al si la bezonaĵojn, li rabas, iafoje mortigas, kaj poste... poste oni ekzekutas lin! Mia Dio, kiam mi estas denove kaptita de miaj halucinoj, mi sentas, ke viaj manoj etendiĝas super mi; mi sentas, ke via boneco ĉirkaŭas kaj protektas min.

Dankon, mia Dio! En la venonta ekzistado mi uzos mian tutan inteligentecon ĉe helpo al la pereintaj malfeliĉuloj, por ilin antaŭgardi de la falo. Dankon al vi, kiuj ne malŝatis komunikiĝi kun mi; nenion timu, ĉar vi bone vidas, ke mi ne estas malbona. Kiam vi pensos pri mi, ne imagu min, kiel vi min vidis, sed kiel afliktitan animon, kiu dankas vin pro via indulgemo.

Adiaŭ; elvoku min plu, kaj preĝu al Dio por mi."

*Latour*

(Studo pri la Spirito de Jacques Latour)

Oni ne povas ne koni la profundecon kaj la altan signifon de kelkaj el la frazoj entenataj en ĉi tiu komunikaĵo. Krom tio, ĝi donas unu el la aspektoj de la mondo de la punataj Spiritoj, kvankam super ĝi ankoraŭ ŝvebas la dia favorkoreco. La mitologia alegorio pri la Eŭmenidoj ne estas tiel ridinda, kiel ĝi ŝajnas, kaj la demonoj, oficialaj ekzekutistoj en la nevidebla mondo, kiuj ilin

anstataŭas antaŭ la modernaj kredoj, estas malpli raciaj kun siaj kornoj kaj forkegoj, ol tiuj viktimoj, kiuj servas mem al la puno de la kulpulo.

Akceptante la identecon de tiu Spirito, eble oni estas surprizita de tiel rapida ŝanĝiĝo de lia moralo. Estas la okazo de la jam farita pripenso, ke Spirito krude malbona povas enhavi pli bonajn kvalitojn ol tiu venkita de orgojlo kaj hipokriteco. Ĉi tiu reveno al pli bonfaraj sentoj montras ian naturon pli sovaĝan, ol malican, al kiu mankas nur bona gvidado. Komparante ĉi tiun lingvaĵon kun tiu de alia Spirito, ĉi-sube registritan sub la titolo *puno per lumo*, estas facile veni al konkludo, ke unu el la du Spiritoj estas morale pli progresinta, malgraŭ la malsameco de instruiteco kaj socia hierarkio, kaj unu obeas al la natura instinkto de krueleco, al ia speco de superekscitiĝo, dum la dua faras siajn krimojn kun sereneco kaj malvarma sango propraj al la malrapidaj kaj obstinaj kombinoj, alfrontante pro fiero la punon, eĉ post la morto. Ĉi tiu suferas kaj ne ĝin konfesas, dum la unua tuj submetiĝas. Ankaŭ per tio ni povas antaŭvidi el ili tiun, kiu suferos pli longe.

Diras la Spirito de Latour: "Mi suferas pro tiu pento, kiu montras la gravecon de miaj krimoj."

Tie estas profunda penso. La Spirito komprenas la gravecon de siaj malbonfaroj nur post sia pento.

La pento kaŭzas ĉagreniĝon, konscieconriproĉon, doloran senton, kiu estas transiro de malbono al bono, de morala malsano al morala sano. Por eviti tion, la malicaj Spiritoj ribelas ja kontraŭ la konsciencovoĉo, simile al malsanuloj forpuŝantaj la medikamenton, kiu ilin resanigos. Kaj tiamaniere ili penas sin trompi, sin senkonsciigi kaj persisti en malbonfarado. Latour atingis tiun periodon, en kiu estingiĝas la harditeco, kaj li fine cedis. La konsciencoriproĉo eniras en lian koron, la pento lin sieĝas, kaj, komprenante la malbonon, kiun li faris, li vidas sian malnobliĝon kaj suferas pro tio. Jen kial li diras: "Mi suferas pro tiu pento." En la antaŭa enkarniĝo li certe estis pli malbona ol en la lasta, tial ke, se tiam li pentus,

kiel nun, lia sekvinta vivo estus pli bona. Liaj nunaj decidoj influos sur lian estontan surteran vivon; kaj lia lasta enkarniĝo, kvankam krima, markis al li stadion de progreso. Estas ja tre probable, ke, antaŭ ol komenci tiun enkarniĝon, li estis en la vaganteco unu el tiuj multaj ribelemaj Spiritoj obstinaj en malbono. Multaj personoj demandis min, kia estis la profito de tiu antaŭa ekzistado, se ĝin ni ne memoras nek havas ideon pri tio, kio ni estis kaj kion ni faris.

Tiu demando estas tute solvita, tial ke, se forviŝiĝis la malbono farita, ne restante eĉ postsigno de ĝi en nia koro, ni ankaŭ ne devas priokupiĝi pri ĝi.

Rilate la malvirtojn, je kiuj ni ne estas tute senigitaj, ni konas ilin per niaj nuntempaj tendencoj, kaj al ili ni devas turni nian tutan atenton. Sufiĉas, ke ni sciu, kiaj ni estas, kaj ne estas necese scii, kiaj ni estis.

Se ni konsideros, kiom malfacila estas dum la ekzistado la regeneriĝo de la Spirito, kiel ajn grandajn estas lia pento kaj la malaproboj, al kiuj estas submetita, ni devas laŭdi Dion pro tio, ke Li etendis tiun vualon sur la pasintecon. Ĝustatempe kondamnita aŭ absolvita, la antecedentoj de Latour farus lin ia forlasito de la socio.

Kiu akceptus lin en sian intimecon, malgraŭ lia pento? Sed la intencoj nun elmontrataj de li, kiel Spirito, donas al ni la esperon, ke en la venonta enkarniĝo li estos honesta kaj estimata homo. Ni supozu, ke oni scius, ke tiu honesta homo estas Latour, kaj la malaprobo lin persekutus plu. Tiu vualo sur la pasinteco malfermas al li la pordon al reboniĝo, ĉar li povas sen timo kaj senĝeno egaliĝi al la plej honestaj. Kiom da homoj dezirus povi forviŝi de la aliula memoro iajn okazaĵojn de sia propra vivo!

Kiu doktrino plej bone akordiĝas kun la boneco kaj justeco de Dio? Cetere tiu doktrino ne estas teorio, sed la rezultato de observoj. Certe la Spiritoj ne ĝin konceptis, sed ili vidis kaj observis la malsamajn situaciojn, en kiuj sin prezentis pluraj Spiritoj; ili penis ekspliki ilin, kaj el tiu eksplikado naskiĝis la doktrino.

Ili akceptis ĝin, kiel rezultaton de faktoj, kaj ankaŭ ĉar ĝi ŝajnis al ili pli racia ol ĉiuj aliaj ĝis hodiaŭ kreitaj, koncerne la estontecon de la animo.

Oni ne povas ne vidi en tiuj komunikaĵoj grandan moralan valoron. La Spirito povus esti helpata ĉe tiu rezonado kaj precipe ĉe la elekto de siaj esprimoj, de aliaj pli progresintaj, sed la fakto estas, ke ĉi tiuj influas nur sur la formon, kaj ne sur la esencon, kaj ili neniam igas la malsuperan Spiriton sin kontraŭdiri. De Latour ili povus poeziigi la pentoformon, sed ili ne povis devigi lin esprimi la penton kontraŭvole, ĉar la Spirito havas sian liberan volon.

En Latour ili duonvidis la ĝermon de liaj bonaj sentoj, kaj tial ili helpis al li esprimiĝi, tiamaniere kontribuante por ĝin elvolvi, kaj samtempe petegante kompaton por li.

Kio estas pli digna, pli moraliga, kapabla pli vive impresi, ol la sceno de tiu grava krimulo riproĉanta al si mem la malesperon kaj la konsciencoriproĉon? De tiu krimulo, kiu turmentita kaj persekutata de la senĉesa rigardo de siaj viktimoj, levas sian penson al Dio, petegante pri favorkoreco? Ĉu tio ne estas ja ia ekzemplo bonefika por la kulpuloj? Oni komprenas la naturon de tiuj angoroj; ili estas raciaj, teruraj, kvankam simplaj kaj senigitaj je fantasmagoriaj scenoj.

Eble oni povus esti surprizita de tiel granda transformiĝo en homo, kiel Latour... Sed kial li devus esti ne inklina al pento? Kial do ankaŭ li ne posedus sian
ne inklina al pento? Kial do ankaŭ li ne posedus sian
senteman kordon? Ĉu la pekinto estus eterne sin fordoninta al malbono? Ĉu ne venus al li, fine, ia momento, kiam la lumo fariĝus al li en la animo? Tiu horo alvenis al Latour; kaj tie estas precize la morala flanko de liaj komunikaĵoj; ĝi estas la kompreno, kiun li havas pri sia stato; ĝi estas liaj ĉagreniĝoj, liaj planoj de reboniĝo, kiuj faras tiujn mesaĝojn eminente instruaj. Kio eksterordinara estus, se Latour konfesus ian sinceran penton antaŭ la morto, se antaŭ la morto li dirus tion, kion li venis diri poste? Ĉu tiaj ekzemploj estas ne multenombraj? Ia reboniĝo antaŭ la morto ŝajnus malforteco en la

okuloj de la plimulto de liaj similuloj; sed tiu voĉo el transtombo estas certe elmontro de tio, kio ilin atendas. Li diras la absolutan veron, kiam li asertas, ke lia ekzemplo estas pli efika por krimuloj ol la perspektivo de la flamoj en la infero, kaj eĉ de la eŝafodo.

Kial do oni ne sugestas al ili tiujn sentojn en la prizono? Ĉi tiuj igus ilin pripensi; cetere ni jam havas kelkajn tiajn ekzemplojn. Sed kiel oni kredu al la vortoj de iu mortinto, se oni ĉiam kredas, ke post la morto ĉio finiĝas? Sed venos tago, kiam oni rekonos tiun veraĵon: *mortintoj povas veni instrui la vivantojn*.

Multajn aliajn gravajn instruojn oni povas tiri el tiuj komunikaĵoj; tiel la konfirmon de la principo de eterna justeco, laŭ kiu al kulpulo ne sufiĉas la pento, kiu estas la unua paŝo al la reboniĝo altiranta la favorkorecon de Dio. Pento estas indico pri pardono, faciligo de la suferoj, sed ĉar Dio ne absolvas senkondiĉe, estas necesa la kulpelpago, kaj precipe la riparo. Tiel komprenas Latour, kaj al tio li estas inklina. Se ni komparos ĉi tiun krimulon kun tiu el Castelnaudary, ni vidos ankoraŭ unu diferencon en la punoj. En tiu, la pento estis malfrua, kaj sekve la puno estis pli longa. Krome tiu puno estis preskaŭ materia, dum por Latour ĝi estis prefere morala, ĉar, kiel ni diris ĉi-supre, inter ili estis granda intelekta diferenco.

Al tiu alia trudiĝis io, kio povus impresi liajn malakrajn sensojn; sed la moralaj punoj ne estos malpli afliktantaj por ĉiu, kiu kapablas ilin kompreni. Tion ni povas konkludi el la krioj de Latour mem, kiuj ne estas de kolero, sed esprimo de konsciencoriproĉoj, de proksime akompanataj de pento kaj deziro pri reboniĝo, celante progreson.

## ĈAPITRO VII

## HARDIĜINTAJ SPIRITOJ

### Lapommeray

*Puno per lumo*

En unu el la seancoj de la Societo de Parizo, dum kiu oni diskutis la konfuziĝon, kiu ĝenerale akompanas la morton, iu Spirito, al kiu neniu faris aludon, kaj kiun oni tute ne intencis elvoki, spontanee manifestiĝis per la sekvanta komunikaĵo, kiun, kvankam ne subskribita, oni rekonis, kiel komunikaĵon de danĝera krimulo ĵus atingita de la homa justeco:

"Kion vi diras pri la konfuziĝo? Kial tiuj sensencaj vortoj? Vi estas revantoj kaj utopiistoj. Vi tute ne scias la aferon, pri kiu vi vin okupas. Ne, sinjoroj, la konfuziĝo ne ekzistas, krom en viaj cerboj. Mi ja estas mortinta, kiel eble tute mortinta kaj mi klare vidas en mi, ĉirkaŭ mi, ĉie!... La vivo estas malgaja komedio! Senprudentaj estas tiuj, kiuj retiriĝas de la scenejo antaŭ la malleviĝo de kurteno. La morto estas teruraĵo, aspiro aŭ puno, laŭ la malforteco aŭ forto de tiuj, kiuj ĝin timas, alfrontas aŭ petegas. Sed ĝi ankaŭ estas por ĉiuj amara mokado.

La lumo blindigas min kaj penetras, kiel akra sago, la subtilecon de mia memo. Oni punis min per mallumo de la karcero kaj ankoraŭ pensis puni min per mallumo de la tombo, kaj ankaŭ per tiu imagita de la katolikaj superstiĉoj...

Nu bone, kiuj suferas de mallumo, tiuj estas vi, dum mi ekzilita de la socio, lokas min sur superan planon. Mi volas esti, kia mi estas!... Kun firma penso, malŝatante la konsilojn, kiuj zumas ĉe miaj oreloj... Mi klare vidas.. Iu krimo! Ĝi estas ia vorto! Krimo ĉie ekzistas. Kiam faritaj de la amasoj, oni ĝin gloras, kaj kiam praktikita de individuo, oni konsideras ĝin abomenindaĵo. Absurdaĵo!

Mi ne deziras, ke vi min kompatu... mi petas nenion... mi luktos favore por mi mem sole, kontraŭ *tiu abomena lumo*.

*Tiu, kiu iam antaŭe estis viro.*”

Post ekzameno de ĉi tiu komunikaĵo en la sekvanta kunveno, oni rekonis pro la cinikeco mem de ĝia lingvaĵo ian profundan instruon, kiu evidentigas el la situacio de tiu malfeliĉulo ian novan kvaliton de kulpo, kiu atendas kulpulon. Efektive, dum kelkaj Spiritoj dronas en mallumo aŭ en absoluta izoliteco, aliaj dum multe da jaroj spertas la angorojn de la ekstrema horo, aŭ opinias, ke ili ankoraŭ estas enkarniĝintaj

Por ĉi tiuj la lumo brilas, kaj la Spirito plene ĝuas siajn kapablojn, sciante, ke li mortis, ne plendante, prefere rifuzante ĉian helpon kaj ankoraŭ alfrontante la diajn kaj homajn leĝojn. Ĉu ĉi tio signifas, ke ili evitis punon? Neniel; la justeco de Dio kompletiĝas sub ĉiuj formoj, kaj kio kaŭzas ĝojon al iuj, tio al aliaj estas turmento. La lumo turmentegas tiun Spiriton, kaj li mem tion asertas, malgraŭ sia fiero, kiam li diras, ke li luktos per si mem, sole, kontraŭ tiu abomena lumo. Kaj ankoraŭ per ĉi tiu frazo: — “la lumo blindigas min kaj penetras, kiel akra sago, en la subtilecon de mia memo.”

Ĉi tiuj vortoj — “subtileco de mia memo” — estas karakterizaj, kaj komprenigas, ke lia korpo estas fluideca kaj penetrebla por la lumo, kiun li ne povas eviti, lumo penetranta en li, kvazaŭ akra sago. Ĉi tiu Spirito ĉi tie staras inter tiuj malmolkoraj pro la longa tempo fluinta, antaŭ ol li montris penton, kio ankaŭ estas plia ekzemplo

por pruvi, ke la morala progreso ne ĉiam akompanas tiun intelektan. Sed iom post iom li sin korektis, kaj poste donis instruajn kaj prudentajn diktatojn. Nun li povas esti enklasigita inter la pentintajn Spiritojn. Invitite eldiri sian opinion pri tio, niaj spiritaj gvidantoj diktis la tri sekvantajn komunikaĵojn, cetere indajn je la plej serioza atento.

I

Laŭ la vidpunkto el la ekzistadoj, la Spiritoj en la erarvaganteco povas esti rigardataj kiel senokupaj aŭ atendantaj; sed eĉ tiel ili povas elaĉeti, ĉar fiero kaj la nevaria konstanteco de iliaj eraroj tiam ne senigas ilin je la senĉesa progreso. Pri tio vi havas teruran ekzemplon, kiu estas la lasta komunikaĵo de tiu senpenta krimulo, luktanta kontraŭ la dia justeco, kiu lin sieĝis post la justeco de la homoj.

En ĉi tiu okazo la elaĉeto aŭ preferinde la fatala sufero, kiu ilin premas, anstataŭ esti utila al ili, kompreniigante al ili la profundan signifon de iliaj punoj, ekscistas ilian ribelemon kaj ebligas la murmurojn, kiujn la Sankta Skribo laŭ sia poezieca elokvento nomas *grincado de dentoj* (*).

Ĉi tiu ekstreme simbola frazo estas signo de la malvigla suferanto, ribelema, izolita en sia propra doloro, sed ankoraŭ sufiĉe forta por rifuzi la veraĵon de la puno kaj de la rekompenco! La grandaj eraroj daŭras plu en la spirita mondo preskaŭ ĉiam, kiel la konsciencoj forte krimaj. Malgraŭ ĉio, lukton kaj defion kontraŭ la senfino oni povas kompari kun la blindeco de homo, kiu, vidinte la stelojn, komparus ilin kun arabeskoj sur plafono, kiel opiniis la galloj en la tempo de Aleksandro.

La morala senfino ekzistas! Mizera kaj malŝatinda estas tiu, kiu sub preteksto daŭrigi la luktojn kaj la malnoblajn altrudojn de la Tero, ne vidas pli da aferoj en alia mondo, ol en ĉi tiu.

---

(*) Mateo, 24:51. — **La Trad.**

Por tiu, blindeco, aliula malŝato, egoisma persona sento estas baroj al lia progreso. Homo! Estas vero, ke ekzistas kaŝita akordo inter la senmorteco de pura nomo transdonita al la Tero kaj la senmorteco efektive konservata de la Spiritoj dum ties sinsekvaj provoj.

*Lamennais*

II

Ĉu ĵeti homon en mallumon aŭ en ondojn de lumo ne donos la saman rezultaton? Kiel en la unua, tiel en la dua okazo, tiu homo tute ne vidas tion, kio lin ĉirkaŭas, kaj eĉ pli facile alkutimiĝos al la ombro, ol al la monotona elektra heleco, en kiu li povas esti droninta. La Spirito manifestiĝinta en la lasta seanco bone esprimas tiun veron, kiam li diras: "Ho! mi scios liberiĝi de tiu abomena lumo." Efektive ĝi estas des pli terura, horora, ju pli ĝi tute en lin penetras, kaj montras liajn plej kaŝitajn pensojn. Jen unu el la plej krudaj cirkonstancoj de tia spirita puno. La Spirito troviĝas, por tiel diri, en la domo el vitro petita de Sokrato. El tio venas ankoraŭ ia instruo, ĉar kio estus ĝojo kaj konsolo por saĝulo, tio transformiĝus en malhonoran kaj kontinuan punon por maliculo, por kriminto, por patromurdinto, turmentata en sia propra personeco. Miaj infanoj, prezentu al vi la suferon, la teruron de la hiprokrituloj, kiuj plezuris dum tuta nigra ekzistado, planante, kombinante la plej abomenindajn krimojn en sia animo, kiaj sovaĝaj bestoj rifuĝintaj en sia kaverno, kaj kiuj nun forpelitaj el tiu interna rifuĝejo ne povas eviti la esploron de siaj kunuloj...

Post senmaskigo de lia hipokriteco, jen ĉiuj liaj pensoj stampiĝas sur la frunto! Jes, krom tio nenia ripozo, nenia rifuĝejo por tiu timiga kriminto. Ĉiu malbona penso — kaj Dio scias ĉu lia animo ĝin esprimas — lin ekstere kaj interne perfidas, kvazaŭ pelata de nerezistebla elektra ŝoko. Li penas eviti la homamason kaj la abomeninda lumo lin konstante montras. Li volas fuĝi, kaj sin pafas for, senbride malespere kurante tra nemezureblaj spacoj, kaj

ĉie lumo, rigardoj lin observantaj. Kaj li kuras, kaj li ree flugas serĉe de ombro, de nokto, sed ombro kaj nokto ne plu ekzistas por li! Li krias pri la morto... Sed la morto estas nenio alia ol sensenca vorto. Kaj la malfeliĉulo ĉiam forkuras *sur vojo al la spirita frenezeco* — terura puno, horora doloro, luktante kontraŭ si por malembarasi je si mem, ĉar tiel estas la superega leĝo trans la Tero, t.e.: la kulpulo serĉas per si mem sian plej severegan punon.

Kiel longe daŭros tia stato? Ĝis la momento, kiam lia volo fine venkita sin klinos premita de la konscienco-riproĉo, kaj kiam lia fiera frunto humiliĝos antaŭ la justaj Spiritoj kaj antaŭ siaj viktimoj pacigitaj.

Rimarku la profundan logikecon de la neŝanĝemaj leĝoj; kun ĝi la Spirito realigos tion, kion li skribis en tiu fiera komunikaĵo tiel klara, tiel senkonsole egoisma, komunikaĵo, kiun li donis al vi en la pasinta vendredo, redaktante ĝin per movo de sia propra volo.

*Éraste*

III

La homa justeco ne distingas individuojn, rilate la estulojn, kiujn ĝi punas; taksante la krimon per la krimo mem, ĝi sendistinge vundas la malrespektantojn, kaj la sama puno atingas la viktimon, sen konsidero al sekso, kia ajn estas ĝia edukiteco. Diversmaniere kondutas la dia justeco, kies *punoj respondas al la progreso de la estuloj, al kiuj ili estas aplikataj*. Sameco de krimoj efektive ne respondas al individua egaleco, ĉar du kulpaj homoj laŭ la sama vidpunkto povas apartiĝi pro malsimileco de provoj, dronante unu en la intelekta maldiafaneco de la unuaj rondoj da inicantoj, dum la dua disponas, pro tio, ke li transpasis tiujn rondojn, la mensklarecon, kiu senigas la Spiriton je la konfuziĝo. En tiu okazo ne estas plu la mallumo, kiu lin punas, sed la heleco de la spirita lumo, kiu trapasas la surteran inteligenton kaj sentigas al li dolorojn de viva ulcero.

La elkarniĝintaj estuloj, kiuj ĉeestas la materian ludadon de siaj krimoj, suferas la ŝokon de la fizika elektro: ili suferas per la sentumoj. Kaj tiuj kun elmateriiĝinta Spirito suferas doloron multe pli intensa, kiu, por tiel diri, nuligas pro iliaj amaraĵoj la rememoron pri la faktoj, kaj ne la nocion pri ties respektivaj kaŭzoj..

Tiel la homo, malgraŭ sia krimeco, povas posedi internan progreson kaj leviĝi super la dika atmosfero de la malaltaj tavoloj, kvankam li sub la jugo de la pasioj kondutis kvazaŭ besto. Malesto de pripenso, malekvilibro inter la morala kaj intelekta progresoj kaŭzas tiujn oftajn anomaliojn en tempoj de materialismo kaj transiĝo. Sed la lumo torturanta la Spiriton estas precize la spirita radio pleniganta per heleco la kaŝitajn anguletojn de lia fiero kaj malkaŝanta ties vanecon ĉe lia fragmenta esto. Tie estas la unuaj simptomoj, la unuaj angoroj de la spirita agonio, kaj kiuj antaŭanoncas la disiĝon de la intelektaj kaj materiaj elementoj konsistigantaj la primitivan homan duecon, kaj kiuj devas malaperi en la grandiozan unuecon de la ellaborita esto.

*Jean Reynaud*

Krom tio, ke ĉi tiuj tri komunikaĵoj sin reciproke kompletigas, samtempe ricevitaj, ili prezentas la punon sub nova koncepto, cetere eminente filozofia kaj racia. Estas eble, ke la Spiritoj dezirantaj pritrakti la aferon laŭ iu ekzemplo, okazigis la manifestiĝon de la kulpulo.

Krom tiu vivanta sceno bazita sur unu fakto, jen por starigi komparon ankaŭ ĉi tiu, kiun predikisto el Montreuil-sur-Mer priskribis en 1864, okaze de karesmo, rilate la inferon:

“La fajro de la infero estas milionfoje pli intensa ol tiu sur la Tero, kaj se unu el la korpoj tie brulantaj, ne konsumiĝante, estus ĵetita sur nian planedon, ĝi bruligus ĝin de unu al alia ekstremaĵo! La infero estas vasta kaj malluma kaverno, plena de pikaj pintoj de lamenoj de

akrigitaj glavoj, de lamenoj de raziloj plej akrigitaj, sur kiujn estas ĵetataj la animoj de la kondamnitoj.”

(*Revue Spirite*, Julio, 1864, p. 199.)

## Angèle, sentaŭgulino sur la Tero

(Bordeaux, 1862)

Kun tiu nomo iu Spirito spontanee prezentiĝis al la mediumo.

1. — Ĉu vi pentas pri viaj eraroj? — R. Ne. — D. Kial do vi venas al mi? — R. Por sperto. — D. Ĉu vi ne estas feliĉa? — R. Ne. — D. Ĉu vi suferas? — R. Ne. — D. Kio do mankas al vi? — R. Paco.

Iaj Spiritoj konsideras sufero nur tion, kio rememorigas ilin pri iliaj fizikaj doloroj, sed konsentante, ke estas neeltenebla ilia morala stato.

2. — Kiel povas manki al vi paco en la spirita vivo? — R. Ia doloro el la pasinteco. — D. Doloro el pasinteco estas konsciencoriproĉo; ĉu do vi pentas? — R. Ne; mi spertas ja timon pri la estonteco. — D. Kion do vi timas? — R. La nekonataĵon.

3. — Ĉu vi sentas vin en taŭga humoro diri al mi tion, kion vi faris en via lasta enkarniĝo? Eble tio faciligos al mi helpi vin. — R. Ne.

4. — Kia estas via socia rango? — R. Mezbona. — D. Ĉu vi estis edzino? — R. Jes; mi estis edzino kaj patrino. — D. Ĉu vi zorge plenumis la devojn rilatajn al tiu duobla komisio? — R. Ne; mia edzo min tedis, kaj ankaŭ miaj infanoj.

5. — Kiel vi plenigis vian ekzistadon? — R. Per distro, estante fraŭlino, kaj per enuo, sinjorino. — D. Kiaj do estis viaj okupoj? — R. Nenia. — D. Kaj kiu mastrumadis vian hejmon? — R. La servistino.

6. — Ĉu ni eble atribuu al tiu inerteco la kaŭzon de viaj ĉagreniĝoj kaj timoj? — R. Eble vi pravas. Sed konsento ne sufiĉas. — D. Ĉu vi volas ripari la neutilecon de tiu ekzistado kaj helpi la suferantajn Spiritojn, kiuj nin ĉirkaŭas? — R. Kiel do? — D. Helpante ilin perfektigi sin per viaj konsiloj kaj per viaj preĝoj. — R. Mi ne scias preĝi. — D. Ni duope tion faros kaj vi lernos. Ĉu jes? — R. Ne. — D. Kial do? — R. Ĝi lacigas.

*Instruoj de la gvidanto de la mediumo*

Ni instruas vin, donante al vi praktikan konon pri la diversaj stadioj de sufero, kaj ankaŭ pri la situacio de la Spiritoj kondamnitaj al elaĉeto de iliaj eraroj mem.

Angèle estis unu el tiuj virinoj sen iniciativo, kies ekzistado estas tiel senutila al ŝi, kiel al la proksimulo. Amante nur la plezuron, nekapabla serĉi la studon kaj la plenumadon de la hejmaj kaj sociaj devoj, solaj kontentigoj de la koro, kiuj faras la ĉarmon de la vivo, ĉar ili estas de ĉiuj tempoj, ŝi uzis sian junecon nur por frivolaj distroj; kaj kiam oni altrudis al ŝi pli seriozajn devojn, tiam *la mondo jam fariĝis ia malpleno, ĉar ankaŭ malplena estis ŝia koro*. Sen gravaj eraroj kaj ankaŭ sen meritoj ŝi malfeliĉigis sian edzon, kompromitante pro sia neglektemo kaj malzorgo la estontecon de siaj propraj infanoj.

Ŝi koruptis iliajn korojn kaj sentojn, jen per sia ekzemplo, jen per forlaso, en kiu ŝi ilin restigis, transdonitajn al servistoj, kiujn ŝi tute ne penis elekti. Ŝia ekzistado estis malprofita, kaj ĝuste tial kulpa, ĉar *malbono devenas de neglektemo de bono*. Bone certiĝu, ke ne sufiĉas sin deteni de eraro: estas necese, praktiki tiujn virtojn al ĝi kontraŭaj.

Studu la instruojn de la Sinjoro; ilin primeditu kaj konvinkiĝu, ke, se ili haltigas vin sur la malbona vojo, ili ankaŭ trudas al vi malantaŭen veni, ke vi iru la kontraŭan vojon kondukantan al bono. Malbono estas la malo de bono; kiu do volos eviti la unuan, tiu devos sekvi la duan, sen kiu la vivo fariĝus nula, ĝiaj verkoj mortaj,

kaj Dio, nia patro, ne estus tiu Dio de la mortintoj, sed de la vivantoj.

— D. Ĉu estas al mi permesate scii, kiel estis la antaŭlasta ekzistado de Angèle? La lasta devus esti sekvo de ĝi, t.e. de la antaŭlasta.

— R. Ŝi vivis en beata senfareco, en la senutileco de la monaĥa vivo. Laŭguste mallaborema kaj egoisma ŝi volis sperti la hejman vivon, sed ŝia Spirito malmulte progresis.

Ŝi ĉiam forpuŝis la internan voĉon, kiu montradis al ŝi la danĝeron, kaj, ĉar ŝia inklino estis milda, ŝi preferis sin doni al ĝi, ol fari klopodon por haltigi ĝin en la komenco. Hodiaŭ ŝi ankoraŭ komprenas la danĝeron de tiu neŭtraleco, sed ŝi ne sentas sin kun forto por provi la minimuman klopodon. Preĝu por ŝi, penu veki ŝin kaj fari, ke ŝiaj okuloj malfermiĝu por la lumo. Tio estas devo, kaj nenian devon oni malestimas.

La homo estas kreita por aktiveco; aktiveco de la Spirito karakterizas lian esencon mem; kaj tiu de la korpo estas bezono.

Plenumu do la postulojn de la ekzistado, kiel Spirito sindediĉinta al la eterna paco. Servante la Spiriton, la korpo estas nenio alia ol maŝino submetita al la inteligento: laboru, kulturu do vian inteligenton, ke estu donata sana impulso al la instrumento, kiu devas ĝin helpi dum la plenumado de ĝia misio. Ne donu al ĝi haltojn nek ripozon, rememorante, ke tiu paco, kiun vi sopiras, al vi estos donata nur per laboro. Tiel, ju pli vi prokrastos ĉi tiun, des pli daŭros al vi la atendangoro.

Laboru, senĉese laboru; senescepte plenumu ĉiujn viajn devojn, ilin plenumante zorge, kuraĝe, obstine.

Fido vin konsolos. Kiu konscie plenumas la plej sendankan kaj humilan laboron por via socio, tiu estas pli valora en la okuloj de la Ĉiopova ol tiu, kiu, altrudante tiun laboron al aliaj, forlasas la sian.

Ĉio estas ŝtupo kondukanta al ĉielo: ne rompu la ŝtonplaton sub viaj piedoj kaj kalkulu je la helpo de amikoj eletendantaj al vi la manon, subtenantoj de tiuj ĉerpontaj fortojn ĉe la kredo je la Sinjoro.

*Monod*

## Unu tedita Spirito

(Bordeaux, 1862)

Ĉi tiu Spirito sin spontanee prezentas al la mediumo, petante pri preĝoj.

1. — Kio movas vin peti pri preĝoj? — R. Mi estas laca vagi sencele. — D. Ĉu vi longe estas en tia situacio? — R. De ĉirkaŭ cent okdek jaroj. — D. Kion vi faris sur la Tero? — R. Nenion bonan.

2. — Kia estas via pozicio inter la Spiritoj? — R. Mi estas inter enuantaj. — D. Sed ili ne formas kategorion... — R. Inter ni ĉio formas kategorion. Ĉiu sensacio rekontas siajn similajn, aŭ siajn simpatiojn, kiuj kolektiĝas.

3. — Kial vi tiel longe restis senprogresa, ne estante kondamnita al sufero? — R. Tial, ke mi estis destinita al enuo, kiu inter ni estas sufero. Ĉio, kio ne estas ĝojo, estas doloro. — D. Ĉu vi estas perforte destinita al vaganteco kontraŭ via volo? — R. Tio estas subtilega afero por via materia inteligento. — D. Penante klarigi al ni tiujn aferojn, eble vi komencos bonfari al vi mem... — R. Pro manko de vortoj por komparo mi ĝin ne povas fari. Senprofita vivo, estingiĝante, postlasas al la elkarniĝinta Spirito tion saman, kion fajro povas postlasi al papero, kiam tiu konsumas ĉi tiun — fajrerojn, kies ankoraŭ densa cindro rememorigas nin pri sia origino, pri la kaŭzo de sia naskiĝo, aŭ, se vi ĝin volas, pri la detruo de la

papero. Tiuj fajreroj estas rememoraĵo pri la surteraj ligiloj katenantaj la Spiriton, ĝis kiam ĉi tiu disblovu la cindron de sia korpo. Tiam, kaj nur tiam li, subtilega esenco, havos konon pri si mem, dezirante progresi.

4. — Kia eble estis la kaŭzo de tiu ĉagreniĝo, pri kiu vi plendas? — R. Sekvoj de la ekzistado. Enuo estas frukto de senokupeco; ĉar mi ne sciis uzi longan tempon de mia enkarniĝo, la sekvoj okazis en ĉi tiu mondo.

5. — Ĉu la Spiritoj, kiuj, same kiel vi, poseditaj de enuo, ne povas liberiĝi de tia situacio, se nur ili tion deziros? — R. Ne, ne ĉiam, ĉar enuo paralizas ilian volon, kaj ĉar ili estis senutilaj, sen iniciativo, ili tiel trovas inter si nenian helpon. Forlasitaj de si mem, ili en tiu stato restas, ĝis kiam laceco, rezultanta de tia senokupeco, pelu ilin al kontraŭa direkto, momento, kiam ilia malpli granda volo renkontos apogon kaj bonajn avertojn, kaj favoros iliajn klopodon kaj konstantecon.

6. — Ĉu vi povas diri al mi ion pri via surtera ekzistado? — R. Ho! Vi devas kompreni, ke estas al mi konsentite diri malmulton, ĉar enuo, nuleco kaj senokupeco fontas el mallaboremo, kiu siavice kaŭzas nescion.

7. — Ĉu vi ne profitis viajn antaŭajn ekzistadojn? — R. Mi profitis ĉiujn, sed malmulte, ĉar ili estis respeguloj unu de la alia. Progreso ĉiam ekzistas, sed tiel nesentebla, ke ĝi fariĝas al ni netaksebla.

8. — Ĉu plaĉas al vi ree doni viajn komunikaĵojn, dum vi atendas novan enkarniĝon? — R. Elvoku min por min revenigi, ĉar per tio vi bonfaros al mi.

9. — Ĉu vi povas diri al mi, kial tiel ofte varias via skribaĵo? — R. Ĉar vi multe demandas, kio cetere min lacigas, kiam mi bezonas helpon.

*La gvidanto de la mediumo*. Kio lin lacigas, tio estas la intelekta laboro, deviganta nin helpi lin doni respondon al viaj demandoj. Tio estas senokupulo en la spirita mondo, same kiel li estis sur la planedo. Ni kondukis lin al vi, ke vi provu lin eltiri el tiu apatio, el tiu enuo, kiu estas efektiva sufero, iafoje pli dolora, ol la akraj suferoj, ĉar ĝi povas senfine daŭri.

Prezentu al vi la senfinan perspektivon de ia senfina enuo. La Spiritoj el tiu kategorio plej ofte *serĉas la surterajn vivojn*, nur kiel tempopasigilon kaj por interrompi la monotonion de sia spirita vivo. Jen kial ili ofte tien venas sen iaj decidoj por la bono, devigite sinsekve rekomenci, ĝis kiam ili atingos komprenon pri la efektiva progreso.

## La reĝino de Oude

(Mortinta en Francujo, en 1858)

1. — Kiaj estis viaj sensacoj, kiam vi forlasis la surteran mondon? — R. Ankoraŭ menskonfuzita, estas al mi neeble ilin klarigi. — D. Ĉu vi estas feliĉa? — R. Mi resopiras la vivon... mi ne scias... mi suferas akran doloron, de kiu la vivo mim liberigus... mi volus, ke mia korpo leviĝus el la tombo...

2. — Ĉu vi bedaŭras, ke vi estis entombigita inter kristanoj, for de via lando? — R. Jes, la hinda grundo malpli pezus sur mia korpo. — D. Kion vi pensas pri la funebraj honoroj al viaj restaĵoj? — R. Ili ne estis tiel grandaj, ĉar mi estis reĝino kaj ne ĉiuj riverencis antaŭ mi... Lasu min... vi devigas min paroli, kiam mi volas, ke vi ne sciu tion, kio mi nun estas... Mi asertas, ke mi estis reĝino...

3. — Ni respektas vian hierarkion kaj ni nur insistas, ke vi respondu, ĉar ni celas nin instrui. Ĉu vi opinias, ke

via filo estonte reakiros la Ŝtatojn de via patro? — R. Certe mia sango regos, ĉar ĝi indas tion. — D. Ĉu vi donos al la regado de via filo la saman gravecon, kiun vi donis al la via, kiam vi estis enkarniĝinta? — R. Mia sango ne povas miksiĝi kun tiu de la popolo.

4. — Oni ne povas rimarki en via konforma mort-atesto la nomon de via naskloko; ĉu vi nun povas eldiri ĝin al ni? — R. Mi devenas de la plej nobela sango en Hundujo. Mi pensas, ke mi naskiĝis en Delhio.

5. — Vivinte en la briloj de lukso, ĉirkaŭite de honoroj, kion vi nun pensas pri ĉio tio? — R. Ke mi rajtas tion. — D. Ĉu via surtera hierarkio kunhelpis, ke vi havus alian pli altan en la mondo, en kiu vi nun troviĝas? — R. Mi estas plu reĝino... oni venigu al mi sklavinojn por min servi!... Sed... mi ne scias... ŝajnas al mi, ke oni malmulte zorgas pri mia persono ĉi tie... kaj tamen... mi estas ĉiam sama.

6. — Ĉu vi praktikis Islamismon aŭ la hindan religion? — R. Islamismon; sed mi estis tro potenca, ke mi okupiĝus pri Dio. — D. Rilate la homan feliĉon, kiajn diferencojn vi vidas inter via religio kaj Kristanismo? — R. Kristanismo estas absurdaĵo; ĝi diras, ke ni ĉiuj estas fratoj. — D. Kia estas via opinio pri Mahometo? — R. Li ne estis filo de reĝo. — D. Ĉu vi kredas, ke li havis ian dian mision? — R. Tio ne gravas! — D. Kia estas via opinio pri la Kristo? — R. La filo de la ĉarpentisto ne indas okupi miajn pensojn.

7. — Kion vi pensas pri tiu kutimo, laŭ kiu la islamaninoj evitas la virajn rigardojn? — R. Mi pensas, ke la virinoj naskiĝis por superregi: mi estis virino. — D. Ĉu vi envias la liberecon, kiun la eŭropaninoj ĝuas? — R. Ĉu gravus al mi tia libereco? Ĉu oni eble ilin servas, genuiĝante?

8. — Ĉu vi rememoras enkarniĝojn antaŭajn al tiu, kiun vi ĵus postlasis? — R. Eble mi ĉiam estis reĝino.

9. — Kial vi tiel rapide kontentigis nian alvokon? — R. Mi ne volis, sed oni devigis min veni. Ĉu vi eble opinias, ke vi indus mian respondon? Kiu estas vi apud mi? — D. Kaj kiu vin devigis veni? — R. Mi mem ne scias... ĉar ekzistas neniu pli potenca ol mi.

10. — Kun kia rango vi prezentas vin ĉi tie? — R. Ĉiam kun tiu de reĝino... kaj ĉu vi pensas, ke mi ne plu estas tio? Vi estas malmulte respektema... sciu, ke ne tiamaniere oni parolas al reĝinoj.

11. — Se oni ĝin permesos al ni, ĉu ni vidus vin kun ornamaĵoj kaj juveloj? — R. Certe... — D. Kiel ni klarigu la fakton, ke, senigite de ĉio tio, via Spirito konservas tiujn objektojn precipe la galanteriojn? — R. Ili ja ne depreniĝas. Mi estas tiel bela, kiel antaŭe, kaj mi ne konas vian penson pri mi! Estas vero, ke vi neniam vidis min.

12. — Kian impreson kaŭzas al vi via restado inter ni? — R. Se mi povus ĝin eviti... Oni min tiel malmulte ĝentile akceptas...

*Sankta Ludoviko*. — Lasu ŝin, konfuzitan kompatindulinon. Kompatu sin pro ŝia blindeco kaj volu Dio, ke tiu ekzemplo estu instruo al vi. Vi ne scias, kiom ŝi suferas de sia fiero.

Elvokinte tiun altrangulinon defalintan en la tombon, mi ne atendis profundajn respondojn, pro la grado da virina edukiteco en tiu lando; sed ni pensis, ke ni trovos en tiu Spirito, ni ne diru filozofion, sed almenaŭ ian informon pli proksiman al la realaĵo, kaj ideojn pli prudentajn rilate la surterajn vantecojn kaj luksaĵojn. Kontraŭe ni vidis, ke la Spirito konservas ĉiujn siajn surterajn antaŭjuĝojn kun ties tuta forto; ke la fiero neniom perdas siajn iluziojn; ke li luktas kontraŭ sia malforteco mem, kaj ke fine li multe devos suferi pro sia senpotenco.

## Xumène

(Bordeaux, 1862)

Kun ĉi tiu nomo unu Spirito memvole prezentis sin al la mediumo, alkutimiĝinta al ĉi tiu speco de manifestiĝoj, ĉar laŭŝajne ties misio estas helpi la malsuperajn Spiritojn, kiujn lia spirita gvidanto kondukas al li, por la duobla celo de lia propra instruo kaj de ilia progreso.

— Kiu nome vi estas? Ĉu tiu nomo estas de viro aŭ virino? — R. De viro, sed kiel eble plej malfeliĉa. Mi spertas ĉiujn turmentojn de la infero.

— Se la infero ne ekzistas, kiel vi povas sperti ĝiajn torturojn? — R. Vana demando. — D. Mi komprenas, sed aliaj homoj bezonas klarigojn... — R. Tio min malmulte zorgigas.

— Ĉu egoismo ne estas unu el la kaŭzoj de via sufero? — R. Eble.

— Se vi deziras esti kvietigita, de nun rezignu viajn malbonajn inklinojn... — R. Ne zorgu pri tio, kio ne koncernas vin; komence preĝu por mi, kiel vi faras por aliaj, kaj poste ni konsiliĝos.

— Se vi ne helpos min per via pento, preĝo eble havos malmulte da valoro. — R. Sed konversaciante, anstataŭ preĝi, vi malpli helpos min.

— Ĉu vi do deziras progresi? — R. Eble... mi ne scias. Ni provu tion esencan, t.e. ni vidu ĉu la preĝo kvietigos viajn suferojn.

— Nu, ni unuigu niajn pensojn kun la firma volo sukcesi kvietigi vin. — R. Konsentinte.

— (Post la preĝo.) Ĉu vi estas kontenta? — R. Ne tiom, kiom mi deziras.

— Sed medikamento uzata la unuan fojon ne povas tuj resanigi malnovan malsanon... — R. Estas eble...

— Ĉu vi volas reveni? — R. Se oni vokos min...

*La gvidanto de la mediumo*. – Karulino, tiu malmolkora Spirito donos al vi multe da laboro, sed la pli granda merito venas ne de la savo de la ne-perdiĝintoj. Estu kuraĝa, obstina kaj vi fine triumfos. Ne ekzistas kulpintoj, kiujn oni ne povas regeneri per persvado kaj ekzemplado, ĉar la Spiritoj kiel eble plej malicaj fine korektas sin kun la tempo. La fakto, ke multfoje estas neeble ilin tuj regeneri ne ŝanĝas tiajn klopodojn en senutilecon. Eĉ kontraŭvole la ideoj sugestataj al tiaj Spiritoj igas nin pripensi. Ili estas kvazaŭ semoj, kiuj frue aŭ malfrue devas frukti. Oni ne rompas ŝtonon per la unua martelbato.

Kion mi diras al vi, tion vi povas apliki al la enkarniĝintoj kaj vi devas kompreni, kial Spiritismo tuj ne faras homojn perfektajn, eĉ inter adeptoj plej kredantaj.

Kredo estas la unua paŝo; poste venos fido kaj siavice transformiĝo; sed krom tio multaj homoj nur renobliĝas en la spirita mondo.

Inter la malmolkoraj Spiritoj ekzistas ne nur perversaj kaj malicaj. Granda estas la nombro de tiuj, kiuj, ne farante malbonon, haltas pro fiero, indiferenteco aŭ apatio. Ĉi tiuj eĉ tiel ne fariĝas malpli malfeliĉaj, ĉar ju pli la inerteco ilin afliktas, des pli ili vidas sin senigitaj je la mondumaj kompensoj.

Certe la perspektivo pri senfino fariĝas al ili netolerebla, sed ili ne havas forton nek volon por eviti tiun situacion. Ni aludas tiujn individuojn, kiuj travivas senokupan ekzistadon, neutilan al si, kiel al sia proksimulo, multfoje metante finon al sia vivo, per memmortigo, sen seriozaj motivoj, pro tedo de la vivo.

Tiaj Spiritoj entute estas malpli tuj regenereblaj ol tiuj efektive malicaj, ĉar ĉi tiuj almenaŭ disponas energi-

on, kaj admonite ili sin dediĉas al bono, kun la sama ardo, kiun al ili inspiris malbono.

La aliaj bezonas multe da enkarniĝoj por progresi, kaj tiel iom post iom lacigite de enuo, ili serĉas por sin distri ian ajn okupon, kiu poste transformiĝos en necesaĵon.

## ĈAPITRO VIII

## SURTERAJ ELAĈETOJ

### Marcel, la infano en la ĉambro n-ro 4

En provinca hospitalo estis iu infano en la aĝo de 8-10 jaroj, en stato, kiu ne estas facile priskribebla. Oni nomis lin per la n-ro 4. Tute tordiĝinta, ĉu pro lia kripleco, ĉu pro la malsano, liaj kruroj sin tordis, tuŝante lian kolon, kaj tia estis ilia malgraseco, ke al ili restis nur haŭto sur ostoj. La korpo, ia ulcero; liaj suferoj estis kruelegaj. Li devenis de juda familio. La malsano superregis tiun organismon jam de 8 jaroj, kaj tamen la malsanulo montradis rimarkindan inteligentecon, krom edifaj naiveco, pacienco kaj rezignacio. La doktoro, kiu lin kuracis, plena de kompato por tiu estulo iom forlasita, tial ke liaj parencoj malofte vizitadis lin, ekinteresiĝis pri li. Kaj li trovis ion ĉarman en lia intelekta frumatureco. Tiamaniere li ne nur lin afable traktadis, sed ankaŭ legadis al li, kiam liaj okupoj tion permesis, mirante pri lia kriterio ĉe la taksado de aferoj, kiuj laŭ lia opinio estis super la komprenkapablo propra al lia aĝo. Unu tagon la infano diris al li: “Doktoro, bonvolu doni al mi ankoraŭfoje tiujn pilolojn lastatempe preskribitajn.” Kial do? — demandis la kuracisto — mi jam donis al vi sufiĉan kvanton, kaj plia dozo povos malutili al vi...

— “Mi ja tiom suferas, ke tre malofte mi povas preĝi al Dio, por ke Li donu fortojn al mi, ĉar mi ne volas

ĝeni la ceterajn malsanulojn. Tiuj piloloj min dormigas, kaj almenaŭ dum mia dormo mi ĝenas neniun.”

Tiuj vortoj sufiĉas por montri la noblecon de tiu animo enfermita en kripla korpo. Kie tiu infano ĉerpis tiajn sentojn? Certe ne en la medio, en kiu li edukiĝis; krom tio, en aĝo, en kiu li komencis suferi, li eĉ ne posedis rezonkapablon.

Tiuj sentoj estis denaskaj al li; sed kial do li sin vidis kondamnita al sufero, se ni akceptas, ke Dio samtempe kreis unu animon tiel noblan kaj tiun mizeran korpon — instrumento de torturoj?

Estas necese nei la bonecon de Dio aŭ akcepti la antaŭecon de kaŭzo, t.e. la antaŭekzistadon de la animo kaj la plurecon de la ekzistadoj.

Tiu infano mortis, kaj liaj lastaj pensoj estis pri Dio kaj pri la karitatema kuracisto, kiu lin kompatis. Post kelka tempo lia Spirito estis elvokita ĉe la Societo de Parizo, ĉe kiu li donis la jenan komunikaĵon (1863):

“Ĉe via alvoko mi venis fari, ke mia voĉo etendiĝu trans ĉi tiu rondo, tuŝante ĉiujn korojn. Dio volu, ke ĝia eĥo aŭdiĝu en la soleco, memorigante al vi, ke la surteraj afliktiĝoj havas, kiel premisojn, la ĉielajn ĝojon; ke la turmentego estas nenio alia ol la ŝelo de plezuriga frukto, donanta kuraĝon kaj rezignacion.

Tiu voĉo diros al vi, ke sur la litaĉo de mizero kuŝas la senditoj de la Sinjoro, kies misio konsistas en la elmontro, ke ne estas nevenkebla doloro, kondiĉe ke ni havu helpon de la Ĉiopova kaj de liaj bonaj Spiritoj. Tiu voĉo aŭdigos al vi lamentojn miksitajn kun preĝoj, por ke vi komprenu ilian kompatoplenan harmonion tre malsaman ol tiu de horoj de lamentoj miksitaj kun blasfemoj.

Unu el viaj bonaj Spiritoj, granda apostolo de Spiritismo, cedis al mi sian lokon en ĉi vespero (*). Miavice,

(*) Sankta Aŭgusteno, per la mediumo, kun kiu li ordinare komunikiĝas ĉe la Societo.

mi devas diri ion pri la progreso de via Doktrino, kiu devas helpi en sia misio al tiuj, kiuj inter vi enkarniĝas por suferi. Spiritismo estos la provilo; la suferantoj havigos al si la ekzemplon kaj la parolon, kaj tiam la blasfemoj ŝanĝiĝos en kriojn kaj larmojn de ĝojo.”

— D. Laŭ viaj asertoj, ŝajnas, ke viaj suferoj ne estis elpago de pasintaj kulpoj...

— R. Ili ne estas rekta kulpelpago, sed mi certigas al vi, ke ĉia sufero havas justan kaŭzon. Tiu, kiun vi konis tiel mizera, jam estis bela, granda, riĉa kaj flatata. Mi havis flatantojn kaj korteganojn, mi estis frivola kaj orgojla. Antaŭe mi estis tre kulpa; mi forĵuris Dion, malutilis al mia similulo, sed mi kruele elpagis, antaŭe en la Spirita mondo, kaj poste sur la Tero. Miaj suferoj dum nur kelkaj jaroj, en ĉi tiu lasta enkarniĝo, estis eltenataj de mi antaŭe, dum tuta ekzistado, kiu atingis ekstreman maljunaĝon. Per mia pento mi ree havigis al mi la favoron de la Sinjoro, kiu konfidis al mi plurajn misiojn, inkluzive la lastan, kiun vi bone konas. Mi mem ĝin petegis por fini mian elpuriĝon.

Adiaŭ, amikoj; mi revenos kelkajn fojojn. Mia misio estas konsoli, kaj ne instrui. Sed troviĝas ĉi tie multaj personoj, kies vundoj restas kaŝitaj, kaj ili sentos plezuron ĉe mia ĉeesto.

*Marcel*

*Instrukcioj de la gvidanto de la mediumo*

Kompatinda etuleto suferanta, konsumiĝanta, ulcera kaj kripla! Kiom da ĝemoj li aŭdigis en tiu azilo de mizero kaj larmoj! Kaj kiel rezignacia li estis... kiel lia animo jam tiam duonvidis la finon de la suferoj, malgraŭ sia junaĝo! En la transtombo li jam antaŭsentis la rekompencon pro tiom da sufokitaj ĝemoj, kaj li esperis! Kaj kiom multe li ankaŭ preĝis por tiuj, kiuj ne estis rezignaciaj en la suferado, kaj por tiuj, kiuj ŝanĝis preĝojn por blasfemoj!

Al li estis malrapida la agonio, sed la horo de la morto ne estis terura por li; certe la konvulsiaj membroj tordiĝis, donante al la ĉeestantoj la scenon de kripla korpo ribelanta kontraŭ la sorto, laŭ tiu leĝo de la karno, kiu volas vivi ĉiakoste; sed bona anĝelo ŝvebis super lia mortlito kaj cikatris al li la koron. Poste tiu anĝelo forportis per siaj blankaj flugiloj tiun tiel belan animon eskapantan el tiel terurega korpo, kaj jen estas la vortoj de ĝi eldiritaj: "Gloron al Vi, Sinjoro, mia Dio!" Kaj la animo, feliĉa, supreniris al la Ĉiopova, kaj ekkriis: "Jen mi estas ĉi tie, Sinjoro; Vi donis al mi la mision lerni suferi... ĉu mi elportis ja la provon?"

Hodiaŭ la Spirito de la kompatinda infano kreskas, ŝvebas en la Spaco, iras de la malforta ĝis la humila, kaj al ĉiuj li diras: Esperu kaj kuraĝu. Libera de ĉiuj materiaj malpuraĵoj, jen li estas tie, apud vi, parolante al vi, dirante al vi, ne plu kun tiu febla kaj lamenta voĉo, sed firme: "Ĉiuj, kiuj min observis, vidis, ke la infano ne murmuris; el tiu ekzemplo ili ĉerpis la faciligon por siaj malbonoj, kaj iliaj koroj fortikiĝis ĉe la milda fido al Dio, ĉar alia ne estis la celo de mia mallonga restado sur la Tero."

*Sankta Aŭgusteno*

## Szymel Slizgol

Ĉi tiu estis nenio alia ol malriĉa judo el Vilna, mortinta en Majo 1865. Dum 30 jaroj li almozpetis kun pleto en la manoj. En la tuta urbo estis tre konata tiu voĉo, kiu diradis: "Memoru pri la malriĉuloj, pri la vidvinoj kaj pri la orfoj!" Per tiu longa pilgrimado Slizgol kolektis 90 000 rublojn, sed ne konservis por si eĉ unu kopekon. Li kvietigis la malsanulojn, kiujn li mem kuracadis; pagadis la instruadon al malriĉaj infanoj; disdonadis al la necesbezonaj la manĝaĵon, kiun oni donadis al li.

Li destinis la nokton por la preparado de flartabako, kiun li vendadis por sin provizi per necesaĵoj, kaj tio, kio

restadis al li, estis por la malriĉuloj. En la mondo li estis sola, kaj tamen ĉeestis lian entombigon la plimulto de la loĝantaro de Vilna, kies magazenoj fermis siajn pordojn.

*Societo de Parizo, la 15-an de Junio 1865*

*Elvoko.* — Tro feliĉa, kaj fine atinginte la celon, kiun mi plej ambiciis, kaj por kiu mi tre kare pagis, jen mi ĉi tie, inter vi, ekde la vespero. Dankon, pro la intereso, kiun vekis en vi la Spirito de la kompatinda almozulo, kiu ĝoje penos respondi viajn demandojn.

— D. Unu letero el Vilna sciigis min pri la plej rimarkindaj detaloj de via ekzistado, kaj el la simpatio, kiun tiuj detaloj inspiras al ni, naskiĝis nia deziro komunikiĝi kun vi. Ni estas dankaj pro via ĉeesto, kaj, ĉar vi volas respondi al ni, ni komencos, certigante al vi, ke ni estos tre feliĉaj, se, por nia instruo, ni povos koni vian spiritan situacion kaj ankaŭ la kaŭzojn, kiuj difinis la specon de la vivo, kiun vi havis en la lasta enkarniĝo.

— R. Antaŭe permesu al mia Spirito konsciiĝinta pri sia vera pozicio, la favoron doni al vi ian opinion pri iu penso, kiu venis al vi en la menson, pri mia personeco. Kaj anticipe mi petas vian konsilon, se tiu mia opinio estos falsa.

Al vi ŝajnas strange, ke la publikaj manifestiĝoj fariĝis tiel gravaj por omaĝi la memoron pri la sensignifa homo, kiu per sia karitatemo scipovis altiri tian simpation. Mi ne aludas al vi, kara majstro, nek al vi, estimata mediumo, nek al la ceteraj veraj kaj sinceraj spiritistoj; mi parolas ja al la personoj indiferentaj al la kredo, ĉar en tio estas nenio eksterordinara. La morala influo de la praktiko de bono, sur la homaron, estas tiel granda, ke, kiel ajn materia ĉi tiu estas, ĝi ĉiam kliniĝas al bono, ĉi tiun respektas, malgraŭ sia inklino por malbono.

Ni konsideru nun viajn demandojn, kiuj ne estas diktitaj de scivolemo, sed formulitaj nur por doni pli

grandan amplekson al via instruiĝo. Ĉar mi disponas je libereco, mi do diros al vi, kiel eble plej koncize, kiuj estas la kaŭzoj, kiuj kreis mian lastan ekzistadon.

Antaŭ pluraj jarcentoj mi vivis kiel reĝo, aŭ almenaŭ kiel suverena princo. En la sfero de mia relative limigita povo, kompare kun la nuntempaj Ŝtatoj, mi tamen estis absoluta sinjoro de miaj vasaloj, tiel same, kiel de iliaj destinoj, kaj mi ilin regadis tiranece, aŭ prefere — ni uzu la ĝustan terminon — kiel turmentanto.

Ĉar mi estis dotita per karaktero impetega, perforta, krom avara kaj volupta, vi povas taksi, kia devus esti la sorto de la kompatindaj estuloj submetitaj al mia regado. Krom misuzi la povon por subpremi la malfortulon, mi metis oficojn, laborojn kaj dolorojn je servo de miaj propraj pasioj. Tiel mi postulis dekonaĵon el la produkto de almozo, kaj neniu povus amasigi monon, antaŭ ol mi prenis de li grandan parton el tiuj restaĵoj, kiujn la homa kompatemo lasis gliti en la almozosakon de mizero. Kaj ankoraŭ pli: por ke ne malpliiĝis la nombro da almozuloj inter miaj vasaloj, mi malpermesis al la malfeliĉuloj doni al amikoj, parencoj kaj necesbezonaj servistoj la sensignifan parton de tio, kio ankoraŭ restadis al ili. Unuvorte mi estis ja ĉio, kion plej kruelan oni povas imagi, rilate la aliulajn suferon kaj mizeron. Meze en la teruregaj suferoj, mi ja perdis tion, kion vi nomas vivo, tiel ke mia morto estis montrata, kiel terura ekzemplo al ĉiuj, kiuj pensadis, kiel mi, kvankam en malpli granda skalo.

Kiel Spirito, mi restis dum tri jarcentoj kaj duono vaganta en la Spaco, kaj kiam, en la fino de tiu tempo, mi komprenis, ke la pravo de ekzisto de la reenkarniĝo estas tute alia ol tiu sekvata de miaj krudaj sensoj, mi havigis al mi, koste de preĝoj, rezignacio kaj ĉagrenoj, la permeson materie elporti la samajn suferojn, kiujn mi trudis al aliaj, kaj kiuj estis pli profunde senteblaj ol tiuj de mi kaŭzitaj. Per tiu konsento, Dio permesis, ke mi pliigis la fizikajn kaj moralajn suferojn per mia libera volo. Dank' al la helpo de la bonaj Spiritoj, mi persistis en la praktiko de la bono, kaj mi estas danka pro tio, ke ili ne lasis min perei sub la tasko, kiun mi prenis sur

min. Fine mi plenumis ekzistadon de abnegacio kaj karitato, kiu per si elpagis la kulpojn de alia vivo, kruela kaj maljusta. Naskita de malriĉaj gepatroj kaj malfrue fariĝinta orfo, mi lernis perlabori la panon en aĝo, en kiu multaj pensas, ke rezonado ankoraŭ ne ekzistas.

Mi vivis sola, sen amo, sen korinklinoj, kaj ekde la komenco mi elportis la kruelaĵojn, kiujn mi trudis al aliaj.

Oni diras, ke ĉiuj monsumoj de mi almozpetitaj estis destinataj al la konsolado de miaj similuloj: Ĝi estas sendiskuta fakto, al kiu mi, sen fiero kaj emfazo, devas aldoni, ke tre ofte, koste de seniĝoj relative pezaj, mi pliigadis la bonon, kiun mi faris al la publika karitato. Mi elkarniĝis trankvile, fidante pri la valoro de mia reboniĝo, kaj mia rekompenco estas supera al miaj kaŝitaj aspiroj. Hodiaŭ mi estas feliĉa, tre feliĉa, kaj mi povas aserti al vi, ke ĉiuj, kiuj altiĝas, estos humiligataj, tiel same, kiel altigataj estos ĉiuj, kiuj sin humiligos.

— D. Bonvolu diri al ni, en kio konsistas via kulpelaĉeto en la spirita mondo, kaj kiom longe ĝi daŭris, ekde via morto ĝis la momento de la malpligravigo, rezulte de la pento kaj de la bonaj decidoj. Diru al ni ankaŭ, kio ja kaŭzis la ŝanĝiĝon de viaj ideoj, en la spirita stato.

— R. Tiu demando vekas en mi plurajn dolorajn rememorojn! Kiom multe mi suferis... Sed mi ne plendas: mi nur rememoras!... Ĉu vi volas scii la naturon de mia kulpelpago? Jen ĝi en sia terura abomenindeco:

Ĉar mi estis detruanto de ĉiuj bonaj sentoj, mi restis dum longa, tre longa tempo ligita per la perispirito al la putranta korpo. Ĝis kompletiĝis la putrado, mi vidis min dismordata de la vermoj, kio tre turmentadis min! Kaj kiam mi vidis min liberigita el la ligiloj min katenantaj al la turmentilo, pli kruela turmento atendis min!... Post la fizika, venis la morala sufero, multe pli longa. Mi estis metita antaŭ ĉiuj miaj viktimoj. De tempo al tempo, devigita de la supera forto, mi revidis la vivan

bildon de miaj krimoj. Kaj mi vidis fizike kaj morale ĉiujn dolorojn, kiujn mi suferigis al aliaj! Ha! miaj amikoj, kiel terure estas vidi konstante tiujn, al kiuj ni faris malbonon! Inter vi, vi havas nur malfortan ekzemplon, ĉe la komparo de la akuzito kun la viktimo. Resume vi tie vidas tion, kion mi suferis dum tri jarcentoj kaj duono, ĝis kiam Dio, kompatinte mian doloron kaj tuŝite de mia pento, petita de tiuj, kiuj min helpis, konsentis al mi la elaĉetan vivon, kiun vi konas.

— D. Ĉu ia speciala motivo instigis vin al elekto de la lasta ekzistado, submetita al la izraela religio?

— R. Mi ne elektis mem, sed mi aŭskultis la konsilon de miaj gvidantoj. La religio de Izraelo estis ia plia malgranda humiligo en mia provo, pro tio, ke en iaj landoj la plimulto de la enkarniĝintoj malŝatas la judojn, kaj precipe la almozpetantajn judojn.

— D. En kia aĝo vi komencis vian kulpelpagon sur la Tero? Kiel venis al vi en la koron la deziro vin sendevigi pri la antaŭfaritaj decidoj? Ĉu, dum vi tiel abnegacie praktikis la karitaton, vi havis la intuicion pri la kaŭzoj, vin antaŭinklinigintaj al tio?

— R. Miaj gepatroj estis malriĉaj, sed inteligentaj kaj avaraj. Ankoraŭ juna, mi estis senigita je la amo kaj karesoj de mia patrino. Ĉi tiu perdo kaŭzis al mi tiom grandan kaj profundan ĉagrenon, kiom al mia patro, kiu posedita de gajno-avideco, tute min forlasis. Miaj fratoj, ĉiuj pli aĝaj ol mi, ŝajne ne priatentis miajn afliktiĝojn. Alia judo, movita de sento pli egoisma ol karitata, akceptis min en sian hejmon kaj instruis min labori. Tio, kiom ajn kostis al li, estis riĉe kompensita per mia laboro, kiu cetere ofte superis miajn fortojn. Poste, liberiĝinta de tiu jugo, mi laboris por mi; sed ĉie, ĉe laboro, kiel ĉe ripozo, persekutis min la resopiroj al la karesoj de mia patrino kaj, laŭmezure kiel mi fariĝis pli aĝa, la rememoro pri tiu estulo sin gravuris pli profunde en mia menso, kaj

mi tro bedaŭris la perdon de ŝiaj amo kaj zorgemo. Ne malfruis, ke mi estis la sola, kiu restis el mia familio, ĉar, fakte, post kelkaj monatoj, la morto falĉis ĝin tutan. Tiam komencis manifestiĝi al mi la maniero, kiel mi devus pasigi la reston de mia vivo. Du el miaj fratoj postlasis orfojn, kaj kortuŝite de la memoro pri tio, kion mi suferis kiel orfo, mi ekdeziris antaŭgardi la kompatindajn etulojn kontraŭ ia juneco simila al mia.

Ĉar mia laboro ne produktis enspezon sufiĉan por nutri ilin ĉiujn, mi komencis almozpeti ne por mi, sed por aliaj. Al Dio ne plaĉis, ke mi vidu la rezulton, la konsolon por miaj penoj, kaj tiel ankaŭ la kompatinduletoj min forlasis por ciam.

Mi bone sciis, kio mankis al ili: la patrino. Mi decidis do almozpeti por la malfeliĉaj vidvinoj, kiuj ne povante labori por si kaj por siaj filetoj, trudis al si fatalajn seniĝojn, kiuj nepre mortigis ilin, kiuj postlasis al la mondo orfojn fordonitajn al turmentoj, kiujn mi mem elportis.

En tiu tempo mi estis 30-jara, kaj en tiu aĝo, oni vidis min sana kaj fortika almozpeti por vidvinoj kaj orfoj. Por mi estis penigaj la unuaj paŝoj , kaj tiam mi elportis pli ol unu malnobligan alnomon; sed kiam oni certiĝis, ke mi efektive disdonadis al la malriĉuloj tion, kion mi ricevis; kiam oni eksciis, ke al tiu disdonado mi aldonis ankoraŭ la ekscesojn de mia enspezo, tiam mi akiris ian reputacion, kiu ne povis ne esti agrabla por mi.

Dum la 60 jaroj da surtera pilgrimado, mi neniam preteratentis la taskon al mi truditan. Neniam ankaŭ la konscienco sentigis al mi, ke kaŭzoj antaŭaj al mia ekzistado estis motivo de mia konduto. Nur unu tagon, antaŭ ol komenci almozpeti mi aŭdis ĉi tiujn vortojn:

"Ne faru al alia tion, kion vi ne volas, ke oni faru al vi."

Surprizita de la ĝeneralaj principoj de moralo entenataj en tiuj kelkaj vortoj, al mi ofte ŝajnis, ke mi ilin aŭdis aldonitaj de ĉi tiuj: "Sed kontraŭe faru tion, kion vi volas,

ke oni faru al vi.” Ĉar min helpadis la memoro pri mia patrino kaj pri miaj propraj suferoj, mi iris plu la vojon, kiun mia konscienco diradis, ke ĝi estas bona.

Mi finos ĉi tiun longan komunikaĵon, dirante: Dankon!

Estante ankoraŭ neperfekta, mi tamen scias, ke malbono okazigas nur malbono, kaj kiel mi jam faris, mi denove dediĉos min al la bono por atingi la feliĉon.

*Szymel Slizgol*

## Julienne-Marie, la almozulino

En la komunumo Villate, proksime de Nozai (Malsupera Loire), estis malriĉa virino nomata Julienne-Marie, maljuna, malsana, vivante el la publika karitato. Unu tagon ŝi enfalis en puton, el kiu ŝin eltiris iu samlandano, A..., kiu kutime ŝin helpadis. Kondukite en sian hejmon, tie ŝi elkarniĝis iom poste, pro tiu akcidento. Laŭ la ĝenerala opinio Julienne mortis pro memmortigo. En la tago mem de ŝia entombigo, la viro, kiu ŝin helpis kaj kiu estis spiritisto kaj mediumo, eksentis kvazaŭ ian delikatan kontakton de persono, kiu estus apude, sed li ne klarigis al si la kaŭzon de tiu fenomeno. Kiam li informiĝis pri la forpaso de Julienne-Marie, venis al li en la kapon la probabla vizito de ŝia Spirito. Konsilite de iu amiko ĉe la Societo de Parizo, kiu lin informis pri la okazintaĵo, li faris la elvokon, celante esti utila al la Spirito, kaj li ĝin faris, anticipe petinte konsilon de siaj protektantoj, kiuj al li donis la jenan komunikaĵon:

“Vi povos fari la elvokon, kaj tial vi donos plezuron al ŝi, kvankam estas tute nenecesa la bono, kiun vi intencas fari al ŝi.

Ŝi estas feliĉa kaj tute sin dediĉinta al tiuj, kiuj sin montris kompataj al ŝi. Vi estas unu el ŝiaj bonaj amikoj; ŝi preskaŭ neniam vin lasas, kaj ofte komunikiĝas kun vi, sen via scio. Frue aŭ malfrue la servoj estos rekompencataj, se ne de la favorato mem, almenaŭ de tiuj, kiuj

interesiĝas pri li antaŭ kaj post la morto. Se la Spirito de favorato ankoraŭ ne estos konsciiĝinta pri sia nova situacio, aliaj Spiritoj al li simpatiaj venos doni ateston pri sia dankemo.

Jen estas la klarigo de la sento, kiun vi havis en la tago mem de la forpaso de Julienne-Marie.

Nun ŝi vin helpos en la praktiko de bono. Memoru tion, kion diris Jesuo: "Kiu humiliĝos, tiu estos altigita." Vi vidos la servon, kiun tiu Spirito povos fari al vi, kondiĉe ke vi petu lian helpon, kun la intenco esti utila al la proksimulo."

*Elvoko*: — Bona Julienne, mi scias, ke vi estas feliĉa, kaj tio estas ĉio, kion mi deziris scii; tio tamen ne malebligas, ke mi plurfoje memoru pri vi, kaj ke mi ne forgesu vin en miaj preĝoj.

— R. Fidu Dion, penu inspiri sinceran fidon al viaj malsanuloj, ĉar tiel vi ĉiam atingos tion, kion vi deziras. Neniam priokupiĝu pri rekompenco, ĉar ĝi estos ĉiam supera al tio, kion vi povos atendi. Dio scias juste rekompenci tiun, kiu sindediĉe konsolas siajn fratojn, *inspirite de absoluta abnegacio*. Sen tio, ĉio estas iluzio, ĥimero. Antaŭ ĉio, fido estas necesa al homo, ĉar sen ĝi oni nenion atingos. Memoru pri ĉi tiu maksimo, kaj vi miros de ĝiaj rezultatoj. La du malsanuloj de vi kuracitaj estas pruvo de tio, kion mi asertas al vi, ĉar, en la stato, en kiu ili estis, nur per kuracilo al vi prosperus nenio. Kiam vi petegos de Dio permeson, por ke la bonaj Spiritoj portu al vi bonfarajn fluidaĵojn, tiam, se vi ne sentos nevolan ekstremon, tio signifos, ke via preĝo ne estis sufiĉe fervora por esti aŭskultata. Nur en ĉi tiu kondiĉo la preĝo povas ja fariĝi valora. Kaj ne alian rezultaton oni atingas, dirante: "Dio ĉiopova, Patro de boneco kaj senfina favorkoreco, permesu, ke la bonaj Spiritoj min helpu en la kuracado de ... Kompatu lin, Sinjoro; redonu al li la sanon, ĉar mi sen Vi povas fari nenion. Fariĝu via volo." Vi bone agas, ne malŝatante la humilulojn; la voĉo de tiu, kiu rezignacie elportis la mizerojn en tiu mondo estas

ĉiam aŭskultata, kaj neniu servo restas ne rekompencita. Nun unu vorto pri mi, konfirmante tion, kion mi ĉi-supre diris: Spiritismo klarigas al vi mian lingvaĵon de Spirito, kaj cetere mi ne bezonos pritrakti detalojn pri tio. Same mi opinias neutile paroli al vi mia antaŭa ekzistado. La situacio, en kiu vi konis min sur la Tero, igos vin kompreni kaj taksi miajn antaŭajn enkarniĝojn, ne ĉiam senmakulajn. Kondamnita al ia mizera ekzistado, malsana, invalida, mi almozpetis dum mia tuta vivo. Mi ne amasigis monon, kaj en la maljunaĝo miaj malmultaj ŝparaĵoj estis nenio pli ol unu cento da frankoj, rezervitaj por tiam, kiam miaj kruroj jam ne povos min subteni.

Opiniante sufiĉaj la kulpelpagon kaj la provon, Dio metis finon al ili, liberigis min de la surtera vivo, sen suferado, ĉar mi ne memmortigis, kiel komence oni pensadis.

Mi elkarniĝis subite ĉe la rando de puto, kiam de la Tero mi sendis al Dio mian lastan preĝon. Poste, pro la deklivo de la tereno, mia korpo nature englitis en la puton.

Mi ne suferis ĉe mia morto, kaj mi estas feliĉa ĉar mi senhezite, rezignacie plenumis mian mision. Laŭ miaj fortoj mi fariĝis utila, ĉiam evitante damaĝi miajn similulojn. Hodiaŭ mi ricevas la rekompencon kaj dankas Dion, nian Dian Majstron, kiu mildigas la amaraĵon de la provoj, igante nin forgesi, dum la vivo, la erarojn de la pasinteco, kaj kiu metas sur nian vojon la karitemajn animojn, kiuj helpas nin elporti la ŝarĝon de niaj pasintaj kulpoj. Persistu ankaŭ vi, kiu, kiel mi, estos rekompencita. Mi dankas vin pro viaj bonaj preĝoj kaj pro la servoj, kiujn vi faris al mi. Mi neniam forgesos vin. Unu tagon ni ree vidos nin kaj multaj aferoj estos eksplikataj al vi, aferoj, kies klarigo hodiaŭ estus malĝustatempa. Estu certa nur pri mia sindonemo, pri mia restado apud vi, ĉiam, kiam vi bezonos min por konsoli la suferantojn.

Via tre maljuna almozulino.

*Julienne-Marie*

Elvokite la 10an de Junio 1864, ĉe la Societo de Parizo, la Spirito de Julienne diktis la jenan mesaĝon:

"Kara prezidanto, dankon pro tio, ke vi volas min akcepti ĉe via Societo. Vi antaŭvidis, el la socia vidpunkto, la superecon de miaj antaŭaj enkarniĝoj, ĉar, se mi revenis sur la Teron por la provo de malriĉeco, tio estis por puni min pro la vana fiero, kun kiu mi forpelis la malriĉulojn, la mizerulojn. Tiel mi suferis egalan repunon, kaj fariĝis terurega almozulino en ĉi tiu lando; kaj eĉ tiel, kvazaŭ por certigi min pri la boneco de Dio, ne ĉiuj min forpelis, kaj tio estis mia tuta timo. Ankaŭ sen plendoj mi elportis la elprovon, antaŭsentante ian vivon pli bonan, el kiu mi ne plu revenus al la mondo de ekzilo kaj malfeliĉego. Kiel granda estas la feliĉo en tiu tago, kiam nia rejuniĝinta animo povas eniri en la spiritan vivon por tie revidi siajn amatojn! Jes, ĉar ankaŭ mi amis kaj konsideras min feliĉa pro mia rekontiĝo kun tiuj, kiuj min antaŭis.

Dankon al A..., tiu bona amiko, kiu ebligis al mi esprimi mian dankon. Sen lia mediumeco mi ne povus danke pruvi al li, ke mia animo ne forgesas la bonfarajn influojn de ia bona koro, kia la lia, kaj konsilas, ke li penu progresi en sia dia kredo. Ĉar li havas mision, rebonigi la malvirtiĝintajn animojn, li certiĝu pri mia helpo. Kaj kion li faris por mi, tion mi povas centoble rekompenci al li, instruante lin sur la vojo, kiun vi mem trairas. Danku la Sinjoron pro tio, ke Li permesis, ke la bonaj Spiritoj gvidu vin kuraĝigi la malriĉulon ĉe la ĉagrenoj, kaj deteni la riĉulon de la fiero. Konvinkiĝu pri kiom honte estas forpeli malfeliĉulojn kaj utilu al vi mia ekzemplo, por ke vi evitu reveni el la Tero por kulpelpago, ĉe la doloraj sociaj pozicioj vin metantaj tiel malsupren, ke vi estu konsiderata skorio de la socio."

*Julienne-Marie*

La ĉi-supra komunikaĵo estis transdonita al A..., kiu siavice ricevis la sekvantan, kiu cetere estas ia konfirmo:

— D. Bona Julienne, ĉar vi deziras helpi min per viaj konsiloj, por ke mi progresu en nia sankta Doktrino, venu komunikiĝi kun mi, certa pri tio, ke mi klopodos profiti viajn instruojn. — R. Memoru la admonon, kiun mi faros, kaj ne malobeu ĝin. Penu esti ĉiam karitema, laŭ viaj fortoj; vi komprenas la karitaton tiel, kiel ĝi devas esti praktikata en ĉiuj vivo-agoj. Mi do ne bezonas konsili al vi ion, kion vi mem povas taksi; mi tamen diros, ke vi sekvu la konsciencovoĉon, kiu neniam vin trompos, kondiĉe ke vi ĝin sincere konsultu. Ne iluziu vin pri plenumotaj misioj; malalt- kaj altranguloj, ĉiuj havas sian mision. Mia misio estis penplena, sed mi meritis tian punon, pro la antaŭaj ekzistadoj, kiel mi jam konfesis al la bona prezidanto de la Societo de Parizo, ĉefa organizaĵo, kiu unu tagon kunigos vin ĉiujn. Tiu tago estas malpli malproksima ol vi opinias, ĉar Spiritismo marŝas per grandaj paŝoj, malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj. Iru do sentime, fervoraj adeptoj; iru, ĉar viaj penoj estos kronataj per multaj bonsukcesoj. Ne gravas tio, kion oni povos diri pri vi! Metu vin super la bagatela kritiko, kiu nepre falos sur la kontraŭulojn mem de Spiritismo.

Ha! la fieruloj! ili opinias sin fortaj, pensante, ke ili povos vin eldetrui, sed... bonaj amikoj, trankviliĝu kaj ne timu alfronti ilin, ĉar ili estas malpli nevenkeblaj ol vi eble povas supozi. Inter ili estas multaj, kiuj timas, ke la vero ilin ekblindigos. Esperu! Ili nepre venos helpi vin fini la verkon."

Julienne-Marie

Ĉi tie estas fakto plena de instruo. Kiu bonvolos mediti pri tiuj tri komunikaĵoj, tiu en ili trovos resumitaj ĉiujn gravajn principojn de Spiritismo.

Jam en la unua komunikaĵo la Spirito evidentigas sian superecon per la lingvaĵo; kiel bonfara genio, kaj kvazaŭ metamorfozita, tiu radia virino venas protekti tiujn samajn homojn, kiuj ŝin malŝatis, kiam ŝi estis vestita per la ĉifonaĵoj de mizero.

Tio estas apliko de ĉi tiuj evangeliaj maksimoj: "La grandaj estos humiligitaj kaj la malgrandaj estos altigitaj:

feliĉaj estas la humilaj, feliĉaj estas la afliktitaj, ĉar ili estos konsolataj; ne malestimu la humilajn, ĉar tiu, kiu ŝajn-as malgranda en ĉi tiu mondo, tiu povas esti multe pli granda ol vi opinias.”

## Max, la almozulo

En 1850, en vilaĝo el Bavario, mortis maljunulo preskaŭ centjara, konata kiel patro Max. Ĉar li ne posedis familion, neniu konis lian devenon. De ĉirkaŭ duona jarcento li fariĝis nekapabla perlabori siajn vivrimedojn, krom per almozpetado, kion li trompkaŝis, penante vendi, en bienoj kaj kasteloj, almanakojn kaj aliajn etajn var-ojn. Oni alnomis lin grafo Max, kaj la infanoj vokis lin nur per tiu titolo, kio igis lin ridi sen koleriĝo. Kial do tiu titolo? Neniu povis ĝin ekspliki. La kutimo ĝin sankciis. Eble ĝi venis de lia fizionomio, de liaj manieroj, kies distingiĝo kontrastis kun liaj mizeraj ĉifonaĵoj.

Multajn jarojn post sia morto, Max aperis en sonĝo al la filino de la posedanto de unu kastelo, en kies stalo li iam gastis, ĉar li ne posedis propran loĝejon. En tiu apero, li diris: “Mi dankas vin pro tio, ke vi memoris pri la malriĉa Max en viaj preĝoj, ĉar la Sinjoro ilin aŭdis. Ho! karitema animo, kiu interesiĝis pri la kompatinda almozulo, tial, ke vi volas scii, kiu mi estas, jen mi kon-tentigos vin, samtempe donante al vi kaj al ĉiuj grandan instruon.

“Antaŭ proksimume unu jarcento kaj duono mi estis unu el la riĉaj kaj potencaj mastroj en ĉi tiu regiono, sed fiera pri mia nobeleco. La grandega riĉaĵo, krom utili al miaj plezuroj, apenaŭ sufiĉis por hazardludo, diboĉo kaj orgioj, kiuj estis mia sola priokupiĝo en la vivo.

La vasaloj, kiujn mi rigardis, kiel laborbestojn destinitajn por servi al mi, estis humiligitaj kaj piedprem-itaj, por subteni mian malŝparemon. Surda al iliaj plendoj, kiel mi ordinare estis al ĉiuj malfeliĉuloj, mi opiniis, ke ili ankoraŭ sin konsideris honorataj, kontentigante miajn kapricojn. Mi mortis frue, laca de la ekscesoj, sed fakte ne provinte iun ajn realan malfeliĉon. Male, ĉio ŝajne

ridetis al mi tiagrade, ke mi estis rigardata, kiel unu el la plej feliĉaj estuloj en la mondo. Mia funebra ceremonio estis pompa, kaj la mallaborelumoj bedaŭris la perdon de la riĉulo, sed vero estas, ke sur mian tombon oni verŝis nenian larmon, nenia preĝo estis kore farita al Dio por mi, dum mia rememoro estis malbenata de ĉiuj, por kies mizero mi kontribuis. Ha! kiel terura estas la malbeno de tiuj, al kiuj ni malutilas! Tiu malbeno ja ne ĉesis eĥi en miaj oreloj dum longaj jaroj, kiuj al mi ŝajnis ia eterneco. Poste, ĉe la morto de ĉiu el la viktimoj, nova fantomo minacanta aŭ sarkasma leviĝis antaŭ mi, senĉese min persekutante, kaj mi ne povis trovi angulon, kie mi kaŝus de iliaj vidoj! Eĉ ne unu amika rigardo!

La malnovaj kamaradoj de diboĉo, malfeliĉaj, kiel mi, forkuris, kvazaŭ malestime dirante al mi: "Vi ne povas plu elspezi por niaj plezuroj." Ho! Tiam, kiom mi donus por momento da ripozo, por glaso da akvo por kvietigi la ardan soifon, kiu min konsumadis! Mi tamen posedis nenion pli, kaj *la tuta oro ŝpruce verŝiĝinta sur la Teron produktis eĉ ne unu benon,* eĉ ne unu... ĉu vi aŭdis, mia filino?

Fine, laca, premegita, kiel vojiranto ne duonvidanta la finon de la vojaĝo, mi ekkriis: "Mia Dio, kompatu min! Kiam finiĝos ĉi tiu terura situacio?" Tiam iu voĉo — la unua, kiun mi aŭdis, post kiam mi postlasis la Teron — diris : "Kiam vi volos." Kion mi devos fari, granda Dio? — mi demandis. Diru, kaj mi submetiĝos al ĉio. — "Pento estas necesa, ankaŭ estas necese, ke vi humiliĝu antaŭ tiuj samaj, kiujn vi humiligis; ke vi petu ilin interhelpi por vi, ĉar la preĝo de ofendito, kiu pardonas, estas ĉiam agrabla al la Sinjoro." Kaj mi humiliĝis, kaj mi petis interhelpon de miaj vasaloj kaj servantoj, tie starantaj antaŭ mi, kaj kies mienoj iom post iom pli bonvolemaj fine malaperis. Tio estis por mi kvazaŭ ia nova vivo; la malespero cedis lokon al la espero, dum mi dankadis Dion per ĉiuj fortoj de mia animo.

La voĉo aldonis: "Princo..." al kiu mi respondis: "ĉi tie ne estas alia princo krom Dio, Ĉiopova Dio, kiu

humiligas la fieregajn. Pardonu min, Sinjoro, ĉar mi pekis; kaj se tia estas via volo, faru min sklavo de miaj sklavoj.”

Post kelkaj jaroj mi reenkarniĝis en familio de malriĉaj burĝoj. Ankoraŭ infano, mi perdis miajn gepatrojn kaj restis sola, senprotekta, en la mondo. Mi perlaboris la vivrimedojn, kiel mi povis, jen kiel metiisto, jen kiel kamplaboristo, sed ĉiam honeste, ĉar tiam mi jam kredis je Dio. Sed en la aĝo de 40 jaroj mi fariĝis tute paralizita, kaj de tiam mi bezonis almozpeti dum pli ol 50 jaroj, tra tiuj samaj regionoj, kies absoluta mastro mi estis. En la bienoj, kiuj apartenis al mi, mi ricevis panpecetojn, kaj mi estis feliĉa, kiam oni disponigis al mi staltegmenton, kiel ŝirmejon. Ankoraŭ pro maldolĉa ironio de la sorto, oni alnomis min S-ro Grafo... Dum dormo plaĉis al mi vizitadi tiun saman kastelon, kie mi despote regnis, revidante min en la luksego de mia antikva riĉeco! Ĉe vekiĝo, tiuj vidoj lasis al mi ian nedifineblan senton de amareco kaj malĝojo, sed neniam eĉ unu plendo eliĝis el miaj lipoj; kaj kiam plaĉis al Dio min alvoki, mi gloris Lin pro tio, ke Li donis al mi firmecon kaj rezignacion por elteni tiel penigan provon, kies rekompencon mi ricevas hodiaŭ. Rilate al vi, mia filino, mi vin benas pro tio, ke vi preĝis por mi.”

Al ĉi tiu fakto ni turnas la atenton de ĉiuj, kiuj opinias, ke, sen la perspektivo de la eternaj punoj, la homoj ne havus ian bridon por siaj pasioj. Ĉu la puno, kia tiu de la patro Max, estos eble malpli profita ol tiuj senfinaj punoj, al kiuj hodiaŭ neniu kredas?

## Historio de iu servisto

Ĉe altranga familio li estis juna servisto, kies inteligenta kaj bonedukita figuro impresis pro sia distingiĝo. En liaj manieroj estis nenio vilaĝa aŭ pleba kaj, dum li klopodis diligente servadi siajn mastrojn, li tute ne montradis iun ajn troservemon, cetere tre propran al la personoj de la klaso. Iam revenante al la domo de tiu familio, kie ni lin ekkonis, ni demandis, ĉar ni ne

vidis lin, ĉu oni lin maldungis. Oni respondis, ke li iris promeni kelkajn tagojn en sia lando, kaj ke li tie mortis.

Oni diris al ni plie, ke oni tre bedaŭris la perdon de tiel bonega junulo, *posedanto de sentoj tre altaj por sia pozicio*. Kaj oni aldonis, ke li estis tre delikata kaj donis pruvojn pri granda alligiteco al ĉiuj.

Poste venis al ni en la koron la deziro elvoki tiun junulon, kaj jen kion li diris al ni:

"En la antaŭlasta enkarniĝo mi naskiĝi, kiel oni diras sur la Tero, en tre bona familio, kies havoj estis detruitaj de la malŝparemo de mia patro. Orfo ankoraŭ en frua infaneco, unu amiko de mia patro akceptis min kaj edukigis min tre bone, kiel filon, kio naskis en mi certan pavemon. De tiam mia protektanto estas ankoraŭ hodiaŭ S-ro G..., ĉe kiu vi ekkonis min, kiam mi servadis al li. Mi ja volis elpagi la fieron, en la lasta ekzistado, en ofico de servisto, samtempe pruvante la sindonemon, kiun mi ŝuldis al mia bonfarinto. Mi eĉ savis lian vivon, sen lia scio. Tio estis ankaŭ ia provo, el kiu mi eliris triumfanta kaj sufiĉe konsolita, ĉar mi ne lasis min korupti en malvirta medio. Konservante min senmakula, malgraŭ la malbonaj ekzemploj, mi dankas Dion pro la rekompenco je la feliĉo, kiun hodiaŭ mi ĝuas."

— D. Sub kiaj cirkonstancoj vi savis la vivon de G..?

— R. Evitante, ke li estu subpremita de granda arbotrunko, okaze de promenado sur ĉevalo. Mi, kiu lin sekvadis sola, vidis la minacantan danĝeron, kaj per korprema krio mi igis lin turniĝi rapide, dum la trunko falis.

G..., al kiu mi rakontis tiun fakton, perfekte lin memoris.

— D. Kial do vi elkarniĝis tiel juna? — R. Ĉar Dio opiniis jam sufiĉa la provon.

— D. Kiel vi povis profiti tiun provon, se vi ne konis ĝian antaŭan kaŭzon?

— R. En mia humila stato ankoraŭ restis al mi ia instinkto de tiu fiero; mi estis feliĉa pro tio, ke mi ĝin subigis, farante utila la provon, kiun alie mi devus rekomenci. En siaj momentoj de libereco, mia Spirito memoris tion, kio li estis, kaj ĉe lia vekiĝo, lin invadis ia intuicia deziro kontraŭstari siajn malbonajn inklinojn. Tiel luktante, mi estis pli inda ol se mi havus memoron pri la pasinteco. Kun tia rememoro, la iama fiereco kreskus, min konfuzante, dum tiamaniere agante mi nur devis kontraŭbatali la malutilajn influojn de mia nova situacio.

— D. Kio utilis, ke vi ricevis brilan edukadon, se en la lasta enkarniĝo ne estis eble al vi memori la akiritajn konojn?

— R. Konsiderante mian postan situacion, tiuj konoj estus superfluaj; tial ili restis en latenta stato, por ke hodiaŭ mi ilin ree renkontu. Sed tiuj konoj ne estis tute neutilaj al mi, pro tio, ke, elvolvante mian intelekton, ili inspiris al mi instinktan preferon al noblaj aferoj kaj malinklinon al malaltaj kaj abomenindaj ekzemploj, kiujn mi havis antaŭ la okuloj. Sen tiu eduko, *mi estus nenio alia ol servisto*.

— D. Ĉu la abnegacio de la servistoj al la mastroj havas, kiel kaŭzon, ilian antaŭajn interrilatojn? — R. Certe, almenaŭ tiu estas la ordinara ekzemplo. Iafoje tiaj servistoj estas membroj de sama familio, aŭ, kiel en mia afero, debitoroj, kiuj penas pagi dankoŝuldon, kiu samtempe kunhelpas, ke ili progresu pro sia sindonemo. Vi ne komprenas ĉiujn efektojn de la simpatio, kiujn la antaŭaj interrilatoj kaŭzas tie, en la mondo. La morto tute ne interrompas tiujn interrilatojn, kiuj povas daŭri jarcentojn kaj jarcentojn.

— D. Kial do estas tiel maloftaj hodiaŭ tiuj ekzempl-oj de sindonemo? — R. Akuzu la egoisman kaj fieran

konduton de via jarcento, ankoraŭ pligravigita de la nekredemo de la materialismaj ideoj. Nuntempe la vera fido estas anstataŭata de ambicio, de avideco je gajno, malprofite al abnegacio. Instigante la homojn al la vero, Spiritismo revivigos ankaŭ la forgesitajn virtojn.

Nenio pli bona ol ĉi tiu ekzemplo por evidentigi la bonfaro de forgeso rilate al la antaŭaj ekzistadoj.

Se G... scius tion, kion antaŭe diris lia servisto, lia pozicio antaŭ li estus embarasa, kaj G... tiele ne konservus lin, sekve malebligante ian utilan provon por ili ambaŭ.

## Antonio B...

Enterigita viva. La egala repuno

Antonio B..., merita verkisto tre estimata de siaj samlandanoj, kaj kiu plenumis kun distingiĝo kaj honesteco plurajn publikajn oficojn en Lombardio, ĉirkaŭ la jaro 1850, falis ŝajne mortinta pro apopleksia atako.

Kiel kelkfoje okazas en tiaj kazoj, lia morto estis konsiderata reala, kaj por la eraro pli kontribuis la signoj de putriĝo sur lia korpo.

Dek kvin tagojn post lia enterigo, hazarda cirkonstanco determinis lian elterigon, laŭ peto de lia familio. Temis pri medaliono forgesita en la ĉerko. Granda estis do la mirego de la ĉeestantoj, kiam ĉe la malfermo de la ĉerko, oni rimarkis, ke la korpo ŝanĝis sian pozicion, sin turninte surventren kaj — terura afero — ke unu el la manoj estis parte formanĝita de la mortinto mem.

Estis evidente do, ke la malfeliĉa Antonio B... estis enterigita viva, kaj eble li mortis pro afliktiteco kaj sufokiĝo.

Elvokita ĉe la Societo de Parizo, en Aŭgusto 1861, laŭ peto de parencoj, li donis la jenajn eksplikojn:

1. *Elvoko.* — R. Kion do vi volas?

2. — Laŭ peto de iu via parenco, ni plezure elvokas vin kaj estos feliĉaj, se vi bonvolos respondi al ni. — R. Jes, mi deziras fari tion.

3. — Ĉu vi memoras pri la okazetoj de via morto? — R. Ha! certe mi memoras. Sed kial do vi vigligas tiun memoron pri la puno?

4. — Ĉu vi efektive estis enterigita pro neglekto? — R. Tiel devis okazi, ĉar la ŝajna morto prezentiĝas kun ĉiuj karakteroj de la reala: mi estis preskaŭ sensanga (*).

"Oni devas tamen atribui al neniu okazintaĵon, kiu estis antaŭdestinita por mi, ekde mia naskiĝo."

5. — Ĉu ĉi tiuj demandoj ĝenas vin? Ĉu estas necese, ke ni metu finon al ĝi? — R. Ne. Vi povas daŭrigi.

6. — Ĉar vi postlasis reputacion de honesta homo, ni esperis, ke vi estas feliĉa. — R. Mi dankas vin, ĉar mi scias, ke vi propetos pro mi. Mi penos respondi al vi, kaj se mi ne povos, unu el viaj gvidantoj faros ĝin por mi.

7. — Ĉu vi povas priskribi al ni viajn sentojn en tiu momento? — R. Kia dolora provo senti min enfermita inter kvar tabuloj, paralizita, tute paralizita! Kriegi! Neeble!

Pro manko de aero la voĉo ne havis eĥon! Ha! kiel granda estas la torturo de la malfeliĉulo vane penanta spiri en limigita medio! Mi estis kvazaŭ ia kondamnito ĉe enirejo de forno sen varmo. Al neniu mi deziras ian finon kun tiaj torturoj. Ne, mi deziras al neniu tian finon! Ha! kruela puno por kruela kaj turmenta ekzistado! Mi ne scius diri pri kio mi tiam pensadis; apenaŭ revidante la pasintecon, mi malprecize duonvidis la estontecon.

8. — Vi diris: "kruela puno por kruela kaj turmenta ekzistado..." Kiel oni povas akordigi tiun aserton kun

(*) Senigita je sanga cirkulado. Senkoloriĝo de la haŭto, pro seniĝo je sango.

via senmakula reputacio? — R. Kion valoras unu ekzistado antaŭ la eterneco? Certe mi penis esti honesta kaj bona en mia lasta enkarniĝo, sed mi akceptis tiun epilogon antaŭe, t.e. antaŭ ol enkarniĝi. Ha!... Kial demandi min pri tiu dolora pasinteco, kiun konis nur mi kaj miaj bonaj Spiritoj senditaj de la Sinjoro? Sed, ĉar tio estas necesa, mi diros al vi, ke en antaŭa ekzistado mi enterigis iun virinon viva — mian edzinon — en kavon! La egala repuno devis esti aplikata al mi. Okulon pro okulo, denton pro dento.

9. — Ni dankas vin pro tiuj respondoj kaj petas Dion pardoni vian pasintecon, konsiderante la meriton de via lasta enkarniĝo. — R. Mi revenos poste, sed, se nenio lin kontraŭstaros, la Spirito Éraste kompletigos ĉi tiun mian komunikaĵon.

*Instruoj de la gvidanto de la mediumo*

El tiu komunikaĵo vi povas konkludi, ke ekzistas rilatecon kaj dependecon de viaj vivoj inter si; la turmentiĝoj, la sortoŝanĝoj, la homaj malfacilaĵoj kaj doloroj estas ĉiam sekvoj de antaŭa vivo kulpa aŭ malbone utiligita. Mi tamen devas diri al vi, ke finiĝoj, kiel tiu de Antonio B... estas maloftaj, ĉar, se li finis tiamaniere ian honestan ekzistadon, estis nur pro tio, ke li mem ĝin petis, por mallongigi sian vagadon, kiel Spirito, kaj atingi pli frue la superajn sferojn. Efektive, post periodo da konfuziĝo kaj morala suferado, propra al la elpago de la abomeninda krimo, ĉi tiu estos pardonita al li, kaj li leviĝos al pli bona mondo, kie lin atendas la viktimo, kiu jam de longe ĝin pardonis al li. Profitu ĉi tiun kruelan ekzemplon, karaj spiritistoj, por ke vi pacience elportu la moralajn kaj fizikajn suferojn kaj ĉiujn etajn surterajn mizerojn.

— D. Kian profiton la homaro povas ricevi el tiaj punoj? — R. La krimoj ne ekzistas por evoluigi la homaron, sed por puni la kulpulojn. Fakte la homaro ne

povas havi iun ajn intereson al la sufero de unu el siaj membroj. Tiuokaze la puno estis adaptita al la eraro. Kial do ekzistas frenezuloj, idiotoj, paralizuloj?

Kial ĉi tiuj mortas bruligitaj, dum tiuj aliaj suferas la torturojn de longa agonio inter la vivo kaj la morto?

Ha! kredu al mi; respektu la superegan volon kaj ne penu sondi la pravon de la dekretoj de la Providenco! Dio estas justa kaj faras nur bonon.

*Éraste*

Ĉu ĉi tiu fakto entenas ne ian teruran instruon? La justeco de Dio, iafoje malfrua, ne pro tio ne atingas la kulpulon, kaj ordinare ĝi iras antaŭe. Estas eminente moraliga la scio pri tio, ke, se grandaj kulpuloj finiĝas trankvile, en abundo da surteraj havoj, ne pro tio ĉesos sonori frue aŭ malfrue por ili la horo de kulpelpago. Tiaj punoj estas kompreneblaj ne nur ĉar ili estas pli malpli ĉe la atingo de niaj okuloj, sed ankaŭ pro tio, ke ili estas logikaj. Ni kredas, ĉar la prudento akceptas. Nobla ekzistado ne forigas do la vivoprovojn, kiuj estas elektitaj kaj akceptitaj, kiel kompletigaĵo de kulpelpago — la restaĵo de ŝuldo solvita antaŭ ol ricevi la prezon de la plenumita progreso.

Konsiderante kiom oftaj estis en la pasintaj jarcentoj, eĉ en la pli altaj kleraj klasoj, la agoj de barbareco hodiaŭ abomenindaj; kiom da murdoj faritaj en tiuj tempoj de malestimo al la aliula vivo, kiam la malfortaj estis senskrupule subpremataj de la potenculoj, tiam ni komprenas, ke multaj el niaj samtempuloj nepre devas forviŝi pasintajn makulojn, kaj ni ne miros pri la granda nombro da personoj, kiuj pereas kaŭze de individuaj akcidentoj aŭ de kolektivaj katastrofoj.

Despotismo, fanatikeco, nescio kaj antaŭjuĝoj de la Mezaĝo kaj de la sekvintaj jarcentoj postlasis al la estontaj generacioj grandegan ŝuldon, kiu ankoraŭ ne estas elpagita.

Multaj malfeliĉoj ŝajnas al ni maljustaj nur pro tio, ke ni vidas nur la nuntempon.

## Letil

Ĉi tiu industriulo, kiu loĝis en la najbaraĵoj de Parizo, mortis en Aprilo 1864, en terura maniero. Kaldronego plena de bolanta verniso brulis, kaj en palpebruma daŭro lia korpo estis kovrita per inkandeska materio, kio komprenigis al li, ke li estas perdita. Kvankam en tiu momento estis kun li en la laborejo nur unu juna metilernanto, li tamen ankoraŭ kuraĝis iri sian hejmon, en distanco de pli ol 200 metroj.

Kiam oni povis doni al li la unuajn helpojn, liaj karnoj jam dissŝiriĝis, kaj la ostoj de unu parto de lia korpo kaj de la vizaĝo jam fariĝis nudaj. Tiel li vivis dek du horojn en plej teruraj suferoj, konservante tamen, ĝis la lasta momento, sian spiritan viglecon, kaj antaŭzorgante siajn negocojn kun perfekta mensklarecon. Dum tiu kruela agonio li ne aŭdigis eĉ unu ĝemon, eĉ unu plendon, kaj mortis preĝante al Dio. Li estis tre honora viro, de afabla kaj milda karaktero, amata kaj estimata de ĉiuj personoj, kiuj lin konis. Li entuziasme akceptis la spiritismajn ideojn, sed iom supraĵe, kaj tiel, estante mediumo, li spertis plurajn mistifikaĵojn, kiuj tamen neniom skuis lian kredon.

La fido al tio, kion la Spiritoj diradis al li en certaj cirkonstancoj tuŝis la limojn de naiveco.

Elvokite ĉe la Societo de Parizo, la 29an de Aprilo 1864, kelkajn tagojn post sia morto kaj ankoraŭ impresite de la terura okazintaĵo lin mortiginta, li donis la jenan komunikaĵon.

“Profunda malĝojo min ĉagrenas! Ankoraŭ terurigita de mia tragika morto, mi opinias min sub la tranĉiloj de ekzekutisto.

Kiom mi suferis!... ho! kiom mi suferis! Mi estas tremanta, kiel se mi sentus la abomenan odoron de bruligitaj karnoj. Dek du horoj da agonio, kiun ci suferis, ho kulpinta Spirito! Sed li ĝin suferis sen murmuroj, kaj tial li ricevos de Dio pardonon. Ho mia amantino, ne ploru, ĉar baldaŭ tiuj doloroj kvietiĝos. Efektive mi ne

suferas, sed tiuokaze la rememoro valoras, kiel realaĵo. Multe min helpas la spiritisma kono, kaj nun mi vidas, ke sen tiu konsola kredo mi restus en la deliro de mia terura morto. Sed iu konsolanta Spirito ne forlasas min, de kiam mi eligis la lastan spiron. Mi ankoraŭ parolis, kaj li jam troviĝis apud mi... Ŝajnis al mi, ke li estas spegulo de miaj doloroj, kaŭzanta ĉe mi kapturnojn, kiuj igis min vidi fantomojn... Sed ne; tio estis mia gardanĝelo, kiu silente kaj mute min konsolis per la koro. Tuj post kiam mi forlasis la Teron, li diris al mi: "Venu, mia infano, vidu denove la tagon." Tiam mi ekspiris pli facile, opiniante min libera de la abomena premsonĝo; mi demandis pri la amata edzino, pri la kuraĝa filo, kiu sin oferis por mi, kaj li diris: "Ili ĉiuj estas sur la Tero, kaj vi, infano, estas inter ni." Mi serĉadis la hejmon, kie, ĉiam akompanata de la anĝelo, mi vidis ĉiujn banataj per larmoj. Malĝojo kaj funebro jam invadis tiun loĝejon iam trankvilan. Mi ne povis elteni la scenon pli longe, kaj tre kortuŝita mi diris al mia gvidanto: Ho, mia bona anĝelo, ni foriru de ĉi tie. Jes, ni foriru — li respondis — kaj ni serĉu ripozon. De tiam ĝis hodiaŭ mi suferas malpli multe, kaj se mi tiam ne vidus nekonsoleblaj miajn edzinon kaj filojn, kaj malĝojaj la amikojn, mi estus preskaŭ feliĉa.

Mia bona gvidanto vidigis al mi la kaŭzon de mia terura morto, kaj mi konfesos ĝin por vin instrui:

Antaŭ ĉirkaŭ du jarcentoj, mi ordonis bruligi knabinon senkulpan, kiel oni povas esti en ŝia aĝo — 12 ĝis 14-jaraj. Pri kio oni ŝin akuzis? Pri kunkulpeco en konspiro kontraŭ la pastra politiko. Tiam mi estis italo kaj inkvizicia juĝisto; ĉar la ekzekutistoj ne kuraĝis tuŝi la korpon de la kompatinda knabino, mi mem estis la juĝisto kaj la ekzekutisto.

Ho kiom granda ci estas, dia justeco! Submetita al ci, mi promesis al mi mem ne heziti en la tago de la batalo, kaj feliĉe mi havis forton por plenumi la kompromison. Mi ne murmuris, kaj Vi min pardonis, ho Dio! Kiam tamen forviŝiĝos el mia menso la memoron pri la kompatinda senkulpa viktimo? Tiu memoro igas min suferi. Estas necese do, ke ŝi pardonu min.

Ho vi, adeptoj de la nova Doktrino, kiuj ofte diras, ke vi ne povas eviti la malbonon pro la nescio pri la pasinteco! Ho miaj fratoj! prefere benu la Patron, ĉar se tia memoro vin akompanus al la Tero, tie ne plu estus ripozo en viaj koroj. Ofte sieĝitaj de honto kaj konsciencoriproĉo, kiel do vi ja povus ĝui pacon eĉ unu momenton? Tie la forgeso estas favoro, ĉar ĉi tie la memoro estas turmento. Post kelkaj tagoj, kiel kompenson pro la rezignacio, per kiu mi elportis miajn dolorojn, Dio permesos al mi forgeson pri la eraro. Jen la promeso, kiun mia bona anĝelo ĵus faris al mi."

En la lasta enkarniĝo la karaktero de S-ro Letil pruvas, kiom multe perfektiĝis lia Spirito. Lia tiama konduto estus la rezulto de la pento kaj de la bonaj decidoj antaŭe faritaj, sed tio ne sufiĉis: estis necese kroni tiujn decidojn per granda kulpelpago; estis necese, ke, kiel homo, li elportus la turmenton, kiun li altrudis al alia, kaj ankoraŭ plie: la rezignacio, kiun feliĉe li ne forlasis ĉe tiu terura cirkonstanco. Certe la spiritisma kono multe kontribuis por subteni lian fidon kaj la kuraĝon naskitan de la espero pri la estonteco. Konsciiĝinta pri tio, ke la fizikaj doloroj estas provoj kaj kulpelaĉetoj, li sumetiĝis al ili rezignacie, dirante: Dio estas justa; mi do ilin ja meritis.

## Ambicia saĝulo

Kvankam ŝi neniam suferis la afliktojn de mizero, S-ino B..., el Bordeaux, dum sia tuta vivo estis martirigitaj de fizikaj doloroj pro serio da sennombraj pli-malpli gravaj malsanoj, ekde sia aĝo de 5 monatoj. Vivinte 70 jarojn, preskaŭ ĉiujare ŝi frapis ĉe la pordo de la tombo. Tri fojojn venenita de la terapio de ia eksperimenta kaj duba scienco, ĉe studoj faritaj super ŝiaj organismo kaj temperamento, ruinigite ankoraŭ de medikamentoj kaj malsano, tiel ŝi vivis turmentita de neelporteblaj suferoj, kiujn nenio sukcesis kvietigi. Unu ŝia filino, kristana spiritistino kaj mediumino, ĉiam petadis Dion mildigi al ŝi la kruelajn provojn. Sed ŝia gvidanto konsilis ŝin peti nur forton, trankvilecon, rezignacion por elporti la provojn, kaj li donis tiun konsilon kun la jenaj instruoj:

“En tiu vivo ĉio havas sian pravon de ekzisto: *ne ekzistas eĉ unu el viaj suferoj, kiu ne respondas al la suferoj kaŭzitaj de vi mem*; ne ekzistas eĉ unu el viaj ekscesoj, kiu ne havas, kiel rezulton, ian seniĝon; ne ekzistas eĉ unu larmo gutinta el viaj okuloj, kiu ne estas destinata forlavi iun eraron, iun krimon.

Elportu do, pacience kaj rezignacie, la fizikajn kaj moralajn dolorojn, kiel ajn kruelaj ili ŝajnas al vi. Prezentu al vi la laboriston, kiu kun membroj senfortiĝintaj de laciĝo laboras plu, ĉar li havas antaŭ si la oran spikon, aliajn fruktojn de sia persistemo. Tiel la sorto de la malfeliĉulo suferanta en ĉi tiu mondo; la aspiro al feliĉeco, kiu devas konsisti en frukto de lia pacienco, *faros lin rezistema kontraŭ la nedaŭraj doloroj de la homaro*. Jen kio okazas al via patrino. Ĉiu el ŝiaj doloroj akceptita, kiel kulpelpago respondas al la forviŝo de makulo el la pasinteco; kaj ju pli frue forviŝiĝos ĉiuj makuloj, des pli frue ŝi estos feliĉa.

*La manko de rezignacio senfruktigas la suferon*, kiu tial devas esti rekomencata. Al vi konvenas do kuraĝo kaj rezignacio, kaj kio fariĝas necesa, tio estas peti Dion kaj la bonajn Spiritojn ilin permesi al vi. Iam via patrino estis bona kuracisto vivinta en medio, kie fariĝis facila lia bonstato, kaj kie ne mankis al li favordonoj nek omaĝoj. Ne estante filantropo kaj sekve ne celante faciligon al siaj fratoj, sed estante zorgema pri gloro kaj riĉo, li volis atingi la apogeon de la Scienco por pliigi siajn reputacion kaj klientaron. Kaj por la sukceso de tiu intenco nenia konsidero lin retenis.

Ĉar li antaŭvidis studon ĉe la konvulsioj, kiujn li esploradis, lia patrino estis martirigita en la lito de suferoj, dum la filo sin donis al eksperimentoj, kiuj devus klarigi iajn fenomenojn; al la maljunuloj li malpliigis la vivotagojn kaj la fortikajn homojn li malfortikigis per provoj celantaj konfirmi la agadon de tiu aŭ alia medikamento. Kaj ĉiuj tiuj eksperimentoj estis provataj sen scio aŭ eĉ sen suspekto de la malfeliĉulo. La kontentigo de la avideco kaj fiero, la soifo je oro kaj famo estis ja motivo de tia konduto. Estis necesaj jarcentoj de teruraj provoj

por malsovaĝigi tiun Spiriton ambician kaj plenan de orgojlo, ĝis la pento komencis la laboron de regenerado. Nun finiĝas la riparado, ĉar la provoj de ĉi tiu lasta enkarniĝo estas mildaj kompare kun tiuj, kiujn li elportis. Kuraĝon do, ĉar, se la puno estis daŭra kaj kruela, granda estos la rekompenco pro la rezignacio, pacienco kaj humileco.

Kuraĝon al ĉiuj vi, kiuj suferas; konsideru la nedaŭrecon de la materia ekzistado, pensu pri la eternaj ĝojoj.

Alvoku la esperon, la sindoneman amikinon de la suferantoj; la fidon, ĝian fratinon, kiu montras al vi la ĉielon, kien kun espero vi povas penetri antaŭtempe. Altiru ankaŭ al vi tiujn amikojn, kiujn la Sinjoro disponigas al vi, amikojn, kiuj vin ĉirkaŭas, vin subtenas kaj amas, kaj ties konstanta komplezemo vin rekondukas apud Tiun, kiun vi ofendis, malobeante liajn leĝojn."

Post sia elkarniĝo, S-ino B... donis al sia filino kaj ankaŭ al la Societo de Parizo plurajn komunikaĵojn, en kiuj montriĝas ŝiaj plej altaj kvalitoj, konfirmante ŝiajn antaŭ-ajn kondutojn.

## Charles de Saint-G..., idioto

(Spiritisma Societo de Parizo, 1860)

Ĉi tiu knabo 13-jara, ankoraŭ enkarniĝinta, kies intelektaj kapabloj estis nulaj, en tia grado, ke li ne rekonis la proprajn gepatrojn, kaj apenaŭ povis preni mem sian nutraĵon. Okazis ĉe li kompleta ĉeso de elvolviĝo de la tuta organismo.

1. — (Al Sankta Ludoviko.) Ĉu ni povas elvoki la Spiriton de ĉi tiu knabo? — R. Jes, ĝi estas ja, kvazaŭ vi elvokus tiun de elkarniĝinto.

2. — Tiu respondo supozigas al ni, ke la elvoko povas esti farata je iu ajn horo... — R. Jes, ĉar lia

animo estas katenita al la korpo per ligiloj materiaj, kaj ne spiritaj, tial lia animo povas disiĝi je iu ajn horo.

3. — (Elvoko al Charles.) — R. Mi estas kompatinda Spirito ligita al la Tero je unu piedo, kiel birdeto.

4. — Ĉu nuntempe, kiel Spirito, vi konscias pri via nuleco en ĉi tiu mondo? — R. Certe mi sentas la sklavecon.

5. — Kiam via korpo ekdormas kaj via Spirito malligiĝas, ĉu vi havas ideojn tiel klarajn, kiel se vi estus en normala stato? — R. Kiam mia malfeliĉa korpo ripozas, mi fariĝas iom pli libera por atingi la ĉielon, kiun mi aspiras.

6. — Ĉu en la spirita stato vi spertas iun ajn doloran senton naskitan de via enkorpa stato? — R. Jes, tial ĝi estas ja puno.

7. — Ĉu vi memoras pri via antaŭa enkarniĝo? — R. Ho jes! kaj ĝi estas la kaŭzo de mia nuna ekzilo.

8. — Kia estis tiu ekzistado? — R. Tiu de diboĉa junulo sub la regado de Henriko la Tria.

9. — Vi diras, ke via nuna situacio estas puno... ĉu vi ja elektis ĝin? — R. Ne.

10. — Kiel via nuntempa ekzistado povas utili al via progreso, en la stato e nuleco, en kiu vi troviĝas? — R. Por mi ne estas nuleco, ĉar estis ja Dio, kiu trudis al mi tiun eventualecon.

11. — Ĉu vi povas antaŭvidi la daŭron de la nuna ekzistado? — R. Ne; ankoraŭ forpasos kelkaj jaroj, ĝis kiam mi nepre reeniros en mian patrujon.

12. — Dum la tempo inter la lasta kaj nuna enkarniĝoj, kion do vi faris? — R. Dio min enkarcerigis; mi estis ventanima Spirito.

13. — Ĉu, dum maldormo, malgraŭ la neperfekteco de viaj organoj, ĉu vi konscias pri tio, kio okazas? — R. Mi vidas kaj aŭdas, sed mia korpo nenion vidas, nek perceptas.

14. — Ĉu ni povos fari ion profitan por vi? — R. Nenion.

15. — (Al Sankta Ludoviko.) Rilate al enkarniĝinta Spirito, ĉu la preĝoj havas efikon, kiel por la elkarniĝintaj? — R. Estante ĉiam utilaj, la preĝoj plaĉas al Dio. Rilate ĉi tiun Spiriton, ili tuj neniel utilas al li, sed poste Dio ilin konsideros.

Ĉi tiu elvoko konfirmas tion, kio ĉiam estis dirita pri la idiotoj. La morala nuleco ne estigas nulecon de la Spirito, kiu, sen konsidero pri la organoj, ĝuas siajn kapablojn. La neperfekteco de la organoj estas nur baro kontraŭ la libera manifestiĝo de la pensoj. Estas do la okazo de fortika viro, kiu estus momente manligita.

### *Instruo de iu Spirito pri la idiotoj kaj kretenoj, donita ĉe la societo de Parizo*

La idiotoj estas estuloj punitaj pro lia misuzo de potencaj kapabloj; animoj enkarcerigitaj en korpoj, kies senpovaj organoj ne kapablas esprimi pensojn. Tiu morala kaj fizika muteco estas unu el la plej kruelaj surteraj punoj, plurfoje elektitaj de pentitaj Spiritoj, kiuj deziras elaĉeti siajn erarojn. Ne pro tio la provado estas senefika, ĉar la Spirito ne restas senaga en la karna prizono; tiuj malinteligentaj okuloj vidas, tiuj deprimitaj cerboj konceptas, kvankam ili nenion povas esprimi per la parolo kaj per la rigardo. Escepte de la moveco, ilia stato estas tiu de la letargiuloj aŭ katalepsiuloj, kiuj vidas kaj aŭdas, sed ne povas sin esprimi. Kiam vi havas tiujn terurajn premsonĝojn, dum kiuj vi penas forkuri de danĝero, kriegante, malgraŭ la senmoveco de via korpo kaj de via

lango; kiam tio okazas — ni diras — via sensacio estas egala al tiu de la idiotoj. *Ĝi estas la paralizo de la korpo ligita al la vivo de la Spirito*.

Tiel estas klarigitaj preskaŭ ĉiuj malsanoj, ĉar ekzistas nenio senkaŭza , kaj tio, kion vi nomas maljusteco de la destino, estas nur la apliko de la plej alta justeco. Frenezo ankaŭ estas puno pro misuzo de la plej altaj kapabloj; la frenezulo havas du personecojn: tiun, kiu konfuziĝas, kaj tiun, kiu konscias pri siaj agoj, ne povante ilin gvidi.

Rilate la idiotojn, la kontempla, soleca vivo de ilia animo, sen la plezuroj kaj ĝuoj de la korpo, ankaŭ povas fariĝi agitata de la okazaĵoj, same kiel iu ajn el la plej komplikaj ekzistadoj; kelkaj ribelas kontraŭ la memvola turmentiĝo kaj, lamentante la elekton faritan, sentas tre fortan deziron reveni al alia vivo, deziron, kiu igas ilin forgesi la nuntempan rezignacion kaj la pasintan konsciencoriproĉon, pri kiu ili estas konsciaj, ĉar, kvankam ili estas idiotaj kaj frenezaj, ili scias pli multe ol vi, kaj kaŝas sub la fizika senpoveco ian moralan povon, kiun vi ne kapablas prezenti al vi. La furiozaj agoj, same kiel tiuj de stulteco ilin regantaj, estas interne juĝataj de ili mem, agoj, de kiuj ili suferas kaj ĉagreniĝas. Tiam ilin moki, ilin insulti aŭ eĉ malbone trakti, kiel oni ofte kondutas, estas pliigi ilian suferon, kaj pli krude sentigi al ili iliajn malfortecon kaj mizeron. Se ili povus, ili akuzus pri kovardeco tiujn, kiuj tiel kondutas, sciante, ke la viktimo ne povas sin defendi.

Frenezeco ne apartenas al la diaj leĝoj, tial ke, se ĝi materie rezultas de nescio, malpureco kaj mizero, la homo povas ĝin ekstermi. La modernaj rimedoj de higieno, kiujn la scienco hodiaŭ kreas kaj al ĉiuj disponigas, celas detrui la frenezecon. Ĉar la progreso estas kategoria kondiĉo de la homaro, tial la provoj devas ŝanĝiĝi, obeante la evoluadon de la jarcentoj. Venos tago, kiam ĉiuj provoj nepre estos moralaj; kaj kiam la Tero, ankoraŭ nova, atingos ĉiujn fazojn de sia ekzistado, tiam ĝi

transformiĝos en loĝejon de feliĉo, kiel okazas al la plej progresintaj planedoj.

### *Pierre Jouty, patro de la mediumo*

Estis tempo, kiam oni dubis pri la ekzistado de la animo de la idiotoj, kaj oni eĉ demandadis ĉu ili efektive apartenis al la homa speco. Ĉu la maniero, kiel Spiritismo alfrontas la faktojn, ne estas ja tre moraliga kaj instrua? Konsiderante, ke tiuj korpoj entenas animojn, kiuj jam brilis sur la Tero; animojn tiel klarvidajn kaj pensantajn, kiel niaj, malgraŭ la dika envolvaĵo sufokanta iliajn manifestiĝojn; konsiderante, ke la samo povas okazi al ni, se ni misuzos la kapablojn, kiujn la Providenco donis al ni; konsiderante ĉion tion, ĉu ni ne havas materialon por serioza pripensado? Ne akceptante la plurecon de la ekzistadoj, kiel ni povos akordigi la stultecon kun la justeco kaj boneco de Dio? Se la animo ne vivis antaŭe, tio signifas, ke ĝi estis kreita samtempe kun la korpo, kaj tiuokaze, kiel klarigi la kreadon de tiel malfavorataj animoj fare de iu Dio justa kaj bona? Oni devas konsideri, ke ĉi tie la afero ekzemple ne estas pri frenezeco, kiun oni povas antaŭforigi kaj kuraci. La idiotoj naskiĝas kaj mortas kiel idiotoj, sen konscio pri bono kaj malbono. Kia do estas ilia sorto en la vivo eterna? Ĉu ili estos feliĉaj apud inteligentaj kaj diligentaj homoj? Ĉu ili restos en tio, kion oni nomas limbo, t.e. ia miksita stato, kiu ne estas feliĉa nek malfeliĉa? Sed, kial do tia eterna malsupereco? Ĉu ili kulpas, se Dio ilin kreis idiotoj? Ni defias ĉiujn, kiuj rifuzas la reenkarniĝon, ke ili eliru el tiu malfacila situacio.

Kontraŭe, se oni akceptas la reenkarniĝon, kio ŝajnas maljusteco, tio fariĝas mirinde justa; kio ŝajnas neklarigebla, tio estas logike klarigata.

Cetere ni scias, ke tiuj, kiuj rifuzas ĉi tiun doktrinon, ĝin neniam kontraŭbatalis per aliaj argumentoj, krom tiuj devenantaj de persona abomeno kontraŭ tio, ke ili devos reveni sur la Teron. Al ili ni respondas: Por reveni tien, oni ne petas vian permeson, ĉar la juĝisto ne konsultas la volon de la akuzito por sendi lin en arestejon, Ĉiuj havas eblecon ne reenkarniĝi, kondiĉe ke ili pliboniĝu sufiĉe por atingi pli altan sferon. Sed en tiuj feliĉajn sferojn la egoismo kaj la fiero ne estas akceptataj; jen kial estas necese,

ke ĉiuj seniĝu je tiuj moralaj malsanoj, atingante pli altan ŝtupon per laboro kaj klopodo.

Ni scias, ke en iaj landoj la idiotoj, anstataŭ esti objekto de malŝato, ricevas bonefikajn zorgojn. Ĉu tiu kompato ne devenas de ia intuicio pri la vera stato de tiuj malfeliĉuloj, kiuj estas des pli indaj je atento, ĉar iliaj Spiritoj bone komprenas tiun situacion, pro tio, ke ili sin vidas forpelitaj el la socio? Oni eĉ konsideras, kiel favoron kaj veran benon, la ĉeeston de unu el tiuj estuloj en la sino de la familio.

Ĉu tio estas superstiĉo? Eble, ĉar ĉe nekleruloj superstiĉo intermiksiĝas kun plej sanktaj ideoj, tial ke ili ne kaptas ĝian signifon. Sed, kia ajn ĝi estos, al la geparencoj sin prezentas okazon fari karitaton, des pli meritan, ju pli peza al ili estos tiu tasko sen iu ajn materia kompenso. Estas pli granda indeco ĉe la afabla zorgado al malfeliĉa filo, ol ĉe la helpado al filo, kies kvalitoj oferas iun ajn kompenson. Ĉar la neprofitama karitato estas unu el la virtoj plej agrablaj al Dio, tial ĝi ĉiam altiras lian benon al tiuj, kiuj ĝin praktikas. Tiu sento denaska kaj spontanea valoras tiun preĝon: "Dankon, mia Dio, pro tio, ke vi donis al ni malfortikan estulon, kiun ni nutru, afliktiton, kiun ni konsolu."

## Adélaide-Marguerite Gosse

Ŝi estis humila kaj malriĉa servistino, el Harfleur, Normandio. En la aĝo de 11 jaroj ŝi ekservis ĉe riĉaj terkulturistoj en sia lando. Post unu jaro inundo de la rivero Sejno forprenis ĉiujn iliajn bestojn, ilin dronigante. Ankoraŭ pro aliaj postvenintaj malfeliĉaĵoj, la mastroj de la knabino falis en mizeron. Adélaide kuniĝis al ilia malfeliĉo, sufokis la voĉon de la egoismo, kaj, aŭskultante nur sia malavaran koron, devigis akcepti kvincent frankojn el ŝiaj ŝparaĵoj, servante plu al ili, sendepende de salajro. Post la morto de siaj gemastroj, ŝi komencis sin dediĉi al unu filino, kiun ili postlasis, vidvino kaj sen rimedoj. Ŝi laboregis sur la kampoj, rikoltis la produkton kaj, edziniĝinte, ŝi kunigis siajn klopodojn kun tiuj de la edzo, por kune subteni la kompatindan virinon, kiun ŝi daŭrigis nomadi sia mastrino! Ĉirkaŭ duonjarcenton

daŭris tiu sublima abnegacio. La Societo de Konkurado, el Rueno, ne forgesis tiun virinon indan je tiom da respekto kaj admiro; ĝi honoris ŝin per honormedalo kaj per ia mona rekompenco. La framasonaj loĝioj en Havre asociiĝis al tiu atesto de estimo, oferante al ŝi malgrandan monsumon destinitan por ŝia bonfarto.

Fine ankaŭ la tiea administracio interesiĝis pri ŝia sorto en delikata maniero, tiel ke ŝi ne estu ĉagrenita en sia sentemo. Atako de paralizo subite kaj milde forprenis de sur la Tero tiun bonfarantan estulinon. La lastaj omaĝoj faritaj al ŝi estis simplaj kaj decaj. La sekretario de la komunumo iris ĉe la antaŭaĵo de la funebra akompanantaro.

(Societo de Parizo, la 27an de Decembro 1861)

*Elvoko*: — Ni petas la Ĉiopovan Dion permesi al la Spirito de Marguerite Gosse komunikiĝi kun ni. — R. Jes, Dio bonvolis doni al mi tiun favoron.

— D. Ni estas tre feliĉaj pro tio, ke ni povas atesti al vi nian admiron pri via konduto sur la Tero, kaj ni esperas, ke vi ricevis rekompencon por tiom da abnegacio. — R. Jes, Dio estas bona kaj favorkora por sia servantino. Ĉio, kion mi faris, kaj kio al vi ŝajnas laŭdinda, estas tute natura.

— D. Ĉu vi povas diri al ni, por nia edifo, kia estas la kaŭzo de via humila kondiĉo sur la Tero? — R. En du sinsekvaj enkarniĝoj mi okupis tro altan pozicion; estis facile por mi praktiki bonon; tion mi faris sen ofero, ĉar mi estis riĉa. Sed al mi ŝajnis, ke mia progreso estas malrapida,kaj tial mi petis renaskiĝi en malriĉaj kondiĉoj, en kiuj mi devis mem lukti kontraŭ la seniĝoj. Por tio mi prepariĝis longan tempon, kaj Dio subtenis mian kuraĝon, tiel ke mi povis atingi la celon, kiun mi trudis al mi.

— D. Ĉu vi jam ree vidis viajn malnovajn gemastrojn? Diru al ni, kia estas situacio antaŭ ili, kaj ĉu

vi ankoraŭ vin konsideras ilia subulino? — R. Jes, mi ilin vidis, kiam mi venis en ĉi tiun mondon, ĉar ili ĉi tie troviĝis. Humile mi konfesas al vi, ke ili min konsideras kvazaŭ mi estus supera al ili.

— D. Ĉu vi havis ian motivon de alligiteco al ili, prefere ol al iuj aliaj? — R. Nenian motivon devigitan, ilin elektis por pagi dankoŝuldon. Iam ili estis bonvolemaj al mi, farinte al mi servojn.

— D. Laŭ via opinio, kia estonteco vin atendas? — R. Mi esperas reenkarniĝi en mondo, kie oni ne konas doloron. Eble vi opinias min pretendema, sed mi parolas al vi kun la vigleco propra al mia karaktero. Krom tio, mi submetiĝas al la volo de Dio.

— D. Dankaj pro via ĉeesto, ni ne dubas, ke Dio kovros vin per favoroj. — R. Dankon. Tiel Dio benu vin ĉiujn, por ke vi povu ĝui, kiam vi estos elkarniĝintaj, la purajn ĝojon, kiuj al mi estis donitaj.

## Clara Rivier

Ŝi estis knabino ĉirkaŭ dekjara, filino de kamparana familio el la Sudo de Francujo. Jam de 4 jaroj ŝi estis grave malsana. Dum ŝia vivo, neniam oni aŭdis de ŝi ian plendon, ian signon de senpacienco, kaj, kvankam ŝi havis nenian instruitecon, ŝi tamen konsoladis la familion ĉe ties afliktiteco, komentariante la estontan vivon kaj la feliĉon, kiu el ĝi rezultus. Ŝi elkarniĝis en Septembro 1862, post kvar tagoj da konvulsiaj torturoj, dum kiuj ŝi ne ĉesis preĝi. “Mi ne timas antaŭ la morto, ŝi diradis, ĉar post ĝi estas rezervita por mi feliĉa vivo.” Al sia ploranta patro ŝi diradis: “Konsolu vin, ĉar mi venos viziti vin; mi sentas, ke alproksimiĝas la horo, sed, kiam ĝi alvenos, tiam mi scios vin antaŭsciigi.” Efektive, kiam jam estis baldaŭa la fatala momento, ŝi venigis ĉiujn siajn familianojn kaj diris : “Mi havas nur kvin minutojn da vivo; donu al mi la manojn.” Kaj ŝi mortis, kiel ŝi antaŭvidis.

De tiam iu frapanta Spirito komencis viziti la domon de la familio Rivier: — li rompas ĉion, frapas sur tablon, skuas vestojn, kurtenojn, teleraron... Sub la formo de Clara li ekaperas al ŝia pli juna fratino, kiu estas nur kvinjara.

Laŭ aserto de tiu knabino, ŝia fratino ekaperas ofte, kaj tiuj aperaĵoj kaŭzas al ŝi ĝojkrioj, kiel: "Vidu, kiel bela estas Clara!"

1. *Elvoko.* — R. Ĉi tie mi estas preta respondi al vi.

2. — Estante tiel juna, kiam vi estis enkarniĝinta, de kie venadis al vi la altaj ideoj pri la estonta vivo, kiujn vi esprimadis en ĉi tiu mondo? — R. De mallonga tempo, kiun mi devis pasigi sur via planedo kaj de mia antaŭa enkarniĝo. Mi estis mediumino, kiam mi forlasis la Teron, kaj ankaŭ kiam mi revenis inter vin; antaŭdestinita, mi sentis kaj vidis tion, kion mi diradis.

3. — Kiel oni klarigu, ke iu infano en via aĝo ne aŭdigis eĉ unu plorĝemon dum kvar jaroj da suferado? — R. Ĉar tiu fizika sufero estis venkita de pli granda povo — tiu de mia gvidanto, senĉese videbla apud mi. Li samtempe min kvietigis kaj scipovis inspiri al mi ian persistemon superan al miaj suferoj.

4. — Kiel vi ekrimarkis la decidan momenton de via morto? — R. Sub la influo de mia gardanĝelo, kiu neniam trompis min.

5. — Vi petis al via patro, ke li rezignaciu, ĉar vi venos viziti lin. Kiel oni komprenu do, ke, animita de tiel bonaj sentoj por viaj gepatroj, vi poste venus ĝeni ilin per bruado, en ilia domo? — R. Sendube mi havas ja ian provon, aŭ plibone ian mision por plenumi. Ĉu vi kredas, ke mi venus vidi miajn gepatrojn tute sencele? Tiuj onidiroj, tiuj luktoj devenintaj de mia ĉeesto estas ia avizo. En tio mi estas bone helpata de aliaj Spiritoj, kies agitemo

havas sian pravon de ekzisto, same kiel mia aperado al mia fratineto havas sian pravon de ekzisto... Dank' al ni, multaj konvinkiĝoj ekburĝonos. Miaj gepatroj devis suferi ian provon. Tre frue ĝi pasos, sed nur post kiam ĝi konvinkos amason da personoj.

6. — Nu, ĉu ne estas vi mem, persone, la aŭtorino de tiuj agitadoj? — R. Mi estas helpata de aliaj Spiritoj servantaj miajn gepatrojn en la provado al ili rezervita.

7. — Kiel do oni komprenu, ke nur via fratineto vin rekonis, se vi ne estas la sola aŭtorino de tiaj manifestiĝoj? — R. Fakto estas, ke ŝi vidis nur min. Nun ŝi disponas je duobla vidado, kaj mi ankoraŭ devos plurfoje konsoli ŝin per mia ĉeesto.

8. — Kiu estis la kaŭzo de viaj turmentaj suferoj en tiel frua aĝo? — R. Antaŭaj eraroj, kulpelpago. En la antaŭa ekzistado mi misuzis la sanon kaj la brilan situacion, kiun mi okupis. Jen kial Dio diris al mi: "Vi ĝuis tro multe kaj senbride; vi do suferos proporcie al via ĝuado; vi estis orgojla, tial vi estos humila; ĉar vi estis fiera pri via beleco, estas necese, ke vi ĝin perdu, penante akiri karitemon kaj bonkorecon." Mi kondutis laŭ la dia volo, kaj mia gardanĝelo min helpis.

9. — Ĉu vi volas, ke ni diru ion al viaj gepatroj? — R. Laŭ peto de iu mediumo, ili jam havis la okazon praktiki karitaton ne preĝi nur per la lipoj, kaj ili agis bone, ĉar estas necese fari tion ankaŭ en la praktiko, per la koro. Helpi la suferantoj estas preĝi; kiu tiel agas, tiu estas spiritisto. Al ĉiuj animoj Dio donis liberan volon, t.e. kapablon progresi, same kiel Li donis al ili ĉiuj la saman aspiron, kaj tial, *pli ol oni ĝenerale opinias la antaŭtuko tuŝas la broditan togon*. Alproksimigu la distancojn per la karitato, donu azilon ĉe vi al la malriĉulo, reanimu lin, ne lin humiligu. Se tiu grava leĝo de la konscienco estus ĉie praktikata, la mondo periode ne vidus tiujn grandajn necesbezonojn, kiuj malhonoras la

civilizacion de la popoloj, necesbezonojn, kiujn Dio sendas por ilin puni kaj malfermi al ili la okulojn. Karaj gepatroj, preĝu. Amu unu alian, praktiku la leĝon de la Kristo: Ne faru al aliaj tion, kion vi ne volas, ke oni faru al vi. Preĝu al Dio, kiu vin provas, kaj montru, ke via boneco estas sankta kaj senlima, kiel Li mem. Kiel antaŭzorgo por la estonteco, fortigu vin per kuraĝo kaj persistemo, ĉar vi estas vokitaj ankoraŭ suferi. Estas necese fariĝi inda je bona pozicio en pli bona mondo, kie la komprenado de la dia justeco fariĝas puno por malbonaj Spiritoj.

Karaj gepatroj, mi estos ĉiam proksime de vi. Adiaŭ, aŭ prefere, ĝis revido. Havu rezignacion, karitaton, amon al viaj similuloj, kaj unu tagon vi estos feliĉaj.

*Clara*

"Pli ol oni ĝenerale opinias, la antaŭtuko tuŝas la broditan togon..." Ĉi tiu ĉarma figuro estas aludo al la Spiritoj kiuj en unu aŭ alia ekzistado iras de brilaj al humilegaj kondiĉoj, plurfoje elpagante le misuzon de la kapabloj, kiujn Dio donis al ili.

Tiu justeco estas ja atingebla por ĉiuj.

Profunda estas ankaŭ tiu penso, kiu atribuas la kolektivajn malfeliĉegojn al malobeo al la diaj leĝoj, ĉar Dio punas tiel la popolojn, kiel la individuojn. Efektive, per praktiko de karitato, militoj kaj mizeroj nepre estus forigitaj. Nu bone, la praktiko de tiu leĝo kondukas al Spiritismo, kaj kiu scias, ĉu tiu ne estas la kaŭzo, kial ĝi havas tiel multajn kaj tiel terurajn malamikojn? Ĉu la admonoj de tiu filino al la gepatroj eble estas tiuj de ia demono?

## Françoise Vernhes

Blinda de naskiĝo kaj filino de farmisto el la ĉirkaŭaĵo de Toulouse. Ŝi mortis en 1855, en la aĝo de 45 jaroj.

Ŝi ofte okupiĝis pri instruado de katekismo al infanoj, preparante ilin por la unua komunio.

Post ŝanĝo de la katekismo, ŝi havis nenian malfacilecon ĉe la instruado de la nova, ĉar ŝi konis ilin ambaŭ parkere. En ia vintra posttagmezo, revenante de ekskurso

en kompanio de iu onklino, ili devis trairi sur kotaj vojoj malhelan arbaron. Estis necesa plej granda singardo, por ke la du virinoj ne enfalis en kavojn. Ĉar ŝia onklino volis konduki ŝin je la mano, ŝi diris: "Ne ĝenu vin pri mi; mi nenion riskas, ĉar mi havas sur la ŝultro ian lumon, kiu gvidas min. Sekvu min; mi vin kondukos." Tiel ili finis la vojiradon sen iu ajn akcidento; la blindulino kondukis la onklinon, kiu havas bonajn okulojn.

Elvoko en Parizo, em Majo 1865:

— D. Ĉu vi volas diri al ni, kia estis tiu lumo, kiu vin gvidis en tiu malluma nokto, kaj kiu estis vidata nur de vi? — R. Kiel! Ĉu personoj, kiel vi, en kontinuaj interrilatoj kun Spiritoj, bezonas eksplikon pri tia fakto? Gvidis min ja mia gardanĝelo.

— D. Tiu estis ankaŭ nia opinio, sed ni deziris vidi ĝin konfirmata. Sed ĉu vi sciis, en tiu tempo, ke via gardanta anĝelo vin kondukadis? — R. Mi konfesas, ke ne, kvankam mi kredis al ia ĉiela interveno. Mi preĝis multe da tempo, por ke la ĉiela Patro min kompatu... Estas tiel kruela la blindeco... Jes, ĝi estas tre kruela, sed mi ankaŭ rekonas, ke ĝi estas justa.

"Kiuj pekas per la okuloj, tiuj per ili devas esti punitaj; kaj tiel devas okazi rilate al ĉiuj aliaj kapabloj de la homo, lin kondukantaj al misuzo. Ne serĉu do en la sennombraj homaj suferoj alian kaŭzon, kiu ne estu ilia propra kaj natura, nome la kulpelpago.

Ĉi tiu kulpelpago tamen nur estas merita se humile elportata, kaj ĝi povas esti faciligata per preĝo, per altiro de spiritaj influoj, kiuj, protektante la akuzitojn en la *homa punmalliberejo*, al ili inspiras esperon kaj konsolon.

— D. Vi dediĉis vin al la instruado de malriĉaj infanoj; ĉu vi havis malfacilaĵon ĉe la akirado de konoj pri la nova katekismo, kiam oni ŝanĝis ĝin? — R. Ordinare la blinduloj havas aliajn duoblajn sentumojn, por tiel

diri. La observado ne estas unu el la pli malgrandaj kapabloj de ilia naturo.

La memorkapablo estas por ili ia ŝranko, kie oni metas bonorde kaj por ĉiam, la instruojn rilatajn al iliaj kapabloj kaj inklinoj. Kaj pro tio, ke nenio ekstera povas konfuzi tiun kapablon, ilia elvolviĝo per edukado povas esti rimarkinda. Rilate al mi, mi dankas Dion pro tio, ke Li permesis, ke tia kapablo ebligu al mi plenumi mian mision apud tiuj infanoj, kio estis ankaŭ ia riparado de la malbona ekzemplo, kiun mi donis al ili en antaŭa ekzistado. Por la spiritistoj ĉio estas serioza temo; por certigi tion, sufiĉas, ke ili rigardu ĉirkaŭ si. Miaj lecionoj eble estus pli utilaj al ili, ol se ili lasus sin konduki de la filozofiaj subtilaĵoj de certaj Spiritoj, kiuj sin amuzas per flatado de ilia fiero per frazoj tiel bombastaj, kiel sensencaj.

— D. El via surtera konduto ni havis pruvon pri via morala progreso, kaj nun, el via parolmaniero, ni havas pruvon pri tio, ke via progreso estas ankaŭ intelekta. — R. Al mi restas multe por akiri; sed sur la Tero estas multaj personoj, kiuj estas rigardataj kiel nekleraj, nur pro tio, ke ilia intelekto estas malakrigita de kulpelpago. Per la morto ŝiriĝas la vualo kaj la nesciantoj ofte estas pli kleraj ol tiuj, kiuj malŝatis ilian nescion. Kredu, ke fiero estas provilo por la homa kono.

Ĉiuj, kiuj havas koron alireblan por flatado, kaj kiuj tro fidas al sia sciaro, estas sur malbona vojo; ordinare ili estas hipokritaj, kaj tial ilin malfidu.

Estu humila, kiel la Kristo, kaj, kiel li, ame portu vian krucon, por ke vi supreniru en la regnon de la ĉieloj."

*Françoise Vernhes*

## Anna Bitter

La perdo de adorata filo estas motivo de akra afliktiĝo, sed vidi la solfilon, celon de ĉiuj esperoj, ricevanton de ĉiuj amoj, konsumiĝi videble kaj sensufere pro nekonataj kaŭzoj, pro unu el tiuj kapricoj de la Naturo, mokantaj

la Sciencon, kaj, post la elĉerpiĝo de ĉiuj rimedoj, ne havigi al si kompense eĉ unu esperon; elporti tiun angoron ĉiumomente, dum longaj jaroj, kaj ne antaŭvidi ĝian finon, tio estas kruela turmento, kiun riĉaĵo pligravigas anstataŭ faciligi, pro la neeblo vidi ĝin ĝuata de la adorata estulo.

Tia estis la situacio de la patro de Anna Bitter, kiu tial forlasis sin al intima malespero. Lia karaktero koleriĝis antaŭ tia sceno, kiu ŝiris lian koron kaj ties sekvoj ne povis ne esti fatalaj, kvankam malprecizaj. Iu amiko de la familio, adepto de Spiritismo, opiniis, ke li devas demandi pri tio la spiritan gvidanton, kaj li ricevis la jenan repondon:

“Mi tre deziras klarigi al vi la aferon, kiu nun vin priokupas, ĉar mi scias, ke vi ne venas al mi pro maldiskreta scivolemo, sed pro la intereso, kiun tiu kompatinda filino inspiras al vi, kaj ankaŭ pro tio, ke, kredante al la dia justeco, vi nur gajnos el tio. Ĉiuj, kiuj portas en si la justecon de la Sinjoro, devas klini sian frunton sen malbenoj kaj ribeloj, ĉar ne ekzistas puno senkaŭza. La kompatinda filino, kies verdikto de morto estis prokrastita de Dio, baldaŭ devos eniri en nian medion, ĉar ŝi meritis la dian kompaton; koncerne ŝian patron, tiu malfeliĉa viro devas esti punata ĉe la sola alligiteco de sia vivo, ĉar li mokis la fidon kaj la sentojn de ĉiuj lin ĉirkaŭantaj. Dum sekundoj lia pento tuŝis la Ĉiopovan, kaj la morto ne donis baton al estulino, kiu al li estis tiel kara; sed la ribelemo venis tuj, kaj la puno ĉiam ĝin akompanas. En tiuj kondiĉoj, ankoraŭ estas feliĉo esti punata en tiu mondo! Miaj amikoj, preĝu por tiu kompatinda filino, kies junaĝo malfaciligos ŝiajn lastajn momentojn. En tiu estulino la vivosuko estas tiel abunda, ke, malgraŭ ĝia organa malfortikeco, ŝia animo havos malfacilaĵon disiĝi. Ho! preĝu... Poste ankaŭ ŝi vin helpos kaj konsolos, ĉar ŝia Spirito estas pli progresinta ol tiuj, kiuj ŝin ĉirkaŭas. Por ke ŝia disiĝo estu faciligata, koncernis min, kiel speciala favoro de la Sinjoro, instrui vin tiurilate.”

Spertinte la izolitecon, la patro de Anna Bitter mortis. Jen estas la unuaj komunikaĵoj, kiujn unu kaj dua donis post siaj respektivaj elkarniĝoj:

*De la filino*. "Dankon, mia amiko, pro via propeto pro tiu infano, kaj ankaŭ pro tio, ke vi sekvis la konsilojn de via bona gvidanto. Jes. Dank' al viaj preĝoj, estis al mi pli facile lasi la surteran envolvaĵon, ĉar mia patro... Ha! tiu ne preĝis, nur malbenis! Mi tamen ne malamas lin pro tio: — rezulto de lia granda amo al mi. Mi petas Dion doni lumon al li antaŭ la morto; kaj, rilate al mi, mi lin instigas kaj animas, ĉar koncernas min la misio faciligi liajn lastajn momentojn. Iafoje ŝajnas al mi, ke dia lumradio falas sur lin kaj eĉ lin kortuŝas; sed tio estas nenio pli ol pasema heleco, tuj lin fordonanta al la primitivaj ideoj. Li portas en si unu ĝermon de fido, sed de fido tiel sufokita de la mondumaj interesoj, ke ĝi nur povas maturiĝi per novaj kaj pli turmentaj provoj. Rilate al mi, mi nur devis elporti ian reston de provo, de kulpelaĉeto, kaj tiel ĝi estis nek tre dolora, nek tre malfacila. Mia stranga malsano ne okazigis suferojn; mi estis kvazaŭa instrumento de provo de mia patro, kiu, vidante min en tia stato, suferis pli ol mi mem. Krom tio, mi estis rezignacia, kaj li ne. Hodiaŭ mi estas rekompencita. Dio kompleze mallongigis mian restadon sur la Tero, pro kio cetere mi Lin dankas. Mi estas feliĉa inter la bonaj Spiritoj min ĉirkaŭantaj, kaj ni ĉiuj ĝoje plenumas niajn devojn, tial ke la neaktiveco estus kruela martireco."

*La Patro* (unu monaton post la morto). — Elvokante vin, ni celas informiĝi pri via situacio en la spirita mondo kaj esti utilaj al vi, laŭ niaj fortoj. — R. Spirita mondo? Mi ne vidas ĝin... Kion mi vidas, tio estas konataj homoj, kiuj ne priokupiĝas pri mi nek priploras mian sorton, sed male ili ŝajnas ĝojaj, vidante sin liberaj de mi.

— D. Sed ĉu vi faras ĝustan ideon pri via situacio? — R. Jes, dum kelka tempo mi pensadis, ke mi ankoraŭ estas en via mondo, sed hodiaŭ mi scias tre bone, ke mi ne plu apartenas al ĝi.

— D. Kial do vi ne povas duonvidi aliajn Spiritojn, kiuj vin ĉirkaŭas? — R. Mi tion nescias, kvankam ĉio estas tre klara ĉirkaŭ mi.

— D. Ĉu vi ankoraŭ ne vidis vian filinon? — R. Ne, ŝi mortis; mi serĉas, vokas ŝin vane. Kian teruran malplenon ŝia morto postlasis al mi sur la Tero! Mortinte, mi esperis ŝin renkonti, sed vane! Izoliteco ĉiam kaj ĉiam! Neniu direktas al mi eĉ unu vorton de konsolo kaj espero. Adiaŭ, mi iras serĉi mian filinon.

*La gvidanto de la mediumo*. Tiu viro ne estis ateisto nek materialisto, sed li apartenis al la nombro de tiuj, kiuj kredas heziteme, ne priokupiĝante pri Dio kaj pri la estonteco, ĉar ili estas ravitaj de la surteraj interesoj. Profunde egoisma, li ĉion oferus por savi la filinon, sed ankaŭ sen la minimuma skrupulo li oferus la aliulajn interesojn por persona profito. Li interesiĝis pri neniu, krom pri sia filino. Dio punis lin tiel, kiel vi vidis, forprenante de sur la Tero lian solan konsolon, kaj tial, ke li ne pentis, la forpreno daŭras plu en la spirita mondo. Ĉar li interesiĝis pri neniu tie, ankaŭ ĉi tie neniu interesiĝas pri li. Li restas sola, izolita, forlasita, kaj en tio konsistas lia puno. Sed, kion li faras en tiu situacio? Ĉu li direktiĝas al Dio? Ĉu li pentas? Ne; li ĉiam murmuras, eĉ blasfemas, resume faras tion, kion li faris sur la Tero. Per preĝo kaj konsilo helpu do lin liberigi de sia blindeco.

## Joseph Maître, la blindulo

Li apartenis al la meza klaso de la socio kaj ĝuis modestan riĉaĵon, kiu ŝirmis lin de necesbezono. Liaj gepatroj destinis lin por industrio kaj donis al li bonan edukon, sed en la aĝo de 20 jaroj li perdis la vidkapablon. Ĉirkaŭ 50-jara li mortis, en 1845. Antaŭ dek jaroj li spertis alian malsanon, kiu faris lin surda, tiel ke nur per palpado li rilatis al la mondo de la enkarniĝintoj. Nu bone, ne vidi jam estas turmentiĝo; ne vidi kaj ne aŭdi estas duobla turmentiĝo, precipe por tiu, kiu devos elporti tiun duoblan seniĝon, post kiam li ĝuis la kapabl-

ojn de tiuj sentumoj. Kiu estis la kaŭzo de tiel kruela sorto? Certe ne lia lasta ekzistado, ĉiam karakterizita de modela konduto. Fakte li estis ĉiam bona filo, de karaktero afabla kaj bonvola, kaj kiam plie li vidis sin senigita je aŭdado, li akceptis rezignacie, sen unu plendo, tiun provon. El lia konversacio oni perceptis pro la mensklareco de lia Spirito ian eksterordinaran inteligenton. Iu persono lin koninta, dezirante ricevi utilajn instruojn, elvokis lian Spiriton kaj havigis al si la jenan mesaĝon, responde al la demandoj faritaj:

(Parizo, 1863)

"Mi dankas vin, miaj amikoj, pro tio, ke vi memoras min. Povas esti, ke tio ne okazus sen supozo de profito el mia komunikaĵo, sed eĉ tiel mi estas certa, ke seriozaj motivoj vin animas kaj jen kial mi plezure aŭskultas vian alvokon, kaj mi sentas min feliĉa pro tio, ke oni bonvolis permesi al mi vin instrui. Tiamaniere mia ekzemplo povu aldoniĝi al la multenombraj pruvoj, kiujn la Spiritoj donas al vi pri la justeco de Dio. Vi konis min blinda kaj surda, kaj vi tuj penis scii la kaŭzon de tia destino.

Mi diras ĝin al vi. Antaŭ ĉio estas necese diri, ke la duan fojon mi kulpelpagis per seniĝo je la vidado. En mia antaŭa ekzistado, komence de la lasta jarcento, mi blindiĝis en la aĝo de 30 jaroj, kiel rezulto de ĉiaspecaj ekscesoj, kiuj, difektante mian sanon, malfortikigis al mi la organismon. Ĝi jam estis puno pro la misuzo de la kapabloj, kiujn la Providenco malavare donis al mi. Sed anstataŭ atribui al mi la originan kaŭzon de tiu malsano, mi preferis akuzi la Providencon, kiun cetere mi malmulte fidis. Mi anatemis Dion, Lin forneis. Lin akuzis, aldonante, ke se Li eble ekzistus, Li devus esti maljusta kaj malbona, pro tio, ke li lasis siajn kreitojn tiom suferi. Mi tamen devus opinii min feliĉa, ne estante devigita almozi pri mia pano, kontraŭe al tio, kio okazis al tiel multaj blinduloj. Sed ne; mi pensadis nur pri mi, pri la seniĝo je plezuroj, kiun oni trudis al mi. Sub la influo de tiaj ideoj, kiujn skeptikeco pli ardigis, mi fariĝis furioza, postulema,

resume netolerebla por tiuj, kiuj intime kunvivadis kun mi. Krom tio, la vivo estis por mi io sencela, ĉar mi ne pensis pri la estonteco — ia ĥimero. Post kiam mi vane eluzis la rimedojn de la Scienco kaj mia resaniĝo estis konsiderata neebla, mi decidis anticipi mian morton: mi min mortigis. Kia vekiĝo tiam estis la mia, kiam mi sentis min envolvita en la samaj mallumoj de la vivo! Sed ne tre malfruis la konsciiĝo pri mia situacio, pri mia transiro al la spirita mondo. Mi estis Spirito certe, sed blinda. La transtomba vivo fariĝis realaĵo por mi! Mi penis eviti ĝin, sed vane... Malplenaĵo min ĉirkaŭis. Laŭ onidiro tiu vivo devus esti eterna, kaj, kiel ĝi, ankaŭ mia situacio. Abomena ideo! Mi ne suferadis, sed estas neeble priskribi la spiritajn afliktiĝojn kaj turmentojn spertitajn de mi. Kiom da tempo ili daŭris? Mi ĝin nescias... Sed kiel longa ŝajnis al mi tiu tempo! Konsumita, laca mi fine povis esplori min mem kaj kompreni la superregadon de ia supera potenco aganta sur min, kaj mi konstatis, ke, se tiu potenco povis min subpremi, ĝi ankaŭ povis min kvietigi. Kaj mi petegis pri kompato. Laŭmezure kiel mi preĝis kaj pliiĝis mia fervoro, iu diradis al mi, ke mia situacio havos limon. Fine fariĝis lumo, kaj grandega estis mia raviteco, kiam mi ekvidis la ĉielan helecon kaj distingis la Spiritojn, kiuj min ĉirkaŭis, ridetantaj, bonvolemaj, kaj ankaŭ tiujn, kiuj brilegaj, ŝvebis en la Spaco. Kiam mi volis iri post ili, nevidebla forto retenis, min. Tiam unu el ili diris al mi: "La Dio, kiun vi forneis, kompatis vin pro via pento kaj permesis al ni doni al vi lumon, sed vi cedis nur per sufero, per laciĝo. Se vi volas de nun partopreni en ĉi tiu feliĉo, kiun oni ĝuas ĉi tie, estas necese, ke vi pruvu la sincerecon de via pento, viajn bonajn intencojn, rekomencante la surterajn provojn *en kondiĉoj inklinigantaj vin al la samaj eraroj*, ĉar ĉi tiu nova provo estos pli severa ol la lasta." Mi rapide konsentis, promesante ne plu erari. Tiel mi revenis al la Tero en la kondiĉoj, kiujn vi scias. Al mi ne estis malfacile fariĝi bona, ĉar mi ne estis malbona pro naturo; mi estis ribelinta kontraŭ Dio, kaj Dio min punis. Mi reenkarniĝis kun *denaska fido*, motivo, kial mi ne murmuris, sed male

mi rezignacie akceptis la duoblan malsanon, ĉar ĝi estas kulpelaĉeto devenanta de la superega justeco. La izoliteco de miaj lastaj jaroj estis neniom senesperiga, ĉar ĝi inspiradis al mi fidon al la estonteco kaj al la kompato de Dio. Plie tiu izoliteco estis profita por mi, ĉar dum la longa silenta nokto mia animo sin levis pli libere al la Sinjoro, duonvidante per la penso la senfinon. Kiam laste finiĝis la ekzilo, la spirita mondo havigis al mi nur brilegojn, nur neesprimeblajn plezurojn. Rerigardo al la pasinteco igas min trovi relative feliĉa mian nunan situacion, pro kio mi dankas Dion: kiam mi tamen rigardas al la estonteco, mi vidas la grandan distancon, kiu ankoraŭ apartigas min de la kompleta feliĉo. Kvankam mi jam kulpelpagis, *mi tamen ankoraŭ devas fari riparon. La lasta enkarniĝo esti profita nur por mi*, kaj tiel mi esperas baldaŭ rekomenci ekzistadon, kiu permesu al mi esti utila al la proksimulo, tiamaniere riparante mian antaŭan senutilecon. Nur tiel mi antaŭeniros sur la bona vojo ĉiam malfermita al la bonvolemaj Spiritoj.

Jen estas mia historio, amikoj; se mia ekzemplo povos nobligi iujn ajn el miaj enkarniĝintaj fratoj, tiel ke ili evitu la malbonan agon, kiun mi faris, tiam mi konsideros komencita la pagon de miaj ŝuldoj."

*Joseph*